

JULIO BAGHY

HURA!



Julius Bagby

Bonvola avertu :

*Surventre kuŝantoj antaŭ la mon',
ĉi tiu verko parolas pri vi ;
ne legu do ĝin !*

*Al revantoj pri la nova Homo
dediĉas kore*

la aŭtoro

JULIO BAGHY

HURA!

NE ROMANO, NUR GRIMACO.

Prof. MIECZ. SYGNARSKI
Ex Libris

L. 83



Eldonis :
LITERATURA MONDO, BUDAPEST 1930
IX., Boráros tér 6, IV., 11.


ĈIU RAJTO, EĈ TIU DE LA FILMIGO, REZER-
VITAJ ĈE LA AUTORO.

Esper. 444 I



5-18778

PRESEJO LITERATURA MONDO BUDAPEST 1930.



UNUA PARTO:
VULTURHOMO

Antaŭparolo por postparolantoj

Al samsortanoj, fratoj kaj fratinoj en la granda mondo, kies koron vundas la dornoj de la Nuntempo, kun samideana solidareco mi dediĉis tiun ĉi verkon. Ili komprenus la verkon sen ia ajn antaŭparolo, ĉar la vojoj de la revantoj povas esti tre diferencaj, sed la celo sensange restas la sama: *novan etikon por la nova Homo de la pli bela estonteco.*

Al postparolantoj mi direktas miajn vortojn. Al tiuj, kiuj legas ĉiun verkon de sendependa verkisto tra binoklo de dogmoj, ĉu politikaj, ĉu religiaj aŭ sidante ĉe pupitro de iu difinita literatura skolo sekciaj kaj nur sekciaj ĝin laŭ la oficiale enregistritaj reguloj. Ho ve' al la verkisto aŭ al la poeto, se li transpaŝas la limojn, rigore faritajn de la literaturaj parazitaj kaj se la tendenco de la verko ne trafas certan politikan aŭ religian mondpercepton kaj milfoje ve' al la malfeliĉa artisto, se li kuraĝas prezenti la vivon laŭ kurba spegulo, priskribi karakterojn, okazintaĵojn karikaturaj, nerealaj, troidealistaj!

Pri ĉio ĉi mi konsciis kaj pro tio mi turnas min kun modesta peto al vi, postparolantoj: flankenmetu la binoklon, forlasu la pupitron kaj aŭskultu

min dum kelkaj minutoj ! Vi vane serĉos propagandon de tendencoj en la verko kaj vane volos retrovi certan literaturan skolon en la koncipa laboro. Por la unuaj mi ne ĵuras kaj la diversajn skolojn mi neglektas. Kial ? Facile respondi.

Estas doloroj sen larmoj, plezuroj sen rido, kiam la animo plenplena de sentoj povas nur grimaci kaj nur grimaci. Sinsekvaj seniluziigoj, sufokaj sentoj premas la koron, la vivanta realeco turmentas kaj nek ploro, nek rido povas faciligi la langvoran humoron. Kion fari do ? Rifugi al la fabellando de la infanoj por elverŝi la doloron, vengemon, furiozon, torturan ironion kaj teksi samtempe esperdonajn revojn, krei songohomojn kaj post ĉio luli, luli la baraktantan animon ĝis retranskviligo.

Nu, tion mi faris en tiu ĉi verko. Ne rakonton, ne romanon mi verkis, sed mi teksis fabelon el fadenoj de senlarmaj doloroj kaj senridaj plezuroj. Fantazian historion mi surpaperigis, ĉar mia animo, katenita al la marĉo de la ĉiutagoj, baraktas ; ĉar la Homo de la Hodiaŭo kredas sole al la materialismo, kvankam ĝi sola ne havas savantan forton ; ĉar la nuna Homo estas malkuraĝa por mediti kaj malforta por kredi kaj fine mi verkis, ĉar mi hontas, ke mi estas homo kaj ĉar mi tutkore amas la Homon. Jen, tiel mi staras antaŭ via tribunalo, postparolantoj !

Tre verŝajne la historieto ŝajnos kelkloke iom reala, sed ĉu la plej fantazia fabelo ne entenas iom da realeco ? Sed jes ! Ĝuste pro tio la infanoj pensas la fabelon vera. Kaj tiel estas bone, tiel ĝi povas havi edukan efikon. Certe, la enhavo de mia fabelo kelkloke vekos naŭzon — mi volis ja tion — sed vi ĝoju

pro tio ; alifoje ĝi kortuŝos vin, vekos pensojn, belajn sentojn en vi kaj por momento vi kredos la naivaĵojn, sed ne hontu, eĉ ĝoju kaj estu fieraj pri via infananimeco. La infananimuloj estis kaj estas ĉiam la pioniroj de la progreso, torĉportantoj de la kulturo. Ho, plenaĝaj infanoj, vi estas la plibeligantoj de la realeco!

Al la tria speco de la legantoj (ĉar ekzistas eĉ triaspeca!) mi diras nenion, sed simple pardonos riproĉojn, kalumniojn, malican kritikon, prudecon, plenblovitecon, ĉar — sincere konfesante — mi kruele trompiĝus pri ili, se mia verko trovus ĉe ili — *komprenon*. Evidente, ke ĝiskole sidante en la ŝlimo de bagatelaj interesoj ili povas kompreni ĉion, escepte homajn doloron kaj revojn, ĉar ili konas nur la literojn, la leksikologian sencon de la vortoj, sed legi — ho, tre domaĝe! — legi ili ne povas.

Budapest, dum Junio 1930.

Julio Zaghy

La sekretario de la Ĉefurba Orfeono kaj la impresario de la mondfama dresisto Vilhelmo Grauer sidigis inter si en la aŭtomobilo la junan Grauer, ĵus alvenintan el Berlin. La aŭto ekmovigis. La tri sinjoroj, vestitaj en nigra uniformo de la funebro, rigide senmove kaj senvorte rigardis antaŭ sin. La trajtojn de la sekretario ŝtonigis la oficiala funebro de la Orfeono. La mieno de la impresario respogulis pli da zorgoj pro la necerta estonteco ol doloron pro la morto de la iama ĉefo. Gena silento turmentis ilin ambaŭ. En la kapo de ambaŭ sinjoroj zigzagis sola penso kun granda demandsigno : kiel komenci ?

La juna Grauer ŝtele rigardis jen dekstren jen maldekstren por konatigi kun la rapide preterlasataj vidindaĵoj de la nekonata urbo Strutmagen. Ĉio interesis lin. Li imagis ja ne tia la ĉefurbon de lando, kvankam verdire, tiu ĉi lando estas preskaŭ ne signifa. *Bagonio*. Kiu lernis ion pri ĝi en la geografio ? Aŭ ĝi estas nove kreita lando ? Li ne sciis, sed la scivolo ne tre turmentis lin. Sufiĉe, ke la vagonaro portis lin ĉi tien. Entute li miris, ke li entreprenis la vojaĝon. Sub la masko de lia fila funebro kaŝigis indiferenteco. La afero tedis lin, ĉar ĝi devigis lin kaj la aliajn hipokriti pro sociaj konvenaĵoj. La subita morto de lia patro apenaŭ tuŝis lin. Li havis ioman intereson sole por la financa parto. Onidire la maljunulo estis riĉegulo. La testamento de la patro . . .

Strange ekstravaganca estis lia patro. Antaŭ dekkvin jaroj li renkontis lin eble la unuan fojon, sed certe la lastan fojon. Tiam la juna Grauer ankoraŭ estis gimnaziano, apenaŭ dekjara knabo. Tiu-tempe li loĝis en instituto. Dum longaj jaroj neniu vizitis lin. Ofte eĉ la someran libertempon li pasigis inter la muroj de la severa konstruaĵo. Foje venis iu, kiu volis vidi lin. Onidire la — patro. La impresio de la renkontiĝo restis neforviŝebla en la koro de la filo. Ho, kiel freneze batetadis lia infana koro dum la vestado, dum la alkonduko, ĉe la sojlo de la salono ! Li promesis mil kisojn al la nekonata viro kaj post la transpaŝo de la sojlo liaj revoj dronis en la kruda realeco.

En la mezo de la salono staris severmiena grizhara viro. Nenia emocio, nek alvoka rideto ĉe la renkonto. Per energia gesto li forpermesis la instruiston, kiu kondukis la junan Grauer en la salonon. La instruisto tre humile, profunde klinante sin senbrue forlasis la ĉambron. La patro kaj filo restis en intima duopo. La juna Grauer proksimiĝis al sia patro por kisi lian manon, sed tiu subite ŝovis ĝin en la poŝon.

— Eksidu ! — komencis li kaj la filo iom tremante eksidis sur la proponitan fotelon. — Ĉu vi estas Cezaro Grauer ?

— Jes, oni nomas min tiel... kaj vi estas mia patro... ĉu ne ?

— Ĉu vi estas sana ? — daŭrigis la severa viro, kvazaŭ li tute ne atentus pri la demando. — Espereble, vi estas sana kaj ŝatas lernadi.

— Jes.

— Nu, bone. Mi venis por diri al vi, ke mi zorgos pri via estonteco. Ĉu komprenite ?

— Jes.

— Nu, tiam ni estas en ordo. Vi povas foriri.

— Jes, — respondis obeeme la timigita knabo kaj ekiris al la pordo, sed tie prenante kuragon li returnis sin. — Paĉjo, kial vi koleras min ?

La demando videble surprizis la maljunan Grauer. Momenton li hezitis kaj poste iom mildigante la tonon demandis :

— Kial ? Mi tute ne koleras vin. La profesoroj estas kontentaj pri vi, mi mem vidas, ke vi ŝajnas esti brava knabo. Espereble vi fariĝos forta, sana kaj tre saĝa viro. Kial koleri ?

— Almenaŭ permesu, ke mi kisu vian manon... Vi ne scias ja kiomfoje mi revadis pri vi kaj pri patrino mia...

— Revadi ne bezone, malutile, danĝere... Cetere, inter viroj ridinda estas la mankisado. Jen, prenu la manon kaj finite !

Li etendis manon al la knabeto, kiu per ambaŭ manoj ekkaptis ĝin kaj premadis longe... longe. La larmoj en liaj okuloj atestis pri sentotorento, malfacile retenita. Sur la tremantaj lipoj vibris la haltigitaj vortoj.

— Nu, jen... Vi povas reveni jam al via ĉambro. Estu trankvila, mi zorgos pri vi kaj...

— Nur unu, unu demandon permesu... Ne pelu min for de vi sen certa scio!... Ĉu mia... mia kara panjo vivas ankoraŭ?... Mi vidas ŝin ofte en miaj sonĝoj.

La trajtoj de sinjoro Grauer kvazaŭ ŝtoniĝis, sed nur por momento. Li regadis siajn pensojn kaj kun seka tono donis la informojn.

— Ne ! Ŝi mortis antaŭ multaj jaroj. Vi ne povas rememori pri ŝi... Kaj lasu la sonĝojn ! Ili mensogas. Ĉu vi komprenas ? La sonĝoj ĉiam mensogas kaj detruas la homan vivon... Cetere, kiel aspektis via patrino en la sonĝoj ?

— Kiel ŝi aspektis en la vivo, — komencis la knabo — ĉar mi rememoras pri ŝi. Mi vidis ŝin ja antaŭ ses jaroj, kiam ŝi vizitis min en tiu instituto, kie tiutempe mi estis vartata kun multaj malgrandaj infanoj. Mi rememoras pri ŝiaj milda voĉo, pala vizago

kaj malgrasaj, preskaŭ diafanaj manetoj. Sia kareso restos vivanta rememoro pri ŝi...

Sinjoro Grauer subite elŝiris sian manon el la infanaj manetoj.

— Aŭskultu, Cezaro Grauer... Via patrino jam ne vivas. Viaj songoj mensogas. Mi devas konfesi, ke foje vi vidis vian patrinon tute hazarde, sed ŝi ne estis tiu virino, kiu spite al mia malpermeso vizitis vin en la instituto. Por vi sufiĉas scii tiom. Nu, revenu al via ĉambro! Mi havas pritraktotajn aferojn por la sinjoro direktoro.

Fininte la parolon li turnis sin al la fenestro kaj la juna knabo kun retenita ploro forlasis la salonon. Neniam plu li renkontis sian patron. La sola ligilo inter ili evidentiĝis en tiu ĉeko, kiun kvaronjare la patra prizorgo subskribis kaj sendis al la filo. La kvitanca subskribo restis en la banko. Tiamaniere la patro neniam havis okazon vidi lian skribon. Dum la postaj jaroj ili zorge evitis unu la alian. Antaŭ ses jaroj la filo ricevis bone salajratan postenon ĉe granda firmo en *Berlin*. Tiutempe proponis sin la okazo por renkonto, sed la ĉefo de la firmo neatendite sendis lin al *Madrid* pro negocaj aferoj. Antaŭ du jaroj krie koloraj afiŝoj anoncis la gastroladon de la mondfama Vilhelmo Grauer en la Berlina Orfeono. Tiam la filo volonte evitis la okazon kaj vojaĝis al silenta provinca urbo por pasigi sian ferion for de la metropola bruo. En la interrilato de la patro kaj la filo kaŝiĝis sekreto, el kiu ĝermis, kreskis stranga mal-simpatio, poste indiferenteco. Nur pro socia konveneco li cedis al la telegramo, kiu anoncis la morton de la patro kaj vokis lin al la enterigo.

La aŭtomobilo jam trakuris kelkajn stratojn kaj bulvardojn. La ĝena silento tedis la junan Grauer. Por komenci la paroladon li ektusis.

— La aŭtuna nebulo jam estas sentebla, — rimarkis tuj la sekretario.

— Jes, jes... Oni tre facile povas malvarmumi en tia vetero, — la kaponvoĉa impresario rapidis akiri kontakton al la konversacio kaj suprenfaldis la peltan kolumon de sia surtuto.

— Jes, jes, — la juna Grauer nekonvinkite aprobis kaj post momento li turnis sin al la sekretario. — Kien ni iras ?

— Al la Orfeono. La katafalkon la direktoraro starigis en la ornamita vestiblo. Ni ne ŝparis. Ni mendis unuarangan enterigon.

— Al tia mondfama artisto, kia estis Vilhelmo Grauer, decas vera pompo. Granda perdo por la internacia artistaro ! — kaj la impresario ekĝemis tiel profunde, kiel la malsana pulmo permesis al li. En tiu ĉi ĝemo esprimiĝis lia lamento pri la perdo de la labordonanto kaj pri la nebula estonteco. Ankaŭ lin ne simpatio, sed nura intereso ligis al la fama artisto, kiu ne havis amikojn kaj kiun neniu amis.

— La katafalko staras do en la vestiblo... Nu, bone, — diris Grauer nur por diri ion. Liaj pensoj vagadis ĉe lia forlasita kontoro, kie ĉarma fraŭlino ĉe la skribmaŝino pli ol verŝajne rememoras pri sia ĉefo kaj preskaŭ fianĉo, kuranta al la faŭko de la tento. Vole nevole li ridis pri la ĵaluzemo de sia amikineto, kiu elokvente priskribis la demonojn de la orfeonoj. El la momenta revado vekis lin la kaponvoĉo de la impresario.

— Tute certe, sinjoro Grauer, vi estos kontenta pri la soleno. La sinjoro ĉefdirektoro de la Orfeono faros funebran paroladon. La orĥestro ludos funebrajn marŝojn. La gekantistoj kantos funebrajn psalmojn kaj la dekdu dancistinoj de la fama Birgmann'a trupo...

— dancos funebrajn dancojn, ĉu ne ? — Kun malica rideto rimarkis sinjoro Grauer kaj per tio li preskaŭ rompis la decan sintenadon de la sekretario.

— Ah, kion vi pensas ? ! Tio estus ja profanaĵo,

sinjoro Grauer! Ne! Ne! Absolute ne! La dekdu dancistinoj de la fama Birgmann'a trupo tenante la rubandojn de la florkronoj staros ĉe la katafalko kaj poste marŝos ĉe ambaŭ flankoj de la ĉerkokaleŝo, kiun sekvos en tute nova funebra kostumo Cezaro II-a.

— Ĉu la...?

— Jes, la ĉimpanzo. Ĝi estas ja *lia* kreaĵo, primadono kaj miraklo de la dresarto, kun kiu li loĝis en la sama ĉambro kaj kiun li prizorgis, kombis, banis, vestis. Ho, nesuperebla emociiga sceno estos, kiam Cezaro II-a en nigra kostumo, kun vualrubanda cilindro sur la kapo funebre marŝos post la ĉerko. Oni kortuŝiĝos, oni larmos, ploros. La virinoj certe eĉ ploregos... Mi vidis ja similan enterigon, kiu faris al mi neforgeseblan impreson. Sur la batalkampo mortis kolonelo kaj en la funebra procesio *lia* ĉevalo sekvis la ĉerkon... Jes, sole *lia* ĉevalo, ĉar la kolonelo ne havis parencojn kaj...

— Simio en frako post la ĉerko? Kaj tio ne estas profanaĵo, sinjoro impresario? Hahaha! — kaj Grauer plengorge ekridis. Ankaŭ la sekretario ridetis. Nur la mieno de la mizera impresario restis konsternita. Li provis motivi, argumenti por la aranĝo, sed la ekrido de la funebrofrapita filo paralizis lian kuraĝon.

— Komedio de l' komedioj! Sinjoro, konfesu, ke vi mem ne pensis tion serioza! Ĉu vi ne sentas la diferencon inter fidela ĉevalo de kolonelo kaj arlekena simio de dresisto? Krome, tiu kolonelo ne havis parencojn, sed *mi*, mi la filo, ... ĉu mi devos marŝi kun mano en mano apud tiu dekoracia parenco? Hahaha!

— Sed, sinjoro Grauer, bonvolu finaŭskulti min! La ideo... la ideo...

La pene retenita kolero subite eksplodis el la juna Grauer.

— Nenion pli mi volas scii pri tiu ĉi komedio!

Kiel vi povis pensi eĉ unu minuton, ke mi liveros min al tia stulta cirka reklamo. Mi ne toleros kaj malpermesos profanigi tiamaniere la enterigan solenon de mia patro. Ĉu vi komprenas, sinjoro impresario ?

La impresario embarasite rigardis al la sekretario, kiu levinte la ŝultrojn mute esprimis sian flankenstaron. Fine kion fari, la impresario riskis fini sian interrompitan frazon.

— La ideo ne estas de mi, sinjoro Grauer, sed de via karmemora kaj tre estimata patro, kies definitiva deziro estis, ke Ĉezaro II-a sekvu lian ĉerkon... Cetere, baldaŭ vi scios multe pli, ĉar ni jam alvenis.

La aŭtomobilo haltis antaŭ la Ĉefurba Orfeono, sur kies fronto granda nigra flago anoncis la funebbron de la entrepreno. Ĉe la pordego akceptis ilin malalta grasa viro, la ĉefdirektoro kaj li tuj akompanis la alvenintojn al sia kontoro, kie la urba notario kun sia protokolisto atendis.

Iom ceremonie ili prezentis sin al la juna Grauer kaj — post kelkaj demandoj pri la vetero, vojaĝo, bonfarto — la trajtoj de la notario rigidigis, fariĝis solenaj. Ankaŭ la protokolisto prenis oficialan pozon.

— Sinjoro Stubek, — la notario turnis sin al sia protokolisto — bonvolu pretigi la koverton !

La alparolito kun digna fervoro malfermis sian paperujon kaj prenis el ĝi grandan koverton, kiun kun ĝentila klineto li transdonis al sia ĉefo. La notario nun turnis sin al sinjoro Grauer, kiun tre amuzis tiuj ĉi formalajtoj kaj precipe la solena vibro en la voĉo de la oficiala vireto.

— Sinjoro Grauer, via tre estimata patro bonvolis komisi min antaŭ sia morto transdoni al vi tiun ĉi leteron, kies enhavon mi ne havas la honoron koni kaj kiu certe aŭ almenaŭ verŝajne entenas gravajn sciigojn por vi. Bonvolu konstati, ke la sigeloj estas sendifektaj ! Jen ! Prenu ĝin kaj samtempe akceptu mian sinceran kondolencon. Vere, estas granda perdo

por la filo, se li... se li... Jes, sinjoro Grauer, mi havas ankoraŭ alian sigelitan dokumenton ĉe mi, kiu entenas la testamenton. Ĝin malfermi, publike legi kaj transdoni estas mia posta tasko.

La notario ĝentile riverencis, la protokolisto iom pli profunde klinis sin kaj kun la aliaj ĉeestantoj forlasis la ĉambron. Ĉio impresis tiel ceremonie, ke oni facile povis konkludi pri eksterordinara heredaĵo, kiu portos kun si avantaĝojn, privilegiojn de la riĉeco.

II.

Grauer restis sola en la ĉambro. Li tenis la sigelitan leteron kaj havis tre diversajn sentojn. La teksto de la koverto kaj la skribmaniero sufiĉe karakterizis lian patron. Sekaj vortoj, energia, eĉ kruelon montranta skribo. Tamen kortuŝis lin la fakto, ke lia patro fine, eĉ se nur perletere parolas al li. Sed la momentan emociion sekvis timo. Li konjektis, ke la enhavo de la letero alportos klaran respondon pri demando, kiun li ofte faris al si, sed vane. La sekreto ne estos plu sekreto. Guste tion li timis. Ĉu ne estus multe pli bone, se li ĵetus la leteron en la fornon kaj cindrigus ĝin? Neniigu la sekreto! Lia scivolo estis pli forta. Ĝi venkis la penson, eble la plej feliĉan. Li decidis scii la veron.

Duonvoĉe li legis la surskribon.

»Por sinjoro Cezaro Grauer, prokuristo de la firmo W. C. kaj K-io en Berlin. Transdonenda antaŭ mia enterigo. Vilhelmo Grauer.«

Li rompis la sigelojn, malfermis la koverton kaj elprenis alian koverton, kiu havis la jenan tekston:

»Haltu momenton! Se ankoraŭ vi kredas la sonĝojn, disŝiru la leteron sen lego! La enhavo ne taŭgas por nervoj malfortaj porti la kruelan realecon, kiu ŝajnas esti iom fantazia, tamen produktita de la Vivo, kiun forlasi estos mia ĝojo.«

La juna Grauer longe pripensis la avertajn vortojn. Lia antaŭtimo nun havis jam pli definitivan



koncepton. Li sentis, ke tiu koverto kaŝas detruon de sonĝoj, revoj pri ĉio, kio el homa vidpunkto estas konsiderata kiel sankta, majesta. Tiu ĉi kelklinia skribo, kvazaŭ pugnomontro, demonstracias pri kruda muskolforto, kiu ne konas indulgon kaj draŝos, frakasos ĉion, kaj ĉiun, kies sensenta krueleco ne superas aŭ almenaŭ ne egalas kun ĝi. Li denove travivis ĉiun momenton de la renkontiĝo kun sia patro kaj revokis ĉiun suferon de sia fila koro por taksi la forton, pri kiu li povas disponi en la batalo, luktota kun la mortinto. Perdo de la anima ekvilibro rezultigus lian ekgliton sur la deklivo de la vivovojo kaj falon en la abismon de malespero. La postlasitaj vortoj de la mortinto havas vivantan povon, kiun li timas, malamas, volas eviti, sed kiu jam katenis lin.

Kun tremantaj manoj li forŝiris la koverton. Momenton sen lego li rigardis la dense plenskribitajn paĝojn, ne konscius pri la viditaj vortoj, ĝis lia atento falis al la duvorta, seka kaj senkora alparolo. Subite li rekonsciigis. La frosta spiro, flirtanta el tiuj du vortoj al li, kvazaŭ glaciigis lian koron kaj donis al li la necesan forton por konservi la ekvilibron. Almenaŭ li pensis tiel. Li komencis la legadon.

»Sinjoro Grauer,

ne miru, ke mi ne nomas vin filo mia ! Nenia parenceco ligas nin unu al alia. Nek patro, nek onklo mi estas por vi. Mi estas kreinto de tiu okazo, al kiu vi povas danki vian vivon, se entute estas dankinda tiu ĉi vivo. La sorto metis vin sur mian vojon. Ni havas komunan nomon. Rajton al tiu ĉi nomo vi havas tiom, kiom mi. Ankaŭ mi pruntepetis ĝin por mi kaj pruntedonis al vi. Mia familia nomo estas ... Ne, tio ne gravas. Nur laŭ la bagatela mondpercepto de la tradicisklavo kaj kokincerbaj individuoj oni naskiĝas por reprezenti nomon. La numero same bone taŭgus por la praktika celo. Mi plene konscias, ke oni naskiĝas reprezenti idearon ĉu bagatelan, ĉu grandiozan.

Mia letero ne estas konfeso. Neniu havas rajton postuli de mi konfeson. Kion mi komunikas al vi, tion mi faras pro propra decido. Nek juĝon, nek absolvon mi petas. Tute ne interesas min via pardono aŭ malbeno. La tombo estas profunda kaj la mortinto jam — surda. Tamen mi dezirus, ke vi objektivite akceptu la faktojn, kiujn ĉi sube mi priskribos. Tio ĉi estus plej prudenta je via intereso. Por faciligi al vi la akiron de la necesa objektiveco mi donos al vi instruon pri la Vivo. Akceptu ĝin por kompreni min. Cetere mi estas kontenta, ke vi elektis profesion, kiu ligas vin al la rigida mondo de la ciferoj. La matematiko ne havas tiom da seniluziigaj embuskoj, kiom da ili havas la artoj, reprezentantaj efemerajn sentimentojn. La matematiko estas la plej perfekta tera seniluzio. Sed eble mi eraras kaj ĝi estas sole iluzio de ŝajnaveroj. Mi spertis, ke ĉu per koto, ĉu per ĉifonoj, deklaritaj belaj, oni ornamas sin, tio estas bagatela kaj indiferenta el la vidpunkto de la Vivo mem. La Bono kaj Malico apartenas samgravece al la Ekzisto kiel la alaŭda kanto kaj la predikpiko.

Kio estas la Vivo? Movo. Kial estas Vivo? Por mueli la energion de la moviĝanta materio. Kio estas la animo? Aglomeraĵo de diversaj fortoj, muelantaj la materion. El marĉo de cent kaj cent miljaroj ĝi devenas, nutras sin, farante senĉesan rondiron. Pro tio estas nekomprenbla, ne unueca, abomeninda kaj majeste stulta la — socio de la Vivo.

Mi diris »socio de la Vivo« kaj intence evitis la distingon inter la homa kaj besta socioj. La Vivo mem ne distingas. Ĝi remaĉas kaj digestas. La ĉifonon, hieraŭ forjetitan, eble post kelke da morgaŭoj ĝi denove prenos al si kaj tiam la pozmajstroj konstatos: la Historio ripetas sin. Kio estas la Morto? Plua muelado de la materio, nova ekzisto: putrado. Por fini la instruon mi aldonas, ke mia ekzisto estis: langmontro al la homa reĝeco, krieta de egoista vanteco. La superforta ambicio de la Homo atingi la

tronon de ĉiuj kreitaĵoj estas ridinda fortostreĉo el vidpunkto de la Vivo, kies gvidprincipo estas tro proza: movo por la movo eĉ sen celo.

Kaj nun aŭskultu la koncizan priskribon de mia vivhistorio! Ĝi ne estos ĉiutaga, kvankam ĝi ne entenas mirindaĵojn. La vivo de la libere vagantaj frenezuloj similas al la mia. Guste pro tiu ĉi simileco mi zorge kaŝis ĝin. Mi ne deziris konatiĝi kun la bonfaremo de la homa ŝafaro, konsiderata normala. La bastionoj de la riĉeco bone defendis min kontraŭ tiuj, kiuj ĝenerale mensogas kompaton tie, kie ilia kelkgrama cerbo ne kapablas penetri ĝis la limo de la kompreno.

Ĉe la suna flanko de la konscia Ekzisto mi ekvidis la homan mondon. Pri la ombraj flankoj ne multon mi interesiĝis dum mia tuta vivo. Zorqu pri la ombroj tiuj, kiujn tedas la mallumo. Mia vivo estingis tiun de mia patrino. Neniam mi konis ŝin. Certe ŝi similis al la aliaj virinoj. Si vivis por ĝui, naski kaj morti. Mia patro, kiel ĉiu stulta viro, fieris pri la hazardo: pri la riĉeco, akaparita de rabemaj prauloj, kaj pri mi, lia fila ido. Li adoris la monon kaj min. Eble la monon pro mi, ĉar mi heredis dekobligitan kapitalon. Mamnutristino, lakeoj kaj profesoroj edukis min. Tro frue mi speritis, ke la lakeoj havas profesorajn ambiciojn kaj la profesoroj preferas la kutimojn de la lakeoj. La servistaro instruis min pri la praktika aplikado de teorioj, kiuj ofte laŭprofesie konsternis la sinjorojn profesorojn. Sufiĉe frue mi ricevis lecionojn pri la virina idealismo. Dum mia tuta vivo dankplene mi rememoris ĉiam pri nia ĉambristino, kuŝanta jen kun mi, jen kun la stalmajstro, kiu post jaroj konstruigis dometon kaj edziĝis kun la — filino de apotekisto. Jes, ja! La ĉambristino intertempe ŝanĝis profesion. Kiam mi atingis mian dudekan jaron, la instruoj kaj diversaj impresoj havis jenan rezulton: kredi signifas scii nenion; esperi egalas fari

nenion, kaj ami estas hipokrite profigiti la egoismon.
Jen!

Mi estis dudekunujara, kiam mia patro mortis. Lia lasta deziro, ke mi konservu la gloron de la kellecentjara familio kaj zorgu pri indaj posteuloj, ŝajnis al mi facile plenumbla.

Mia juneco kaj riĉeco estis bona allogilo por la sinproponantaj nobelaj fraŭlinoj. Baldaŭ mi fariĝis la centro, al kiu direktiĝis la atento de ĉiu patrino de la aristokrata klaso. Sekvis longdaŭra naŭza amludo: intrigoj, artifaĵoj. Malgraŭ la etiketa masko de la societo mi sentis min ofte virĉevalo en la bredejo. Tio konsternis min, ĉar la unuan fojon mi sentis, ke la diferenco inter homo kaj besto estas nur forma, sed ne esenca. Por eviti tiun ĉi malagrablan senton, kiu kvazaŭ fantome aperadis en mi dum solecaj horoj, mi serĉis amuzojn.

Iun vesperon mi vizitis la Ĉefurban Orfeonon. Tie mi renkontis nian iaman ĉambristinon. Nun ŝi panakiris kiel dancistino. Sincere mi ĝojis pro la revido. Almenaŭ ŝi ne mensogis sentojn kaj sincere parolis pri siaj planoj, pensoj. La tutan vesperon mi pasigis kun ŝi en artista societo. Tiu ĉi vespero decidis pri mia tuta plua sorto.

La fantoma penso, de kiu mi rifuĝis, tute neatendite reaperis en tiu gaja, senzorge ridanta societo. Neniu rimarkis ĝian aperon, sole mi, kvankam la penso kvazaŭ korpiginte sidis inter ni kaj per sia ĉeesto demonstraciis pri esenca egaleco. Tiam mi sentis la unuan fojon, ke tiu ĉi egaleco estas multe pli reala ol mi imagis ĝin en komenco. Sed mi volas rakonti plu.

La humoro, stimulita de fajraj vinoj kaj ŝaŭmanta ĉampano, atingis altan gradon, kiam por esprimi dankon al mi, al la gastiganto, iu proponis prezentadon, sur kies programo rolu la plej unuarangaj artistoj kaj artistinoj. La proponon aprobis konsenta aplaŭdo. La prezentado komenciĝis. Ĉarmaj dancist-

inoj, kantistinoj, lertaj ekvilibristoj, fama iluziisto, arlekenoj konkure prezentis sian arton kaj mi ne forgesis noti la honorarion en mia ĉeklibreto. Subite sur la sojlo aperis vireto, kiun ĝis nun mi apenaŭ rimarkis. Lia nomo : Vilhelmo Grauer. Ĉi tiu nomo ankoraŭ ne estis tre konata en la artistaj rondoj. Li mem konfesis tion en sia alparolo.

— Gesinjoroj, la kontrakto, kiu ligas min al la nova programo de la Orfeono, estas ankoraŭ freŝdata, preskaŭ tiel freŝa, kiel mia apero antaŭ la publiko. Tiu ĉi urbo estas la dua, kie mi havos la honoron prezenti mian arton. Mi esperas, ke ankaŭ tie ĉi mi akiros plaĉon. Mi petas kvinminutan paciencon por prepari min.

Li klinis sin kaj malaperis. La ne tre kutima antaŭparolo vekis intereson eĉ en la artista rondo kaj oni diris, ke li havas specialan dresarton. Precizan informon neniu povis doni, ĉar li estis ludonta la unuan fojon nur post kelkaj tagoj. Tute sincere, min ne tre interesis la afero ĝis aperis en la kadro de la pordo du grandaj simioj: du ĉimpanzoj. Unu aspektis en sia laŭmoda frako kiel maljuna kurbiĝinta dando de bulvaroj kaj la alia sen kostumo, en sia nuda realeco, sekvis sian civilizitan kolegon.

La prezentado komenciĝis. La du simioj faris kelkajn produkciojn, tute surprizajn. Jen la unua imitis la duan, jen la dua la unuan. Ĉe la fino ili intermalpaciĝis kaj oni jam timis, kiam subite la senkostuma simio rektiĝis, per subita gesto forigis sian maskon kaj staris antaŭ ni — la dresisto mem. Li afable ridetis kaj montris al sia besto.

— Jen, gesinjoroj, via surprizo estas mia laŭdo. Malgraŭ la nesufiĉa distanco, bezonata inter artisto kaj spektatoro, via iluzio estis perfekta. Okazas kelkfoje, ke mi estas kostumita kiel Cezaro, mia simio, kaj oni ne povas diveni kiu el la du estas la — homo. Permesu, karaj gekolegoj, ke mi altabligu mian Cezaron, kiu ankoraŭ ne vespermanĝis hodiaŭ!

Kaj Cezaro kun gracio de civilizita simio proksimiĝis al la tablo. Ĝi eksidis inter mi kaj sia dresisto. Kontraŭ ni staris granda tualeta spegulo. Vole nevole mi devis vidi ĉiujn gestojn kaj movojn de la ĉimpanzo. Miajn nervojn ekregis ia fantoma penso. Jen la artisto, forigante sian homan formon, pleniluzie prezentis la beston kaj la simio, prenante al si homajn gestojn, kutimojn, elokvente pruvas, ke la diferenco estas forma kaj ne esenca. Ĉiam pli kaj pli konfuziĝis mia pensaro. Mi rimarkis en la spegulo, ke miaj gestoj similas al tiuj de Cezaro kaj Cezaro sammaniere kruccmetis la krurojn dum la fumado kiel mi. Ĉe tiu ĉi konstato mi ekabomenis en mi la simion kaj en la simio la homon... Apenaŭ mi povis regi min por ne salti al la gorgo de la impertinenta besto, kiu per sia ekzisto mem primokas la tutan homan socion.

Por distri min kaj plenumi konvenaĵon mi komplimentis al la dresisto, kiu ankoraŭ — tiel ŝajnis al mi — ne tute liberiĝis de sia simia rolo. Maskon li ja ne havis, sed eble la simia kostumo helpis mian fantazion al tiu ĉi penso.

— Sinjoro Grauer, — mi diris, — akceptu mian sinceran gratulon. Kiel vi povas tiel pleniluzie imiti la simion?

La artisto longe rigardis min. Verŝajne li miris, ke mi laŭdis ne lian simion, ne lian drestalenton, sed la aktorajn kvalitojn. Post momento li afable proponis apud si neokupitan seĝon.

— Sinjoro, ĉu vi ne rimarkis, kiom da simieca estas en mi? Cetere ĉiu homo pli malpli prezentas per sia fizionomio aŭ per sia karaktero iun beston.

La respondo surprizis min, ĉar ĝi entenis ion, kio malklare jam vivis en mi. Por kaŝi la emocion mi kurbigis miajn lipojn je duba rideto. Ankaŭ la dresisto ekridetis, sed tiel filozofie bonkore kaj indulge, ke mia duba rideto baldaŭ sereniĝis, eĉ malaperis.

— Ĉu vi ne volas kredi miajn vortojn? Vi havas

akran rigardon. Ĝi povas penetri sub la eksterajon. Ĉirkaŭrigardu! Tiu fraŭlino (kaj li montris al nia iama ĉambristino) certe similas al flatema katino. Ŝia ronda vizaĝo, sinproponaj movoj, mallongaj dikaj fingroj iom post iom, se vi okupus vin pri ŝi, konvinkus vin, ke mi ne eraris. La unuan fojon mi vidis ŝin hodiaŭ. Ĉu ankaŭ vi?

Mi ne povis respondi. Dum la artisto parolis kaj montris sinsekve la personojn, sidantajn ĉe la tablo, dirante pri ĉiu sian opinion, miaj okuloj vere vidis ilin tiaj.... tiaj ŝajne homaj, tiaj bestaj. Kva-zaŭ el terura vizio forpelis min la plengorĝa rido de la artisto.

— Kaj nun, ĉar mi komencis la vicon ĉe mi, mi devas fini ĝin ĉe mi. Pri vi, sinjoro, memkompreneble mi ne kuraĝas diri mian opinion. Divenu vi mem! Jen la spegulo. Rigardu vin!... Mi, kiel jam estas menciite, apartenas al tiu speco de la bestaro.

Mi sentis tremeton tra mia tuta korpo, kiam rigardante min en la spegulo mi vidis ne homan sed vulturan kapon kun du akraj okuloj. Eĉ miaj kurbigantaj ungoj plirealigis la fantazikreitan bildon.

— Haltu, sinjoro! Tute sincere konfesu, ĉu ankaŭ vi vidas min — vulturo?

Mia voĉo sonis rauka pro la interna haoso. La artisto, iom paliĝinte, rigardis min kaj ne kuraĝis respondi. Li rigardis rekte al miaj okuloj kaj en lia rigardo respeguliĝis timo, teruro kaj... kaj... simia humileco.

— Mi ripetas, sinjoro, konfesu sincere, ĉu ankaŭ vi vidas min tia, kia mi ŝajnis al mi antaŭ momento? Mi vidis min vulturo kruela, sangavida.

— Ne kaj tamen jes, — li komencis mallaŭte singarde. — Via fizionomio certe havas ion rabobirdan, sed ĉu ĝi estas vultura, ĉu akcipitra, mi ne povas aserti... Vi impresas min kiel montara aglo en sklaveco de ora kaĝo, ĉu ne?... Pardonu, mi volis distri vin kaj neniel ofendi. Mi estas ja arlekeno.

— Vi tute ne ofendis min.

Mia voĉo sonis kiel ektinto de fendita argil-poto... Longe ni rigardis tute senvorte unu la alian kaj tiel sincere, tiel senetikete kiel du bestokamaradoj en la paarbaro. Por momento mi forgesis eĉ pensadi. Nur tion mi rememoras, ke du streĉitaj simiaj okuloj kroĉiĝis al la miaj kaj blindige blanka dentaro rikanis al mi. En tiu rikano kvazaŭ instinkte mi sentis la kaŝatan timon de la mambestoj, kiuj montras siajn terurajn armilojn al la atakonta malamiko. Kion vidis mia kunulo en mia rigardo, mi ne scias, sed mi konjektis tion el tiu ekĝemo, monranta senpeziĝon, kiun li aŭdebligis, kiam du molaj brakoj plektis sin ĉirkaŭ mia kolo.

— Kara, vi lasis vian glason tute orfa. Nu, venu kaj lasu for tiun ĉi malbelan simion! Ĉu vi jam forgesis pri via...

— katino?! — finis la frazon la dresisto kaj laŭte ekridis.

Ankaŭ mi ekridis, kiam en la karesado de la mole grasaj fingretoj de nia iama ĉambristino mi rekonis la singardajn piedtuŝojn de katino, retirinta siajn akrajn ungojn. Kiel bone, ke mi similas al vulturo kaj ne al mizera pasero! La katinoj ofte havas apetiton je paseroj.

— Nu, venu, mia kara! — Si grumbletis flate al miaj oreloj kaj mi obeis, eble eĉ dankplene. Tamen mi rememoras vigle pri lasta frazo de la dresisto: »Bonvole mi konsilas al vi neniam forlasi vian kaĝon. Tamen ĝi estas el oro.»

Tiu ĉi vespero ne estis la lasta, kiun mi pasigis kun Vilhelmo Grauer. Ĉiutage pli kaj pli forte kaptis min al si la fantoma penso kaj ĝi metis nevideblajn katenojn al mia volo. Nur post semajnoj mi konsciis pri la fakto, ke ĉiun tagon mi pasigas en la zoologia ĝardeno por studi la karakteron de la bestoj kaj ĉiun vesperon mi longe parolas pri la spertoj al Vilhelmo.

Grauer. Tiu ĉi homo tre plaĉis al mi. Mian simpatian al li firmigis tiuj longaj horoj, kiujn mi pasigis antaŭ la bestokaĝoj. Tie dum la amikiĝo kun niaj bestofratoj mi rekonis uan ne ĉiutagan valoron. La sincereco de boninstinkaj bestoj karakterizis lin kaj li tute ne klopodis maski tion per imagitaj homaj virtoj. Li estis konscia homobesto. Pro tio mi admiris lin. La nekonsciaj homobestoj mensogas al si superan dignon. Pro tio mi malamas ilin. Vilhelmo Grauer montriĝis konvena amiko por iu, kiu estis ankoraŭ ĉe la komenco de sia Vekiĝo. Tiutempe mi eksciis ja, ke mi ne estas homo.

Mia societo miris pri mia retiriĝo. Ĝi konsterniĝis pro la onidiro, ke mi havas amrilaton kun dancistino, nia iama ĉambristino. En la pruda societo mia konduto estis konsiderata kiel eksterordinara skandalo. Oni hipokrite turnadis la okulojn, faris grimacojn jen kompatan jen kondamnan, sed malgraŭ ĉio ĉi la atakoj de la sinproponantaj virinoj kaj filinojn vendantaj patrinoj torturis min plu. Mi konstatis, ke la socio de la bestoj estas multe pli sincera. Ili ne mensogas simpatian al la malamiko kaj ne mordas je morto la objekton de sia simpatio.

Prefere mi estus montrinta langon al la mondo de la perpudre sin lavantoj kaj en frakon premitaj karakteroj. Por moki ĉi tiun privilegian societon mi portis kun mi Vilhelmon Grauer kaj lian ĉimpanzon. La prezentado bonege pleniluzie sukcesis kaj oni multe ridis, gratulis al mi por la brila ideo. Ĉiu trovis mian spritecon tre eleganta, originala, kolosa ĝis la toasto, kiun mi faris ĉe la vespermanĝo. Ho, tiam mia spriteco jam provokis alian opinion! La antaŭe prilauditan spritecon oni trovis tro forta, frivola, vulgara, ofenda. Kompreneble, ke la dorlotata ŝafaro, ofendita en sia vanteco, indigniĝis, kiam mi prezentis al ili Cezaron kiel prototipon de niaj prauloj. Kontraŭ la akraj protestoj mi promesis pruvon. Mi diris, ke mi klopodos subteni mian aserton per prezento de la tipa bestohomo,

multe pli sincera ol la nuna homobesto. Mia hipotezo, per kiu mi klarigis la du signifplenajn gradojn de la homa evoluo, dronis en la bruo de la ĝenerala konsterniĝo. »La Homo, — mi diris, — kiel bestohomo vivis en la edeno de la senkonscio kaj kiel homobesto kreis por si la inferon de la konscio. La tria evolua grado, kiam la homobesto fariĝos homo de la dividita egoismo, de toleremĉielo, eble neniam estos atingita.«

La dogmoskavoj citis tuj la biblion, la sekretaj darvinistoj titolis min scienca ĉarlatano, la membroj de la armeo deklaris min danĝera antimilitaristo, miaj amikoj parlamentanoj akuzis min per kamparana politika programo, la ruĝiĝantaj knabinoj ekscitite kunŝovis la kapojn kaj verŝajne klaĉadis pri eventuala seksa malnormaliĝo, en la graskusenaj patrinoj ekbolis la amareco pro la daŭraj fiaskoj, ĉar ili delikate aludis pri tio, ke sendube la profunda studado pri mia iama ĉambristino maturigis en mi tiun teorion kaj sur la mutaj lipoj de la lakeoj vibris la konvinkiĝo: frenezulo, certe frenezulo! Kaj mi — ridetis. Triumfe jubilis en mi la vulturo. Kun ceremonia riverenco mi adiaŭis kaj forlasis la gloran societon por efektive reveni neniam al ĝi, escepte unu okazon, pri kiu mi parolos poste.

Pasis longaj monatoj sen konsiderinda okazintaĵo. Ĉiutage kun notlibreto en la mano mi vagadis inter la kaĝoj en la zoologia ĝardeno kaj kolektis la materialon por la pruvo de miaj asertoj. Baldaŭ mi spertis, ke miaj notoj havas la valoron nur el mia propra vidpunkto teoria, sed ili ne havas la nepre konvinkan forton por tiu medio, kiun mi volis kruele rebati kaj venki. Tiujn hipokritulojn povas neniigi sole la plej kruda realeco. Vortoj, notoj, disertacioj kaj diversaj studoj provokus nur pluan disputadon, eble senfinan debaton. Mi celis martelbati ilin per la nuda kaj nerefutebla vero. Mi volis prezenti al ili la sinceran bestohomon, kiu ne havas sociajn ĉifonojn, ne estas katenita de edukado kaj kiel absolute sentradicia estaĵo ĝi de-

monstraciu pri sia sincera besteco kaj devigu ilin je la rekono de la vero.

La hazardo helpis. Iun tagon mia kuiristino kun deca lamentado kaj morala konsterniĝo raportis al mi, ke unu el la servistinoj naskis infanon, pri kies patro eĉ la naskintino ne havas certecon. Ĉu li estas la stal-servisto aŭ la nova kelisto, jen kion ŝi mem dezirus scii. La maljunulino riskis proponi al mi la maldungon de tiu sinfororgesema knabino, kiu portis honton por la servistaro de tia aristokrata domo, kia estas la mia. Mi ne scias kial, sed kolera timiga ridego skuis mian tutan korpon, kaj la kuiristino terurite forkuris el la ĉambro. Verŝajne ŝi divenis el mia mieno tiun abomenon, kiun mi sentis pro ŝia hipokriteco. Ankoraŭ tre vigle vivis en mia memoro okazintaĵo, kies ĉefrolantoj estis ŝi kaj la ĝardenisto. Kio iam estis tute nekomprenebla por kvinjara knabo, tion kun plena signifo rememoris la viro. Kaj la saman tagon mi maldungis — la kuiristinon, kies pruda sintenado terure incitis min.

Mi vizitis la novnaskiton. Li estis knabo, sed laŭ aspekto similis pli al baraktanta vermo ol al homido. La ekrigardo de tiu mizera estaĵo vekis en mi penson, kiu konsternis eĉ min por momentoj. Sed nur por momentoj, ĉar poste mi esprimis mian deziron kaj la patrino konsentis. Ŝi konsentis pri mia zorgo rilate la infanon, sed ŝi tute ne konjektis, ke mi aĉetis por mi eksperimentan materialon. Mi akiris la novan Adamon.

Baldaŭ oni klaĉadis pri mia amrilato kun simpla servistino, kies frukto, la bastardo, forŝirita de sia patrino, vivas en la plej grandaj komforto kaj lukso kun mi en la sama apartamento. La klaĉado ne interesis min. La onidiro fantaziis pri la amo, komforto kaj lukso.

En la unuaj tagoj mi ne sciis kion fari, kiel komenci? Poste mia plano pli kaj pli evoluis. Mi forlasis la urbon kaj vojaĝis kun la infano al unu el miaj kamparaj bienoj. Tie en la varmo de stalo mi donacis

novan patrinon al la infano : kaprinon, kiu antaŭ tago naskis idon. Certe la besto havis surprizon pri la formo de sia naskitaĵo, sed ĝia patrina instinkto venkis kaj ĝi pacience toleris, ke la malsata infanbuŝo turmentu ĝian mamon. La kaprino montriĝis zorgema patrino, per lekado ŝi purigis la strangan idon. Tage kaj nokte apenaŭ dormante mi atentis pri la vivo de mia poreksperimenta estaĵo kaj post semajno mi decidis fari ŝanĝon en mia plano. Pro du kaŭzoj : mi timis la malhelpon de la homoj, kiuj baldaŭ ekscios la celon de mia foresto kaj forprenosde mi la infanon ; poste mi tute ne trovis la lokon konvena por mia eksperimento. Mi revojaĝis do al la urbo kun la kaprino kaj la infano. Ili trovis novan stalon en la salono, ornamita per la portretoj de miaj gloraj prauloj. Ho, la gloraj nobeloj kaj nobelinoj kun sama stulta fiereco kaj pasintmoda ĉarmo rigardis el la kadro kiel antaŭe kaj ilia sinteno ne ŝanĝiĝis : la digno, sorĉita per la peniko de la flatemaj mezepokaj pentristoj, impone paradis plu. Ili ne balancis la kapon, ne grimacis, ilia nazo ne tordiĝis kiel en la romanoj, kvankam la odoro de la pajlo kaj sterko ne estas rozolea.

En la urbo mi transdonis miajn aferojn al agento. Mi komisiis lin vendi miajn bienojn kaj preninte al mi ĉiun kontantan monon mi baldaŭ forlasis la landon, vojaĝis al havena urbo, aĉetis jahton por serĉi konvenan insulon ie en la granda oceano por mia celo. Jam la jahto atendis vojaĝpreta, kiam subita penso igis min tute sekrete alboridi kaj vagadi tra la stratoj kaj bulvaroj. Vana taga kurado . . . Dumnokte mi decidis fariĝi aŭdaca kaj la sunbrila mateno jam trovis min en la marborda parko. Vartistinoj, mamnutristinoj puŝis antaŭ si malgrandajn infankaleŝojn. Ili grupiĝis por momentoj, poste disiĝis por daŭrigi la pandonan promenadon. Kvazaŭ duonfreneze mi kuradis tra la vojetoj kaj mi sentis, ke mia vultura naturo plene suverenas min kaj liberiĝi de tio mi ne povas! Fine mi trovis kaleŝeton, starantan en mezo de la vojo.

La infano silente dormetis en ĝi kaj la vartistino ronkadis sur benko en ombro de arbo. Senhezite mi prenis la infanon, kaŝis ĝin sub mian mantelon kaj kuris laŭ la bordo ĝis la albordiĝejo de mia jaĥto. Baldaŭ mi troviĝis sur la libera maro.

Tre verŝajne ĉio ĉi konsternas vin kaj via morala edukiteco kondamnas min. Tio ne interesas min hodiaŭ. Jes, tiutempe ankaŭ mi havis konscienciproĉojn efemerajn. Por silentigi tiun misteran voĉon mi faris riĉan donacon al mia servistino kaj ĵetis plenan monujon en la infankaleŝon. Nomu min frenezulo kiel mi mem nomis min ofte tiutempe, sed konfirmu la fakton, ke el vidpunkto de la Vivo mem mia ago estis bagatela, sensignifa, tute ne krima. Ĝi estis nur gestelo. Nur la homa socio konas krimojn. Tiutempe mi jam staris ekster la limo de tiu ĉi socio. Mi mem eksigis min, ĉar mi malamis la ŝafaron, kunpremitan en la granda stalo de ŝtoniĝintaj tradicioj kaj kontraŭnatura moralo.

La ŝtelita infano estis kelkmonata knabino. Plengorĝe mi ridis pro la hazardo. Jen la nova Evo! Verdire, mia intenco estis posedi nur provizon da por-eksperimenta materialo. Adamo kaj Evo! Eĉ hodiaŭ tiklas mian gorĝon la mokrido, kiu tiam plenigis min je vandala ĝojo.

Monatojn mi vagadis sur la maro zorge evitante la grandajn havenojn. Miaj maristoj jam grumbladis, sed ĉiufoje mi sukcesis kvietigi ilin per plenmano da oraj moneroj. Fine en la Pacifika Oceano mi trovis insuleton, kies dezerteco kaj nelogateco tute taŭgis por miaj planoj. Ĝi apartenis al Usono, respektive al la teritorio de ĝi, sed sur la insulo mem nenio montris ĝian suverenecon.

Miaj maristoj elŝipigis la tutan ŝarĝon de la jaĥto kaj konstruis grandan groton laŭ miaj planoj. La artefarita monto el cementaj rokoj staris ĉe la rando de la marbordo tiamaniere, ke ĝia laŭborda flanko estis alirebla nur per boato. La groto mem kon-

sistis el du partoj. La unua estis ne tre vasta kaverno kun malfermita faŭko al la insulo. Ĝia interno havis nenian komforton. Ĝi servis kiel stalo por la alportitaj bestoj. La duan parton formis granda provizejo kaj loĝejo, meblita sufiĉe racie por la primitivaj bezonoj. Tiu ĉi parto havis du kaŝitajn pordojn. Unu kondukis al la insulo kaj la alia al la marbordo. El tiu ĉi parto de la groto oni povis bonege observi la vivon en la malvasta kaverno.

Miaj maristoj vetlaboris kaj dank' al mia malavareco ili baldaŭ finkonstruis la monton kaj forlasis la insulon per la jahto. Laŭ la kontrakto mia unua direktilisto en ĉiu jaro unufoje albordiĝos por alporti la novan bezonatan provizon kaj transpreni miajn pluajn ordonojn. Post la adiaŭo mi restis kun surdmuta malajo, kiu sklave obeis al mi. La du infanojn mi lokigis al la bestoj en la stalon.

Dek kvin jarojn mi pasigis sur tiu ĉi insulo dediĉante min al la studo pri la geknaboj. Ili neniam vidis min, nek mian serviston. Eĉ konjekton ili ne povis havi pri estajoj, similaj al ili. Ni laboris dumnokte, kiam la silento kaj ripozo regis la tutan naturon. Detalan priskribon de tiuj ĉi dek kvin jaroj vi povas trovi en mia taglibro, postlasita inter miaj skribaĵoj. Ĉi tie mi mencias nur la plej gravajn faktojn.

Ĉe la fino de la unua jaro la infanoj perkape iuktis kun la kaprino kaj iradis kiel la kvarpieduloj. Ili blekegis kiel la kaprino por peti la nutron kaj plenkulme kriadis por esprimi koleron, doloron. Dum la dua jaro ili lertiĝis. La knabo imitis la kortbirdaron. Li flugile movis la brakojn kaj per la piedoj skrapis la sterkejon kiel la koko. La knabino lernis lavi sin de la kato. Ilia lingvo ekevoluis. Simpla sonimitado. Ili bojis, miaŭis, gruntis, blekis, henis, imitis la surradon de la vento kaj tondron de la fulmo.

En la tria kaj kvara jaroj ili fortikiĝis, vagadis tra la tuta insulo, malofte pasigis la nokton kun la konstante plimultiĝanta bestaro. Jam videbliĝis ia ekster-

ordinara sovaĝeco, kiun vi ne povas trovi ĉe la dombestoj. Tamen la komunaj bestaj kutimoj restis. La kato kaptis birdon kaj manĝis ĝin. La knabo longajn tagojn ekzercis sin, ĝis fine li sukcesis kapti mizeran birdidon kaj per siaj dentoj li disŝiris ĝin. La knabino proksimiĝis al li kaj en tiu momento mi preskaŭ triumfe ekkriis. La knabo kolere murmuris kaj minace montris siajn dentojn kiel la hundo mordanta oston. La knabino subite malaperis kaj post momento ŝi revenis tenante disŝiritan anseridon inter la dentoj. De tiu ĉi tago ilia ĉefa nutraĵo estis la sango. Mi alportigis do per la revenanta jaĥto kelkajn centojn da kortbirdoj.

En la kvina jaro okazis io, kio tre malagrabla surprizis min. La knabo, kiel la porkoj, ekrulinte sin en ŝlima koto ekkuŝis sur la platan flankon de unu cementa roko. La ŝlimplenajn manojn li frapetadis al la roko, sur kies surfaco restis la kontura desegno de liaj manoj. La knabo subite saltleviĝis kaj rigardis atente la postsignon de sia tuta korpo. Dum la tuta tago li okupis sin pri tio ĉi. Li banis sin en la ŝlimo kaj ekkuŝis momenton sur la rokon por vidi la konturan desegnon. Mi sentis, ke mia eksperimento proksimiĝas al ia krizo. La arto, eĉ en la plej primitiva formo ruinigas mian teorion. Kun tremanta koro mi spionadis longajn semajnojn. La ludo ne ripetiĝis.

En la sesa jaro mi rimarkis, ke por havi bonan digeston ili kuracas sin kiel la plimulto de la bestoj. Ili manĝis plenmanon da marborda sablo. Kvazaŭ instinkte ili timis ĝis nun la maron, sed iun tagon la defluo lasis grandan duonmortan fiŝon sur la sablo. La knabo rimarkis ĝin kaj liaj okuloj mire streĉiĝis. La knabino ekkaptis ĝin, sed la fiŝo elglitis el ŝiaj manoj, per longa sinĵeto ĝi atingis la maron kaj malaperis. De tiu tago ili pli ofte sidis sur la bordo. La alfluo banis ilin kaj tre malofte ili sukcesis kapti omaron aŭ ian fiŝon.

En la sepa jaro mi zorgis pri novaj ludkamara-

doj por ili. La jahto alportis paron da ĉimpanzo. La bestoj estis tute junaj, sed tamen sufiĉe fortaj kaj lertaj por lukti, batali. Neniam mi estus povinta trovi pli taŭgajn edukistojn ol tiuj du ĉimpanzoj. Ĝis nun la geknaboj ofte vagadis malproksime unu de la alia, sed de nun kvazaŭ instinkte ili ĉiam kaŝis sin kune. La novajn alvenintojn kun videbla timo ili observadis kaj ne malofte okazis inter ili malpaciĝoj. Eĉ nun mi ridas pri tiuj luktoj. La bestoj kaj la homidoj sammaniere tamburis per la pugnoj sur la brusto kaj montris la dentojn unu al alia, sed en la batalo la lastaj montriĝis pli lertaj, pli fortaj. Post du jaroj jam ili estis egalfortaj kaj estis risiko lasi ilin kune. Tiam mi forigis la ĉimpanzojn ŝlosinte ilin en fera kaĝo, kiu staris en la provizeja parto de la groto.

Dum la postaj ses jaroj ilia evoluo plene kontentigis min. Ili fariĝis tipo de timiga nova bestospeco, la reviviĝintaj bestohomoj: Adamo kaj Evo. En la dekkvina jaro la knabo similis al plenforta pantero laŭ vigleco kaj sovaĝeco. La knabino estis lia inda kunulino. La intelekto homa profunde dormis kaj pri abstraktaĵoj ili tute ne havis perceptemon. La sunon ili rigardis indiferece kaj ĝi ne vekis en ili koncepton pri Sundio. Ili amis unu la alian pro reciproka ambezono, sed tiun sensan instigon ili ne ornamis per mensogaj vortĉifonoj. Nur fizikan doloron ili sentis kaj tiam ili blekis, hurlis, la vundojn kuracis per lekado kaj kiam interna malsano turmentis ilin, tiam ili ekkuŝis en la ombron de iu palmo kaj kuŝis tie ĝis resaniĝo. Ilia rigardo similis al tiu de ĉashundo.

Jam proksimiĝis la tago, kiam mia jahto devis reveni. Mi decidis forlasi la insulon kaj prezenti la nudan realan pruvon al la malamata homa socio. Du tagojn antaŭ la alboriĝo de la jahto mi montris min antaŭ ili la unuan fojon. Nepriskribeblan efikon havis mia apero. Adamo kaj Evo sentis instinkte, ke aperis la forpelanta anĝelo de la venĝo kaj ili baldaŭ perdos la paradizon. Sed ili heroe defendis sin. Adamo

ekmordis mian dekstran ŝultron. Peceto da mia karno restis inter liaj timige minacantaj dentoj. Evo enigis siajn akrajn ungojn en miajn femurojn kaj per sia kapo plenforte ŝi boksis mian ventron. La atako estis subita, tute ne atendita kaj tre facile ĝi estus fariĝinta fatala por mi, se mia malaja servisto kun la skurĝo, uzata por la ĉimpanzoj, ne estus aperinta ĝustatempe. Li ekdraŝis ilin per la skurĝo kaj en tiu momento malgraŭ la doloro mi triumfe ridegante aklamis, ĉar Adamo atakis ne la skurĝanton, sed sole la skurĝon. Ĉu vi povas kompreni la signifon de tiu senpova furiozo, kiu evidentiĝis en la mordado kaj ŝirado de tiu skurĝo? Ili estis perfektaj bestoj, ne konsciantaj pri la kaŭzo kaj kaŭzitaĵo. En tiu skurĝo ili vidis ambaŭ fenomenojn.

Iom post iom ni retiriĝis kaj la postan tagon liberiginte la ĉimpanzojn nikomencis la ĉasadon. Ili rifuĝis en la kavernon kaj tio faciligis nian taskon. La sinsekvaj skurĝobatoj humiligis ilin kaj per ŝnuro kunliginte iliajn manojn, kruojn, ni portis, ŝlisis ilin en la kaĝon de la ĉimpanzoj... Jen, la koncize rakontita historio de la dekkvin jaroj.

La sekvintan tagon jam okazis la enŝipigo de Adamo kaj Evo. La malajon mi lasis sur la insulo kaj donis al li provizon da nutraĵoj por du jaroj, ĉar estis mia intenco reveni, post mia certa venko, al la insulo kaj fini tie mian vivon, kiu ne havos plu celon.

Post ses semajnoj laŭmode vestite kaj freŝe razite mi denove aperis en tiu societo, kiun mi forlasis antaŭ tiom da jaroj. La tropika klimato kolorigis mian vizagon bruna. La abstinenca vivmaniero, fizika laboro faris min muskola. El la malsataj virinaj rigardoj mi povis facile konkludi, ke mia persono ne perdis, eĉ gajnis intereson ĉe la kokincerba sekso. La plej multaj el miaj samaĝuloj jam ruiniĝis, kvankam apenaŭ mi estis tridekokjara. La longan foreston mi motivis per vojaĝo en Afriko kaj la veran kaŭzon de

la reveno mi prisilentis. Maskon mi portis por kaŝi la memon kaj pliigi en mi la malestimon kaj malamon. La inaĉoj de la societo komencis vete fiŝkaptadi. La reveninta ora fiŝo incitis la klaĉemon kaj tiel mi eksciis, ke en Afriko mi havas vilaĝojn, indiĝenaj hurioj ventumas min, kvardekdu leonojn mi pafis kaj donacis nuksograndan diamanton, la plej valoran trovitaĵon de mia diamantminejo, al la angla reĝino okaze de ŝia naskiĝtago. Nenion mi refutis, nur ridetis kaj plenmane disipis la monon. Pri mia »krimo« farita antaŭ dekkvin jaroj neniu volis rememori kaj se mi mem aludis pri ĝi, tiam oni konsideris ĝin »senpeka petolajo«. La pruntoj, donitaj al amikoj en monembaraso, esperdona konsolo de la belaj vidvinoj, la signifplena premado de veluraj knabinaj manoj akiris por mi sensacian popularecon dum dek mallongaj tagoj.

Por la vespero de la dekunua tago mi luis la grandan salanon de la plej eleganta hotelo en la urbo kaj sendis invitilojn al ĉiu konata kaj nekonata grandkapulo. La celon de tiu ĉi rememorinda vespero neniu konjektis. La salono pleniĝis. Aperis tie eminentaj ekleziaj kaj politikaj plenblovitoj, la plej famaj pozmajstroj de la scienco, aristokrataj amatinoj kaj amantinpagitaj aristokratoj. Do mallonge, la tuta ŝafaro estis reprezentata. Sovaĝa, senbrida triumfa sento ŝveligis mian bruston, kiam mi vidis antaŭ mi la hordon de la etiketo kaj hipokriteco kaj imagis al mi la ĝeneralan konsterniĝon, okazontan post nelonga tempo kaj prefere mi estus volinta ĝis gorĝŝiriĝo hurli, heni kiel la bestohomoj, por montri al ili mian senliman malamon, malestimon.

Adamo kaj Evo atendis ŝlosite en sia remburita kestokaĝo, kiu staris en la mezo de la salono, lumigata per grandaj lustroj. Mi staris en forta lumo de la petrolreflektoroj antaŭ la kaĝo kaj tenis longan skurĝon en la mano.

— Sinjorinoj, sinjoroj, gefratoj en la ŝafaro,

— mi komencis kaj kun troa humileco mi klinis min antaŭ la feste kostumitaj. En la silento de la atendo subite afekta rimarko kartavis al mi: »Bhave, the sphite! Mi ghatulas!« — Antaŭ dekkvin jaroj mi riskis aserti, ke inter la homo kaj la besto ekzistas nur forma, sed ne esenca diferenco. Mi nomis la homon ŝtelisto de la naturo, kaj kuraĝis deklari, ke tiu ĉi homo nun vivas la duan periodon de sia evoluo. Ni ĉiuj estas homobestoj, mi diris kaj sole al la imitkapableco estas dankebla, ke la bestohomo fariĝis homobesto. La imitado esence estas ja ŝtelado. La homo, nomanta sin krono de ĉiuj kreitaĵoj, tiel ŝtelmaniere kolektis por si ĉiun hodiaŭan kapablecon, siajn lingvon kaj socian ordon. Sed la evoluo alportis nekompanseblan perdon. La homo perdis sian senkonsciecon kaj tiun simplan leĝon, kiun la Vivo donas kiel solan leĝon por ĉiu estaĵo. La vekigo je konscio rezultigis nesatigeblan egoismon. Tio ĉi degradis la homon de la hodiaŭo kaj faris lin pli malaltnivela el morala vidpunkto ol estas la ceteraj bestospecoj. Korvo ne elpikas la okulojn de korvo. La ŝakalo formanĝas nur la kadavron de sia frato, sed ni manĝas kaj remaĉas vivon kaj per belaj vortoj senkulpigas nin. En tiu ĉi senkulpigo troviĝas la rekono de la interna moralo, kiun oni volonte neas. La bestohomo de la praepoko estis multe pli sincera en siaj agoj, ol la hodiaŭa krono de la kreitaĵoj. Sed por ĉio oni devas pagi. La dupiedan iradon ni pagas per la laŭgrada degenero de la pulmoj... Mi diris ĉion ĉi antaŭ dekkvin jaroj, sed la vortoj ne havas konvinkan forton tie, kie la pensado estas tute ne konata, aŭ tre ĝena afero. Por la ofendita vanteco ekzistas sola pruvo: la nuda realeco. Mi sciis, ke vin povas konvinki sole la vido de la nerefutebla bestohomo... Jen, paro da ili!

Mi premis la butonon de la seruro. La pordo de la kestokaĝo subite malfermiĝis, la eksvingita skurĝo laŭte klakis kaj Adamo kun sia Evo terurite elsaltis al la plena lumo de la lustroj. Neeble priskribi la

surprizitecon, la konsterniĝon, kiu regis en la salono. La kriptaj silentoj, la mortpalaj vizaĝoj, la terurstreĉitaj rigardoj, la haltigitaj timveoj elokventis pri mia triumfa venko. Vidante la kontraston inter ili kaj miaj edukitoj mi ne povis reteni la ridegon kaj mi ridegis hurlante, kriegante, blekante. Mia voĉo superis ĉion.

— Jen, tre estimataj gesinjoroj, la bestohomoj, la reviviĝintaj Adamo kaj Evo!!!

Mia parolo rompita la silenton. Kelkaj virinoj svenis, aliaj ekkriis: »Frenezulo, frenezulo! Arestu lin! Kaptu lin!« Sed neniu kuraĝis proksimiĝi al mi. Subite akra veo tranĉis la kreskantajn bruojn. Evo kun neatendita sovaĝeco saltis al unu el la proksime starantaj virinoj kaj deŝiris la kostumon de ŝi por — kovri sian nudecon. La blekbojato de Adamo minace superis la voĉhaoson. La homa ŝafaro terurite rifuĝis kaj mi per rapidaj skurĝobatoj devigis Adamon kaj Evon humiliĝi, reveni en la kestokaĝon kaj... mi rifuĝis, eskapis.

En tiu sama horo mi forlasis la urbon. Ne la certa danĝero igis min rifuĝi, sed pelis, persekutis min la penso, ke mi malgajnis la batalon kaj mi estas venkita. En tiu sinkovro de Evo mi klare vidis mian fiaskon. La honto ne devenas el besta instinkto. Honti pri nudeco estas ja simpla moro, sugesto de edukiteco. La mahometana virino nehavante vualon kovras per la jupo sian vizaĝon antaŭ fremdaj okuloj; en fora oriento en komunaj banejoj la bankostumoj ne estas konataj, aŭ konjektigas malsanon, nenormalecon. Eĉ la rifuĝo de la ĉasta talpo dum pariĝa periodo estas nur timo al la nekonata. Mi malbenis tiun atavisman fenomenon, kiu tute neatendite neniigis mian teorion, detruis la preparan laboron de dekkvin jaroj.

Uzante diversajn pseŭdonimojn mi pasigis ankorau unu monaton sur la kontinento kaj tiam mi revenis al la insulo, kie atendis min la retransilvigo. Miaj plujaj planoj koncerne Adamon kaj Evon ŝajnis tute sencelaj. Cetere la granda skandalo malebligis, ke la

eksperimentojn, celantajn prezenti la evolugradojn de la hombestiĝo de bestohomoj, mi povu daŭrigi. Sur la insulo mi havis tempon revizii mian filozofion kaj la tutan teorion. Post la restudo de la notoj kaj taglibro de la dekkvin jaroj mi estis devigata konstati, ke inter la homo kaj la besto ekzistas ne nur forma, sed ankaŭ esenca diferenco ĝis certa grado, ĉar la periodo de la homobesteco jam proksimiĝas al sia fino. En la frenezeco de la teknika progresado al perfektigo estas bezonataj la sangverŝado, la vivmanĝa batalo, la terskua milito. La rafinado de la mortigiloj kaj batalmanieroj devas perfektigi, ĉar superfantazian sangoferson bezonos fari la Homaro, se ĝi volas skui je vekigisian animon (se ĝi entute havas animon ? !). La epoko de la Hodiaŭo estas narkotado de la kulturo kaj furiozado de la civilizacio. Kiam la Detruforto atingos la zeniton kaj diboĉos ĝis plena inertiĝo, tiam sur la kadavromontoj kreiĝos nova mondo : la mondo de la homa Homo. Hura ! Mortigu, masakru unu la alian por rapidigi la tagiĝon de la nova epoko !

Tiu ĉi nova teorio, proksima, eĉ parenca al la optimismo, ne povis radikigi en mi. Mi povis kredi la tempokaŝitan pasintecon, sed duboj turmentis min pri la estonteco, naskita de mia fantazio. Ĉiam la sama penso fantomadis en mia kapo : kial la batalo ? Ĉu por la perfektigo ? Sed se tiu ĉi celo estas atingebla kaj iam la homaro sukcesos atingi ĝin, tiam la Ekzisto fariĝos sencela. Almenaŭ la konscia ekzisto certe. La celperdinto pereas. La Homaro vane taŭzis, mordis sin dum miljaroj, ĉar ĝi pereos kaj ĝian lokon en la evoluo transprenos la — termitoj. Tiutempe mi ektrouas la veran kaj solan celon de la Vivo : movo por la movo.

La celperdinto pereas. Neniam mi sentis tiel prema la forton de tiu ĉi vero kiel tiam. Mia malŝato al la homa socio ne malpliigis, nur mildiĝis. Mi decidis neniam reveni al la homoj. Dediĉate je longdaŭra agoniado mi pasigis kvar jarojn en perfekta nenifarado,

kiam mia malajo formortis kaj mi restis sola. La soleco premis min. Kvankam mi ne sopiris la ĉeeston de iu homo, tamen mi forte sentis la mankon de mia servisto, kies surdmuteco, sindona obeemo, dumnokta ronkado kaj konstanta apudesto bonege efikis je mi precipe dum la lastaj jaroj. Li estis ja duonhomo pro la kripleco kaj duonbesto pro la sovaĝa aspekto. La unua direktilisto de mia jaĥto proponis, ke li dungos novan serviston por mi, sed mi rifuzis pro ia nemotiv- ebla timo.

Foje promenante sur la insulo mi rimarkis, ke mia bestaro plimultiĝis. Kelkaj junaj ĉimpanzoj saltetadis inter la palmoj. Ili estis homformaj, tiel similaj al mia iama malajo, ke tute spontanee venis al mi la penso anstataŭigi lin per unu el tiuj ĉi bestoj. Mi rememoris pri la dresisto Vilhelmo Grauer. En la intima duopo ĉu mi bestigis ĉu la ĉimpanzo homiĝis ĝis certa grado estos egale kaj indiferente por mi. Mi ja edukis preskaŭ perfektajn bestojn el homidoj, do kial mi ne povu eduki preskaŭ perfektan homon el bestido? ! Tiu ĉi penso revigligis min. Jen, denove mi trovis rimedon por moki la homan ŝafaron.

Ankoraŭ du jarojn mi restis sur la insulo. Mia eksperimento kun la juna ĉimpanzo kontentigis min. En komenco de la dua jaro okazis io, kion menci- i estas inda. Kelkaj vestoj de mia iama servisto restis pendanta sur la vestpendilo. Iun tagon la simio ŝtelis ilin kaj prenis sur sin. Ĉu mi komentariu tiun ĉi agon, aŭ parolu pri la pensoj, vekitaj de tio. Ne! Superflue. Kiel malfrua konsolo efikis la sinkovro de la ĉimpanzo por iama sinkovro de Evo. Tio estis do ne atavisma fenomeno, nek hontosento, sed ago de besta akiremo, instigata, incitata de la allogaj koloro kaj brilo. La kleptomano de la pigo estas retrovebla en la karaktero de aliaj bestoj, kial ĝi ne estu prainstinkta fenomeno ĉe la homo, ĉe la reĝo de la mambestoj.

Mi decidis reveni al la homoj, sed ne por vivi kun ili, nur por esti inter ili. Kunportante mian tutan ha-

vajon mi forlasis la insulon kaj en la plej proksima havenurbo mi adiaŭis mian direktiliston por ĉiam. Per granda ŝipo mi atingis Eŭropon por aperi sur la scenejo de orfeonoj kaj per prezentado de mia ĉimpanzo ĉiutage moki tiujn, kiujn mi malestimas. Mi vivis kva-zaŭ izolite kun miaj du ĉimpanzoj. La virĉimpanzo estis la artisto, la alia plenumis edzinan rolon. La ido de tiuj ĉi estas Cezaro II-a, la miraklo de la dresarto. Li perfekte imitas ne sole la kutimojn, gestojn, movojn de civilizita homo, sed komprenas la homan parolon. La skurĝon li abomenas, sed kiam iu ajn el la publiko venas sur la scenejon kaj dece alparolas lin, tiam li senhezite plenumas la dezirojn de la alparolinto. Mi kuraĝas aserti, ke Cezaro II-a sentas sin egala kun ĉiu bonkondukta kavaliro. Sed pri tio vi mem povos konvinkiĝi baldaŭ. Estu ĝentila al li kaj vin surprizos la sinjora edukiteco de la simio.

En la artista mondo mi prenis al mi la nomon de Vilhelmo Grauer. Mia sola hombesta amiko formortis du jarojn antaŭ mia reveno. Multaj pensas eĉ nun, ke mi estas lia filo. La jaroj ŝanĝis mian aspekton, kiun mi mem klopodis fremdigi per la barbo kaj lipharoj. En la haroj, iam karbonigraj, jam troviĝis blankaj bukloj. Neniu rekonis min, nur unu virino, nia iama ĉambristino. La velkiĝo igis ŝin forlasi la scenejon, sed tamen ŝi ne povis disiĝi definitive de la mondo de kulisoj, dekoracioj. Ŝi rekonis min en orfeono, kie ŝi havis la postenon de inspektorino pri la artistaj vestejoj. Ŝi rakontis detale la okazintaĵojn post mia dua malapero. La skandalo fariĝis mondsensacia, la ĵurnaloj plenklovis ĝin. Miaj parencoj oficiale deklaris mian forigon el la familio. Mi havis ĉiam kompaton al ili pro la mensa limigiteco. Ĉu tia oficiala dokumento povas aliigi la fakton? Kelkaj pozmajstroj provis eksperimenti kun Adamo kaj Eŭo, sed la diletantismo baldaŭ enuis la idealistan rolon kaj iu cirkoposedanto akiris ilin. Ĉu vi komprenas? Li akiris ilin. Tiu ĉi fakto per si mem pravas, ke mem la glora ho-

ma socio konsideris ilin akireblaj bestoj. Oni ne kontraktis kun ili, sed simple akiris ilin. Mi estis devigata aĉeti la diskretecon de tiu ĉi virino kaj mi kontrakteligis ŝin al mi kiel impresariinon. Al tiu ĉi renkonto vi povas danki, ke vi havas imponan pozicion en la ŝafaro.

Sinjoro Grauer, kiam vi estis dekjara gimnaziano, mi vizitis vin en la instituto. Verŝajne vigle vi rememoras pri tiu renkonto. Mi diris al vi, ke la sonĝoj mensogas kaj vi vidis vian patrinon, sed ŝi ne estis tiu, pri kiu vi rememoras. Jam estas tempo scii la veron. Vi estas filo de la bestohomoj Adamo kaj Eŭo. Kiam mi forlasis ilin, Eŭo jam estis graveda, pri kio mi tute ne sciis. Vi naskiĝis en la kaĝo de la Bangensen Cirko, kie viaj gepatroj amuzis aŭ tremigis la publikon. Tiutempe la iama ĉambristino kiel membro de danctrupo ludis en tiu cirko kaj ŝi prenis vin al si ĉu pro kompato ĉu pro profitemo, mi ja ne scias. Ŝi adoptis kaj transdonis vin al zorgado de instituto por georfoj. Ĉi tie vi renkontis ŝin en 1906-a jaro.

Kaj nun bone streĉu vian memorpovon! Foje la infanojn de tiu instituto oni kondukis al posttagmeza prezentado de cirko. Tie vi revidis en fera kaĝo tiun, de kiu vi ricevis la vivon. Via patro jam ne vivis. Lin baldaŭ mortigis la klimatsanĝo. Vidu, tiel mensogas la sonĝoj! Certe viaj filaj okuloj kun timesprimo fiksigiĝis al via vera patrino, kies bildo verŝajne fantome revenadis dum la postaj tagoj kaj per inkuboj turmentis vin. Tute certe, ankaŭ Eŭo ne sentis, ke inter la centoj da okulparoj, rigardantaj ŝin, ĉeestas ankaŭ tiu, kiu ricevis la brilon de ŝi. Verŝajne, sed ne certe, se ŝi estus povinta flari vian odoron, ŝi estus rekoninta vin. Do, la sonĝoj mensogas, la sentoj trompas nin.

De la momento, kiam mi sciigis pri via ekzisto el la rakonto de mia impresariino, mi zorgis pri vi. Unue mi forigis vin el tiuj ĉi urbo kaj lando, kiuj estas nia naskurbo kaj patrolando. Mi adoptis vin, pli precize, mi akiris por vi dokumentojn kun la nomo.

Cezaro Grauer. La komisiito vojaĝis kun vi en Germanujon kaj lokigis vin en iun bonfaman instituton en Berlin. Ne kompato, aŭ pripento igis min preni al mi la taskon de patroanstataŭanto. Per la prizorgado mi pagis al viaj sendankaj gepatroj. Sed krome mi havis ankoraŭ kaŭzon. Mi estis scivola pri via evoluo, kaj timis la skandalon, ĉar la iama ĉambristino intertempe fariĝis sentimentala patrinbesto kaj ŝi minacadis, parolis pri Dio kaj infero. Cetere mi ne havis simpatian al vi. Eĉ, post la vizito, farita en la instituto, mi havis malamon al vi. Jes, la renkonto kaŭzis malagrablan impreson, vekis incitan rememoron en mi, kiam mi konstatis la similecon inter vi kaj via patrino. Nur laŭstature vi estas stampita de la patro. Via normaleco, la profesoraj laŭdoj pri viaj kapabloj kaj konduto tre ĉagrenis min kaj mi decidis neniam revidi vin por eviti la okazon havi nedeziratajn momentojn. Rememoru, ke en 1923 via ĉefo sendis vin por negocaj aferoj en Madrid-on kaj en 1927 viaj gamikoj persvadis vin pasigi la ferion en provinca urbeto. Ambaŭfoje mi gastroladis en Berlin. Tamen ne miru, ke malgraŭ ĉio ĉi mi ne retiris la subtenon de vi. Nenion mi faris sen kaŭzo kaj celo. Sed la celon de tio ĉi mi prisilentas eĉ en mia nuna letero. Verŝajne post jaroj, aŭ eble, ke eĉ pli frue vi divenos ĝin, ĉar vi estas ja abomeninde normala. Tiu ĉi postmorta celo, transtomba langmontro naskiĝis en mi dum mia restado en Ameriko. Eĉ en la momento de mia formorto mi ridegos pri tio.

Vi estis ĉiam fremda por mi. Guste pro tio mi sciigas vin pri mia definitiva deziro: ne ĉeestu dum la enterigaj komedioj, aranĝataj de la homa vanteco por mia putranta kadavro. Malantaŭ la ĉerko paŝadu nur Cezaro II-a, la ĉimpanzo. Tiu ĉi cirka arlekenajo estos mia antaŭlasta langmontro. La lasta sekvos poste...

Ankoraŭ ion! Mi estas multe pli riĉa ol oni supozas tion. Mi testamentis ne por via favoro. La

kaŭzon nur duone mi klarigas al vi. La alia duono restos sekreto, portita kun mi en la tombon kaj samtempe postlasita kiel malagrabla heredaĵo por la ŝafaro, kiun ĉagreni estas mia plej alta plezuro eĉ el la nekonata transtomba ekzisto.

Alveninte en Amerikon mi konstatis kun dolora bedaŭro, ke mia kapitalo forte malpliigis. Mi timis ne la mizeron, sed la forgliton de la rimedo el miaj manoj. Mi dediĉis min al monakiro, ĉar mi decidis starigi pri mi daŭran memoraron por la posteuloj. Ho, ne pro vanteco, sed pro ironio. La frenezigo de la ŝafaro helpis min rapide riĉiĝi. Amalia Korp, mia impresariino kaj necesvirino baldaŭ mortis. Ŝi estis fidela pario, nur iom sentimentala. Ŝian ŝparitan salajron, la monon por la diskreteco ŝi testamentis al vi. Tiu ĉi sumo, kvin milionoj da dolaroj, estas deponita por vi en la banko, kie vi transprenis la kvaronjarajn ĉekojn. Mi mem eĉ unu dolaron ne testamentis por vi, sed ankaŭ ne forprenis de vi. Mi estas ja vulturo kaj ne pigo. Se mi estus konvinkiginta, ke vi havas nenormalajn ecojn, tiam nun vi fariĝus miliardulo. Via normaleco estas maldanko al viaj gepatroj kaj al mia dekkvinjara laboro. Mi ne miras. Vi estas ja filo de Evo kaj ankaŭ ŝi primokigis min.

Kiel mi jam menciis, la frenezigo de la ŝafaro helpis min rapide riĉiĝi. La eksplodo de la mondmilito atingis min en Ameriko. Mian tutan kapitalon mi investis en akcioj de militaj entreprenoj, pruntis fondkapitalon por fabrikoj de armiloj, rentumigis la homan stultecon, ĉar por la efektivigo de mia plej nova plano mi bezonas monon, monon kaj nur monon. La necesan malprudenton donos la ŝafaro. Subteni la militon apartenis al mia sincera plezuro. Bedaŭrinde ĝi ne alportis la perturbon, sopiratan de mi. Nu, la 1938-a jaro eltordos la kolon de tiu ĉi mondo, prudenton perdinta. Se vi postvivos tion, rememoru pri mi kaj se la nova kataklismo

alportos la ŝanĝon, pri kiu mi revadis foje sur la insulo, tiam... Sed pri tio poste!

Mi testamentis mian tutan havaĵon, ducent tridek milionojn da dolaroj al tiu ĉi urbo, kie mi naskiĝis kaj kie mi estis dufoje publike nomata »frenozulo.« Jes, mi testamentis favore al la urbo, kie en 1861 ekvidi la sunlumon kiel membro de la ŝafaro mi konsideris la plej granda malfeliĉo dum mia tuta ekzisto. Por la malavara donacado min instigas ne bonfaremo, sed celkonscia langmontro, la lasta, kiun mi faras kun sincera ĝojo. Sed la transprenon de la heredaĵo mi ligas al tiaj kondiĉoj, kiuj sukcon de abrotano verŝas en la pokalon, plenan de nektaro. La koncernan parton de mia testamento mi komunikas al vi.

»...la testamentitan 230.000.000 t. e. ducent tridek milionojn da dolaroj (parte en kontanto, parte en akcioj de petrol- kaj aerŝipentreprenoj) povas konsideri rajta posedaĵo mia naskurbo Strutmagen nur tiam, se ties altestimata Konsilantaro akceptis la subajn kondiĉojn, alivorte, se ĝi estas preta plenumi ilin sen ia ajn artifikado :

1. se la altestimata Urba Konsilantaro dum duonjaro post la malfermo de tiu ĉi testamento starigas imponan monumenton en la zoologia ĝardeno por rekonii kaj aprobi la ĝustecon de mia teorio kaj se la elspezojn por tiu ĉi monumento ĝi akiros per memvola monofero de la loĝantaro. La monumento figuru la renkonton de Homo al Simio, reciproke amike manprenantaj. Surskribo : »Egaleco en la frateco. Por la glora ŝafaro starigis Vilhelmo Grauer.«

2. se la altestimata Urba Konsilantaro ĉiujare unufoje kun solena digno, en salonkostumo kaj kun cilindro en la mano faros demonstracian promenon inter la bestokaĝoj por espirmi sian simpation al la besta frataro kaj meti pajlokronon, ornamitan per orkolora rubando, al la piedestalo de la monumento ;

3. se la altestimata Urba Konsilantaro konsi-

derus la suprajn kondiĉojn neplenumebajn, tiam mia tuta postlasita havaĵo, en plena valoro estu disdonita egalproporcie inter la prostituinoj, loĝantaj en la urbo Strutmagen, ĉar ili formas la solan kaston, kiu ne hontas kaj sincere montras sian hombestecon.»

Jen, sinjoro Grauer, mia lasta langmonstro. Mi kuraĝus veti, ke la grandkapaj pozmajstroj aperos antaŭ la kaĝoj en ĉiu jaro nur por teni la heredajon en siaj gluemaj manoj. Povas okazi, ke la Konsilantaro falsos la motivon de la solenaj promenoj kaj per mensogaj, belsonaj frazoj savos aŭ almenaŭ provos savi sian prestiĝon, sed tio jam tute ne interesos min. La monumento staros ĝis . . .

Mi ne havas pli por diri al vi. Se vi volas, akceptu en vian amikecon la pranepojn da tiuj ĉimpanzoj, kiuj estis iam la ludo-kaj instrukamaradoj de viaj gepatroj. Tio estus el vidpunkto de sentimentaleco vere tre inda por legolibroj de infanoj.

Kiam vi estos ricevinta tiun ĉi leteron, tiam nova vivo, »putrado« komenciĝis por tiu, kiu longajn jarojn uzurpis la nomon de sia konscia hombesta frato Vilhelm Grauer.

III.

Cezaro Grauer tremante en sia tuta korpo sidis pala kaj rigide rigardis antaŭ sin. Lia narkotita konscio ne perceptis pri loko kaj paso de tempo. Tiu ĉi letero revokis memoron pri entombigita pasinteco kaj la terura monstro pezigiĝis sur lian cerbon. Tra nebulo de forgesitaj jaroj desegniĝis antaŭ li granda fera kaĝo, en kiu homforma estaĵo perdente disŝiras kolombon. El la buŝanguloj de la nekonata besto gutfluas la freŝa birdosango. La stranga besto jen indifere, jen timigite palpebrumas al la gapanta amaso. Antaŭ la kaĝo, kun skurĝo en la mano, staras muskola viro, vestita per ekzotikaj ĉifonoj kaj ekparolas.... Sed kion?... Kion li diras? Li ne povas rememori, nur frazerojn revoki povas la streĉita memorpovo: Afriko... praarbaro... bestohomo... Jes, bestohomo! Tiun ĉi vorton li bone ĉizis tiam en sian memoron... Kaj tiu malfeliĉa, terura mambesto, la viktimo de la vulturhomo, kiun skurĝobato pelis el la kaĝo al la rigardo de profanaj okuloj estis *lia* patrino... *lia* patrino... *lia* mizera torturita naskintino. Terure!

Liaj tempioj freneze pulsas. Pro senpova furiozo li ĉifonigis, disŝiris la leteron je mil pecoj. Nesuperebla doloro premadis lian gorĝon. Nevideblaj manoj enigis la ungojn en lian koron. Rifuĝi de la malkaŝita sekreto, rifuĝi de la pensado, rifuĝi de lia propra intelekto estis lia sola deziro. Aŭ plori, ploregi, trovi su-

fiĉe da larmoj por konsoliĝi! La vulturhomo ekkaptis ankaŭ lin. Li sentis sian baraktadon en lia potenco... La bestoj, bestohomoj estas pli sinceraj eĉ en siaj kruelaĵoj. La homobesto ĉiam artifikas, ruzadas, preparas embuskojn. La hombesto estas pli besta ol la besto mem... Bestohomo... Hombesto... Terure!

Subite li sentis kvazaŭ iu ektordus lian cerbon. Jes, kvazaŭ monstra mano kirlus la cerbon en la kranio. Pika konstanta doloro. La sango, kiel digfrakasa torento, zume brue kuregas al la kapo. La lango spasme gluigas al la seka palato kaj la okuloj volas elsalti el siaj kavoj... Plori, ploregi! Almenaŭ kriegi, kriegi, hurli, heni dolore korsire kaj beste aŭ home, estus egale, sed tio ĉi estas la komenco de certa freneziĝo... Terure!

Singarda, mallaŭta frapetado. La impresario venis en la ĉambron kaj lasis la pordon larĝe malfermita. Lia humila respektplena voĉo tiel orfe sonis en la silento kiel la bruo de falinta guteto en la kriptoj.

— Sinjoro Grauer, permesu, ke mi prezentu al vi Cezaron II-an, la fieron de via tre estimata karmemora patro, — kaj ne atendente la respondon li turnis sin al la koridoro kaj kun sama humila sinteno li daŭrigis, — Cezaro, bonvolu veni en la ĉambron kaj konatiĝi kun sinjoro Grauer, la filo de via iama majstro!

En la kadro de la pordo post momento aperis altstatura ĉimpanzo, vestita en funebra kostumo kun cilindro en la gantumita mano. Ĝia alia mano estis senganta, kiun ĝi proponis kun mirinda homa gracio por manpremo. Tiu ĉi gesto de la harkovrita mano revokis Cezaron Grauer al la realeco por momento. Sed tiu momento estis kriza, fatala. Ĝis nun nekonata malamo, eksplodanta furiozo, eble heredita de la gepatroj, pugnigis liajn manojn. Post momento ektondris orekfenda hurlo el lia gorĝo. Li saltis rekte al la ĉimpanzo kaj liaj pugnoj boksis al ĝiaj okuloj, frunto kiel pezaj martelbatoj.

Cezaro Grauer, la civilizita homo, la sinreganta intelektulo, perdis la homan prudenton kaj Cezaro II-a, la civilizita ĉimpanzo, aspektis kiel freneziga homo.... Du bestoj ekluktis je vivo kaj morto.

La terurkrioj de la mantordanta impresario eĥis akre, helpvoke, malespere tra la koridoroj....



DUA PARTO
POSTMORTA GRIMACO

Aŭtomobilo haltis antaŭ la pordego de la urb-estro. Jonathan Krak, la notario, kun ŝvitanta frunto, saltante du ŝtupojn suprenkuris kaj subite bremsis antaŭ la pordego. Lia plenda rigardo helpopete fiksigis al la skribisto, kuranta post li. Stubek, laŭaspekte kiel la sep malgrasaj jaroj mem, kunsentis kun sia ĉefo, ĝemspiris, perokule petegis al la ĉielo, poste senkonsile, sed servoprete ankaŭ li haltis ĉe la fermita pordego.

— Stubek, bonvolu ekpremi la butonon!

La brako de la skribisto obeeme eksvingiĝis. Akra sonorilbruo rompita la silenton de la domo. Al Jonathan Krak ŝajnis, ke tiu ĉi sonorilo orelfende bruas hodiaŭ. Kiel dangersignala veo, kiu renversas la ĉiutagecon.

La pordisto malfermis la pordegon kaj profunde riverencis. Sinjoro Krak turnis sin al li.

— La sinjoro urbestro, ĉu...?

— En sia skriboĉambro.

— Bone, — li diris kaj ekiris. Stubek, spasme tenante la paperujon sub sia akselo, rapidigis siajn paŝojn post la liaj. En la vestiblo akceptis ilin la ĉambristino.

— La sinjoro urbestro, ĉu...?

— En sia skriboĉambro.

— Ĉu li laboras?

— Eble, — respondis ruze ridetante la ĉarma blondulino. — En tiu horo tedas lin ĉia vizito.

— Sed mi nepre devas paroli kun li. Bonvolu raporti al li, ke Jonathan Krak, la urba notario, deziras fari viziton ĉe li.

La ĉambristino malaperis malantaŭ la remburita pordo de la skriboĉambro tirante post si la sopiran rigardon de sinjoro Stubek. Ĉiu blondulino kaj ĉambristino estis la sopirpunkto ĉe la skiribisto. Li vidis en la blondeco anĝelan naivecon kaj en la ĉambristino enkarniĝon de sindono. Sinjoro Stubek estis ja juna kaj flirtema (nu, tiomgrade, kiom povas esti flirtema iu aktovermo) kaj pro tio estas pardoneble, ke dum longa minuto li forgesis pri sia subuleco kaj revadis.

— Stubek, — vekis lin la seka voĉo de la ĉefo — vi restos ekstere. Se mi bezonos vin, mi vokos vin.

— Jes.

— Donu la paperujon!

— Laŭordone, sinjoro notario. — Li transdonis ĝin kaj en liaj okuloj rebrilis la petola penso, kiun en li vekis la dike remburita pordo de la skriboĉambro.

En la urbestra ĉambro la ĉambristino piedpinte faris kelkajn paŝojn al la sinjoro, kiu dormis korpulentigan sonĝon post la abunda tagmanĝo. Kazimiro Jenlafiŝ celscie faris tion dum ĉiu posttagmezo en la mola sino de sia leda fotelo. Li bone sciis, ke la ventro, elstaranta kun deca digno, havas gravan rolon en la altigo kaj konservo de la aŭtoritato. Lian vizaĝon kovris la plej freŝa numero de la »*Cioscio*«. Li legis ja nur registaran ĵurnalon. El la ĵurnaloj de la opozicia partio nur tiuj artikoloj interesis lin, kiujn krajonsignitaj transdonis lia sekretario al li. Legi opozician ĵurnalon flanke de la urbestro estas teda laboro kaj flanke de la civitano estas peko. Ĉi tiun internan principon — kompreneble — li ne publikis. La ĵurnalo kaŝis do lian vizaĝon, sed ĉirkaŭ lia kalva kapo

aŭreolon brilteksis la aŭtuna suno. Liaj grandaj grasaj manoj pendis ĝis la planko. En tiuj manoj, tenantaj la bridrimenon de la urbo, klare montriĝis tiu veturigista energio, per kiu li obeigis la partiojn, okulumentajn al diversaj mondperceptoj.

La ĉambristino singarde forigis la sursternitan numeron de la »*Cioscio*« kaj post la malkovra gesto la kaŝitaj ĉarmoj de la sinjoro urbestro fariĝis videblaj. Sane plenvanga, trimentona vizaĝo, iom suspekta ruĝeta terpomforma nazo kaj nikotinflavaj lipharoj kun enviinda longeco faris lin karakterize interesa je lia plej granda ĉagreno, ĉar tiuj malbenitaj karikaturistoj volonte trouzis tiujn malavarajn donacojn de la naturo.

Je la delikata tuŝo de la ĉambristino ekmoviĝis la kolosa korpo.

— Nu, kio?... Kio okazis denove? — La lamenta voĉo kiel vivanta refuto mokis lian imponan eksterajon. Ĝi knaris kiel trouzitajn fajfilojn havanta gurdo kaj se li incitiĝis, tiam en neatingeblaj sferoj ĝi singultadis. — Ĉu mia fratino vekigis min? Diru al ŝi, ke ni havas ankoraŭ tempon.

— Sinjoro Jonathan Krak, la urba notario estas ĉi tie. Nepre li volas paroli kun la sinjora moŝto.

— Diru al li, ke mi tre bedaŭras, sed mi ne povas akcepti lin. Hodiaŭ estos enketo, pli ĝuste bankedo ĉe lia ekscelenca moŝto la financministro kaj mi nun preparas min.... Ĉu komprenite?

— Jes, sinjora moŝto, sed....

— Kia *sed*? Ne ekzistas *sed*! Pro la amasiĝinta laboro mi ne scias ja kie estas mia kapo, nu!

— Bone, mi diros, sed laŭ mia opinio li volas paroli pri tre grava afero, ĉar li ŝajnas esti tre incitata kaj kunportis sian skribiston.

— Jes, tiel? Verŝajne, denove tiuj ĉi malbenitaj liberalistoj volas mueli pipron sub mia nazo... Nu, mi finos kun ili!... Enlasu tiun Krak!... Atendu nur momenton, Lida! Kia homo li aspektas? Ĉu liberala?

— Mi ne scias, sinjora moŝto.

— Nu, memkompreneble, kiel vi scius... Sed kial vi ridetas?

— Pro nenio... sed mi pensis, ke li apartenas al la partio de via sinjora moŝto.

— Jes? Pri kio vi pensas?

— Nu, ili ambaŭ ŝajnas timemuloj.

— Sed diri tion?!... Tuj enkonduku sinjoron Krak!

La ĉambristino eliris. La urbestro eksidis al sia skribotablo kaj ŝajnigis fervoran studadon pri la memorando de la kloakopurigistoj. Estis ja tempo, ĉar la notario kun humila klino jam paŝis en la ĉambron. Sinjoro Jenlafiŝ tuj rekonis en li la senvertebron de la urbaj oficistoj kaj kun facila rideto proponis sidlokon al sia gasto.

La notario eksidis. La ĝena devoplenumo ŝvitperlis sur lia frunto. Li forviŝis ĝin kaj kun parolatenda respekto fiksas sian rigardon al la vizaĝo de lia urbestra moŝto. Jenlafiŝ ekkompatis lin, rememoris pri la rimarko de la ĉambristino. Fakte, tiu ĉi estas lia partiano. Nur liaj partianoj aspektas tiaj timemuloj. Amikece li metis la manon al la ŝultro de la notario.

— Nu, kio nova, sinjoro Krak?

— Sinjora moŝto, tiu Vilhelmo Grauer, la artisto, mortis.

— Dio donu ripozon kaj pacon al li! Sed tio ĉi tute ne interesas min.

— Al mi estu permesita deklari libere mian opinion, ĉar mi kontraŭdiras al via urbestra moŝto kaj tiun Vilhelmon Grauer mi deziras en la profundan fundon de la fajra infero. Sinjora moŝto, tiu ĉi freneza dresisto, tiu ĉi ekstravaganculo, mankumanta ĉian homan dignon, tiu ĉi naskito de nia amata urbo Strutmagen...

— mortis. Tion mi scias, — senpaciencis la urbestro. — Ĉu ni devos enterigi lin?

— Ho, tute ne! Hieraŭ oni enterigis lin kun tia

pompo, je kia havas rajton nur kronprinco. Ne tio estas la domaĝo! Sed Vilhelmo Grauer estis amerikano, kiu testamentis sian tutan havaĵon 230, tio estas, ducent tridek milionojn da dolaroj al nia urbo.

— Kioooo? Dudududucenttri... — la surprizita urbestro senvoĉe malfermadis la buŝon kaj impresis kiel grasa siluro sur la bordo. Li energie ekkaptis la dorsapogilon de la seĝo, kvazaŭ li kaptus jam la tutan heredaĵon.

— Jes, du-cent-tridek milionojn da dolaroj.

— Sed homo, la ŝtata kapitalo de la tuta Bagonio ne superas tiun sumon!

— Kion fari? Fakto estas fakto. La reprezentantoj de la Urba Konsilantaro laŭ la deziro de la testamentinto ĉeestis dum la lego de la testamento.

Kazimiro Jenlafiŝ komencis ekscitite kuradi tien kaj reen. Dum momentoj desegniĝis antaŭ liaj okuloj la ĉefurbo, metropoliĝinta sub lia urbestreco kaj li vidis eĉ la statuon, por lia memoro starigitan de la dankema posteularo. Subita kolero ekregis lin.

— Kaj vi kuraĝis deziri en la profundan fundon de la fajra infero tiun ĉi puran bagonan karakteron, tiun ĉi grandaniman patrioton, danke rememorantan pri sia patrujo?! Sinjoro Krak, espereble vi ne apartenas al la liberala partio, aŭ jes?!

— Dio gardu min! — protestis la timigita notario — sed sinjora moŝto, ankoraŭ vi ne bonvolis finaŭskulti la motivigon de mia antaŭe citita deziro. Tiu ĉi freneza miliardulo ligis la posedeblecon de la heredaĵo al tiaj kondiĉoj, kiaj estas senekzemplaj ne sole en Bagonio, sed ankaŭ en la historio de la tuta kulturmondo. Tiuj kondiĉoj vangofrapadas la Homaron kaj estas neplenumebaj.

— Mi ne komprenas. Bonvolu pli detale klarigi!

— Plej oportune, se mi legos por vi la koncernan dokumenton. — Sinjoro Krak prenis la skribon el sia paperujo. Ĝi estis nur kopio, ĉar la origi-

nalon transprenis oficiale la urba arĥivisto. — Jen, bonvolu bone atenti!

Donante certan aplombon al gravaj vortoj kaj kritikaj partoj la notario laŭtlegis la testamenton de Vilhelmo Grauer. La urbestro variigis sian koloron. Li fartis kiel tiu, sub kiu oni fortiradas la tapiŝon. Ne sole la forruliĝantaj dolaroj zigzapis antaŭ li, sed li aŭdis eĉ la piedknaradon de la urbestra seĝo. Li paligis. Ne, tiu ĉi dokumento ne estas publikebla kaj provizore estas necese prisilenti ĝin. En tiu momento responde eksonis hurlo raŭka de kolportisto: »*Heroldo de l'Popolo... Eksterordinara eldono!... Testamento de Vilhelmo Grauer... Ducent tridek milionoj da dolaroj al la urbo Strutmagen...*« Ĉirkaŭ la kapo de Kazimiro Jenlafiŝ vagadis tiu certa afero, kiun al li ofte deziris liaj malamikoj.

La notario finis la legadon.

— Sinjora moŝto, kiel vi povas konstati, la afero estas tre serioze konsiderinda. La du subskribintoj, kiel atestantoj, estas amerikaj civitanoj, kiujn ni ne povas akuzadi, pridubi sen diplomatia konflikto kaj la heredaĵon, gardatan en la plej bonfama banko de New-York, ni ne povas konfiski.

— Ho, ke la fulmo estus trafinta la tutan aferadon!

— Identan opinion mi havas la honoron esprimi koncerne la aferon.

— Sed nepre ni devas trovi ian elirvojon, — incitite ekkriis la urbestro. — Tiom da mono oni ne eljetas tra la fenestro! Hodiaŭ vespere bankedon aranĝos lia ekscelenca moŝto la financministro. Pro tiu ĉi neatendita intervenaĵo, tre verŝajne, la bankedo fariĝos enketo. Mi fidas plene la genion de lia ekscelenca moŝto Tobio Akapar.

— Ne estas permesate forgesi, sinjora moŝto, ankaŭ tiujn sekurigajn aranĝojn, kiujn entenas la testamenta klaŭzo. Bonvolu rememori pri la antaŭe legitaj! La kontrolo pri la plenumado de la testamen-

taj kondiĉoj estas komisiita al la prokuroro de tiu banko, en kies sefo n-ro 135, ŝlosita kaj sigelita de Vilhelmo Grauer mem, estas gardata la grandioza heredaĵo. La sefo estas asekurita ĝis plena valoro de la sumo testamentita kontraŭ ŝtel- sigelrompo kaj brulo kaj tiel la vivekzisto de la asekura socio dependas de tio, ke la sefo ne estu malfermita antaŭ la limtago. Tiu ĉi limtago koincidas kun la limtago de la plenumotaj kondiĉoj. Ni vicigu la konsekvencojn! Unue, la inventariado de la heredaĵo estas malhelpita; due, se dum la limigita tempo ne estos plenumitaj la kondiĉoj, rajtigantaj la posedeblecon de la heredaĵo, la tuta grandioza kapitalo transiros en la ŝtatan kason de Usono. Kaj ni ne forgesu pri la filo de la testamentinto, pri Cezaro Grauer.

— Kiooo? Eĉ filon li havas? La testamento tute ne mencias lin.

— Jen, ĝuste tio mirigas min pleje. Sed tiu ĉi forgeso, fakte senheredigo komplikas la situacion. Laŭ la heredleĝo la senheredigita infano havas rajton procesi kontraŭ la testamento, escepte, se la infano jam estis kontentigita, rekompencita dum vivo de la gepatroj. Nun la demando, ĉu Vilhelmo Grauer rekompencis jam la filon dum sia vivo?

— Kolose! Piramidale! — Kazimiro Jenlafiŝ entuziasmis pri sia subita ideo kaj tiel forte ekskuis la notarion, kvazaŭ li estus volonta forigi la animon el li. — Homo, aŭskultu! La prostituinoj estas solvitaj!

— Kikikieel? Mi ne komprenas.... Solvitaj??!

— Aŭskultu, homo! La filo procesos kontraŭ la testamento, por ke li povu ricevi sian parton, laŭleĝe certigitan. Sed la urbo grandanime rezignos pri la tuta heredaĵo kaj sekrete konsentos kun la juna Grauer, kiu kiel rajta posedanto redonos la duonon de la heredaĵo per donacdokumento al la urbo. Ne estos proceso, nek perturbo. Nu, kiel vi opinias? Kolose, ĉu ne?

— Bedaŭrinde, mi devas deklari kontraŭopinion

al tiu de via sinjora moŝto, sed tion mi faras kun respekto plena bedaŭro. Jen, miaj argumentoj : unue, ĉar la juna Grauer ŝvebas inter vivo kaj morto en nia plej bonfama sanatorio ; due, ĉar li volas aŭdi nenion pri la heredaĵa afero, malbenas la memoron de sia patro, aŭ alivorte li rezignis pri sia heredrajto ; trie, ĉar se la urbo mem eĉ rezignos pri sia rajto, kiun certe ne volonte faros, tamen restos la rajto de la prostituinoj, loĝantaj en la urbo Strutmagen kaj ili procesos ; kvare, ĉar . . .

— Sed tio ja nebla ! Ĉiu aparte ne povos fari tion ?

— Ili organizos sin en societo, havanta statuton kaj ilia prokuroro . . .

— Harstariga teruro ! La prostituinoj, kiel moralaj korporacio ! Frenezaĵo !

— Do, kvare, ĉar eĉ la persvado ne havas racion eĉ la juna Grauer, la vicordo de heredo restos ja : la urbo, la prostituinoj aŭ Usono mem en kazo de plena rezigno. Ĉu vi bonvolas kompreni la situacion ? Konsiderante ĉion ne estus racie, se la urbo rezignus, se oni persvados la junan Grauer, se la prostituinoj rezignus, ĉar Usono forglutos la nemezureblan heredaĵon, signifantan por ni grandiozan prosperon.

Kazimiro Jenlafiŝ profundigis en sian komfortan fotelon kaj en la malagrablan pripensadon. Verdire, la duan li ĉiam faris en la unua, sed la unuan li preferis al la dua. Cetere li kondutis kun speciala ŝato al la seĝoj, precipe li spasme kroĉigis al la urbestra seĝo kaj nun li sentis, ke la objekto de lia korporefero preparas sin je ekmigrado. Li devas reteni ĝin eĉ je la kosto de sia vivo, ĉar per persista laboro de tuta vivo li akaparis ĝin sub sin. Sed kiamaniere ? Li ne povas ja kontraŭstari al Usono ! Por tio li ne havas la deziratan aŭtoritatan dignon. Ĉu li procesadu kontraŭ la prostituinoj ? Tro riske ! Ĉu li senhezite plenumu la kondiĉojn de la testamento, starigu

la monumenton kaj eble eĉ pozu kiel modelo al la figuro etendanta manon al la simio kaj ĉiujare frakvestita, kun cilindro en la mano aperu antaŭ la kaĝo de la pavianoj? Tio ĉi donus al li tian popularecon, kian li tute ne deziras. Ĉu li rezignu pri la heredaĵo je la nomo de la urbo? Ho, tio ŝajnis plej dolora, plej malsaĝa penso. Memmortigo, certe memmortigo! Ĉu la pro soifo mortanto ŝtopus la fonton, mirakle elŝprucantan, antaŭ ol li estus trinkinta? Ne! Kaj li estas ja soifa. Ho, kiel soifa! Nepre necese do trovi solvon!

Lia rigardo, peteganta por savideo, karesadis la longstaturan figuron de la urba notario. Momenton li havis envion. Se la urbestro estos eksigita, tamen la notario restos, eĉ povos fariĝi lia posteulo kaj tiam li, la fiera Kazimiro Jenlafiŝ venus kun ŝvitperla frunto, riverenca humilo al la nova Grandsinjoro. Certe, tio signifus lian morton. Tamen, kiu scias, kion alportos la estonteco? Estus prudente akcepti tiun ĉi grizan figuron, al kiu nun la hazardo donis gravan rolon, en lian amikecon. Jes, en amikecon, sed ne en konfidon. La konfido senvestigas la animon nuda kaj la sinjoro urbestro estis tre hontema pri siaj ĉarmoj.

— Kara sinjoro Krak, — li komencis kun mallaŭta lamenta voĉo, — mi aŭdis jam ofte pri viaj eminentaj individuaj kapabloj kaj tio tre trankviligas min nun, kiam mi estas devigata peti vian konsilon pri tiu ĉi gravega afero. Sciu, kara amiko, ke nia nuna interkonsiliĝo formas la bazon de tiu raporto, kiun dum la hodiaŭa enketo mi faros al lia ekscelenca moŝto la financministro. Mi ne forgesos mencii viajn altvalorajn servojn. Vere, vi tre honorus min, se vi deklarus vian opinion kaj montrus direkton al la eventuale plej feliĉa solvo de la problemo. Kara amiko, mi fidas viajn genion kaj klaran prijuĝon, tiom ofte laŭditan antaŭ mi.

Jonathan Krak ĝenite turnadis sin sur la seĝo.

Lia incensumita vanteco proporcie estis multe pli malgranda ol lia modesteco, kiu ofte limiĝis ĉe malkuraĝo. Li flaris urbestran ruzadon. Eble, lia sinjora moŝto tiamaniere volas forskui de si la respondecon pri ĉiuj konsekvencoj de la heredafero. Laŭ lia propra scio la Urba Konsilantaro neniam petis lian konsilon. Eĉ sian oficon li povas danki al tiu bonŝanco, ke la filinon, nomatan Lola, de sia iama ĉefo li edzinigis. Ĉu ofica genio? La ofica genio ne ĉiam estas virto. Je demaĝo de kelkaj siaj kolegoj li lernis tion kaj li neniam dezi- ris havi la martiran vivon de geniulo, stigmita de revolu- cionemo. Nun lin surprizis do la akuzado pri tiuj ĉi eminentaj individuaj kapabloj. Li trovis sian situa- cion kriza. Ĉu li diru sinceran opinion, aŭ per dip- lomata respondo evitu la varmegan kaĉon? Tiam di- lemon li havis nur tiam, kiam lia iama ĉefo kaj oficeja antaŭulo svatis lian manon por sia filino Lola. Tiam li ĝemis jeson, kaj jen la konsekvenco kun sia plena pezo falis sur lin: Lola kun siaj okdekkvar kilo- gramoj. De post tiam li abomenas la operon «Caval- leria Rusticana». Lia sentema koro ne povas toleri la grandan arion: «*Lola sur via vang' pompas rozo...*» La rozo de lia Lola respondus je Mamut-pomo, eĉ neparolante pri la ok rozburgonoj, elkreskintaj sur tiu ĉi rozujo. Ok filinoj! Ho, se la Dio almenaŭ estus donacinta dote ok heredigeblajn oficojn! Por la mal- granda Lola jam li elektis viktimon, sinjoron Stubek, sed kio okazos al la aliaj sep? ... Kaj jen, nun al la zorgoj de la familiestro venas demando, kaŝanta urb- estran ruzon. Kio estas lia opinio pri tiu ĉi ku- rioza afero? Verdire, li havas opinion pri tio, sed deklari tion li ne riskas. Povos okazi, ke la Vivo kon- sideros lian respondon jeso kaj per la konsekvencoj eltordos lian kolon.

— Nu, kara amiko mia, nur senĝene, — admonis lin la urbestro.

La granda kolora poŝtuko de Krak denove ekiris por ŝvitviŝado. Li rigardis por indulgo al la trimentona

vizaĝo, sed renkontis nur indiferenton de senkompateco kaj Krak kapitulacis antaŭ sia sorto.

— Sinjora moŝto, mi sentas min eta sensignifa punkto por servi per konsilo al la kapo de la urbo. La spirita supereco, la administra saĝeco de la atestimata urbestro nur estus embarasata per la bagatela konkludado de iu ofica subulo, se mi kuraĝus esprimi mian opinion en formo de konsilo. Ĝuste pro tio ĉi mi ne havas ŝancon konsili, sed mian opinion, nutratan de suspekto, volonte mi komunikos al vi, substreke akcentante tamen, ke nehavante faktajn pruvojn por mia ĝermanta suspekto, tion mi ne povas deklari sekvida, aŭ per aliaj vortoj : jam nun mi petas humile absolvon pri konsekvencoj de mia opinideklaro.

— La absolvon vi havas jam, — pozadis gravmiene sinjoro Jenlafiŝ.

— Tutkore mi dankas. Kiel vi eble scias, mi havas ok filinojn kaj kiel zorgema patro, mi... Sed tio ĉi ne apartenas al la afero. Ĉiukaze volonte mi plenumas la honoran deziron de via sinjora moŝto, kiam komunikante al vi mian suspekton, mi aldonas al ĝi la koncernajn argumentojn je eventuala konsiderado. La kuriozeco de la testamento, la ekstravaganca naturo de la testamentinto, plue la cirkonstanco, ke la letero, transdonita de mi al la juna Grauer, rezultis perdon de anima ekvilibro ĉe li, permesas al mi konkludi, ke la sefo n-ro 135 de la new-yorka banko ne entenas ion pli ol aeron, aŭ alivorte, la testamentita heredaĵo estas en la Luno.

La urbestro ekscitite leviĝis. Tiu konkludado surprizis lin. Li ne sciis, ĉu koleri aŭ ridi? Li fiksissian rigardon al la malespera mieno de Krak, legis el la trajtoj, iom nerve baraktantaj. Tiu ĉi viro scias ion, kion li kaŝas aŭ kion ĝis nun li ne povis rakonti. Eble, li volas erarigi lin kaj sub la masko de la lojaleco insidas dungito liberala. Ioma timigo ne domaĝos, sed nur ioma, delikata, eĉ milda, ĉar li aŭdis jam, ke terurita homo mutiĝis kaj la vortojn de muta civitano

eĉ la urbestro ne povas kompreni. Kelkfoje li paŝmezuris la ĉambron, poste subite haltis antaŭ la notario. La rigardon longe penetre li kroĉis al liaj okuloj.

— Sinjoro Krak, mi ne neas, ke via opinio konsternis min. Mi ne volas supozi, ke via komunikaĵo mankumas ĉian seriozan bazon kaj vi intencas igi min ridinda je admonado de certaj personoj, sed...

Krak ŝanĝis koloron, liaj genuoj ekstremitis. Tamen li bone konjektis, ke urbestra ruzo kaŝiĝis post la demando.

— Sed, atestimata sinjoroora momomoŝto, kiel vi... kiel vi... mi havas ja ok filinojn sen doto... kaj...

La mieno de la urbestro sereniĝis. Li volonte estus ridetinta, se la situacio ne estus tiel kap-al-tera.

— Jes, ja... memkompreneble... ok filinoj... Mi tute forgesis pri tio... Jes, kion vi volis diri, kara sinjoro Krak?

— Laŭ mia scio, mi volis diri nenion... tamen, jes... Miaopinie la ŝlosilo de la problemo estas en la manoj de la juna Grauer.

— Kiel vi pensas?

— Jam mi havis la honoron mencii, ke mi transdonis al li leteron antaŭ la enterigo. Tiun leteron kun la testamento lia patro, unu semajnon antaŭ sia morto, transdonis al mi. Nu, tiu letero, aŭ skribo, aŭ mi ne scias ja kio, instigis la junan Grauer je tia ago, kiu preskaŭ kostis lian vivon. Li atakis la muskolan ĉimpanzon de sia patro, luktis kun ĝi je vivo kaj morto kaj se la orfeonaj servistoj kun la eksimpresario ne estus liberigas lin, tute certe la furiozanta besto sufokas la malfeliĉan junulon.

— Kaj kion enhavis tiu letero?

— Jen kion scii estus bone! Tiam solviĝus la enigmo per si mem. Sed la juna Grauer ne emas paroli pri tio. La leteron, verŝajne, li neniigis, ĉar dum lia transportado al la sanatorio oni ne trovis ĝin ĉe li.

— Ni devas ekparoligi lin eĉ perforte !

— Germana civitano, do eksterlandano kaj prosekretakiro de privata letero estus tre riske fari diplomatian konflikton inter Bagonio kaj Germanujo. Mia opinie, se vi, sinjora moŝto, kun via konata takteco intervenus kaj persvadus la junan Grauer je revizio de lia sintenado, tio estus la plej celatinga. Neniu povus ja pli inde priskribi antaŭ li la nerezisteblecon de tiu ĉi situacio ol vi, sinjora moŝto, kiu estas destinita zorgadi pri la sorto kaj bonfarto de Strutmagen.

Sinjoro Jenlafiŝ kontente kapjesadis.

— Laŭ mi, sufiĉus scii *kial* la patro senheredigis sian filon. Se ties kaŭzon ni konos, ni estos pli proksimaj al la kaŭzo de la strangaj testamentaj kondiĉoj kaj samtempe ni scios, ĉu la heredaĵo troviĝas en la luno aŭ en la sefo n-ro 135.

La urbestro ne povis kaŝi sian admiron precipe ne nun, kiam la laŭdo eble alportos pluan profiton.

— Kara, mia bona amiko, via akravido atestas pri la laŭdoj, kiuj anticipis nian interkonatigon. Mi tre ĝojas, ke ankaŭ mi mem povis konvinkiĝi pri via kapableco. Vere, vi havas ofican genion kaj mi pensas, ke en proksima okazo vi havos ŝancon por la posteno de la urba ĉefnotario.

— Ho, altestimata urbestra moŝto, vere bagatelajo... nu, kiel mi diru?... via sinjora moŝto, vi atribuas tute netroveblajn meritojn al mi... nu, kiel... jes, vi tro alte taksas mian genion kaj devigas min al ĉiama danko, ĉar verdire, ok filinoj kaj eĉ ne unu bofilo kaj... kaj... mi ne havas bonajn aŭspiciojn je ok bravanimaj junuloj... Sed, mi pensas, ke tio ĉi tute ne koncernas la aferon de tiu ĉi heredaĵo...

— Eble ne, sed eble jes, — kaj sinjoro Jenlafiŝ sfinkse ridetis. — Mi ne povas fari certan promeson, sed verŝajne la urbo ne avaros kontraŭ tiuj oficistoj, kiuj ĉe la akiro de la nemezurebla riĉaĵo konsciencce plenumis la devon. Inter ili ankaŭ vi, kara amiko, certe havas vian parton, ĉar vi estas ja tiu,

al kiu la mortinto komisiis la testamenton kaj ĝian legadon. La unuan sciigon vi portis al mi kaj krome per via altvalora opinideklaro jam ĝis nun vi faris tre utilajn servojn al la afero.

Sur la sekaj vangoj de Krak ekbrilis sincera ĝojesprimado, sed ne longe. La serenon sekvis nebulo de suspekto.

— Kaj se tiu sefo entenas nenion?!

— Kaj se ĝi entenas ĉion?! — En la voĉo de Jenlafiŝ sonis forta fido.

La du kontrastesprimaj rigardoj renkontis sin kaj subite ŝanĝis lokon. La duba »*kaj se*« de Krak ekzidis en la rigardon de la urbestro kaj ties fidoplena »*kaj se*« rebrilis sur la mieno de la notario. Tiu ĉi »*kaj se*«, forflugante el la urbestra ĉambro al la vasta mondo, baldaŭ gravan rolon havis en la historio de Bagonio, precipe en tiu de ĝia ĉeŭrbo Strutmagen. Apenaŭ post paso de tago ĉiu civitano de Bagonio per tiu »*kaj se*« komencis aŭ finis sian diskuton. Ĝi fariĝis detruanto de familia paco, disiganto de partioj, antagonismo-semanto inter amikoj, kunpelanto de bonuloj kaj maliculoj en komunan tendaron. Kiel nehaltigebla epidemio tiu »*kaj se*« ŝtelis sin trans la limojn de ĉiu kulturlando kaj incitis, venenis la ĵurnallegantaron de ĉiu popolo dum ses longaj monatoj. Sed en tiu momento pri tio, kion la utero de la estonteco kaŝis por Strutmagen, Bagonio kaj la tuta mondo, la du urbaj funkciuloj sciis nenion. Ilin incitis sole la problemo: *jes aŭ ne?*

— Sinjora moŝto, mi havus tre modestan proponon.

— Nur brave, kara amiko Jonathan. Vi scias ja, kiel alte mi taksas vian inventemon.

— Estas rimedo (memkompreneble mia financa situacio ne permesas ĝian efektivigon), per kiu dum 24 horoj ni povus informiĝi pri fidindeco de tiu testamento. Eĉ se ĝi ne donus plenan certeton, tamen la verŝajnecon pruvus du radiogramoj, senditaj al la

banko, menciita en la testamento kaj al la asekura societo. Ni petus tujan respondon kaj de la ricevita informo dependus nia posta sintenado.

Je larĝa rideto tirigis la urbestraj lipoj. Kontente li gratulis al si. La taktiko de amikeca konduto bone efikis. Tiu ĉi homo malfermigis antaŭ li. Vere, ĝis ricevo de certaj informoj li devus akcepti la principon de neŭtraleco, ĉar ĝi gardos lian aŭtoritaton, aŭ almenaŭ ne elmetas ĝin al danĝero. La respondoj pri la radiogramoj difinos la pluajn konsiderojn. La popolamaso juĝos tion saĝa antaŭvido kaj lia aŭtoritato plifirmigos. Sed, memkompreneble, pri tio oni devas scii, eĉ konjekti nenion. Jes, sed... Kaj nun per rigardo li mezuris *de verto ĝis plando* la figuron de la notario. Cetere la rigardmezurado *de verto ĝis plando* apartenis al la oficialaj kutimoj de la urbestro. Mezuradi *de plando ĝis kapo* nur la simpla civitano havas rajton kaj eĉ tion kun humilo en deca tripaŝa distanco. Tamen en tiu ĉi momento li opiniis la malpliigon de la distanco — tute racia, kompreneble kun konservo de la respekto, ĉar sinjoro Krak povas esti babilema vireto kaj tiel li baldaŭ distrumpetos sian ideon en la urbo. Sed se eĉ li ne estas babilemulo, li havas ok klaĉemajn filinojn, kiuj el sola vorto, nevole elparolita, faros tian historion kun la najbaroj, kiu senigos de ĉiu valoro tiun ĉi oficialan sekreton. Necese estas agi do, sed delikate, takte kaj noble. Ĉio ĉi dum momento trakirliĝis en la kapo de Kazimiro Jenlafiŝ kaj post momento li etendis sian grasan manegon al Krak.

— Permesu, kara amiko, ke mi gratulu al *cia* ideo. Memkompreneble mi kalkulas pri *cia* nepra diskreteco, ke ci ne mencios la aferon eĉ al cial plejproksimuloj. Vere, tio havus malagrablajn konsekvencojn. Ci scias ja, oficiala sekreto, perfido de taktiko, kaj tiel plu. Vere, tiam eĉ per mia amika bonvolo mi ne povus eltiri cin el la kaĉo.

— Sed, sinjora moŝto, kiel *ci* eĉ... kiel *vi* eĉ povas supozi tion pri mi.

— Krome, mi petus cin je amika komplezaĵo... Espereble, ĉi ne koleras pro la *ciado*? Finfine mi estas ja pli aĝa kaj...

— Ho, granda, jes... vere tre granda honoro por mi, ke... ke... ĉi bonvolas ...ke vi bonvolas tiel umi... distingumi min... Nu, via... ĉia..., Sed kio estus do tiu kompl... komplezaĵo?

— Bagatelaĵo. Ĉi bonvolos sendi je mia kosto la du radiogramojn. Memkompreneble, oficiala sekreto! Ĉio, kio okazas inter ni, estas oficiala sekreto.

— Jes, jes... Memkompreneble ja!

— Atendu momenton! Mi donos monon.

La urbestro malŝlosis la doman monŝrankon, transdonis unu milguldan bankbileton al la notario.

— Bonvolu aranĝi kiel eble plej baldaŭ!

— Senprokraste, urbestra moŝto, senprokraste.

Sinjoro Krak prenis la paperujon sub la akselon, ekiris al la pordo, por momento haltis kiel tiu, kiu kuraĝigas sin, turnis sin al la urbestro kaj fiertone envortigis la maltrankvilon de sia brusto.

— Kaj, sinjoro urbestra moŝto, mi petas pardonon, sed tiu umo... tiu... nu, ankaŭ tiu *ciado* estas oficiala sekreto?

— Ho, kiel ĉi pensas tion?!... *Servus!* (')

Krak per subita gesto larĝe malfermis la pordon kaj tro laŭte adiaŭis.

— *Servus*, mia kara sinjora moŝto!

Sed lia triumfa rigardo, per kiu li volis impone subigi sian skribiston, neatendite rompiĝis pro la surprizveeto de la ĉambristino, rifuĝanta el arda ĉirkaŭpreno kaj pro la mieno de la skribisto, ruĝa ĝis tempioj pro ekscitiĝo. Li rapide refermis la pordon.

— Stubek, — li kolere altigis sian voĉon ĝis tono, permesebla en fremda domo, — vi perfide misuzis mian konfidon, vi misuzis la oficialan dignon. Vi estas ja moderna *Tartufo!* Dum via ĉefo klopo-

(') kutima saluto de interciantoj.

dadas kun sia urbestro-amiko malligi la nodon de tre grava problemo, vi...

— A-a-a-ankaŭ mi... ankaŭ mi... — balbutis la ruĝiganta junulo kaj per rapida manovrado glatigis siajn hirtigitajn buklojn.

— Kion? Ĉu ankaŭ vi? Jes, verŝajne, vi klopodis malligi la nodon de la virina kostumo. Fi! Ĉu ne honte? Vi, vi, vi — moderna *Casanovo!*

— Sed mi petas, sinjoro notario... vi miskomprenas la situacion... La ŝajno trompas vin.

— Vi estas prava. La ŝajno trompas min. Kaj ĉar nun vi estas la ŝajno, do vi trompis min. Vi trompis mian patrekan bonvolon al vi. Ho, moderna *Brutus!* Stubek, vi ne meritas la manon de mia filino Lola.

Sinjoro Stubek ne protestis, senvorte sekvis sian ĉefon. Lia silento signifis konsenton kun la deklaro de Krak kaj kun ĝojo li konstatis, ke la senmeriteco senigis lin de tiu, kies ricevon li timis pli ol sopiria.

II.

Cezaro Grauer akompanis sian gaston ĝis la ŝtuparo. La mieno de la urbestro klare montris, ke lia vizito finiĝis fiaske. Ĉe la unua ŝtupo li returnis sin por fari ankoraŭfoje provon.

— Ne, ne! Vere, mi tre bedaŭras, sed tio ĉi estas plej interna privata afero kaj... Ni ne parolu pri tio! La testamento, la tuta afero, kiu kreis tiel embarasan situacion por vi, min detruis, neniĝis. Tio servu kiel konsolo por vi ĉiuj! Adiaŭ!

Cezaro Grauer retiris sin en sian ĉambron. Ĝis la ekiro de la vagonaro li volis paki kelkajn bagatelaĵojn. Plej prudente por li — eskapi de tie ĉi.

La urbestro longe pensadis pri la malgrasa konsolo. Lia rigardo trafis la flavan kupran ornamajon de la bariero. El la fandaĵo li vidis nur la flavon kaj ne la kupron. La flava koloro rememorigis lin pri la koloro de la oro, la orkoloro pri la tintantaj dolaroj. Balancante sin kiel la graveda kamelino de la dezerto li *malsupreniĝis* sur la ŝtuparo. En vera senco de la vorto li *malsupreniĝis*. Li ne konsciis pri sia irado. Li sentis sin konstruanta. Kaj verdire li konstruis belegajn kartfortikaĵojn sur la dolarmonto de la sefo n-ro 135. Ĉe la pordego la humila saluto de la sanatoria pordisto revokis lin al la kruda realeco. Kion fari? Nun kion fari? La radiogramaj respondoj povos alveni en la plej favora kazo nur morgaŭ matene. Sed kion ĝis tiam? La ĵurnalo de la liberalis-

toj jam faris la demandon, ke ili scivolas pri la opinio de la urbestro. Interese, ĉu li havas opinionon, aŭ ĉu li povas havi opinionon? Vere, ĝis nun li ĉiam havis tion, kvankam neniam koincidan al tiu de la amaso, sed nun li konjekte sentis, ke en tiu ĉi afero estus racie akcepti la opinionon de la civitanoj, ĉar li ne havas ja propran. Sed kio estas la amasoponio? Unu radikale liberala ĵurnalo forte asertas, ke estas heredaĵo, la alia, iom pli mildprincipa, jam dubas kaj la registara presorgano, la »*Cioscio*«, diras nenion, promesas, ke post certaj informoj esprimos sian opinionon. La rezerviteco de la registaro estas tre suspektinda. Tia rezerviteco povas havi du kaŭzojn: malagrable aŭ agrable estas por ili la tuta heredaĵafero. Se ĝi estas malagrable, la silento estas komprenebla kaj se ĝi estas agrable por ili, la plena silento estas *eĉ pli* komprenebla. Certe, ili celas iamaniere flankenpuŝi la urbon por akapari la grandiozan heredaĵon. Ho, ne, tio ne okazos! Li ne toleros... Sed nun trankvilon, trankvilon, ĉar ankoraŭ nenion certan li scias. Hodiaŭ vespere li orientiĝos. Sed kion fari ĝis tiam? Kun tiu ĉi obstina junulo ne eble komenci ion. Post unu horo li forvojaĝos, post du horoj estos trans la limo de Bagonio kaj post du tagoj laboros jam en sia kontoro en Berlin. Al kiu turni sin? Ciu estas suspektinda, kiu vivas! La homoj estas ja tiel monavidaj. Malofta karaktero batalas por la komuna bono. Vere, estus jam tempo, ke ankaŭ tiuj ricevu rekompencan, kiuj ĝemas sub la ŝarĝo de la komunumaj zorgoj. Tia heredaĵo, kvazaŭ falinta el la ĉielo, donus okazon al la urbo, ke ĝi rekompencu sian filedan servanton per la plialtigo de la reprezenta fondo kaj duobligo de la mizera urba-estra salajro. Kaj poste, kiam la saĝeco de la urbestro faris la urbon prospere granda, tiam oni povos honori lin per aliaj bagatelaĵoj. Ne pri statuo li pensas. La statuo sufiĉos post lia morto. Ho, kiom da eblecoj oni havas por honorarii la idealajn klopodojn. Jen, por ekzemplo, tiu ĉi Krak, al kiu li promesis la poste-

non de la urba ĉefnotario kaj al kiu li malaltiĝis ĝis ciado. Hm! Jonathan Krak kaj liaj ok filinoj...

La mieno de Kazimiro Jenlafiŝ subite sere niĝis. Jen, al kiu turni sin! Li decidis venigi al si la notaron. Tiu ĉi vireto plaĉis al li. Tute certe li ne forgesos pri li ĉe la dividado de la profito... Nu, pro tiu ĉi penso li iom ruĝiĝis, sed tion li atribuis al la laciga ŝtuparo. Nur nun li rimarkis sian longminutan staradon antaŭ la pordego, sian ŝoforon ĉe la aŭto.

— Lojz, aŭskultu, — li diris jam sidanta en la aŭto, — rekte hejmen, sed dumvoje ni haltos antaŭ la domo de la urba notario Jonathan Krak. Vi sciigos lin, ke mi senprokraste deziras paroli kun li en mia loĝejo. Ĉu komprenite?... Vere, ĉu vi konas lian adreson?

— Mi pensas, ke li loĝas en la strato Otto Pastrosak.

— Jes, jes... Mi tute forgesis. Nu, ni ekiru!

La urbestro rememoris pri sia antaŭulo, la granda Otto Pastrosak kaj rezulte de la meditado li konstatis, ke lerta fripono estis la maljuna sinjoro. Du trietaĝajn domojn li ĉarlatanadis por si kaj la dankema postularo eternigis lian figuron en impona bronzstatuo. La maljunulo meritus, ke li elektu lin modelo por si... Ne, ne! La materialismo de Otto Pastrosak ofendus lian idealismon.

Post kelkaj minutoj alia aŭto ekiris de la sanatoria pordego kaj portis en si Cezaron Grauer al la stacidomo.

III.

Sub la dragonaj paŝoj de sinjorino Lola brutremidas la planko de la dormoĉambro. Ŝi ekspedis sin al la kanapo por skui energie ĝis vekiĝo la dormetantan Jonathan Krak.

— Jon, kara, la sinjoro urbestro vokas vin... Vekiĝu, Jon, kara!

Je teruro larĝiganta rigardo fiksiĝis al la barelgracia staturo. Krak duonvekiĝis.

— Jon, kara, ĉu vi ne komprenas? La sinjoro *ur-best-ro* deziras paroli kun vi en sia loĝejo. Nu, uf! Uf, kara Jon! Finfine vi ne povas dormi ĉiam.

Ŝia voĉo flatdolĉe flutadis. Tiel muzike ŝi kutimis peti ankaŭ monon. Sinjoro Krak kompatinde ekĝemis. En lia rigardo respeguliĝis inkubo.

— Ho, Lola, mi havis teruran sonĝon... Tute certe honto min trafos.

La scivolemo ektiklis sinjorinon Lola. La rakontado kaj aŭskultado de sonĝoj apartenis al ŝiaj preferaĵoj. Ŝi tuj eksidis apud la edzon. La risortoj de la kanapo dolore veknaris sub la dolĉa ŝarĝo kaj sinjoro Krak perdinte ekvilibron ruliĝis ĉirkaŭ la talion de sia edzino.

— Ĉu vi sonĝis, Jon, kara?

— Jes, ion teruran.

— Ĉu teruran? Kiel interese! Ĉu pri virbovo aŭ leono?

— Eĉ pri pli terura... Mi sonĝis pri vi, ke...

— Jon, kara, vi insultadas min!

— Nu, imagu, ni iris en restoracion kaj vi mendis...

— Nenion teruran mi vidas en tio.

— Jen, kiel vi eraras! Tio eĉ en la realeco estas ja io terura, do tiom pli en sonĝo. Sed nun sekvos la teruraĵo. Vi tromendis. Mi rigardis mian monujon kaj konstatis, ke ĝia enhavo ne kovros la elspezojn...

— Nu, ĝia enhavo neniam kovras la elspezojn. Vidu, vi estas prava. Tio estas vere terura!

— Sed nun sekvas la plej terura... Certa honto trafos min... Mi demandis: kio okazos ĉe la pago? Vi nur ridetis kaj ŝtopis vin. La ŝvito de malespero perladis sur mia frunto kaj eĉ unu peceton mi ne povis engluti. Vi ne ĉesis admonadi: Manĝu, Jon kara, manĝu bone, satmanĝu kaj *kiam* la ĉefkelnero venos por la pago, *tiam* mi skuos vin, ĉar vi ja nur sonĝas! ... kaj efektive vi vekeskuis min. Ĉu ne terure?

SinJORINO Lola longe pripensadis. Enmemore ŝi trafolumadis kelkajn librojn pri sonĝoj, ĉar la praktiko instruis ŝin, ke ofte eĉ la plej stultaj sonĝoj havas gravajn konsekvencojn. Tia sonĝo sciigis ŝin tiutempe pri ŝia edziniĝo. Tiam ŝi sonĝis pri azeno, sternanta sur sin pluvmantelon kaj la pluvmantelo iom post iom malaperis kaj anstataŭ ĝi ŝi mem spronadis la azenon. La sonĝo de Krak ne estas ja eĉ tiel komplika. Tute klara! Ŝi savos sian edzon el ia danĝera situacio. Ŝia fantazio vigle funkciis kaj jam ŝi vidis sin prikantita heroino, kiam la sonorilo de la telefono dispelis la revojn. Ŝi prenis la aŭdilon kaj flatdolĉe flutadis en la aparaton.

— Alo, alo, alo! ... Jes, ĉi tie sinJORINO Krak... Vere, sinJORO urbestra moŝto, tiu ĉi honoro... jes, jes, tuj mi sendos lin... ĵus li estis ekironta... Nepre, nepre... Sendube, sinJORA moŝto... sendube, li estas talenta... Jes, mi sciis ĉiam, ke li estas ĝo-

nia... Ho, sinjora moŝto, kompreneble, ke li meritis... Tuj li ekiros.

Lola kun elversiganta ĝojo flirtis al sia edzo (kompreneble kun flirtado, permesebla de ŝia pezo).

— Jon kara, imagu, la sinjoro urbestro *persone* telefonis.

— Ĉu *mia amiko*, la urbestro? Jes, jes... Certe li denove falis en la kaĉon. Mi kutimas alti-radi lin.

— Vi?!

— Nu jes, kiu alia, se ne mi? Vi scias ja, ke ni estas ciantaj amikoj.

— De kiam? — kaj ŝi mire rondigis la okulojn.

— De kiam? Ho, jam delonge... jam de... de... de tagmezo Mi ja menciis al vi, ĉu ne, ke tiu impertinenta Stubek preskaŭ kompromitis min... Sed tio estas oficiala sekreto. Ne tio, ke Stulok estas impertinenta, kvankam pli bone, se ankaŭ tio restos sekreto, sed tio, ke mi havis pritraktadon kun la sinjora moŝto urbestro...

— Kiooo? Ĉu vi havis pritraktadon kun la urbestro kaj eĉ unuvorte vi ne menciis tion al mi?! Jon, Jon kara, vi havas sekreton, vi kaŝas gravan aferon antaŭ via fideljurinta edzino? Jon!

— Hahaha!... mi havas sekreton? Hihih! Mi kaŝas gravajn aferojn?... Kion vi pensas? Verŝajne, li volas paroli kun mi pri tiuj du radiogramoj.

— Pri kiuj radiogramoj? Jon, kial vi ne volas paroli tute klare? Eble ia konspirado kontraŭ la dinastio?

Sinjoro Krak stulte palpebrumadis al sia edzino, gratadis la verton kaj ĝiskole sidis en la embaraso. Jen, nun preskaŭ li elspulis la sekreton. Kiel volonte li estus subteriĝinta por malaperi kaj ne vidi la minacan rigardon de Lola. Kiel mallerta estas ja la edzinhava viro! Sed kio ajn okazos, li devas konservi la oficialan sekreton. Li pozis do kaj la voĉon stimulis je seka tono.

— Kara Lola, ne miksu vin en miajn aferojn. Tre gravaj interesoj nun estas riskataj kaj mi promesis al mia tre estimata amiko, la urbestro, ke al neniu mi diros ion, kio rilatas ĉi tiun Grauer-an testamenton. Finfine, jam estas tempo, ke mi ricevu la postenon de la urba ĉefnotario, ĉu ne?! Sed mi devas ankaŭ meriti tion, ĉu ne?

Subite vekiginta aristokrateco arlekenadis en la mieno de sinjorino Lola. Pintigante la lipojn ŝi ridetis, malfermis je ĉirkaŭpreno la femurformajn brakojn. Tia fenomeno de entuziasmo kaj amo pli teruris la malfeliĉan edzon ol io ajn kaj li klopodis al la pordo.

— Jon, karrra mijjja, vi eĉ ne diris, ke oni elektis vin urba ĉefnotario.

— Vere, mi ne diris tion. Mi nur... mi nur konjektigis, ke eble...

— Eĉ unu vorton ne! Jon, karrra mijjja! Egale, ĉu vi diris aŭ ne, sed tamen vi estos ĉefnotario kaj nia malgranda Lola edziniĝos kun viro, havanta certan postenon.

— Kiel, kiel?!

— Do, Stubek. Espereble, vi ne forĝeis vian patran devon? Kiel doton, vian postenon havos nia ĉarmulineto.

— Neniam! Ĉu vi komprenas? Neniam! Li estas moderna Casanova. Mi surprizis lin kisanta la ĉambristinon de la sinjoro urbestro. Prezentu al vi, li kisadis, eble eĉ *interkisadis* kun tiu blondulino!

Nur nebuleto de konsterniĝo preterpasis la mienon de Lola. Memoro el ŝia knabinaĝo pelis ĝin for kaj ŝi eĉ ridetis.

— Ho, estas vere tre interese!... Bonega kabalo... favora antaŭsigno.

— Kabalo? Li devus edziĝi kun nia filino kaj kisas blondajn ĉambristinojn kaj por vi estas tio ĉi — bonega kabalo? Ĉu?!

Apenaŭ rimarkebla ironio tiradis ŝiajn lipojn al ride'co.

— Komprenoble, Jon kara, ŝajnas, ke vi fariĝis tre forgesema. Rememoru, kiam ni estis gefianĉoj kaj paĉjo surprizis vin kisanta, ĉirkaŭprenanta *nian* ĉambristinon. Ankaŭ tiu estis blondulino kaj ĉambristino, kaj tamen vi edziĝis kun mi kaj fariĝis bona familiestro. Nu, jen, vidu! La »*casanoveco*« de Stubek estas bonega antaŭsigno por la estonteco. Guste tiel bona kiel via sonĝo, ĉar sciu, Jon kara, ke mi savos vin de eventuala honto... Nu, imagu, ke la sinjoro urbestro juĝas vin inventema homo. Li diras, ke vi havas bonegajn ideojn. Tio ĉi estas, Jon kara, tute nova, eĉ nekredebla kapableco antaŭ mi. Neniam en la vivo mi vidis pli sentalentan kaj ne vivkapablan homon ol vi. Tamen okazas, ke eĉ blinda kokino trovas greneron. Tute certe, ke la flatan opinion de la urbestro vi povas danki al tia blinde trovita grenero. Nu, tiun ĉi greneron ni devas maĉi, remaĉi kaj kuiri, do, bone profitigi. De nun mi prenos por vi la grenerojn. Espereble vi fidas min?! Vidu, jen tiu Grauer afero. La potenca Dio sendis al ni ĝin. Mi ne scias ja, kion vi konsilis al la urbestro, sed ni devos agi taktike, ke li ĉiam nur niajn konsilojn sekvu en la direktado de tiu ĉi afero. Finfine, vi estas ja patro kun ok filinoj kaj ni ne povas elĵetadi certajn milionojn tra la fenestro! Kio ajn estos la radiograma respondo el Ameriko...

— De kiu vi scias? Kiu diris al vi? — balbutis timigite Krak.

— Vi, vi mem diris, vi mem rakontis ĉion... Nu, ne ĉion, sed kial Dio donis al mi viglan fantazion, se mi ne povus diveni eĉ tion, kion vi provizore kaŝas antaŭ mi?!

— Sed, kara mia, mi petegas, ĉio ĉi estas oficiala sekreto... kaj...

— Eĉ restos, Jon kara, duobla oficiala sekreto restos ĉio, kion ni decidis fari en tiu afero, ĉar bone

memorfiksu, Jon kara, ke mi ne povas toleri, ke la tutan kremon forleku tiu ĉi plumblovita neniŭ, tiu ĉi, el simpla skribisto fariĝinta, urbestraĉo, tiu ĉi nesatigebla hipopotamo . . .

— Sed, Lola kara, kiel vi povas diri tiajn pri viro havanta ĝeneralan respekton de ĉiu flanko?

SinJORINO Lola ardiĝis. La fantazikreitajn planojn kun multaj aliaj dirindaĵoj ŝi torente alŝutis antaŭ la edzon. Ŝia lango turniĝis, bruis, senhalte tamburadis kaj Krak kontraŭvole pensis: kiam ŝi prenas spiron?

— Jon, kara, silentu, vi nur silentu! Ĉu mi ne diris la veron? La maljuna Jenlafiŝ estis simpla transportisto, kiu nem sidis sur la veturigista benketo. Ĉu li ne estas do ido de verturigisto? Sed jes, kaj iam li kuradis ĉiumomente en la vendejon por aĉeti cigaredojn, cigarojn al la sinjoroj oficistoj. Li havis ŝancon kaj monon. La maljuna Jenlafiŝ akaparis por si la oficialan transportistan kontrakton ĉe la urbo, per protekto ŝovis sian filon en urbdoman oficejon, edzigis lin kun filino tre riĉa de tiama kamparanpartia parlamentano kaj la nova bofrataro puŝadis lian ĉaron antaŭen. Ĉiu scias ja, ankaŭ vi scias. Gustatempe oni sufloris al li, ke okazos reĝimŝanĝo kaj tiam li eklaboris per ĉiuj permeseblaj kaj nepermeseblaj rimedoj je la intereso de la alvenontoj. Komprenoble, la meritoj bezonas rekompencojn kaj oni sidigis lin sur la kolon de la urbo. Nu, ĉu ne tiel estis? Li plenŝtopis sin. Bone, mi ne envias lin. Sed el la administraj elspezoj de tiuj ĉi Grauer'miliono-
noj ankaŭ vi devos ricevi vian rajtan parton. Pensu pri Gertruda, Tilda, Xenia kaj Helma. Ili estas ja edzinigeblaj. Rememoru pri la trinaskitoj: Olga, Cia kaj Mila. Post du jaroj ili forlasos la benkojn de la lernejo. Jes, jes, jes! Kaj ne diru eĉ unu vorton! Nun sekvas mia plano. Legante la gazetojn mi sentis, ke el tiu ĉi afero estos ia kirlokaĉaĵo. Ĝis nun ne

interesis min la tuta afero, sed nun, kiam mi scias tion, kion mi scias . . .

— Kion vi scias, kara? — rompis la vorttorenton Krak kun lamenta vibro.

— Tion, ke ankaŭ vi estas kompromitita en tiu ĉi afero.

— Ĉu kompromitita?!

— Ĉu ne? Sed jes! Ĉu ne laŭ via konsilo faris ion la urbestro? Sed jes! Nu, vidu! Por via ideo li promesis al vi la postenon de la urba ĉefnotario, intimiĝis kun vi ĝis ĉiado kaj nun malesperigite li urĝas vian tujan alvenon. Ĉu ne sufiĉas tiom por tia genia virino, kia estas mi, via edzino? Ĉu mi ne estas sufiĉe fekunda je ideoj?

— Ne sole je ideoj, kara!

— Jon, kara, Dio punos vin, se vi riproĉas mia pro niaj filinoj. Ok filinoj? Bone! Ĝuste tio ĉi estas bonŝanca! Oni facile povas elekti el ili. Tuj dum la legado mi pensis pri tio ĉi. La ekstravaganca milionulo havas filon. Li povas elekti edzinon el ili.

— Ĉu serioze vi pensas, kara? La sukceso ŝajnas senŝanca. Li ĉiumomente ja povas forvojaĝi kaj neniam vi vidos lin. Cetere, kiel mi havis la okazon pritaksi lin, li ne montriĝas tre amema, eĉ kontraŭe. Li estas iom sovaĝa. Nu, imagu, li ekluktis kun la . . .

— Jes, mi scias . . . kun la ĉimpanzo de sia patro. Mi legis en la ĵurnalo. Nu, oni povis savi lin el ĝiaj brakoj, sed se li ekluktos kun mi, tiam . . .

— Espereble, vi ne volas ataki lin? Dio! Vi freneziĝis!

— Ne insultadu min! Jon, kara, finaŭskultu min! Ne estas permesate, ke tiu junulo forlasu la landon! Ni devas gajni tempon. Ĉu sole administraj elspezoj? Fi! Ni meritas pli! Sciu, kie ĉiuj ŝnuroj ŝiriĝas, tamen unu saĝa aŭ bela virineto povas savi ĉion. Tion bone rememoru! . . . Mi konatiĝos kun li, kondutos afable al li, persvados lin je ĉio, kio helpos miajn planojn . . .

— Cu vi? — Sinjoro Krak unue gapadis, poste ironie grimacis. — Li estas ja junulo kaj vi transpaŝis jam antaŭlonge la demonan aĝon.

— Jon, vi estas tiel malsaĝa ankaŭ hodiaŭ, kiel antaŭ dudek kvin jaroj. Mi estos nur direktanto, kiu batalvicigos miajn filinojn. Ok knabinoj! Nur pripensu! El inter la brakoj de ĉimpanzo oni povas savi iun, sed el la retoj de ok edzoavidaj knabinoj ne tre kredeble... Aŭskultu! Tuj vi vizitos la urbestron kaj per kia ajn motivado, argumentado vi persvados lin, ke li malhelpu la forvojaĝon de tiu Grauer. Estus plej racie ia karambolo, pro kiu li rompus la kruron, aŭ brakon. Ni ekaperus kaj la ok knabinoj ekflegus lin. Nu, kiel vi opinias? Genie, ĉu ne? La junularo estas ĉiam ema al la romantikismo. Ho, tre ofte mi aŭdis kaj legis, ke la vundito edziĝis kun sia flegistino. Nu!

— Do vi volas, ke la juna Grauer rompu sian brakon?

— Estus plej malmulte danĝere kaj samtempe la sinjoron urbestron vizitus apopleksio vidante, ke ankaŭ alia ne sole li, havas spritecon kaj saĝon por la prosperado.

Sinjoro Krak komencis admiri sian edzinon. Kvankam en li la oficisto indigniĝis pro la disciplinrompa plano, sed la familiestro trovis ĝin plaĉa. Esti bopatro de milionulo ja ne apartenas al la plej neglektindaj roloj. Verdire, pri la bofilkandidato forĝesis la testamentinto, sed li havas tiajn pretendojn, kiajn la leĝo mem konsideros. Sed kio okazos, se eĉ unu dolaro ne troviĝos en tiu sefo? Egale. La edzo eĉ tiam restos. Dum Krak tiel cerbumadis pri la ŝancoj, lia edzino vortgalope verŝis el si la torenton da argumentoj, riĉe kolorigis la estontecon kaj la simplan edzon levis ĝis piedestalo de nacia heroo, al kiu Bagonio povos danki la ĝeneralan prosperon, ekfloradon, ĉar per nobla gesto, per edzinigo de sia filino, li solvis la komplikitan problemon.

— Do vi pensas, ke al la urbestro proponi perforton estas konsilinde kaj utile, ĉu ne?

— Kiu parolas ĉi tie pri perforto? Mi parolis nur pri hazardo, bone preparita. Kaj nun kuru, Jon kara!... Jes, la aferon inter Lola kaj Stubek ne tre akcelu!

— Mi ne komprenas vin, antaŭ momento vi diris ja, ke...

— Kion oni povas scii? Eble Lola estos tiu, kiu... Ŝi ja tiel similas al mi.

— Vere, ŝi estas tute via filino.

Sinjoro Krak forrapidis, ĉe la stratangulo jetis sin en aŭtomobilon kaj kuregis al la loĝejo de la urbestro.

Sinjinino Lola ankoraŭfoje pripensis la espereblan belan estontecon, poste prenante al si armeestran dignon ekiris al la ĉambro de la knabinoj.

Inspekti ilin ŝi opiniis urĝe, poste sekvos la dresado kaj fine la ekipado laŭ la individuaj ĉarmoj. Kie mankos tiaj ĉarmoj, tie helpos la kosmetiko kaj la tajlorina arto. Pri eventuala ŝanĝo de la harkoloro zorgos la frizisto.

La ok knabinoj sidadis en la granda ĉambro. La plej junaj cerbumadis pri la morgaŭaj lecionoj, aŭ revadis pri iu gimnazio; la ceteraj legis romanojn kaj entuziasmis pro la kortiklaj aventuroj. Panjo Lola emociigite paŝtis siajn okulojn je la abunda ĉiel-donaco, sed en tiu ĉi momento ŝin ne kontentigis ĝia nombro. Nun prefere ŝi estus la patrino de ĉiu edziniĝebla knabino sur la tero por militiri kun certa ŝanco.

— Knabinoj, — ŝi trumpetis silentorompe kaj triumfe — mi sentas, ke baldaŭ unu el vi forflugos el la gepatra nesto.

— Kio okazis, panjo? Kiun oni svatis? Ĉu Elemer Kofropuf, aŭ fine jam Stubek? Nu, ĉu mi ne diris, knabinoj, ke oni povas kalkuli certe pri tiu

Ignato Eltord ! Fine parolu, panjo ! Jes, jes, parolu pri li !

La okuloj de sinjorino Lola ekbrilis. En ŝia rigardo miksiĝis ia surpriziĝo. Iom ŝi atendis la mildiĝon de la voĉhaoso.

— Provizore okazis ja nenio, sed baldaŭ okazos io... Cetere mi devas esprimi malkontentecon pro la kaŝemo, kiun ĵus mi konstatis. Du nomojn, ĵus menciitajn, ankoraŭ mi ne aŭdis. Kiu estas tiu Elemer Kofropuf ? Nu, Tilda ?

— La matematika profesoro de Cia — respondis iom ruĝiĝante la demandito.

— Bone, ni povos konsideri lin. Ĉu li deklariĝis jam por vi ? Nu !

— Ne, panjo, sed mi jam deklariĝis por li.

— Viii ? ! -- kaj en la patrina voĉo vibris troa konsterniĝo.

— Kial ne, panjo ? Vi mem diris ja, ke nuntempe oni ne povas kun malfermita buŝo atendi la rostitan kolombon. Mi provis kuiri por mi la mian.

— Nu, kaj li moliĝis ?

— Jes, panjo, kiel la trokuirita ovo. Li preskaŭ ŝtoniĝis.

Panjo Lola suprentiris la brovojn ĝis ebla alteco, balancis la kapon, grimacadis, fine esprimis sian opinion.

— Ni ne havas multe da espero... Kaj vi, Xenia, kiel vi diris ? Jes, kiu estas tiu Entord ?

— Eltord, panjo, Eltord... Ignato Eltord !

— Nu, bone, mi eltordos lian kolon, nur li vizitu nin ! Kiu estas tiu ĉi mistera kavaliro ?

— Inĝeniero antaŭ promocio ĉe la urba laktkaj fromaĝfabriko.

— Ĉu li melkas bovinojn ?

— Sed panjo, kiel naiva vi estas ! Li okupas sin pri la laktomaŝinoj. Ĉu vi pensas, ke oni ricevas la lakton tiel, kiel la bovino bonvolas doni ? Tiel oni ricevas, kiel sinjoro Eltord volas. Jes, jes !

Panjo Lola denove enpenŝiĝis, sed nun ŝi malsupreniĝis la brovojn, fermis la palpebrojn, amikiĝis en si kun la stranga nomo.

— Eble, vi estas prava. Sed ĉu li deklaris ion pri siaj sentoj?

— Jes.

— Jes??! kaj tion vi diras nur tiel malvarmtone?

— Nu, kiel mi diru? Ankoraŭ ne aktuale.

— Ĉu por vi ne aktuale edziniĝi? Edziniĝi estas ĉiam aktuale! Precipe en nia familio. Ho, kiam min via patro...

— Ni aŭdis ofte tion, panjo. Ne aktuale, ĉar li ne estas ankoraŭ promociita. Ni ne estas geamantoj. Ni estas sobraj. Mi volas edziniĝi kaj li akiri postenon. Se mi sukcesos akiri postenon por li, li edziĝos kun mi. Jen la senco de lia deklaro.

— Nu, tio estas tute ne dusenca, — ekĝemis la patrino doloro.

— Sed patro estas tiom mallerta kaj...

— Ne riproĉu tiun ĝenian viron! Ankaŭ en tiu ĉi momento li ŝvitadas je viaj interesoj.

— Kie? Ĉe kiu? Certe en la klubo. Nu, liaj klubanoj... Pli bone, ne paroli pri ili.

Feliĉe la ruza diplomato venkis la klaĉulinon en pajno Lola, ĉar post ioma interna batalo ŝi reglutis la sekreton, dancantan sur ŝia lango.

— Tute ne plaĉas al mi tiu ĉi nomo. *Eltord, Eltord*. Ĝi sonas tiom vulgara.

— Vi eraras, panjo. Sinjoro Eltord estas nobelo. Sian nomon li heredis de tiu praulo, kiu eltordis la kolon de perfida grafo okaze de iu konspiro, komplotita kontraŭ nia reĝo Ladomer III-a. Nia glora reĝo kriis tiam al li: Eltordu, eltordu! La brava praulo forte ektordis la kolon de la perfida grafo kaj la reĝo levis lin al nobela rango kun la nomo Eltord.

— Jen, vi estus devinta komenci ĉe Ladomēr III-a. Mi ne povas doni vin al iu ajn alkurinto. La promocio estas certigita. Mi diras.

— Ho, panjo, vere?! — Subita ĝojo eligis el Xenia kaj iom embarase aldonis — ĉar panjo, ni iomete amas unu la alian.

— Sed, knabinoj, nun ne estu parolo pri sinjoro Eltord, aŭ pri iu ajn alia kandidato. Ni metos ilin en rezervon, ĉar nun venis okazo... Jes, vi ĉiuj ĉasos unu leporon.

La surprizo, la esperdona atendo rebrilis en la mieno de la knabinoj. Sed panjo Lola kun mistera rideto ekiris por forlasi la ĉambron. Sed okazis io tute neatendita, eĉ konsterna. La malgranda Cia, kiu mute, neglekte aŭskultis ĝis nun la familiajn kirlaĵojn, subite baris la vojon de sia patrino.

— Panjo, mi petas vin, bonvolu min liberigi de tia aĉa ludo. Mi ne ĉasos.

La murmuro de la ĝenerala konsterniĝo ekmaŝis kaj panjo Lola sentis ŝanceliĝi sian patrinan aŭtoritaton. Kiu aŭdis jam tian impertinentaĵon? Tiu ĉi petolulino volas malobei, tiu ĉi malgranda kokidino?! Do kion ankoraŭ?! Kaj se ĝuste ŝi estus la favoratino de la sorto, kiu alportus la sopiratan bonfarton de la familio?! En panjo Lola tre furiozis la indigno, sed ŝi ne volis esti tro severa.

— Kaj se estas permesate demandi, kial vi ne volas ĉasi, vi, ĉemizulineto?

— Ĉar mi estas jam enamiĝinta kaj mi ĵuris ĝistomban fidelecon.

Cia ruĝiĝis, ekglutis, (verŝajne sian timon) rigardis rekte en la okulojn de sia patrino. Panjo Lola eĉ kontraŭvole ekridis kaj tiel sinĉe, tiel senbride, ke ankaŭ la knabinoj ridis kun ŝi. Nur Cia staris embarasite kun plorema mieno.

— Jes! Eĉ se vi priridas min! Spite al ĉio, jes!

Mi estas enamiginta kaj ĵuris ĝistomban fidelecon kaj mi tenos ĝin. Jes, vane vi ridas. Mi ne estos videbla foira pupo... Nur ridu... ridu aŭ krevu tuj, sed mi estas enamiginta, jes... Nu, ridaĉu nur!... Vere, panjo, vi estas tia... tia... Neniam vi konsideras min serioza, kvankam mi... mi... mi... mi estas tute alia ol viaj aliaj filinoj... Nu, ve, ne ridu plu, ĉar vere mi ekploros... Je Dio, mi ekploros...

Sur la vangoj de la brilokula Cia ekruliĝis la larmoj. La patrino ne ridis plu kaj la knabinoj nur interne, sekrete amuzis sin pri ŝia konduto. Fine estos temo por ĉagreni la ruzetan petolulinon.

— Nu kaj estus permesate scii, kiu estas tiu heroo, — komencis ŝercetone panjo Lola la konfesprenadon.

— Ne, panjo, ne estas permesate scii...

— Nu, sed tamen. Mi estas ja via patrino, al mi vi povas konfesi, ĉu ne?

— Ne, panjo. Eĉ al vi mi ne povas, al neniu mi povas elparoli lian nomon. Post du jaroj vi ekscios ja.

Sinjorino Lola ekregis la koleron eligontan kaj kun afabla rideto proksimiĝis al sia obstina etulino, karesis ŝiajn buklojn.

— Nu bone, filinet', ĉio estas en ordo... Post du jaroj vi diros, ĉu ne? Sed ĝis tiam vi faros, kion mi ordonos al vi kaj kion mi opinias bona, utila por vi... Ankaŭ mi estis ja, kiam via patro min...

— Tion mi aŭdis kelkfoje, panjo, — protestis Cia kun petola rideto tra la larmoj. — Kara paĉjo, ... neniu el vi komprenas lin, neniu nur mi... Ho, mia bona paĉjo...

— Nun vi estas prava. Ankaŭ vi estas tiel stulte honesta, klarparola, kiel via patro — eligis akratone la retenita kolero el panjo Lola.

— Povas esti, sed eĉ tiam, eĉ spite al ĉio mi ne ĉasos la leporon... Nu!

La karesanta mano de la patrino klaksone vangofrapis la aŭdacan ribelulinon.

— Jen, mia pafilo jam eĉ ektondris.

Post la rapida atako panjo Lola retiriĝis en sian ĉambron. La knabinoj per ironiaj rimarkoj ĉagrenis la disciplinon neglektantan fratinon, kiu kun larma rideto palpatis la brulan lokon de la vangofrapo. Ŝia revema animo sentis martiran feliĉon.

— Ankaŭ tio estas pro vi, kara, — ŝi diris al ŝi rememorante pri la neperfidita kavaliro.

IV.

Sur la pomvangoj de la urbestro rebrilis la kontenteco, kiam li kun tre ceremonia klino rekroĉis la aŭdilon de la telefono, kaj turnis sin al Krak, bone ŝrumpanta en la profundo de fotelo.

— Ankoraŭ nenio estas perdita. Lia ekscelenca moŝto, la fervoja ministro, promesis, ke li ordonos tuj forigi kelkajn relojn antaŭ iu oportuna stacio. Eble, ke li eĉ donos sekretan ukazon por eksplodigo de kelkmetra fervojlinio. Per tio li eĉ faros utilan servon al la ekscelenca moŝto, la ministro de la Internaj Aferoj, kiu profitos la okazon pli severe kontroli kaj ĉirkaŭtondi la agojn, kaj precipe la rajtojn de la liberala partio. Kompreneble, la eksplodo okazos antaŭ la alveno de la vagonaro al la danĝera loko. La ĵurnaloj estos informitaj pri la bedaŭrinda afero kiel pri atenco de komunistoj. Jen la ŝtatsekuriga politiko.

— Mi tute ne komprenas, — konfesis kun mira mieno Krak.

— Sed facile ci povus kompreni tion. Rememoru pri la lasta kampanio de la parlamentaj elektoj. Al ĉiu politike suspektinda elemento la registaro certigis liberan agadkampon por malfortigi per tio la unuecan fronton de la liberalistoj. Bonega, elprovita taktiko! Verdire, ni estis devigataj denove malkovri la statuon de nia nacia heroo Rodolf Ferman, la Brava, kiun la komunistoj eksplodflugigis en la aeron. Sed nun mi

povas jam diri al vi, ke la tuta komedio okazis laŭkontrakte. La bofilo de la ministro de la Internaj Aferoj estas skulptisto, kiu vivadas je la kosto de la familio sen ia ajn profitdona laboro. La mendo de tia ŝtata statuo estas bonega negoco. La sangavidajn flugfoliojn disdonadis inkognite detektivoj. Rezulte : dum la elektado la amasopinio turnis sin for de la liberalistoj kaj post la balotado oni denove arestis, enkarcerigis la suspektindajn personojn... Nu, nun ni povas denove reliberigi ilin sub sekreta kontrolo. Ĉiukaze, kara amiko, jam ĝis nun la urbo kaj ŝtato povas danki al ci.

— Ĉu al mi ? — Kontraŭvole ekgapis sinjoro Krak kaj se lia edzino nun estus vidinta lin, certe ŝi ne estus fierinta pri lia genieco.

— Nu, ne modestadu kaj ne protestu ! Dank' al viaj bonegaj ideoj, pensoj, ni estas en la ĝusta direkto, mi opinias. Nun mi estas scivola, kion vi konsilus por gvidi plu la fadenon de tiu ĉi bobeno. Bone, la junan Grauer oni kun plej granda ĝentileco elvagonigos ĉe iu stacio, sed kio okazos poste ? Vere, ni gajnis tempon, sed ankoraŭ ni ne havas definitivan, detale prilaboritan planon. Mi konfesas, ke tiu germano havas tre obstinan kapon. Li parolis tiatone kun mi, ke sole al mia denaska ĝentileco kaj al sia fremda civitaneco li povas danki, ke mi ne aplikis perforton... Kaj vidu, li povos lupreni aŭtomobilon, esti post horo trans la limo kaj ni povos batadi nur per bastono liajn postsignojn. Ni devus posedi definitivan planon. Ĉu ci ne havas certan ideon, savan penson ?

— Ĉu ideon ci deziras ? — Sinjoro Krak preskaŭ timigite ĉirkaŭrigardis helpopete senespre. Li timis la kontraŭvolan perfidon de la planoj, pri-fantaziitaj de sia edzino. Ne, tion ne darfis fari ! Por la doma paco jam ne. Jes, sed se li ne respondos nun ion saĝan, la urbestra opinio pri lia genia inventemo falos en la akvon. Li pensadis. Nenia ideo ! Li pensadis plu kaj marĉandis en si je kvindek procentoj

pri la sekreto de la edzino. Unu frazo ne estas ja ĉio! La rigardon li fiksas al la trimentona vizaĝo kaj aŭdace elspulis la ideon.

— Kiel ci opinius, kara moŝta amiko, pri la enkroĉo de virino?

Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ jubilis pro la ĝojo. Sensacie genia estas tiu ĉi viro. Sed pri kia virino li pensas?

— Bonege! Kolose! Vere, hodiaŭ ci estas en ŝvingo. La enkroĉo de virino en tiun ĉi planon vere servus kiel bonega bazo por plene ekspluati la eventualajn avantaĝojn, sed... mi devas konfesi... Mi ne scias, kian... kiaspecan virinon ci pensas?

Ce la frunto de Krak aperis la ŝvitperloj. Li luktis kun si. Feliĉe, la urbestro per demando donis al li eliran penson.

— Eble iu orfeona demono, aŭ...

— Guste mi pensis pri tia, — li rapidis respondi.

— Bonege! Kolose! Kara Jonathan, ni vere koincidas en la pensmaniero. Eĉ mirinde! — La urbestro iom embarasite tusadis. — Eble... mi... mi konus... konas unu. Tio estas, ke oni ofte parolis pri ŝi... Efektive, ŝi estas ekzotika belulino... Almenaŭ oni asertas tion pri ŝi.

— Kiu?

— Katalino Kaptuŝin, la nuda dancanta miraklo... Ĉu ci konas ŝin?

— Miii?! Nu, estus tro varme por mi, se... Sed... — Sinjoro Krak apenaŭ povis subpremi la altrudiĝantan rideton antaŭ la esplora rigardo de la urbestro. La ĉikano tiklis lin, la urbkonata klaĉo, laŭ kiu delikataj fadenoj ligas la artistinon al la estro de la urbo.

— Kio sed? Ĉu ŝi ne plaĉas al ci?

— Ho, sed kiel!... Mi volis diri, ke kompreneble ŝi plaĉus al mi, se mi havus la honoron persone koni la artistinon, sed tiel... tiel... nu, kiel mi diru al ci?

— Nu, senĝene !

— Mi eĉ ne scias, kion mi volis diri... Jes, tion, ke tia... tia internacia artistino bone kapablas elpoŝigi la monon kaj krome ŝi ne longe restas en la sama lando kaj tiamaniere ne estus mia intereso, *nia* intereso, se... nu, ci komprenas ja min. Mi pensis pri alia umoj... Kiel mi esprimu min? Pri ia burĝa umoj, pri virineto, burĝa virineto, kiu tenus, katenus lin al la lando, aŭ kiel diri? !

Apenaŭ rimarkebla momenta rideto ekbrilis en la okuloj de la urbestro. Tiu ĉi viro havas netakseble bonegajn ideojn. Sed nun li ne envortigis sian admiron, eĉ kaŝis ĝin sub indiferentan tonon ĉe la adiaŭado.

— Pardonu min, kara amiko, sed mi devas prepari min por la hodiaŭa enketo. Kion ci ĵus diris, estas konsiderebla, sed... Nu, ne malbona, sed... Tute certe, ni pridiskutos ĝin kun la kompetentuloj. Se la radiogramoj alvenos, mi nepre sciigos cin. Ĝis revido ! *Servus !*

— *Servus !*

Kun faciligita animo Krak adiaŭadis. Tamen li sukcesis konservi en si la sekreton. Iam kontentecon li sentis pri si kaj tion ĉi volis sentigi per afabla rideto eĉ al la ĉambristino, malfermanta la pordon de la vestiblo por li. La knabineto iom ruĝiĝis pro la afabla rigardo kaj sinjoro Krak eĉ kontraŭvole konstatis, ke tiu impertinenta Stubek havas bonan guston. Li jam ne koleris lin. Precipe nun ne, kiam la edzino rememorigis lin pri la enterigita junaĝa petolado. Li returnis sin de la sojlo, maljunule, patrece ekpinĉis la ruĝetan vangon de la blondulino.

— Kiel oni nomas vin, knabino ?

— Lida Jenmi, sinjoro.

— Lida Jenmi... Lida Jenmi... Hm, hm! — ripetadis li kvazaŭ maŝine, sed la rideto jam malaperis el liaj okuloj. — Kaj de kie vi estas ?

— De Bikitato.

— Jes, ... Bikitato ... jes, kompreneble ... Bikitato. Ĉu via patrino ?

— Ŝi vivas, dank' al Dio !

— Kaj ... kaj ... via patro ?

Ŝi ruĝiĝis kiel kuirita omaro, mallevis la palpebrojn, ekglutis.

— Neniam mi konis lin, sinjoro, — ŝi respondis mallaŭte kaj senbrue fermis la pordon post la foririnto.

Sinjoro Krak havis ne tre agrablan konjekton malsuprenirante la ŝtuparon. Sur la strato li riproĉe okulumis al la alta ĉielo.

— Ho, Dio, neniam mi estus pensinta, ke ... Kaj eĉ tiu ĉi estas knabino !

Dum sinjoro Krak kun korpremaj konjektoj stumbladis hejmen, la urbestro sonoris al Lida kaj telegramojn donis al ŝi.

— Jen, Lida, tiujn ĉi telegramojn vi senprokraste portos al la poŝto, poste ordigos la ĉambron de mia filino. Diru al mia fratino, ke ŝia nevino jam dumnokte alvenos. Ĉu vi komprenas ? Poste vi paku la plej necesajn por kelktaga ekskurso, ĉar morgaŭ matene ni vojaĝos.

— Kien ?

— Ĉu mi scias ? Ĝis tie, kie la vagonaro haltos. Sed tio tute ne koncernas vin.

— Neniel, sinjora moŝto, sed mi dezirus scii, ĉu ankaŭ mi estos bezonata dum la vojaĝo ?

— Kompreneble, mia filino certe bezonos vin. Nu, rapidu kun tiuj telegramoj.

Lida iom ĉagrenite foriris, pensante pri tiu beleĉa Stubek, al kiu ŝi promesis la proksiman dimanĉan promentempon. La urbestro kun sinventuma kontenteco kunfrotis la manojn.

— Ho, kara amiko, ci havas bonegajn ideojn, sed ekspluati ilin nur mi povas, vere nur mi.

V.

La konduktoro, la brava bagono, ne komprenis ja la germanan lingvon, sed li komprenis la elokventecon de la dekgulda bankbileto, ŝovita en lian manon. Apartan kupeon li malfermis por la eminenta fremdulo, sukcese klopodis gardi lin de altrudemaj novaj pasaĝeroj. Cetere, ĝis la limstacio la vagonaro haltos nur trifoje. Tie jam la nova personaro de la najbara ŝtato transprenos la trajnon.

Cezaro Grauer mallevis la kurtenojn al la koridoreto, eksidis al la kupefenestro kaj kun rigida rigardo apatie gapis la preterkuregantajn vilaĝetojn, belajn pejzaĝojn, verdmurajn stacidometojn. Li aŭdis la klakadon de la ritme ruliĝantaj radoj. Li rigardis kaj aŭdis, sed ne vidis, ne aŭskultis. La okazintaĵoj de la hieraŭa tago, la dumnokta baraktado en febro, la sennombraj scivolemuloj de la hodiaŭo kreis tian haoson en lia animo, el kiu li ankoraŭ ne trovis elirvojon. Nun li deziris nur unu solan. Rifuĝi, eskapi, ne vidi homojn! Eble plej prudente. Aŭ ĉu pli prudente estus ĵeti sin en la kirladon de la vivo? Ne! Verdire, tiukaze muelus, mortigus lin la soleco kaj la silento, sed ankaŭ la homa societo ne donus trankvilon. En lian animon la vulturhomo entranĉis la ungojn kaj ili taŭzas ĝin. Antaŭ liaj okuloj kelkfoje aperis linioj de tiu kruela letero, kiun pro sia doloro, senpova furoro li ĉifis, disŝiris je mil pecetoj. Nun li jam bedaŭris tion.

La kompatgrimaco, monavida hipokriteco, sur-
ventre rampado de la vizitantoj ĉirkaŭ li vekis en li la
pacon de pardono al la mortinto por momento, sed
nur por momento, ĉar la rememoro pri la gepatroj,
la tragedio de la bestohomoj denove dronigis lian kla-
ran juĝkapablon en la lafon de la senpova venĝemo.
Subite li ekkonsciis pri tio, ke li ja ne havas nomon.
Senrajte li posedas la nomon, skribitan sur la doku-
mentojn. Ĉiuj estas falsajoj. Vilhelmo Grauer ne estis
lia patro kaj Amalia Korp ne estis lia patrino. Eĉ
tion li ne scias certe, kiu estis tiu Amalia Korp? Ĉu
ties nomo, kiu prenis lin al si pro kompato el la
kaĝo? Kie formortis liaj gepatroj? Li ne scias. Ĉu
li povos esplori? Ne verŝajne. Per kio li povus moti-
vi do sian interesigon? La homoj estas tre triviale-
cinikaj kaj pro la peko de iu tria ili pelus lin for
el la vivo.

La penso pri memmortigo tentadis en li, sed lia
juneco komencis batalon kontraŭ la himera monstro.
Vivi, necesas vivi, devas vivi! Sed kial? Por kio?
Ĉu por la longaj numervicoj, duobla librotenado, por
la stomakŝtopado kaj nokta ripozo? Gis nun li vivis
por tio. Neniam ŝajnis al li la vivo tiel stulte mal-
plena kiel en tiu ĉi momento. Li enviis la vulturho-
mon Tiu havis almenaŭ definitivan celon. Tiu sciis,
kial vivi? Tiu estis eble la korpiginta malico, sed
konscie agadis. Sed li?! Li povas esti eĉ bona, sed
tamen li vivas nur instinkte kaj ne multon valoras la
boneco nur instinkta. Eble, ĝi donas ĝojon efemeran,
sed neniel kontentigas tiun, kiu estas jam konscii-
ginta pri malpleneco, senceleco ĉe sia ĝisnuna vivo.
Kaj entute, ĉu oni povas ekzisti sen celo? Jes, *movo-
por la movo*. Bone, tio povas esti la celo de la Vivo
mem, sed neniel tiu de la *konscie pensema kreitaĵo*.

Vivi por la amo, por la nura pariĝo, por la kon-
servo kaj daŭrigo de la raso? Iam, kiel brilan veron,
li akceptis tiun ĉi penson, sed hodiaŭ... hodiaŭ
li opinias tion tute besta. Kial? Ĉu li mem ne estas

ja besto, aŭ hombesto, kiel nomus lin la mortinto! ?... Vivi por la stomako kaj infano. Ne, tio estus kruela facilanimeco. Kiel monstra ombro teruris lin la penso: en la posteuloj ofte renaskiĝas la prauloj. Korsire estas eĉ pensi pri tio, ke en iu reviviĝu la bestohomo. Li ne povas ja vivi eĉ por infano. Kio restas do? La stomako, la ventro. Nu, tio estas vere tute animala. La senfekundeco, la asketismo nur tiam havas pled-motivojn, se ĝia celo estas sankta, idea. Vivi por la sankta ventro!...

Amare ironie li ekridis kaj li ne rimarkis, ke lia animo baraktas en vundofebro kaj vagadas en la pensomondo de la vulturhomo. Ĝis nun li mokis ja ne niun: nek sin mem, nek iun alian.

La kurego de la vagonaro bridigis, fine ĝi haltis. Cezaro Grauer malfermis la kupefenestron. La aerblovo alportis freŝan fojnodoron, bonfare karesadis lian febran frunton. Antaŭ la stacidomo sur la perono oni tumultis. La stranga, iom kurioza nacia kostumo faris unu kaj alian interesaj. Li estus dezirinta interparoladi kun ili. Neeble, ĉar li ne konas ja ilian lingvon, kvankam nun estus bone enterigi sin en la gapadon de la simpleco kaj senpeka malscio. Jen, ili nur tumultadas sur la perono kaj ne envagoniĝas. Jes, ili estas kamparanoj, vilaĝanoj, nebezontaj rapidvagonaron. Bone estas por ili ankaŭ la tria klaso de personvagonaro... Kamparanoj, simplaj vilaĝanoj. De ili devenis ankaŭ lia avino, tiu servistino, kiu ne sciis, ke de kiu ŝi havas infanon kaj... kaj... vendis sian idon, lian patron kiel poreksperimentan kobajon. Vere, ŝi ne sciis ja por kia sorto, sed tamen ŝi vendis lin. Eble nun ankaŭ ŝi gapadas tie inter la maljunulinoj sur la perono kaj ŝia rigardo kroĉiĝas al la nepo, kaj blasfemas la dion pro la sinjoraj moŝtoj, kies sorto tiel diferencas de la ŝia.

La kamparana spito vekigis en Cezaro Grauer. Li deziris sakri, sed ne en sia lingvo, sed en la lingvo de sia avino, en tiu ĉi strange sonanta nekonata lin-

gvo. Ho, kiel estus bone parencoserĉe superkrii la bruon de la amaso : »avinjo, ĉi vendis mian patron kaj per tio akiris la sinjoran veston de ĉia nepo !« Tiu penso incitis lin. Li ekkoleris je la facilkreda malsciemo, kaj vilaĝanina naiveco, sed poste sentis sian maljustecon al la nekonatolino.

Kurbdorsa kaduka maljunulineto paŝadis preter la vagonoj, proponadis mineralakvon. Ankaŭ al Grauer ŝi etendis boteleton.

— *Vod turu bak, hesi, mol ej guld !* (Akvon aĉetu, sinjoro, nur duona guldo !)

Kvazaŭ maŝine li prenis la botelon. Lia rigardo profundigis en la sulkojn de la velkinta vizaĝo. Mania imagemo ekregis lin. La sorto eble ĝuste tiun alportis al li, al kiu lia animo sopirploris antaŭ momento. Ĉu neeble, ke lia avinjo proponas mineralakvon al sia nepo ? Ĉe la penso subitaj larmoj ekvualis liajn okulojn. Li ĵetis la botelon sur la sidejon kaj centguldanan bankbileton en la korbon de la maljunulino.

— *Nam mogi guld, hesi. Bak el i pag ŝŭri !* (Mi ne havas multe de mono, sinjoro. Reprenu kaj pagu per malgrandaj !) — ŝi klarigis kun malespero de la honesta mizero.

Grauer subite fermis la fenestron, falis sur la sidejon kaj ploris... ploregis. La vagonaro jam estis kureganta ie malproksime, kiam li povis superregi sian malfortecon. La mania imagemo eĉ tiam turmentis lin.

— Mi aĉetis botelon da akvo ĉe mia avino kaj pagis por ĝi kiel la vulturhomo por mia patro.

La frunton li premis al la malvarma vitro de la fenestro. La vagonaro serpentumadis inter montoj. Tie kaj tie, en la smeraldverda abiaro, blankmuraj dometoj modestadis kaj sur la pinto de la lignoturaj preĝejoj ekbrilis orumitaj kruco aŭ koko. La subiranta suno adiaŭadis de ili. Sur la paŝejo, etendiĝanta laŭ la fervoja linio, hejmenirantaj vilaĝanoj marŝis. Nur por momentoj Grauer povis vidi ilian vizaĝon,

sed sur ĉiu mienis la trankvilo de la simpleco. Ho, kiel li enviis ilin. Ili iras hejmen, hejmen al la virino, al la infanoj, poste ili altabliĝos por konsumi la unu-pladan vespermanĝon, kisos la peceton da pano, por kiu ili pagas per laborŝvito de la frunto. Serene ili kulerumados kaj ĝempregos: ho, Dio, donu favoran veteron! Ho ve, nur malbonan Li ne donu! Jen, kio plenigas ilian vivon. Ili eĉ konjekton ne havas pri la turmentoj de la rafinitaj intelektuloj, kaj eĉ se ili aŭdas pri tio, tamen ili ne povas altiĝi ĝis la kompreno. En ŝultrolevo evidentiĝas ilia interesiĝo. Jes, jes, sanaj, senartifikaj animoj!

Tie, kien li estas revenanta, la infekta spiro de malsanaj animoj venenas la aeron. Sed kial li devas reveni? Ĉu li ne estas libera kaj sendependa? Ĉu ne estus pli bone rifuĝi al tiuj sanaj animoj? Certe, inter ili li trovos resaniĝon. Ie, en arbarmeza domo, kie la simplaj vizaĝoj ne mensogas kompaton. Jes, tie la silento muzikas, lulas la animon kaj tie la soleco ne mortigas, ĉar tiuj homoj estus mutaj *nur por li*. Li povos aŭdi ilian parolon kaj ne devos kompreni ĝin... Sed do kien li revenus? Ĉu al la fakturoj kaj kaslibroj? Kiu atendas lin? Kiu?... Knabino, nervema kaj pimpanta kun ruĝsminkitaj lipoj ĉe la skribmaŝino. Ŝi volas edziniĝi, *nur* edziniĝi. Strange, la unuan fojon li rememoris pri ŝi kaj ne sentis sopiron je la revido. Ili daŭrigus ja tie, kie ili ĉesigis. Matene, »mankison, Franciska!«; post la oficaĵoj, »ni iru, Cezar', en sukerajejon!«; vespere »ankaŭ por la panjo aĉetu bileton en la orfeono, Cezar'!« kaj post noktomezo denove, »mankison, Franciska!«... Sed kio ligas lin al tiu knabino? Pintnaza kamaradina vizaĝo, du neĝblankaj grasetaĵoj manetoj, kiujn li ornamis per juveloj, filigranaj petolkonturaj piedoj kaj ŝia sinlaŭda afektemo, kiu postulas nepran terenfalon de la viro antaŭ la virineco... En tiu ĉi momento li tute *ne amas ŝin*. Sed ĉu ŝi amas lin? Inter la rememoroj li serĉis, serĉadis ion noblan. Nur nesindonan sinpro-

ponon li trovis. Ludon kun la sensa amigado por la fianĉina ringo. Ne, ankaŭ ŝi ne povas ami lin. Nek li, nek ŝi. Li ne konas ja amon. Neniām li havis iun, kiu estus instruinta lin pri la nobleco de la amo. Kie li estus povinta ekkoni ĝin? Ĉu en la instituto, inter severmienaj negoculoj, sur sino de pagitaj ĉiesulinoj? Ne, neniū ankoraŭ amis lin, nek li amis iun. Ĉu neniun li amis?...

Vizaĝo el la infanaĝo ekridetis al li. Jes, li amis tiun, pensante, ke ŝi estas lia patrino. Tro frue oni frakasis la altarbildon de la infankoro. Kaj tamen tiu unu, tiu sola, tiu nekonata sennoma iu amis lin. La iama ĉambristino, la dancistino, la necesvirino de la vulturhomo. Jes, ŝi amis lin la idon de la bestohomoj. Eĉ en la lasta minuto de sia vivo ŝi pensis pri li, suferis ĉe flanko de la kruelulo por prizorgi la forlasitan orfon. La katvizaĝa Amalia Korp... Jen nomo, eble ne apartenanta al ŝi. Egale! Bone estas doni nomon al tiu, kiun ni amas. Jes, Amalia Korp, la patrinanstataŭanto. Ŝi postlasis sian tutan havaĵon por li, faris lin riĉegulo... Nun la unuan fojon li pensis pri sia riĉeco. Kvin milionoj da dolaroj! Grandioza kapitalo, atendanta lin en la banko je lia propra nomo. Kvin milionoj... La penso kaŭzis momentan sveneton. Li havis ja ĉion de sia sesa jaro kaj pri li ĉiam malavare zorgis tiu... tiu... Ankaŭ lia ofico estas bone salajrata, li mem ŝparis kelkajn milojn da markoj kaj tamen kion komenci per tia granda riĉaĵo?... Li rezignos pri ĝi, donacos al ia bonfara celo. Tio ĉi nur trafalmis en lia kapo, ĉar en la posta minuto fremda rikano grimacis sur lia vizaĝo. Penso ironiadis en li: la hipokritaj bonfaremuloj certe administrus ĝian duonon por siaj poŝoj. Konsterniĝante li rimarkis, ke li perdis sian kredon pri la homa honesteco. La veneno de la vulturhomo profunde penetras ĉiam pli kaj pli... Li devas resaniĝi!

Sur rando de altaĵo kuregis la vagonaro. En fora valo grizaj ardezaj tegmentoj de urbeto vidiĝis in'er

la arboj. Sur la montdeklivo kelkaj vilaoj. Kiel bone estus kaŝi sin tie en la nekonateco, ripozi, resaniĝi. La vagonaro finkuris longan kurbon, bremsis, haltis. La stacidomo estis sur la transa flanko. Grauer vidis nur kelkajn relparojn post kiuj kondukis makadamita ŝoseo. La montdeklivaj vilaoj allogis lin. Li flankentiris la kupepordon kaj elrigardis. Silenta eturba stacidomo. Antaŭ la perono kelkaj florbedoj, kaŝtanarboj. Sub ili — benkoj. Nur kelkaj gapantoj, eble la familianoj de la fervojistoj, staradis kaj sidadis tie. Li suprenrigardis al la fronto de la stacidomo. *Bikitato*. Neniam li aŭdis pri tianoma urbeto. Tre silenta urbeto povas esti tiu ĉi Bikitato. Post la barilo, antaŭ la elirejo malĝojis tempmordita fiakro. La fiakristo paroladis kun fervojisto... Kiel bone estus portigi sin per tiu tempmordita fiakro en la urbeton, pensis Grauer. Sed kial ne? Li povas ja resti. Libertempon semajnan li havas ja kaj per telegramo petos ĝian plilongigon. Li estas malsana, ne povas vojaĝi, bezonas ripozon kaj tiel plu. Motivoj ne mankas.

Akra fora fajfo tranĉis la silenton. La konduktoroj, starantaj antaŭ la vagonaro, ekgrimpis sur la ŝtupojn. Sur la najbara relparo, antaŭ li, vaporblove dignoplene aperis lokomotivgiganto. Lia vagonaro atendis ĝin. Tiu vagonaro haltis kaj la lia ekiris.

La neatendita ekmovo de la vagonaro preskaŭ teruris lin. Pli konvenan, pli oportunan lokon kiel estas tiu ĉi silenta Bikitato por la ripozo, resaniĝo li ne povas ja trovi. Subite li decidis, la valizon ĵetis tra la fenestro kaj per lerta svingo saltis de la vagonaro, kuris tra la relparoj al la ŝoseo.

VI.

La urbeto malproksime en la valo etendiĝis. La ŝoseo serpentume kondukis al ĝi. Lastaj radioj de la subiranta suno orumis la pejzaĝon. Longdaŭra vojo, sed... Almenaŭ trikvaronhorojn li bezonos piedmarŝi por atingi la unuajn domojn. Nu, egale! Nun neeble reveni! Neeble reveni. Li ĝojis pro la penso. Liaj pulmoj plenstreĉite enspiris la freŝan aeron. Kvazaŭ li estus renaskiĝinta. Ĉi tie, en la fremdeco, neniu konas lin. Migranto li estas, kiu laŭ sia plaĉo kaj tie, kie li volas, faros sian tendon.

Li ekiris per longaj paŝoj. La valizo forte muskolstreĉe tiris lian brakon. Do, li prenis ĝin sur la ŝultron. Liaj geamikoj certe priridetus lin. Hohoha! Pakaĵliveranto, vestita laŭ la plej lasta angla modo. La penso ektiklis lin kaj li laŭte ekridis, poste rememoris pri la marŝkantado de la soldatoj. Se li kantus, la tempo pli rapide, nerimarkeble pasus... Li ekirigis la melodion sen teksto el inter la dentoj. La tekston li ja ne konis, nur la melodion.

Malantaŭ li bruo de radoj. Li turnis sin. Jen, la tempmordita fiakro... Li haltis. Verŝajne la veturigisto surprenos lin por kelkaj guldoj. Granda pajloĉapelo kaj korbo sidis post la veturigisto. Nu, ne tre grave. Ankaŭ perpiede li atingos la urbeton. Nur informojn li petos. Li flankenstaris do al la ŝoserando.

Kiam la fiakro estis de li nur en kelkmetra distanco, li salutlevis la ĉapelon. Je tiu gesto la granda

pajloĉapelo, sidanta en la fiakro, malkaŝis junan knabinvizaĝon, kiu kun muta kapbalanco resalutis lin. La neatendita juna vizaĝo surprizis lin, sed lia embaraso daŭris nur momenteton.

— Pardonu, fraŭlino, sed mi estas fremda en tiu ĉi regiono. Kiom longe daŭras la vojo ĝis la urbo kaj ĉu tiu ĉi vojo kondukas rekte tien aŭ mi devos turni min al iu flanka vojeto?

La veturigisto haltigis la ĉevalojn. La knabino embarasite rigardis al la fremdulo. Grauer ripetis la demandon. Ŝia enŝtela voĉo sonis fremdmaniere.

— *Ich kann nicht deutsch.* (Mi ne scias germane.)

Verŝajne la knabino diris veron kaj krom tiu ĉi sola frazo ŝi povas esprimi nur la ideojn de »ja« kaj »nein« en tiu ĉi lingvo. Grauer do tradukis sian demandon en lingvoj franca, poste angla. La knabino kun ridetantaj okuloj skuis nee la kapon. Pro embaraso ŝi ridetis. La veturigisto signifplene levadis la ŝultrojn por esprimi, ke ankaŭ li ne komprenas la fremdulon. Fine, kion fari, Grauer kun ĝentila gesto levis la ĉapelon, la knabino mute resalutis lin, la veturigisto ektiklis per la vipo la ĉevalojn kaj la tempmordita fiakro kun la granda pajloĉapelo ekiris... Grauer longe rigardis post ili kaj sekvis la radpostsignon.

Kelkcent paŝojn antaŭ li la fiakro pasis. La knabino rerigardis, haltigis la fiakron, voke gestadis. Grauer plirapidigis la paŝojn. Kiam li atingis ilin, la knabino kun ĉarma rideto invitis lin eksidi apud ŝin. La granda korbo estis metita sur la veturigistan sidejon. Grauer dankis kaj akceptis la komplezon. La knabino diris ion al la veturigisto kaj la du ĉevaloj ekgalopis.

La gejunuloj, nekonantaj unu la alian, sidis sen-vorte. Ili havis ja tempon por la observado, pensado, konkludado. La rigardo de Grauer ŝteliĝis kelkfoje al la vizaĝo de la knabino. Li sentis sin tre mallerta pro la altrudita muteco. Ĉe tiaj okazoj iu povas ŝajni

eĉ impertinenta, se li gapas al la apudsidanto. Li atentis do la kurbiĝojn de la ŝoseo kaj resumis la rezulton de la ŝtelrigardoj. Bela knabino, eĉ belulino, li pensis, certe ŝi estas la filino de iu bonhava bagona bienulo. Pli ĉarman vizaĝon li ne vidis eĉ sur pentraĵoj. Ŝi ne estas pintnaza, nek ruĝŝminkita. Ŝiaj brovoj estas ne artefaritaj. La okuloj mirinde profundbluaj. La haroj verŝajne blondaj. Bedaŭrinde, ke tiu granda ĉapelo kaŝas ilin. Nu, kaj krome jam forte vesperigas. Ŝiaj manoj ne estas filigranaj, ne en glicerino banitaj molaj karnopecoj, sed tamen tre belformaj. Eble, ŝi ne estas eĉ riĉa. Nur nigraŝtona ostringeto ornamas ŝian maldekstran manon. Belformaj fingretoj, kun puraj, nature rozkoloraj ungoj. Tiajn manojn tre malofte vidas la urbano. Centimetrolongajn poluritajn ungojn jes, sed tiajn formomodelajn ungetojn... Kaj ŝiaj piedoj? Nu, belaj, vere belaj. Eble ili ne impresas tiel artifike malgrandaj, sed nekontesteble ili havas naturan pozon. Ŝia kostumo simpla, sed bonguste eleganta. Ne tro mallonga, ne tro longa. Tiel knabineca. Bone ĝi decas al ŝia sunkisita vizaĝo... Verŝajne, ŝi ne estas filino de bienulo, sed en modesta medio vivanta burĝa knabino, ĉarme serioza. Jes, jes, ŝi estas instruistino. Tute certe ŝi estas instruistino.

Dum Grauer tiel cerbumadis, ankaŭ la knabino faris siajn rimarkojn pri la fremdulo. Ŝi ne trovis lin malbela, nek bela. Granda blonda germano. Eble li estas turisto aŭ komerca agento. Liaj vestoj estas el bona materialo, elegante altranĉitaj. Odorojn de parfumo kaj tabakfumo la venteto miksite portas de li. Verŝajne, li estas drogisto. Liaj manoj estas muskolaj, blankaj, la ungoj puraj, ne flavaj. Malofte ĉe viroj. Certe li prizorgas ilin kaj fumas nur tubhavajn cigaredojn. Liaj okuloj... Nu, la okuloj kaj la lipoj estas belformaj. La unuaj karbonigraj, la duaj — sangruĝaj. Kiam li ridetas, certe mildiĝas liaj trajtoj. Lia voĉo konjektigas revemulon. Ĝi rememorigas pri sonorilsono alda kaj tre fora. Domaĝe, ke ŝi ne povas

paroli kun li. Si estas scivola pri lia interno... Nu, ŝia frato diros ja tion. Nun ŝi pensis pri sia frato kaj petola rideto vibris ĉe ŝiaj lipoj. Tute certe, ke li ŝerce primokos ŝin. Mutan kavaliron, eble migrantan minstrelon ŝi prenis al si el la polvo de la vojo. Nu, bone! Estu tiel! Tamen ŝi ne povis esti tiel senkora, ke ŝi lasu for la fremdulon sen helpo... Kiu scias germane paroli en Bikitato? Nu, du, tri, eble dek personoj scias ja, sed ĉu *li* serĉadu ilin dumnokte? Hotelo ja tute ne ekzistas tie ĉi. Estas ia gastejo ĉe la lago, sed verŝajne oni jam ŝlosis tie la pordon. Al kiu li estus povinta iri? Ĉu al la pastro? Li ne scias ja, kie tiu loĝas. Al la spicvendisto, kiu havas butikon por brandtrinkantoj. Fi! Por tiu ejo li ŝajnas tro delikatsenta. Estas ankoraŭ la maljuna instruisto, kiu havas ses gefilojn. Tri dormas en la kuirejo, kvin en la ĉambro. Kiu estas ankoraŭ? Ho, jes, la apotekisto kaj la kuracisto. Ĉe la unua li mortmalsatus, ĉe la dua estus devigata esti atestanto pri jaluzaj scenoj... Plej prudente estas tiel, ke li venos al ili. Morgaŭ li povos fini sian laboron dumtage. Ŝi pretigos komfortan kuŝejon sur la ŝezlono en la laborejo de la frato. Ili havas ja sufiĉe da litaĵo. Ho, kien li estus povinta iri dumnokte en Bikitato?!... Tamen li ŝajnas turisto, ĉar en tiu ĉi urbeto ne estas tiaspeca vendejo, kie li povus proponi siajn varojn.

Ĉe kurbigo la vojo disiĝis. La pli larĝa deklivis al la valo, al la urbeto kaj la alia suprenkondukis al la vilaoj, konstruitaj sur la montflanko. La fiakro turnis sin al tiu lasta. Grauer surpriziĝis.

— Ĉu ni iros ne en la urbeton? — Li demandis montrante al la dometoj en la valo.

La knabino ridetante kapneis, montris al ne malproksima ardeztegmeta dometo. Grauer komprenis kaj pro konveneco protestadis.

— Certe, mi estos malgrabla gasto por viaj gepatroj.

— *Ja, ja!* (jes, jes!) — respondis ŝi, pensante,

ke la fremdulo demandis : »ĉu vi loĝas tie, kara fraŭlino ?«

Grauer ridetis pri la efektiva miskompreno... La knabino konstatis, ke lia rideto estas melankolie karesa.

La vojo, ne tre komforta, kondukis tra gigant-arba abiaro, zigzagis. Ĉe la tria kurbiĝo la fiakro haltis antaŭ la beleta domo. La knabino vigle desaltis, kuris al la pordo de la barilo kaj ekkriis.

— Juro!... Juro!

La veturigisto metis la grandan korbon sur la teron. En la kapo de Grauer klariĝis la penso, ke ŝi antaŭe volis reveni hejmen kaj poste ŝi lasos la fiakron je lia dispono. Li povos do uzi ĝin ĝis la urbeto. Sincere li deziris tion. Neniun li volis ĝeni. Certe troviĝas ia hotelspeca domo en la urbeto.

La knabino turnis sin al li, mire ekstreĉis la okulojn, sed post momento per ĉarmaj invitaj gestoj klarigis, ke ili alvenis jam kaj estas tempo elfiakriĝi. Dum Grauer, ne tre volonte, obeis kaj ekstaris kun la valizo en la mano, sur la vojeto al la pordo ekknaris la siliko sub proksimiĝantaj paŝoj.

— Juro, kun gasto mi alvenis, — komencis la knabino. — Prezentu al vi, li estas germano ! Eĉ unu vorton mi ne povis paroli kun li. Tiel kompatinde mallerta li staradis tie ĉe la vojrandoj, ke mi ne povis resti senkora kaj invitis lin eksidi en la fiakron kaj pasigi ĉe ni la nokton.

La mastro de la domo bonkore ridetis.

— Ĉu vi invitis lin ? Antaŭe vi diris ja, ke eĉ unu vorton vi ne povis interŝanĝi kun li.

— Nu, mi invitis lin per pense. — Ŝi rugiĝis dum la respondo. — Vi scias ja, ke la ŝezlono en via laborejo tute bone taŭgos... Ne ridetu ! Mi scias, ke vi primokos min. Pli bone, parolu kun li !

Dolĉe muzikis la knabina voĉo. Grauer konstatis, ke la sonado de tiu ĉi lingvo estas fremda de tiu de la bagona idiomo. Aŭ ĝi havas specialan bel-

econ el inter la lipoj de la knabino? Pri tiu penso momenton li revis kaj preskaŭ forgesis levi ĉapelon al la mastro de la domo, salutanta lin kun afabla rideto.

— Bonvolu enveni, sinjoro! Servos je nia granda ĝojo, se ni povos iamaniere helpi vin. — Li etendis la manon kaj prezentis sin. — Juro Aleksandroviĉ Košelev, skulptisto.

Grauer kun momenta embaraso luktis. La ne-atendita spontaneco tuŝis lin ne tre agrable. Li pensis pri tio, ke li volas rifuĝi de la mondo kaj jen ĉe la unua paŝo li renkontas samklasan viron, perfekte parolantan la germanan lingvon. Lia sopiro tiris lin al la kamparanoj. Tiuj eble eĉ gazetojn ne legas, sed tiu ĉi sinjoro certe konas jam lian nomon. Eh, li uzos pseŭdonimon. Morgaŭ li vojaĝos ja plu al pli oportuna kaŝejo.

— Francisko Hinzen — diris li aŭdace. La nomo de lia skribmaŝinistino estis Franciska Hinzen. Pli oportunan nomon li ne trovis momente, poste turnis sin al la knabino kaj ankaŭ al ŝi prezentis sin.

— Tamara — ŝi diris senafekte.

La knabino etendis sian maneton por premo. Grauer volis kisi ĝin, sed ŝi fortirinte ĝin malhelpis tion. Košelev laŭte ekridis.

— Nu, estas eminente, vi eĉ ne konas unu la alian?! Tamara, vi estas vere ekstravaganca, kiel ĉiam — kaj poste germane daŭrigis — mia frantineto kondukos vin en la domon. Mi havas ankoraŭ ion por la fiakristo. Ne, ne! Lasu ĝin, mi petas. Pri via valizo mi zorgos. Fartu vin hejmece! Post momento mi estos kun vi ambaŭ... Tamara!

La knabino antaŭenrapidante montris la vojon. Tra la verando, hederkovrita, ŝi kondukis la gaston en la salonon. Salono kaj manĝoĉambro kune. Vasta, aeriĉa, simple meblita hejmo ridetis al la fremdulo. La pureco kaj delikata aranĝo laŭdis ŝiajn ordemon kaj guston.

Tra la malfermita pordo de la apuda ĉambro oni povis vidi la dormoĉambron. Inter la litoj, starigitaj en gefrata distanco, sur aparta piedestalo staris krucifikso, preskaŭ dumetra, skulptita el marmoro. La pendanta figuro de la krucumito estis korbhaltege homa. Ĝi diferencis de ĉiu ŝablono kaj la teruran realecon de la martirmorto tiel plastike montris, ke tio vekis plie konsternan kortremon ol religian piecon. Tiel artan, tiel perfektan, larmovokan skulptaĵon Grauer ankoraŭ ne vidis. Li forgesis sian rigardon tie kaj ne rimarkis, ke la knabino proponis seĝon por li. Dolora demando zigzagis tra lia menso. Pro kio mortis Kristo? Kial mortis martire la filo de la Homo? De ie, eble el profundo de lia animo venis la timema respondo: *por la Homo*.

— Bonvolu eksidi do, — denove ŝi proponis, sed nun pervorte. Kvankam Grauer ne komprenis la vorton, tamen la sonora voĉo rekonsciigis lin.

La knabino malaperis en la dormoĉambro por demeti la ĉapelon kaj surtuton, revenis kaj altabligis kontraŭ li. Ŝi ridetis ĉarme, kuraĝige, indulge. Grauer estis surprizita, ke ŝi ne estas blonda. Malhelaj, kaŝtanbrunaj bukloj donis indan kadron al ŝia bela frunto. Ŝia frizaĵo preskaŭ provoke simpla. De jaroj la unuan fojon li povis rimarki, ke ankaŭ la virinoj havas orelojn, kisindajn oreletojn. La modo de la hodiaŭo kaŝas ja ilin, kvazaŭ estus honto havi orelojn.

Li rigardis kaj rigardis la knabinon. La senĝena, laŭnatura sintenado, kiun ŝi havis sidante kontraŭ li ĉe la tablo, forgesigis kun li, ke li troviĝas inter fremdaj homoj en fremda lando. Neklarigeblian trankvilon li sentis. Kvazaŭ iu milde estus karesanta lian turmentitan animon. Jes, la marobluaj okuloj karesadas, trankviligas ĝin. Kaj kiel spontanee, senpoze... Estus bone koni la sopirojn, dezirojn, sekretojn, kiuj kaŝiĝas en la animprofundo de tiu ĉi knabino. Eh, kial? Kial interesiĝi pri ili? Hodiaŭ li vidas ŝin, morgaŭ li jam estos for. Cetere,

kion povas ja kaŝi tia knabinanimo? Naivajn revojn, kirasitan kavaliron, kiu en la momento de la svatado montras sin almozulsaka, vinsoifa vilaĝa instruisto. Ho, ŝi certe meritis pli! Kiu scias? Verŝajne, ŝia mondpercepto estas same simpla, senpoza, kiel ŝia eksteraĵo. Eble, eĉ tro simpla, netransira la limojn de ŝia vilaĝo.

Koŝelev kun ridetanta mieno malfermis la pordon.

— Nu, mutulino, nun estus utile scii tiun germanan lingvon, ĉu ne?

— Mi ne sentas la mankon de la lingvoscio. Tiel pli bone mi komprenas lin. Pli profunden mi vidas... Se ni iam bezonos la paroladon, mi instruos lin.

Tamara diris ĉion ĉi tiel serioze, ke tio efikis komike kaj Koŝelev laŭte ekridis.

— Prezentu al vi, ke mia fratinetto volas instrui vin paroli... Eh, nun mi rimarkas, ke vi ne demetis vian surtuton. Transdonu do! Vian valizon mi portis en la laborejon, kie vi pasigos la nokton. Nu, ne tre timu! Ĝi estas tute agrabla laborejo. Almenaŭ mia fratino asertas tion.

— Via gastamo, gesinjoroj, vere tre embarasas min. Mi celis eniri en la urbeton, pensante, ke en hotelo mi tranoktos kaj morgaŭ mi serĉos pli oportunan loĝejon.

— Ĉu en hotelo? En Bikitato vi pretendas trovi hotelon?! Ĉi tie eble eĉ en la gastejo ne ekzistas loĝoĉambro. Nu, ne protestu! Mia fratino invitis vin kaj tiun ĉi inviton kun vera ĝojo mi aprobas. Tiel malofte mi havas okazon paroli germane.

— Vi bonege parolas. Kie vi lernis?

— En Berlino. Mi studis tie en la Akademio de la Belartoj. Sed jam antaŭ dek kvin jaroj. Jes ja, mi estas jam maljuna vireto.

— Kiel? Vi ne ŝajnas pli aĝa ol mi. Mi pensis, ke ni havas saman aĝon.

— Mi estas tridek kvin jara. Kaj vi?

— Dudeknaŭ.

— Ĉu vi loĝas en Berlino?

— Jes, mi estas prokuristo ĉe granda entrepreno por eks- kaj importoj.

— Ĉu por negocaj aferoj vi venis en Bagnion?

La demando ĝenis Cezaron Grauer. Post la falsa nomo li estis devigata mensogi plu, se li volis konservi sian inkogniton.

— Jes, ... por negocaj aferoj... Nur por negocaj aferoj.

— Espereble, bonsukcese vi aranĝis ĉion.

— Tre bonsukcese... eĉ tro bonsukcese.

Kontraŭvola doloro vibris en lia voĉo kaj Košelev instinkte sentis, ke la pridemandado malagrable tuŝas lian gaston. Li provis korekti sian sentaktecon, kaj ŝanĝis la temon. La okulludo de lia fratino helpis lin.

— Jen vidu, kiel senatenta mi estas. Se mia fratino ne avertas min, mi forgesos eble eĉ pri tio. Vi estas laca, verŝajne eĉ malsatas, ĉar la vojaĝanto havas bonan apetiton. Mi scias tion pri mi mem.

— Dankon! Vere, ne faru zorgojn al vi pro mi... vere ne...

Li ne povis fini, ĉar tuŝo de maneto haltigis lin. Tamara metis sian manon sur la lian, verŝajne por alvoki lian atenton kaj per tiu gesto peti pardonon por sia foriro, tamen Grauer sentis ion alian. Nur kelkajn sekundojn ripozis ŝia mano sur la lia, sed tiel karese, varme sincere, kvazaŭ iu estus metinta sian koron tien. Tiu ĉi mano ne flatadis, ne ekmovis por signifplena premo, nek koketis. Tiajn manojn havas tiu ĉi knabino, kia ŝia rigardo, pensis li.

— Ne forgesu, ke ankaŭ ni deziras vespermanĝi kaj vi havas viajn gastajn devojn.

— Memkompreneble... Mi nur petas vin, ke ne faru apartajn zorgojn pro mi, speciale por mi.

— Ne pensu pri tiaj vantaĵoj! Ni estas tre simple vivantaj. Du gefratoj, restintaj orfe je nia re-

ciproka bonvolo en ia fremdeco. Ho, mia fratino bone kaj saĝe mastrumas.

Tamara turnis sin reen ĉe la pordo.

— Juro, proponu cigaredon al la gasto. De kiam li forlasis la vagonaron, li ne fumis. Verŝajne lia provizo konsumiĝis kaj mi tute ne mirus, se en sia nuna animstato li estus forgesinta denove aĉeti.

Tamara fermis la pordon post si. Sia frato kun mira rigardo enpensiĝis. Kiel strange? Poste ridetis, ĉar Tamara povas esti ja prava, kiel ĉiam.

— Cu vi fumas? — Li turnis sin al li.

— Jes, sed... sed...

— Tuj, ...bonvolu preni! Bonegaj specialaĵoj. Aŭ ĉi vi preferas cigaron?

— Ne, ne! Dankon... jes, tiun tubhavan... Hodiaŭ la lastan cigaredon mi fumis en Strutmagen kaj nur en la vagonaro mi rimarkis, ke mia provizo konsumiĝis el la cigaredujo.

Koŝelev rememoris pri la frazoj de sia fratino: «mi ne sentas la mankon de la lingvoscio. Tiel mi vidas pli profunden.» Preskaŭ li embarasiĝis pro la longdaŭra enpensiĝo. Eble la paŭzeto ŝajnis ĝena por la gasto.

— Belega estas nia regiono, — li komencis kun altigita tono, kvazaŭ kompensi la prokrastitajn. — Bikitato havas la plej pitoreskan situon en tuta Bagonio.

— Cu vi loĝas tie ĉi jam delonge?

— Jam de dekunu jaroj. Tiutempe Tamara estis dekjara knabineto.

— Kaj ĉu vi povas bone toleri la solecon? Ĉu ne incitas vin la silento? Ĉu vi ne sopiras je la plezuroj de iu kulturcentro? Vi estas ja artisto.

— En la metropoloj la arto estas nur foira lukto. Ĉi tie retransviliĝo, konsolo. Mi ŝatas loĝi ĉi tie. Rememoroj ligas min al tiu ĉi loko.

— Verŝajne, la rememoro pri amo, ĉu ne? . . .

Pardonu, mi estas scivola urbano. Mi petas vin, ne respondu, se ĝenas vin la demando!

— Kial? Mi ne hontas pri tiu rememoro. Min ligas ama rememoro, jam delonge enterigita, kiu akompanos min ĝis la tombo, ĝis la tombo de mia edzino... Ĉu vi estas edzo?

— Ne.

— Kaj ankaŭ mia fratino... Si tre ŝatas la pacon, la vilaĝan silenton. Si estas la sunbrilo de tiu ĉi malgaja domo... Sed tamen ne pensu, ke ni estas tute izolitaj de la mondo. Ho ne! En ĉiu jaro ni gustumas la kuirajojn de la grandaj urboj. Vere, kedum kelkaj semajnoj ni plensatiĝas por plua jaro. Tamara ne povas elteni, nek mi. Sincere konfesante, ofte mi pensis, ke ŝi eltenas nur *pro* mi. Preskaŭ ŝi ofertas sin por mi. Tamara estas tre interesa, ofte nekompreneble sentema. Laŭeksteraje ŝi rememorigas min pri nia patrino, sed ŝia tuta anima mondo estas tiel milda, meditema, revanta, kiel estis tiu de nia patro.

— Ĉu ŝi estas religiema?

— Nu, ne tre. Alivorte, ŝi ne loĝas en la preĝejo ĉe la ombro de la pastro. Laŭ ŝiaj vortoj: »Mi estas parto de la tuto kaj plenumas devon. Ankaŭ Kristo faris la samon.« Cetere tiu ĉi diro tre karakterizas ŝin. Estas en ĝi io tragika, io rezigna, memvola humiliĝo antaŭ la Vivo. Jes, antaŭ la Vivo, sed ne antaŭ la homoj, kiujn ŝi fanatike amas.

Por momento antaŭ Grauer aperis la karesa rigardo de la knabino, denove li sentis la tuŝon de la varma kordonaca mano. Jen ŝia animo havas pli misterajn profundojn ol li pensis en la unuaj momentoj. La simpleco estas nur masko. Ne, ne! Nur li vidas ĝin masko, ĉar li ne konas la koran simplecon. Lia rigardo preterglitante la diversajn objektojn haltis ĉe la marmora krucifikso en la alia ĉambro. Kiel ŝi diris? »Mi estas parto de la tuto kaj plenumas devon. Ankaŭ Kristo faris la samon.«

— Mirinda artaĵo, — li diris al Koŝelev. — De kie vi akiris?

— Mia verko.

Grauer mire rigardis al la artisto. Tiel senpoze li diris »mia verko« kvazaŭ li ne konscius pri grandiozeco de sia krea talento, aŭ ne alte taksus sian scion.

— Admirinde bela ĝi estas, korhaltige originala. Kial vi ne ekspozicias ĝin? Mi estas certa, ke oni proponus konsiderindan sumon por ĝi.

— Ĝi ne estas vendebla. Tiu ĉi krucifikso estas rememorigilo por ni ambaŭ kaj posedaĵo de Tamara. Nia komuna tombomonumento.

La melankolitona parolo de la artisto iom ĝenis lin.

— Ĉu permesate rigardi deproksime ĝin?

— Jen, bonvolu!

Ili iris en la alian ĉambron. De proksime la figuro de la Krucumito faris eĉ pli profundan efikon al Grauer. Kvazaŭ la plej suferplena momento de torturita vivanta homo estus ŝtoniĝinta. La vizaĝo martira, pro turmento deformiĝinta, kun malfermitaj okuloj rigardas al la ĉielo. El inter la lipoj kvazaŭ ŝvebas vekrio. La konvulsia baraktado de ĉiu muskolo, la torĉigo de la fingroj, de manplatoj, tranajlitaj, kurbiganta korpo, streĉita kaj senpova, subigis kaj katenis la animon de la spektanto. Ne, Grauer ankoraŭ neniam vidis tiel krude realan artistan kreaĵon. Sur la piedestalo de la krucifikso ĉizite: »*Eli, Eli, lama sabaktani?!*« (Patro, Patro, kial vi forlasis min?)

— Sinjoro, min sklavigas la forto de via artista genio — diris duonvoĉe Grauer. — Tiu ĉi Kristo ja vivas.

— Jes, li vivas. Li havas ne kvin, nur kvar vundojn. El liaj lipoj vekrias al la ĉielo la »Patro, Patro, kial vi forlasis min?« Ne la trankvilo de la bonfara morto sidas sur ĝi, sed la martirdoloro de la torturata homo. Ne la rebrilo de la ĉiela graco speguliĝas sur

la vizaĝo, sed la pro suferoj naniĝinta homa digno. Jes, tiu ĉi Kristo vivas por rememorigi pri la vivanta veo, pri la sangavido de la venĝemuloj, pri la krimoj de la potenculoj. Tiu ĉi Kristo ne estas la Filo de Dio, sed nur la filo de Homo, senĉese torturata, ĉiutage krucumata de la homoj.

Dum li parolis, en liaj okuloj aperis larma brilo, la vangoj purpure ardis. Grauer senvorte admiris lin. Dum longa momento ili silentis.

— Por krei tian perfektan, la artisto mem devas ja suferi dum la kreado.

Sur la vangoj de Košelev ekruliĝis du larmoj. Lia dolora rigardo emocie ripozis sur la figuro de la Krucumito.

— Mi havis ja modelon... La vizaĝon de martirita viro... Gi akompanas min dum la vivo.

— Kiu estis tiu viro?

— Mia patro.

La apenaŭ aŭdebla respondo, kiel ĝemo forfluganta el tombo, peziĝis sur la animon de Grauer, kaj preskaŭ sufokadis lin. Cent demandoj tumultis sur liaj lipoj, sed li ne envortigis ilin. La fratecon de la fila doloro li sentis kontraŭ tiu ĉi viro. Jen, certe la patron de tiu ĉi forrabis la furiozado de vandalismo. Ankaŭ la lian. Ties patro havis martirmorton, kaj lia patro martiran vivon. La martiran vivon de la besto li havis de sia naskiĝo.

Ili staris antaŭ la krucifikso kaj ilia rigardo jam vidis ne la figuron, skulptitan el marmoro, sed la vivantan, suferantan, baraktantan homon. En Grauer denove ekaperis la demando: *kial?*

Senbrue malfermiĝis la pordo de la najbara ĉambro. Tamara portis surplade la necesajn por la tablopretiĝo. Ŝia rigardo serĉis, trovis la du virojn, en penso staris al ili, al la fremdulo. Depost la renkonto la duan fojon ŝi sentis, ke estus ŝia devo stari ĉe lia flanko... Kvazaŭ maŝine ŝi ordigis la telerojn,

manĝilaron. La pladon ŝi metis sur la dekstran flankon de la tablo kaj forlasis la ĉambron.

— Vojon de uragano signas eltorditaj arboj, — komencis mallaŭte Koŝelev. — La granda uragano rompis ankaŭ lian arbon. Jam de dekunu jaroj. El miaj du fratoj unu mortis kun li, la alia... la alia restis tie kaj eble hodiaŭ li kraĉas jam al la memoro de sia patro. Li estis ja juna, facile fleksebla branĉeto. Mi kun mia patrino kaj Tamara eskapis trans la limon. Longajn monatojn ni vagadis el unu lando en la alian. En la najbara urbo mia patrino malsaniĝis, ne povis toleri plu la suferojn. La rememoroj mortigis ŝin. Mi restis sola kun Tamara. La mizera viro kun dekjara knabineto. Kion mi estus povinta entrepreni? Apenaŭ ni havis ion vendeblan. Oni serĉis masonistojn en tiu ĉi urbeto. Mi dungigis kiel ŝtonhakisto. En la najbara domo mi loĝis. La posedantino estas bonanima vilaĝanino. Ŝia filino havas saman aĝon kiel Tamara. Ili ludis kune dum mi laboris. En tiu ĉi domo kun sia filino loĝis vidvino de ĉefurba profesoro gimnazia. La knabino estis belstatura, kolumbkora. Ni interkonatiĝis. Ŝi ne hontis pro mia laborista robo. Ni reĉiproke ekamis nin kaj ŝi donis hejmon en sia koro por la du georfoj. Ses belajn, neforgeseblajn jarojn ni vivis kune. Denove mi povis vivi por mia arto, akiri bonfaman nomon kaj ni pensis jam pri tio, ke baldaŭ mi serĉos eksterlande pli konvenan laborejon. Protektantaj konatuloj ne mankis ja tiam, sed... sed venis, tiam venis la malsano kaj portis ŝin for... Mia kompatinda etulino lasis min for kaj poste ankaŭ ŝia patrino kaj mi restis sola kun Tamara. Jam de kvar jaroj... jes, jes, jam de kvar jaroj...

Koŝelev rakontis ĉion ĉi duonvoĉe, monotone, kvazaŭ li estus parolinta al si. Grauer aŭskultis lin, tutanime sorbis en sin la tutan historion. Lia fantazio kolorigis la okazintaĵojn, ĉerpis konsolon el suferoj de sia homfrato, kvankam tiu ĉi viro iam havis feliĉan

infanaĝon kaj gepatra amo radiis varmon al lia duonvivo, edzina solidareco subtenis lin en la krizaj horoj kaj eĉ en lia nuna orfeco li povas esti certa pri sinofera konsento de fratino. Kiel li diris? »Tamara estas la sunbrilo de tiu ĉi malgaja domo.« En tiu ĉi momento li enviis lin pro tiu sunbrilo, ĉar la vivo estis multe pli kruela al li ol al tiu alia. Ĝi donis al li nur la atenton de la bone pagata prizorgado, la nuran liberecon de senparenca sendepedenco, aĉetitajn kisojn de ŝminkitaj knabinoj kaj fine la forpelitecon kun plenŝtopita monujo... Monon li havis ja ĉiam, sed homan solidarecon, amikan simpatian, centfoje sopiratajn tute ne... Subite li ruĝiĝis. Honto, vere honto, ke tiu ĉi viro sendemande malfermis sian vivon antaŭ li kaj li mem kun mensogo transpaŝis lian sojlon. Eh, tiam li ankoraŭ ne sciis tion, kion nun scias, sentas. Sed jam neeble redancadi! Necese mensogi plu!... Lia mano ekiris, ĉu kontraŭvole, ĉu intence, sed pardonpete. Ĝi karese premiĝis sur la ŝultron de Koŝelev. Ho, kiel bona estas la homa frateco!

Tamara denove venis en la ĉambron, portis la grandan zumantan samovaron kaj metis ĝin sur la pladon. Ŝia rigardo denove serĉis la du virojn. Jen, kiel ili interamikiĝis! Ŝi ne sciis kial, sed sentis sinceran ĝojon. Vigle gaje ŝi iris for por enporti ankaŭ la vespermanĝaĵon.

La tuŝo de la fremda mano rememorigis la artiston pri siaj dommastraj devoj kaj la embaraso de lia senkulpigo ne estis ŝajnigita.

— Pardonu min! Iom mi ekvagadis inter la rememoroj. Malofte tio okazas, ĉar Tamara ne permesas. Certe via cigaredo forbrulis jam... Sed, vidu, jam atendas nin la fabellanda »*Pleniĝu tableto mia!*« Nu, bonvolu altabliĝi. Mi pensas, ke via loko estos kontraŭ Tamara... Jes, tie!

Grauer ne povis tiel facile preni al si la maskon de la societa konveno. Ankaŭ la »*Pleniĝu tableto mia!*« estis tute nova, ne kutima antaŭ li. Lian tablon plen-

igita sorĉas ne fiendoj, sed lacpiedaj kelneroj, profunde riverencantaj por la trinkmono, aŭ en la plej favora okazo la rigore grumblanta kuiristino ĉe la patrino de lia skribmaŝinistino. Tiel senpere li ne sentis ankoraŭ la varmon de la hejmo. Lian gorĝon tiklis turmente la orfeco, kvazaŭ tra ĝi fluus la larmoj al lia koro. Li staris senvorte ĉe la tablo, forte premis la seĝdorsegon. Koŝelev preskaŭ pente ŝtelis rigardon al la melankolia vizaĝo de sia gasto.

La pordo larĝe malfermiĝis. Tamara portis la freŝe vaporantan rostajon. Ŝia ridetanta mieno forpelis la silenton.

— Juro, hodiaŭ ni ŝanĝos lokon. Vi sidos kontraŭ sinjoro Hinzen. Por junulo, kutiminta la virinan societon, ne estus agrable sidi vid-al-vide kun mutulino... Nu, eksidu do! — Tamara montris la lokon al la gasto kaj tuj komencis la dividadon. Al neniu ŝi proponis, sed al ĉiu ŝi mem donis. — Pri kio vi ridetas, Juro?

— Pri kio vi scias, ke li estas kutiminta al la virina societo?

— Nu, Juro, kiel malbona priatentulo vi estas... Sed nun okupu vin sole pri la gasto!

Ankaŭ Tamara altablighis. La forkoj, tranĉiletoj tintis, la samovaro zumadis kaj el iu najbara domo aŭdiĝis la kantado, akompanata de harmoniko, de la gajaj vilaĝanoj. Ne forte, nur mallaŭte, de malproksime, kiel memoro de detruita pasinteco. Vespera humoro de rusa vilaĝeto, jam delonge forbruligita, fantomadis, fantomadis, sed ne teruris. Ĝi lulis kaj mistifikis.

— Kiel kortuŝe bela kaj bona estas ĉio ĉe vi — turnis sin Grauer al Tamara.

La knabino rigardis al sia frato. Li tradukis. Post momenta pripensado Tamara respondis:

— Diru al li, Juro, ke precipe por tiu, kies animo doloras.

Košelev malaprobe balancis la kapon. Tamen ne decus tiamaniere interesiĝi pri la privataj aferoj de fremdulo.

— Kion diris via fratino?

— Nur traduku do!

Košelev tradukis. La rigardoj renkontiĝis. Ŝi milde trankvile observis la mienon de la gasto, poste leviĝis por prepari teon.

— Mia fratino estas kelkfoje iom stranga. Mi menciis ja al vi. Pardonu ŝin!

— Ho, kial?... Via fratino estas prava... Kiel bela samovaro! Ĝis nun mi neniam vidis rusan samovaron.

— Jes... Mia karmemora edzineto surprizis min per tio. Naskotaga surprizaĵo. Ŝi volis revoki, sorĉi mian patrujon en la hejmon.

Longa silento. Grauer jam ne riskis demandi. En tiu ĉi domo ĉiu objekto havas certan memoran signifon, kiun revoki, priparoligi estas ne dece de fremdulo. Estus bone pensi pri la morgaŭo.

— Sinjoro Košelev, mi intencus restadi en tiu ĉi urbeto kelkajn tagojn. Post la Berlin-a bruo vere bone efikus iom da ripozo kaj silento. Vi devigus min al danko, se bonvolus informi min pri luebla ĉambreto.

— Miaopinie en la najbara domo troviĝus unu tre malgranda, sed pura... Tamara, sinjoro Hinzen intencas pasigi kelkajn tagojn en Bikitato. Ĉu vi ne scias, ĉe panjo Lida la ĉambreto nun malplenas?

— Jes... Malmultekoste ŝi ludonos. Mi parolos kun ŝi.

Post la traduko de Košelev Grauer per kapklino dankis la promesitan helpon.

— En tiu ĉambreto vi loĝos, kie mi antaŭdekunu jaroj, kiam ni alvenis ĉi tien.

— Demandu, Juro, kiom longe li restos?

Košelev demandis. Grauer iom pripensadis.

— Kiom longe? Do... do... ĝis mi retrovos min.

La stranga respondo estis surpriza kaj Košelev ne interpretis ĝin. Li observe atente rigardis al la okuloj de la gasto. Grauer ne mallevis la palpebrojn. Almenaŭ per rigardo li volis esti sincera.

Ĝis detabliĝo ili ne interparoladis. Tiam Košelev akompanis lin en sian artan laborejon, kie sur la ŝezlono proponis sin freŝe blanke la alŝorĉita lito. Iom fore sur kuireja seĝo — lavujo, viŝtuko por la matena refreŝiĝo.

— Bonan nokton, belajn sonĝojn! Morgaŭ ni havu la honoron ĉe la matenmanĝo.

— Dankon.

Košelev revenis al sia fratino. Ili paroladis pri ĉio, nur pri la gasto ne. Ili ambaŭ evitis tiun temon. Ĉe la enlitiĝo tamen Košelev ne povis reteni sin plu. La scivolemo incitis lin.

— Diru, Tamara, de kie vi prenis viajn precizajn informojn pri tiu ĉi homo?

— Kiujn precizajn informojn?

— Por ekzemplo, pri kio vi sciis, ke li fumadas. Liaj fingroj ne estas ja nikotinflavaj.

— Sidante apud li en la fiakro la vento alportis parfum- kaj tabakodoron el lia vesto. Pro la unua mi pensis, ke li ŝatas la virinan societon kaj kiam mi vidis lin staranta ĉe la tablo ĝis mi altabligis lin, mi estis certa, ke la supozo estas fakto. Memkompreneble, la urbaj knabinoj kutimigis lin al ĝentileco.

— Nu, tiel ridinde? Sed pri kio vi konkludis, ke li havas ĉagrenon? Li diris ja ne eĉ unu vorton pri tio.

— Ho, tre simple! Homo, forlasinta la rapidvagonaron, kiun nur la malfruĝo de nia vagonaro devigis halti ĉe nia stacidomo, estas distriĝema, aŭ rifuĝanta. Se pro farita krimo li rifuĝas, tiam li ne haltas kaj staras tiel hezite senkonsile ĉe la vojrande, ke mi kortuŝiĝu. La embarasitan ekvilibron de lia animo mi rimarkis tuj, kiam post la enpaŝo li preskaŭ sinforgese rigardis la krucifikson kaj ne

rimarkis mian seĝoproponon kaj fine li altabligis havanta sur si la palton.

— Eble vi estas prava... Cetere, ĉu vi scias, kion li respondis je la demando : kiom longe vi deziras resti en Bikitato ?

— Jes, mi scias.

— Hahaha ! Kiel vi scius, mi ja ne tradukis ĝin ? !

— Guste pro tio mi scias. La respondon mi legis el lia mieno. Li diris : »ĝis mi resaniĝos«.

— Nu, ne precize tiel, sed oni povas ja klarigi eĉ tiamaniere... Li ŝajnas esti iom melankolia.

— Jes.

La gefratoj longe silentis. Tamara kontrolis siajn sentojn, ion decidis, leviĝis kaj iris al la libroŝranko, serĉadis en ĝi, elektis libreton kaj metis ĝin sur la tablon antaŭ la frato.

— Kion vi volas ?

— Mi diris ja al vi, ke mi instruos lin paroli, kiam mi sentos la mankon de la lingvoscio... Portu ĝin al li !

Koŝelev ekridetis. Jen tamen lia fratino efektive estas naiva, en songomondo vivanta. Tiu ĉi libreto pravas tion elokvente. Tamara rimarkis la rideton.

— Ne primoku min ! Indulgu tiun sentemecon, ke mi kredas, ke mi povas kredi la revojn.

— Mi ne mokas vin, Tamara. Neniam mi mokas la revantojn, al kiuj apartenis ankaŭ nia patro. Nur liaj revoj ne estis la samaj kiel estas la viaj. Mi ridetis pri tio, ke vi juĝas tiun ĉi Hinzen kapabla lerni artefaritan lingvon pro via deziro... Ne, neniam !

— Ne pro mia deziro, sed por sia propra intereso li lernos, ĉar li bezonas mian helpon.

Koŝelev longe esplorante rigardis al la okuloj de sia fratino, sed ŝi senpalpebrume toleris la penetran rigardon.

— Ĉu ne estus pli bone, se vi lernus la germanan lingvon ?

— Se iam mi sentos ĝian mankon, mi lernos ĝin... Nun, mi petas vin, portu la gramatikon al li!

Košelev eklevis la ŝultrojn, prenis la libron, transiris al la gasto kaj baldaŭ revenis. Tamara senpacience atendis lin. Ŝi volis legi la respondon el la mieno de sia frato, sed ĝi esprimis nenion.

— Li jam enlitiĝis. Mi metis la libreton sur lian valizon kaj surskribis, ke vi sendis ĝin.

Tamara aprobe kapklinis. Ĝis enlitiĝo ili paroladis denove pri ĉio, nur pri la fremdulo ne. Tiam Košelev ekparolis kun ioma dolora vibro en la voĉo.

— Tamara, mi sentas, ke vi ekamos tiun ĉi homon.

— Vi eraras, Juro, mi ne ekamos, sed mi jam *amas* lin.

— Ĉu vi amas lin?! — Tiu ĉi sincera konfeso preskaŭ konsternis lin por momenteto, poste li donis esprimon al sia miro. — Mi ne komprenas. Vi ja ankoraŭ ne povas koni lin... Sed kial do?

— Ĉar li bezonas mian helpon, Juro, — ŝi respondis duonvoĉe, serioztone.

VII.

Grauer malfermis la fenestron de la laborejo. La matena nebulo de la aŭtuno kuŝis en la valo. Supre, ĉe la montdeklivo, sunbrilo kaŝludis inter la arboj. La muteco de la arbaro, la ozona aero, la karesa varmo de la suno kvietige efikis al li.

Grauer ne vidis la nebulkovritan urbeton, kvazaŭ li starus sur insulo elpintiĝinta el la maro. Li lasis ĉion post tiu granda akvo, tie malproksime. Li sentis, ke novan vivon li povus komenci ĉi tie. Nenio kaj neniu troviĝas ĉirkaŭ li, kio rememorigus lin pri la pasinteco. Ĉu vere ne? Kaj la rememoroj? La rememoroj kiel la ombro akompanas nin ĝis tombo. Verdire iom post iom ili maljuniĝas, malheliĝas kaj perdas el siaj fortoj. Jes, la inertigon de la rememoroj li devas atendi kaj ĉi tie en la silento, en la nekonekteco tion fari estas eble. Kaj se longe li devas atendi? Nun ne pripensinde! Ĉu la ŝippereinto, kiun la tajda alfluo ĵetis sur la bordon el la certa ondotombo, pensas pri la morgaŭo? En la unua momento li ĝuas nur la ĝojon pro saviĝo, ne cerbumadas pri la plua batalo por la vivtenado. Ankaŭ li estas ja tia ŝippereinto. Hodiaŭ li ĝojas pro la vivo kaj ne pensas pri la morgaŭo... Tiu ĉi monto similas al insulo de ŝippereintoj. Ankaŭ aliaj borden-ĵetitoj vivas ĉi tie, Eĉ se ili ne estas feliĉaj, tamen la silento donas trankvilon al ili. Reveni sur la abisman uraganan maron de la Vivo ili ne sopiras. La kalfatrira hejmo, kiel

certa rodo, gardas ilin kaj la fortika digo de amo kaj reciproka helpado reĵetas la furiozantajn ondojn, rompas ties detruforton.

Grauer sopiris tian hejmon, tian sekuran digon kaj rodon. Profunda ĝemo lasis for lian bruston. En tiu ĉi ĝemo plende ploris lia orfeco, lia senkunuleco. Eh, egale! Necese komenci! Se la soleco jam tro torturos lin, li serĉos hejman varmon ĉe la fajrujo de la najbaroj. Li ne ŝtelos la varmon, sed pagos por ĝi. Monon li havas ja! Monon jes, sed ĉu la varmo de la koro estas aĉetebla per mono? Pri tio li ne pensis. Ankaŭ la vulturhomo pagis por ĉio per mono kaj ankaŭ li mem de sia infanaĝo kutimis rekompenci per kontanto ĉiun servon, faritan al li. Ne mirinde, ke li forgesis la homan koron. Dum lia ĝisnuna vivo eĉ la koroj malfermiĝis nur por lia monujo. Ankorau infano li estis, kiam li ricevis la instruon, ke la songoj mensogas... Jes, liaj songoj ĉiam mensogis kaj tio fortimigis lin de nova revteksado.

Grauer foriris de la fenestro, komencis vesti sin, volis malfermi sian valizon. Verda libreto kaj kelkvorta paperslipo kuŝis sur ĝi. Li legis. *«Tamara sendis. Distru vin per ĝi! Koŝelev.»*

Li rigardis la libreton. Gramatiko de iu nekonata lingvo por germanoj. Surprizite li rememoris, ke iam li aŭdis pri tiu ĉi lingvo. Oni mokis priridis pro tio unu el liaj kolegoj. Ankaŭ li ofte bone ridis pri la obstina revemulo. Li rigardis la libreton, foliumadis kaj ne ridetis. Neniam sentita varmo karesis lian koron. *«Tamara sendis. Distru vin per ĝi!«* Iu pensis pri li, iu etendis sian manon al li por forgesigi la orfecon. Iu, kvazaŭ dirante: prenu ĝin, ne pensu pri la pasinteco kaj okupu vin per tio, kio povos iam alveni!... Tamara sendis. Stranga donaco, postulanta kredon, laboron. Por momento li vidis antaŭ si la ofte primokitan kolegon, vidis la blankharulon parolanta entuziasme kun juneca vervo pri pli bela estonteco. Ho, kiel li argumentadis, kiel obstinadis kun neromp-

ebla fido ! Jes, Tamara postulas fidon de li kaj volas vidi lin revteksanta. Ŝi vokas lin al la armeo de la revemuloj por forgesigi la estantecon. Sed ŝi ne povas ja koni tiun estantecon ? Li diris nenion pri si, nur mensogis kaj silentis...

— Jes, jes, ĵus mi rememoras, ŝia frato menciis, ke ŝi volas instrui min paroli ! Naiva knabino !

Ridetante li flankenmetis la libron. Dum la razado li rimarkis pri si, ke li denove pensas pri la knabino kaj la plaĉi-volo incitas lin. Pro tio li beligas sin. Dum la alkroĉado de la kolumo li aprobis sian decidon, ke pro ĝentileco li salutos ŝin en la nova lingvo. La kravatton senbantita li lasis kaj serĉis esprimojn en la libreto. Eh, estas ankoraŭ tempo ! Denove li flankenpuŝis la libreton, rapidis fini la sinvestadon, sed ĉe la ŝulaĉumado lia rigardo serĉis denove la libron. Ne domagis serioze provi, li pensis, eble mi sukcesos kompili kelkajn frazojn por danki ŝian komplezon. Tio estas ja gasta devo.

Li prenis al si la libron. Ankoraŭ estas ja sufiĉe frue kaj antaŭ ol viziti la gemastrojn li faros longan promenon en la arbaro. Verŝajne li sukcesos kompili almenaŭ unu sanan frazon. Foririnte el la laborejo li proksimiĝis al la surstrata pordo, kiam afabla virina voĉo salutis lin el la najbara korto.

— *Lob hette, hesi !* (Bonan matenon, sinjoro !)

Grauer ĉapellevante salutis al la direkto de la voĉo kaj lia rigardo apenaŭ povis trovi la nekonatinon inter la densaj arbustoj. Sana vilaĝanina vizaĝo ridetis al li. Certe, la najbarino, ĉe kiu li luos ĉambreton. Ŝi ŝajnis kvardekjara, purema kaj ŝia interesiĝo tuj ekigis. Por Grauer estis iom embarase klarigi, ke ĉe unu vorton li ne komprenas. La scivolema najbarino larĝe ekridis.

Grauer ekiris kaj promenis kun libro en la mano, foliumadis kaj lia miro kreskis. La nova lingvo ŝajnis infanludo por li. La plimulton de la vortoj li ja

konas kaj li primiris ĉefe la surprizan simplecon. La kelkpaĝa propaganda artikoleto ĉe la librofino vekis en li nekonatan senton, en kiu troviĝis io pardonpeta al la blankhara kolego. Poste li denove pensis pri Tamara kaj incitiĝis, ekkoleris pro la penso, ke ankaŭ ŝi estas primokata de la skeptikuloj... Skeptikuloj?! Ĉu ankaŭ li mem ne apartenas ja al ili?

En pensoj profundigante li faris la vojon ĝis la domo de Koŝelev. Dumvoje li renkontis kelkajn preterrapidantojn, kiuj kun respekto al la fremdulo salutis lin. Kvazaŭ maŝine li ripetis: »*Lob hette, hesi!*«

Ĉe la pordo de la najbarino li renkontis la knabinon. Tamara kun matena freŝeco ridetis. Ŝia pura bel-eco vekis en Grauer admiron kaj ne ekdeziron. La senmakuleco, radiantanta el ŝia tuta estaĵo, embarasetis lin kaj li forgesis la du parkere lernitajn frazojn kaj germanlingve salutis ŝin. Tamara kun natura afableco etendis sian manon al li.

Ili kune iris en la domon kaj Grauer ĉagreniĝis pro sia mallerteco. Jen, li preterlasis la plej bonan okazon. Nun neeble ridindigi sin per provokado de refoja manpreno por la du frazoj?! En la ĉambro Koŝelev jam atendis ilin ĉe la tablo. Post la reciprokaj »Bonan matenon« kaj »Kion belan vi songis?« Tamara informis lin pri la rezulto de sia vizito ĉe la najbarino. La postulata luprezo ŝajnis ridinde malalta por Grauer, sed se ŝi estus postulinta la dekoblon, eĉ tiam li restus, ĉar li decidis jam hodiaŭ sciigi sian firmon pri sia daŭra foresto.

Ĉe la tablo Grauer dankis la libron kaj promesis diligente foliumadi ĝin. Koŝelev interpretis kaj en la okuloj de la knabino brilis kontenteco. Tiu ĉi brilo kaŭzis ĝojon al Grauer kaj li estus volonte rigardinta ĝin ĝis vespero.

— Kiel mi diris al vi, mia fratinetto estas kelkfoje nekompreneble stranga. Tamen vi faros al ŝi veran plezuron, se efektive vi foliumados tiun libreton. Faru tion, mi petas, almenaŭ por la ŝajno! — diris

Košelev, kiam Tamara estis foririnta kun la samovaro.

— Sed kial nur por la ŝajno? Tute serioze mi volas okupiĝi pri tio.

— Sincere konfesante, ankaŭ mi opinias bela kaj valora kulturcelo la aferon de la neŭtrala artefarita lingvo, sed... sed mi ne povas kredi la efektivigon de tiuj esperoj, kiujn havas ĝiaj adeptoj. Krome mi timas ĝin pro mia fratino... Jes, pro ŝi. Ĉiun liberan minuton ŝi dediĉas al tiu ĉi ideo. Nu, ne tiel ridinde naive kiel nia maljuna instruisto, sed tamen... Tamara estas jam junulino, ŝi devus pensadi pri sia estonteco. En la dudekunua jaro jam estas tempo pensadi ankaŭ pri la edziniĝo, sed ŝi tute ne volas aŭdi pri tio. Mi faras riproĉojn al mi, ĉar certe ŝi oferas sian junecon al mi. Ŝia sola amuzado estas la korespondado. Sed kia korespondado? Nur en la sonĝomondo vivantoj povas mensogi la homon tiel bela. Mi timas, ke foje Tamara vekigis kaj la realeco glaciigos ŝian koron... Jes, jes, la sonĝoj ofte mensogas.

Grauer atente rigardis la mienon de la parolanto. La rememoroj de la pasinteco nebuligis ĝin. En liaj vortoj kaj tono kaŝiĝis pli ol nekredemo. La neglektado de la Homo mem. Li montriĝis ja ĝis nun tute bonkora, belkarakterata viro. La lasta frazo tamen rekte tranĉis la koron de Grauer. Ĝi memorigis lin pri tiu, kiu la unuan fojon diris tion al li. Per tio la unuan fojon la vulturhomo ekvundis kruele la animon de la dekjara knabo.

— Ĉu vi estas mizantropo?

— Ne! Nur mi ne kredas la evoluon de la Homo... Sed, mi petas vin, ni ne parolu pri tio ĉi antaŭ mia fratino. Ŝi fanatike amas la Homon kaj ŝia kredo pri la progreso ne toleras diskuton. Tro sentema ŝi estas... Progreso? Oni povas kredi ĝin ĝis ĉirkaŭrigardo. Ni stagnas tie, kie antaŭ mil jaroj. La klasoj de la homa socio ŝanĝis nur nomojn, sed ne malaperis kaj alternas sole la devizoj, instigantaj je reciproka atakado.

— Vi estas ja artisto, vi nepre devas havi kredon pri la Belo — Grauer duonvoĉe rimarkis kaj sentis, ke la mano de mortinto peziĝas sur lian koron. La mano de tiu mortinto, kies tuta vivo pasis en malica mokema langomontro.

— Hodiaŭ la evoluo de la tekniko mortigas la kulturon, kreas la tipon de la maŝinhomo. La maŝinhomo ne povas ja kredi, sed movas sin, knaras laŭ la oleumado. Ho, tre bedaŭrinde, ke en la vivoleon miksiĝis la sablo de la civilizacio. La aksoj tro rapide ardas, fajrerigiĝas, forbrulas kaj el la maŝinhomo fariĝas foruzita, plene ekspluatita fersplito... Arto? Ĉu hodiaŭ la artisto scipovas krei? Sensacion vekanta foira varo estas bezonata hodiaŭ kaj ne tio, kio ĝermis, elkreskis el la animo. La unua estas pli plaĉa, ĉar ĝi ne postulas profundigon, specialan komprenon. La arto de la hodiaŭo ne havas animon, ĉar ĝiaj kulturantoj nur elcerbumas, sed ne sentas.

Grauer rigide rigardis al la kontraŭa muro, konscion lulante kalkuladis la figurojn de la tapeto. Per tiu kalkulado li defendis la animon kontraŭ la vipantaj pensoj. Koŝelev profunde ekĝemis.

— Hieraŭ vi primiris mian skulptaĵon, ĉar vi rigardis ĝin per animaj okuloj. Se vi estus rigardinta ĝin tra la binokloj de la socio, vi juĝus ĝin konsterna. Foje la paroĥestro kun sia kapelano vizitis min. La kapelano emociiĝis ĝis larmoj, la paroĥestro indigniĝis pro la *kvar* vundoj, kiuj povos ŝajni herezo en la okuloj de la piulo. Riĉa judo vidis en ĝi danĝeran ilon por la antisemitismo kaj nur tre malmultaj vidas en ĝi *la vivantan suferadon por la ideo*, la sanglarman protestadon de la dia filo kontraŭ la homa krueleco... Eh, ni ne parolu pri tio! La maŝinhomo timas la arton, kiu aŭdace esprimas ideon. Antaŭ jaroj mi partoprenis en eksterlanda konkurso por statuo. Mi devis krei la figuron de Ludoviko Kosuth, la plej giganta liberebatalanto de la hungaroj. Nu, mi finstudis lian biografion. La statuo figuris lin

staranta kun celkonscie levita kapo kaj elŝiranta la paĝojn de la servuteco el la konstitucia leĝaro. Sub lia dekstra piedo baraktis la dukapa imperiestra aglo. La piedestalon de la statuo formis la entuziasma amaso mem : karakterizaj figuroj, tenantaj alten sur plataĵo la ĉefan figuron. La modelon mi montros en mia labor-ejo. Nu, kiel vi opinias, kion oni trovis elĵetinda ? La ideon mem, karakterize esprimantan. La oficiala verdikto, malgraŭ la ĝenerala plaĉo, flankenpuŝis mian verkon, ĉar la detronizita aglo ofendis la lojalecon de certa medio... Eh, ni parolu pri io alia ! Eble la arto vin ne interesas tiel intense.

La lasta rimarko iom trafis lin. Sincere konfesante, Grauer estis la filo de la Hodiaŭo kaj li taksis pli alte la pied- kaj manĵetadon de la belaj dancistinoj ol la parolantan senmovecon, tamen nun li klopodis, jam pro ĝentileco, maski sian moderan interesiĝon.

— Ĉu vi laboras nun pri io nova ?

— Jes, sed tio ne tre incitas min... Simpla mendo. Ŝablonaĵo... Sed de du tagoj estas io, instiganta, eĉ inspiranta mian fantazion. Monumento. La ideo ne estas mia, eĉ ne estas artista, sed la prilaboro kunligi la trivialecon kun la majesteco kaj doni formon al ĝi jam apartenas al la artista talento. Kiel mi solvos la temon, mi ne scias, sed... sed mi sentas, ke ĝi iam maturiĝos en mi kaj mi kreos ion grandiozan.

— Pri kio temas ?

— Pri monumentigo de bizara penso. Verŝajne ankaŭ vi legis, aŭ almenaŭ aŭdis pri tio, ke iu bagona dresartisto, akirinta milionojn en Ameriko, sian tutan havaĵon testamentis al la ĉefurbo de Bagonio. Ĉu vi aŭdis pri tio ?

Grauer sentis la koron batadi en la gorĝo. Li paliĝis kaj bezonis sian tutan energion por ne perfidi sin.

— Jes, mi aŭdis... tiel mi pensas....

— Kio estas via opinio pri la maljuna Vilhelmo Grauer, mi ne scias, sed mi vidas en lia donaca gesto pli ol ekstravagancaĵon...

— Kion vi vidas en ĝi? ... Kion vi povas vidi? Li estis frenezulo.

— La ĵurnaloj tre detale pritraktis tiun malmulton, kiun oni konis pri lia vivo. Mi ne kuraĝus aserti lian frenezecon. Mi opinias lin erarvaganta idealisto. Sed mi povas ankaŭ erari. Cetere lia impresario mem ne multon sciis pri li, lia filo rifuzis doni informojn. Memkompreneble, li estas senheredigita.

— Eh, li ne havis ja filon.

— Kiel vi povas aserti tion? La ĵurnaloj tute detale raportis pri la bedaŭrinda lukto inter la juna Grauer kaj la ĉimpanzo de la mortinto...

— Cezaro Grauer neniam estis filo de Vilhelmo Grauer!

La subita ekscitiĝo surprizis la artiston. Li longe rigardis al la vizaĝo de la gasto. Grauer sentis, ke preskaŭ li perfidis sin per tiu ĉi firma deklaro. Li jam pensis pri plua rifuĝo, ĉar neeble resti ĉi tie. Eble Koŝelev divenos, ke li estas Cezaro Grauer kaj tiam sekvos torento de demandoj. Se li ne estas lia filo, kiu do? Kion li scias pri la mortinto? Kies filo li mem estas? Kiuĵ estis liaj gepatroj? Senfina kaskado de demandoj... Nun necese trovi akcepteblan klarigon! Denove li devos mensogi.

— Kiel vi povas tiel firme aserti, sinjoro Hinzen, ke Cezaro Grauer ne estas la filo de la mortinta milionulo? Ĉu vi konis iun el ili? ... Verŝajne, ĉar vi venis ja por negocaj aferoj en Bagonion kaj eble por io certa, koncerne tiun ĉi aferon, ĉu ne? ... Pardonu, mi ne havas rajton demandi tiajn... eĉ mi ne volis.

— Rajton certe vi havas. Mi estas ja gasto en via domo, sed... sed... kio koncernas mian aserton, ĝi baziĝas sur konkludo. Mi tiel aŭdis, ke la urbestro de Strutmagen faris viziton ĉe li por persvadi lin

procesi kontraŭ la testamento, sed Cezaro Grauer tute definitive rifuzis la proponon. Jen!

— Mi ne povas konkludi same. Verŝajne, li estimas la lastan deziron de sia patro. Sed supozeble, ke li ricevis sian parton el la riĉaĵo jam antaŭe. Pri unu mi estas certa, ke la maljuna Grauer estis mizantropo. Ĉiu vorto de lia impresario pravas tion. Sed plej elokvente pravas tiuj kondiĉoj, kiujn li diktas al la Urba Konsilantaro... Jen, vidu, tio ĉi incitas min, la monumento, kies surskribo estas kruele ironia, ofendanta, eĉ insultanta la homan dignon kaj tamen mi tiel sentas, ke ĝi naskiĝis el dolora, tre dolora mondpercepto: »Egaleco en la frateco«. Ĉu vi aŭdis jam similan?

— Frenezajo! — La rimarko de Grauer fontis el sincera konvinkiĝo. — Frenezulo kaj krimulo li estis.... Tute certe, krima maliculo, kiu trovis ĝuon en torturado kaj konsternado de aliaj... Aĉa hombesto li estis!

Koŝelev longe enpensiĝis. La nemotivebla ekscitiĝo, en kiu oni povas trovi la voĉon de malamo, surprizis lin kaj li havis la senton, ke lia gasto certe scias pli multe pri la afero ol kiom li perfidi volas. Verŝajne, li ne deziras komuniki tion al fremduloj kaj tial ne decus daŭrigi la parolon pri tiu temo.

La penetran rigardon Grauer sentis sur si. Li sciis, ke momente superregis lin la emociiĝo kaj la malamo. Li time atendis la vortojn de Koŝelev, atendis, longe atendis, sed vane.... Incitis lin la muteco, kiu kaŝis necertecon. Eble, Koŝelev jam divenis, ke li ne estas Francisko Hinzen, sed Cezaro Grauer. Ne, neeble! Ĵurnalo ankoraŭ ne alvenis.

Koŝelev detabliĝis, iris al la fenestro.

— Belan, sunradian tagon ni havos hodiaŭ.... En tia vetero mi laboras prefere.

— Jes,... ankaŭ mi pensas, ke estos sunbrila tago... jes.

Denove silento. Ĝena kaj incita. Grauer subite

decidis. Li konfesos ĉion. Al tiu ĉi homo li povas fari konfeson. Ankaŭ li estas ja ŝipperinto, multe suferis, havos komprenon por li. Kial mensogi al la bonuloj? Kaj kio povas okazi? Se li ne trovos komprenon, rifuĝos for de tie ĉi, for al la homoj por enterigi sin en la luktobruon de la ĉiutagoj. Jes, li rakontos ĉion. Nu, ne ĉion, nur kiom li konsideras necesa, kiom la momento eltrudos el li.

— Sinjoro Koŝelev...

Koŝelev turnis sin je la petvibra voĉo, kompato kaptis lian koron. Kial? Li ne sciis.

— Ĉu vi deziras ion?

— Sinjoro Koŝelev, via boneco kortuŝis min. Pri la horoj, pasigitaj ĉe vi, mi rememoros ĉiam agrable.

— Vere mi ĝojas, ke . . .

— Mi petas, ne interrompu! Mi devas konfesi ion. Tre malfacile mi povas trabarakti la komencon. Eksidu, eksidu do apud mi! . . . Tiel! . . . Hieraŭ, kiam vi parolis pri via vivo, mi emociiĝis. Verŝajne, se antaŭ semajno mi estus aŭdinta la historion pri via suferado, ĝi ne estus farinta tiel profundan impreson. Jen, vidu, mi estas sincera! Kiel mi menciis, mi ne estus sentinta tiel emociite, kiel hieraŭ. De tiam mi ofte pensadis pri tio.

Koŝelev prenis kaj premis la manon de la gasto. Tiu ĉi manpremo konjektigis la amikan kunsenton.

— Ni ne parolu pri tio! Bedaŭrinde, ke mi tiel malgajigis vin. Mia sorto estas ja identa kun tiu de multaj centmiloj. La krucon de emigrado ne sole mi portas.

— Mia sorto apartenas nur al mi. . . En la tuta mondo ne estas identa al tio.

— Mi pensis, ke ankaŭ vi estas rifuĝinto. . . Jes, antaŭ momento mi pensis.

— Jes kaj ne! Antaŭ semajno mi sciis min tute alia ol efektive mi estas. Nun mi rifuĝas. De kio? De la vero, subpremanta min, de la vero, dirita al mi. Sciu do, sinjoro, ke mi transpaŝis vian sojlon

kun mensogo. Mi ne estas Francisko Hinzen, mi venis ne por negocaj aferoj en tiun ĉi landon, mi. . .

— Sed kiu vi estas do ?

— Mi estas Cezaro Grauer, laŭnoma filo de Vilhelmo Grauer. — Li prenis dokumentojn el sia poŝo. — Jen, rigardu !

Koŝelev senvorte gapis al sia gasto. La vero surprizis lin kaj la baraktantaj trajtoj de Grauer korfrapis lin. Li serĉis vortojn por konsoli. Sed kial ? Li ne konas ja la fonton de suferoj de la fremdulo. En tio, ke iu havas la bonŝancon esti filo de milionulo, ne estas io priplorinda, kompatinda. Vere, li diris »*laŭnoma*«. Do li ne estas lia filo, nur adoptita. Tiam li estas sendanka, ĉar ploras pro la mono, pro la heredaĵo, kiun li estas perdinta. Sed ne pro la heredaĵo, ĉar antaŭe li menciis, ke li rifuzis la proponon de la urbestro. Koŝelev sentis sin staranta antaŭ enigmo, kiu iom post iom eble malkaŝiĝos. Nun li serĉis vorton, en kiu evidentiĝu simpatio. Li ne trovis.

— Kion vi deziras ?

— Forgesi min mem... Ne pensu malbonon pri mi ! Honestulo mi estis dum mia tuta vivo kaj ne de la leĝo mi rifuĝas, sed de ia terura scio. . . Ankaŭ mian animon oni krucumis, kaj tie ĝi sangas, helpkrias malespere al la ĉiela potenco : »Patro, Patro, kial vi forlasis min ?« ... Pardonu mian konfuzan parolon, sed ĉion mi ne povas rakonti al vi... La vundo estas ankoraŭ tro freŝa, sanganta. Mi havas solan peton. Ni ne parolu plu pri tiu homo, kiu krucumis mian animon ! Ni ne parolu plu pri Vilhelmo Grauer !... Ne miskomprenu min ! Ne la senheredigo doloras. La mono ne interesas min.

— Mi ne scivolas pri la kaŭzo. Eble iam, poste vi mem rakontos ĉion, sen demando. Kiam via animo jam trovis ripozon. Vi por mi, por *ni* ambaŭ restos Francisko Hinzen... Ĉu bone ?

La voĉo de Koŝelev fine trovis la ĝustan vojon,

antaŭe vane serĉitan. Grauer dankplene premadis lian manon kaj en liaj okuloj ekbrilis larmoj.

— Dankon... Dankon. Mi ne povas rememori, ke iam mi estus konduktinta sendanke al tiuj, kiuj faris servon al mi. Mi klopodos meriti vian bonvolon. La pureco, trankvilo de tiu ĉi domo kaj mia simpatio al ĝiaj loĝantoj helpos min trovi rimedon por resaniĝo.

— Ne por la danko mi faras tion, sed iom por mi... kaj... precipe por mia fratino. Sia sentema animo eksentis vian doloron.

— Ĉu eble, ke fraŭlino Tamara...

— Mi diris ja, ke ŝi estas iom nekompreneble stranga kreitaĵo... De hieraŭ mia admiro pliiĝis al ŝi. Mi ne konas la efektivan motivon de via doloro, sed tion mi scias, ke ĉi tie la silento de la arbaro kaj fratina simpatio de Tamara resanigos vian animon. Ankaŭ mian animon ŝi kuracadas. Vere, mi ne scias, kio estus okazinta al mi post la morto de mia edzino, se ŝi ne estas apud mi... Akceptu ŝian helpon! Ne miskomprenu, mi proponas al vi ne mian fratinton, nur ŝian helpon! Mi... mi... Pardonu, ke mi faras rimarkon pri tiu homo, kiun menciis ne estas konsilinde, legante la tekston de la testamento en la ĵurnaloj mi sentis ian parencecon al Vilhelmo Grauer, ian certan parencecon. La simbola manprenado de la homo kaj besto, krome la surskribo de la starigota monumento kondukis min al konkludo, ke li estis plie erarvaganta idealisto ol — mi uzas viajn vortojn — aĉa hombesto.

Grauer rememoris pri liaj vortoj, koncerne la arton. Jes, kvazaŭ tiujn vortojn la vulturhomo estus doninta en la buŝon de Koŝelev.

— Jes, vere... Sed, tamen ne! Granda diferenco! Vi estas bonulo, havas sentimentojn, konas la kompaton, koran komprenon, amon, nur kredi vi ne povas. Tiel vi esprimis vin, ĉu ne?

— Jes, mi ne povas kredi la evoluon de la Homo.

— Jes. — Grauer duonvoĉe diris la jeson. Ankaŭ la vulturhomo ne povis kredi la animan evoluon, kvankam li starigis la trian gradon, la trian periodon en sia teorio. Eble, Koŝelev estas prava. Vilhelmo Grauer estis erarvaganta idealisto. Ne, ne estas eble nomi *konscian krimulon* erarvaganta. Vilhelmo Grauer estis nur rafinita krimulo.

Tamara venis en la ĉambbron. Ŝi ŝajnis embarasita, kiam rigardis al la gasto kaj senvorte iris al ŝranko por preni al si florbazon. Antaŭ la foriro ŝi turnis sin al sia frato.

— Juro, diru al sinjoro Hinzen, ke la ĉambro-luon mi estas jam aranĝinta. Panjo Lida eĉ plene purigis ĝin kaj posttagmeze li povos okupi sian hejmon. . . Jes, preskaŭ mi forgesis. Invitu lin al tagmanĝo ! Ne estus bone lacigi lin ĝis la gastejo. De morgaŭ tiu problemo estos aranĝita. Li manĝos ĉe panjo Lida.

Koŝelev volis interpreti, sed Grauer leviĝis, aliris kaj perrigarde petis la tradukan helpon.

— Fraŭlino Tamara, mi ne komprenis la ĵus diritajn vortojn, sed mi scias, ke ili koncernis min. Mi dankas vian koran helpon kaj mi dankas ankaŭ tiun libreton. Tre volonte mi okupiĝos pri ĝi. Mi pensas, ke baldaŭ sen interpretanto ni povos konversacii. Mi parolas ja tri lingvojn.

Tamara aŭskultis la tradukon, ruĝiĝis, poste tre atente rigardis al la okuloj de Grauer. Momente dolora surprizo videbliĝis en ŝia mieno kaj ŝi riproĉe rigardis al sia frato.

— Nu, kion vi respondas ? Kion mi interpretu ? — demandis Koŝelev.

— Kion vi diru ? — Tamara altrudis rideton al la lipoj. — Diru al li, ke la lernado konsole distras nur tiun, kiu ne sole la tempon volas peli per ĝi. Poste montru al li mian bibliotekon ! Li estas ja inteligenta homo, kaj povos prijuĝi laŭ la libroj la posed-

anton. Diru al li, ke el tiuj verkoj parolas la animo de intelektuloj, kiuj kredas la savan forton de kompreno kaj amo. Jes, diru tion al li kaj *ne turmentu* ĉi tiun malfeliĉan viron!... Jes, jes... Ne pridemandu lin pri liaj sekretoj! Estu konvinkita, ke vi staras kontraŭ ne krimulo, sed viktimo.

— De kie vi prenas tian supozon, ke mi... Sed tiaĵon diri, ke mi turmentas lin! ? — indigniĝis iom mire Koŝelev.

Tamara tre milde metis la manon sur la manon de sia frato.

— Vi ne volis, Juro, mi scias, ke tute kontraŭvole, sed... sed... tamen vi kaŭzis malagrablajn momentojn por sinjoro Hinzen. Nu rigardu, la postsignoj de larmoj ankoraŭ estas en la okuloj kaj... Jes, kelkfoje vi havas ja tre pesimistan humoron.

Koŝelev enpenŝiĝante rigardis antaŭ sin. Tamara ridetis konsole al Grauer, kiu senpacience, konjektante malagrablaron atendis ŝian respondon. La rideto trankviligis lin.

Tamara forlasis la ĉambron. Koŝelev rememoris pri la komisio, paŝis al la libroŝranko malfermis ĝin.

— Tamara petis min montri al vi siajn librojn. Jen la skribaĵoj de ŝiaj kunuloj en la revado. Ĉiun ŝparitan moneron ŝi elspezas por tiuj ĉi libroj. La tagiĝon de nova kulturo, de pli bela estonteco antaŭdiras tiuj verkoj, ŝi diras. Verdire, mi envias ŝin, ke ŝi kapablas kredi pri la alvenonta *homa Homo*.

— Kion ŝi kredas? ! — La demando preskaŭ krie sonis. Ankaŭ la vulturhomo nomis tiel la Homon de la estonteco, sed kredi *lian* alvenon li ne povis. Laŭ tria evolua periodo. Laŭvorte tiel! Kun superŝiĉa timo li ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ terurus lin fantomo. Nevidebla mano premis lian voĉon raŭka, kiam li pene demandis. — Kaj vi... ankaŭ vi *ne* kredas tion?

— Mi ne povas, kvankam mi dezirus, ĉar tiu ĉi nekredemo muelas mian energion, primokas la artiston.

en mi, premas min en la marĉon de la ĉiutagoj kaj mi fariĝos bestohomo, jes, bestohomo.

La lasta vorto kvazaŭ senigis la junan Grauer de lia konscio. Longan momenton li gapis mute kun deformiĝinta mieno al Koŝelev kaj la paroksismo skuis lian tutan korpon. Vane li penadis subpremi la terurigon, ĝi tremvibris en lia rigardo. Subite li plenforte kaptis la ŝultrojn de Koŝelev.

— Homo, homo — kaj lia voĉo plende ekploris, singultadis — kiu... kiu donis al vi tiun vorton? Bestohomo... bestohomo!... Ho, se vi scius, se vi nur konjektus... Ne, ne... mi ne povas plu...!

Kun singulta plorego li falis sur la seĝon. Koŝelev tute timigita embarase staris antaŭ li. Sinakuzon li sentis, kvankam sciis, ke nur nevola revokanto de turmentaj momentoj li estas. Kun sincera kompatato li serĉis vortojn. Ĉu helpas vortoj nun? Unu amika konsola gesto valoras pli ol vortoj. Li paŝis al li, ĉirkaŭprenis lin kun frata kompreno, homa samsortana solidareco. Iom post iom silentiĝis la interna batalo kaj Grauer longe rigardis lin.

— Ankaŭ Vilhelmo Grauer ne povis kredi la homan homon kaj tial... Li ne kapablis kredi la efektiviĝon de sia revo mem kaj tial... mi... ne, neoble, mi ne povas diri tion!... Ne, tion neoble!... Pardonu min, sed mi ne povas...

— Ni ne plu parolu pri tio!... Venu, ni faru promeneton en la arbaro, aŭ ni rigardu vian ĉambron. Vi eĉ ne vidis ĝin... kaj ne pensu pri tio, kion forgesi estus plej prudente!... Nu, venu! Post horo per la radio-aparato ni aŭskultos koncerton el Berlin, ĉu bone?

Grauer konsente kapbalancis, sed pensadis pri la forvojaĝo. Kion li serĉas ja ĉi tie? Ne tion li sopiris. Li volis kaŝi sin en la fremdeco kaj jen ĉe la unua paŝo li estis devigata flankenmeti sian inkogniton. For, for de tie ĉi!

Ili faris longan promenon en la arbaro, poste

vizitis la najbaran domon. En la ĉambro, blanke kalkumita, kun florornama fenestro ili trovis Tamara. Ŝi ordigis, beligis la novan hejmon de la fremdulo. Surprizite ŝi ridetis iom ruĝigante.

Sur la tablo pompadis granda bukedo da krizantemoj en la florvazo. Ĉirkaŭ ĝi kelkaj germanaj libroj. La murojn ornamis malnovmodaj reproduktajoj de ĉasbildoj kaj portreto de la reĝo. Zorgema mano aplikis sur la kolorperdinta kanapo puntan kovrilon por kaŝi la malriĉecon. La freŝe lavitan plankon kovris hejme farita tapiŝo. Ĉe la fenestro staris profundsina fotelo. Sur la plafono pendanta petrollampo. Ĉio estis neta, freŝa kaj tamen tiel malnova, dormige antikva, ke Grauer kontraŭvole ekmiris. Neniam li vidis similan. La suno amike ridetis tra la fenestro.

Longajn minutojn ili staris senvorte. Tamara atentis pri la surpriziĝo de la gasto kaj ŝia koro premiĝis pro la penso, ke li trovos la tuton tro simpla. Koŝelev rigardis reveme la kahelan fornon en la angulo kaj memoroj karesis lian koron. Iam tre ofte li sidis tie kun sia edzino dum la malgranda Tamara lernis ĉe la tablo sub la petrollampo. De tiam Tamara plenkreskis. Eble baldaŭ ŝi sidos ĉe la forno kaj kun parolanta muteco rigardos la lumon de la arda fajraĵo. Tiel, kiel iam la foririnto... Nekonata emocio varmigis la koron de Grauer. Li sentis la odoron de ozonspira printempa mateno, kvankam ekstere la tempo jam pasis al aŭtuno. Jes, el la estaĵo de tiu ĉi knabino radias la iluzidona sorĉo.

— Vi havos trankvilan hejmon por tiuj semajnoj, kiujn vi volas pasigi en nia urbeto, — diris la knabino kaj turnis sin al la frato por interpreto.

Koŝelev tradukis. En la animo de Grauer muzikadis la voĉo de Tamara kaj ĝi forgesigis la antaŭan decidon. Jes, vere, li havos ĉi tie trankvilan hejmon. Subite li rememoris pri la du frazoj, parkere lernitaj. Nun sin proponas la okazo uzi almenaŭ unu el ili. Ridetante li etendis sian manon al ŝi.

— *Mi dankas vian bonecon*, — li diris kun gimnaziana tremo la unuan frazon en la nova lingvo.

Por momento Tamara agrable surpriziĝis, akceptis la etenditan manon kaj — laŭ sento de Grauer — ŝi metis ankaŭ sian animon en la viran manon.

— *Ho, nedankinde, vi estas ja mia samideano.*

— Kion ŝi diris? — li turnis sin al Koŝelev.

Koŝelev embarasite ridetis. Tamara tre gaje, ĉarme ridis. Ho, kiel sonore! Grauer sentis, kvazaŭ iu gutetus balzamon sur lian koron.

VIII.

Post la tagmanĝo la gefratoj restis solaj. Grauer okupis sian novan hejmon. Košelev ĵus pensadis, ĉu li malkovru la veran nomon de la fremdulo aŭ ne, kiam Tamara metis la matene alvenintajn ĵurnalojn antaŭ lin.

— Juro, mi volas peti vin, ke sinjoro Hinzen por ni kaj niaj konatuloj restos nur sinjoro Hinzen.

— Mi ne komprenas vin, — li provis ŝajnigi nescion, sed la serioza rigardo de Tamara embarasis lin. — Vere, kompreneble... Sed de kie vi scias? Cu en la ĵurnaloj oni pritraktas ion?

— Jes, sed nur por ni. Neniu scias, kie li malaperis. Matene, kiam mi legis la ĵurnalojn, tuj mi konsciis pri la vera personeco de nia gasto kaj pro tio mi bedaŭras, ke vi turmentis lin per via pesimista humoro. Mi ne scias, kio povas suferigi lin? Eble la morto de la patro; eble la senheredigo. En la unua kazo mi kompatas lin kiel funebrohavenan homfraton, en la dua... Nu, tiam eĉ pli mi kompatas lin, ĉar tre malŝeraga povas esti tiu, kies dio estas la mono.

— Mi pensas, ke nek la unua, nek la dua, sed io tria.

— Kio?

— Li ne diris ja, sed la sekreto tre torturas lin. Mi vere tre kompatas lin kaj sentas sinceran simpatian al li, tamen, mi pensas, estus plej saĝe ne serĉi lian societon ĝis lia retransviliĝo.

— Verŝajne, vi denove eraras, Juro. Tiu ĉi homo bezonas fratan amon.

— Nu bone, fratan amon, fratinan prizorgon, sed kio poste? Nu kaj se li havas jam fianĉinon?

La koro de Tamara ekstremis. Ĝis nun ŝi eĉ ne pensis pri tio. Ŝian amon vekis ne la viro, sed la suferi ŝajnanta homo. Tamen nun la penso doloris al ŝi. Ne estas permesate al ŝi enŝteli sin en la koron de viro, kiun katenas fianĉa ringo kaj se tiu ĉi viro estus tute libera, eĉ tiam ne. Riĉulo, kutiminta la komfortecon de la grandurboj, konsiderus la amon, en malriĉeco ekflorantan, nur egoista ambicio.

— Vi povas esti prava, Juro. Espereble, tio ĉi ne influos vian simpatian? !... Kaj se li havas nenium? Pli verŝajne.

— Pri kio vi pensas tion?

— Ĉar li estus ja rifuĝinta al tiu. Jes, ĉar sciu, ke tiu ĉi homo rifuĝas de tiuj, kiuj aranĝas pelĉasadon kontraŭ li. Legu nur la ĵurnalojn! Tiu vagonaro, per kiu li volis forlasi la landon, haltis pro teknikaj malhelpaĵoj. Onidire la komunistoj forigis la relojn antaŭ la stacio Rakvert. Nu, sed dumnokte tre dense trafikadis la aŭtomobiloj tien kaj la febra serĉesploro por trovi la junan Grauer konvinkas min, ke nur mallerte aranĝita komedio estis ja ĉio. Ĉion por la mono, ĉion por la heredaĵo! Hahaha! Ĉu vi scias, kiuj honoris per vizito la tute sensignifan vilaĝeton Rakvert?

— Eĉ ideon mi ne havas pri tio!

— Aŭskultu kaj konkludu! Kun sia filino la urbestro de Strutmagen, la urba notario kun sia tuta familio, kun ok filinoj. Hahaha! Kaj tute *hazarde* la aŭtomobilo de princino Olivia, vojaĝanta kun sia korteganino kaj la ceremoniestro, havis difekton ĝuste en tiu vilaĝo. La tutan policon ili mobilizis. La motivo de la febra traserĉado estas, kompreneble, eviti eventualajn diplomaciajn konfliktojn. Jen, vidu, kia cirko!

— Se oni tiel serĉas lin, li baldaŭ estos retrovita.

— Nu, jes, sed ne nun!... Nun tute ne!... Eble post du tri semajnoj, kiam li mem eble volas esti malkovrita. Pro tio mi ne lasis lin en la urbeton. Konstante li manĝos hejme ĉe panjo Lida.

Koŝelev ŝercetone rimarkis :

— Nu, mia fratineto, kiel ĉiu virino, estas sufiĉe ruza. Ŝi kaŝas sian trezoron for de la konkurenco.

Ankaŭ ŝi laŭte ekridis pri la rimarko, poste preninte libron eksidis ĉe la fenestro. Sed la litervicoj ne povis kateni ŝian atenton.

Koŝelev komencis informojn akiri el la ĵurnaloj, preskaŭ tute plenigitaj per raportoĵoj pri la afero de la heredaĵo. Oni komunikis la tekston de la alvenintaj radiogramoj. La banko konfirmis, ke la sefo n-ro 135 estas luita vere de Vilhelmo Grauer, kiu sian tutan havaĵon metis tien kaj asekuris ĝin kontraŭ ŝtel- kaj sigelrompo kaj brulo. La asekurita societo konfirmis, ke Vilhelmo Grauer ĝis sumo de 230 milionoj da dolaroj asekuris ĉe ili la sefon n-ro 135, en kiun li mem metis sian havaĵon. La asekurita kontrakto validas ses monatojn kaj por tio la plena asekurprezo 128 mil dolaroj kaj 15 cent-oj jam estas pagitaj de la sefluinto mem. La kopioj pri dokumentoj alvenos baldaŭ per aerpoŝto. Alparolo de Tamara rompilian legadon.

— Juro, ĉu vi scias, kion mi pensas ?

— Ne, tute ne !

— Tion, eĉ se li havas fianĉinon, tamen li ne amas ŝin. Certe ne !

— Pri kio vi pensas tion ?

— Li ne parolis pri ŝi. Kiun ni amas, pri tiu ni ĉiam parolas.

Koŝelev milde ridetante levis la manon kaj ŝerce minacis.

— Tamara, Tamara, vi ŝajnas tre suspektinda al mi... Nun mi scias ja, kial vi parolas ĉiam pri li.

Ŝi ruĝiĝis kaj kun ĉarma spito respondis :

— Sciu do, Juro, se eĉ ĝismorte mi enamiĝus lin, tamen mi ne edziniĝus kun li kaj... kaj... sincerkore mi deziras, ke li havu fianĉinon. Nu ! Ĉu vi estas kontenta ?

IX.

Pasis semajnoj. Kazimiro Jenlafiŝ staris ĉe la fenestro de sia urbestra oficejo, rigardis al la placo, etendiĝanta antaŭ la urbodomo. Li atentis la ekscitite diskutantan amason, malsatan je novaĵoj kaj mono. Se ne estas novaĵo, oni devas elcerbumi ion por la popolo kaj anstataŭ mono almenaŭ estas necese skue tintigi la fabellandan monsakon antaŭ ili. En tia granda amaso la popolo ĉiam vekis abomenon en li. Jen la popolo kaj tion oni nomas nacio. La majesta popolo estas tiel stulta! Tiu ĉi stulteco estas ĝia sola profitigebla eco... Kaj hodiaŭ tamen estus pli agrable samopinii kun tiu ĉi neglektita amaso. La superaj medioj kun certa indiferenteco rigardas la okazintaĵojn. Verŝajne ili ruzadas en la fono, ĉar ilia intereso estas ja ne la urbo, *nur la dinastio*.

La urbestro ekridetis. Nu, edzinigi principinon Olivia kun Cezaro Grauer ne sukcesis, kvankam tio estus tre multe utilinta al la dinastio: restarigon de firma financa bazo. Ĉu subranga edziniĝo? Ne grave! Cetere, oni povas grafigi, eĉ principigi lin antaŭ la ceremonio. La urbestron konsolis iom da malica ĝojo pro la fiasko de la dinastio. En Rakvert du tagojn la plej lertaj detektivoj de la lando serĉis tiun viron. Kazimiro Jenlafiŝ tamen ne tre kuraĝis montri sian koleron al la suverena medio, sed sian tutan koleron rezervis por Jonathan Krak taj liaj ok filinoj kaj unukvintala edzino. Tiu ruza notarieto volis liberigi tutan

menaĝerion kontraŭ la sensuspekta junulo. Ho, tre danĝera konkuranto estas tiu ĉi Krak, sed bedaŭrinde, ke li ne povas sentigi sian malsimpation al li, ĉar — vole nevole oni devas konfesi — li estas genia praktikulo. Antaŭe li devos eltordi lin kiel citronon kaj poste li iru, iru en pension !

La urbestro malfermis la spiontrueton de la por-do al la atendejo. Ho, kia amaso ! Vere, en frako kaj lakŝuoj kaj ne en haladza kamparana drapo, bastŝuoj, sed tamen amaso... Jen, denove estas ĉi tie la du psiĥiatroj, du universitataj profesoroj. Ili ja tudas lin. Sian reciprokan malsimpation ili akriĝas je liaj nervoj. Unu provas pruvi sur psikologia bazo, ke la heredaĵo troviĝas en la *Luno*, la alia per vicigo de sciencaj argumentoj certigas, ke ĝi kuŝas netuŝita en la sefo n-ro 135. Terura necerteco ! Neĉe inventarii !

La diskuto de la profesoroj trafiltriĝis.

— Konsiderante la diritajn fundamenta bazo ni povas konstati, kara kolego, ke Vilhelmo Grauer havis psihan malnormaliĝon, respektive li estis danĝera mizantropo, kiu postlasis nenion, tiom pli, ĉar li posedis ja nenion por postlasi.

— Kara kolego, denove vi eraras. Mi konsente aprobas vian deduktadon kaj konkludadon ĝis la punkto pri la prostituinoj, sed ĉi tie mi estas devigata renversi vian tutan hipotezon. Vilhelmo Grauer eble, sed ne tute certe, malamis la homojn, malestimis la socion, sed kial li volus venĝi sin je malprofito de la mizeraj parioj ? Jen, kara kolego, pri tio vi ne povis produkti akcepteblan argumenton. Nu, kaj ĉu ekzistas tia frenezulo, kiu pagas 128 mil dolarojn kaj 15 cend-ojn al asekura societo por sola ŝerco ? Dek kvin cend-ojn eble, sed ne centdudekok mil dolarojn ! La informoj, ricevitaĵ ĝis nun, povas plene konvinki nin, ke tiu Grauer posedis grandiozan kapitalon, ĉar dum-milite li partoprenis en la plej profitdonaj entreprenoj.

— Bone, kara kolego, sed kiel vi opinias pri la sintenado de la filo?

— La pomo ne malproksimen falas de sia arbo, kara kolego. Ekstravaganculo kiel la patro. Laŭ la raportoj de la detektivoj atendas lin kvin milionoj da dolaroj en iu Berlin-a banko. Kies filo estas tiom riĉa, neniel tiu povis esti almozetanto.

— Sed, kara kolego, ĝuste tio vekas en mi suspekton. La testamento ne mencias la filon. Jen la fakto, kies logika sekvaĵo estas, ke Vilhelmo Grauer dum sia vivo transdonis la tutan havaĵon al sia filo kaj la restaĵon uzis por efektiviĝi ian absurdan ŝercon.

— Vi, tre estimata kolego, kiel ĉiam, ankaŭ nun treege eraras. La detektivoj raportis, ke tiu ĉi sumo jam de jaroj rentumas en la banko. La testamentinto ne Vilhelmo Grauer, sed Amalia Korp, la impresarino de la artisto, verŝajne la patrino de la juna Grauer. La testamentita sumo nur post la morto de la patro estis disponebla de la filo, sed la maljuna Grauer tute ne bezonis tiun sumon. Pruvo, ke li ĉiun kvaronjaron sendis ĉekon pri alta sumo al sia filo...

La urbestro refermis la trueton kaj ekĝemis.

— Ho, Patro, Filo kaj Sankta Spirito, mi frenezigos... kaj tiuj ĉi turmentas min ĉiutage kaj la impertinenta aro de la ĵurnalistoj publikigas ĉion al la majesta popolo. Ho ve!

Pro la ĵurnalistoj li rememoris pri la ĵurnaloj, pri la eksterlandaj raportoj, telegramoj, hodiaŭ alvenintaj. Li eksidis do por orientiĝi. Amaso da paperaĵo kuŝis antaŭ li. Li legis la krajonsignitajn artikolojn. Nur malbonaj sciigoj, raportoj. Oni ankoraŭ ne retrovis la junan Grauer. Verŝajne li kaŝis sin en la najbara lando, ĉar lia ĉefo de tie ricevis leteron de li. Scipo Prikatel, nova gvidanto de la kamparanoj, vagadas de vilaĝo al vilaĝo kaj agitadas, incitas kontraŭ la superaj klasoj, dirante, ke ili sekretumas pri la heredaĵo por akapari ĉion en propran poŝon. Sed li mem tenos la okulojn malfermitaj kaj ne permesos

prirabi la popolon. Se necese, renversiĝu la trono, pereu la dinastio kaj mortaĉu la urbestro kun sia tuta stabo, sed li malhelpos la deturnadon de la heredaĵo.

Eble la ĵurnaloj, kiel ĉiam iom troigas, sed tamen tiu Scipo Prikatel ŝajnas esti danĝera krimulo, pensis la urbestro kaj vere admiris la trankvilon de lia ekscelenca moŝto, la ministro por Internaj Aferoj, ke lin ne dekretas por la mutigo de tiu ĉi impertinentulo. Mortaĉu la urbestro! Anarĥio estas deziri tion, ĉu ne! ? Certe, tiu Prikatel estas respublikano. Nur respublikano povas esti tiel aŭtoritatdetrua. Verdire, ke la okazintaĵo kun princino Olivia iom malpliigis ankaŭ lian entuziasmon por la dinastio, tamen li neniam kuragŭs deklari tian mallojalecon.

Ankaŭ la sciigoj el Ameriko ne tre favoras. Ankoraŭ oni ne sukcesis priesplori la personecon de la du atestantoj, subskribintaj la testamenton. Ne mirinde, ĉar ĉiu dua usona civitano havas nomon Smith aŭ Jackson. Verŝajne ili apartenas al la plezurneglektantoj de la mondo. Pli malagrabla, ke armita bando atakis la bankon, gardantan en sia sefo la grandiozan heredaĵon. Post longa batalo tamen la polico sukcesis reĵeti la atakon. La asekura societo organizis apartan gvardion por la sefo n-ro 135. Nu, jen io saĝe farita! Ho, kio okazus, se tiuj friponoj prirabus la bankon?! Sed kiu scias ja? Eble tiel estus plej bone, se oni ŝtelrompe sukcesus, ĉar ĉu estas mono, ĉu ne — la solvo favorus por la urbo Strutmagen. La asekura societo nepre devus pagi la 230 milionojn. Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ ekpreĝis al la Sinjoro de la ĉielo, ke *Li* protektu la friponojn ĉe la proksima okazo. Eĉ simpla sigelrompo sufiĉus ja por la asignado de la milionoj.

Nun trafis lian manon la plej freŝa polica statistiko pri la prostituo. Momenton li rigardis ĝin, poste turnante la okulojn al la plafono ekĝemis. Tio ĉi estas ja freneziga! Antaŭ du tri semajnoj la nombro de la prostituinoj en Strutmagen estis nur 432 kaj

hodiaŭ 3/95. Terure! El la tuta lando ili vojaĝas al la ĉefurbo kaj la inunda torento konstante kreskas. De horo al horo. La vagonaroj alportas amasojn da tiu ĉi profesie koketa elemento. Se tiel daŭros, ĝis la Urba Konsilantaro decidos, certe ĉiu prostituino de la mondo translokiĝos en Strutmagen por esti ĝia loĝanto kaj per tio rajta postulantino. Jes, vere, Kazimiro Jenlafiŝ ĉiam sopiris fremdultrafikon, sed ne tian! Ho tute ne! Oni ja ne povas profiti el tiuj, sed kontraŭe ili profitos el la pacaj civitanoj.

Por peti urĝan helpon li iris al la telefono alvoki la ministron de la Internaj Aferoj. En tiu momento ĉe la flanko pordeto aperis la kapo de Jonathan Krak.

— Ho, urbestra moŝto, ĉu ci havas iom da tempo por pritraktado?

Humile lamentadis la voĉo de la notario. La urbestro kun kaŝita malamikeco mezuradis lin de verto ĝis piedo. Lin tre ĉagrenis liaj ok filinoj. Li havas nur unu, eĉ tiu similas al sia patrino laŭ la karaktero. Kion nun povas pritrakti tiu ĉi vireto?

— Tuj mi estos je cia dispono, sed antaŭe mi devas telefoni al la ministerio de la Internaj Aferoj pro tiu prostitua afero. Netolerebla tiu ĉi invado!

— Bonvolu rekroĉi la aŭdilon por momentoj! Mi venis ĝuste pro tio ĉi.

La urbestro maŝine obeis, proponis sidlokon al la notario, li mem sidis al sia skribotablo kaj atendis. Krak serĉadis en si la vortojn por komenci la prezentadon de la ideo, kiun panjo Lola trudis al li. Kiel propran li estis devigata prezenti tiun absurdaĵon. Vere, li tute ne havis savideojn kaj dum la lastaj tagoj li havis konscienciproĉojn pro la ĉambristino de la urbestro. Jen, unu kromleĝa infano de li kuradas en la mondo. Dum sia tuta vivo li estis ja pedante honesta kaj neniel ema por diboĉado. Sed tiu junulaĝa flankenpaŝo venenas ĉiun lian nokton.

— Nu, — senpacienciĝis la moŝta amiko.

— Tre multe mi cerbumadis pri la solvo, ĉar tiuj ĉi pervorte nenomeblaj virinoj ŝturmas mian oficejon por informoj. De mateno ĝis vespero. Laŭ ricevitaj informoj ili volas fondi organizaĵon por pledi pri siaj rajtoj. Bedaŭrinde nia leĝaro permesas la fondon de ia ajn societo ne kontraŭkonstitucia. Tamen sola punkto de la leĝaro donas eblecon limigi la nombron de membroj de la fondota organizaĵo. Ili povas esti nur bagoniaj civitanoj, en tiu ĉi kazo *civitaninoj*. Honora membro povas esti eksterlandano, sed, mi pensas, ke la niaj ne tre respektos kaj honoros la eksterlandajn koleginojn. Nu, tiom ankoraŭ ne infektis ilin la reciprokaĵo estimo kaj solidareco. Tre domaĝe, ke ni povas malhelpi la fondon de la organizaĵo nur per *sola* fakto, se la Urba Konsilantaro decidos akcepti la kondiĉojn de la testamento. Nu, tiam tuj ĉesus la ĝenerala paroksismo kaj ankaŭ mia nova ideo malaktualiĝus.

Kazimiro Jenlafiŝ blovspire ĝemadis.

— Vere, kara amiko, tio ĉi estus plej simpla. Bedaŭrinde, ke parto de la Konsilantaro eĉ hodiaŭ estas kontraŭ la definitiva decido. Eĉ tiuj, kiuj antaŭ horo pensas *por*, post horo pensas *kontraŭ* la akcepto. La necerteco regas ĉiun. Precipe la kaŝiĝo de la du amerikaj atestantoj pliiĝas la rezervemon kaj dubon. *Kaj se* estas, *kaj se ne* estas! Neniu riskas preni sur sin la respondecon pri la konsekvencoj.

Sinjoro Krak viŝis sian ŝvitantan frunton. Nu, nun li venos kun la granda kanono, kun la ideo de Lola. Li havis tremon. Verdire, ĝi estas ja la plej senmorala propono, kiun homa menso elcerbumis ĝis nun. La sola konsolo, ke *ne* li elcerbumis tion.

— Konsiderante la hezitemon de la Konsilantaro mi pensis, ke... Memkompreneble, se oni retrovos la amerikajn atestantojn, la ideo malaktualiĝos... Donu Dio! Tio ĉi taŭgas nur en la plej malfavora decido de la Konsilantaro, kiam la heredaĵo estos cedita al la prostituinoj. La demando pri la »*kaj se*«

eĉ tiel ne estus solvita, tamen se la mono efektive ekzistas, la posedrajto tamen estus en la manoj de la moralhavaj klasoj.

— Mi ne komprenas, tute mi ne komprenas.

— Nu, en la unuaj momentoj ankaŭ mi ne komprenis, ... mi volis diri, ke en la unuaj momentoj mi ne povis sufiĉe konsideri la savoforton de mia ideo, sed nun... nun...

— Ĉu ci volas krucumi min?! Diru do la ideon!

— Tuj, tuj! Nun ĝi estos elpremita. La ne-nomeblajn virinetojn, alvenintajn el eksterlando, ni povos facile forigi per dekreto kiel nedeziratan elementon. La nombro de la restintoj jam estos tre malalta, ĉar la eldonon de novaj legitimiloj ni rifuzos pretekstante ion kaj nun sekvos la moralhava klaso: niaj edzinoj kaj filinoj.

— Mi ne komprenas. Terure!

— La polico rajtos doni legitimilojn nur al virinoj kaj knabinoj, kiuj havas atestilon pri sia morala sendifekto. Nu, jen! Kompreneble, oni diskrete faros tiun aferon kaj mi estas tute konvinkite, ke eĉ unu honesta virino ne krios al la publiko, ke ŝi havas tian legitimilon pri pros... prost... Resume, se ni enkalkulas eĉ la virinseksajn suĉinfanojn, tamen ĉiu ricevos 3602 dolarojn, konsiderindan sumon por prosperigi la burĝan klason.

La urbestro salte leviĝis. La konsterniĝo kaj ekscitiĝo pri nova ebleco batalis en li. En la unua momento li volis vangofrapi la proponinton, poste plengorge moke piriridi lin, sed en la dua momento li komencis ekscitite kalkuli la virinajn membrojn de sia familio. Bedaŭrinde, nur du! En dolaroj: nur 7204! Nu, sed tiu ĉi mizera notario havus ŝancon por la ok filinoj kaj edzino en dolaroj, kiom? Jes, 32418. Li fariĝus la plej riĉa civitano de la urbo kaj baldaŭ elŝovus lin el la urbestra seĝo. Ne, ne! La ideo estas tute malbona, kvankam efektivebla kun necesa diskret-

eco kaj takto... Ĉu eble fari ion diskrete en la epoko de la ĵurnalfuriozado? Nenion!

— La ideo estas forĵetinda, — deklaris abrupte la urbestro.

— Ankaŭ mi tiel pensis tuj, — konfesis spontanee Krak. — Mi diris ja al mia ed...

— Al kiu ci diris? — La voĉo de Kazimiro Jenlafiŝ minace vibris. — Laŭ nia konsento ĉio, koncerne tiun ĉi aferon, estas ja oficiala sekreto.

— Jes, jes, sed ci ne bonvolis finaŭskulti min... Mi volis diri, ke mi diris, al *mia edukiteco* ne konvenas la ideo... Dank' al Dio!

Krak terure ŝvitis, la urbestro filozofadis plu.

— Prezentu al ci, kion opinius la edzoj kaj patroj pri tia afero?

— Ankaŭ mi demandis la samon... Mi ekpensis kaj preskaŭ svenis.

— Ankaŭ mi sentas kapturton pro cia ideo, kvankam ĝi ne estas absolute malbona, nur ne efektivebla. Unu tia propono kaj morgaŭ mi povus ja transdoni mian urbestran seĝon al Scipo Prikatel... Jes, se oni povus diskrete aranĝi la komedion kaj poste, kiam ni havos certecon pri la mono, tiam gaje prifajfi la mondon, ĉar la mono ne havas ja odoron. Sed kio okazus, se la mono restus eterna fiktivaĵo? Mi pripensos... Krak, diru al mi: cia filino havas prostituan legitimilon!

— Kion? — Kvazaŭ vekigante el silenta digestado Krak nekomprene rigardis la urbestron.

— Kion, kion, kion?! Diru, cia filino, amiko, havas ja prostituan legitimilon.

— Bone, sed ŝi ne havas.

— Mi scias, ci azeno, sed ci diru... Diru kru-
ele, insulte! Ĉu komprenite?

Krak tre ĝenite kun laŭebla respektemo fine plenumis la strangan deziron.

— Sinjoro urbestro, cia tre estimata filino havas legitimilon pri prostituo... Ne kolere, sed ci volis

kaj mi petas enpense pardonon de cia filino, kiun koni ĝis nun mi ne havas honoron.

Kazimiro Jenlafiŝ atentis la efikon en si mem. Nu, ne tiel agrable, sed tamen tolereble por 3602 dolaroj. Subite li turnis sin al Krak kaj plenkolere kriadis:

— Ci kuraĝas tiel riproĉi min?! Cijaj filinoj kaj edzino havas ja prostituan legitimilon!

Krak insultite saltleviĝis kaj preskaŭ furioze atakis la urbestron.

— Aĉa impertinenteco, fripona kalumnio... Ci povas esti centoble urbestro, sed tiam veturigistan vulgarecon mi ne emos toleri... Mi procesos tuj!

Sinjoro Jenlafiŝ kun malesperaj gestoj provis retrankviligi lin.

— Ne krii! Estus prudenta!... Mi diris tion ne serioze, nur praktike eksperimentis pri cia ideo... Nu, ĝi estas tute ne bona. Ĉiutage okazus kvereloj, dueloj, masakradoj... Ne bone!... Bedaŭrinde la ĉefprovo pruvis, ke la teatraĵo havos ĝeneralan fiaskon.

Sinjoro Krak iom kvietiĝis, kvankam liaj kruroj pro la subita paroksismo eĉ nun tremis. Terure malsaĝa ŝerco! Li momenton pripensis kaj subite ekkriis. Fine, bonega ideo!

— Eĉ kontraŭe, la ĉefprovo pruvis, ke la ideo estas bonega, ĉar se ci prezentos ĝin kiel solan eblecon por konservi la monon al la moralhava klaso kaj emfaze fortimige ci priskribos ĝiajn terurajn konsekvencojn, certe por elekti el la du malbonoj la Urba Konsilantaro akceptos la kondiĉojn de la testamento... Memkompreneble, el la du malbonaj la malpli malbonan!

La okuloj de Jenlafiŝ vikle ekbrilis. Jes, tiel la ideo jam estas akceptebla por atingi certan perforton per ĝi, ĉar kiam la Konsilantaro akceptos la kondiĉojn pri starigo de la monumento kaj promeno en la zoologia ĝardeno, tiam poreterne ĉesos la demando pri la prostituinoj. Sed por ĉesigi tion estas necese mi-

naci per prostitua legitimilo ĉiun patron kaj ĉiun edzon. Kolose! Harstarige geniajn ideojn havas tiu ĉi Krak! Post monato li elektigos lin urba ĉefnotario.

Subite bruo, kriado, orĥestra kakofonio aŭdiĝis sur la placo al la urbestra ĉambro. Ili ambaŭ kuris al la fenestroj. Longa, preskaŭ senfina virina armeo marŝis en soldataj vicoj al la placo. Kun blankaj flagoj, faritaj el littukoj kaj kun grandaj tabuloj el kartono. Kiel reklamprocesio de iu fama ŝminkfabriko, vestita en supergenuaj jupetoj kaj ĝisventre dekoltitaj bluzoj.

— Kio... kio estas, Krak? Tuj mi freneziĝos! Kia demonstracio? Ĉu revolucio?

Ankaŭ Krak rigidiĝinte rigardis la konsternan demonstracion. Jen, la furioj de la nokta moralo venis sur la straton kaj postulas. Ili ripete kriacas la surskribojn de la tabuloj. Ho, kiaj devizoj! »Redonu al ni la knabinajn revojn!« »Ebligu la revenon al la rekta vojo!« »Savu nin por la socio!« »La bazo de moralo estas la mono!«

— Kio, Krak, kio??!

La kapo de la urbo prenis inter manojn sian kapon por ne perdi ĝin. Kapperdinta urbo ja ne estas tiel nesavebla, kiel kapperdinta urbestro.

— La prostituinoj demonstracias.

— Jam! Ve! Kio okazos pli poste?... Eble ili eĉ deputitaron sendos al mi, ĉu ne? Mi ne akceptos ilin! Neniel!

Krak iom pli trankvile pripensis la ŝancojn.

— Laŭ la leĝaro ankaŭ ili estas civitaninoj, pagas imposton. Ci devos akcepti ilin, takte komprenigi al ili la malfruiĝon.

— Kian malfruiĝon?

— Ĉar la Urba Konsilantaro jam akceptis la kondiĉojn de la testamento.

— Sed ĝi ankoraŭ ne akceptis!!

— Jen la plej bona okazo akceptigi tion kun ili. Tuj ci devos kunvoki la sinjorojn, la ideon kaj

tiun ĉi demonstracion armile uzi kaj post horo ĉio estos en ordo.

— Ho, se tiel okazus! Se tiel!! — Sinjoro Jenlafiŝ ekscitite kuradis en la ĉambro, tordadis la manojn. — Kara bona amiko, Jon, ne lasu min for! Se el tiu ĉi ŝlimo mi elnaĝos sur la bordon, nepre — je mia honora vorto! — jam morgaŭ ci estos urba ĉefnotario kaj mi elektigos cin vicurbestro.

Krak prenis Donkiĥot-an pozon. Stranga ekscitiĝo regis lin. Li sentis sin stari sur la plej alta punkto de la situacio kaj kvazaŭ ordone komunikis siajn koncizajn konsilojn.

— Ni ne havas tempon por perdi! La konsilantaron tuj sciigi, kunvoki kaj favore decidi. Telefoni al la loka regimento kaj senprokraste alarmi ĝin kaj se tiuj ĉi virinoj perdus la prudenton, do pafi... pafi pro diablo!... Jes, pafi, sed kompreneble en la aeron, ĉar tia buĉado ne faras bonan impreson en eksterlando, kaj inter la demonstraciantoj troviĝas tre multaj fremdaj civitaninoj. La deputitaron akcepti, promesi al ili ĉion promeseblan — do *bonvolon* — kaj finite! Ĉefe, ke la skandalo kiel eble plej baldaŭ estu likvidita!

La urbestro mire rigardis al sia amiko. Jen, kiel plenkreskis tiu ĉi griza vireto. Jam estis ekfajriĝonta en li la ĵaluzemo, kiam la pordo malfermiĝis.

— Deputitaro — anoncis la servisto.

— Atendu ili — diris Kazimiro Jenlafiŝ kaj turnis sin alla notario. — Kara amiko, certe ci bonvolos anstataŭi min dum mi aranĝos la pluajn. — Li informis ankaŭ la serviston. — Jonathan Krak, la urba notario, bonvolos anstataŭi min. *Servus*, Krak kaj nur lerte, takte!

La urbestro rifuĝis tra la flanka pordeto. Krak paliĝis pro la soleco. Nu, li miksiĝis en belan aferon. Kia respondeco! Se panjo Lola scius pri tio, certe ŝi elŝirus tiujn kelkajn harojn, kiuj ankoraŭ obstine ornamis lian kalvigantan kapon. Kiel ajn honora ŝajnas

esti la rolo de anstataŭanto, tamen li preferus sidadi hejme kaj aŭskulti eĉ dum horoj la urbosavajn projektojn de Lola, kvankam tiuj same estas harstarigaj.

La pordo larĝe malfermiĝis. Dekduo da blanke vestitaj virinoj kun nigra drapmakulo super la koro digne enpaŝadis. Unu el ili sur velura kuseno portis lilion kun rompita tigo. Kiel mezepoka fantomado tiel timige impresis ĉio al Krak.

— Altestimata sinjora moŝto! Amata urbestro, — komencis unu el ili. Ŝi kurbigis la kolon je naiva esprimo kaj elparolis la vortojn senpeke kartavaj — rigardu...

— Mi ne estas urbestro, — rimarkis Krak kun lamenta voĉo. — Mi nur anstataŭas lin.

La naivulino ekglutis kaj komencis denove.

— Altestimata sinjora moŝto, amata...

— Mi ne estas *altestimata* nur *estimata*.

— Nu, bone!... Estimata sinjora moŝto, amata urbestro-anstataŭanto...

— Pardonon, eraro! Mi ne estas urbestro-anstataŭanto, nur nun mi anstataŭas la urbestran moŝton. Mi estas Krak, la urba notario.

— Jes, vi estas ja tiu... — aŭdiĝis raŭkvoĉa rimarko el la lastaj vicoj.

La oratorino denove ekglutis, ŝia kolo, kurbiĝinta je naiva esprimo, rektiĝis.

— Nu do, estimata sinjora moŝto, — ŝi komencis kaj eĉ nuanco ne restis el la kartava parolmaniero, — ni venis en la nomo de la rompitaĵoj kun humila peto. Rigardu ĉi tiun simbolon! — Nun ŝi montris al la floro, kuŝanta sur la kuseno, klopodis efike pepadi la vortojn kaj ŝia kolo denove kurbiĝis. — Jen, tiaj rompitaĵoj, velkantaĵoj sur kuseno, estas ni, kiujn puŝis la vira egoismo en la koton. Super nia koro la funebro-kolora drapmakulo simbolas tiun nigran punkton, kiu forigis nin el la morala socio. Hodiaŭ ni aplikis ĝin kiel emblemon pri pento. Sinjora moŝto, ho, rigardu nin! El ni ne unu akvumas

siajn kusenojn per larmoj, ĉar la unua erarpaŝo mal-
ebligas revenon al la rekta vojo. Ni estas la en abis-
mojn falintoj. La plimulto el ni havas kromleĝan
infanon, kaj multaj troviĝas inter ni, kiuj ne konas
la nomon de la patro. Sinjooora Moŝŝto, rigardu
ninnn . . . !

La oratorino longe parolis, jen tremigis la voĉon,
jen prenis krian patoson. Sinjoro Krak ne riskis ri-
gardi ŝin, nek la aliajn. Terura sinakuzo turmentis lin
pro la — *ĉambristino* de la urbestro. Jes, ankaŭ ŝi
estas senpatronoma infano kaj *lia* infano. *Ŝi* jam
estis proksima al la abismo, sed ĝustatempe li sur-
prizis ŝin kun tiu friponeta Stubek. Ne pro la orat-
orino, sed pro siaj propraj pensoj li kortuŝiĝis, ek-
larmis.

La vido de la larmoj erarigis la oratorinon kaj ŝi
kun tragika gesto prenis la lilion, transdonis ĝin al
Krak.

— Ho, sinjora moŝto, nia amata patrono...

Krak, kvazaŭ mordpikita de serpento, eksiblis
kaj kun rigida mieno rigardis al la membroj de la
deputitaro.

— Via koro ekparolis, — daŭrigis la knabino,
sed ŝia voĉo jam ne pepadis plu, sed plore plende
ŝalmadis. — Ni ne povas doni ion alian ol nia memo.
Ĉi tiu floro estu nia interpretanto, kiam la afero de la
testamento kuŝos sur la verda tablo de la Urba Kon-
silantaro. Prenu sub viajn flugilojn defende nian
intereson kaj estu la pledanto por la elpuŝitaj mizerul-
inoj! Certe vi havas ja familion, belajn, sanajn
filinojn...

Krak preskaŭ laŭte ekploris. Li sentis, ke en
tiu ĉi momento en la ĉambrego de la Konsilantaro
oni faros ion tute maljustan. Preskaŭ maŝine li trans-
prenis la rompitan lilion kaj lia mieno estis trans-
cende suferanta, kiel tiu de mezepoka sanktulo, ves-
tita en redingoto kun okulvitroj sur la nazo. La
membroj de la deputitaro apenaŭ povis reteni la ri-

don, tiklantan en la gorĝo. Nur la oratorino emociĝis profunde pro sia sukceso kaj aŭdace paŝis al Krak, kisis lian frunton.

— Nia patro.

La makulo de la kiso perfide ruĝis sur la frunto de sinjoro Krak. En la angulo juna ĵurnalisto laŭte ekridante notis kaj notis. La kiso kaj ĵurnalisto skuis la paralizitan konscion de Krak. Ho, kia skandalo farigis el tio ĉi! Oni legos ĉion en la ĵurnaloj kaj sekvos la vangofrapoj. Li malmoligis la koron. Nu, li povas ja rebati tiun ĉi impertinentan societon!

— Sinjorinoj, — li komencis, — ĉio, kion vi estis dirintaj, povas esti bela, sed tute ne helpas vian aferon.

La ekscitiĝo zumis en la ĉambro. Krak sentis kontentiĝon.

— Jes, ĉio estas vane de via flanko, ĉar ĝuste en tiu ĉi momento la Urba Konsilantaro decidus akcepte pri la kondiĉoj de la testamento.

— Fi! Trivialaĵo! Rabistoj! Ili priŝtelas nin! Ĉu tio estas ja burĝa moralo? — kaj kelkaj nereprodukteblaj esprimoj kriaĉe flugetadis tien reen, kreante tian haoson, ke Krak paliĝis, sed li jam ne povis retrodanci.

— Vin certe erarigis mia antaŭa emociiĝo. Pro konsterniĝo mi eklarmis, ke homa cerbo povas amasiĝi tiom da mensogoj kaj kuraĝas aperi en la mano kun la simbolo de la ĉasteco antaŭ la publiko. Nu, tiun simbolon, ĉar viaj manoj etendis ĝin al mi, mi terenĵetas kaj surpaŝas.

Dirite, farite. »*Liliorompanto*«, kriis akratone iu virino el la vestiblo. »*Mensogo*, — respondis kolere Krak, — *la unua lilio, kiun mi rompas en mia vivo!*« El la ĵurnalisto eliĝis la ridego. La deputitaro faris surdigan bruon. La servistoj iom post iom sukcesis elpuŝadi ilin kaj malhelpi la pluajn atencojn. La ĉambro malpleniĝis, nur de la koridoro filtriĝis la senbrida blasfemado, orelfendaj krioj. Jam ankaŭ sur la placo oni ek-

sciis ion pri la okazintaĵo. Aperis la oratorino kaj kun voĉo penetre plifortiginta ekkriis: »*Ili prirabis kaj malhonorigis nin!*«

Post momento uragane eksplodis la bruoj, muĝoj, kriado kaj vipis la detrupasoj. Furioj, gestantaj al la ĉielo, ekcitis agitante saltis sur la piedestalon de la statuo, staranta sur la placo, kaj admonis, instigis, incitis la amason. La amaso hurlis, la littukaj flagoj batale flirtis, minace levigis kaj ĵetita ŝtono rompita la fenestron de la urbestra oficejo. Krak timigite flankensaltis. La teruro haltigis liajn korobatojn por momento. En la plej sekuran angulon de la ĉambro li tiris sin.

La montraj fenestroj de la magazenoj estis la unuaj viktimoj de la furoro. Oni ŝlisis la pordogon de la urbdomo, sed la virinaj pugnoj fulmotondre tamburis sur ĝi. Malantaŭ la pordego kelkaj paligintaj policanoj premis sin unu al alia. La fenestroj de la domoj malfermiĝis kaj la konsternitaj patrinoj ovoplumon ĵetis al la furiozantaj demonoj. Tiuj respondis per ŝtonoj. La nova respondo el la etaĝaj fenestroj jam pli efike argumentis: balailoj, karbŝoveliloj, lignokuleroj, noktaj vazoj kun ne rozakva enhavo. Reciprokaj insultoj. »Edzorabistinoj, familivenenantoj! — kriis la horo de la familiestrinoj. »Pseŭdmoralaj okulturnantoj, via konkurenco puŝas nin en mizeron!« — kriis responde la amaso. Ĉe la rando de la placo eksonis danĝeraverto: »La polico!!... La soldatoj!«

El la strato Otto Pastrosak aŭdigis la klakbruo de galopantaj ĉevaloj. Ĉe la alia flanko de la placo aperis la soldatoj. La amaso, perdinte kuraĝon, vekriadis, blasfemadis, insultis kaj okazis scenoj neprikskribeblaj kun triviala ridado. Al la kolo de la policoficiro, komandanta la atakon, ĵetis sin bronzhara megero kaj krie publikis la intimaĵojn de la pagitaj nokttoj. La longa svarmo de la soldatoj ridetante kun bajonetoj ekiris al la amaso por elpusi ĝin el la placo.

La knabinoj lerte evitante la bajonetojn atakis ilin demalantaŭ. Per kisoj, ĉirkaŭprenoj, historiaj baraktadoj ili eltordis la danĝerajn armilojn. El la fenestroj la konsterniĝintoj turnis sin plenkolere al la polico kaj soldataro.

Krak kun tremantaj kruroj rampe trenis sin al la fenestro kaj elrigardis. Pro malespero li ekploris. Ne estas necese havi viglan fantazion por diveni la konsekvencojn. Eksigo el la oficejo, eterna doma infero. En tiu ĉi momento la pezo de la respondeco tiom premis lin, ke preskaŭ li terenfalas. Eĉ la ekscitite alvenintan Stubek li ne rimarkis.

— Telegramo el Ameriko! — En la mano de Stubek blanke flirtis la papero.

— De kie? ... El Ameriko? Ve, Stubek, mi jam estas mortinta... Kion ĝi entenas?

— Mi ne kuraĝis legi ĝin, adresitan al vi.

— Malfermu ĝin!... Legu!... Mi jam mortis... Ho, Lola, Lola kaj ĉio ĉi pro vi! Serĉu la kaŭzon de ĉiu malbono nur en virino!... Kio estas en tiu malfeliĉa telegramo?

— *»Per Majestic ni alvenos post tagoj en Hamburgo Stop. De tie ni vojaĝos al Strutmagen. Stop. Smith kaj Jackson«* — legis Stubek kun singulta rapideco.

Momenta trankviliĝo aperis sur la vizaĝo de Krak. Nu, tamen estas mono. Li ĉiam asertis tion. La atestantoj de la testamento post unu aŭ du semajnoj alvenos kaj definitive malaperos la necerteco. La voĉhaoso, penetranta el la strato, fariĝis ĉiam pli timiga, rememorigis lin pri la nuno. Jam egale, ĉu estas, ĉu ne heredaĵo, sed tiu ĉi tago eltordis lian kolon. Lia rigardo falis sur la telegramon. Nu, kio okazus, se ili eksciis tion ĉi?! Certe revolucio kaj eĉ lia vivo ne havus sekurecon. La alvenon de la du atestantoj ne estus racie publiki nun, eĉ kontraŭe. Sed kion kontraŭe?! Kio povas esti la kontraŭo? Kio?! Lia mieno subite sereniĝis. La malespero donis ideon. Nur ku-

raĝon li devas havi por efektiviĝi ĝin. Li okulumis al la placo. Terure! Li rememoris pri Lola. Eĉ pli terure! **Li** legis ja en romanoj, ke la heroo per malvarma temperamento kaj persona kuraĝo povis ekbridi la furiozantan amason. Jes, tio povis okazi, kaj eble sukcesos ankaŭ al li. Nu, malvarman temperamenton li havas ja, sed kie estas la trankvilo kaj la persona kuraĝo? De kie li ĉerpu tion? Aperis antaŭ li la atleta figuro de lia edzino. Ho, Lola, el la respekto al vi mi ĉerpas la kuraĝon por ĵeti min al la furiozantaj megeroj, li pensis kaj post momento elŝirante la telegramon el manoj de Stubek larĝe malfermis la pordon de la balkono.

Kelkajn momentojn li staris tie, kiam iu rimarkis lin kaj ekkriis al li: »Liliorompanto!« La atento turnis sin al li. Sinjoro Krak alten levis la blankan telegramon. La koloro de la paco kaj la scivolo iom post iom silentigis la amason. Tie kaj tie oni ja povis aŭdi senpacienca sibladon. La silento stimulis la kuraĝon de Krak. Nu, nun helpu Sinjoro de ĉielo! Tion esprimis lia rigardo fikse pendanta ĉe la rusta defluilo de la kontraŭa domo.

— Civitanoj kaj civitaninoj, — li komencis kun timovibro. — Telegramo el Ameriko!!

Eĉ la zumadon de muŝo oni povus aŭdi en tia silento. Krak havis jam eĉ vervon por aŭdace daŭrigi.

— Mi volas sciigi ian informon al la loĝantaro de nia ŝatata ĉefurbo, tian informon, kiu ĉesigos la ĝisnunan necertecon. Mi, Jonathan Krak, en tiu ĉi momento anstataŭanto de nia meritplena altestimata urbestro Kazimiro Jenlafiŝ...

Nun iu ekkriis: »Fi, abdiku li kaj kaŝu sin post la figofolion de sia nuda dancistino!« La interkrio ne embarasis la notarion, inspiratan de heroeco. Finfine la kora deziro ne koncernis lin.

— . . . mi volas legi al vi la tekston de ĵus alveninta telegramo, sed . . . — En la kapon venis nova ideo kaj Krak tuj agis laŭ tio. — Sed mi petas la

majestan popolon, ke viciĝinte sub siaj flagoj ĝi retenu sin de pluaj eksterordaj entreprenoj, de senprudenta konduto. Mi ripetas, ke la enhavo de tiu ĉi telegramo ĉiurilate meritas vian atenton, ĉar ĝi sensacie efikos... Mi atendos kelkajn minutojn kaj postulas plenan disciplinon kaj devosenton de niaj altestimataj policanoj kaj soldatoj.

Sur la placo tuj montriĝis la kvietiga efiko. Kelkaj senprokraste emis al oboe, aliaj konjektis ruzaĵon, la pli batalemaj provis daŭrigi la incitadon, sed finfine venkis la — *scivolemo*. La armitaj viroj de la potenco denove poziciis en defendopreteco.

La bruston de Jonathan Krak nekonata kuraĝo ŝveligis. La unuan fojon en la vivo li estis fiera pri sia genia inventemo. Momentojn li staris en Napoleon-a pozo sur la balkono. Stubek kun larĝe malfermitaj okuloj admiris sian aŭdacan ĉefon. Kiam la ordo ŝajnis kontentiga, tiam Krak alte levante la telegramon kaj la tonon de sia voĉo, komencis la legadon.

— *»Mono ne estas Stop Heredaĵo en la Luno Stop Vilhelmo Grauer estis eskapinto de frenezulejo Stop Hawkins, la ĉefo de la newyork-a detektiv korporacio.«*

La surprizo haltigis en ĉiu la eksplodon de konsterniĝo por momento. Tiun momenton Krak bone profitis.

— Civitanoj, kaj civitaninoj, per tio la aferon de nia flanko ni finis. Sed se vi pensas prudente mortbati unu la alian pro heredaĵo, estanta en la Luno, faru do! Miaflanke mi povas nur ridi, ridegi pri la nova situacio, — kaj el Krak vere eliĝis la rido de plifaciliĝo. Tie kaj tie sur la placo ĝi havis eĥon.

La paroksismon, sovaĝecon, subitan koleron iom post iom superregis la ridego. La eksterlandaninoj sakris, la bagoniaj civitaninoj mokadis: *»Jes, vi volonte estus absorbintaj iom el la 230 milionoj. Nu, nun faru tion!«* Grupoj pro la nekontentigita venĝ-

emo ekiris al la tombejo por detruĝi la tombon de la mortinto, sed la polico dispelis ilin. Multaj kuris hejmen por paki kaj forlasi la landon, ĉar kion serĉi ĉi tie, se la espero forvaporigis? Post duonhoro sole la rompitaĵoj montraj fenestroj, vitraĵoj, kuleroj kuŝantaj dise sur la placo montris la ekflamiĝon de la bagona sango.

Kiam Krak retiriĝis en la ĉambron, lia rigardo renkontis tiun de la mortpala urbestro, kiu leonsovaĝe atakis al sia amiko.

— Kion ci faris al mi, homo? Kial ci ne sciigis min pri la malpleno de la sefo? Ĵus antaŭ momento la Urba Konsilantaro akceptis la kondiĉojn. La tuta mondo ridos pri ni. Mi eljetos cin el la oficejo!... Terure, kio okazos al mi?

Kun mistera rideto Krak transdonis la telegramon al la urbestro, kies okuloj kvazaŭ formangiĝis ĉiun literon aparte kaj poste kun stulta mieno, komprenante nenion, gapis al la notario, tenanta sin en digna pozo.

— Ĉu ci frenezigiĝis? Sed tiu ĉi telegramo tekstas alimaniere ol tiu...

— Nu, kompreneble. Mi devis malhelpi, ke tiuj ĉi megeroj, furioj komencu ian teruran masakradon. Finfine la vivo de la armeo valoras tion. Kaj rigardu, kara amiko, kiel ridetante, mokante unu la alian ili nun disiĝas. Sed tiu ridas, kiu laste ridas. La lastaj estos *ni*.

— Sed se ili ekscios pri la ruzaĵo, dekobliĝos ilia kolero.

— Mi pensas, ke jam ne. Unue, la tekston de la telegramo ni komunikos al la membroj de la Konsilantaro kiel la plej diskretan oficialan sekreton. Post semajno ni povos publikigi tion, ĉar la amaso ĝis tiam malaltiĝos je la normala nombro de la prostituinoj, la eksterlandaj nepre devos forlasi la landon. La decido de la Konsilantaro jam tute forprenas de ili la rajton al la heredaĵo. Due, tiu ĉi telegramo alportis

certecon, ĉar du amerikaj civitanoj tute ne traŝipveturus la oceanon por diri, ke mono *ne* estas. Tion ankaŭ telegrame ili estus povintaj fari. Ĉu ? !

Jonathan Krak kreskis timige giganta en la okuloj de Kazimiro Jenlafiŝ. Jes, tiu ĉi homo estas lia dekstra brako kaj li devas teni lin ĉe si, ĉar se la liberala partio varbos lin, tiam adiaŭ urbestra seĝo.

— Jonathan, mia sola amiko, neniam mi forgesos cian sindonemon. Per tia ideo nur *mi* estus povinta servi en simila situacio. — Li larĝe malfermis la brakojn por ĉirkaŭpreno.

X.

Post unu horo sinjoro Krak kun sia helpanto Stubek trotadis tra la placo al sia hejmo. Kun nekutima afableco li brakumis sian skribiston. Io stranga varmigis lian koron kaj li haltis ĉe proksima kafejo, rigardis enen. Ne tre multaj sidadis en la kafejaĉo. Du ŝoforoj, unu paciĝinta demono kaj la mastro mem.

— Stubek, — li komencis kaj signifplene rigardis la skribiston.

— Ĉu vi deziras ion, sinjoro ?

— Mi dezirus paroli kun vi tute serioze. Ne kiel la ĉefo al subulo, sed kiel homo al la alia homo. Nu, kiel patro al sia filo.

Stubek subpremis eliĝontan ĝemon. Nun sekvos do la malgranda Lola. Vane, la sorton neniu povas eviti. Li rezigne klinis la kapon, pensis pri la ĉambristino de la urbestro. De tiu tago ili ofte renkontiĝis jen dum dimanĉaj promenoj, jen hazarde, kiam li devis porti dokumentojn, diversajn sciigojn al la loĝejo de la urbestro. En komenco nur al liaj okuloj plaĉis la knabino, sed poste ŝi ŝtelis sin en lian koron. Ŝi ne estas ja stulta vilaĝanino. Ŝi frekventis eĉ la burĝan lernejon en Rakvert kaj Bikitato. Se li ne scius, ke ŝi estas ĉambristino, li povus pensi ŝin eĉ grafino. Kial ne ?

— Nu, pri kio vi pensadas ? — demandis Krak kun patreca mildo.

— Mi estas je via dispono.

— Nu bone, ni eniru! Sidante ĉe tableto pli facile ni povos aranĝi la aferon.

Ili eniris en la kafejon, eksidis al angula tableto, atendis la kelneron, alportantan du botelojn da freŝa blonda biero kaj du glasojn. Sinjoro Krak verŝis, trinkis, rigardis en la aeron, iom batalis en si.

— Stubek, mi ĉiam ŝatis vin kaj nun, kiam mi havas certan aŭspicion, ke baldaŭ mi fariĝos ĉefnotario . . .

— Permesu, ke mi gratulu!

— Ankoraŭ ne gratulu! . . . Mi volus diri ion al vi. Ofte mi pensis pri tio, ke mia filino Lola ricevos dote mian postenon. Espereble tio ĉi estas komprenebla, mi havas ja ok filinojn kaj tial mi pensis certigi ŝian estontecon . . . Ankaŭ mi tiel heredis tiun ĉi postenon.

— Sed la sinjoro notario estas ja tiel eminenta homo, ke . . .

— Lasu tion, Stubek! Se ne estas iu, kiu puŝas antaŭen mian ĉaron, vi eĉ povas pendigi sur hokon la geniecon, eminentecon kaj la ceterajn bagatelaĵojn . . . Kaj kio koncernas mian geniecon . . . sed tio ne interesu vin! . . . Longe mia ŝatata plano estis, ke iam mi nomu vin mia bofilo. Sed intervenis io, pli precize *iu*. Mi surprizis vin kun la ĉambristino de la urbestro . . .

Stubek ruĝiĝis, provis senkulpigi sin, sed pro la embaraso ne trovis vortojn.

— Nu, mi komprenas vin . . . Ankaŭ mi estis iam juna. Vere, ne tre longe daŭris la paradiza stato, sed tamen mi estis ja . . . Nu, kion mi volis diri? Jes, nun mi scias. Kiel mi vidas, vi ne tre simpatias al mia filino Lola. Mi devas do rezigni pri via bofileco . . . Nun mi rememoras, ke ne pri tio mi volis paroli. Mi pensis, ke vi serioze amas *tiun* knabinon, tiun Lida Jenmi kaj . . . kaj . . .

Stubek kun elstarantaj okuloj rigardis al sia ĉefo. Li ne kuraĝis respondi, adiaŭis de oficejo kaj de Lola, ektiris junule siajn ŝultrojn. En tiu

ŝultrolevo estis io impona por sinjoro Krak, kiu konsideris ĝin enviinda spito kaj trokuraĝo de la juneco.

— Nu, juna amiko mia, konfesu sincere, ĉu vi *amas* tiun Lida Jenmi aŭ ŝi *nur plaĉas* al vi?

— Vere, mi bedaŭras, ke ŝi estas ĉambristino kaj mi oficisto.

Krak komprenis la malrektan respondon, jese balancis la kapon.

— Nu, kaj se ŝi *ne* estus ĉambristino aŭ vi *ne* oficisto?

— Nu, mi edziĝus kun ŝi... Jes, sed tiel...

— Kion »*sed tiel*»? Ĉu vi hontas, ke ŝi estas ĉambristino? Ĉu estus pli bone, se ŝi estus ia nuda dancistino?

— Pro Dio! Neniel! Tamen...

— Jen, oni povas miri pri tio. Stultaĵo, ke iu hontas edziĝi kun honesta ĉambristino, sed facile donas sian nomon al dube morala nuda dancistino... Aŭ vi pensas tiun knabinon ne honesta?

— Ho, ŝi estas ja honesta, sed... sed estas io alia...

— Kio?

— Do... Ne, tion malkaŝi mi ne havas rajton... Mi ne diros.

— Nu, bone! Ŝi estas kromleĝa infano, ĉu ne? Jes, certe...

La miro de Stubek estis elokventa respondo. Krak eĉ iom ridetis.

— Nu, kara juna amiko, jen alia stultaĵo. Pro la facilanimeco de tria persono puni la senpekan honestulinon, ne estas juste. Se mi estus en via situacio, mi ne hezitus...

— Ĉu vi volas diri per tio, ke mi edziĝu kun ŝi?

— Kompreneble, edziĝu, estu feliĉa kun ŝi! Mi benos vin ambaŭ. Nu!

Necerta suspekto vekigis en sinjoro Stubek, ke lia ĉefo nur mokas lin. Tio ofendis liajn sentojn.

— Sinjoro Krak, verdire doloras al mi, ke vi mokas miajn sentojn.

— Ĉu mi mokas viajn sentojn? Mi? Neniel! Eĉ kontraŭe! Mi tre dezirus aranĝi kun vi tiun ĉi aferon... Nu, edzinigu tiun knabinon!

— Tre volonte, sed per tio mia kariero estus rompita por ĉiam... Miaj kolegoj, kaj precipe la edzinoj de ili ĉiam klaĉadus pri tio, ke mia edzino iam estis ĉambristino de la sinjoro urbestro.

— Ne zorgu pri tio! Nun ne pensu pri tio, kara Stubek! Vi edzinigos ŝin ne kiel ĉambristinon. La knabino baldaŭ forlasos la postenon kaj post kelkaj tagoj vi konatiĝos kun ŝi en iu burĝa amuzejo. Ŝi jam ne estos plu ĉambristino kaj... kaj... Nu, diru, ĉu vi edziĝos kun ŝi?

Subite vekiginta demando incitis sinjoron Stubek. Kial li volas tiel persiste, ke li edzinigu ŝin? Verŝajne, ŝi estas lia parenco aŭ eble eĉ lia filino. Ne, tiu lasta ŝajnas absurdaĵo! Li tre bone konis la timemon de la ĉefo al la edzino. Certe, ke ŝi estas iu malproksima parenco.

— Kial vi dezirus, ke mi edziĝu kun ŝi?

La demando iom embarasis sinjoron Krak. La embarason li dronigis en la glason da biero. Denove li verŝis, pripensadis.

— Kial? Nu, sciu, ke mi estas *la amiko de la geamantoj*.

— Ĉu la amiko de la geamantoj?... Hm, tamen tie, en la urbestra vestiblo vi ne tre montriĝis tia.

— Ankaŭ tiam mi estis ja, sed vidu, tre doloris al mi, ke mi trompiĝis pri miaj esperoj... Nu, diru, ĉu vi edzinigos ŝin? — La voĉo de Krak preskaŭ petegis.

— Sed mia oficejo kaj la kolegoj...

La notarion forlasis la pacienco, kaj kun akra severa tono ekkriis:

— Ĉu vi edzinigos aŭ ne edzinigos ŝin? Pro diablo! Senmoralecon mi ne toleras en la oficejo.

Se vi edziĝos kun ŝi, vi havos oficejon ; *se ne*, morgaŭ vi jam povas serĉi por vi standon kiel ŝoforo aŭ ŝafojn por fariĝi paŝtisto. Ĉu komprenite ? Simple mi eljetos vin tiel, ke eĉ la kolon vi rompos. Nu, ĉu jes aŭ ne ?

— Kompreneble, ke mi edzinigos ŝin, sinjoro ĉefo, — balbutis la timigita skribisto senprokraste la respondon.

— Jen, kion mi ŝatas ! — Sinjoro Krak ruzete ridetis, trinkis la bierrestaĵon kaj pagis. — Kompreneble, eĉ unu vorton ne antaŭ mia edzino !... Vi ricevos kun la knabino kiel doton mian oficon kaj post la geedziĝa ceremonio ni fariĝos *ĝistombaj malamikoj*.

— Ĉu malamikoj ? Sed mi petas...

— Silenton ! Nur pro la ŝajno. Vi diris ja, ke la ŝajno trompas. Nun *ni* estos la ŝajno kaj *ni* trompos. Kaj nun, adiaŭ ! Morgaŭ la knabino forlasos la postenon kaj la pluajn ni fidu al la providenco !

Kun manpremo adiaŭis Krak kaj rapide forlasis la kafejon. Nekutime gaja li sentis sin, ĉar hodiaŭ li aranĝis ĉion memstare. La unuan fojon de post longaj jaroj.

Sinjoro Stubek kun miksitaj sentoj ekiris al la kontraŭa direkto. Lia koro ĝojis, sed lia prudento iomete protestadis. Fine li konsoliĝis, ĉar havi oficon bone salajratan kaj edzinon amatan estas multe pli agrable ol havi nek la unuan nek la duan. Pri ĉiu miraklo oni klaĉadas ja nur tri tagojn. Fininte en si la tutan aferon li rapidis al la loĝejo de la urbestro — por deklari sian grandan amon.

XI.

Ĉe iu stratangulo la ĵurnalvendisto plenpulme kriadis la titolojn de la gazetoj kaj okazintaĵojn de la tago. Pugnograndaj literoj frapis la okulojn de sinjoro Krak. »*Lilïrompanta urba notario.*« Sekvis subtitoloj, sed tiu sola sufiĉis por li. Certe, tiu fripona ĵurnalisto tie en la anguleto de la ĉambro! Jam tiam li pensis ion ne tre agrablan vidante la profesion subaŭskultanton. Hja, preslibereco! Oni estus devintaj mortbati tiun, kiu la unuan fojon postulis tiajn malsaĝaĵojn! Certe panjo Lola jam atendas lin batalpreta en la pordo. Neeble nun hejmeniri! Antaŭe li faros longan promenon ekster la urbo.

La penson sekvis ago. Jam purpuris la vesperiĝo ĉe la horizonto, kiam denove li revenis en la urbon. Evitante la homplenajn stratojn li ŝtelis sin hejmen tra mallarĝaj stratetoj. Ĉe la angulo de la strato Otto Pastrosak li renkontis societon, konsistantan el elegantaj sinjorinoj kaj sinjoroj. Krak volonte estus fortuninta sian rigardon de ili, sed iu el la sinjoroj rekonis lin kaj kun troigita afableco laŭte salutis lin. La sinjorinoj ĉarme ridetis al li. La nekutiman afablecon li akceptis kun duba sinteno. Ŝajne, oni mokas lin. Li rapidis plu.

Ĉe la pordo de la domo li haltis terurite. De la korto aŭdiĝis akra komanda voĉo de sinjorino Lola. Ŝajne, ŝi ne havas bonan humoron. Jam li decidis pri plua vagado, kiam la pordo neatendite malfermiĝis kaj Cia kaptis lin.

— Ho, kiel bone, ke vi alvenis, paĉjo !

— Jes ? ! Ĉu vi pensas ? Kvankam ĵus mi rememoras, ke mi havas kelkajn aferojn ankoraŭ en mia oficejo. Mi nepre devas reveni. Vi scias ja, tiu ĉi malbenita heredaĵafero donas tiom da laboro, ke...

— Panjo sendis min ĝuste por vi. Ŝi estas tre nervoza... Prezentu al vi, ni havas multe da gastoj, kiuj venis al vi. Ia deputitaro, kiu portis faskon da lilioj.

— Deputitaro ? ! Lilio ? ! Dankon, mi ne petas pli da ili. — Krak ĝemveis — Kaj panjo estas tre nervoza ? Nu, bone mi staras antaŭ la vizaĝo de la ĉiela sinjoro.

— Ŝi estas tre nervoza, ĉar jam pli ol duonhoron atendas vin tiuj sinjorinoj.

— Kiaj sinjorinoj ? — Terura suspekto firmiĝis en li. Lilio kaj sinjorinoj. Nu, tre bele ! — Cia, diru, ĉu ne iaj dube moralaj personoj ŝovis sin al mia sankta familia fajrujo ?

— Kiel vi povas pensi tion ? La deputitaron gvidas la edzino de la prezidanto de la Reĝa Tribunalo. Estas inter ili unu tre altranga sinjoro, sendita de la kortego mem. Vi povas imagi, panjo preskaŭ svenis pro la honoro.

— Kion ili povas deziri de mi ? Espereble ne *ideon*, ĉar mi mortigos min.

— Venu, venu do ! ... Ve, ĉu vi sangas ! ?

— Kie ?

— Sur la frunto... Ne, tio ne estas sango. La postsigno de ruĝumitaj lipoj !... Paĉjo, vi trompis panjon ! — Cia laŭte gaje ekridis.

Krak kun troa fervoro klopodis malaperigi la perfidan postsignon.

— Cia, mi ne permesas tian supozon. Ĉiam mi respektis la senmakulecon de mia familia vivo kaj eĉ en la kapon ne venis penso pri alia virino ol *via* amata patrino.

— Kompreneble . . . Kiu konas panjon, neniel povas dubi pri la vereco de viaj vortoj.

Krak iom emociite transpaŝis la sojlon, provis senkulpiĝi sin, sed la solena silento kaj la leviĝo de la sinjorinoj baldaŭ mutigis lin. La edzino de la tribunala prezidanto, la bela kaj tre juna Sofia Alflamflirt proksimiĝis kun granda bukedo da lilioj al li.

— Altestimata sinjoro notario, ne surprizu vin tiu ĉi eminenta societo, kiu rapidis al vi esprimi koran dankon por via hodiaŭa nobla sintenado. Jes, hodiaŭ vi pruvis, kiel oni devas defendi la sanktecon de la familiaj fajrujoj kontraŭ la atakoj de la nokta moralo. Vi kuraĝe donis indan respondon al tiuj, kiuj el la profunda marĉo aperis demonstracii per sia nudeco kontraŭ la virina honesteco. Vi piedrompis la lilion, la simbolon de la ĉasteco, ĉar profanaj manoj etendis ĝin al vi kaj vi havis kuraĝon kontraŭrigardi, venki la amason, atakantan nin. En la nomo de la honestaj patrinoj kaj iliaj ĉastaj filinoj mi etendas al vi tiun bukedon da lilioj, esprimantan iliajn koran dankon kaj honoron al vi.

Sofia Alflamflirt kun gracia gesto ŝovis en la manojn de Krak la faskon da lilioj, ceremonie kisis lian frunton. La frunto de la malfeliĉa notario *denove* sangis. Ĉia kaŝe ridetis. Sinjorino Lola kun la ceteraj filinoj larmis kortuŝite kaj Krak kontraŭvole rememoris pri la klaĉo, laŭ kiu la bela oratorino havas sekretan amrilaton kun juna leŭtenanto el la reĝa gvardio. Li penadis kelkajn dankesprimojn elpremi el si, kiam la altranga kortegano paŝis antaŭ lin.

Per konciza soldatmaniera parolado li esprimis la dankon de la reĝa kortego por la restarigo de la ordo kaj por tiu grandioza ideo, ke en tiu danĝera situacio li aliformis la tekston de la telegramo. Sinjoro Krak iom paliĝis. Kiel? Oni jam scias pri tio?! Sed la ĉestantoj sen kompreno rigardis al la sendito de la kortego, diplomate ridetanta.

— Jes, ni estas precize informitaj pri tiu ener-

gia sintenado, per kiu vi sukcesis defendi la interesojn de la civitanoj kaj de la ĉefurbo. Por rekompenca la meritojn Lia Reĝa Moŝto — li profunde klinis sin. Ankaŭ la aliaj. — Xaver Nepaul, la VI-a, deziras honori vin per sia plej alta atento kaj bonvolas donaci al vi la titolon de Kortegana Konsilanto.

Supriziteco, flata aproba susurado.

— Sincerkore mi ĝojas, ke la honoro sciigi tion al vi kaj gratuli vin estis donita al mi.

La kortegano premis la manon de sinjoro Krak, kiu tre ĝenite, tre surprizite balbutis dankon. La sinjorinoj kun fervora klopodemo vetpreamadis lian manon. La korsajo de sinjorino Lola krevis ĉu pro la fiereco, ĉu pro ĝojĝemo, eliganta el la vasta profundo de ŝia animo.

La domo silentiĝis. Ankaŭ Krak pretiĝis sin por la nokta ripozo post la aventurplena tago. Ĝuste li okupiĝis pri piedlavado, kiam sinjorino Lola kun sinventuma imponado inter la blankaj kusenoj ekparolis.

— Nu, Jon kara, ĉu vi vidas, kion kapablas la genio de virino?

— Kiel?! Kiel vi komprenas?

— Ĉiam mi diris ja al vi, ke nur min vi aŭskultu! Jen la sukceso de mia ideo.

Je la aŭdo de tia impertinentaĵo iom ekbolis la sango en la pia edzo. Cetere, de kiam li ĝuis la fruktojn de sia memstareco, li havis ian riskemon en la koro.

— Pro via ideo mi estus povinta salti kun kapo al la muro, — li rimarkis iom gale. — Apenaŭ mi povis elnaĝi el ĝi. Espereble, vi ne havas novan ideon, ĉar ni estus perditaj.

— Jon, Jon!! — ekstertoris la konsternita Lola. Dum la dudekdu-jara geedza vivo la unuan fojon sonis tia voĉo, kiu transiris la permesitan limon.

— Jon, vi forgesas pri la estimo al via edzino!!

— Pri la estimo ne, kara Lola, sed mi avertas

vin, ke vian intermiksiĝon en miajn aferojn mi ne toleros plu.

SinJORINO Lola preskaŭ sufokiĝis pro la retenita kolero. Se ŝi ne montros nun necesan energion, certe ŝia doma suvereneco perdiĝos por ĉiam. Ŝi sentis tion kaj serĉis imponan esprimon por subpremi tian, kaj eventuale similan ribeladon. Sed kial la vortoj? La ago pli efikas. Ŝi salte ellitiĝis, batalprete haltis antaŭ la edzo, levis la manon je bato.

Ankaŭ sinJORON Krak ekregis por momento la meleagra ekscitiĝo. Li frapis per la piedo en la lavujon. De la disŝprucantaj akveroj flankensaltis la edzino.

— Jon, mi vangofrapos vin!

— Provu do, provu, — kriis la ekscitita notario. — Vere mi scivolas, ĉu vi havas kuraĝon bati la konsilanton de lia reĝa moŝto?... — kaj li klinis sin — Cetere, kaj tion bone memorfiksu, tian megeran konduton mi refutas por ĉiam. En mia domo mi estas la sinjoro. Nu!

— Viii? Ĉu viii?!

— Jes, mi... kaj nun finite.

SinJORINO Lola timigite rigardis sian edzon. Ŝia batalemo forvaporigis. Ŝi residiĝis sur la randon de la lito kaj transiris al la taktiko de la larmoj.

— Ve, kiel malfeliĉa mi estas!... Megero! Li kuraĝis nomi min megero!! Do tion mi meritis?! Jes, tion, ĉar mi oferis mian belan junecon por tia viro... Jes, ja, ĉiam la barbaraj viroj tiel rekompencas la sindonemon de la fidela virino... Ve!

— Ne veadu! La knabinoj vekigis.

— Spite al ĉio mi veadas, nu! Vekiĝu la knabinoj kaj konstatu, kian senkoran patron ili havas.

Krak ektiris la ŝultrojn, pensis pri tio, ke la kuraĝo ne estas io eksterordinara. Simple oni ne devas pripensadi la eventualajn danĝerojn. Senvorte li viŝadis la piedojn, prenis pantoflojn, poste tute faciltone alparolis la lamentantan edzinon.

— Lola, forportu la akvon!

Ne, tiu ĉi homo ne estas normala! Certe li perdis la saĝon, pensis sinjorino Lola. Ankoraŭ nemiam okazis dum ilia kuna vivo, ke ŝi estus portinta ion ajn je la *ordono* de sia edzo. Kaj nun, nun *tian* akvon?! Terure!

— Kion vi diris? Ke mi... ke mi...

— Jes forportu la akvon... Nu, rapide!

— Jon, vi frenezigiĝis!

— Ĉu vi forportos aŭ ne?

— Ne!... Krevu, sed la akvo restos.

— Nu, bone... La akvo restos, sed mi foriros.

Sinjoro Krak tute trankvile komencis vesti sin. Ankoraŭ li ne sciis kien iri, sed egale. Li pasigos la nokton en la oficejo. Ho, dum la hodiaŭa tago kvazaŭ li estus rricevinta sian junaĝan obstinon, liberigis sin el katenoj de teda zorgateco. La Vivo montris al li, kiel ĝi povas favori la kuraĝulojn. Jam la kravaton li bantumis, kiam la ploretado de Lola iom mildiĝis kaj ŝi senvorte leviĝis, ekiris al la lavujo kaj kun martira humileco ekiris kun ĝi al la pordo. Tio ĉi tre kortuŝis sinjoron Krak. Li preskaŭ ekploris pro la subitaj konscienciproĉoj kaj sur liaj lipoj jam vibris: »Ĉu vi scias, Lola kara, ni *kune* forportu ĝin?!« Feliĉe, sinjorino Lola forlasis ĝustatempe la ĉambron.

Krak fulmorapide senvestigis sin, enlitigis kaj post minutoj jam ekdormis. Pro ploro kun ruĝaj okuloj sinjorino Lola revenis. Ŝi revadis pri ruiniĝo de iama gloro. Krak baritone ekronkis. Lola aŭskultis longan minuton, rememoris, ke tamen ŝi estas ja edzino de Kortegana Konsilanto kaj tio konsolis ŝin. Sur la litorandon ŝi eksidis, rigardis, miris, eĉ admiris sian edzon, la *novan*, la *ĝis nun nekonatan* Jonathanon Krak.

— Ho, kia karaktero!... Kia fera volo! Vere pursanga bagono.

XII.

La aŭtentika teksto de la telegramo estis baldaŭ publikita. La urbestro elektigis unuvoĉe sinjoron Krak urba ĉefnotario kaj lia promocio al la posteno de la vicurbestro estis nur demando de semajnopaso. Cetere la iama notario havis ĝeneralan respekton kaj oni sincere ŝatis lin. Lian antaŭan oficon ricevis Stubek. Al la influo de Krak estis dankebla, ke Ignato Eltord fine firmiĝis en sia inĝeniera posteno ĉe la urba lakt- kaj fromaĝfabriko kaj Elemer Kofropuf, kvankam tre juna, fariĝis gimnazia direktoro en provinca urbeto. Verdire, pri tiu ĉi lasta baldaŭ evidentiĝis, ke li tute ne intencas ligi sian vivon al fraŭlino Tilda. Tamen duoblan gefianĉiĝon rezultis la influo de Krak. Sinjoro Eltord portis la ringeton de fraŭlino Xenia, kaj sinjoro Kofropuf konfesis, ke li intencas edziĝi kun sia lernantino, la ĉarma Cia post du jaroj. Pro envio Tilda iomete paliĝis, sed ŝi klopodis ŝajnigi indiferentecon, deklarante, ke kun *tia* librovermo kiel Elemer Kofropuf ŝi neniel konsentus edziniĝi. Tre verŝajne, ke la juna paro havos harmonian vivon, escepte la tagojn, kiujn panjo Lola pasigos ĉe ili. Jes, ankaŭ Lola iom post iom kutimiĝis al la detronizado, nur antaŭ siaj filinoj ŝi heroadis ĝis alveno de la grumblanta kato. Ĉar sinjoro Krak por konservi la potencon adaptis la taktikon de senĉesa grumblado.

La du amerikanojn la urbo Strutmagen akceptis kun deca solenaĵo. Sur la unua etaĝo de la plej unuaranga hotelo estis luita por ili eleganta apartamento. Sinjoroj Smith kaj Jackson honorvorte kon-

firmis, ke ili estas la atestantaj subskribintoj de la testamento kaj asertis, ke la postlasaĵo de Vilhelmo Grauer estas metita en la seĝon n-ro 135. Tio ĉi ekirigis la lavangon de projektoj kaj senfinaj pritraktadoj. Akciaj societoj diversece fondiĝis por profite ekspluati la espereblan heredaĵon kaj Kazimiro Jenlafiŝ klopodis kontentigi per promesoj la interesatojn, turnantajn sin al li. Fantaziaj planoj amasiĝis por la pligo de la milionoj.

La komitato por la starigota monumento fondiĝis, publikis konkurson, kvankam la komitatanoj sciis ja, ke sole la projekto de la bofrato de la ministro de Internaj Aferoj povas esti akceptita. La monkollektado por la monumento estis komencita, sed ĉi tie la komitaton atingis malagrabla surprizo. La mono neniel enkasiĝis por la monumento kostanta certe centkvindek mil guldojn. La kaŭzo de la malsukceso estis verŝajne, ke Scipo Prikatel, la energia agitatoro, ne ĉesigis sian agadon kaj asertis, ke la tuta heredaĵo ekmigros al la poŝoj de la grandkapuloj. En la plej bona okazo la popolo havos festenon kun bovrostado. Sed la popolo ne estas tia bovo, kiu lasos sin rosti. Se la sinjoroj tiel manipuladas pri la mono, ili havu koron antaŭpagi la koston de la monumento. Nur kelkaj naivuloj cedis al la patriotaj frazoj kaj notis kelkajn guldojn. Kian rilaton havas la monumento zoologia al la bagona honoro kaj al la patrujo, demandis Scipo. Responde la ministro de la Internaj Aferoj alvokis la atenton de la ŝtata prokuroro pri Scipo Prikatel kaj ordonis la areston de la ribelanto pro incitado al patrujperfido. La dekreto ne multe utilis, ĉar Scipo Prikatel ne estis kaptetbla. Li kaŝis sin inter la popolo kaj verŝajne grasiĝis en la senĉesa gastigado.

Certe la afero de la heredaĵo portis viklecon, multajn kolorojn en la vivon de Bagonio. Literaturaj, socialtendencaj societoj fondiĝis por kaj kontraŭ la starigota monumento kaj ili klarigis, komentariis el diversaĵ vidpunktoj la motivojn de la mortinto, lian

mondpercepton, kvankam ĉiu tre malproksime restis post la vero. Kion ili povis scii pri Vilhelmo Grauer? Nenion! Nur tiom, kiom la iama impresario, restinta sen posteno, elcerbumadis por la tintantaj guldoj. Sed por tiuj ĉi fragmentetoj la ĵurnaloj bone pagis kaj tial okazis ne unufoje, ke la impresario enkasis obolojn samtempe de ĉiuj ĵurnaloj. Li jen defendis, jen atakis sian iaman ĉefon, jen nomis lin simple frenezulo. Kelkajn semajnojn li vivis per tio, kiam subite li malaperis kaj neniu sciis kien.

Kazimiro Jenlafiŝ kun kreskanta envio konstatis la populariĝon de sia amiko Krak, sed nek ataki, nek riproĉi li kuraĝis lin, ĉar preskaŭ superstiĉe li kredis, ke li bezonas nepre la geniecon de tiu ĉi viro. Vere, iomete li havis malican ĝojon, kiam li eksciis, ke la nova notario tute ne interesiĝas pri lia filino Lola. Sed tiu ĉi ĝojo ne tre longe daŭris, ĉar iu sufloris al li, ke la nova notario fianĉiĝis kun lia iama ĉambristino. Vere, harstarige demokrate. Li povas ja troviĝi en tia situacio, ke li estos devigata mankisi sian iaman ĉambristinon kaj nomi ŝin »sinjorina moŝto«. Abomeninda demokratio! Nu, en tia lando, kie Scipo Prikatel-specaj homoj libere vagadas ĉio povas okazi. Pleje lin incitis, ke li ne povis ĉeesti la tagmanĝon, donitan de la kortego mem. Jes, tiu ĉi kortega tagmanĝo incitis lin neimageble. Kompreneble, Jonathan Krak, kiel kortegana konsilanto, certe ĉeestis kaj ion priruzadis ĉe la plejsupera medio. Nu, li provos pridemandi lin.

Sed li ne devis ruze pridemandi lin, ĉar la postan tagon sinjoro Krak mem vizitis sian amikon por rakonti ĉion. Kiam li enpaŝis, Kazimiro Jenlafiŝ kontraŭvole konstatis, ke la nova konsilanto havas dignoplenan sintenon. Nu, jes, ankaŭ li fariĝis »altestimata sinjora moŝto« kaj per la altigo de la rango li ŝajnis esti tute ŝanĝita. Liaj gestoj, movoj certe fariĝis pli decidaj kaj estis momento, kiam la urbestro sentis sin lia subulo.

La konversacio ekiris. La urbestro longe evitadis la temon, fine tamen li aludis.

— Nu, kara moŝta amiko, kia novaĵo ĉe la kortego?

— Ĉe la kortego? Nu, kiel mi diru, ili estas ja... ili bone fartas... Lia Reĝa Moŝto bonvolis honori min per afabla alparolo.

— — Ĉu vere?... Mi volis diri, kompreneble ja...

— Jes, ja, kompreneble! Finfine Lia Reĝa Moŝto povas esti scivola pri sia plej freŝe bakita konsilanto... Ĉu ne? Ankaŭ princino Olivia tre ĉarme konversaciis kun mi.

— Ĉu ŝi konversaciis?

— Jes! Ŝi diris: »mi tre ĝojas konatiĝi kun vi.«

— Kaj poste?

— Poste? Ĉu ne sufiĉas tiom?... Cetere mia sento estas, ke ĉe la kortego nun regas demokratia spirito.

— Demokratia? Kiel mi komprenu tion?

— Do sciu, kara moŝta amiko mia, ke Vaga Orel de Pord, la efektiva sekreta konsilanto de Lia Reĝa Moŝto, longe parolis kun mi pri la politika situacio. Memkompreneble, ke ankaŭ la heredajafero estis tuŝita. Mi parolis tre rezervite, tamen mi sentis, ke ĉe la kortego oni iom indignite konsideras ciajn agojn.

La urbestro paliĝis. Se tiu ĉi homo diras la veron, li povas adiaŭi jam nun de la urbestra seĝo.

— Mi ne komprenas cin. Kio ne plaĉas en miaj agoj ĉe la kortego?

— Onidire ciaj agoj ne estas sufiĉe demokratiaj kaj donas abundan argumentaron por tiaj personoj, kia estas Scipo Prikatel, agitanta kontraŭ la superaj klasoj. La urbestro devus esti, almenaŭ *laŭŝajne*, pli demokrata, pli liberala. Tiel esprimis sin Vaga

Orel de Pord, la sekreta konsilanto de la reĝo... Kiel ci povas konstati, mi estas cia bona amiko, kiu ĝustatempe avertas cin. Verdire, mi ne tre dezirus, ke plenumiĝu la aŭguro, kion lia kortegana moŝto diris, koncerne cian urbestrecon.

— Ki-ki-kion li diris? — Preskaŭ sinforgese balbutis la timigita urbestro.

— Se la aferoj tiel daŭros ankoraŭ kelkajn monatojn, diris li, fine ili kondukos al certa revolucio kaj renverso de la ŝtatformo. La furiozigitamasa detronigos la dinastion.

— Ĉu li diris tion?!

— Jes, tion.

— Preskaŭ neeble... Morgaŭ mi anoncos min por aŭdienco.

— Vere, tio estus je cia intereso, kara moŝta amiko mia.

— Sed kara bona amiko mia, — komencis la lamentadon Kazimiro Jenlafiŝ — apenaŭ pasis du semajnoj, ke lastfoje mi havis la honoron paroli kun lia ekscelenca moŝto kaj tiam li donis tute kontraŭajn instrukciojn al mi. Jes, ja... intervenis tiu ĉi malbenita fripono, tiu ĉi Scipo Prikatel. Nu, pri tiu ĉi demagogo mi ne kalkulis, sed verŝajne ankaŭ li ne. Mi mem eltordos lian kolon, kiam oni arestos lin.

— Mi povas trankviligi vin, ke li ne estos arestita. Lia ekscelenca moŝto la ministro de la Internaj Aferoj reprenis sian persekutan dekreton pro pli altaj intereso. Mi pensas, ke la manoj de la kortego manipulis ĉi tie. La arestado de tia populara popolestro ne estus senriska, nek la plej feliĉa kaptajo. Ni devus bone pripensi la rimedojn por defendi la intereson de la urbo kaj iomete ŝtopi la buŝon de la krieganta popolo.

Jenlafiŝ kvazaŭ petegante rigardis al sia amiko, kiu certe havas ian savideon. Estus bone vidi la pensojn de tiu ĉi ruza vulpo kaj precipe scii, kion li prisilentis. La urbestro nun klare perceptis, ke la kortego,

verdire la dinastio intrigas, sagace artifikadas. Sed kiel? Certe, estus bone alproprigi la duonon de la heredaĵo kaj per tio plialtigi la ĵaran rentumon. Tute nedubeble, ke la artifikado koncernas la monon. Jes, eĉ princino Olivia estis preta edziniĝi kun la juna Grauer por restarigi la bilancon de la dinastia havaĵo.

— Vere, kara amiko, mi eĉ ne pensadis ĝis nun pri tiu ĉi situacio, — li komencis — kaj tre verŝajne ci vidas pli klare en tiu ĉi momento ol mi. Ĉu ci havas ian ideon?

— Ne! ... Tamen ne ektimu! ... Kioma horo?

— Trikvaronoj post la tria, — respondis la urbestro tiel lamente, ke eĉ li mem miris pri sia malespero. — Ne iru for! Ĉu ci havas ion por aranĝi?

— Jes, mi havas ion por aranĝi, sed ĝuste pro tio mi restos ĉe ci. Jes, mi aranĝos tion en cia loĝejo. Je la kvara ni devos akcepti la viziton de sinjoro. Pardonu min, ke mi invitis lin al cia loĝejo, sed kiel ci scias, ke ĉe mi ok knabinoj...

— Jes, jes... Mi aŭdis, ke du el ili fianĉiniĝis. Mi kore gratulas, kvankam la sintenado de tiu sendanka Stubek vere estas konsterna.

— Kial?

— Nu, estis ja preskaŭ certe, ke li edziĝos kun cia malgranda Lola kaj nun mi estas informita, ke li baldaŭ kondukos al la altaro mian *iaman* ĉambristinon.

— Nu, en tio mi trovas nenion konsternan. Li amas ja ŝin kaj ne mian filinon.

Tiu ĉi trankvilo tre surprizis la urbestron, ĉar la mencion de tiu ĉi geedziĝo li dediĉis por pikado. La fiasko iom incitis lin.

— Kiel? Vere mi miras, ke ci tiel facile prijuĝas la geedziĝon de urba notario kaj iama ĉambristino. Kien tiaj aferoj kondukos nin?

— Ne estu tiel aristokrata, moŝta amiko! Ĉe la kortego nun regas demokrata modo kaj eĉ respublikanojn oni akceptas tie kun granda honoro.

— Ĉu respublikanojn? Kiel ci komprenas?

— Nu, la du amerikanojn. Ĉu ili ne estas respublikanoj? Cetere unu el ili tre amindumas al mia filino Lola. Kio koncernas la konduton de Stubek, mi opinias tion iom romantika kaj kortuŝa. Prezentu al ci, ke iun tagon cia filino konfesos al ci sian amon al Scipo Prikatel.

La urbestro salte leviĝis.

— Kia ideo!... Mi propramane eltordus la kolon!

— Kies kolon? Ĉu tiun de cia filino, aŭ tiun de Scipo Prikatel?

— Memkompreneble, ke tiun de Scipo, de tiu popolvenenanto.

Jonathan Krak ruze ridetis, rigardis la horloĝon.

— Nu, prepariĝu, ĉar post kvin minutoj ci povos efektiviĝi cian deziron. Post kvin minutoj Scipo Prikatel aperos en tiu ĉi ĉambro.

— Kiu??

— Scipo Prikatel, — ripetis kviete sinjoro Krak kaj li sentis sinflatan kontentecon pro la konsterniĝo de la urbestro. — Nu, rigardu, jes rigardu tion ne tiel tragika. Li estos ĉi tie. Ni pritraktados kun li, eble subaĉetos lin kaj morgaŭ li jam predikos laŭ nia gusto.

Kazimiron Jenlafiŝ katenis la trankvilo kaj la nova ideo. Sed nur por momento. Li rememoris pri la antaŭa diro.

— Bone, ni subaĉetos lin, sed kiel tio koncernas mian filinon?

— Ankoraŭ neniel. De tio dependas, kian karakteron havas tiu ĉi viro? Se li estas jam maljuna, nu ĉi okaze ne povas temi pri via filino, escepte, se ŝi volus sin oferi por la afero. Sed se li estas fortika bela junulo, kiel mi aŭdis, nu...

— Ĉu ŝercas ci aŭ serioze parolas?

— Kiel eble plej serioze. Tiajn fanatikajn popolestrojn nur en la plej malofta okazo oni povas sub-

aĉeti per mono. Virino, ĝuste esprime *amo* estas plej necesa. La familio metas seruron sur la lipojn de la grandbuŝuloj.

— Nu, bone, sed kial ĝuste mia sola filino? Kial ne unu el la ciaj? Ci havas ja sufiĉe da ili.

Sinjoro Krak leviĝis, promenadis tien kaj reen antaŭ sia amiko.

— Vere, ci estas tute prava. Kial ne unu el la miaj? Sed, vidu, mi kiel bona amiko pensis, ke per tia geedziĝo pruviĝus, ke la urbestro de Strutmagen estas demokrato ĝis lasta sangguteto. Cetere la marĉando kaj konsento dependas de du personoj. Eble Scipo Prikatel ne volos kaj ĉi okaze ...

— Nu, kaj mia filino?

— Ne tiel malfacile. La knabinoj senescepte estas romantikaj. Mi scias ja, ĉar mi havas ok el ili. Al ili imponas tiaspeca populareco, precipe, se la heroo estas bela junulo... Tamen ci estas tute prava, kial ne unu el la miaj?

La urbestron pripensigis la troa emo de sia amiko. Se tiu ĉi homo tiel facile konsentus pri edziniĝo de unu el siaj filinoj kun la populara populastro, certe io devas kaŝiĝi sub la afero. Jes, ja, li tagmanĝis hieraŭ ĉe la kortego. Preskaŭ malesperigite li kroĉiĝis al la brako de Krak, kiam li ekiris al la pordo.

— Kien ci volas?

— Mi foriros. Ĉe la pordego mi atendos sinjoron Prikatel kaj en mia hejmo ni pritraktados, ĉar mi vidas, ke tiu ĉi vizito malagrable tuŝas cin. Mi petas pardonon, sed mi celis cian intereson.

— Sed kiel ci pensas? Finfine ci invitis lin ĉi tien kaj impresus strange, se nun... Nu, prezentu al ci, kion li pensus pri mi?

— Nu, tion, ke ci estas tro konzervativa, eĉ reacia. Mi pensas, ke tio ne multe utilis por ci ĉe la kortego, kiam eĉ la registraro ne deziras miksiĝi en la aferon de tiu ĉi Prikatel.

— Mi petas, restu!

— Kiel ci deziras . . . Sed pri tiu umo . . . pri tiu . . . kiel mi esprimu . . . pri tiu eventuala edziniĝo . . . Mi nur ŝercis! Sciu, mi havas ja kelkfoje tiajn petolajn ideojn. Promesu, ke ci ne parolos pri tio! Precipe ne al cia filino . . .

— Nu, kompreneble! Eĉ nebezone promesi. Mi sciis ja, ke nur petolajo estis de cia flanko. Sed nun pardonu momenton, mi devos lasi cin sola. Al mia ĉambristo mi donos kelkajn ordonojn. Certe tiaj popolestroj ŝatas la bonan konjakon, ĉu ne?

Sinjoro Jenlafiŝ ridetis en la animprofundo. Certe li silentos pri la ideo, ĉar per tamburado oni ne kaptas paseron. Tamen li trovos okazon kaj rimedon kapti la fiŝeton for de liaj filinoj. Nu, tiam li denove firme sidos en la selo antaŭ la kortego.

Jonathan Krak konsente kapjesis, duonokule rigardis al la tableto, sur kiu proponis sin plena botelo da konjako. Ne kun la ĉambristo, sed kun sia filino li volas paroli. Bonege! Tio neespereble bone sukcesis. Dum la tuta nokto li cerbumadis pri tio. Certe lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord estos kontenta pri li. Kaj fine el tio ĉi povas deveni diversaj bonaĵoj. Se la demokrata manio daŭre tenos sin ĉe la kortego, ankaŭ la urbestron, ankaŭ la kortegon li stimulis por si je favora humoro. Se la kortego denove rigidiĝos, al la urbestra seĝo li havos plej grandan ŝancon. Ne! Sinjoro Krak ne estis enviema, sed ankaŭ escepto li *ne* estis. La unua sukceso faris al li apetiton, tamen perkubute luktadi por tiu mizera seĝo li ne volas, tion li decidis en si. Nun estas demando, kia viro estas tiu ĉi Prikatel? Hieraŭ li alvenis en la urbon, pasigis la nokton en la lastranga veturigista hotelo, sed tamen hodiaŭ li vizitis la ministerion de la Internaj Aferoj por anonci sin je la morgaŭa reĝa aŭdienco. Li ne estas ja malkuraĝa, tion oni devas konfesi.

Ekstere akra sonorado. La urbestro rapidis en la ĉambron.

— Jen li. La servisto nun malfermas la pordon por li... Kion mi diru al li?

— Provizore nenion. Lasu min paroli! Mi estis ja la invitinto. Persone mi serĉis lin antaŭtagmeze en la hotelo »Nigra Bovo«, sed mi ne havis bonŝancon.

— Nu, bone, bone, sed kiel eble singarde, mi petas ĉin.

— Ĉi ja konas min, — respondis kun fiera sinteno sinjoro Krak.

La pordo large malfermiĝis kaj la servisto anoncis, ke iu simplulo volas paroli kun la altestimata moŝto.

— Ĉu li ne diris sian nomon?

— Ne. Li diris, ke vi jam atendas lin. Mi opinias lin kamparano.

— Tute mi ne estas scivola pri via opinio. Enkonduku tiun sinjoron kun deca respekto.

La kolerema tono de Kazimiro Jenlafiŝ iom amuzis la ĉefnotarion.

— Bonvolu eniri, sinjoro, la sinjora moŝto atendas vin, — sonis ekstere la voĉo de la servisto.

Scipo Prikatel, vestita en simpla nacia kostumo el kamparana ŝtofo, tenante sian peltĉapon en la mano aperis sur la sojlo. Lia sinteno imponis kiel tiu de disciplinita soldato. Perkape li salutis, ne tre humile, eble eĉ respektopostule.

— Scipo Prikatel... Ĉu vi deziras ion de mi, sinjoroj?

Eĉ la vorto haltis en la gorgo de la urbestro je tia impona apero. Neniam li vidis tian kamparanon. Lian altan frunton, kvazaŭ en arta aranĝo bele kadrumis la densaj noktonigraj bukloj. La maldikaj lipharoj, zorge formita barbo donis aspekton iom severan, sed tion forgesigis la du veluraj, profunde bluaj okuloj. Liaj manoj, kvankam sunbrunigitaj, tamen ŝajnis kutimiĝintaj pli al delikata laboro ol al falĉado kaj

plugado. Jes, li estas ja oratoro, kutimis verkadi. Liaj botoj, brile ciritaj, montris mirinde gracian piedformon. Nu, se li razus tiun barbon, certe li aspektus akceptebla bofilo.

Sinjoro Krak ne longe havis tempon revadi pri la figuro de la juna popolestro, ĉar iu decis respondi pri la demando. Li prezentis la urbestron kaj poste ankaŭ sin.

— Bonvolu eksidi, — daŭrigis sinjoro Krak. — Mi ne miras, ke tuj post via prezento vi demandis la kaŭzon de la invito. Mi konfesas, ke vi embarasis min per tio. Ĉe ni, en *nia* medio, unue oni faras demandojn pri la farto, poste pri la vetero, pri la familiaj aferoj, do, oni lasas tempon por pripensi la komencon... Ne ridetu, mia sincereco povas vekti nur fidon en vi. Tiun ĉi renkontiĝon mi deziris. La sinjoro urbestra moŝto tuj perceptis ties gravecon kaj kun ĝojo donis sian hejmon je nia dispono. Nun ni ambaŭ ĝuas lian gastamecon.

Scipo Prikatel facile riverencis perkape al la urbestro. Post ioma pripenso Krak daŭrigis :

— Mi ne povas nei, ke via agado vekis en mi certan interesiĝon. Ni priesploris viajn vortojn, studis viajn argumentojn tiomgrade, kiom tion ebligis la ne tre fidindaj raportoj de la ĵurnaloj kaj tamen ni konsideris tute konsilinde ne retiri nin definitive de eventualaj pritraktoj kun vi por trovi seriozan bazon je la reviziado de nia projekto kaj de niaj principoj en la afero pri la heredaĵo... Vi denove ridetas? Jes, mi komprenas. Certe tion ĉi vi estus espriminta pli koncize, sed ne forgesu, ke mi verkas jam pli ol dudek kvin jarojn ne oratorojn, sed artifikajn dokumentojn pri kontraktoj, geedziĝoj ktp... Krome mi havas ok filinojn kaj ofte oni estas devigataj paroli iom diplomate kun la virina popolo, se... Nu!

Scipo Prikatel eĉ kontraŭvole ekridis. En la parolmaniero de la ĉefnotario estis tiom da naiveco, kiu faris la maljunulon eĉ ĉarma en la momento. Ankaŭ

sinjoro Jenlafiŝ faciligite ekĝemis kaj kontente konstatis, ke lia amiko estas eminenta komedianto, ŝmirita per ĉiaspeca oleo. Li do rapidis utiligi la favoran humoron.

— Ĉu vi deziras glaseton da konjako? Vera franca marko!

— Dankon, mi ne kutimas konsumi alkoholaĵon.

— Kiel? Ĉu vi ne kutimas? — La urbestro miradis. — Sed kiel do vi povas tiam superkriadi tiujn brandgorgaĵajn kamparanojn?

— Ne bezone superkriegi ilin. Ili parolas mallaŭte, plende, kiel tiuj, kies vivo dronas en doloroj.

— Ĉu vi estas respublikano?

— La ŝtatformon mi neglektas. La bonfarto de la popolo estas grava kaj ne la nomo de la reĝimo. Multe mi vojaĝis kaj vidis, ke la monarkio ne estas certa malhelpo por la ĝenerala libereco kaj prospero, kiel la respubliko ne estas nepra garantianto de tiuj.

— Hm, hm, jes, . . . la popolo . . . certe, — kaj la urbestro signifplene tusadis. — Nu, diru do, kiel ni estas *kun tiu popolo*?

— Kiel mi komprenu la demandon de la sinjoro urbestro? — demandis Scipo Prikatel iom ofendite de la tono, sed la maniero de la demando montris disciplinan edukitecon.

Krak instinkte sentis, ke lia moŝta amiko uzis iomete tro demokratian tonon, li do klopodis korekti la eraron.

— Lia urbestra moŝto tiel opinias, ke estus plej racie, se vi bonvolus skizi en grandaj trajtoj la logikan bazon de via politika pripenso koncerne la popolbonfarton. Finfine ni ĉiuj ja apartenas al la popolo kaj almenaŭ mi pensas, ke la intereso de la popolo kaj la nacio povas esti nur unu: *la bonfarto*. Ĝuste pro tio ni restu ĉe la bonfarto, kiun bezonas la popolo, alivorte la nacio, pli precize, ni ĉiuj.

Scipo Prikatel momenton pripensis, poste li turnis

sin rekte al la ĉefnotario, tute neglektante la ĉeeston de la urbestro.

— Vi ĉiuj manipulas tiun ĉi aferon pri la heredaĵo, kvazaŭ ĝi estus ne la afero de landa ĉefurbo, sed tiu de intima tablosocieto.

— Kia malica suspektigo? — indignite rimarkis la urbestro.

— Mi petas vin, ne interrompu! Mi ne havas multe da tempo. Eble en ĉiu minuto povas alveni la sciigo de la ministerio pri la petita aŭdienco ĉe Lia Reĝa Moŝto.

— Ĉe lia Re-ĝa Moŝ-to? ! Kaj ĉu vi pensas, ke Lia Reĝa Moŝto bonvolos akcepti vin?

— Jes, mi tiel opinias, ke li akceptos min, ĉar li devos akcepti min. Samkiel ankaŭ vi devos akcepti tion, kion mi diktos...

— Diiiktoos? Nu, ne tiel certe! Fine estas ankoraŭ polico, kiu...

— Mi komprenas vian timon, sinjoro urbestro. Vi promesis tro multon al viaj amikoj, ligis vian vorton al bone melkeblaj akciaj societoj, aprobis projektojn, kiuj eĉ de malproksime ne tuŝas la ĝeneralan bonfarton, prosperon. En la plej bona kazo, ili servas por la komforto de la ĉefurbanoj kontraŭ kontanto... Ne interrompu, mi petas! La sinjoro ĉefnotario tre ĝuste rimarkis, ke la popolo kaj la nacio estas samaj. Permesu, ke ankaŭ mi diru ion! Se la ĉefurbo de nia malgranda lando efektivigos tiujn ĉi projektojn, per tio ĝi elŝiros sin el la korpo de la nacio, akiros tian aŭtonomion, kiu apartigos ĝin por ĉiam de ĉiuj aliaj urboj de la lando. Se ni estus granda, potenca nacio, eble tio estus permesebla, ĉar tie eĉ tiom granda heredaĵo signifus guton en la maro. Sed ni estas tre sensignifaj en la maro de ŝtatoj. La loĝantaro de tuta Bagonio apenaŭ atingas la 838 milojn kaj el tiu nombro 60 mil apartenas al Strutmagen. Ni havas ankoraŭ kvin pli evoluintajn urbetojn, el kiuj la plej vigla, plej prosperanta havas 31 mil loĝantojn.

La lando ne estas riĉa, la popolo de la vilaĝoj pagas per laborŝvito por ĉiu peceto da pano. La kulturo ne tre fierinda, la ekonomia bilanco estas ja priplorinda... Mi ne volas nun mencii tiujn vundojn, kiuj kovras la korpon de la ŝtato. Tion ja scias ĉiu, nur paroli ne kuraĝas. Korupto nestas en la oficejoj kaj ĉiu sinjore vestita volas sin senlabore nutri per la ŝtata kaso. Sinjoroj, mia animo ploras. Ni agu kune, konsente ĝis ne malfrue! La popolo silentas, sed tiu ĉi silento entenas la danĝerojn de la revolucio kaj plena anarĥio.

— Kaj vi klopodas malfermi la buŝon de la popolo — interdiris ironie la urbestro. — Ŝajne vi deziras fiŝkaptadi en la malklara akvo. Ni havis jam aferon kun tiaj bone salajritaj revolucianoj.

La okuloj de Scipo Prikatel fulme ekbrilis kaj la koro de la urbestro ektemis pro tio. Krak rapidis interveni por malhelpi la erupcion.

— Tre estimata sinjoro, mi devas konfesi, ke la antaŭe diritaj jam ofte... ofte... umis... kiel mi diru?... ofte okupis nin kaj... nun ni tre dezirus koni tiujn efektivajn proponojn, kiuj koncernas la pritraktatan aferon... jes... tion mi volis iamaniere komuniki al vi.

Scipo Prikatel ekstaris pala pro la retenita paroksismo. Evidente li bezonis grandan sinregadon por konduti sin dece. Li klinis sin al sinjoro Krak kaj estis forironta, sed la ĉefnotario baris lian vojon. Ankaŭ Kazimiro Jenlafiŝ sentis sian mallertajon. Ofte okazis ja tiel. Li tute ne povis konservi dignon kontraŭ tiuj opoziciuloj. Sed tamen nun ne foriru tiu ĉi homo! Lia filino ja baldaŭ venos kaj kun virina takto ŝi malakrigos la konsekvencojn de lia erara taktiko.

— Ne foriru, mi petas, — komencis Krak preskaŭ petegante. — La sinjoro urbestro ne volis ja ofendi vin, sed facile kompreneble, ke dum la lastaj tagoj tiom da personoj torturis lin per ideoj pri la heredaĵo, ke li iom nervoziĝis... Mi petas, restu!

— Se la nervoj de la sinjoro urbestro ne rezistas la objektivan kritikon, eble estus plej bone, se tuj li abdikus... Cetere, tio estas lia afero. Miaparte mi finis la pritraktadon. Adiaŭ, sinjoroj!

— Sinjoro Scipo Prikatel, — komencis Krak la interpacigon tre singarde — ŝajnas al mi, ke vi forgesas, ke hodiaŭ ĉi tie... kiel mi diru?... Jes, ni estas scivolaj pri viaj proponoj, pli precize, pri tiuj de via partio. Pardonu mian sincerecon, sed mi pensas, ke estus plej oportune marŝi sur bone kaj ofte paŝita vojo. Unue propono kaj poste motivado. Vi motivadis unue kaj mi verŝajne ne eraras asertante, ke la senpropona motivado povas rezulti nur *tiajn* bedaŭrindajn momentojn... Estas malproksime de mi ĉia ofenda intenco, sed mi opinias, ke via idealismo nur tiam povos utili al la popolo, se ĝi paralele, aŭ unuiginte kun la necesa persisto batalos por la intereso, prezentata de vi. Unue propono, poste motivado kaj la vundoj, ricevitaĵ en la batalo ne gravas. La venko gravas. Ankaŭ mi dum dudekdu jaroj ricevadis la vundojn ĝis la venko... sed tio tute ne apartenas al tiu ĉi afero.

Scipo Prikatel surprizite aŭskultis la vortojn de la ĉefnotario. Li diris tiajn verojn, je kiuj li devis ekatenti. Tiu ĉi griza vireto estas lia amiko, aŭ almenaŭ volas esti bonintenca aŭskultanto de tiu afero, kies majesteco plene katenis lin al si.

— Dankon por viaj vortoj, sinjoro. Vi estas prava... Konfesu sincere, ĉu vi deziras mian venkon? Ĉu amiko aŭ malamiko vi estas?

Sinjoron Krak embarasis la rekta demando. Li rigardis al la vizaĝo de la urbestro. Ĝi alterne montris ĉiujn nuancojn de la ruĝa koloro. Jes, la urbestro admiris, enviis la taktecon de sia amiko kaj cerbumadis pri la personeco de tiu ĉi popolestro, kies potenco dum nekredeble mallonga tempo, dum tri semajnoj minace kreskis. Eĉ la ekscelenca moŝto la ministro retiris sian dekreton kontraŭ li. Sendube oni timas lin.

Kiu estas tiu ĉi homo? Ĉu sinjora kamparano aŭ kamparana sinjoro? Vere estis malsaĝe tiel perdi la ekvilibron!

— Vi silentas? Ĉu vi ne deziras respondi rekte?

Sur la frunto de la ĉefnotario aperis la karakterizaj ŝvitperloj.

— Sed jes... nur... ume... umo... nu, kiel mi diru?... Via demando tre embarasis min. Vidu, mi estas tute sincera. La sincereco estas la plej bona atuto, kiam okazas parolo pri mondperceptoj diferencaj. Mi estas nur simpla urba ĉefnotario, akceptinta la rolon de peranto, mi devas do konservi mian objektiveton, tiom pli, ĉar mia edz... Ne, tio ne apartenas al la afero. Mi konfesas, ke mi vere ĝojus, se ĉi tie ne estus parolo pri venko, nek pri malvenko. En la koro de la venkito loĝas amareco, kaj la venkinton ofte torturas konscienciproĉoj. Ankaŭ min ofte turmentas, kial ni ne kune forportis tiun lavujon da akvo...

— Kiun lavujon da akvo? — demandis iom mire Scipo Prikatel.

Jonathan Krak ruĝiĝis kiel la infano. Jen, denove li aludadis pri hejmaj bagatelaĵoj. Kion fari? El tiu ĉi akvo li nepre devas elnaĝi tute seka por ne perdisian dignon.

— Nur junaga memoro... ia umo... ia memoro pri venko. Mi volis diri, ke la venko nur ŝanĝas la rolojn, sed ne alportas kontentecon. Via venko humiligus la burĝan klason, kaj la malvenko de la sinjoro urbestro signifus la suvereniĝon de nova klaso. Sed en la popolo enestas ja kamparano, burĝo kaj sinjoro, ĉar ilia tuteco formas la nacion. En la nacio, kie regas kontenteco, ne estas venkinto, nek venkito, nur *konvinkito*. Nu, tion mi volis diri... Dank' al Dio!

Krak ekspiris pli libere, viŝis la ŝviton de la frunto, momenton eĉ li miris, ke tiel facile li sukcesis elnaĝi. La pensoj venis ja spontanee. Eble, li ne konsciis pri la helpo de sia sincereco.

Ankaŭ la urbestro opiniis la momenton ĝusta por peti pardonon sen humiliĝo.

— Kion la kortegana konsilanta moŝto diris, tio estas subskribita ankaŭ de mi. Bonvolu rezidiĝi kaj estu certa, ke mi atente finaŭskultos vin.

Scipo Prikatel eksidis, parolis, faris siajn proponojn, kiuj celis la tripartigon de la heredaĵo. La unua parto estu certigita por la profitdonaj entreprenoj de la ĉefurbo, la dua por la prosperigo de la provincaj urboj, la tria kaj plej alta sumo por konstruado de hospitaloj, lernejoj, por subvenciado de kultur-societoj, por investado de agrikulturaj maŝinoj, asignado de senrentumaj pruntoj por domkonstruado k. t. p. . . . La juna homo parolis, parolis. Liaj okuloj brilis entuziasme kaj lia voĉo verve altiĝis en ne serĉita patoso. Argumenton post argumento li amisigis kaj tutanime klopodis konvinki siajn aŭskultantojn.

La urbestro vidis disflui la grandan heredaĵon. Li ne interrompis, sed decidis: okazu kio ajn, li ne lasos sin flankenigi de la originala projekto. La aprobaj kapbalancoj de Krak ankaŭ tre incitis lin. Jen, tiu ĉi homo eble eĉ konsentas. Nu, bone, se necesas la batalo, certe li batalos. La kamparano per oratorajoj kaj li mem per potenco kaj subaĉeto. Nedubeble, kiu estos la venkinto.

Scipo Prikatel finis kaj atendis respondon. La urbestro deziris eviti pluan diskutadon kaj singarde formis la frazon.

— Kun granda interesiĝo mi aŭskultis viajn proponojn kaj konsiderinte ĉion mi prezentos ilin por debato al la Konsilantaro. Espereble vi estas kontenta?

Scipo Prikatel konfirmis la respondon per kapbalanco, sed lia mieno montris suspekton kaj dubon. Sinjoro Krak sentis la bezonon de alparolo.

— Sinjoro, ĉio, kion vi diris tute ne surprizis, sed plie kortuŝis min. En viaj parolo kaj proponoj estas la juneca fajro, la malproksima celdifino kaj

senlima optimismo de la junularo. Jes. Mi estas jam sufiĉe maljuna por ke vi ne konsideru miajn vortojn ofendaj. Ĉio enestis en tiuj proponoj, nur unu mankiis: la dezirata vivsperto. Tio ĉi ne estas eraro de via flanko... tio estas... nu, kiel mi esprimu? ... Jes, tio estas admirinda por ni. Jes, ni konatiĝis per la prezentitaj proponoj kaj argumentoj kun revomondo de idealisto kaj mi tre ĝojas, ke la urbestra moŝto havas identan opinion kun mi... Almenaŭ mi tion pensas. Ni serioze konsideros viajn proponojn kaj se ne centprocente, sed ĝis certa grado ankaŭ ni akceptos ilin...

— Memkompreneble, — deklaris tro laŭte la urbestro kaj leviĝis por evidentigi, ke li ne deziras daŭrigi la diskuton. — Ĝustatempe ni sciigos vin, (Nur havu paciencon atendi, li pensis.) kaj la rezulto estos kontentiga.

Scipo Prikatel eksentis la malsincerecon de la voĉo, leviĝis kaj kun ĝentila riverenco adiaŭis. Ĉe la pordo li renkontis la enrapidantan filinon de la urbestro. Barante la vojon ŝi haltis sur la sojlo kaj etendis leteron al la fremdulo.

— Mi pensas, sinjoro, ke tio koncernas vin. Antaŭ minuto mi transprenis ĝin de servisto kaj, pardonu min, sed la konfirman subskribon pri la transpreno mi falsigis. Mi ne volis, ke vi estu malhelpataj en la diskutado.

— Koran dankon, fraŭlino. Se permesate, mi prezentas min: Scipo Prikatel.

— Mia filino, — duonvoĉe, iom ĉagrenite murmuris la urbestro.

— Ho, mi tre bone konas vian nomon. Paĉjo ofte mencias ĝin. Mi konfesas, ke mi imagis vin ne tia.

Scipo Prikatel eĉ kontraŭvole ridetis.

— Ĉu permesate scii, ke via trompiĝo okazis je mia avantaĝo aŭ male?

— Ĉu je via avantaĝo, mi ne scias, sed nun vi plaĉe impresas. — La rigardo de la knabino trafis ŝian patron, kiu nekompreneblajn gestojn, signalojn

faris post la dorso de la fremdulo. — Kion vi deziras, paĉjo? Ĉu mi ĝenas?

La urbestro per malespera gesto montris, ke lia filino ne celtrafis. Scipo Prikatel rimarkis la embarason de la knabino.

— Ho, tute ne, fraŭlina moŝto, mi ja tuj foriros. Mi devas prepari min al la aŭdienco ĉe Lia Reĝa Moŝto... Koran dankon por la transdono de la sciigo. El viaj manoj ĝi antaŭdiras bonan ŝancon.

— Nu, ne tiel certe, — rimarkis iom gale la urbestro. — Ĉu vi estas konvinkita, ke en la palaco vi estos gasto, atendata kun malfermitaj brakoj?

— Vere, vi povas esti prava, — kaj Scipo Prikatel etendis la leteron al la urbestro. — Vi devigus min al danko, se vi, urbestra moŝto, bonvolus sciigi min pri la malfavora sciigo. Kompreneble, nur takte... Nur takte!

La urbestro avide ŝiris la koverton. La kelklinia enhavo tamen ne lasis dubon: »*Lia Reĝa Moŝto bonvolas akcepti en privata aŭdienco Scipon Prikatel, loĝanton de Talger. Horo: atm. 11-a kaj 25 minutoj. Vaga Orel de Pord, reĝa konsilanto.*«

— Nu? — demandis Scipo kaj en lia voĉo vibris la triumfo.

— Mi gratulas... Certe vi havas potencan protektanton ĉe la kortego.

— Jes, vi pravas, urbestra moŝto. Mia protektanto estas nomata: *timo*.

— Nu, la *timo* ne estas fidinda protektanto. La malfermitaj pordoj tre facile povos fermiĝi post vi.

— Remalfermos ilin la justeco de la reĝo... Sed nun mi ne deziras plu ĝeni vin, gesinjoroj. Jes, fraŭlina moŝto, ne kedu ĉion belan kaj bonan, kion via patro rakontos pri mi.

Li klinis la kapon por adiaŭo kaj foriris. Krak enpensiginte rigardis la figurojn de la persa tapiŝo. La knabino mute deziris bonŝancon al la foririnto kaj la urbestro sentis sin tre sola en la silento. Li Haradis,

kiel la pelita hundo en la dezerto, ian danĝeron. Certe estas io en la aero. Sed kio?

— Paĉjo, ĉu vi scias, ke tiu ĉi viro tre plaĉas al mi. . . Brava kaj sincera li estas.

El la urbestro eksplodis la longe retenita kolero.

— La plej impertinenta el tiuj, kiuj iam transpaŝis mian sojlon. Verdire, mi ne tre kutimas amikiĝadi kun tiaj fanatikuloj. . . Tion mi povas danki al ci, Krak. Preskaŭ mi malpaciĝis kun li. Senpaga semgreno, malkara pano, pruntentrepreno de agrikulturaj maŝinoj, senrentuma prunto por domkonstruo kaj biblioteko. Hahaha! Nur tio mankis! Biblioteko! Por kio bezonas la kamparano librojn? Samtempe plugi kaj legi oni ja ne povas. Eĉ tiel havas grandan buŝon la kamparano! Certe Vilhelmo Grauer turnus sin en la ĉerko, se ni elspezus por tiaj celoj liajn milionojn. . . Kaj ci, Krak, ci eĉ aprobe kapjesadis kaj per tio donis ĉevalon sub lin. Nu, li galopadis ja tiel, ke apenaŭ mi povis sekvi lin en la pensoj. KREDU, ke li estas bone pagata liberala dungito! Eble li estas eĉ komunista agitatoro. . . Hospitalo kaj lernejo! Kaj kion ankoraŭ?! Kial ne tuj gotikan rezidejon por ĉiu sterkforkanto?

La knabino laŭte ekridis.

— Kiel bone, ke li avertis min ne kredi ĉion bonan, kion vi rakontos pri li.

— Ne mokadu! Vi similas al via kapricema patrino. . . Kaj. . . kaj li eĉ kuraĝis amindumadi en mia ĉeesto al mia filino! Kaj vi. . . vi. . . Jes, kion vi havis fari en la ĉambro?

— Ĉu ne vi diris, ke mi envenu kaj estu iom afabla al li?

Subite la urbestro rememoris pri sia maljusteco, sed tio eĉ pli incitis lin, precipe antaŭ Krak li hontis la aferon.

— Sed la kaŭzo de ĉio estas ci, Krak! Se tiel ci daŭrigos, mia loĝejo baldaŭ fariĝos traira domo por ĉiu kamparano, malkontenta pri la decidoj

de la Urba Konsilantaro kaj mia filino, edukita en multekostaj eksterlandaj institutoj, estos devigata babile komplimenti kaj manpremadi kun ĉiu kalmana plebestro, kiu donas temon por la ĵurnaloj. Krak, ci perdis cian saĝon, kiam ci invitis al mi tiun ĉi viron. . . Kial ci ne respondas? Ĉu ci mutiĝis? Nu, jes. . . Nun ankaŭ ci vidas, ke tio ĉi ne estis bone farita, ĉu ne?

— Mi petas cin, kara moŝta amiko, trankviliĝu, — komencis Krak kun meditema mieno. — La kolero forprenas de ci la klarvidon. Ne forgesu, ke morgaŭ Lia Reĝa Moŝto akceptos tiun ĉi kamparanon en privata aŭdienco. Dum la tuta tempo de la vizito ci estis tro incitita por rimarki la rimarkendan.

— Kion, kion mi estus devinta rimarki?

— Nur tion, ke tiu ĉi homo nur laŭkostume estas kamparano. . . Mi ne scias kiel okazas tiaj privataj aŭdiencoj, sed multe mi donus, se morgaŭ mi povus subaŭskulti tion. Cetere li estas prava. La ĉefurbo estas nur urbo kaj ne la lando. Sed tiel akre apartigi la intereson de la ĉefurbo de tiu de la lando ne estas prudente. Nu, inter ni estu konfesate, ke tiurilate li havas iom da vero. Kaj la demokratia sfero, reganta nun ĉe la kortego, pravas, ke io odoras en la aero. Mi, en cia posteno, ne kuraĝus tiel akre kontraŭstari la volon de la lando kaj inklinon de la kortego. La ŝtata prokurora oficejo retiris la dekretan kontraŭ Scipo Prikatel. Du kaŭzoj povas motivi tion: unue, pritrakti kun li aŭ due, inside aresti lin. Tio ĉi lasta ŝajnas iom riska, ĉar laŭ la informoj, ricevitaĵoj de la ministerio de Internaj Aferoj, li havas potencon amason post si. La popolo entuziasmas pri li.

Dum la kvieta pripensado de Krak ankaŭ la urbestro admirende mildiĝis. Jes, la kortego kaj la popolo. Tamen estus saĝe inviti tiun homon al posttagmeza teo. Li subite riproĉis sian filinon.

— Kial vi ne venis tuj en la ĉambron?

— Mi venis ja, sed neniu volis rimarki min.

Mi staris tie ĉe la pordo de la salono. Vi ne rigardis al mi. Poste mi retiriĝis por ne malhelpi vin en la pritraktado... sed mi aŭdis ja ĉion.

Sinjoro Krak subpremis altrudiĝantan rideton. La urbestro rigardis al sia filino, ekpromenis.

— Elvira, oni devas bone pripensi la aferon. Mi ne povas ja akcepti kun malfermitaj brakoj ĉiun alveninton... sed, se morgaŭ tiu ĉi... tiu ĉi Prikatel ne estos arestita, pri kio mi certe dubas, nu mi *ne* bedaŭros, se via onklino invitos lin al posttagmeza teo. Ĉu komprenite?

— Jes, paĉjo! — La knabino senbrue fermis la pordon post si, ekiris al la ĉambro de sia onklino, sed ĉe la sojlo ekhaltis. — Eh, kial? Tiu ĉi viro kiel amiko neniam povos ja transpaŝi nian sojlon.

Ŝi ne povis klarigi al si la antaŭsenton, sed ŝia koro tamen ekdoloris pro io.

XIII.

La postan tagon antaŭtagmeze je la dekunua horo Scipo Prikatel aperis en la reĝa palaco. En la kancelario de la kortego oni transprenis de li liajn dokumentojn, traserĉis lin kaj akompanis supren al la aŭdiencia ĉambreto.

Scipo Prikatel indifere pasis tra la lukse ornamitaj ĉambroj, koridoroj. Nenio interesis lin. Li profundigis en la pensoj kaj apenaŭ rimarkis, kiam li estis haltigita antaŭ la pordo de la aŭdiencejo. Li rigardis al la horloĝo, pendanta super la pordo. Ankoraŭ kvin minutojn li havas por bone pripensadi. Dum la tuta nokto li batalis kun siaj sentoj. Lia decido estis firma, neŝancelebla, tamen lia koro tremetis pensante pri la aŭdienco. Certe li kaŭzos doloron al Lia Reĝa Moŝto, sed eble li sukcesos komprenigi al li, ke la elektita vojo estas la sola kaj honesta... Ankoraŭ du minutoj. Lia rigardo karese ripozis sur la blankaj haroj de la maljuna lakeo.

En la kadro de la pordo aperis la adjutanto.

— Vi estas Scipo Prikatel, ĉu ne?

Kapjese li respondis.

— Ĉu li estas traserĉita? — li turnis sin al la lakeo.

— Jes. Ĉio en ordo. Bonvolu transpreni liajn dokumentojn!

La blankhara lakeo transdonis la dokumentojn al la adjutanto, kiu momente trarigardis ilin, poste donis instrukciojn al la aŭdiencpetinto.

— Post la malfermo de la pordo vi enpaŝos, faros kvar paŝojn antaŭen, tie turnos vin maldekstren al Lia Reĝa Moŝto, sidanta ĉe la skribotablo. Profunde riverencante vi prezentos la nomon kun deca humilo. Dum la tempo de la aŭdienco vi ne povos paŝi pli proksimen. Paroltono estu modera kaj respektoplena! Ĉu vi komprenis min?

Scipo Prikatel jesis nur per la kapo. De kiam li venis en la palacon eĉ unu vorto ne forlasis liajn lipojn. La montrilo saltis al la lasta minuto kaj la adjutanto malfermis la pordon soldate raportante:

— Scipo Prikatel, loĝanto de Talger, kun humilo de regato aperis por la aŭdienco ĉe Via Reĝa Moŝto. Li petas favoran akcepton.

Xaver Nepaul VI. sidis ĉe la skribotablo, pergeste donis permeson por la eniro. Prikatel laŭ la ricevitaĵ instruicioj aperis antaŭ la reĝo.

— Scipo Prikatel, loĝanto de Talger, kun humilo de regato, petas favoran priaŭskulton ĉe Via Reĝa Moŝto — li diris soldatone, sed lia voĉo iom vibris.

La maljuna reĝo kun rigida disciplinita mieno rigardis al la fama popolestro. La adjutanto metis la dokumentojn sur la skribotablon kaj en streĉa gardopozo li lokis sin proksime al la reĝo.

— Holbrom, mi ne bezonas vin. Sola mi volas paroli kun tiu ĉi homo. Zorgu, ke neniu ĝenu nin!

— Laŭ ordono, Via Reĝa Moŝto.

La pordo fermiĝis. La reĝo kaj la popolestro longe senvorte rigardis unu la alian. En la mieno de la reĝo respeguliĝis riproĉo, en tiu de la popolestro — kortuŝiĝo. La reĝo leviĝis, paŝis al la popolestro kaj etendis la manon por premo. Scipo Prikatel klinis sin al la mano kaj kisis ĝin.

— Mi devus koleri vin, filo mia. Vi transiris la priparolitan limon. Kompreneble, via juneco senkulpigas vin.

— Patro, pardonu min, sed...

— Nu, ne estas tiel tragike. Ankoraŭ ĉion oni povas reordigi. Jen, la unuan fojon Vaga Orel de Pord eraris pri sia kalkulo. Ankaŭ li estas homo kaj povas erari.

— Jes, patro, ankaŭ li estas homo kaj povas erari. Ankaŭ mi eraris.

— Ne kulpigu *nur* vin. Tre konsciencie vi volis plenumi la ordonon, donitan al vi, sed bedaŭrinde kun troa entuziasmo.

— Vi ne komprenis min, patro. Ankaŭ mi eraris. Antaŭ kvar semajnoj, kiam lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord vizitis min en Parizo por interrompi miajn universitatajn studojn kaj doni instrukciojn por la rehejmiĝo, tiam mi ne konsciis pri mia tasko. Li diris, ke la intereso de la dinastio dependas de la sukceso. Mia tasko estis sub pseŭdonimo Scipo Prikatel kaŝi min inter la simpluloj kaj agitadi, minaci la magistraton de la ĉefurbo, poste laŭ difinita tempo ataki kun dungitoj la ĉefurbon kaj la elektitojn de Vaga Orel de Pord levi en la potencon, kiuj la donon de la heredaĵo kiel donacon de la regatoj prezentos al la dinastio. Tre plaĉis al mi la ŝerca aventuro, la multpromesa petolaĵo kaj senhezite mi akceptis la komision, tiom pli, ĉar lia ekscelenca moŝto venis al mi en *via* nomo. La deziro de la patro povas esti nur ordono por la filo. Tiel mi pensis. Nur tiam mi sentis la rolon aĉa, malhonoriga, kiam la unuan fojon mi rigardis al la okuloj; al la vera vizaĝo de la popolo. Patro, mi sentis tiam, ke vi faris min fripono, misuzis la facilanimecon de mia junaĝo...

— Oliver, vi forgesas pri la respektodevo kaj ŝajnas forgesi, kiun vi vidas antaŭ vi.

— Ne, mi ne forgesis pri tio, patro, sed pro la doloro mi ekveis. Mi scias, ke krom la mono ankaŭ alia celo instigis lian ekscelencan moŝton por organizi ĉiun ĉi pseŭdoribelon. Li timis, kaj tute rajte li timis, se ne estiĝos tia ribelo, gvidata kaj kontrolata de la

ŝtataj funkciuloj, eksplodos *vera* revolucio, kiun subpremi estos multe pli malfacile.

— Jes, tio estis la ĉefa celo.

— Verŝajne tion oni mensogis al vi, patro... Ne konsterniĝu pro miaj vortoj! Tiu ĉi palaco estas la edeno de la mensogoj. Estas jam tempo, ke iu diru al vi la verojn, kiujn oni zorge kaŝas de vi. Vi, patro, ankoraŭ kredas, ke vi regas la popolon laŭ la ĉiela favoro de la Dio, sed sciu, sole al la toleremo de la Popolo vi povas danki, ke ni ĉiuj ne estas senhejmaj vagantoj. La epoko de regantoj jam pasis kaj nun sekvas la epoko de la *guidantoj*. La racio kaj la koro regos en la estonteco la popolojn kaj ne la ore brodita trenaĵo kaj brila krono.

— Silentu! Mi malpermesas kaj refutas tiajn parolojn!... Mi ne rekonas vin. Tiel vi deklamas ĉi tie, kiel demagogo staranta sur barelo. Rememoru pri la loko, kie vi staras kaj pri la persono, al kiu vi direktas viajn vortojn! Mi ne povas toleri tiun ĉi tonon!

La filo klinis sian kapon, longe silentis. La pasinto kaj la estanteco batalis en li. Subite kun spito li levis la kapon kaj rigardis rekte al okuloj de la reĝo.

— Patro, hieraŭ ankaŭ mi tiel konsterniĝis por momento, kiam iu ĵetis rekte al mi, ke mi estas bone salajrita dungito.

— Kiu kuraĝis diri tion?

— Ne gravas la persono. Nur pro tio mi ne prenis kontentigon por mi, ĉar tiu homo estis prava... Vi dungis ja min por tiu ĉi komedio. Ankaŭ mi estus ricevinta mian parton el la heredaĵo. Ho, kiel mi hontas, patro!... Nun mi petegas humile, kun fila amo, kun anima sindono, aŭskultu min! Venu kun mi por momento en tiun mondon, kien vi sendis min! Lasu for tiun ĉi sferon, kie la freŝecon de la aero oni venenas per parfumodoro! Permesu, ke mi rakontu pri la tri semajnoj pasigitaj inter la popolo. Pensu, ke mi fabelas, kiel la mezepokaj kortegaj histrionoj. Tiam

la kortego estis simile mensoga kiel nun, sed unu ĉiam havis la privilegion diri al veron, kaj tiu estis la histriono de la reĝo, ĉar neniu konsideris lin saĝa. Sed kedu, patro, ke *ne unu* reĝo povas danki la epiteton »*la saĝulo*« al tio, ke li pripensis la parolojn de sia histriono. Permesu, ke mi, via plej juna filo, hodiaŭ prezentu min via humila histriono.

La voĉo de la filo ĉirkaŭprenis la koron de la patro. La plej juna filo. Li rememoris pri la unuajnaskito, la kronprinco, kiu eble nun estas vestata de ses lakeoj, ĉar baldaŭ li faros promenveturon tra la urbo. La reĝo rigardis sian plej junan filon. La barbo kaj la lipharoj, la kamparanodora vestaĵo kiel aliigis lin ekstere kaj interne. Tamen li estas lia filo. La karmemora edzino amis ĉiam plej dorlote tiun plej junan. Li estis vigla, lernema, sentema kaj cerbumadis pri petolajoj, sed tamen neniam li povis severe puni lin, nek serioze koleri je li. Ĉu nun li koleras je li? Ne, li nur hontas kontraŭrigardi lin, ĉar hodiaŭ la plej juna filo intencas diri al li la veron.

La reĝo residiĝis al la skribotablo kaj kiam levis sian rigardon, en tiu ridetis amo, pardono, eble eĉ kompreno. Kiu scias?

— Parolu, mi aŭskultos!

— Koran dankon, Via Reĝa Moŝto... Nu, por daŭrigi la fabelon, la reĝido prenis sur la ŝultron la sakon da oro, kiun la...

— Kiel? Ĉu vi volas fabeladi? — kaj li surprizite rigardis al sia filo.

— Jes. En fabelo mi rakontos al vi la realecon. Pli oportune. Ankaŭ la mezepokaj histrionoj faris same... La reĝido ekiris do. Lian ŝultron peze premis la sako da oro. Nu, nelonge, li pensis, ĉar oni donis ĝin por disdonado, mi devos aĉeti por ĝi buŝojn, tiom forte kriegantajn, ke la gardistoj de la ora monto forkuru pro teruro kaj la servistoj de la reĝo povu facile transporti la trezorojn en la reĝan trezorejon... Tri semajnoj vagadis la reĝido. Ĉiutage en alia vilaĝo.

Oni ne rekonis lin pro la almozula vestaĵo kaj kiel senhavan junulon oni akceptis lin kun sincera gastameco en ĉiu domo. Sed jam ĉe la unua vilaĝo, dum la unua nokto okazis io neatendita. Li havis kuŝejon en kabano pajlotegita. Jes, jes. Ses malsataj idoj kaŭradis sur la argilplanko. Platbrusta, frue maljuniĝinta virino sur la benko kaj sulkfrunta kamparano, kurbdorsa pro la laboro, dividis sian lastan pantranĉaĵon kun li. Nu, la sako da oro malfermiĝis, sed la reĝido forgesis aĉeti la buŝon de la malriĉulo. La koron li aĉetis de li... La reĝido rigardis en la mizeran aĉetitan koron kaj teruriĝis pro la vido. Diru homo, li demandis do, ĉu la koro de ĉiu malriĉulo estas tiel sange vundita kiel la via? Jes, certe, respondis la mizera homo. Kaj kiu tiel tranĉe taŭzas la korojn? — demandis la reĝido. La mizero, respondis li, rigardu, bonkora fremdulo tiujn ses malsatajn buŝetojn! Se ili petas panon, la peto akre ektranĉas la koron. Se ili plendas, ĉar doloras io, denove freŝa vundo, ĉar mankas al ni por kuracilo. Se per sangvoma ĝemo ili elsputas la animon, nu, fine ili ne plu suferas, sed en nia koro restas ĝistomba doloro... La reĝido miris, metis la koron en la sakon kaj la postan tagon ekprenis la plugilon de la malriĉulo por provi la plugadon. Apenaŭ du sulkojn li faris kun la jungita sesinfana patrino kaj sur la frunto de la reĝido aperis akveroj. Li demandis do, diru al mi, malriĉa homo, kio estas tio ĉi? Svito, li respondis. Pro kio? Per tio ni pagas al la terpatrino por la peceto da pano, kiun oni forprenas de ni. Kiu? La sinjoroj. Kaj kion ili donas rekompence? Zorgon kaj ĉagrenon... La reĝido enpenŝiĝis. Ĉu ne estus pli bone doni el la trezoroj de la ora monto por peceto da pano al tiu ĉi mizera homo ol porti ĉion en la trezorejon de la reĝo por ŝtopi la sakojn? Nu, aŭdu, malriĉa homo, ne por tio estas la virino, ke ŝi tiradu la plugilon, diris la reĝido, mi donos al vi baldaŭ tian plugilon, kiu per si mem plugos senpage la agron de

ĉiu malriĉa homo... La reĝido iris plu kaj ĉiutage alia vilaĝo, alia mieno de la mizero. Malpleniĝis, pleniĝis la sako sur la ŝultro. Konsumiĝis la oro kaj amasiĝis la sangantaj koroj. La sako pleniĝis je salaj larmoj, bagatelaj deziroj de la malriĉuloj. La reĝido iom post iom promese disdonadis la tutan trezoron de la ora monto por ĉiaspeca bezonaĵo de la malriĉuloj. Foje li rimarkis, ke lia oro tute konsumiĝis kaj tamen la koroj pli kaj plimultiĝas. Tiam li konsciis, ke ne per oro li aĉetis la korojn, sed per la amo, kompato, helpdeziro, kiujn li tute sincere montris al la mizeruloj. Li elprenis la segilon kaj hakilon el la manoj de la ĉarpentisto por ekscii kial ties dorso kurbigigas antaŭtempe. Li ĉekanadis kun la ministro por ekscii kial ties brusto stertore fajfetas kaj kial ties okuloj blindiĝas kaj li sidis al la teksilo por vidi kial sputas sangon la palvizaĝa printempo. Li manĝis branpanon kaj putran brasikon, kiujn la humiligitoj kun sincera pio dankas al Dio, kiun eble eĉ ne atingas la larma preĝo kaj poste kun tre peza, troŝargita animo li revenis por raporti al sia reĝa patro... Apenaŭ li atingis la urbon iu haltigis lin. He, aŭdu kamparano, neeble transiri la placon, — vulgara voĉo kriis al li. Kial ne? Ĉar Lia Reĝa Moŝto je la dua horo promenveturos en tiu ĉi direkto. Nu, bone, mi ne volas ja atenci kontraŭ li, diris la reĝido, cetere nun estas ankoraŭ tagmezo, la reĝo venos post du horoj kaj mi bezonas nur kvin minutojn por transiro. Neeble, stulta bruto, — kriis la viro de la potenco... La reĝido ĉirkaŭiris la duonurbon por transiri la placon, vidis sian reĝan patron vestitan en bela uniformo kaj sidanta en kaleŝo kaj li vidis, ke en la gapanta amaso nur la aĉetitaj buŝoj vivuadis plengorĝe. Ho, kiel ekdoloris la koro de la reĝido! Se mia patro scius, li pensis, certe li bontus veni sur la straton kaj restus en la ora kaĝo... La postan tagon la reĝido aperis antaŭ sia patro kaj diris al li: Mia reĝa patro, mi malbone elspezis la monon, rompĉis vian ordonon.

La sako da oro konsumiĝis, sed eĉ unu buŝon mi ne aĉetis, tamen preskaŭ mi terenfalas sub la ŝarĝo de la sako. Mi portis por vi, patro, sakon da homaj koroj. Ĉiu estas malsana, vundita, saturita de larmoj kaj ĉagrenoj. Sur la supron de ĉiuj koroj mi metas ankaŭ la mian kiel interpretanton. Ĝi parolu anstataŭ la aliaj. Aŭskultu do, kion ĝi diras ! Patro, ne deziru por vi la trezoron de la ora monto, ĉar ĝi ne valoras entute tiom, kiom unu el tiuj koroj. Pensu pri tio, ke ne ekzistas pli firma, pli fortika ligo konservanta vian potencon ol la amo mem. Ne estu reganto, sed gvidanto ! Demetu la pompan veston kaj prenu sur vin almozulajn ĉifonaĵojn, se simbolo vi volas reprezenti vian popolon kaj ne kredu la vivuadon, kiun dungitaj gorgoj kriegas !

Longa silento. Patro kaj filo rigardis unu la alian esplore, milde, iom emociite. Ne la rakonto kortuŝis la reĝon, sed la fakto, ke lia filo diris tion al li. Li konis la verecon de la fabelo jam delonge. Kion fari ? Li kutimiĝis al la juĝo de la familiaj tradicioj kaj ne povas esti io alia. Eĉ vane li volus esti alia. Ĉe la kortego la plej malmulte estas permesata al li. Ĉiu havas pli da libereco ol la reĝo. Nun li enviis sian plej junan filon. Lin ankoraŭ ne rompis la disciplino kaj la etiketo. Nu, ankaŭ lin baldaŭ... Tiel devas esti !

— Olivero, la histriono rakontis belan fabelon. Mi rekompencos lin. Mi rezignos pri la trezoroj de la ora monto. Por la histriono sufiĉas tiom, sed al la reĝido, malprudente malavara kaj disciplinrompa, mi ordonas punon. La kamparana vesto estu forprenita de li kaj li denove restu en la palaco !

La filo longe pripensis la vortojn de la patro, trovis ilin maljustaj kaj pro tio li apelaciis.

— Mi ne povas kontentiĝi pri la juĝo, patro. Ne ĝia severeco, sed ĝia absoluta maljusteco igas min protesti. Neniam vi rompis vian reĝan promeson, ĉu ne ? Kaj min al tiu ĉi kamparana vesto ligas promesoj kaj ankoraŭ io ; pli altvalora ol ia ajn promeso : *mia*

nova memo. En tiu ĉi simpla vesto mi konatiĝis kun la vivo, kun la nuda realeco. Neniam plu mi deziras preni sur min la kolorajn ĉifonojn de la mensogoj. Mi ĵuris fidelecon al mia memo, vekiĝinta en la mal-delikata kamparanŝtofo kaj se mi revenus ĉi tien, la akuzanto estus praya : mi estis nur pagita dungito. La honto mortigus min. Ne, mi ne povas resti.

— Tion ni vidos. Mi estas via patro kaj plen-potenca suvereno.

La voĉo de la reĝo akre sonis kaj ĝi vekis la spiton en la filo.

— Via Reĝa Moŝto, en tiu ĉi minuto Scipo Prikatel staras ĉi tie por aŭdienco. Scipo Prikatel, la popolestro. Mi venis peti komprenon por tiuj, kiujn mi reprezentas. Ĉu Via Reĝa Moŝto estos ema aŭskulti miajn proponojn ?

La reĝo surprizite rigardis al la subite rektiĝinta, fiera, preskaŭ malamike sintenanta viro. Por momento li ekmiris pri la aŭdaca junulo, sed poste la patro, gardanta de danĝeroj sian filon, parolis.

— Ĉi tie ne ekzistas Scipo Prikatel, nur Olivero Karlo reĝa princo staras kontraŭ sia patro.

— Via Reĝa Moŝto, emfaze mi devas deklari, ke Olivero Karlo reĝa princo nun studadas en la Paris-a universitato. En la palacon venis Scipo Prikatel, kies dokumentojn la adjutanto transdonis al Via Reĝa Moŝto. La reĝo havas potencon kaj rajton arestigi min, sed mi sentas mia devo averti lin, ke la arestado alportus tre malagrablajn konsekvencojn. Se hodiaŭ post-tagmeze mi ne forlasos libera la palacon kaj la urbon, morgaŭ jam la ruĝa koko kikerikos sur la urbdoma tegmento.

La reĝo cedis al la argumentoj. La ŝajnon oni devas konservi, sed al la patro doloris la decide firma sintenado, kvankam li admiris la fajron de la juneco.

— Bone, vi povas foriri. Post kvardek horoj vi reaperos kiel Olivero Karlo, forlasinta Parizon.

Scipo Prikatel eskapis al eksterlando pro la persekutado. Ĉu vi komprenis ?

— Via Reĝa Moŝto, Scipo Prikatel scios kion fari. La telegrama sciigo post kvardekok horoj alvenos... Nun mi petas kun humilo de regato Vian Reĝan Moŝton, ke la transdonitan petskribon, en kiu subdek punktoj mi resumas miajn proponojn, bonvolu favori per tralego kaj rekomendi per subskribo por serioza konsidero al la ministraro de via reĝimo. Jen mia peto.

La reĝo prenis la petskribon el la dokumentoj kaj disŝiris.

— Scipo Prikatel estas persekutenda revoluciulo. Lian petskribon mi neniigas.

La vangoj de la filo purpuris pro la ekscitiĝo. Li forgesis, ke antaŭ li staras la patro. En tiu ĉi momento li sentis sin nur persekutata, ĉasata. Sed kial? Ĉar li volas bonon al la popolo, kies toleremo, bonvolo indulgas la dinastion? ! En liaj okuloj ekbrilis la flamo de sindefendo kaj akre, senindulge, kvazaŭ denaske li portus tiun simplan veston, li respondis:

— Regnestro, kiu nelegite disŝiras la humilan petskribon de regato, ne indas al trono, sed al malliberujo. Jen la respondo de Scipo Prikatel.

La reĝo fariĝis pala kiel mortinto, liaj trajtoj rigidigis kaj ne volis kredi al la propraj sensoj. Ĉu tiu ĉi vere estus lia filo? Tiu ĉi fremdvizaĝa, fajrokula, malamike ultimaton sendanta ribelanto? ! Eble iu ŝtelis al si liajn voĉon kaj staturon. La reĝo volis regi sin kaj kun tremanta mano premis la sonorilan butonon. La adjutanto tuj aperis.

— Holbrom, la aŭdienco finiĝis. Redonu liajn dokumentojn, li povas foriri!

Scipo Prikatel transprenis siajn paperojn de la adjutanto, apenaŭ rimarkeble salutis la reĝon kaj senvorte forlasis la ĉambron. Holbrom estis konsternita pro tia fiera senhumila sintenado, sed en la ĉeesto de la reĝo li ne riskis kontentigi sian indignon. Cetere

la reĝo tre laciĝis kaj ŝajnis sufiĉe torturita de tiu ĉi kamparano. Li estis ja tute pala.

— Ĉu via reĝa moŝto ne deziras malfermon de fenestro?... La freŝa aero...

— Superflue, Holbrom. Dankon... La kronprinco?

— Post kvin minutoj kun princino Olivia li forlasos la palacon por rigardi la aŭtunan ekspozicion en la Belarta Muzeo.

— Bone... La vojo?

— Plene sekura.

— Dankon. Mi ne bezonas vin, Holbrom.

La adjutanto ekironta rimarkis sur la planko la disŝiritan petskribon. Li volis levi ĝin.

— Superflue, Holbrom, lasu!... Nur la petskribo de tiu ĉi Scipo Prikatel.

Apenaŭ la adjutanto lasis la reĝon sola, jam malfermiĝis tapetita pordo kaj aperis la maldika alta figuro de Vaga Orel de Pord. La reĝo iom riproĉe rigardis sian konsilanton, kalviĝintan en intrigoj kaj artifikadoj. La mieno de lia ekscelenca moŝto melankolie longiĝis.

— Nu, Orel de Pord, mi pensas, ke al vi ne malutilus iom da ripozo.

Delikata pala rideto vibris sur la lipoj de Vaga Orel de Pord.

— Laŭ ordono de Via Reĝa Moŝto mi transdonos mian petskribon por pensiumo mia.

La reĝo nee skuis la kapon. Li pensis pri tio, ke tia pensiumado havus ja ne multe da senco. Ili kune maljuniĝis, kutimis unu la alian kaj li mem jam ne estas sufiĉe juna por aŭskulti kaj sekvi la konsilojn de nova konsilanto.

— Ĉu vi aŭdis?

— Ĉiun vorton, Via Reĝa Moŝto.

— Kaj via opinio?

— Bedaŭrinda malnormaliĝo. Tia ne okazis en la historio de la dinastio.

— Nu, tia ne, sed simila jes. — La reĝo tiris la lipojn je malgaja rideto. — Dum regado de Alfred Nepaŭl I-a okazis, ke la kronprinco malnormaliĝis kaj enamigis la ĉambristinon de la reĝino kaj pro sia idealo li eĉ volis detronigi sian patron. Feliĉe intervenis variolo, kiu senigis de ĉarmoj la belan konkubinon kaj la kronprinco normaligis. Nu, sed tiam rolis virino en la afero.

— Kaj se ankaŭ nun ?

— Mi ne pensas. La fanatikulo de virino post ioma tempopaso trankviliĝas, sed fanatikulo de ideo povas nur frenezigi... Jes, militon deklaris kontraŭ mi, mia plej juna filo.

— Decida energio estus necesa, Via Reĝa Moŝto. Princo Oliver Karlo jam forlasis la palacon. Ni devus arestigi lin, kiel Scipon Prikatel. En la malnova medio li normaliĝos.

La reĝo longe pripensadis. La minaco de la filo pri tuja perturbo eble ne estus ja renversanta ĉion, tamen pripensinde. Kial superflue verŝi sangon kaj per tio pliakrigi la antagonismojn.

— Ne, Orel de Pord, via konsilo ne estas sekvinnda. Kial detruu la pacon de la ĉefurbo kaj de la lando? Kaj ankoraŭ io. Plie la tremo pro lia vivo ol la kolero min regas. Eble li estas prava. Vere, mi estus devinta legi tiun petskribon. — La reĝo levis la disŝiritan skribaĵon, legis, legis kaj ridetis. — Ĉu vi scias, Orel de Pord, ke princo Oliver Karlo ne deziras ja neblaĵojn? Legu do ankaŭ vi!

Lia ekscelenca moŝto transprenis kaj legis ĝin, komprenis, ke sole la patra indulgemo povas pledi por la enhavo. Ĝin karakterizas malproksimaj celdifinoj de la malbenita socialismo. Kiel bone, ke ne la junulo estas la kronprinco! Nu, tiam estus ĉi tie kap-al-tere starigita mondo. Socialista reĝo sur la trono, kvazaŭ kronita prezidanto de respubliko.

— La reĝan princon senkulpigas nur lia junago. Ni danku Dion, ke ne li estas la tronheredanto. Tio

certe signifus la falon de la dinastio... Via Reĝa Moŝto, mi petegas, estu energia, akceptu mian antaŭan konsilon!

— Orel de Pord, ni jam tre maljuniĝis. Sincere konfesante mi envas en tiu ĉi momento Oliveron Karlon kaj mia animo ploras pro la kronprinco. Kredu, ke la sintenado kaj foriro de Scipo Prikatel estis multe pli reĝeca ol la promenveturadoj de la kronprinco eskortita de la reĝa gvardio. Li estas libera, sekvas la sopirojn de sia animo kaj batalas por ideo, egale ĉu tiu ideo plaĉas aŭ ne plaĉas al ni, sed li batalas por tio. Kaj ni? Kiuj ni estas? Ornamitaj sklavoj, kiuj kun lernita afabla grimaco akceptas la vivuadon de niaj detektivoj. Scipo Prikatel vivas por revoj, ni por la arto de la polvoŝutado al okuloj. Ho, Orel de Pord, min plenigas ia fiero pensante pri tio, ke Scipo Prikatel estas mia plej juna fileto, kiu ne surgenuis antaŭ mia volo, Li iru, vidu, suferu, sentu dolorojn de persekutito por esti inda sur la trono.

— Sed, Via Reĝa Moŝto, la kronprinco ja...

— Mi scias, Orel de Pord. La kronprinco ricevos sian tronon, sed mia plej juna filo, tiu Scipo Prikatel devos suferi por la trono de martiroj, ĉar bedaŭrinde mi ne povas etendi protekte mian brakon al li. Min ligas la familia tradicio, katenas la leĝaro de la dinastio kaj la konstitucio, je kiuj mi ĵuris kaj fine katenas min mia maljuneco, sed mi diras al vi, Orel de Pord, ke povos veni tempo, kiam kun tia amplena humilo kiel hodiaŭ li, mi petos de li permeson esti lia histriono, diranta la veron... Jes, jes, Orel de Pord, mi perdis filon, sed la perdo alportis novan filon.

La maljuna ekscelenca moŝto mire rigardis la reĝon, ne komprenis lian entuziasmon. Neniam li staris tiel malproksime de sia suvereno kiel nun. Li ne trovis vortojn por komenci pritraktadon. Reĝa kaprico, li pensis.

— Via Reĝa Moŝto, mi atendas vian ordonon.
Longminuta paŭzo.

— Post kvardekok horoj, komprenu, post *kvardekok* horoj la ministro de Internaj Aferoj ripetos la oficialan denuncon, bone motivitan, ĉe la ŝtata prokuroro kontraŭ Scipo Prikatel, loĝanto de Talger, pro danĝera agitado kontraŭ la ŝtata ordo.

Vaga Orel de Pord embarasiĝis, poste hezitante momenton pri ĝusteco de sia konsilo, eble alportanta kruelan frapon al la reĝo, atendis la motivadon de la reĝa ordono.

— Sed antaŭ momento, Via Reĝa Moŝto, pensis ja, ke...

— Tiam mi deklaris miajn sentojn antaŭ maljuna amiko, sed nun mi plenumas reĝan devon. Scipo Prikatel estas tre danĝera revoluciulo kaj li estas persekutenda.

La reĝo pergeste esprimis la deziron resti sola. Vaga Orel de Pord kun profunda riverenco foriris.

La rigardo de la reĝo longe karesadis la disŝiritan petskribon. Li zorge faldis kaj metis ĝin en kaŝkesteton de la skribotablo. Liaj okuloj brilis en larva lumo. Li dolore ekĝemis.

— Aldono al la petskribo de la detronigita reĝo.

XIV.

Pasis du tagoj kaj la tria alportis tri sensaciojn. La unua tre konsternis la grandkapulojn, embarasis la policon, ridigis la gajajn bagonojn. Tiel okazis, ke altranga oficisto de la financministerio kun la maljuna generalo Venknejam peraŭtomobile aperis en la urba impostoficejo por transpreno de la ŝtataj impostoj. Ilia alveno estis ja sciigita kaj la kasistoj farante la necesajn formalaĵojn metis la tintantajn orajn guldojn, la bankbiletojn en la valizon, kaj respektplene adiaŭis. Post paso de horo denove haltis aŭtomobilo antaŭ la impostejo kaj la altranga ministeria oficisto kun la maljuna generalo Venknejam alvenis por ree postuli la ŝtatan imposton, montris siajn dokumentojn. Harstariga skandalo! La estro de la impostejo tuj telefonis al la polico, kies senditoj arestis la du ĉarlatanojn, malgraŭ ilia protesto. Pasis horo kaj la ministerio legitimis ilin. Sed la mono, la lastmonata imposto enkasita de la urbaj civitanoj por la ŝtato, neniel volis enflui en la ŝtatan kason. Sensacia ĉarlatanaĵo!

La grandkapuloj konsterniĝis kaj provis klarigi kontakton de tiu okazintaĵo al la dua sensacio, ke Scipo Prikatel eskapis, forlasis la landon. Tute certe tiuj du havas ian kunligan fadenon. Tre verŝajne, ke la du ĉarlatanoj estis lerte maskitaj, bonege ŝminkitaj revoluciuloj. Almenaŭ la urbestra opinio konfirmis tiun ĉi supozon. La sumo, kvankam ĝia malapero ne bankrotigos la ŝtaton, estis konsiderinde alta. Pli

ol unu miliono da guldoj. Sed la gajaj nenihavaj bagonoj aplaŭdis al la geniaj ĉarlatanoj.

La tria sensacio vekis ĝeneralan kondolencon en la lojalaj civitanoj. Aperis nigraj flagoj por demonstracii pri la funebro de la lando. Princo Olivero Karlo, la simpatia plej juna membro de la dinastio, okaze de boata ekskurso kaj sinbanado dronis en la Sejno. Lian korpon ankoraŭ oni ne sukcesis retrovi, sed estas atestantoj de la akcidento. La foton de la neatendite mortinta princo ĉiu ĵurnalo, eĉ multaj eksterlandaj, precipe francaj, aperigis kaj ĉu koncize ĉu detale komunikis ankaŭ lian biografion en la nekrologoj.

Ne mirinde, ke neniu vidis, eĉ konjektis interrilaton inter la malapero de la fama popolestro kaj la morto de la reĝa princo. Tamen ŝajnis iom strange, ke la funebra flago nur en la malfruaj vesperaj horoj aperis sur la standardstango de la reĝa palaco. Verŝajne en la kortego oni atendis la konfirmon de la sciigo, kiun ĉiuj ĵurnaloj ricevis telegrame rekte el Parizo.

Kvartaga kortega funebro estis dekretita, dum kiu en tuta Bagonio estis malpermesataj la publikaj amuzadoj, prezentadoj de la Nacia Teatro kaj muziko en la kafejoj. La membroj de la dinastio ne montris sin sur la stratoj kaj onidire la maljuna reĝo pro la plago grave malsaniĝis. Ĉu vere, ĉu ne, sed oni parolis sekrete pri lia baldaŭa abdiko por la favoro de la kronprinco kaj tiu ĉi famo ne trovis sinceran kontentiĝon en la koro de la bravaj bagonoj, ne tre simpatiantaj al la estonta reĝo.

La kvaran tagon de la funebro jam oni retrovis la kadavron de la princo, kvankam kun vizaĝo, ĝis nereconebleco kontuzita pro frapoj de iu ŝiphelico, tamen la leteroj, skribaĵoj en la poŝoj kaj konata familia ringo sur la fingro pruvis la identecon. Provizore li estos enterigita en Parizo laŭ decido de la dinastio kaj la enterigan ceremonion ĉeestos nur la kronprinco kaj princino Olivia.

Jus pri tio ĉi sinjoro Krak estis leganta detalajn informojn en la ĵurnalo »Cioscio«, kiam iu frapis la pordon. Energia frapo, li pensis, certe la urbestro. Li leviĝis de la tablo por akcepti konvene sian amikon kiam en la kadro de la malfermata pordo aperis la maldika, aristokrate impona figuro de Vaga Orel de Pord. Krak momente mutiĝis pro la honoro.

— Pardonu, kortega konsilanta moŝto, se mi ĝenos vin por momentoj, — komencis lia ekscelenca moŝto, — sed diskreta afero devigis min veni al vi.

— Mi servoprete estas je via dispono, ekscelenca moŝto... Bonvolu honori mian modestan laborĉambron per via eksido... Jes, tie, en tiun komfortan fotelon.

Vaga Orel de Pord sidiĝis. Krak momente hezitis ĉu sidi aŭ stari estus pli etikete, fine ankaŭ li lokis sin en fotelon. Iom ĝene longa silento.

— Espereble neniu subaŭskultos nin. Ĉu?

— Certe ne, ekscelenca moŝto.

— Nu, bone... Mi venis al vi por ricevi informojn pri Scipo Prikatel.

— Pri Scipo Prikatel?... Li ja eskapis.

— Tion ni scias, sed antaŭ lia eskapo, onidire, pli sincere, laŭ la raporto de nia komisiito, vi havis okazon paroli kun li, eĉ li pasigis duonhoron en via oficejo, poste li revenis al sia loĝejo en la »Nigra Bovo«, la saman vesperon vojaĝis al la limurbo Talger, kaj transpaŝis la limon.

— Dank' al Dio!

— Kiel mi komprenu vian dankon, ĉu respublikane aŭ lojale al la dinastio?

La demando embarasis sinjoron Krak. Lojala li estis ja, sed la dankoĝemon eligis el li tute simpla simpatio al la juna homo. Ĉu necesas mensogi aŭ esti sincere nun? La sincereco eble ne malutilos, ĉar tio estas ja tre malofta birdeto ĉe la kortego.

— Via ekscelenca moŝto, mi estas ja simpla ĉefnotario, kiu ne komprenas bone la artifikadon per la vortoj en tiu rilato, kiamaniere formi la frazojn por esti

kortegkapabla babilanto kaj pro tio permesu, ke mi sincere malkaŝu miajn sentojn. Dum mia tuta vivo la lojaleco al la dinastio, al nia konstitucio karakterizis min, sed ekzistas super ĉio ĉi ia tre simpla sento, la homa simpatio al la erarvaganta juneco, kiu kelkfoje spontanee forlasas niajn lipojn en formo de dankoĝemo, kiam... kiam... Vi certe komprenas min, ekscelenca moŝto. Dank' al Dio, ke Scipo Prikatel forlasis la landon, ĉar li ne faros plu agitadon kaj ĉar li ne estos persekutata. Jen! Mi sincere konfesas, ke tiu junulo vekis en mi simpatian ne per siaj principoj, sed per sintenado brava kaj akceptinte lin en mia oficejo mi pensis ne fari konspiradon, ĉar li venis al mi rekte de la reĝa aŭdienco. Certe, via ekscelenca moŝto, dezirus scii, kio okazis kaj pri kio li parolis dum tiu duonhoru, pasigita ĉe mi. Volonte mi informos vin. Tre melankolian humoron li havis rakontante sian plenan fiaskon ĉe la aŭdienco, poste iom kortuŝite dankis mian bonvolon koncerne liajn proponojn, pritraktitajn dum la antaŭa tago ĉe lia urbestra moŝto, kiun pritraktadon mi iniciatis laŭ via sugesto, ekscelenca moŝto kaj ĝuste li volis diri ion pli, kiam in frapis ĉe la pordo kaj...

Kaj en tiu momento frapo ĉe la pordo interrompis la intiman duopon. Energia frapo, certe la urbestro. Eĉ neatendante la permesvorton, la pordo malfermiĝis kaj Kazimiro Jenlafiŝ kun ruĝa vizaĝo pro la ekscitiĝo envenis. Li iomete surpriziĝis pro la ĉesto de lia ekscelenca moŝto, petis pardonon, sen propono eksidis kaj elverŝis la kaŭzon de la emociiĝo.

— Prezentu al vi, ekscelenca moŝto, ke tiu fripono, tin Scipo Prikatel sendis anstataŭanton. La nova agitatoro estas ion pli mistera, ĉar li ne aperas videbla por la okuloj de niaj spionoj, tamen danĝere organizas revolucion. Nur tion oni sukcesis malkovri, ke en ĉiu fabriko de la lando la laboristaro deklaris demonstracian strikon por protesti kontraŭ la projekto, akceptita de la Urba Konsilantaro kaj por postuli ple-

nan amnestion, liberan agadon al tiu eskapinta plebestro Scipo Prikatel. Terure! Feliĉe, ke nia polico havas argusajn okulojn kaj longajn orelojn.

— Nu, longajn orelojn ili havas ja, — rimarkis iom sarkasme lia ekscelenco.

— Komprenoble, ke soldatoj estis tuj komanditaj al la danĝeraj lokoj. Bela komedio, mi povas diri. Ni cerbumadas, ŝvitas je la intereso de la popolo por akiri per plenumo de la kondiĉoj tiun heredaĵon kaj la popolo ĉiam malhelpas. Sed mi devas konfesi, ke ne sole la laboristaro forgesas pri sia patriota devo, sed ankaŭ la meza klaso. Plorinde malrapide kolektiĝas la sumo por la starigo de la monumento. Jes, jes, ankaŭ la meza klaso jam estas venenita, perdis la moralan bazon, kion pleje pravas tiu ŝercemo pri la ŝtelita imposto. Terure!

— Kial vi ne mendas kredite la monumenton?

— Neeble, ekscelencan moŝto, ĉar tiu frip... mi volis diri, tiu karmemora Vilhelmo Grauer postulas en sia testamento, ke la monumento estu starigita je kosto de oferemaj civitanoj. Nu kaj la prokuroro de la new-york-a banko severe kontrolas ĉion. Memkomprenoble, ĉar 230 milionoj da dolaroj eĉ en Ameriko estas 230 milionoj. Kion fari? Mi venis al mia amiko interkonsiliĝi, ĉar espereble lia genia inventemo trovos bonan ideon por superruzi tiun ĉi kondiĉon.

— Mi? — demandis preskaŭ timigite Krak. — Kiel mi povus havi ideon pri superruziĝo?

Vaga Orel de Pord senpacienciĝis. Li ne volis partopreni en la antaŭvidebla diskutado. Ne tiacele li venis ĉi tien kaj pro tio li leviĝis.

— Pardonu, altestimataj, mi nepre devas foriri. La devo vokas min. — Li apenaŭ rimarkeble okulsignis al Krak. — Do, ĝis revido! Agrablan interkonsiliĝon!

Post la reciprokaj salutoj en akompano de Krak lia ekscelencan moŝto forlasis la ĉambron. En la vestiblo li flustre demandis :

— Nu, kaj kio okazis en tiu momento, kiam iu frapis la pordon?

Krak jam estis respondonta, kiam akre eksonis la sonorilo kaj enrapidis la servisto por malfermi la pordon.

— Kiu? — demandis iom ĉagrenite Krak.

— Mi estas, kara oĉjo Krak, mi, Elvira! — Agrable trilanta voĉo respondis sur la koridoro.

La servisto malfermis la pordon. La knabino enrapidis.

— Ĉu mia paĉjo estas ĉe vi?... Ho pardonon, mi ne sciis antaŭe, ke mi eble ĝenos vin.

Sinjoro Krak prezentis lian ekscelencan moŝton, kiu facile kapsalutis la ĉarman knabinon, poste prezentis ankaŭ ŝin al li.

— Elvira Jenlafiŝ, la filino de la urbestra moŝto... Pardonu momenton, Via patro estas en la interna ĉambro. Bonvolu eniri!

La knabino perkape adiaŭante forlasis la ĉambro kaj Vaga Orel de Pord jam tute ekscitite demandis la duan fojon:

— Kio okazis do tiam, kiam iu frapis la pordon?

— Nu, venis la filino de la urbestro.

— Tion mi scias.

— Kiel vi povus scii, kiam ĵus mi diris, ke venis la filino de la urbestro?

— Nu, ankaŭ mi vidis ja.

— Ho, miskompreno, ekscelenca moŝto. Tiam, kiel nun, kiam iu frapis la pordon, venis en la ĉambro la filino de la urbestro kaj la gejunuloj longe rigardis unu la alian.

— Ĉu la gejunuloj?

— Jes, ili estas junaj kaj kiel ĉiu knabino, ankaŭ ŝi estas iomete romantika. Kial ŝi venis? Serĉi la patron kiel nun, sed mi povus veti, ke ŝi spionadis la paŝojn de la belstatura popolestro. Sed mi estas amiko de la geamantoj kaj tial mi ŝajnis rimarki nenion.

— Vi ŝajnis rimarki nenion?! Ĉu entute estis io rimarkebla inter ili?

— Ŝajne nenio, sed efektive io.

— Mi ne komprenas vin.

— Bedaŭrinde nur laŭsentente mi konjektas, ke ŝi forte simpatias al tiu Scipo Prikatel. Ili eĉ fariĝus bela paro, se la malfeliĉaj cirkonstancoj ne disigus ilin.

Vaga Orel de Pord mire ekstreĉis la okulojn. Kiajn malsaĝaĵojn parolas tiu ĉi viro! Iom indigne li rimarkis:

— Vi eĉ deziras, ke ili fariĝu unu paro, ĉu ne?

— Jam ne, ekscelenca moŝto, ĉar la lando liberigis pli malmultekoste de la popolestro. Mi ne neas, ke en komenco mi pensis la amon bona rimedo por senarmigi kaj kateni lin per la rozoĉeno de la gedziĝo. Jam ne, ekscelenca moŝto, ĉar malbonan sorton mi ne deziras al tiu ĉi ĉarma knabino. Esti edzino de persekutata politika partiestro vere ne estas enviinde.

Lia ekscelenca moŝto kontraŭvole konstatis, ke tiu ideo ne estas lastranga kaj finfine oni povas akceli la ripetigon de la historio, eĉ en danĝera okazo la *subitan variolon*. Ĉar finfine Scipo Prikatel estas identa kun Olivero Karlo reĝa princo, kvankam tiu lasta provizore mortis kaj kvankam pri la sekreto scias nur du: la reĝo kaj li.

— Bedaŭrinde, ke via bonega ideo malaktualigis... Sed nun mi devas forrapidi. Petu pardonon je mia nomo de la urbestra moŝto, ke tiom longe mi retenis vin.

Vaga Orel de Pord post la fermo de la pordo gratulis al si por tiu ĉi vizito. Jen ideo, kiu eble povus konsole redoni, se ne la mortintan filon al la patro, sed almenaŭ la mildiĝintan regaton Scipo Prikatel al la reĝo. Akceli la burĝonadon de tia amo estus prudente, ĉar ĝi kondukas tre verŝajne pli proksimen al la celo.

Krak revenis en la ĉambron kaj trovis la urb-

estron kaj lian filinon en arda diskutado, respektive disputado.

— Kaj mi diris centfoje al vi paĉjo, ke mi fariĝis plenaĝa por memstare pensadi pri la aferoj.

— Kaj mi diras al vi eble la milan fojon, ke vi laŭkaraktere similas al via patrino, kiu ĉiam volis direkti miajn paŝojn.

Krak vole nevole ridetis kaj interpacige haltis antaŭ ili.

— Nu, ĉu decas fari familian scenon en fremda oficejo, kie oni ĉiam interrompas ĉe la plej interesa kriza punkto? Nur tie vi malpacigu, kie ne povas veni malhelpo. Nur tiam agrable. Mi scias laŭ sperto.

Krak laŭte ridis pri sia ŝerco, sed Kazimiro Jenlafiŝ ne estis stimulebla je serena humoro.

— Finfine ci estas la sola ĉefkulpanto pri la afero.

— Pri kia afero?

— Pri ĉia! Jes! Pri la heredaĵo kaj pri tiu fripono Scipo Prikatel.

— Ĉu mi testamentis aŭ Vilhelmo Grauer kaj ĉu mi subaĉetis por agitado la popolestron? Ne!

— Sed ci sciĝis min pri la heredaĵo, ci legis la testamenton kaj ci invitis al mi tiun... tiun...

— Nu, se ci tiel opinias, mia amiko, do ŝajne cia prudento ekiris promeni. Cetere cia obstino kaj ciaz projektoj incitis je agado tiun... tiun tute simpatian junulon.

Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ krevis pro la retenita kolero. Li iom moderigis la konduton, sed en la voĉo konstante vibris la ekscitiĝo.

— Tute mi ne povas kompreni, kiel ci povas nomi tiun friponon simpatia junulo?

— Kial? Ĉar de tiu tago, kiam ci kvazaŭ perforte elpremadas ideojn el mi, por konservi miajn postenon kaj aŭtoritaton mi bezonas pensadi pli logike. Ĉu ci ne trovas iom prinpensinde, ke oni ne arestis lin tuj post la aŭdienco, lasis lin eskapi sub

detektiva kontrolo kaj nur poste, kiam li troviĝis jam ekster la landlimo, oni eldonis la severtonan dekretan kontraŭ li kaj ordonis lian arestadon? Ĉu tio ĉi ne pruvas, ke verŝajne la reĝo mem indulge trovis lin simpatia?

Sinjoro Jenlafiŝ kun sincera miro gapis al sia amiko.

— De kie ci prenas viajn informojn?

— De tie, de kie ci... kaj... kaj ĵus mi eksciis ion, tute hazarde, tute spontanee el la mieno de lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord.

— Kion?

— Tre bedaŭrinde, ke la afero malaktualiĝis kaj verŝajne estas bedaŭre ankaŭ por ci, ĉar ĝi rilatas iamaniere ankaŭ al ci.

— Mi ne komprenas cin. Parolu tute klare!... Ne turmentu per silento!

— Kara moŝta amiko, ci scias, ke mi povas silenti pri oficialaj sekretoj. Tio ĉi estas duoble oficiala kaj krome *privata*. La mieno de lia ekscelenca moŝto duobligis la oficialecon kaj la privateco de la sekreto apartenas ne tute al mi. Jen! Provizore ni lasu tiun ĉi aferon kaj parolu pri la kunsido de la Monumenta Komitato.

Kazimiro Jenlafiŝ tute amare eksplodis.

— Mi diris ja, ke la mono neniel volas kolektiĝi. Ne turmentu! Ĉio estus en ordo, ĉar la bofrato de la ministro de Internaj Aferoj jam pretiĝis la modelon tute laŭ la kondiĉo, la direktoro de la zoologia ĝardeno parkumigis placeton antaŭ la kaĝo de la pavianoj por la monumento, sed la necesa mono mankas. La bagona patriotismo bankrotis.

— Nu, la monumenton ni devas mendi je kredo kaj...

— Sed la kondiĉo, ĉu ci forgesas?

— Neniel! Aŭskultu min! Mi elcerbumis ion, pli ĝuste la vivo donis al mi bonan ideon. Antaŭ kelkaj tagoj mi pruntis kvindek guldojn al mia estonta

bofilo Ignato Eltord, kiu je honora vorto promesis redoni la sumon post du tagoj. Hieraŭ mia edzino elflutadis kvindek guldojn el mia poŝo por aĉeti laŭmodan ĉapelon por si. Nu, posttagmeze vizitis nin Ignato Eltord kaj redonis la pruntitan sumon en la sama bankbileto, kiun mi donis al mia edzino. Mi rekonis ĝin. Kial vi ne aĉetis ĉapelon, mi demandis mian edzinon? Ŝi embarasiĝis, balbutis iom pri necesa ŝparado por la filinoj. Nu, tiamaniere la kredito kaj ŝuldo pri la kvindek guldoj restis en la familio.

La urbestro sentis sveneton. Li ne povis kompreni, kio estos la ideo.

— Sed la ideon, homo, kaj ne torturu!

— Simple, ni pruntos al ni mem.

— Bone, sed kiel kolekti?

— Ne estu senpacienca! Ni pruntos dek mil guldojn al ni. Tiun sumon du oficistoj disdonos kontraŭ kvitanco al dek civitanoj kaj post duonhora la kolektanta komisiono de la Monumenta Komitato aperos ĉe la dek civitanoj por enkasi la pruntitan sumon, kies kvitigon la subskribo sur la listo de oferintoj kvitancas. Jen! Tiun procedon oni devas ripeti ĝis la surpapera kolektiĝo de la bezonata sumo. La listoj kaj atestantoj pruvos, ke la monumento estos starigita je la kosto de la oferintoj. La patriota honoro de la bagonoj estas savita. La monumento estos mendita je la ŝarĝo de la heredaĵo. Nu, tiamaniere la debito kaj kredito restos en la familio, tio estas, en la urba kaso.

La urbestro tuj entuziasmiĝis por la ideo, Krak estis kontenta, nur Elvira ridetis ironie, iom petole. Ŝia patro rimarkis tion.

— Ĉu ne plaĉas al vi tiu ĉi genia ideo?

— Kaj se ne estos heredaĵo, kaj se la heredaĵo estos nur nulo?

La dubsemanta demando paralizis ambaŭ grandkapulojn por momento. De kiam la amerikanoj alvenis kaj asertis la enmeton de la Vilhelmo Grauer-a

postlasaĵo en la seĉon n-ro 135 oni ja tre malofte pridubis la ekziston de la milionoj. Kaj tamen nun la rimarko nubigis la optimisman firmamenton. Kazimiro Jenlafiŝ riproĉis en si la filinon, ke ŝi tiel kruele disŝiris la vualon de la iluzio pri preskaŭ certaĵo. Sinjoro Krak post momenteto jam dankis ŝin.

— Ho, kara Elvira, la Dio donis tiun demandon en vian buŝeton. Jen la favora okazo priprovi la amerikanojn, kiuj estas ja riĉeguloj laŭ onidiro. Ni tuj vizitos ilin kaj petos prunte la bezonatan sumon por la Monumenta Komitato, alivorte ni pagigos per ili la koston de la monumento. Se ili rifuzos, certe ankaŭ ili dubas, kaj se ili dubas, ni ree povos pripensi la aferon kaj...

— Krak, homo, amiko, frato — komencis kun troa aplombo la urbestro, — permesu, ke mi ĉirkaŭprenu cin por tiu genia ideo. Jes, ni vizitu ilin! Aŭ eĉ estus pli dece, se telefone mi invitus ilin al intima vespermanĝo ĉe mi.

— Bedaŭrinde neeble, ĉar sinjoro Jackson antaŭ semajno rompis la kruron kaj li ne povas forlasi la liton. Lia fidela amiko, sinjoro Smith, flegas lin sindone.

— Do ni iru senprokraste! Elvira, vi iru hejmen!

La patra ordono ne tre agrable tuŝis la filinon. Si venis ja por ruzete informiĝi pri la eskapinto kaj jen ĉio renversita. La rigardo de Krak rimarkis ŝian malsereniĝon. Post momenta pripenso li eksidis al sia skribotablo, skribis kelkajn vortojn sur slipeton, faldis ĝin kaj metis en la poŝon.

Ili jam estis ĉe la unua stratangulo. Elvira adiaŭis. Ĉe la manpremo Krak ŝovis la falditan slipeton en ŝian manon kaj konfidencie ekbrilis liaj okuloj.

La du amikoj ekiris al la direkto de la Hotelo Royal. La knabino kuris en profundon de pordego por malfaldi kaj legi la misteran sciigon.

— *»Bone scii, ke la mieno de lia ekscelenca moŝto esprimis simpatian al la penso, kiu estas verŝajne sekreto de via knabina koreto.«*

La koreto de Elvira komencis tamburadi pli verve. Ŝi havis ĝojon. Kial? Ŝi mem ne komprenis. Poste hontoruĝo aperis sur ŝiaj vangoj.

— Nu, tiu ĉi oĉjo Krak estas vere ruza. Jen, li divenis, ke mia koro havas sekreton.

XV.

Sinjoro Jackson dolore ekveis en la lito. Lia amiko kuris servoprete al li. La vizitantoj grimacis komplete.

— Kompreson, kompreson !

— Sed, kara Jackson, tion neeble. Via kruro estas metita en gipson.

— Jam eĉ nebezone !... Pardonu, sinjoroj, sed kelkfoje mi sentas preskaŭ netolerablan pikdoloron kaj pro tio mi ekveas... Ni daŭrigu la traktadon ! Se mi bone komprenis vin, vi apelacias al mia amika sento kaj al tiu intima rilato, kiuj ligis min al la mortinto.

— Jes, sinjoro Jackson, ni apelaciis al tiu alta sento, — konfirmis Krak.

La du amerikanoj rigardis unu la alian. Sinjoro Smith gratadis la verton emfaze, signife, iom hezite. Ŝajne li dependigis la decidon de la sintenado de sia amiko. Sinjoro Jackson momente ekveis, poste denove petis pardonon, levis la rigardon al la plafono kaj profunde ekĝemis.

— Karmemora Vilhelmo, ĉi eterna grumblulo, ĉu mi povus rifuzi la plenumon de tiu deziro, kiu celas la efektivigon de ĉia testamento ? — Kaj sinjoro Jackson denove ekĝemis, mistere okulumis al sia amiko Smith. — Ankaŭ vi, sinjoro Smith, opinias same, ke senprokraste ni helpu, ĉu ne ?

— Nu, kompreneble, se vi tiel pensas, mi ne estas malboniganto de bona ideo.

La mieno de Jenlafiŝ kaj Krak radiis pro espero. Ili ambaŭ trankviliĝis pri la enhavo de la sefo n-ro 135. Kun granda aplombo, en bele konstruitaj frazoj, sinjoro Krak jam estis dankonta la komplezan prunton, kiam Jackson reprenis la rajton de parolo.

— Sed, atestimataj sinjoroj, prunton mi ne donas.

— Kiel? . . . Sed antaŭ momenteto vi diris, ke . . .

— Ke mi ne volas malhelpi la efektivigon de lia testamento, sed mi eĉ unu vorton ne parolis pri prunto. Pri la prunto parolis nur vi. Ni, amerikanoj, scipovas taksi laŭvalore la monon, ĉar la mono estas la akso de la mondo. Ni, amerikanoj, povas esti grandanime oferemaj aŭ honeste negocemaj, kiam temas pri mono.

— Jes, jes . . . Grandanime oferemaj aŭ negocemaj, — aprobis sinjoro Smith.

La vizitantoj embarasite, iom esperperdinte rigardis jen al la fremduloj, jen unu al alia. Kion pensi post tia parolo? Antaŭ iliaj okuloj konsternite rapide malaperis la milionoj de la sefo n-ro 135.

— Se mi bone perceptas viajn vortojn — komencis Krak — finrezulte tamen vi rifuzas. Ni povus ja konsideri la prunton grandanimaĵo sen rento kaj negoco kun rento.

— Vi eraras, sinjoro, prunto estas prunto, nek grandanimaĵo, nek negoco. Kiel mi menciis, ni, amerikanoj, volas montri al vi, kiel praktike profiti la okazon.

— Jes, sinjoroj, kiel praktiki la okazon — konfirmis Smith.

— Unue, bonvolu informi, kiom kostas tiu monumento?

— Ho, bagatela sumo rilate al la heredaĵo kaj sole la kondiĉoj ligas niajn manojn — eklamentis la urbestro.

— Tamen kiom?

— Maksimume centkvindek mil guldojn — rapidis kontentigi la scivolon sinjoro Krak. — Nu, tiom ni certe bezonus, eĉ se iom ĝi kostus pli.

— Nu, bone! Mi volas montri al vi kiel aspektas la grandanimeco de amerikanoj... Sinjoro Smith, ĉu ne, ankaŭ vi opinias same, ke ni povus donaci tiun tutan sumeton, tiun bagatelan sumeton por la majesta celo? Ĉu ne?

Sinjoro Smith momenton hezite rigardis al Jackson, poste aprobe balancis la kapon.

— Vere, kial ne? Konsiderante la celon, certe... Kiam vi bezonas tiun sumon? Tuj?

— Kiel vi vidas, sinjoroj, ni estas pretaj je grandanimeco. Eĉ vi honoros nin akceptinte la deziratan sumon. Ni vere tre ĝojas esti je la dispono per tia posttomba servo al nia Vilhelmo.

Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ jubilis pro la ĝojo. Krak subite pripensis la eventualan prezon de la amerika grandanimeco, krome rememoris pri la severa kondiĉo. Nun, se la oferintoj persistos, ke ili estu publike menciitaj kiel solaj oferintoj, la kondiĉo ne estos severe plenumita kaj donos okazon al la banka prokuroro por protesto.

— Sinjoroj, via grandanimeco vere estas admirinda, — Krak iom ĝenite komencis evitadi la kritikan punkton — sed kiel mi rakontis al vi, niaj manoj estas ligitaj rilate al kelkaj severaj kondiĉoj kaj tiel vi kiel solaj oferintoj... nu, kiel mi diru?... viaj nomoj ne povas esti publike menciitaj... kaj...

— Sed kion vi pensas, sinjoro? Ni faris amikan geston al la mortinto kaj ne por reklami nin. Por la Monumenta Komitato ni donas liberan manon. Vi eble mencias niajn nomojn sub certa sumeto, ni diru, po dek mil guldoj... Sinjoro Smith, se dezirinde tuj transdonos al vi tiun sumeton. Ĉu ĉio en ordo?

Sinjoro Smith iris en la alian ĉambron. La urbestro kaj la ĉefnotario plene kontentaj per bombastaj

frazoj superŝutis sinjoron Jackson, kiu ree veadis, sakris kaj kriegis por kompreso. Sinjoro Smith revenis, kalkulis la monon en la manojn de Kazimiro Jenlafiŝ, rifuzis eĉ kvitancon, poste li residiĝis sur la liton de sia amiko.

— Premu la butonon, kara Smith, — Jackson petis — kaj mendu nigran kafon kaj konjakon, ĉar nun ni devos montri praktike kiel faras negocon la veraj amerikanoj.

Krak iomete surprizite rigardis al la urbestro, kiu konjektis malbonon. Jen la prezo de la grand-animeco. Sed kion fari? Li kontraktis jam kelkfoje por la konto de la heredaĵo, kial ne ankaŭ nun. Unu kontrakto pli aŭ malpli ne tre gravas.

— Sinjoroj, kiam mi kaj mia amiko decidis viziti vian landon, ni projektis rentumigi nian kapitalon ankaŭ en Eŭropo, kiu nun tre bezonas la amerikajn dolarojn. Ni havas bone prosperantan instituton en New York kaj kelkajn filiojn. Prudenta negocisto ne volas riski monon antaŭ ol sufiĉe orienti sin pri la cirkonstancoj. Nu, antaŭ ol riski ni orientiĝis en via bela ĉefurbo kaj pensis, ke la transpreno aŭ luo de la *lakt- kaj fromaĝfabriko* konvenus kaj indus al niaj kapabloj.

— Sed, sinjoroj, tiu entreprenon apartenas tute al la urbo, — rimarkis la urbestro. — La plej profitdona entreprenon de la urbo.

— Jen, vidu, kiel bonajn okulojn havas la amerikanoj. Certe, ke ni bezonas por nia kapitalo vivantan prosperantan entreprenon. Mortintan bovinon eĉ amerikano ne povas melki.

— Sed, sinjoroj, la Urba Konsilantaro certe ne lasos elgliti el siaj manoj la gvidadon. Vere mi bedaŭras, ke vi havas guston ĝuste por tiaspeca entreprenon.

Jackson faris grimaceton, sekrete okulumis al Smith, ekveis pro doloro, sakris, pardonpetis kaj poste tute facile rimarkis.

— Nu, sinjoroj, vere mi bedaŭras, ke ni havos

konkurencon. Antaŭ semajno ni aĉetis kamparon, tute proksime al la ĉefurbo, kie ni intencas konstrui kaj investi tian laktproduktejon kun modernaj maŝinoj en vera amerika stilo. Ni pensis unue pri aĉeto de la urba entrepreno, poste pri ĝia luo, sed ni kalkulis ankaŭ pri la rifuzo kaj tial, mi povas ja malkaŝi, ĉar ĉio estas jam farita, niaj komisiitoj, agentoj dum la du lastaj semajnoj faris kontrakton kun ĉiu kamparano, havanta kelkajn bovinojn aŭ bredejon pri liverado de la laktprodukto. La kontraktoj validas komence de januaro kaj ni vere scivolos, de kie prenos la urba entrepreno lakton en la venonta jaro. Ĝi povos havi lakton nur en okazo, se la sinjoroj urbaj konsilantoj estas sufiĉe lertaj melki la *mortintan* bovinon.

La haroj, ne tre densaj, stariĝis sur la kapo de la urbestro. La memorpovo de Krak kankanis inter la paragrafoj de la leĝaro.

— Nu, sinjoroj, tamen vi eraris, — iom ridete rimarkis Krak. — Ĉar sen speciala permeso de la ŝtato eksterlandaj civitanoj ne rajtas fondi entreprenon en nia lando.

Jackson laŭte ekridis. La rido rigidigis la trajtojn de la vizitantoj.

— Unue, pri speciala permeso ni zorgis dum la vespermanĝo, dum kiu ankaŭ vi ĉeestis sinjoro Krak, ĉe la kortego. Liaj ekscelencaj moŝtoj la ministro de Internaj Aferoj kaj la ministro de la Financaj Aferoj promesis subtenon kaj favoran akcepton de nia petskribo, sed eĉ tion ni ne bezonas, ĉar la kontraktoj estas faritaj kaj la kamparo estas aĉetita ne je nia nomo, sed je nomo de sendube bagonia civitano Ignato Eltord, inĝeniero de la nuna Urba Lakt- kaj Fromaĝfabriko. Nu, kion vi opinias?

La urbestro riproĉe rigardis al Krak, kiu mirigite aŭdis la novaĵon, ke lia estonta bofilo, pruntepreninta kvindek guldojn de li, poste de lia edzino, nun havas tiajn projektojn. Sed la momenta suspekto tuj pasis, kiam li rememoris, ke Jackson varme interesiĝas pri

la malgranda Lola. Nu du tiaj vivkapablaj bofiloj ne malutilas en la familio, kie ankoraŭ kvin knabinoj metas viran kalsonon sub la kusenon en nokto de Sankta Andreo por ekvidi sonĝe la alvenontan kavaliron. Tamen la urbestra riproĉa rigardo tuŝis lin malagrabla.

— Nu, sinjoroj, se tiel statas la afero, — komencis la urbestro — mi estas devigata serioze pripensian proponon pri eventuala ludono de la nomita entrepreno. Tamen mi estas certa, ke la urbo deziras, jam nur por la formalajo, ke unu direktoro flanke de la urbo mem, kvazaŭ kontrolanto, estu akceptita de vi.

— Ho, kompreneble, ni konsentas kaj vere ni sentus nin honorataj, se tiun direktoran postenon akceptus vi, atestimata urbestra moŝto.

— Ĉu mi? — La urbestro kontentigite ridetis sub la lipharoj, triumfan rigardon jetante al Krak, kvazaŭ esprimante per tio, ke ne nur la ĉefnotario povas rentumigi sian bofilon, sed ankaŭ la urbestro sian aŭtoritaton.

La kvar viroj detale preparolis la projekton, poste la gastoj adiaŭante foriris. La urbestro ĝoje kunfrotis la manojn, pensis pri la donaco por la monumento kaj pri la direktora posteno ĉe la nova entrepreno.

— Kia grandanimeco!

Krak pensis pri la elglito de la profitdona urba entrepreno.

— Kia negocemo!

Apenaŭ fermiĝis la pordo post la foririntoj, kiam sinjoro Jackson salte leviĝis, jetis sin el la lito kaj bagonlingve ekkriis:

— Terure varme! Kaj tiu germana lingvo tre lacigas mian carbon.

— Nu, kara mia, oni devas ŝviti por la gloro — ridis gaje sinjoro Smith.

— Ĉu bone vi ŝlosis la pordon?

— Komprenoble !

— Nu, tiam ni ripozu !... Jes, kiam laŭplane mi resaniĝos ?

— Post tri, kvar tagoj . . . Kion vi faras ? Lasu tiun perukon ! Via kapo aspektas kiel kukurbo surŝutita per papaveroj.

— Malbenita peruko, ho, kiel varma ĝi estas !

— Kial vi ne komencis sen peruko ?

— La diablo neniam dormas, diras la proverbo. Kaj se ni decidiĝis je nova honesta vivo, tiam ni devas havi imponan eksterajon, tiel *burĝe* honestan.

— Nu, belege ni komencis la novan vivon en la malnova Eŭropo !

— Ne lamentu, Smith, sen mono ne ekzistas honesta vivo. Honoron havas nur la riĉulo eĉ en la demokrata Ameriko, tiom pli ĉi tie. Cetere mi gratulas al mi por mia lasta kaj samtempe jubilea entrepreno.

— Ĉu jubilea, Jackson ?

— Jam jubilea. Per tiu ĉi bone sukcesinta publika rolado finiĝis mia ĝisnuna profesio. Jen, hodiaŭ mi faris jam bonegan negocon kaj samtempe mi montris min grandanima.

Sinjoro Smith ekridis kaj Jackson same.

— Groteska grandanimeco, kiel ĉiuj viaj faroj. Ni redonis iom el la ŝtata imposto.

— Ĉar mi respektas la memoron de la mortinto kaj respektas lian testamenton. Kvankam mi neniam vidis lin, Smith, sed ĉu ne estis devo morala, starigi la monumenton vere el kolektitaj monoj de la civitanoj ? Nu, la imposto estas ja tia ! Cetere la danko al Vilhelmo Grauer, al la nekonata granda fripono, akaparinta tiom da milionoj, instigis min al tiu ago. Lia testamento estis ja por ni ĉiela donaco. Verdire, kiam ni enŝipiĝis, ankoraŭ mi ne havis tiom da aŭspicioj, kiom efektive atendis nin en nia amata patrujo, forlasita antaŭ tiom da jaroj . . . Nu, verŝu Smith !

Smith obeis kaj transdonis glaseton da konjako al sia amiko.

— Ne tiel gustas kiel en la seka Ameriko. Je Dio, ne tiel gustas! Tie eble ĝi estas malpli bona, sed la scio pri danĝero faras ĝin pli plezura. Jes, jes, la vivo valoras pli, se oni pagas per ekscitiĝoj por ĝiaj plezuroj.

— Nu, koncerne la ekscitiĝojn, ni havis abunde ankaŭ ĉi tie. Kiel genie vi antaŭvidis ja ĉion. Vi meritas la nomon Majstro de la Rapidmanoj.

— Ne menciu plu tiun societeton. Nun mi batalas por la honesta vivo. Min tedas la senĉesa vagado. Mi ripetas, ke la testamento de Vilhelmo Grauer kondukas min al la moralhava vojo de la burĝoj.

— Nu, kaj se nenio estos en tiu seĝo?

— Eĉ tiam! Por ni egale. Eble eĉ pli bone, se nenio estos en ĝi, almenaŭ mi ne estos tentata. Mi volas havi trankvilan familian fajrujon. Tiam pastrobenitan hejmon kun multaj infanoj.

Smith denove ekridis kaj sinjoro Jackson same.

— De kiam vi fariĝis tiel sentimentala? La amo ne tre taŭgas en nia profesio. La filistra virino facile povas eltordi nian kapon.

— Sed ĉu vi ne aŭdas, Smith, ke mi volas forlasi la vojon, ĝis nun iritan?

— Vere mi ne komprenas vin. Nun, kiam *Fortuno* portas nin sur sia manplato, nun vi volas perfide forlasi vian amikon?!

— Tion ne! Tion mi ne diris ja. La profesion kaj ne mian amikon mi forlasos. Mi havas la antaŭsenton kiel ĉe la tablo dum kartludado, kiam mi konstante gajnas. Mi devas ĉesigi la ludon, ĉar se eĉ unu cendon mi riskos, mi povos iri hejmen sen ĉemizo. Tamen tiaj senĉemizaj promenoj sur la Broadway ne estas rekomendindaj. Ĉu?

— Ĉu vi havas jam fianĉinon, kandidatinton?

— Nu, ankoraŭ ne tre.

— Mi proponas al vi la amatinon de la urb-

estro. Katalina Kaptuŝin, la dancanta nuda miraklo.

— Lasu ŝin!... Laŭsente ŝi estas el nia branĉo. Mi bezonas fekundan virinon, kiu ne hontas naski dekduon da infanoj.

Smith plengorĝe ekridis kaj Jackson same.

— Kial, Jackson? Ĉu vi volas organizi rabistan bandon, formitan laŭ via vizaĝo?

— Nu, mi eltordus ja ilian kolon, se ili fariĝus tiaj friponoj kia la patro!

— Mi petas, ne insultu vin mem!

— Kial? Ĉu mi ne estas el la plej famaj ĉarlatanoj, kiun vane serĉas depost jaroj la plej lertaj detektivoj de New York?

— Ĉarlatano eble, sed neniel fripono. Granda diferenco! Vi estas ja majstra artisto de la profesio. Mi estas certa, se la maljuna generalo Venknejam estus vidinta vin en la impostejo, li estus tuj hejmen-irinta pro la penso, ke li jam alvenis antaŭe.

Smith ridis kaj Jackson same, sed nur momenton, ĉar energia frapo sonis ĉe la pordo de la vestiblo. Smith elrapidis, Jackson remetis la perukon, saltis en la liton kaj dolore veadis, sakris.

— Sinjoro Jackson, la inĝeniero Ignato Eltord alvenis, alportis por kontrolo la kontraktojn. Ĉu vi povas akcepti lin?

— Ve! Nu, tiu piedo! Pro diablo!... Jes, li venu!... Venu, kara inĝeniero, ni rigardu tiujn kontraktojn pri la melkeblaj bovinoj, kvankam mi fartas morte malsana...

XVI.

Grauer kaj Tamara kune paŝadis senvorte sur la vojo, kondukanta al la monto. Ili venis el la urbeto. La larma nebulo de la aŭtuno jam kuŝis neforpeble sur la tuta pejzaĝo. La tempo pasis al fino de Novembro. Post kelkaj semajnoj la abioj ricevos neĝoĉapojn. Grauer preskaŭ du plenajn monatojn pasigis jam en Bikitato. La senokazintaĵaj du monatoj tamen faris grandan aliformadon en lia animo. Li mem miris pleje pri tio. En la unuaj tagoj apenaŭ li forlasis la silentan ĉambreton, sidadis longajn horojn ĉe la fenestro, lernis aŭ meditadis amare, korŝire. Ĉiun linion de tiu kruela letero li revokis al sia memoro, torturis sian animon, sed li sentis, ke la turmentoj estas bezonataj. Jam multe pli objektive li povis prijuĝi la vulturhomon. Ne krimulon, sed malfeliĉan filozofon, baraktantan en abismo de pesimismo mondpercepto, li vidis en li, kiu staris sola en la momento de la krizo kaj nemirinde, ke li ĉiam pli kaj pli sovaĝe ekvadis en la labirinto de la Vivo. Jes, Vilhelmo Grauer estis same kompatinda orfo, kiel Cezaro Grauer. Ankaŭ li sentis neniam la karesadon de patrinaj manoj, lakeoj edukis lin kaj lia patro anstataŭ bonaj vortoj kaj ama severeco ŝtopis lin per mono. Interese, kvankam nenia parenceco ekzistis inter ili, tamen Cezaro Grauer sentis, ke la mizantropo estis por li iom pli ol zorganto. Nun du monatojn post lia morto li konstatis kvazaŭ mire, ke

li pensas pri li ne kun malamo, sed kun kompato. Tiu ĉi sento trankviligis lin. Sed al kiu li povis danki la resaniĝon, la ekiron sur la ĝusta vojo? Al Tamara. Li fariĝis apud la knabino kvazaŭ infano, lasanta ĉe la mano konduki sin. Tamara estis por li ĉio; obei al ŝi kaŭzis ĝojon al li. Li amis, tre amis tiun ĉi knabinon, sed neniam pensis pri ŝi kun alia sento ol la malforta pri forta. Kiam senvorte ili sidis unu apud alia, tiam li sentis, ke nun interbabilas ilia animo. Ĉiun semajnon li decidis reveni al Berlin, sed kiam alvenis la tago de la forvojaĝo, li ĵetis for de si la penson pri foriro... Kaj la fraŭlino de la skribmaŝino senpacience atendis lin. Siaj leteroj, peritaj de la eksimpresario de Vilhelmo Grauer, promesis multe da amuzajoj. Liaj konatuloj el Berlin moke nomis lin ermito kaj se li baldaŭ ne revenos, la bela Franciska Hinzen estos devigata akcepti la amindumadon de Henrik Altman, la bankdirektoro... Grauer ridetis pri la minaco. Eble antaŭ du monatoj la sama minaco estus kaŭzinta ĵaluzan turmenton al li, sed nun jam ne. Eĉ tiel li sentis, ke Henrik Altman pli konvenas al Franciska Hinzen ol li. Tamen repreni sian promeson li konsideris malhonesta ago. En tiuj leteroj estas ja tiom da ĉarmaj petolaĵoj, amaj promesoj kaj projektado pri revoj, ke estus honte kaŭzi doloron al tiu knabino. Nekontesteble, ke li promesis geedziĝon al ŝi, kiam li kredis pri sia amo. Kion fari? Ĉu li haltu duonvoje kaj diru al ŝi: »kara fraŭlino, mi eraris.« Vere li eraris ja, aŭ eĉ ne li eraris, ĉar tiu Grauer mortis kaj la *hodiaŭa* Grauer ne povas havi respondecon pri la promesoj de la mortinto.

Grauer rigardis al Tamara, kiu turnis sian vizaĝon, milde ridetantan, al li. Ŝi atendis alparolon, Grauer nur rigardis kaj meditadis plu. Lia animo apartenas tute al Tamara, al tiu ĉi muzikvoĉa knabino, kiu kredon semis en lian animon. Kiel stranga estas la Vivo. Oni donacas la animon al la amata persono, sed la korpon, la *nomon* donacas al tiu, kiu tenas la

promeson, facilanime faritan. Kaj oni nomas tion — *moralo*. Ne! Tio ĉi estas malmoralo, trudata al ni per homfaritaj leĝoj. Por la okuloj kaj buŝo de la mondo sufiĉas la korpo kaj nomo. Kial pensi pri tio, ke la animo pereas en la malbenata batalo. La animo estas ja *io nevidebla*. Eble ĝi ekzistas, eble ne. Multaj neas ĝian ekziston... Ho, li ne povas nei tion, ĉar sentas la doloran baraktadon de tiu nevidebla io.

La meditado sulkigis la frunton de Grauer. Tamara estus dezirinta forkaresi tiujn zorgojn. Ne permane, sed pervorte, perridete, sed nun ŝi sentis sin tre malforta. Ankaŭ ŝian koron tenis en potenco la doloro, la dolĉa doloro de la amo. Jam de longe ŝi marĉandadis kun sia sorto, rezignis kaj sole en pensoj ŝi premis sin al la viro, kiun tutanime ŝi deziris por si. Estis minutoj, kiam ŝia sango ekribelis pro la altrudita rezigno kaj konjekte sentis, ke ŝi volonte neniigus en la ĉirkaŭpreno de tiu ĉi viro. Tiaokaze ŝi bezonis sian tutan energion por skurĝi sin je konscio. Konstante ŝi devis teni la penson vivanta, ke li apartenas al alia virino. Ĉiun semajnon alvenas en duobla koverto letero el Berlin por li. La ekstera adreso por Francisko Hinzzen, sed la interna... Kaj li ĉiam legas tiujn leterojn al ŝi. Ĉu li ne sentas, ke tia konfido kaŭzas doloron al ŝi? Turmente estas vidi, ke la virino, rabanta de ŝi la amatan viron, parolas tro sobre por ne rimarki ŝian nuran intereson pri la riĉa edzokandidato. Sed Tamara ne povas averti lin. Ŝi devus honte ruĝiĝi pro eventuala miskompreno, ĉar li facile povus konsideri tion alkroĉiĝo de malriĉulineto. Pli volonte morti ol veki tian suspekton! Kiel bone, ke ankoraŭ ili neniam parolis unu al alia pri siaj sentoj. Eĉ tio povas esti verŝajna, ke tiu ĉi viro ne amas ŝin kaj ŝi misklarigas la motivon de lia ĉiam prokrastata forvojaĝo. Nun subite ŝi pensis pri la nova datlimo, pri la tago de la baldaŭa disiĝo. Kio okazos poste? Poste, kiam li lasos ŝin for por ĉiam?! Sed longe jam ne povas daŭri la bela sonĝo... Ŝi luktis kontraŭ la ploro, suf-

oke premanta ŝian gorĝon, retenis la veploreĝon, sed la larmoj aperis en ŝiaj okuloj.

Grauer denove rigardis al Tamara, ĉar li volis forpeligi siajn turmentajn pensojn per ŝia voĉo. Li rifugiĝis ĉiam al tiu ĉi muzika voĉo, kiam tro torturis lin la meditado kaj soleco. Melankolia ĉarmo ombremis ŝian mienon. Grauer neniam vidis ŝin tia. Surprizite li rememoris, ke li konas nur ŝian rideton, ŝian konsolon muzikan voĉon, sed ŝiajn larmojn tute ne. Jen, hodiaŭ ili ŝanĝos rolojn. Dum momento li forgesis sian ĉagrenon, kvankam li sentis sin tute mallerta en la nova rolo. Li prenis la manon de la knabino.

— Tamara, diru, kio doloras al vi? Nu, rakontu al mi!

Tamara ekskuis la kapon, kvazaŭ pelante for la ĉagrenon kaj trudis rideton sur la lipoj.

— Nenio!... Nenio ĉagrenas min!... Iomete mi pripensis nian ĵus faritan viziton ĉe la maljuna instruisto. Tiel emocie estis vidi oĉjon Belvar, viciganta siajn ses gefilojn laŭ la orgenfajfiloj kaj salutanta la fremdulon. Ho, memorinda tago por li! La unuan fojon li parolis kun eksterlanda samideano. Hja, la salajro estas tro malgranda kaj li ne povas permesi al si ekskurson al kongresoj, kvankam ĉiujare li decidus la vojaĝon, ŝparadas, sed poste la sumeto ekiras al la apoteko pro neatendita infanmalsano.

— Nu, en la venonta jaro mi invitos la maljunulon en Berlinon, sendos por li ĉion necesan kaj li estos mia gasto.

— Vi estas bona homo.

Grauer ridetis.

— Nenia boneco. Bagatelaĵo, eĉ, simpla egoismo. Ankaŭ vi kaj via frato estos kun ni... Jes, jes, kaj ni vojaĝos, vagados longe en la mondo por rigardi la vidindaĵojn.

— Jes... — Tamara pensis, ke nenio realiĝos el tiuj belaj revoj. Sed kial diri tion? Kial malgajigi lin? En tiaj revoteksadoj ofte la animo montras sian

veran karakteron. La plenumiĝo dependas de multaj aliaj cirkonstancoj.

— Tamara, vi eĉ ne ĝojas. Tiel vi diris tiun jeson, kvazaŭ vi estus respondinta nee. Sed *vere* mi invitos vin ambaŭ kaj ankaŭ tiun ĉi maljunan instruiston.

— Mi scias ja.

— Kaj mi serioze koleros pro rifuzo de la invito.

— Ne certe, ke serioze vi *koleros*, se ni restos hejme...

— Tamara !

— Ne estas permesate koleri, *nun* ne... eble *tiam*, kiam ni rifuzos. Hodiaŭ principe mi akceptis vian inviton. Hodiaŭ ni ĝoju pro tio.

— Mi ne komprenas... Tiel strange vi diris ĉion ĉi. Kio ĉagrenas vin ?

Tamara forigis de la frunto la buklojn. Ŝi sentis, ke neeble longe daŭrigi la konversacion en tia tono, ĉar ŝi ne havus forton por ĝi.

— Ĉu via fianĉino skribis ? — Ŝi demandis kun ŝajna facileco.

— Ŝi skribis... Antaŭtagmeze alportis la poŝtisto... Nur kelkajn frazojn. Ŝi atendas.

— Jes... Kio nova en Berlin ?

— Nenio interesa... almenaŭ por mi nenio interesa.

— Kiam vi vojaĝos ?

— Post du tagoj.

— Jes... Do, postmorgaŭ.

La voĉo de Tamara indiferente sonis, sed ŝia koro kun dolora tremeto tamburadis. Kelkajn paŝojn antaŭ ili estis benko sur la vojrandoj. Ŝi kuris antaŭen, kvazaŭ falis sur ĝin, sed tamen kun laŭta rido proponis lokon apud si por Grauer. Li sidiĝis. Jam ne estis malproksime la domo, sed li ne sopiris la silenton de la ĉambreto, ne volis disiĝi de Tamara. Post du tagoj li vane revokados ja tiun ĉi horon. La tie ĉi pasigita tempo fariĝos nur memoro, ĝistombe akompananta memoro. Lin atendas la oficejo, la laboro. Mensogo !

Li mensogis al si, ĉar sentis, ke post foriro li nepre devos ekvagadi tra landoj, kontinentoj, oceanoj por trovi trankvilon. Kial? Ĉar ĉiuj sentoj ligas lin al tiu ĉi loko. Tamen estus bone paroli kun Tamara, dek-lari la sentojn, peti konsilon, sed... Malfacile, tre malfacile! Kion pensus tiu ĉi puranima knabino pri li, se ĉion li rakontus al ŝi? Certe ŝi malestimus lin. Antaŭe ŝi demandis ja pri lia fianĉino.

En longa silento ili sidis. Tamara ĝojis pro la senvorteco, sed lin incitis la muteco, serĉis temon kaj la penso peziĝis sur lian koron pri la baldaŭa disiĝo.

— Strange kruela estas la Vivo, — li ekĝemis.

— Jes, strange... — Tamara senscie ripetis.

— Movo por la movo, kiel la maljuna Grauer diris. Bela celo, mi povas konfesi! Hhaha!

Tamara ekatentis. Du monatojn ŝi vigle senlace gardas, kontrolas la pensojn de tiu ĉi viro kaj sciis, ke ŝi sukcesis redoni kredon al li, tamen la ĵus dirita frazo pruvas senrezulton de ŝia tuta klopodo. Ekstermi tion, ekstermi kunradike! Ŝi ne povas lasi, ke li refalu en tiun staton, kiun li havis ĉe la alveno. En la unuaj tagoj estis plifacile, sed depost la alveno de la postlasitaj skribaĵoj de Vilhelmo Grauer ŝi devas batali ĉiutage kun la monstro nevidebla. Ŝi ne sciis, kion enhavas tiuj skribaĵoj, sed ilian efikon ŝi vidis, spertis. Ŝi ne povis malpermesi al li okupi sin pri tio, sed tamen ŝi sentis la batalon senvenka, ĝis en pensomondo de la mortinto vagadas tiu, por kiu ŝi volonte oferus eĉ sian vivon. Kaj jen, nun ŝi eĉ ne havas multe da tempo. Postmorgaŭ li foriros de ŝi, pesimismo estas en lia tornistro, la plej malbona porvoja ŝarĝo al la senkamarada vaganto. Ĉu lia fianĉino? Ŝi neniel povos kompreni tiun ĉi viron, ĉar ŝia spirito restos fremda ĉiam por lia animo. Jen, tion Tamara klare antaŭsentis. Neniam tiel forte premos la orfeco lin, kiel de tiu tempo, kiam per leĝa papero li estos katenita al tiu knabino. Tiu ĉi viro celperdinte migr-

adas ja tien kaj reen en la mondo kaj lian koron muelas ia sekreto. Si sciis jam, ke Vilhelmo Grauer ne estis lia patro, sed kiuj estis do liaj gepatroj? Ĉu li estas trovita infano? La nomdonacinto certe ne estis sentimentalita, ĉar tute rompĉis la animon de la knabo adoptita. Jam ofte ŝia frato provis diveni la sekreton de lia deveno. Sin tute ne interesis. La fantazion de ŝia frato incitis la vivo de tiu mizantropo. Nemirinde, ĉar li volas partopreni en la konkurso por la starigota monumento kaj ĝi devos respeguli tiun animon, en kiu naskiĝis la bizara penso. Sed nun ankaŭ ŝin interesas tio. Si volas koni la sekreton por dividi la turmentojn, devenantajn el ĝi. Por uzi egalajn armilojn oni devas koni la malamikon.

Tamara ekkaresis lian manon, ripozantan sur la ŝia kaj per tio ŝi devigis lin rigardi al ŝi. La rigardoj renkontiĝis. Ŝia mieno surprizis lin. Ĝi estis dolore bela. Li pleje deziris terenĵeti sin antaŭ ŝi kaj ekkrii en la silento tion, kion li sentis jam delonge: »Tamara, mi pereos, se mi devos foriri de tie ĉi!«

— Rigardu, nur rigardu al miaj okuloj, rigardu ĝis la fundo de la animo — ŝi komencis duonvoĉe milde kaj komplate. — Mi estas via fratineto. La sufero, akompananta min de mia infanaĝo, faris min via fratino. Vi konas ja la historion de nia familio... Ne interrompu! Nun antaŭ ol forlasi nin vi devos forpeli la timotremon de la fratino. Du monatojn jam mi staras ĉe via flanko tenante vian manon. Tion vi devis senti ja, ĉar mi volis, ke vi sentu tion. Mi ne konis kaj ne konas la sekreton, kiu muelas vian animon. Mi ne estis scivola, nek volis ŝajni maldiskreta. Mi pensis, ke mi venkos kaj vi forgesos vian ĉagrenon. Mi trompiĝis. Tre dolore al mi scii, ke ĉiu penado estis vana.

La voĉo de la knabino ekstremigis ĉiun kordon de lia animo. La mildeco katenis, emociis lin, la riproĉo kaŭzis doloron al li kaj la aludo pri la sekreto vekis timon en li.

— Tamara, neniam mi vidis vin tiom stranga. Vi embarasas min kaj mi ne scias, kion vi deziras.

— Mi ne estas stranga. Ne diru tion! Ĉiam mi estis tia kaj al ĉiu mi kondutas same. Al la maljuna instruisto, al onjo Lida, al mia frato. Mi nomis min via fratino. Mi havis rajton por tio, ĉar nur viajn vortojn mi citis. Fiera mi estas pri tia distingo, ĉar esti fratino de bona homo signifas havi honoran distingon. Nun mi parolis do al mia frato. Mi havas peton.

— Ĉion deziratan mi plenumos.

— Ne faru facilaniman promeson. Mi petas oferon ne por mi, sed por vi mem... Rakontu al mi ĉion... ĉion pri vi kaj pri Vilhelmo Grauer!

Grauer kun terurmieno rigardis al Tamara. La knabino admone, persvade kuraĝige premadis lian manon. Ŝia rigardo petegis la respondon, sed Grauer flanketurnis sian kapon. Li ne povis toleri nun la karesadon de la blujaj okuloj. Regis lin la penso, ke per tia konfeso li fortimigos por ĉiam de si tiun ĉi knabinon, ĉar li mem timis ja ofte, ke la besteco de la gepatroj foje rompos vojon en li por jubile demonstacii pri la ideo de Vilhelmo Grauer. La kaĝo de lia patrino fantomadis ĉirkaŭ li.

— Ne timu, — muzikis la voĉo de la knabino — vi ne povas ja diri tian, kia malpliigus mian simpatian, respekton al vi. Krimulo vi ne estas ja.

— Tamara, vi ne scias, kion vi deziras. Eternan doloron vi prenis sur vian koron, se mi cedus al via deziro. Eble eĉ timigite vi rifuĝus de mi... Mi estis tre senpripensa, kiam mi nomis vin mia fratino. Mi ja ne... Tamara, ne koleru min! Mi ne estas malhonestaj, nur malfeliĉaj. Pri ĉio, kio okazis mi ja ne povas havi respondecon. Nur de du monatoj mi scias tion, kion neniam estus permesite scii, se ekzistas eĉ atoma homa indulgo en la koro de Vilhelmo Grauer. Ne deziru konfeson de mi, ne deziru konfeson pri mi!

Grauer luktis kontraŭ la larmoj altrudantaj sin kaj Tamara bedaŭris, ke ŝi pridemandis lin. Ŝi ne

volis koni jam la sekreton, kvankam sentis, ke ĝi muelos la vivenergion de la viro. Nu, ŝi devos batali plu kontraŭ la nevidebla monstro, aŭ kapitulaci kaj retiriĝi. Si lasis elgliti la manon de Grauer el la sia, kaj leviĝis. Grauer retenis ŝin.

— Tamara, mi petegas, ne iru for ankoraŭ, nun ne! Ni restu kune iomete!

— Mi ne iros ja sola. Ankaŭ vi venos kun mi. Ni havas ankoraŭ du vojkurbojn ĝis la hejmo. Ni vizitos mian fraton. Li promesis por la hodiaŭa tago montri la modelon de la monumento. Ĉu ĝi interesos vin?

— Jes...

— Nu, jen, nun vi jesis tiamaniere, kvazaŭ vi estus respondinta nee... Sed mi komprenas. Ne povas interesi vin tia monumento, kiu respregulas la animon de tiu homo, kiu ĵetis vin en la marĉon de la mal-espero... Tamen mi povas suffloreti sekreton. Ankaŭ mi faris kelkajn rimarkojn por la ideo de Juro. Ĉu ni rigardu ĝin?

— Jes!

Senvorte, enpensiginte ili ekiris. Malsupre, ĉe la piedo de la monto ĵus enkuris aŭtomobilo sur la vojon al la monto. Ĝi bruis, disŝprucis la akvon el la radfaritaj kavetoj. Ili tiris sin ĝis la vojrandoj. La aŭto preterkuregis kaj tiris post si ilian rigardon.

— Ĝi venas el la ĉefurbo. Mi vidis la signon: »STM. B.«

— Kien ĝi volas? — scivolis Grauer.

— Verŝajne gastoj alvenas en iun domon, ĉar tiu ĉi vojo kondukas nur al la vilaoj.

— Vere, jes, ... Ĝi haltis antaŭ la domo de panjo Lida... Eble iu ekflaris, ke mi loĝas ĉi tie.

— Ĉu virino aŭ viro? Estus bone antaŭe scii.

— Virino? Ho, mi ne havas ja konatulinon.

— Nu, kaj via fianĉino?

— Ŝi ne konas mian restadejon. La leterojn peras la impresario de Vilhelmo Grauer kaj mi ne

pensas, ke tiu ĉi viro kuraĝis babili. Li scias ja, ke per tio li riskus sian postenon.

— Rigardu, rigardu! Ne virino. Viro. Eble via homo, portanta ian sciigon.

— Eble... Ni rapidu por scii ĉion ĝustatempe!

La neatendita vizitanto tre malagrable tuŝis lin. La koron de Tamara tremigis la penso, ke eble tia granda aŭto jam hodiaŭ forportos kun si ŝian amikon. Grauer turnis sin al la ŝoforo, sed li ne komprenis la demandon. La knabino do interpretis.

— Kiun vi alportis?

— La sinjoron ĉefnotarion de Strutmagen, lian kortegan konsilantan moŝton Jonathan Krak.

— Ĉu li venis al mi? Kia malsaĝa demando. Kompreneble, ke al mi! Mi ne volas renkonti lin. Certe pri la heredaĵa afero oni elcerbumis ian novan eblecon. Nenian rilaton mi volas havi kun tiu afero!

Grauer ekiris al la domo de Koŝelev, sed la knabino retenis lin.

— Tamen estus dece paroli kun li. Eble li venis por ia tre grava afero.

— Vi estas prava, Tamara. Mi parolos kun li, sed ankaŭ vi venos, ĉu ne?

— Ne. Aranĝu viajn aferojn kaj poste venu al ni! Mi invitas vin al la adiaŭa vespermangŝo.

— Nu, sed nur postmorgaŭ mi...

— Kiu scias? Eble jam morgaŭ vi devos forlasi nin... Nu, rapidu, ankaŭ Juro atendas vin!

XVII.

Grauer haltis en la vestiblo kaj kelkajn momentojn atentis. La parolado ne el lia ĉambro, sed el tiu de la mastrino aŭdiĝis. La bona virino kondukis la gaston tien. Li subaŭskultis, ĉu ili ne menciös lian nomon : Francisko Hinzen aŭ Cezaro Grauer. Tiujn du nomojn li atendis, ĉar la bagonlingvan konversacion li ne komprenis. La ĉefnotario parolis. Lia voĉo kvazaŭ sentimente flutadis. Certe li persvade pride-mandas la virinon kaj tion li faras tute intime, ĉar ĉiun duan frazon li komencas, aŭ finas per »*slamka Lida*«. Tiom li komprenis ja. »*Kara Lida*«. Kiel senĝenaj estas tiuj ĉi bagonoj inter si, li pensis. Ĵus li volis ekfrapi la pordon, kiam la eksploda rido de panjo Lida haltigis lin. Io aplaŭde klakis, kiel la sono de ŝultrofrapo, farita pro senbrida gajeco. Mi ne opinias, ke ili parolas pri mi, pensis Grauer. Eble la ĉefnotario por peli for sian enuon komencis amindumadon. Nu, li distru sin !

Grauer enpaŝis en sian ĉambron por tie atendi la viziton. Kial rapidigi la malagrablan renkontiĝon? Li sidiĝis al la fenestro, rigardis al la velkinta ĝardeno de Koŝelev. La fenestroj de lia laborejo estis malfermitaj. La du gefratoj staris antaŭ la monumento, kovrita per tolo, kaj ili paroladis. Koŝelev karesis la frunton de sia fratino. Tamara ploris.

Dum Grauer enprofundiĝis en la observadon, en la alia ĉambro Jonathan Krak travivis la plej tragi-

komedian epizodon de sia vivo. Post multaj klarigoj la virino rekonis sian gaston kaj rememoris pri li. Ŝi sentis sin tre honorata pro la vizito kaj prezentis la plej komfortan seĝon al sinjoro Krak.

— Nu, sinjora moŝto, se vi ne diras, neniam mi estus povinta rekonu vin. Iomete vi ŝanĝiĝis.

— Mi maljuniĝis, kara Lida. Jes, jes, jam pasis dudekdu longaj jaroj. Ankaŭ vi ne estas jam la sama ridetanta blonda belulino. Sed per tio mi ne volis diri, ke vi maljuniĝis, kara Lida. Ho, neniel, kara Lida!

— Ne dudekdu, sed dudektri jaroj... Per kio mi povas servi al vi, sinjora moŝto?

La simpla demando iom ĝenis sinjoron Krak. Li ne tiel planis en si la renkontiĝon. Nu, jes, tiuj vilaĝanoj tuj kaptas la aferon ĉe la kolo, kvankam li bezonas tempon por enkonduki. Li ne povas ja enfali kun pordo en la domon. Necese malfermi singarde ĝin! Eble la ĝojo malbone efikus al ŝi. Almenaŭ la ĝojo ĉiam kaŭzas sveneton al Lola, se ŝi ne estas singarde preparita por ĝi.

— Jam mi ne estas plu sinjora moŝto, sed ĉefnotaria kaj kortega konsilanta moŝto...

— Pardonon, mi ja ne sciis.

— Ne pro tio mi diris, kara Lida, sed por revoki la memorojn pri tiu tempo, kiam eĉ sinjora moŝto mi ne estis, nur simpla sinjoro Krak, notarihelpanto. Ĉu vi rememoras, kara Lida?

— Jes, vi bonvolis esti tro juna.

— Jen la vero, kara Lida, mi estis tro juna por pripensi miajn farojn. — Sinjoro Krak tusadis iom signife. — Tio estis ja antaŭ tiom da jaroj, ke nemirinde, ke mi forgesis kio okazis inter ni.

— Inter ni?... Ĉu okazis io inter ni, altestimata kortega konsilanta moŝto?

Krak estis surprizita pro la demando. Ĉu eble, ke tiu ĉi virino estus forgesinta tion? Ne! Ŝi havis ja konstantan avertilon antaŭ si: la etan Lida. Tre ĝenata li sentis sin. Verŝajne pro delikata takto ŝi ne

volas rememori pri tiu junaĝa flankenpaŝo. Ho, kiom da delikateco en tia simpla vilaĝanino! Eĉ tion ŝi ne sciigis al li, ke ŝi sentas sin patrino.

El la bona virino subite eksplodis la ridego kaj konfidence forte frapis la ŝultron de la ĉefnotario. (Tio estis la plaŭda klako, kiu haltigis Cezaron Grauer antaŭ la pordo.)

— Ĉu ne honte, atestimata moŝto, ke vi rememoras kaj rememorigas min pri tiaj petolaĵoj?

Sinjoro Krak, verdire, konsterniĝis. Por tiu ĉi virino *unu kromleĝa infano* ŝajnas nur petolaĵo! Ho, vilaĝa moralo! Nu, egale. Li devas ja komprenigi al ŝi, ke li klopodis ripari la pasintecon. Eble tia ĝojo ekskuos ŝian dormantan intelekton.

— Kara Lida, kvankam mi ne scias, kial ridi pri tio, se ni kune rememoras pri la pasinteco, metinta nigran punkton sur nian vivon, sed precipe ĵetanta sian ombbron sur vian estimindan personon...

— Mi ne komprenas, pri kia *nigra* punkto kaj *ombro* vi bonvolas paroli.

— Bone, Lida, ke eĉ nun vi klopodas kaŝi antaŭ mi la makulon, sed tute superflue. La hazardo malkovris antaŭ mi mian junaĝan flankenpaŝon kaj mi kiel sincere konsciencia viro klopodis ripari ĝin. Mi edzinigis la malgrandan Lida kun brava vireto. Guste hodiaŭ matene okazis la geedziĝa ceremonio kaj mi feliĉe rapidis sciigi tion al vi, kara Lida. Diru, ĉu vi povas pardoni al mi?

— Hej, do vi, kara atestimata moŝto, bonvolis akiri tiun delikatan sinjoron por ŝi?! Sed kial pardoni tion?

Sur la frunto de Krak aperis la ŝvitperloj. Nun profunda konsterniĝo elvokis ilin. Ho, vilaĝa moralo!

— Komprenu do, kara Lida, ke per tio mi volis ripari la flankenpaŝon, kiun mi faris en via vivo. Se *nomon* mi ne povis doni al *nia* infano, almenaŭ mi akiris tian *edzon*, kiu...

— Al kiu *nia* infano?

— Al nia eta Lida, al mia malfeliĉa sennoma filineto.

— Nur nenia komuneco! Lida estas *mia* filino.

— Nu, bone, sed ŝia patro estas mi, — eksplodis Krak perdinte la paciencon.

La vorto haltis en la gorgo de la virino. Si timigite rigardis al la ĉefnotario.

— Sed kiel vi bonvolas kompreni tion?

— Kiel mi komprenas, kiel mi komprenas? Do tiel kiel tio estas. Lida estas mia filino, *nia* filino, la frukto de nia senpripensa junaĝa flankenpaŝo.

— Pardonu min, atestimata moŝto, sed vi ŝercas aŭ bonvolas esti malsaĝulo. Unue, Lida ne estas frukto, due, Lida neniam estis via filino...

— Sed de kiu?!!

— Nu, de mi, mankison, atestimata moŝto. De kiu ŝi estus? Mi naskis ŝin, mi edukis ŝin, mi instruis ŝin. Nu!

— Sed ŝia patro? Malfeliĉulino, kiu estas ŝia patro?!

La bona virino iomete ruĝiĝis, tiradis embarasite la randon de sia antaŭtuko, iomete akriĝis la gorgon je parolo.

— Do, ŝi estas, ... ŝi estas de Joĉjo.

— De Joĉjo?! De kiu Joĉjo? — La voĉo de Krak knaradis lamente kiel la rado neŝmirita.

— De tiu... Estus longe rakonti ĉion. Kiam mi venis hejmen, Joĉjo loĝis en tiu ĉi domo kaj li diris, ke li prenos min al si kiel edzinon... Nu, kaj li prenis min al si, sed nur tiel... nur tiel, ĉar, li diris, ke tuj neeble... kaj li elmigris al Ameriko kaj de tiam ni nenion scias pri li... Sed lia patrino tre amis sian nepinon kaj tial prenis min kun la infano al si. Tiel mi ricevis tiun ĉi dometon, aŭ eĉ pli ĝuste dirite, tiel ricevis tiun ĉi dometon mia filino Lida. Jes, ĝi apartenas al ŝi. Jen, tiel okazis.

Kion Krak sentis, estas nepriskribebla. Prefere li estus sufokinta tiun ĉi virinon. Kia malmoralo! Ŝi

kuraĝis doni sin post li al alia!! Kaj nun eĉ ŝi senigas lin de unu ĉarma infano! Konsternige! La kolero preskaŭ krevigis lin. Lida ne estas lia filino. Sed do kial li edzinigis ŝin kun Stubek? Kial li detruis la familian harmonion? Kial li donacis dote sian antaŭan oficon? Kial li aĉetis en sekreto la fianĉinan tolaĵon? Kial do?! Tio estas ja pumpado de ĉarlatano! Tiu ĉi virino simple elpumpis lin per la memoro de la pasinteco kaj nun ŝi diras rekte al liaj okuloj ke Lida ne estas lia filino, sed tiu de Joĉjo?! Kiu Joĉjo?! Simple, nur Joĉjo!

— Kial vi ne skribis, ke ne mi estas ŝia patro?
— kriis kolere Krak.

— Sed neniam vi bonvolis demandi eĉ tion, ĉu mi havas infanon aŭ ne. Kiel mi sciu, ke oni devas raporti pri tio en la ĉefurbo?

En sinjoro Krak vekigis la prikonsidero kaj rekonsis sian eraron. Simpla suspekto, kvankam motivebla supozo trompis lian sentemecon. Tio ne estas elpumpado, sed harstariga malsaĝaĵo.

— Mi estas sentimentala azeno.

— Kio vi bonvolas esti, altestimata mosto?

Subite li pripensis la sekvojn. Certe tiu ĉi vilaĝanino rakontos ĉion al la najbaroj kaj la famo disvastiĝos, filtriĝos tra la limoj de Bikitato. La tuta Bagonio ridetos pri li kaj oni faros proverbon: »Li edzinigis sian filinon kiel la ĉefnotario de Strutmagen«. Terure! Tian memoron pri si li ne povas lasi al la posteularo. Eh, diablon al la posteularo, sed tio sufiĉus por redoni la hejman suverenecon al Lola kaj poste denove li mem povus forportadi la lavakvon.

— Aŭskultu min, kara Lida! Okazis miskompreno. Al tiu ĉi miskompreno via filino povas danki, ke hodiaŭ ŝi fariĝis la edzino de la urba notario. Mi ne volas prisilenti tion, se tiu ĉi miskompreno estos kolportita, vian bofilon mi eksigos kvazaŭ neniam li estus havinta tiun oficon. Ĉu vi komprenas?

— Jes, mankison, altestimata moŝto, — respon-
dis rapide la timigita virino.

— Nu! Vi amas ja vian filinon, ĉu ne?

— Memkompreneble, ke mi amas ŝin. Ĉu tio
estas peko?

— Kiu parolas ĉi tie pri peko? Mi volas nur,
ke al neniu, eĉ al la pastro ne diru, ke Lida ne estas
mia filino.

— Mankison, altestimata moŝto, ĉu mi diru, ke
ŝi estas via filino?

— Ne, ne, ne! Nu, tio estus ankoraŭ pli skan-
dala! Nenion vi diros. Ĉu komprenite? Nenion! Kaj
precipe tion ne!

— Jes, jes, mi komprenas. Ŝi estas ja de Joĉjo.
Mi scias ja. Eĉ tion neble diri?

— Kial ne? Nur tion!

— Nu, antaŭe vi bonvolis tre koleri, ĉar mi
diris tion.

— Nun jam ne plu mi koleras. Mi ĝojas...
Ve, kiel mi ĝojas! Do koncize, Lida estas de Joĉjo
kaj ne de mi. Bone memorfiksu tion!

— Jes.

— Nu, Dian benon, kara Lida! Nun mi rekuros
al la ĉefurbo. Terure tumultiĝas la farotaĵoj. Vi scias,
ke tiu ĉi Grauer-a afero...

— Mi ne scias.

— Jes, jes... Kiel vi povus ja scii... Ne grave!

Sinjoro Krak malfermis la pordon. La adiaŭ-
adon aŭdis ankaŭ Grauer. Li iris al la pordo kaj ka-
pitulacis al la neevitebla. Gentile li malfermis la por-
don. En tiu momento Krak turnis sin al li. Sur lia
vizaĝo aperis surprizo. Kiel tiu ĉi povas troviĝi ĉi tie?
La plej lertaj detektivoj de la lando longajn semajn-
ojn serĉas, esploras liajn postsignojn en eksterlando
kaj nun fine pruviĝas, ke li eĉ ne forlasis Bagonion.

Grauer legis el lia mieno la surprizon kaj mal-
benis sian eraron. Do li serĉis ne lin, sed alia afero

devigis lin veni ĉi tien. Nu, li senpripense kuris rekte en la faŭkon de la leono.

— Kiel, sinjoro Grauer, vi ĉi tie?

— Jes, mi pensis, ke vi venis viziti min.

— Ho, tute ne!... Tamen — Unu penso trafulis la kapon de la ĉefnotario. Tiun ĉi homon la bona Dio sendis por eltiri lin el la ŝlimkirlaĵo. Eble per sendanĝera mensogeto li sukcesos naĝi al la seka bordo. — Tamen mi aŭdis, ke vi restadas en tiu ĉi regiono kaj mi pensadis pri la vizito.

Grauer sentis, ke la ĉefnotario ne diris veron. Li venis por alia afero.

— Mirinde, ke tiel rekte vi trovis min. De kiu vi eksciis mian adreson?

— De kiu? Nu, mi venis nur tiel... nur laŭ flarsento. Sed nun treege mi ĝojas vidi vin. Nu, jen kion mi nomas feliĉa bonŝanco!

— Mi pensas, ke por vi tio signifas bonŝancon, sed por mi malfeliĉon, ĉar miajn du lastajn tagojn vi malagrabiligas per tio.

— Sed kial incitas vin nia respektplena interesiĝo? Ni ne volas ja malbonon al vi.

— Sed senĉese vi ĉagrenas min per tiu heredaĵo. Denove vi volas persvadi min al ia neblaĵo. Nu, mi firme deklaras jam nun, ke mi neniel volas influi ties aranĝon. Ĝi ne koncernas min kaj mi ne deziras havi rilaton al ĝi.

La rigida rifuzo ne fortimigis sinjoron Krak. Li momente konsideris la situacion. Ian enkondukan parolon fari certe ne malutilus. Pleje efikas la sincereco. Jen, eĉ tiu temperamenta Scipo Prikatel mildiĝis kaj per tio li povis ekparoligi lin.

— Mi petas vin, sinjoro Grauer...

— Ĉi tie oni konas min Francisko Hinzen.

— Kompreneble, inkognito. Bone! Do, kara sinjoro Hinzen, mi konfesas, ke eĉ en la plej aŭdacaj sonĝoj mi ne kuraĝis esperi pri tio, ke mi renkontos vin ĉi tie. Mi venis por...por...jes...por plenumi

komision ĉe la domposedantino. Ne surprizu vin, ke tamen mi konsideras la renkonton feliĉo. Vian inkogniton mi ne tuŝos kaj ne malagrabiligos viajn du tagojn, sed... sed mi havus unu kondiĉon. Jam antaŭe mi deklaras, ke mi ne intencas persvadi vin al ia absurdaĵo. Simple mi petas informon. Per sola vorteto vi povas finarangi ĉion.

— Nu, demandu, sinjoro!

— Ĉu ekzistas heredaĵo aŭ ne?

— Mi ne komprenas.

— Vi devas ja scii, ke la sefo de la new-yorka banko kion entenas.

— Jes! Laŭ mia scio, tie estas la mono kaj la valorpaperoj. Vilhelmo Grauer en la letero, transdonita de vi, sciigis min pri tio kaj definitive deklaris, ke sian tutan havaĵon li testamentis por sia naskurbo. Mi... mi heredis la havaĵon de mia patrino.

Sinjoro Krak plenkontente gratulis al si mem, gojmiene dankis la informon.

— Verdire, via deklaro tre trankviligas min. Sciu, ke ofte en penso mi akuzas la karmemoran mortinton, ke en la asekurita sefo ekzistas ja nenio krom aero.

— Kiel vi pensas?

— Nu, via patro... sed ne konsideru tion ofendo al via fila pietato, kion mi diros... via patro estis iom ekstravaganca kaj kvankam supozante, sed neniel kredante, mi pensis, ke li faris nepardoneblan ŝercon per tiu testamento... Ĉu vi ne pensas?

Grauer longe silentis. La unuan fojon li sentis, ke tia langmonro vere tre karakterizus tiun homon, Eble tio ĉi estas la postmorta grimaco, pri kiu li aludis en la letero. Gis nun li vidis tion en la groteska luktado de la homoj por la mono. La tuta mondo ridis ja kelkajn semajnojn pri la demonstracio de la prostituinoj, en New York ĉiusemajne eksperimentas la armitaj bandoj kaj ĉi tie estos tia perturbo, kiu certe kondukos al revolucio kaj tiam fluos sango sur

la stratoj, stertorado de mortvunditoj, pereco de bi-enoj kaj tragedioj signos la vojton, kiun finkuris la monavida amaso. En tiu ĉi momento li pensis la unuan fojon; ke eble la postmorta grimaco estas: *la batalo por nenio*. Movo por la movo... Kaj li ne havas energion por haltigi ĝin, tamen li provos.

— Sinjoro Krak, mi ne tre kredus pri la ekzisto de la mono.

— Ĉu vi dubas pri tio? — Krak paliĝis, kvankam li mem havis dubojn, sed tiujn tuj neniigis la grandioza sumo, pagita al la asecura societo kaj la atestilo de la banko. — Komprenoble, vi ja ne estis persvadebla por procesi kontraŭ la testamento.

— Vi miskomprenas min kaj ofende suspektas. Se certe mi scius, ke tiu grandioza heredaĵo troviĝas en la sefo kaj mi propraokule vidus ĝin, eĉ tiam ne interesus min la afero. Mi havas por tio kaŭzon. Sed se mi scius, ke la testamenta historio estas sole freneza ŝerco de erarvaginta homo, tiam eĉ sen demando mi estus deklarinta tion jam delonge. Je mia honora vorto mi diras tion.

— Do koncize, ankaŭ vi ne povas aserti ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas tiu heredaĵo?!

— Vere, tiel!

— Kion vi farus en la situacio de la urbo Strutmagen, aŭ kiel Urba Konsilantaro.

— Simple, mi rezignus.

— Kaj cedus ĉion al la prostituinoj?

— Gustadire nenion, *la nenion*...

— Do vi estas konvinkiĝinta, ke nenio troviĝas en tiu sefo.

— Nu tion mi ne riskus aserti. Mi diris ja, ke en la situacio de la Urba Konsilantaro mi rezignus.

— Nu, se tamen ekzistas la heredaĵo, do prezentu al vi, ke ĉion heredus la balaaĵo de la socio. Ĉu vi ne pensadis pri tio? Ĉion ricevus la ekzilitoj de la morala socio.

— Jes, ... *la ekzilitoj de la morala socio* ... La malestimindaj parioj ...

Grauer prisilentis la novajn pensojn. Li profunde meditis por forŝiri la vualon de la necerteco. Tiujn pariojn certe ne celis trompi Vilhelmo Grauer, sentanta sin ekzilito de la morala socio. Li ne povis malami ilin, eĉ li havis certagradan solidarecon kun ili. Li skribis ja pri ili, ke tiuj virinoj malpleje klopodas kaŝi sian hombestecon. Ne! Ilin certe li ne volis trompi. Jen la postmorta grimaco: *rekompenci la malmoralecon*, donaci ĉion al la neglektitoj de la homa socio. Vere, tiu ĉi penso indas al Vilhelmo Grauer.

— Pri kio vi pensadas, kara Gra... sinjoro Hinzen?

— En tiu ĉi momento eĉ mi kuraĝus ĵuri je la ekzisto de la heredaĵo.

Sinjoro Krak gratadis la orelon, poste laŭte ekridis.

— Kiel mi vidas, tiel vi estas pri la afero, kiel la ĉefnotario de Strutmagen pri la edzinigo de sia filino. Hahaha!

— Kiel? Mi ne komprenas.

Sinjoro Krak volonte estus demordinta la langon. Jen, fine li mem estos la kreinto de populara onidiro.

— Nenio. Mi uzis nur proverbetan esprimon, tre laŭmodan en nia regiono... Sed nun mi adiaŭas. Mi petas vin, al neniu menciu mian viziton, ankaŭ mi silentos.

— Kial? Ni ne havas ion sekretan. Cetere mi volis peti vin, ke faru kun mi viziton en la najbara domo, kie Koŝelev, la fama rusa skulptisto loĝas. Ankaŭ li partoprenos en la konkurso por la Monumento. Se vi deziras vidi la modelon, verŝajne li volonte montros al vi.

— Ĉu ĝi bone sukcesis?

— Mi eĉ ne vidis ankoraŭ.

— Nu, kion fari? Ni transiru! — Sinjoro Krak tumis sin al la dommastrino, gape aŭskultanta ĉe la pordo la germanlingvan interparoladon. — Nu, kara Lida Jenmi, ne forgesu, ke via filino estas de Joĉjo.

— Ho, kiel mi povus ja forgesi tion?

— Nu, adiaŭ!

— Adiaŭ, atestimata moŝto, mankison al via edzina moŝto kaj kisojn mi sendas al la juna paro. Verŝajne mi vizitos ilin baldaŭ.

XVIII.

Košelev forprenis la kovrotukon de la modelo. La tri spektantoj havis diversajn sentojn, respeguliĝintajn en la mienoj. Tamara kaj Grauer surprizite Krak iom seniluziigite rigardis.

— Jen la unuigo de du pensomondoĵ! Tiuj de Vilhelmo Grauer kaj de mia fratino Tamara.

La animon de Grauer tute katenis la beleco kaj simbola forto de la kreaĵo. Vere, ĝi sukcese videbligas la pensojn de tiu homo, kiu ne povis kredi kaj ĝi entenis ankaŭ la mirindan fanatikismon de Tamara al la progreso de la Homaro.

La tragikan baraktadon de la Homaro prezentis kolosa vira figuro, katenita per ĉeno ĉe la talio al giganta roko. En la muskoloj streĉiĝis animala forto. La dekstran manon etendante alten por helpo kaj levante sin perkubute li paŝas per la dekstra piedo al la roko, tiel retenante sin de la falo. La maldekstra kruro, pene tirata, estas kovrita de algoj kaj ŝlimaĵoj de la marĉo. Ĉe la talio la ĉeno, tenanta la figuron al la roko, jam cedas en kelkaj ĉeneroj al la troa forto. La mieno de la figuro esprimas doloran sopiron je beleco kaj perfektigo. Ĉio ĉi demonstracias pri suprenklopodo. Nur la *monstraj simiformaj figuroj*, spasme kroĉiĝantaj al ĝia maldekstra brako, simbolas tiujn sentojn kaj ecojn, kiuj volas malhelpi, retiri la liberigonton al la senfunda marĉo. Laŭ la modelo tiuj partoj estos el bronzo, escepte la rokon.

Sur la supro de la roko staras ideale belaj figuroj de viro kaj virino el blanka marmoro skulptitaj. Ili tenas sin en harmonia brakumo. La libera mano de la virino etendiĝas por helpo al la katenita figuro. La libera mano de la viro montras al la senlima alteco. La mieno de ambaŭ figuroj estas milda, celkonscia. Sur la piedestalo la dezirata surskribo, falsigita per demandosigno : »EGALECO EN LA FRATECO ?« La tuta kreaĵo ripozas sur ovala subkonstruaĵo, kies sola ornamo estas la surskribo, kuranta ĉirkaŭe sur ĝi : »LA CELO DE LA HOMA HOMO DESKUI LA ANIMALCON, LIA RELIGIO — LA BONO, LIA SOPIRO — LA PACO, LIA ARMILO — LA KORO, LIA LEGO — LA AMO, LIA REKOMPENCO — LA GOJO, AKIRITA POR LA FRATOJ.«

Tamara kun larmvualitaj okuloj paŝis al sia frato kaj kisis lin.

— Dankon, Juro, tutaniman dankon ! Vere, mi ne povis eĉ imagi ĝin tiel bela.

— Admirinde simbolriĉa, — duonvoĉe diris Grauer al si — Kiom da kredo sub la masko de pesimismo.

Sinjoro Krak skrupule observadis la modelon kaj fine sektone esprimis sian opinion.

— Bela, tre bela ĝi estas, sed neniel koincidas kun la deziro de la testamentinto. Kie estas la manpremantaj Homo kaj Simio ? Kial estas metita demandsigno tie, kie laŭ la originala teksto devus esti krisigno aŭ nenio. Verdire, tre bela, sed domaĝe, ke ĝi ne estos starigebla.

La okuloj de Grauer kolere ekbrilis. La plej belan momenton de la artisto tiel amarigi povas nur sensenta aktovermo, vivanta en la mondo de nuraj literoj.

— Mi scias, altestimata moŝto, ke mi ne havas ŝancon ĉe la konkurso. Mi sciis tion komencante la laboron, sed por la pretigo de la modelo inspiris min ne la premio, sed miaj sentoj. Tia monumento vere

ne indas al profanaj okuloj. Al ili vere taŭgas nur la homo manpremanta kun la simio, ĉar tiu ĉi manpremo faligas ducenttridek milionojn da dolaroj en la poŝojn.

— Vi tro severe prijuĝas la ĉefurbon. Cetere mi estas ja simpla ĉefnotario, kiu ne arogas al si rajton pri definitiva kritiko.

— Oni ja ne havos okazon kritiki, ĉar mi ne sendos ĝin. Por mia fratino mi kreis ĝin.

Grauer rigardis jen la modelon, jen Tamaran. Gojo kaj doloro alternis sur ŝia vizaĝo. Ŝin feliĉigis la penso, ke ŝi povis helpi al sia frato, sed ŝi malgajniĝis, ke la bela projekto restos nur projekto. Por efektivigo ŝi ne havas esperon. Grauer divenis la penson.

— Tamara, ne ĉagreniĝu! La monumento staros. Mi aĉetas, pliprecize, mi mendas ĝin.

La knabino ĵetis konfuzan rigardon al Grauer.

— Tio estus vere granda, neakceptebla ofero.

— Ofero? Kiel mi komprenu?

— Ofero, ĉar vi ne laŭsente perceptas la verecon de la simbola monumento. Hodiaŭ posttagmeze mi konvinkiĝis pri tio. Vi ne kredas tion, kion ĉi tiu kreaĵo simbolas. Vi neis *min*.

Profunda seriozeco vibris en la voĉo de Tamara, kiu tuŝis dolore la koron de Grauer. Li devis konfesi en si, ke iom da vero troviĝas en la vortoj, sed tamen ne ofero. Tute ne! Nur demando pri mono. Monon li havas ja abunde.

— Ne ofero, kedu *min*, ne ofero! Kial vi tiel kruele juĝas pri mi? Via kredo estas forta, inspiranta, kapabla influi eĉ vian fraton, kiu ŝajnas nekredema en pli alta grado ol mi. Tiu ĉi pesimisto povas danki al vi, ke li kapablis modelon fari pri la plej admirinda monumento de la optimismo.

— La pesimismo de mia frato ne estas identa kun la via. Ĝi estas dolora observado de artisto kaj ĝi fekundigas lian animon. Rigardu ĉirkaŭen! Ĉiu projekto, ĉiu efektivigita modelo naskiĝis en tia doloro.

kaj ili respegulas lian profunde senteman idealismon. Via pesimismo ne kreas, nur detruas, muelas vian animon kaj kaŭzas doloron al tiuj, kiuj ame pensas pri vi. Mi ne koleras kaj ne prijuĝas, sed tre dolore al mi vidi vin tia.

Dum la duonvoĉa interparolado Jonathan Krak klarigis al si la plej etajn detalojn de la monumentomodelo, demandadis pri la eventualaj elspezoj, poste adiaŭadis.

— Mi ĝojas, ke mi havis la honoron konatiĝi kun vi, kara majstro. Mankison, fraŭlino kaj ne riproĉu la ĉefurbon! Ni estas devigataj teni nin al la literoj, ĉar ankaŭ la prokuroro de la new-yorka banko tenas sin al tio. Kara sinjoro Gra... Hinzen, esperable ni revidos nin ankoraŭ kaj vi honoros nin per via vizito. Jes, ĉu vi ne bonvolus monoferi por la monumento? Tutkore ni dankus.

— Por kiu monumento?

— Por la starigota. La Monumenta Komitato ja es...

— Eble bedaŭre, sed mi ne deziras esti inter tiuj, kiuj subskribas per tia monofero la *krisignan* aserton de Vilhelmo Grauer. Ĉe mi nur la demandsigna havas ŝancon.

— Vere, mi bedaŭras. Adiaŭ!

Koŝelev akompanis la gaston. Tamara kaj Grauer restis solaj. Ili ambaŭ rigardis la modelon, sed ili pensis unu pri alia.

— Diru, Tamara, ĉu vi scias, kiam venos la tempo, kiam tiu ĉi plej alta simbolo fariĝos realaĵo?

— Jes, mi scias. Kiam la homoj perdos la kredon pri la feliĉiga forto de la mono. Kiam oni vidos en ĝi same, kiel ankaŭ en la propra korpo nur rimedon por la vivado, sed neniel faros ilin majesta celo. Kiam ĉiu konscios, ke la diro »polvohomo polviĝos« koncernas nur la teran materion. La homa spirito *ne estas tera materio*. La homan Homon ne kateno al la terbuloj la sanga pasinteco, la tradicio, la

bagatelaj zorgoj de la estanteco, ĉar la kredo pri pli bela estanteco edukos lin pura, komprenema kaj justa.

— Tamara, mi admiras vin. De kie vi ĉerpas ĉi tiun forton ?

— El la Vivo mem, el la estanteco, el la koro de miaj homfratoj. La Vivo ne estas tiel malpura, kiel multaj opinias. La Vivo estas bela kaj pura. La *mono* ne estas Vivo, la lukto por la mono ne estas Vivo, nur batalo por la Morto. En la marĉo de la materialismo, pli objektive, de la *nura* materialismo, trovitaj pensoj ne povas formi la bazon de la *homa* vivo. La Vivo estas la *pura kristaliĝo* de la homaj sentoj, aspirantaj progreson. Ĝia ĉiutaga preĝo estas la rideto kaj larmo, devenanta el sincera dankosento. Rememoru pri nia hodiaŭa vizito ĉe oĉjo Belvar! Ho, kiel li luktis kontraŭ la larmoj rakontante la alvenon de malsatantaj infanoj en Hispanujon. Mi ne hontis pri miaj larmoj. Mi vidis antaŭ mi la etajn gefratojn, la malgrandajn homidojn, senditajn al fremda lando. En la etaj manoj flagetoj kun verda stelo. Tie ili premadis, puŝadis unu la alian sur iu stacidoma persono de la fremda lando. Neniu komprenas ilian lingvon, ilia tuta scio estas nur oklinia versaĵo, kiun plengorĝe kantas la multaj malsatantaj buŝetoj. »*En la mondon venis nova sento . . .*« Ĉu ili komprenas ? Provizore ne grave ĉe la etuloj, sed je la *himno* de la *homa solidareco* malfermiĝis la koroj. La homo renkontas homon kaj li ne almozon etendas por prepari vojjon al si en la ĉielon, sed donas sian amon por trovi amon sur la tero. Diru al mi, tute sincere, ĉu ekzistas io pli bela, pli majesta ol renkonto al homo, etendanta sian koron al la frato ?

Kun muta emocio Grauer aŭskultis la knabinon. Koŝelev revenis, momenton haltis ĉe la sojlo, poste retiriĝis. Ili restu solaj ! Li rememoris, ke antaŭ horo lia fratino kun larma doloro falis sur lian bruston. Si ne plendis pervorte, sed en tiu muteco enestis la

doloro de ŝia bona koro. Li komprenas ja sian fratinton.

Tamara duonvoĉe sieĝis plu la animon de Grauer.

— Ĉu vi scias, kio doloras al mi? Ke ni ne povas renkonti nin. Vi montras nur vian nudan manplaton al mi, admiras min, kiel tiun ĉi modelon kaj volas kredigi pri si, ke vi estas escepto. De la unua momento mi scias, ke vi *ne* estas escepto, sed tia orfo, al kiu simila ne tre multaj vagadas en la mondo. Vi ne povas kredi la vorton de la amo, ĉar neniam vi sentis ĝian varmon. Vi ne povas rekonigi la vorton de la koro, ĉar la vorton de via propra koro vi ne volas ekaŭdi.

— Tamara!

Grauer tiel dolore ekkriis, ke la knabino timigite rigardis al li. Veo estis tio. Vekrio de baraktanto sub skurĝofrapoj. Ŝi ne volis ja kaŭzi suferon kaj tamen... Konscienciproĉojn ŝi havis pro tiu vekrio. Pente kompite ŝi etendis la manon al li.

— Pardonu... neniam plu... neniam — kaj ŝia voĉo dronis en esploro.

Grauer preskaŭ falis sur la malgrandan manon, la febran fruntan li klinis tien kaj sinforgese eliĝis la vortoj el lia animo.

— Tamara, ne forlasu min!... mi petegas, ne lasu min sola!... Se vi sciis, se nur konjektus, kio subpremas min, kio muelas, neniigas min?! Aŭskultu min!... Ne fortiru, ho, lasu vian manon! Vian manon mi volas. Vi diris ja, ke en ĝi estas ankaŭ via koro. Mi volas rakonti ĉion. Ne al vi, sed al tiu homa koro, kiun vi etendis al mi. Ne al la knabino, sed nur al la homo, al tiu homo, kiu plenigas vian pensomondon... Aŭskultu min! Mi ne povas toleri plu!

Tamara kvazaŭ forgesinte pri ĉio, tre timigite kun tremanta mano karesadis liajn harojn kiel la patrino kvietigas sian infanon, timantan de fantomoj.

— Ne ploru!... Kion mi faris? Mi ne volis

ja malbonon al vi! Venu, eksidu apud mi! Nenion vi devos rakonti... Mi ne volas... Mi ne kuraĝis supozi, ke via vundo estas tiom profunda... Je Dio, regu do vin, mi petas!

— Tamara, ne lasu min sola, ne forlasu min!

— Ne, ne, neniel!... Mi restos apud vi... Vidu, kiel silente ni eksidis. Trankviliĝu kaj neniam estos plu vortoj inter ni pri tiu... Jes, tiel, tiel! Regu vin! Mi vokos mian fraton kaj... kaj... la viroj pli bone povas kompreni unu la alian.

— Neniun mi bezonas, nur vin! Mi volas paroli, rakonti ĉion, ĉion. Jam delonge mi estus devinta fari tion. Mi pekis per la prokrastado... Ne protestu! Jes, mi pekis kontraŭ vi. Krime estis akcepti vian simpation, sed pardonu min, mi tre sopiris la varmon de koro. Vi kun via frato vivas en tia mondo, kiun eĉ en sonĝo mi vidis neniam. Mi ne havis ja patrinon, kiu estus povinta fabele montri al mi la pli belan mondon. Mi ne havis tian patron, kiu kun firma manpremo estus kondukinta min trans la unuajn malfacilaĵojn de la vivo kaj estus montrinta la embuskojn. Mi estas ja filo de *ne* homoj, komprenu bone Tamara, mi *ne* estas filo de *homoj*, sed nur *ido* de *bestohomoj*. Mi naskiĝis en cirka bestokaĝo. En mia buŝo la patrinlacto kunfluis kun freŝa bestsango, gutanta el buŝanguloj de mia patrino kaj la terurkrioj, aŭ ridaĉo de la publiko kaj klako de skurĝo estis mia lulkanto... Mi trompis vin, Tamara. Por via boneco mi pagis per maldanko. Mi estas ido de bestohomoj, de malfeliĉaj eksperimentaj *bestoj*...

Tamara kun terurmieno rigide rigardis al Grauer. Eĉ ŝiaj korobatoj haltis momente. Ŝi pensis, ke frenzulo sidas apud ŝi. Ĉiun forton ŝi bezonis por regi sin kaj resti sen rifuĝo. Certe, tiu ĉi viro estas frenzulo. Tamen ŝi ne povis forkuri. La larmaj okuloj, la mieno deformita pro doloro, la petega rigardo katenis ŝian koron al li.

Grauer iom post iom retranskiviligis, ordigis la

pensojn kaj komencis duonvoĉe, preskaŭ flustre paroli. Li rakontis ĉion, pri kio li rememoris de sia frua infanaĝo, detale konigis la enhavon de la letero, kiu malkovris antaŭ li la sekreton de lia deveno, citis partojn el la postlasitaj skribaĵoj de Vilhelmo Grauer, kiujn ĉiutage li legadis dum longaj horoj. Tamara mute, senlarne aŭskultis. Ŝi ne havis larmojn, sed la teruro kaj doloro taŭzis ŝian koron kaj ŝi sentis, kvazaŭ ŝia ĝisnuna kruco estus ŝanĝita kaj porti la novan ŝi ne havas forton kaj terenfalos. Sed ne, ne estas permesate! Ŝi devos fermi la sekreton en sian koron kaj forgesigi lian pasintecon, enterigi la fantomajn memorojn por redoni tiun ĉi homfraton al la Vivo.

Grauer jam longe silentis, sed la lipoj de Tamara ne malfermiĝis je parolo. Ŝi ne serĉis konsolajn vortojn, sciante, ke la vorto nun tuŝus la koron, kiel freŝan vundon la fingropalpo. La silento nun estas pli kvietiga ol la vorto. Nur sian manon ŝi lasis en la manpremo de Grauer. Du homaj animoj renkontiĝis en tiu manpremo kaj ĉirkaŭprenis unu la alian kun muta plorego.

Longajn minutojn ili sidis tiel senvorte. La frua vesperiĝo de novembro sternis duonmalhelon al la laborejo, sole la freŝaj gipsfiguroj de la modelo lumis blanke. Koŝelev paŝis en la laborejon, haltis antaŭ la mutiĝintaj animoj.

— Nu, geknaboj, la vespermangxo estas preparita. Hodiaŭ mi plenumis la taskon de la mastrino.

— Pardonu, Juro, mi tute forgesis pri tio.

— Ĉu vi estas kontentaj pri la modelo? Ĉu ĝi estas bela, Tamara?

— Tre bela, Juro.

— Verdire, kara sinjoro Hinzen, kio estas bela sur tiu ĉi monumento, tio estas la donaco de mia fratino kaj kio malbela, tio estas de mi. La surskribojn mi prenis el la taglibro de Tamara. Ankaŭ la demand-signo estis ŝia ideo.

Košelev kovris la modelon per la tuko. En la silento li eksentis, ke io okazis inter lia fratino kaj Grauer. Eble ĝuste tio, kio estus la plej natura kaj antaŭe vidita, sed poste li forĵetis la penson. La feliĉaj geamantoj ne similas al fantomoj, venintaj el tombo-profundo. Li ne kuraĝis demandi, sed tre kompatisian fratinton. Nu, se li restos kun Grauer, certe li pridemandos lin.

Tamara legis el la malsereniĝinta mieno de sia frato, leviĝis, paŝis al li.

— Juro, mi dezirus peti ion de vi. Promesu je via honora vorto, ke vi plenumos.

— Bone, mi plenumos.

— Mi vidas, sincere dirante mi divenas el via mieno, ke vi scivolas pri tio, kio okazis inter ni. Mi diras ja. *Ni renkontiĝis*... Sed kiel, neniam vi demandu lin, nek min pri tio! Mi petegas, ne demandu!

— *Se vi tiel deziras?*... Cetere estas facile diveni, ke io serioza okazis inter vi. Komunan sekreton vi havas kaj ĝin kaŝas antaŭ mi, antaŭ la *fremdulo*.

— Ne estu dolore al vi! Juro, estas multe pli bone tiel! — Tamara turnis sin al Grauer. — Venu, la vespermanĝo atendas nin!

Grauer klopodis deskui la preman humoron, preskaŭ vigle leviĝis, provis rideti, brakumis Košelevon.

— Ni priparolis, ke la monumenton, se vi bonvolos transdoni al mia dispono, mi starigos, sed ne ĉi tie... Ie malproksime, tre malproksime...

— Kion li diris, Juro?

— Ke vi ambaŭ priparolis la starigon de la monumento.

Momenton Tamara primeditis la penson.

— Jes, Juro, ankaŭ tion ni priparolis.

XIX.

Grauer pasigis maldorme la nokton. Tre longe li meditis pri la muteco de la knabino. Eĉ unu vorton ŝi ne havis por li. Vere, kion ŝi estus povinta diri? Sed la manon ŝi lasis en la lia. Se li povus teni ĉiam tiun maneton! Sed kial ne? La sentoj permesas konkludi pri ebleco.

Li komencis skribi leteron al sia fianĉino, sed ĉe la dua frazo jam disŝiris la paperon. Ankoraŭ kelkfoje li provis sensukcese. Ne! Perletere li ne povas aranĝi tiun aferon. Li nepre devas stari vid-al-vide kun ŝi. Li ŝuldas tiun respektindan sintenadon al la knabino, tenanta lian honoran vorton. Eble, forŝirinte sin el la urbeto silento, la sorĉa forto de Tamara ĉesos. Jes, li nepre devas paroli kun sia fianĉino pro Tamara, kiu certe havus ĉiaman doloron, ĉagrenon, se poste konsciiguŝ pri tio, ke la viro, ligita al ŝi, ne tute, ne sendivide donis sian koron al ŝi. Jes, tiel trompi Tamaran estus honte.

Denove li komencis leterskribadon, unue kelkajn liniojn al Koŝelev, poste al Tamara. Tiu letero estis longa, eĉ detala. Ĉe ĉiu frazo li sentis, ke lia amo estas sincera, neestingebla kaj li ne povas vivi sen ŝi, tamen li skribis pri io alia. Ĉu Tamara konjektos lian baraktadon kaj tiun doloran sopiron, kiun li **havas malproksime** de ŝi? Ĉu ŝi sentos, ke ĉiuj liaj pensoj celos la kreon de pli feliĉa komuna vivo? Jes, ŝi devos senti tion!

Li adresis la leterojn, ekpakis kaj kelkajn vortojn adiaŭajn skribis kaj kun mono metis sur la

tablon por panjo Lida. En frumatena horo ekiros vagonaro al la landlimo. Per ĝi li vojaĝos.

Li ekiris, la leterojn ŝovis sub la pordon de la verando kaj la pensoj tiel okupis lin, ke li ne rimarkis la laciĝon dum la longa piedmarŝo.

El la fenestro de la kupeo li perrigarde serĉis la blankardezan tegmenton de la domo de Koŝelev kaj kun larmoj enpense adiaŭis de tiuj, kiuj montris novan mondon por li : *la mondon de la koro*.

La vagonaro atingis vojkurbon kaj postrestis la konata ĉarma valo. Grauer dolore ekĝemis.

— Tamara, mia viveto, mia panjo !

— — — — —

La du gefratoj senvorte sidis ĉe la tablo. Ili ambaŭ profundigis en propraj pensoj. La mieno de Koŝelev esprimis kompaton. En la larmaj okuloj de Tamara brilis lumeto de espero. La leteron, skribitan kun malespere baraktanta koro, ŝi kaŝis en sian bluzon. Jam dufoje ŝi legis, penadis memorfiksi ĉiun linion kaj ju pli longe ŝi meditadis pri la enhavo, des pli vigle viviĝis la espero en ŝi. Li revenos, certe li revenos, li nepre devas reveni !

La rigardo de Koŝelev trafis la adiaŭajn vortojn, kuŝantajn antaŭ li. Verŝajne por konsoli ŝin li rimarkis duonvoĉe :

— Li foriris, ĉar li retrovis sin.

Tamara ekaŭdis kaj sentis la dolorajn skrupulojn de sia frato. Pale ridetante ŝi nee skuis la kapon.

— Juro, vi denove eraras... Li foriris por trovi *min*.

Pri tia optimismo *Koŝelev vere miris. Nu, kiu scias ? Cetere ili komprenas unu la alian. Tamen li ne povis subpremi rimarkon, kiam Tamara metis tason sur la kutiman lokon de Grauer.

— Nu, kiel distrita vi estas.

— Indulgu mian malfortecon, Juro ! Finfine vi devos alkutimiĝi kaj senti, ke baldaŭ ni vivos triope : vi, mi kaj mia edzeto.

XX.

La mizero prenis sur sin ĉifonojn por kovri sian nudecon, retiriĝis por varmiĝi en la haladzohejtajn dometojn kaj rigardis tra la fenestretoj. Grandajn neĝflokojn faligis la nuboj. La anĝeloj skuas la kusenojn de Jesueto, diris la simpluloj, kaj tial neĝas. La zorgoj kaj frostoj de Decembro alvenis.

Kazimiro Jenlafiŝ frumatene vekiĝis por bone pripensi la punktojn de kontrakto, farota kun la amerikanoj. La sola bona kaj vere fiksa negoco, kiun li sukcesis akapari por si. En momento de la subskribo la amerikanoj pagos al li dudek kvin mil guldojn. Bonega negoco! Precipe pro tio, ke li devos labori por tio neniom. Nu, sed ĝis nun li multe klopodadis, persvadis por konvinki la Konsilantaron pri la plej ĝusta solvo de tiu malfeliĉa Lakt- kaj Fromaĝfabriko, kiu staras certe antaŭ bankroto sen la necesa lakto.

— Dudek kvin mil guldoj, dudek kvin mil guldoj! — Li ĝojmiene kunfrotadis la manojn kaj iris al la fenestro por malfermi ĝin, spiri matenan ozonon kaj refreŝigi sian menson. Post la suprenkuro de la ruljaluzio Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ svene falis. Sur la balkono staris pendigilo kun svingiĝanta kadavro. Sur la brusto de la malfeliĉulo blankis alpinglita letero. Terure!

Kazimiro Jenlafiŝ faligis la ŝnuron de la jaluzio kaj ĝi falis kun granda rulbruo, poste li ekkriis terurite, sonoradis kaj preĝadis tremante. La revolucio.

Certe la revolucio eksplodis. Kiu povas esti la malfeliĉa viktimo, pendigita sur lia balkono? Korhaltiga vidaĵo! Li kriis, sonoris kaj sakre preĝadis, preĝe sakradis, falis en la urbestran fotelon.

La servisto, duone vestita, kuris en la ĉambbron. Lia timigita vizaĝo vekis penson en Kazimiro Jenlafiŝ, ke verŝajne la tuta korto estas plena de pendigitaj homoj kaj jam neeble rifuĝi.

— Ĉu revolucio, Stefĉjo? Kien?!

— Revolucio? Mi ne komprenas, urbestra moŝto. Revolucio? Sed kie?

— Do ankoraŭ ne. Dank' al Dio!... Tamen ŝajnas al mi, ke tie, sur la balkono rikanis al mi pendigito.

— Sur la balkono?

— Jes, jes... Se ne halucinacio kaj terura vizio, do certe pendigita homo.

La servisto kuris al la fenestro, suprentiris la rulĵaluzion kaj tuj faligis ĝin. Kun mortpala mieno li rigardis al la urbestro kaj la vortoj balbute faletadis el liaj lipoj.

— Vere... ĉu vi scias, kiu li estas?... Vere, pendigito... Urbestra moŝto, mi tuj... tuj kuros por helpo... mi ne kuraĝas tuŝi lin...

— Ne foriru, restu, ne forlasu min, ĉar mi senhaŭtigos vin, malkuraĝulo! Kriu, sonoru aŭ faru, kion vi volas, sed vi devos resti nun kun mi! Ĉu komprenite? Telefonu al la polico, al sinjoro Krak, al la ministro de la Internaj Aferoj kaj al la kortega kancelario! Certe revolucio! Ho, kiel bone, ke mia filino nun ne estas hejme. Si certe svenus. Ĉu mi ne svenis, Stefĉjo?

La servisto plenpulme kriadis por helpo. Kazimiro Jenlafiŝ kun tremantaj kruroj kuris al la telefono kaj ekscitite disfamigis la teruran okazintaĵon al la polico, al Krak, al la kortega kancelario kaj al la du amerikanoj. Dume alvenis la servistaro, armita per balailoj, bastonoj kaj karbŝoveliloj. Stefĉjo klarigis al

ili la situacion kaj kun unuigita kuraĝo la personaro malfermis la pordon de la balkono por detranĉi la pendigiton.

Kazimiro Jenlafiŝ ĵus estis telefononta al lia eks-celencna moŝto la ministro de Internaj Aferoj, kiam ekstere, sur la balkono aŭdiĝis rido, miksitaj kun sakrado. Nu, ridi kaj sakri samtempe oni laŭkutime povas nur post paso de danĝero. Ŝtefĉjo kuris en la ĉambron.

— Nur ŝerco, urbestra moŝto, tre malbona ŝerco. La pendigito estas nur pajloŝtopita pupego kaj ĝi... kaj ĝi... pardonu urbestra moŝto, sed ĝi tre similas al vi. Jen la letero, trovita sur la brusto de la pupo.

Kazimiro Jenlafiŝ nekonscie transprenis la leteron, post minuto li konsideris la komikan situacion kaj pro tio li senlime ekkoleris, furiozis.

— Kaj mi telefonis al ĉiu oficialulo por disfamiĝi mian primokitecon! Fripono, vi estas la kulpanto. Kial tuj vi ne diris, ke ĝi estas nur komunista ŝerco, minaco aŭ mi ja ne scias kio? Mi pendigos vin, fripono, se vi kuraĝus rideti. La homoj de la polico, eble eĉ la fajrobrigado jam estas survoje. Kuru al la pordego kaj ne lasu ilin supren! Pro diablo, kuru!

Dume la servistoj enportis la pendigilon kaj la pupon. Vere, ĝi tre lerte estis farita kaj similis al Kazimiro Jenlafiŝ.

— Kaj tiun aĉaĵon tuj malaperigu el mia vido, ĉar mi arestigos vin, friponoj! Tian ŝercon!! — Li plenkolere piedpuŝis la pajloŝtopitan urbestron. — Kiu, kiu kuraĝis riski tian mokon kontraŭ la kapo de la ĉefurbo? Sed, je amo de Dio, forportu tiun pupaĉon, ĉar mi svenos!

La urbestro falis en la fotelon, kovris la okulojn per la manoj. Dum la kaŝe ridetanta servistaro forportis la pendigilon kaj la pupon, Kazimiro Jenlafiŝ sentis frostotremojn. Terurajn pensojn vekis en li la ekspedado de lia pajloŝtopita kolego, lia propra personigo. Jes, jes, tio certe estas la vento de la revolucio.

cio, baldaŭ eksplodonta, se per tuta energio li ne subpremos ĝin.

En la kadro de la larĝe malfermita pordo aperis oficialaj personoj: la poliestro, la direktora kuracisto de la savarmeo, la fajrobrigadestro. Aŭtomobile ili venis senorde vestitaj kaj plene armitaj.

— Ke la diablo forportu tiun Ŝtefĉjon! Bonvolu eniri, sinjoroj! Mi diris ja al tiu stulta servisto, ke... Jes, jes, sinjoroj, nur ŝerco, danĝera minaco de miaj malamikoj. Ne tre gravas. Mi venĝos terure! Ni nepre devos venĝi!

Komenciĝis pritraktado de la okazintaĵo. Ĉiu ĉestanto komentariis el sia propra vidpunkto, sed interne ĉiu sentis malican gajecon. Fine la poliestro pridemandis Kazimiron Jenlafiŝ.

— ...nu, kaj krome ne ekzistas io, kio povus doni la necesan postsignon de la iniciatintoj aŭ de la ŝercfarinto mem?

Kazimiro Jenlafiŝ rememoris pri la letero.

— Jes, ia letero estis alpinglita al la brusto de la pupaĉo. Kien mi metis ĝin? Jes, en la poŝon. Jen!

Kun ĝenerala scivolemo oni atendis la ekŝiron de la koverto kaj la prelegon de la enhavo. La poliestro faris tion kun necesa aplombo.

»Aĉa hirudo de la ĉefurbo, baldaŭ ci havos saman sorton kiel tiu ĉi cin prezentanta pupo. Ci, trimentona bradipo, pendos sur la sama loko! Por savi cin abdiku kaj forlasu la landon!«

Kazimiro Jenlafiŝ paliĝis, ankaŭ la aliaj forgesis la malican gajecon. Ne tre kuraĝigaj aŭspicioj por la estonteco. Sed perdi la kuraĝon tamen oni ne devas ĝis la potenco kaj la armeo estas en iliaj manoj, sub ilia komando. Por montri sian heroecon Kazimiro Jenlafiŝ eĉ kurban rideton altrudis sur la mienon.

— Kia impertinenteco! Ili eĉ *ciadas!* Ili nomas *min ci!* Kolosa impertinenteco!

— Tamen tre serioze konsiderinde mi proponas tuj fari la necesajn paŝojn, — rimarkis la poliestro.

Longaj diskutoj, el aero kaptitaj planoj kaj malespere prilaboritaj projektoj zigzagis en la interkonsiligo. Kion fari? Verdire, ĉiu sentis la ventotuŝon de la revolucio. Kiam la sinjoroj preparolis la provizorajn farendaĵojn, ili adiaŭis kaj la urbestro restis sola en melankolia, mondodolora humoro. Sed ne longe, ĉar post kelkaj minutoj la servisto anoncis la alvenon de Jonathan Krak.

La urbestro, kvazaŭ reviviĝinte el plena letargio, saltis kaj kuris saluti sian amikon. Jen, la sola viro, kiu certe povos helpi. Liaj ideoj ĉiam helpis kaj ankaŭ nun li ne povas rifuzi la savon de sia amiko, la urbestro.

— Jus mi aŭdis, ke oni pendigis cin, — komencis Krak — kaj mi jam komencis funebri, kiam oni sciigis, ke *nur simbole* ci estas pendigita.

— Ĉu ci havas humoron por ŝercadi en tia situacio?

— Kiu diras, ke mi ŝercadas? Mi ĝojas, ke ci vivas... Mi estis veninta tuj post cia telefonado, sed intertempe la sendito de la kortego kaptis min kaj sciigis, ke mi estas ordonita al aŭdienco.

— Ĉu al Lia Reĝa Moŝto?

— Nu, kompreneble al Lia Reĝa Moŝto.

Kazimiro Jenlafiŝ momenton envie rigardis al Krak, sed poste rememorante pri la antaŭaj okazintaĵoj forgesis la enviadon, kaptis per ambaŭ manoj la ĉefnotarion, sidigis lin en fotelon kaj malespere kriadis.

— Krak, kara amiko, ci devas savi min, nur ci povas klare percepti la situacion. Simbole oni pendigis min...

— Domaĝe!

— Kio?

— Domaĝe, ke tian ŝercon oni permesas al si. Nu, kio? Nenio okazis. La poliestro rakontis, ke li havas jam plene prilaboritan planon por kapti la aŭdaculon.

— La poliestro estas malsaĝulo.

— Mi subskribas. Li ĉiam trafas preter la celo. Denove li arestigos kelkcentojn da senpekuloj, kies sola krimo estas la malplena ventro. Oni faros denove blufojn por timigi tiujn, kiujn oni ne povas fortimigi. La burĝaro denove havos ĉiunokte frostotremon por la morgaŭa mateno.

Kazimiro Jenlafiŝ ekmiris pri la firma sinteno de Krak. Tiajn esprimojn kaj tonon povas uzi nur tiu, kiu havas certan planon, pri kies sukceso li ne dubas.

— Kara Krak, ĉu ci havas planon, ideon?

Krak konjektige ridetis. Lia ruzeta mieno impresis iom komika, sed tion la urbestra rigardo ne rimarkis. La ruzetan ekbrilon en la okuloj Kazimiro Jenlafiŝ vidis kiel flamflagradon de la genieco kaj vole nevole kapitulacis.

— Kiu havas ok filinojn por edzinigi ilin, tiu nepre devas pensadi. — Krak iom ekĝemis. — Ĉar la virinoj ĉiam torturas nin por multekostaj bagateloj. El tiuj multekostaj bagateloj estas la plej kara la plej bagatela: la edzo. Nu, vidu, kiam mi eksciis, ke la polico malkovris ĉiusemajne konspirojn, strikojn, konfiskis en kvintala kvanto flugfoliojn de komunistaj korporacioj, tiam mi pensis, ke ne estus bone atendi ĝis la domo brulas. Jes ja, la polico kaj la armeo povus subpremi eble ĉion, kaj dronigi en sangon la malkontenton, sed, kiu scias, eble dronus en tiun sangon ankaŭ la *estontaj bofiloj* kaj por ili estus vere tre domaĝe. Mi do pensadis, pensadis tage kaj nokte, fine mi elcerbumis ion, kio estas mia oficiala sekreto, eĉ al vi nekomunikebla. Mia ideo estas: *okazu do la revolucio!*

Momenton senvorte gapis la urbestro al sia amiko, poste konsternite leviĝis.

— Mi ne rekonas cin. Ĉu perdita estas cia saĝo? Okazu la revolucio? Ĉu ĝi okazu por konservi kelkajn edzojn por viaj filinoj?

— Nu, jes, kvankam ne nur por miaj filinoj,

ankaŭ por la cia. Fraŭlino Elvira havas jam la ĝustan aĝon por edziniĝo. Sed nun ne pri tio temas.

— Mi ne komprenas cin. Kian rilaton havas mia filino al la revolucio? Kian rilaton povas havi entute la filino de urbestro al mortigantoj de sia patro?

— Al tiuj certe ŝi ne povas havi amikan rilaton. Sed ne estu tiel ekscitita! Finfine ci estas jam *post* la pendigo kaj kiel mi vidas, kun plena saneco ci travivis cian morton. Kaj nun lasu min paroli, ĉar mi ne havas multe da tempo por ci.

— Nu, parolu, homo, sed tute kompreneble! Tiel, kiel ĉiam!

— Dankon por la komplimento. Nu, aŭskultu Jenlafiŝ! Sinjoro Jackson tre interesiĝas pri mia filino Lola.

— Mi gratulas.

— Ne gratulu! Ankoraŭ tro frue! Mi havas skrupulojn pri la kolo de la amerikanoj. Ili estas ja grandaj kapitalistoj kaj en revolucio ilia kapo valoras neniom. Nu, cetere li nun lernas diligente la bagonan lingvon ĉe mia filino. Mi havis longan interparoladon kun li pri la afero.

— Sed parolu pri la revolucio kaj ne pri la ĝeedziĝa ceremonio!

— Nu, ĝuste pri la revolucio mi parolis kun li. Bedaŭrinde, oni ne povas malkovri la personecon de la nova agitatoro.

— Certe Scipo Prikatel sub pseŭdonimo.

— Ne tiel certe, — kaj sinjoro Krak mistere ekridetis. — Entute, kial ci koleras tiun simpatian junulon? Sed nun tio ne gravas. Laŭdire la nova agitatoro eĉ nomon ne havas, oni parolas pri li »*la Fremdulo*«. Ankoraŭ neniu vidis lin. Inter ni ni povas konfesi, ke li tre bone konas la arton de organizado kaj tio jam pruvas, ke ni staras kontraŭ *profesia* agitatoro kaj ne kontraŭ revema idealisto, kia estis Scipo Prikatel. Nekontesteble la ekonomia situacio estas konsterniga, la mizero eĉ terura.

kaj la simplaj animoj estas bone ekipitaj por la revolucio. Mi diris, ke la simplaj animoj, sed ne la homoj mem. Kion valoras la revolucio, havanta nenian armilon krom la anima ekipaĵo? La armiloj estas en la arsenalo. Necese estas do la ribelantan amason konduki al la arsenalo.

— Ĉu eble ci intencas konduki ĝin tien?

— Tute ne! Tion faros la »*Fremdulo*« mem. Mi kondukos la amason aliloken kaj tial mi havis parolon kun la amerikano.

— Mi ne komprenas, aŭ eĉ pli bone komprenas ol ci pensas. Ci intencas aktive partopreni en la revolucio. Sed kial?

— Jen, mia oficiala sekreto. Ci kontentiĝu, ke baldaŭ ci fariĝos bopatro, kaj travivos la tutan krian tempon en bona sano, poste solene inaŭguros la Monumenton en la zoologia ĝardeno kaj vojaĝos al Ameriko por transpreni la milionojn.

— Kaj se *ne* estas milionoj?

— Mi pensas, ke estas. La amerikanoj ne asertus tiel firme, se ĝi ne estus. Krome mi parolis kun Cezaro Grauer.

Kazimiro Jenlafiŝ faris surprizitan mienon. Sinjoro Krak iom mordetis sian langon por la kontraŭvola babilo, sed kion fari?

— Ĉi eĉ ne raportis pri tio.

— Kial raportis? Li nenion volas scii pri la aferoj. Du monatojn li pasigis en Bikitato, enamiĝis la frat-inon de skulptisto Koŝelev kaj revojaĝis al Berlin. Sed kiel mi aŭdis de Stubek, kies bopatrino baldaŭ alvenos por viziti la junan paron, la modelon, faritan de Koŝelev jam prilaboras kelkaj specialistaj laboristoj kaj unu germana arĥitekto. Jes, ion ankoraŭ! La bopatrino de Stubek havas novan luanton.

— Kiel tio povas interesi min? Mi ne konis eĉ la malnovan.

— Sed jes, la malnova estis Cezaro Grauer sub

pseŭdonimo Francisko Hinzen kaj la nova... Nu, ankaŭ la novan ci konas.

— Kiu do?

— Provizore tio formas la plej severan privatan sekreton.

Kazimiro Jenlafiŝ perdis la paciencon.

— Ci, Krak, ci ruza vulpo, ne torturu min per krucenigmoj! Fine deklaru, kion ci volas!

— Trankvile kaj bone edzinigi miajn ok filinojn, — respondis Krak tre serene, eĉ ridetante.

— Nu, kaj la revolucio?

— Por venki ĝin necesas, ke unue ĝi eksplodul!

— Kaj, diru, ĉu ci ne timas la venkon de la bolŝevismo, la enkondukon de la komunista sistemo?

Jonathan Krak iom ironie ridetis pri la timvibranta voĉo de sia amiko. En tiu ĉi kolosa korpo vere loĝas nana animo. Estas necese konsoli lin kaj montri, ke la fantomo ne aspektas tiom nigra, kiom li pensas.

— Ne, kara moŝta amiko! Feliĉe la komunismo en Eŭropo estas gastronomia demando.

— Ĉu gastronomia demando?

— Certe! En Ruslando, kie la popolo manĝis ĉiutage nur nigran kaĉon, poligonon dum kelkaj centjaroj, manĝi la samon ankoraŭ dum plua jardeko jam ne tre influas la stomakon, sed en Eŭropo la sola eksperimento montris, ke tian reĝimŝanĝon la stomako ne toleras.

— Mi ne komprenas cin, — kaj la okuloj de Jenlafiŝ mire streĉiĝis.

— Mi aŭdis, ke en Hungarujo, kie la ruĝa reĝimo triumfis kelkajn monatojn, oni jam forgesis pri la diversspecaj teroroj, sed ĉiu rememoras, ke ĉiutage oni devis manĝi kukurbon. Mi ne estas tre malproksime de la vero, kiam mi asertas, ke la stomako, ribelanta pro la kukurba regalado, faligis la sovetan registaron. Nu, ankaŭ en Bagonio, la stomako de niaj ŝatataj civitanoj preferas la kokidon kaj ne la kukur-

bon. La komunismo en Eŭropo estas gastronomia demando.

Sinjoro Jenlafiŝ citrondolĉe ridetis kaj Krak vidis, ke li sukcesis forpeli la nigran fantomon por ioma tempo.

— Kaj mi? — ĝemis Jenlafiŝ.

— Por longe vivi necesas, ke ne nur la apopleksio evitu cin, sed ke ankaŭ ci evitu la apopleksion!

— Sed nun, nun kio okazos, homo?! Diru!

— Mi rapidos al la reĝa aŭdienco kaj raportos, ke por maltrankviliĝo ne estas serioza aŭspicio.

Kazimiro Jenlafiŝ, ruĝa pro retenita kolero, vere tre proksime staris al la ĵus menciita evitendaĵo kaj la averto venis ĝustatempe. Eĉ li sentis tion. La sintendo de Krak tre konfuzis liajn pensojn, kaŭzis enivion kaj li flaradis konspiron, perfidon kontraŭ la urbestra seĝo kaj lia prestiĝo. Sed provizore li ne povas malhelpi tion. Ĉi tiu matena komedio tute paralizis lian penskapablon. Tamen li sentis la necesecon, ĝi, ĝi eĉ kontraŭ Krak, se donos sin la okazo. Dum Krak estos ĉe la aŭdienco, li vizitos la policestron kaj priparolos la detalojn de la perforta subpremado de la revolucio. Facile povas paroli ja Krak, ĉar li ankoraŭ ne sentis sin pendigita. Krak-on naŭzas la sangverŝado. Kompreneble, tia anemia figuro! Sed li mem havas densan sangon abunde. Cetere ne pri la elverŝado de la urbestra sango temas.

— Nu, amiko, espereble ci atendos min pacience. Tuj post la aŭdienco mi revenos al ci por detale priparoli. Ĝis tiam eĉ unu paŝon ne faru memstare en tiu ĉi afero!

En Kazimiro Jenlafiŝ vekiĝis la obstina spito.

— Sed jes! Mi estas la kapo de la ĉefurbo, mi havas la rajton kaj devon defendi ĝin. Tuj mi vizitos la policestron por doni neprokrasteblajn instrukciĵojn.

Krak levis la ŝultrojn, iom grimacis, poste averte rimarkis.

— Kaj kiu inaŭguros la Monumenton kaj kiu

faros la demonstracian promenon en la zoologia ĝardeno kaj fine kiu ĝojos je la transpreno de la milionoj?

— Mi ne komprenas cin, — diris la urbestro, sed ia malagrabla sento kunpremis lian koron.

— Ĉar tre facile povas okazi, ke cia memstareco kostos la urbestran seĝon... Nu, mi ne scias, sed ĉio povas okazi sub la suno, ĉu ne?

La urbestro tute frapita de tia eventualaĵo subite mildiĝis kaj preskaŭ humile demandis:

— Kion mi faru do kara Krak?

La ĉefnotario momenton pripensis, poste ridetante respondis.

— Ne forgesu mencii al sinjoro Jackson ĉe la subskribo, ke la Urba Lakt- kaj Fromaĝfabriko ricevis ŝtatan premion por ĉiu kilogramo da butero eksportita duonguldon, tio estas 50 cendojn, sed en la ministerio oni kalkulis por la buĝeto 90 cendojn.

— Jes?... De kiu ci scias?

— Kelkfoje tre utile, se iu havas ok filinojn kaj la bofilojn elektas racie.

Kazimiro Jenlafiŝ jam komprenis. Certe tiu friponeta Ignato Eltord akaparis la sensacian sekreton.

— Kaj kiu ricevas la plujn 40 cendojn?

Jonathan Krak laŭte ekridis vidante la stulte gaptantan urbestron kaj tiklis lin la neeldirita kaj neeldirebla diskretaĵo.

— Nu, ne ci! Sed avertu sinjoron Jackson, ke li donacu malpli por la virinaj tualetaĵoj, precipe, se tiuj estas jam doto de la benata naturo.

— Jes? — diris la urbestro, kvankam li komprenis nenion.

Krak adiaŭis kaj eĉ ĉe la pordego ridis pri tio, ke tiuj 40 cendoj transire tintadas en la poŝo de la ministeria sekretario por poste kovri la tualetfakturojn de Katalina Kaptuŝin, la nuda dancanta miraklo, la favoratino de la urbestro.

XXI.

En la blua saloneto de la reĝa palaco sidis intima trio : Xaver Nepaŭl VI., la reĝo, Vaga Orel de Pord, la reĝa konsilanto kaj Jonathan Krak. Jam pli ol unu horon ili interkonsiliĝis. La reĝo kapbalance aprobis, Orel de Pord persvade subtenis ĉion, kion kun granda vervo kaj tre humila sintenado la ĉefnotario proponis al ili.

— Via propono, konsilanta moŝto, — diris la reĝo — estas ludo kun la fajro. Tamen mi konsentas, ke ni faru eksperimenton, tiom pli, ĉar eviti la sangverŝadon estas konsilinde. Se via plano ne sukcesas, la armiloj, estantaj en niaj manoj, ekparolos.

Vaga Orel de Pord signife rigardis al la reĝo, kvazaŭ atendente de li signon por ŝanĝi la temon. Sed la reĝo longe silentis, enpenŝiĝis. Jonathan Krak tre ĝenite tusetadis, prenis kuraĝon por sia fiksa ideo.

— Se Via Reĝa Moŝto donacus al mi la bonvolan favoron aŭskulti min pri alia afero, mi estus tre danka.

Orel de Pord ruze ridetis. La reĝo iom lace levis la kapon.

— Ĉu pri via rekompenco temas ?

Krak ruĝiĝis eĉ iom indignite, sed tuj li konsideris ne laŭetiketa la elmontron de indigno kaj tial eĉ pli humile ol ĝis nun li daŭrigis :

— Rekompencon mi ne atendas, Via Reĝa Moŝto, por la plenumo de mia devo al la dinastio kaj al mia

patrujo. Sed estu permesate, ke mi povu paroli iom familiarece, tio estas, iom ne elektante la esprimojn kaj ne konsiderinte la politikan gravecon de la vortoj. Mi estas ja simpla ĉefnotario, kiu ne tre konas la korektan manieron, la etiketon, kaj precipe ne konas la arton de la politiko.

— Nu, parolu kiel vi volas! — La reĝo kontraŭvole ekridetis. — Kun atento mi aŭskultos vin.

— Via Reĝa Moŝto eble eĉ ne scias, ke via humila regato havas ok filinojn, el kiuj du jam havas sian fianĉon. Do la zorgoj de tia okfilina patro estas facile imageblaj. Sed tiuj ĉi zorgoj min faris ne grumblulo, eĉ kontraŭe, ĉar — pardonon por la esprimo! — mi tre amas miajn kokidinojn kaj la klopodo akiri kokojn por ili faris min amiko de la geamantoj. Tio ĉi montriĝas en la sento, ke tre volonte, se donas sin la okazo, mi subtenas la aferon de junaj koroj, serĉantaj unu la alian.

Lia ekscelenca moŝto Orel de Pord kuraĝige ridetis kaj la reĝo, kiu ĝis nun senkomprene streĉis sian menson por diveni la celon de tia enkonduka parolo, vidante la mienon de lia ekscelenco tuj perceptis la tro metaforan aludon. La reĝa mieno melankolie sereniĝis.

— Jes, konsilanta moŝto, mi komprenas vin... Lia ekscelenco, Vaga Orel de Pord, foje menciis al mi ideon pri eventuala geedziĝa ligo inter la filino de la urbestro kaj tiu... tiu... Scipo Prikatel.

Krak tre atentis la tonon de la parolo. Ĝi estis milda, do ne tiel danĝere paroli pri la temo kiel li pensis, kiam lia ekscelenco petis lin fari proponon al la reĝo. Certe lia ekscelenco jam preparis la vojon.

— Jes, ĝuste pri tio mi volis fari proponon al Via Reĝa Moŝto. Mi diris ja, ke mi, kiel simpla ĉefnotario, tute ne konas la arton de la politiko, tamen dum la lastaj monatoj, depost kiam oni devigas min enmiksiĝi en aferojn tute ne koncernantaj min kaj liveri ideojn, mi ofte pensadas ankaŭ pri la politiko kaj

vidante, ke mia amiko la urbestro estas kontenta pri mi, do ĉio ĉi kuraĝigas min por la antaŭenpaŝado.

— Bone, bone, sed kiel vi pensas ? — rimarkis la reĝo iom senpacience.

— Foje lia ekscelenca moŝto bonvolis esprimi bedaŭron pri malaktualiĝo de mia ideo, sed jen pro la proksimiĝo de la revolucio ĝi denove aktualiĝas. La popolo ĉiam parolas pri li, pri Scipo Prikatel, kvankam ni estas certaj, ke la nova movado estas organizita de instruita agitatoro, kiun ĝenerale oni nomas »la Fremdulo«. Tiu ĉi nekonata viro ne havas popularecon, ĉar oni *ne* konas lin kaj ĉiu parolas pri la idealista revemulo, eĉ la Fremdulo mem uzas lian personecon por varbi adeptojn. Ni rememoru pri la sinsekvaj demonstracioj, postulantaj la revenon de la fama popolestro kaj la donon de plena amnestio al li. Ni devus profiti la okazon ! Per amnestio ebligi la revenon de Scipo Prikatel kaj per amaj ĉirkaŭprenoj de ĉarma, inteligenta knabino kateni, aŭ almenaŭ bridi lian revoluciemon. Du avantaĝojn ni povus havi per tio. La unua : la entuziasmo de la popolo turnos sin plene al la reveninto kaj per tio multon perdos la Fremdulo el sia influo, multe pli danĝera ; la dua, ke la junulo, katenita de amo kaj krome tre ema al revoj, vidante la furiozon de la ribelantoj iom post iom retiriĝos, perdos kuraĝon pri respondeco kaj kompreneble, ke multaj el liaj adeptoj same bridiĝos.

La reĝo longe meditis pri la vortoj de Krak. Li devis konstati, ke tiu ĉi ĉefnotario estas iom prava, sed precipe lin tuŝis la simpatio, kiun Krak havas al tiu Scipo Prikatel, kiu estas ja la mortinta filo de la reĝo.

— Konsilanta moŝto, ŝajnas al mi, ke via propono estas tro riska.

— Via Reĝa Moŝto, pardonu la esprimon, sed la homa vivo mem estas de naskiĝo tro riska. Kion fari ?

Vaga Orel de Pord iom emfaze rimarkis :

— Sajnas al mi, ke vi, konsilanta moŝto, konas la restadejon de tiu Prikatel, ĉu ne ?

Krak ruĝiĝis, sed dum momento perceptis la eventualan insidon en la demando.

— Pri la restadejo de Scipo Prikatel mi scias nenion, sed... — Kaj sinjoro Krak tenis paŭzeton por denove pripensi — sed la restadejon de la knabino mi konas.

La okuloj de la reĝo esperplene ekbrilis, poste nova dubo zigzagis tra lia kapo.

— Kaj vi, konsilanta moŝto, estas certa pri ilia amo ? Ĉu ne nur supozo, ŝajno trompas vin ?

— Via Reĝa Moŝto, mi estas certa pri nenio, sed mi havas ok filinojn, kiuj donis al mi okazon por bone konkludi el sintenado de la knabinoj. Ĉiu knabino, eĉ la plej sobra, en la fundo de la koro estas iom romantika. Elvira, la filino de la urbestro, eĉ laŭ la aserto de la patro estas tia en alta grado. Sufiĉas simpatia junulo, ŝajne maljuste persekutita, por vekti tiun romantikemon kaj la amo jam ekĝermas. Scipo Prikatel, ĉu dece, ĉu ne dece diri tion, estas simpatia junulo eĉ por mi, kvankam tio ne signifas, ke mi asertas pri lia praveco en ĉio. Nu, li sentas, ke nur unu delikata knabina animo staras apud li dum la persekutoj kaj tiu knabino estas bela, inteligenta kaj tre bonkora. Kion ankoraŭ ? Nenion ! Sufiĉas tiom vekti amon en la koro de junulo, kiu per sia aventurado montras romantikemon. La amo ekĝermas ankaŭ en lia koro. Ĉio estas tre verŝajna.

— Jes, ĉio estas tre verŝajna, — kapjesis kelkfoje la reĝo. — Precipe ĉe li... Kaj nun kie restadas tiu knabino ?

— En Bikitato, ĉe sinjorino Lida Jenmi, ĉe la patrino de ŝia iama ĉambristino. Kial tie ? Tre verŝajne, ĉar ĝi estas tre proksime al la landlimo.

— Ĉu ŝia patro scias pri la vera motivo de tiu foresto ?

— Ne verŝajne, ĉar li ne simpatias al la junulo.

— Nu, kaj kio estas via opinio, konsilanta moŝto, pri la aresto de tiu knabino?

Krak surpriziĝis. Tre malagrabla tuŝis lin tiu neantaŭvidebla eventualaĵo. Kial li ne prisilentis la tutan aferon? Iom pli longe ol dezirinde li pripensis la diversajn ŝancojn, konsekvencojn. Tiom longe, ke la reĝo jam estis devigata interrompi lian meditadon.

— Ŝajne, vi ne aprobas la ideon.

— Via Reĝa Moŝto, sincere konfesante, mi ne vidas la leĝan kaŭzon. La amo de knabino, tute ne partoprenanta en la politika agado de la idealo, ankoraŭ ne povas formi leĝan bazon por arestado. Krome tiu paŝo eble havos tre malagrablajn sekvojn. Unue, la patro eble por venĝi konspiros kun la ribelantoj, aŭ neos sian filinon; due, Scipo Prikatel sciiginte pri la okazintaĵo jam pro kavalireco faros romantikajn heroaĵojn, kies bedaŭrindaj sekvoj montrigos en la reala vivo. Mi neniel kuraĝus riski tiajn paŝojn en kriza tempo.

La reĝo apenaŭ rimarkeble ridetis, sed tiun reĝan rideton Vaga Orel de Pord ŝajne bone komprenis. Tamen li silentis.

— Sed, konsilanta moŝto, ĉu vi ne pensas, ke la amnestio pruvus malfortecon flanke de la registaro?

— Via Reĝa Moŝto tute pravas. Certe tio evidentigus emon por cedi al la maldekstraj partioj... Mi estas ja simpla ĉefnotario kaj kiel menciute, mi ne konas la arton de la politiko.

La reĝo leviĝis, per tio signante, ke la aŭdienco finiĝis. Krak kaj lia ekscelenca moŝto profunde riverencante leviĝis kaj forlasis la ĉambron. Ĉe la disigo Vaga Orel de Pord gratule premadis la manon de la enpensiganta ĉefnotario.

— Kara konsilanta moŝto, vi donis kelkajn tre valorajn sugestojn. Tute aparte mi gratulas por la ideo aresti la knabinon.

— Pardonu, sed mi... Mi diris ja tute la malon, kaj sincere konfesante...

— Finfine la sugeston tamen vi donis kaj ni trovas ĝin bonega.

— Tiel?!... Do, tiel?!

— Jes, tiel.

Krak longe kaj explore rigardis al la okuloj de lia ekscelenca moŝto, sed el tiu enigma mieno li ne povis legi klare. Jes, ja, la diplomatoj havas bonegan maskon.

Iom embarasite, havante eĉ konsciencajn riproĉojn, sinjoro Krak forlasis la reĝan palacon. Kun svena kapo li marŝis sur la strato, cerbumadis, ŝpinis artifaĵojn, sed senrezulte. Lia rigardo hazarde rimarkis la tabuleton de la poŝtoŝtanco. Tio donis al li la penson tuj sciigi la knabinon. Sed pri kio? Kaj sciigante ŝin, ĉu li ne kontraŭagas la reĝan volon? Sed la konscienciproĉoj estis tre fortaj kaj li eniris la oficejon, haltis ĉe la ĝiketo por transpreni telegramfolieton. Post longa pripensado pretera rideto kuris sur lia mieno, poste rapide skribis koncizan tekston. »Tuj ekiru al *Strutmagen* kaj alvenu en *Talger*.«

Plenkontente li forlasis la poŝtoŝtancojn. Rideto ludis ĉe la lipoj kaj duonvoĉe paroladis al si dum la hejmeniro.

— Eble mian amikon, la urbestron, denove ĉirkaŭiras la apopleksio, sed poste ĉio klariĝos. Unu estas tute certa, ke la reĝo ne tre koleras je tiu danĝera Scipo Prikatel, eĉ kontraŭe, kiel mi povis diveni el lia mieno... Vaga Orel de Pord opinias bonega ideo la arestadon de la knabino. Kial, mi ne scias, sed ŝajnas al mi, ke el tio nenio malbona rezultiĝos por mia protektatino. Kaj finfine, mi estas granda azeno, ĉar anstataŭ zorgi pri edziniĝo de miaj filinoj, mi kaptadas edzojn por filinoj de fremdaj personoj. Sed ne tre grave, ĉar verŝajne baldaŭ sinjoro Jackson deklariĝos, kiel montras la antaŭsignoj.

— Kun ĝojo mi konstatas, ke Via Reĝa Moŝto taksas valora la personon de tiu ĉi Jonathan Krak.

— Li estas tre amuza hometo. Lerta kiel la mezepokaj histrionoj.

— Mi ne komprenas tute... Ha, jes!... Kaj kiel vi, Reĝa Moŝto opinias pri la aresto de la knabino?

— Bonega ideo, se per tio ni povus savi la vivon de Scipo Prikatel dum la revolucio, eble ne tiel sensanga kiel pensas tiu ĉi naivulo. Tamen la afero estas iom riska.

— Via Reĝa Moŝto, la homa vivo mem estas de naskiĝo iom riska.

La reĝo ridetis indulge.

— Kiel mi vidas, vi akiris bonan esprimon de nia konsilanta moŝto. Sed diru, via ekscelenca moŝto, kio okazos, se Scipo Prikatel ne revenos je la famo pri la arestigo kaj se li revenos nur dum la revolucio? Kio okazos, se li mem kondukos je atako la furiozantan amason kaj heroe mortos por sia ideo? Se Olivero Karlo jam mortis, tamen la vivon de Scipo Prikatel mi nepre volas konservi. Ĉu vi komprenas, ekscelenca moŝto? Scipo Prikatel estas nia kreaĵo, kiu elglitis el sub nia suvereno, mortigis mian amatan filon por memstare vivi. Neniel mi volas riski *lian* vivon!

Vaga Orel de Pord senkonsile rigardis al la reĝo. Li komprenis la patron, kompatis lin pro la doloro, sed kion komenci, kion fari? Riski kaj ĉiam riski por atingi sukceson, aŭ fiaskon, sed riski nepre oni devas!

— Via Reĝa Moŝto, mi vidas nenian elirvojon krom la prudenta preparo de la aresto. En la malliberejo ni havos okazon mortigi la personon de Scipo Prikatel por revivigi Oliveron Karlon.

— Kaj se li ne volos konsenti pri la revivigo?

— Eble li konsentos fariĝi eksterlanda ambasadoro de Bagonio sub *tria* pseŭdonimo. Kiu scias, la amo faras kelkfoje miraklojn, oni diras. Nur tre takte kaj sagace ni devas kompliki la fadenojn de la romantika amo por atingi la celon kaj ne pretertrafi ĝin.

— Vi estas prava, — diris la reĝo post ioma konsidero. — Olivero Karlo mortis, sed lia romantikemo vivas en Scipo Prikatel kaj tio multe helpas nin. Kaj fine riski oni devas. Vidu, jen ankaŭ mi profitis la saman esprimon : la homa vivo mem de naskiĝo estas tre riska.

XXII.

Kelkajn tagojn post la aŭdienco la antaŭĉambro de la ĉefnotario estis ĉiam plenplena de la plej divers-aspektaj, diversrangaj personoj. Jonathan Krak sidis en sia oficejo de mateno ĝis vespero por kontentigi siajn klientojn. Liaj ok filinoj laboris en la apuda ĉambro ĉe la skribmaŝinoj. La najbaran notarian oficejon de Stubek kunligis pordo kun tiu de la ĉefnotario. El tiu ĉambro aŭdiĝis de tempo al tempo harmoniumludo kaj kantado de vira horo. Tiel pasis tago post tago.

Iun matenon, kiam sinjoro Krak paŝis en sian laborĉambron, li jam trovis eminentajn vizitantojn, kiuj atendis lin : lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord, la generala moŝto Napoleono Venknejam, la majoro Oskar Blindfid kaj la ŝtata poliestro Goliat Mordlanaz. Ili respekte salutis la alveninton.

— Mil pardonojn, moŝtoj, se mi estus sciinta vian ĉeeston, mi...

— Ne senkulpigu vin, konsilanta moŝto. Ni admiras vian energion, — diris lia ekscelenca moŝto. — Ni venis por informoj.

— Jus raportis al mi la urba notario, ke por la horo varbiĝis 200 tenoristoj, 341 baritonistoj, 175 basistoj. Tamen post konsidero mi pensas varbi ankaŭ sopranon. La miksita horo pli efike povos roli kaj mi estas certa, ke niaj virinoj multope superos per voĉo la bagonajn virojn.

— Laŭkutime, laŭkutime, konsilanta moŝto — rimarkis generalo Venknejam.

— Sed kiel ni progresis pri ekipado de la arsenalo? — Krak turnis sin per la demando al majoro Blindfid.

— Plene ekipita laŭ la instrukcioj.

— Bonege! Ne forgesu, sinjoro majoro, ke ties defendo estas ordonita al vi. Nur lerte kaj tre efike faru!

— Laŭinstrukcie kiel ĉiam.

— Bone. Mi petas vin, altestimata policestra moŝto, noti, ke ĉe la arsenalo rolos nur kelkdekoj da tenoristoj kaj kvin, aŭ ses kantistinoj.

— Certe ne pli, konsilanta moŝto, — diris Mordlanaz kaj faris noton en libreton. — Mi estas scivola, kiam okazos la koncerto en la filmejo?

— Nur post la granda koncerto sur la placo Otto Pastrosak. Tie ni bezonos la tutan horon kaj la orhestron. La orhestro ludos »*fortissime*«, de tie la horo ekiros en du direktojn.

— Jes, dankon, mi scias.

— Mi volas raporti al vi, moŝtoj, ke por plifaciligigi la sukceson de la piroteknika prezentado ni devus prokrasti la koncerton ĉe la filmejo ĝis vesperigo. Mi rimarkas, ke ankoraŭ ne alvenis la mendita kvanto da terpomoj kaj faruno. Por ne riski la plenan sukceson oni ne ŝparu!

— Neniel, — respondis generalo Venknejam. — La rekvirado por la armeo jam komenciĝis en la suda regiono, kvankam la popolo ofte malhelpas.

— Nu, necesas do aĉeti. Multe pli bone ol simple rekviri. La suda regiono ankoraŭ ne estas infektita kaj ilia trankvilo certigas la sukceson. Moŝtoj, ni devas rapide agi, akiri la rekvizitojn, bone reĝisoradi, lerte instrukcii la rolantojn. La deklamistoj havu bonegan maskon. Mi dezirus fari ĉefprovon en la Nacia Teatro iun nokton kaj konvinkiĝi pri la ŝminkarto de la teatraj barbiroj.

En tiu momento tranĉa orelfenda virina voĉo ek-kantis en la apuda ĉambro. La vizitantoj surprize kaj timigite rigardis unu la alian. Krak ridetis.

— Mia edzino faras provkantadon. Ŝi volas esti la unua, tuj sekvos miaj ok filinoj.

Post kelkaj minutoj la moŝtaj sinjoroj rapide forlasis la ĉambron, nur lia ekscelenco Vaga Orel de Pord restis por momento.

— Nekomprenoble, konsilanta moŝto, ke niaj detektivoj ne povas trovi la filinon de la urbestro. Kvazaŭ ŝi estus englutita de la tero. Oni konstatis, ke ŝi aĉetis bileton al Strutmagen, envagoniĝis, sed neniam ŝi alvenis. Ĉu la patro ne scias pri ŝi?

— Nenion kaj pro doloro li manĝas kaj trinkas de mateno ĝis enlitiĝo.

Lia ekscelenco iom esplore rigardis al okuloj de Krak.

— Kaj vi, konsilanta moŝto, ne konas ŝian restadejon?

La mieno de la ĉefnotario esprimis stultan naivecon en tia perfekteco, ke Vaga Orel de Pord ekridis kaj pardonpetis.

— Ridinde eĉ pensi tian perfidon pri vi, konsilanta moŝto kaj pardonu, ke eĉ unu momenton mi supozis tion... Terura kantado! Ho, pardonu...

— Jam pardonite, ekscelenca moŝto. Vi aŭdas tion nur kelkajn minutojn, sed prezentu al vi, ke mi jam dudekdu jarojn ĝuas ĉiujn nuancojn de tiu ĉi voĉo. — Krak bonvole ridetis. — Sed miaj filinoj havas iom pli moderan kantmanieron.

— Jes?... Preskaŭ mi forgesis komuniki al vi, ke Lia Reĝa Moŝto nepre deziras la areston de Scipo Prikatel kaj la Fremdulo. Tion vi ne forgesu kaj notu, ke la Fremdulo estos enkarcerigita en la ŝtatan malliberejon kaj Scipo Prikatel estu eskortita en la militistan malliberejon de la fortikaĵo. Kaj nenian perfortaĵon permesu al si la homoj kontraŭ li. Lia vivo apartenas al Lia Reĝa Moŝto. Tion ne forgesu!

Momenta surpriziĝo trakuris sur la vizaĝo de Krak, sed pervorte li ne esprimis sian scivolon pri la kaŭzo. Lia ekscelenco foriris kaj la ĉefnotario restis staranta ĉe la pordo. Li pensis, meditadis, konkludadis pri la stranga ordono. Kial en la militistan malliber-
ejon de la fortikaĵo? Kial tie en la fortikaĵo? Nu, kaj lia vivo apartenas al Lia Reĝa Moŝto? Jes, jes, tion li scias, sed kial en la fortikaĵon? Tio tre malfaciligas la planojn de Krak. En tiu ĉi okazo estas necese reverki kelkajn partojn de la granda komedio.

Li iris al sia skribotablo, premis la butonon de elektra sonorilo. La kantado en la alia ĉambro tuj ĉesis. Krak ridetis. Post momento malfermiĝis la pordo de la najbara ĉambro kaj sinjorino Lola proksimiĝis iom humile al sia edzo.

— Jon kara, ĉu vi deziras ion?

— Jes, tro frue vi komencis la kantadon. Mi diris ja, ke vi kantu nur post la lamposignalo. Mi tute ne premis la butonon de la lampeto.

— Sed jes, kara Jon. Stubek povas atesti, ke mi ekkantis je signalo kaj ankaŭ niaj filinoj viciĝis atendente la duan signalon por ekkanti.

— Jes? Nu tiam certe generalo Venknejam tute hazarde premis la butonon per la kubuto, apogante sin sur la skribotablon.

Longa paŭzo. La pensoj de Krak vagadis malproksime. Li cerbumadis pri la lastaj frazoj de lia ekscelenta moŝto, poste rememoris pri Elvira, kiu senpacience atendas liajn sciigojn en Talger. Estus bone sendi al ŝi iun por konsoli ŝin. Eble Cia taŭgos por tiu rolo. Cia estas la plej konfidinda el liaj filinoj.

Sinjorino Lola senvorte rigardis sian edzon en la momentoj de inspiriteco. Neniam ŝi sentis sin tiel feliĉa kiel de momento de venkiteco. De tiam ĉiutage ŝi malkovris novan econ, tute nekonatan, en sia edzo kaj ju pli ŝia admiro kreskis, des pli ŝia obstino pereis. Eble ŝia vanteco donis al ŝi la necesan prudenton por la oboe. Jen, ŝia edzo dum du monatoj

fariĝis la plej grava persono en la socia vivo kaj en la politiko de Bagonio. Certe la rekompenco ne forestos. Du el la knabinoj jam havas fianĉojn kaj nun sekvas la malgranda Lola.

— Jon kara, mi volus averti vin, ke verŝajne hodiaŭ sinjoro Jackson faros gravan viziton ĉe vi. Vi scias ja, pri la mano de Lola...

— Jes, jes, mi scias... Lola, sendu al mi Cia-n! Senprokraste mi volas paroli kun ŝi.

— Kaj kiel vi opinias, ĉu mi ĉeestu dum la vizito de sinjoro Jackson?

— Unue mi volas pritrakti oficialaĵojn kun li, nur poste mi lasos paroli lin pri la geedziĝa propono. Sed, kara Lola, ĉu vi parolis kun Stubek pri la afero, kiun mi komisiis al vi?

— Jes, kara Jon, mi parolis kaj li tuj telefonis hejmen. Lia bopatrino post duonhoru jam alvenos.

— Nu, bone! Ŝi venu tra la oficejo de sia bofilo al mi... Mi bezonas informojn pri Bikitato. Ŝi certe havas kelkajn... Nu, diru al Cia, ke mi atendas ŝin.

Lola kun flatema kliniĝo kaj ĉirkaŭpreno kisis la frunton de sia edzo.

— Jon kara, vi estas pli ol Napoleono. Ĉu vi scias, ke mi amas vin?

— Ne diru! Post dudekdu jaroj vi volas fari aman skandalon? Ĉu ne sufiĉas la ok filinoj?

Lola ruĝiĝante ridetis kaj ŝerce minacis la admiratan grumblulon.

— Ĉu ne honte al vi petoladi?... Jon, kara!

— Nu, kiom vi volas? — kaj Krak enpoŝigis la manon por preni la monujon.

— Ne kiom, sed kion?

— Nu, kion? — kaj sinjoro Krak milde sereniĝis. Do ne temas pri mono.

— Unu kison, kara Jon!

— Nu, kion mi diris, vi deziras sceni aman skandalon. — Krak pintigis la lipojn. — Nu!

Ankaŭ sinjorino Lola pintigis la lipojn kaj en la kriza momento malfermiĝis la pordo. La nom-anonco haltis en la gorgo de la enpaŝinta servisto. Dum sia multjara servado ĉe Krak li ne rememoras pri tia intima familiaĵo. La servisto ektusis averte. Krak iom embarasite rigardis al li. Sinjorino Lola indignite veetis.

— Kion vi volas, Marko ?

— Sinjoro Jackson deziras paroli kun via altestimata moŝto.

— Enlasu lin !... Nu, kion mi diris ? La skandalo okazis kaj Marko ridos ĝis morgaŭ matene... Sed nun restu, kaj ni finu la aferon familian kun sinjoro Jackson.

Sinjoro Jackson, etikete vestita por la solena okazo, venis kaj salutis ceremonie la gepatrojn de la fianĉino, poste sidiĝis, esprimis per elektitaj bombastoj admiron pri la beleco kaj boneco de la malgranda Lola kaj fine interpretis la sekretan deziron de sia koro. Sinjoro Krak aprobe balancis la kapon, sinjorino Lola certe grasiĝis pluan kilogramon pro la feliĉo. Ŝi estis jam preta doni sian patrinan benon, kiam Krak ekparolis.

— Sinjoro Jackson, vere mi estas tre honorata de via propono, sed *ne mi* edziniĝos kun vi. Mia filino Lola estos la feliĉa fari tion. Tamen kiel patro mi havas la devon pridemandi ŝin, ĉu ŝi deziras aŭ ne ?

— Kompreneble, sinjoro Krak, kvankam ni jam priparolis. Ŝi estas ja en la alia ĉambro, ni povas vokigi ŝin.

— Lola, kara, bonvolu iri por ŝi !

Lola rapide kvazaŭ flugante iris en la ĉambron, kie la knabinoj laboris ĉe la skribmaŝinoj. Krak proponis cigaron al la honorinda gasto.

— Kara Jackson, ne konsideru la demandon maldiskretaĵo, kiomjara vi estas ?

— Kvardekunu.

— Lola estas dudekunujara. Ĉu vi ne pensas, ke la aĝdiferenco...

— Ne grave, kiam la koroj parolas.

— Vi estas prava. — Kaj Krak pensis ne sole pri la koroj, sed pri la oroj, tintantaj en la poŝo de la amerikano. Nu, sinjoro Jackson ne aspektis maljuna, sed tamen, laŭ sekreta opinio de Krak, la riĉaĵo grave influis la amon kaj emon de lia filino.

— Jen, nia enamiĝinta kolombino, — venis sinjorino Lola kondukante ĉe la mano sian plej ŝatatan filinon.

La afero baldaŭ klariĝis, ili decidis pri la tago de la oficiala gefianĉiĝo kaj sinjoro Jackson estis solene ĉirkaŭprenonta sian trezoron, kiam Stubek embarrasis la familian scenon.

— Pardonu, altestimata moŝto, laŭ via deziro mia bopatrino alvenis. Ŝi kun mia edzino atendas en mia oficejo.

— Nu, ili venu! Jes, Stubek, vi povas gratuli al Lola. Ŝi en la ĵusa momenteto fianĉiniĝis kun sinjoro Jackson.

Sinjoro Stubek kun sincera ĝojo gratulis, poste forlasis la ĉambron.

— Nu, karaj gefiloj, nun, ĉar mi estas la amiko de la geamantoj, mi permesas al vi la retiriĝon en la alian ĉambron, sed mi petas vin, kara Jackson, ke antaŭ via foriro revenu al mi por paroli pri oficialaĵoj.

— Volonte mi estos je via dispono, kara paĉjo — diris Jackson kaj kun la virinoj li lasis sinjoron Krak sola.

Post kelkaj minutoj panjo Lida jam sidis en la ĉambro kontraŭ Krak. Ŝia kostumo estis pli urba, iom sinjorina, sed la parolmaniero senŝanĝa. Longe ŝi babiladis pri la okazintaĵoj en Bikitato. Tiel Krak eksciis, ke sinjoro Hinzen forlasis definitive la landon kaj el Berlino alvenis du sinjoroj, unu kaponvoĉa

kaj unu arhitekto. La kaponvoĉa sinjoro nelonge restis kaj transdonis necesan sumon por la aĉeto de materialo al la monumento mendita. La marmoraj figuroj baldaŭ estos pretaj kaj tiam pervagonare ekspeditaj, sed oni ne scias ankoraŭ kien? La bronzaĵn figurojn Koŝelev faros eksterlande. Verŝajne, ke la gefratoj baldaŭ transloĝiĝos ien. Kaj tiu sinjoro Hinzen estas verŝajne tre riĉa homo, ĉar li sendis monon ankaŭ al la maljuna instruisto kaj al ties familio.

— Nu, bone Lida, sed mi ne pri tio scivolos. Kio okazis kun tiu fraŭlino, kiu loĝis ĉe vi. Pri ŝi parolu, ĉar tio multe pli interesas min.

— Nu, fraŭlino Elvira bone fartis en Bikitato.

— Sed kion ŝi faris tie?

— Promenadis, altestimata moŝto, ŝi promenadis, konatiĝis kun fraŭlino Koŝelev kaj ili paroladis amike.

— Sed pri kio ili paroladis?

— Nu, kiel mi sciu?

— Vere, kiel vi sciu? !... Nu, kaj kiam ŝi forlasis vian domon?

— Neniam mi spertis tian kuriozan... Antaŭ dek tagoj ŝi diris al mi, panjo Lida mi vojaĝos hejmen al Strutmagen. Nu bone, ni povos kune vojaĝi, ĉar ankaŭ mi vizitos mian bofilon. Sed mi tuj ekvojaĝos, diris ŝi. Nu, bone ankaŭ mi, respondis mi kaj iris ekpaki. Tiel en duopo estos pli sekure vojaĝi, mi pensis. Fraŭlino Elvira poste ekpromenis tra la arbaro, post la promeno ŝi diris, ke estus plej bone, se ŝi povus lasi siajn valizojn ĉe mi, ĉar ŝi baldaŭ intencas reveni. Nu, bone kolombeto mia, mi diris. La saman tagon ni ekvojaĝis. Ŝi aĉetis ankaŭ por mi la bileton. Ni envagoniĝis, sed jam en la momento de la ekveturo mi ne vidis ŝin apud mi. Komence nenion mi pensis, nur poste, kiam vane mi serĉis ŝin en ĉiuj vagonoj. Antaŭ kelkaj tagoj venis al mi sinjoro kaj pridemandis min, same kiel nun vi, altestimata moŝto, sed ankaŭ al li mi ne povis diri pli. Tamara skribis

hieraŭ, ke ankaŭ tie sinjoroj serĉis la knabinon. Ŝi malaperis. Kien? Mi ne scias.

Krak kontente ridetis en si. Tre lerte ŝi eskapis. Tia lerteco estos bezonata en la baldaŭa estonteco. Nepre li devos sendi al ŝi sian filinon por konsoli ŝin. Poste li rememoris pri ŝiaj promenoj, paroladoj kun fraŭlino Tamara. Nova penso venis.

— Lida, ĉu vi rememoras, ke ŝi promenadis sola aŭ kun fraŭlino Koŝelev?

— Ho, ŝiaj promenoj! Tutan antaŭtagmezon ŝi vagadis en la arbaro por ĉasadi, sed kion mi ja ne scias. Neniam ŝi portis hejmen leporon, kaj neniam mankis eĉ unu el ŝiaj kartoĉoj. Foje mi rimarkis tion. Ne grave, ŝi respondis, mi ĉasas ne por pafi, nur fortimigi la leporon. Kiel bone kun fraŭlino Tamara mi ridis pri tio. Nu, sed se ŝi ne ĉasadis, tamen havis grandiozan apetiton. Eĉ por tri personoj sufiĉus, kiom ŝi manĝis.

— Jes? — kaj en la kapo de Krak iom heliĝis la konjekto pri la celo de tiuj promenoj. Do, Scipo Prikatel jam revenis, sed provizore li kaŝas sin. En tiu ĉi kazo estus pli bone, se li mem vizitus ŝin anstataŭ Cia. — Do, kara Lida, mi dankas viajn informojn... Nu, kiel vi estas kontenta pri via bofilo?

— Delikata sinjoro, sed ankaŭ mia filino ne estas lastranga. Ŝi aspektas kiel filino de milionulo... Vere, mi estos danka, ĝistombe danka al vi, altestimata moŝto pro tiu...

— Pssss! Ne parolu eĉ unu vorton pri la afero!

Panjo Lida timigite kovris per la mano sian buŝon.

— Sed, vidu, ankaŭ mia filino baldaŭ havos bonhavan edzon.

— Jes... Mia bofilo ĵus menciis, ke... Dio donu al ili feliĉon. La amerikano, ĉu ne?

— Jes, sinjoro Jackson. Li estas grava persono. Jen, vidu, tiel rekompencas la Dio... ĵus mi pensis, ke...

Marko, la servisto, paŝis en la ĉambron.

— Pardonon, sed la urbestra moŝto urĝe petas vin al sia oficejo.

— Tuj mi iros... Do, kara Lida, dankon por via vizito kaj pri la alia afero psssss... silenton!

Lida ekiris al la pordo, kondukanta al la najbara oficejo kaj Krak kun la servisto forlasis la ĉambron. En la sama momento, kiam panjo Lida ekpemis la anson, ankaŭ el la alia ĉambro iu volis enveni. Ŝi flankenpaŝis por cedi. La envenanto estis sinjoro Jackson. Li iom surprizite momenton hezitis pro la fremda vizaĝo, poste prezentis sin.

— John Jackson, fabrikposedanto el New York.

Panjo Lida embarasiĝis pro du kaŭzoj: unue, ŝi ne komprenis multon el la ĵus diritaj, due, ne sciis kion respondi? Fine ŝi decidis prezenti sin.

— Mi estas Lida Jenmi, el Bikitato, la bopatrino de sinjoro Stubek la urba notario.

Jackson iom mirigite gapis al ŝi. Lia mieno esprimis iom pli ol simplan nekomprenon, sed panjo Lida klarigis tiel: la amerikano ja ne scias bagone.

— *Hesi, pa gavora bagonec?* (Sinjoro, ĉu vi parolas bagone?) — fine ŝi demandis.

— Ne multe, — respondis post ioma konsidero sinjoro Jackson.

— Nu, jes, kompreneble... En Ameriko multaj ne parolas tiun lingvon... Tamen kelkaj parolas ankaŭ tie. Tiuj, kiuj formigras el nia lando.

Sinjoro Jackson faris grimacon kaj mimikon por ŝajnigi, ke eĉ unu vorton li ne komprenis, sed lia rigardo fiksiĝis al panjo Lida.

— Ne multe kompreni, ne multe paroli kaj vortoj manki al mi — klarigis kun troa fervoro Jackson.

— *Hesi, drel nam gavora bagonec.* (Sinjoro, do vi ne parolas bagone.)

— *Nam gavora, nam gavora* — neis vorte, per kape kaj geste Jackson.

Panjo Lida longe rigardis la amerikanon, kaj tiuj trajtoj ŝajnis al ŝi tre konataj. Sed ŝi ne povis rememori.

— Mi bedaŭras, ke vi ne povas paroli. Mi estus demandinta vin pri Johano Gluemman, kiu antaŭ multaj jaroj elmigris en Amerikon. Verdire, jam antaŭ tiom da jaroj, ke certe li mortis... Tamen via vizaĝo rememorigas pri li.

Jackson nekompreneble rigardis al panjo Lida.

— *Nam gavora, nam gavora*, — li ripetadis.

Sed panjo Lida ne lasis sin embarasi. La unuan fojon ŝi vidas veran amerikanon, do ŝi profitos la okazon paroli al li.

— Vere domaĝe, ke vi ne konas tiun Gluemman. Vi povus diri al li, ke mi honeste edukis nian infanon kaj nun ŝi antaŭnelonge edziniĝis kun la notario Stubek.

— *Nam gavora, nam gavora, hesa!* — Ŝvitperloj aperis sur la frunto de Jackson pro la klopodo komprenigi, ke ŝi vane parolas.

— Mi scias, ke vi ne parolas, sed tre bone aŭdi vian voĉon, kiam vi parolas bagone. Ŝajnas al mi, ke ankaŭ via voĉo similas al tiu de Joĉjo.

Sinjoro Jackson senvorte kapitulacis, eksidis kaj lerte kovris la vizaĝon per la mano, manovranta kun la poŝtuketo.

— Kaj se tiu malfeliĉa Joĉjo ankoraŭ vivus, li havus saman aĝon kiel vi, mi tiel opinias.

Sinjoro Jackson ekkubutis sur la skribotablon kaj post momento eksonis orelfenda kantado kaj terura harmoniumludo en la apuda ĉambro. Sinjorino Lola ekfunkciis. Panjo Lida nur por momento atentis pri la kantado, poste daŭrigis la konversacion.

— Nu, jes, li neniam vidis nian filineton kaj nun vere surpriziĝus. Ĉu vi konas mian filinon? Ŝi estas multe pli bela ol mi estis en ŝia aĝo, nu kaj multe pli inteligenta, instruita. Ĉu mi voku ŝin?

Sinjoro Jackson malespere frapis sur la tablon

kaj post momento eksonis plengorĝa kantaĉado de tuta virina horo en la apuda ĉambro. Ankaŭ la ok filinoj de Krak ekfunkciis.

— *Nam gavora, hesa, nam gavora!!!* — Jackson kvazaŭ hurle kriadis, per la pugnoj tamburis sur la tablon. Ekstere la kantado fariĝis furioza.

— Nun vi tute similas al mia mortinta Joĉjo... Ho, kiel! La gestoj, la fulmo en la okuloj kaj la kria voĉo... Jes, jes... — Panjo Lida kuris al la pordo, malfermis ĝin kaj kriis al la alia ĉambro. — Lida, Lida venu!

Jackson tute frapite, rezigne falis sur la tablon. Momenton ankoraŭ furiozis la kantado, subite ĉesis kaj armeo da virinetoj kuris kun ruĝaj vangoj en la ĉambron. Kun ili ankaŭ sinjorino Stubek.

— Kio okazis, paĉjo? — kriis hore la knabinoj. — Sed paĉjo eĉ ne estas ĉi tie!

Panjo Lida prenis la manon de sia filino kaj tiris ŝin al si.

— Kio, kio okazis, je amo de Dio, sinjoro Jackson? — kriis malespere sinjorino Lola.

— Rigardu, Lida, rigardu! Tiel aspektis via mal-feliĉa patro. Tute tiel! — klarigis panjo Lida al sia filino laŭte por superi la ĝeneralan bruon. — Tute tia, kia Joĉjo Gluemman.

— Ĉu vere, panjo? — demandis sinjorino Stubek. — Nu, sed kiel vi povas aserti tion?

— Kion? — subite rekonsciigis panjo Lida.

— Ke li estas mia patro... Li estas ja sinjoro John Jackson el New York.

— Nu tion mi ne asertis, ke li estas iu alia, sed, ke li similas al la mortinto.

Sinjoro Jackson lamente, vere kompatinde, kunpremane la manojn ĝemetis.

— *Nam gavora, hesa, nam gavora!*

XXIII.

Belega vintra mateno. La suno ridetis kiel printempe kaj ĝiaj radioj fajreris sur la blindige blanka neĝtavolo. Koŝelev kaj Tamara matenmanĝis. La tria sengasta taso jam estis kutima al Koŝelev, tamen hodiaŭ li pli sincere ol iam antaŭe deziris, ke ĝia atendato alvenu baldaŭ. Depost la foriro Grauer eĉ unu vorton ne skribis al Tamara. Lia sekretario, la kaponvoĉa impresario de la iama Grauer, foje vizitis ilin, transdonis oficiale la mendon pri la monumento, pozadis grandsinjore, sed eĉ unu vorton ne parolis pri sia nuna ĉefo. El tiu sintenado Tamara konkludis, ke Cezaro Grauer ankoraŭ ne venkis la barojn, kiuj disigas ilin. Tamen ŝia fido iom malfortiĝis kaj ties sekvo montriĝis sur ŝia vizaĝo. Ŝi fariĝis iom pala, la okuloj ofte ruĝaj pro dumnokta maldormo. Eble neniam li revenos.

Tamara sidis kontraŭ la fenestro, de kie oni povis bone vidi la najbaran dometon kaj tiun fenestron, ĉe kiu sidadis la resopirata karulo. Ho, se nun li aperus ĉe tiu fenestro! Tio estus la plej bela novjara donaco. Ŝi rememoris, ke antaŭ semajnoj kiel trompis ŝin la ŝajno. Ŝi vidis vizaĝon por momento, sed poste pruviĝis, ke tiu vizaĝo eĉ vira ne estas. Elvira Jenlafiŝ loĝis en tiu ĉambro dek kaj kelkajn tagojn. Jes, Elvira! Kiel ŝi ekamis tiun knabinon. Ili bone komprenis unu la alian post la unuaj tagoj. Precipe Tamara komprenis ŝin, kvankam ne en ĉio

aprobis ŝian aŭdacan konduton. Tamen estis iu por ne pasigi sola tutajn tagojn. Lia frato febre laboris de frua mateno por fini la grandan verkon ĝis la limtempo. Grauer volis starigi ĝin ie en eksterlando kaj la inaŭguradon soleni samtempe kun tiu de la Monumento en la zoologia ĝardeno de Strutmagen.

— Bela novjara mateno, — diris Koŝelev por peli la pensojn de sia fratino.

— Jes, tre bela, Juro... Ĉu la novjaro alportos bonon aŭ malfeliĉon?

— Ni esperu pri la bono... Doloraj horoj neniam mankas en la vivo.

— Vi estas prava, Juro, ni pensu nur pri la bono, pri la belo.

La rigardo de Tamara denove karesadis la fenestron de la najbara dometo. Subite la rigardo streĉiĝis, vigliĝis, poste konsterniĝis. Ne, neeble, ke ŝi eraras. Antaŭ momenteto ŝi vidis la konturojn de movanta figuro post tiu fenestro. Ŝi atendis, sed vane.

— Juro, tre strange, sed antaŭ momento ŝajnis al mi, ke iu estas en tiu ĉambro. Panjo Lida ankoraŭ ne revenis el la ĉefurbo, do ŝi ne povas esti en la ĉambro.

— Nu, tiam fraŭlino Elvira... Si revenis por siaj postlasitaj valizoj.

— Ne, ne... Ne Elvira... Alta vira figuro... Tiel ŝajnis al mi.

— Certe vi eraras... Ne utilas luli vin en tiaj revoj, Tamara, ĉar la seniluziigo vekas doloron.

— Ne, nun vi eraras... Tiu figuro eĉ ne similis al li... Ĉu ne povas okazi, ke ŝtelisto kaŝis sin en la neŝatata dometo?

— Ne verŝajne, sed por trankviligi vin, mi tuj rigardos.

— Ni iru kune!

La gefratoj rapidis al la pordeto de la najbara barilo. Ĝi estis ŝlosita. Koŝelev rampis trans la barilon, paŝis al la pordo de la domo. Ĝi estis ŝlosita.

— Ne maltrankviliĝu! Stelrompo ne okazis. La seruro estas nedifektita.

— Juro, rigardu ankaŭ la ŝlosiltruon!

Koŝelev obeis kaj surprizite konstatis, ke en la seruro vidiĝas ŝlosilo, ŝovita de interne. Per la pugnoj li forte ekfrapis la pordon. Silento.

— Kio, Juro?

— Vere, mi ne scias kion pensi? Ŝlosilo estas en la seruro... — li denove ekfrapis la pordon. — Certe iu troviĝas en la domo. Vi estas prava... Certe, ke iu nerajtigite eniris.

— Atendu, Juro, mi kuros en la laborejon por voki iun el viaj laboristoj.

Tamara estis ekironta, kiam agrabla vira voĉo haltigis ŝin.

— Ne necesas havi emociion por vi, fraŭlino... Tuj mi malfermos la pordon kaj vi povos enveni kun via frato. — La ŝlosilo turniĝis en la seruro kaj la pordo larĝe malfermiĝis. — Jen, bonvolu!

Koŝelev konsternite rigardis la fremdan vizaĝon. Tamara ekstere, antaŭ la barilpordo staris kvazaŭ rigidiĝinte.

— Kiu vi estas?

— Scipo Prikatel... la politika malamiko de la nuna reĝimo, la amiko de la malriĉuloj, sinjoro Koŝelev... Vi havas la rajton transdoni min al la unua policano kaj enpoŝigi la proklamitan premion.

Koŝelev bone rememoris pri la fotoj, aperintaj en la ĵurnaloj kaj sur la afiŝoj de la aresta cirkulero. Sendube, la fama popolestro staras antaŭ li. Momenton li hezitis kaj tiun momenton uzis Tamara.

— De kiam vi kaŝas vin en la domo?

— La Kristnaskon mi jam pasigis ĉi tie.

Koŝelev embarasiĝis pro la trankvila sintenado de la fremda viro. Tamara jam komprenis ĉion. La ŝlosilon Elvira donis al li. En la valizoj ŝi postlasis la necesan nutraĵon. La planon tre favore akcelis ankaŭ la forvojaĝo de panjo Lida. Kiel ajn senprudente

aŭdaca Elvira estis en la agoj, tamen Tamara indulge juĝis pri ŝi. Ĉiu amanta virino laŭ siaj kapabloj volas savi la amatan viron. Jes, Tamara bone komprenis kaj pardonis ŝin.

— Juro, mi klarigos al vi ĉion. Jes, mi... Ne rigardu min tiel mire!

— Sinjoro Koŝelev, decidu do!... Decidu kaj ne demandu! Jen, vidu, sen kontraŭstaro mi sekvos vin. Ne preterlasu la okazon akiri la plej altan favoron.

La tono tre incitis Koŝelevon. La aludo pri rekompenco ofendis lin.

— Ĉu mi aspektas kiel ĉashundo aŭ spiono, sinjoro? — Lia voĉo indigne vibris.

— Pardonu!

— Retiriĝu! Mi penos forgesi la renkontiĝon. Estu singarda!

Koŝelev senvorte salutis lin kaj ekiris al la barilpordo. Scipo Prikatel sammaniere dankis kaj faris unu paŝon antaŭen por klini sin al Tamara. En tiu momento ŝia rigardo esprimis surprizon. Nur nun ŝi vidis lian tutan staturon kaj ĝia alteco tre diferencis de tiu figuro, kiun ŝi vidis tra la fenestro. Ŝi komencis pli klare rememori. Jes, eĉ la koloro de la vesto ŝajnis alia. Tre bedaŭrinde, ke ŝi ne povis vidi la vizaĝon, ĉar tiam la vidita viro staris dorsflanke al la fenestro.

— Ni revenu, Juro! — Ŝi diris iom enpensiĝante kaj ekiris eĉ neatendante sian fraton.

Koŝelev iris al sia laborejo, sed malgraŭ la forgesivolo li ĉiam pensis pri la matena okazintaĵo. Tamara okupis sin pri la hejmaj laboroj, sed ŝia rigardo ofte reserĉis la fenestron. La penso, ke la vidita persono ne estis identa kun tiu, kiu nomis sin Scipo Prikatel, plifirmiĝis en ŝi, sed por ne maltrankviligi sian fraton ŝi prisilentis tiun supozon. La sintenado de la persekutato vekis novan penson en ŝi. Li estis ja dignoplena, sed en tiu sintenado iel kaŝiĝis sinofero. Li estis preta por kapitulaco, por tuja sekvo de ŝia frato. Eble ne li estas la vera Scipo Prikatel, sed tiu alta,

largŝultra, kiu sin kaŝis en la domo. Verŝajne, kvankam lia vizaĝo perfekte similis al la afiŝitaj fotoj. Sed kial li ne aliformas sin? Tiu barbo eĉ maljunigas lin. Tiel eĉ la eskapado estus pli facile. Por momento ŝi pensis, ke eble pro tio, ĉar mem la barbo estas ja unu masko por ne rekonu lin.

Sonoriletoj de glitveturilo, proksimiĝanta sur la vojo, tiris al si ŝian atenton. Tamara iris al la fenestro de la verando, de kie ŝi povis bone vidi ĝis la proksima vojkurbo. Ho, kio okazos, se nun panjo Lida estas reveninta. La bona virino certe tre ektimiĝos. Eble ŝi kriados kaj la najbaroj kuros al ŝia helpo. Tiam... Por malhelpi la eventualan okazontaĵon Tamara, preninte sur sin pelteton, kuris al la strata pordo kaj ne rimarkis, ke el la najbara fenestro rigardo sekvas ŝiajn paŝojn. Rigardo de alta, largŝultra junulo, kies mieno esprimis doloran mildecon.

Tamara ekvidis la proksimiĝantan glitveturilon. Krom la veturigisto du viroj, vestitaj en multekostaj peltoj, sidis en ĝi. Post minuto la veturilo haltis antaŭ ŝi kaj unu el la viroj facile saltis el ĝi.

— Tamara!

La voĉo kuris sur ŝian koron. Ŝi paliĝis, ruĝiĝis dum momentoj kaj preskaŭ falis en la brakojn etenditajn al ŝi.

— Cezar'! — La unuan fojon ŝi elparolis tiun ĉi nomon tiel sinforgese, tiel emociite.

La manoj, rigardoj kunkroĉiĝis kaj longan momenton ili senvorte staris vid-al-vide. La koro de Tamara forte tamburis, sed vortojn ŝi ne havis. Grauer ekridetis, klinis sin al ŝia maneto kaj longe kisis ĝin.

— Tamara, vi donis al mi la duan fojon vian manon... Sed nun mi ne lasos elgliti ĝin el la mia.

Tamara ne respondis, nur simple ekkondukis lin al la domo. Anstataŭ la vortoj elokventis ŝiaj larmvu-alitaj okuloj kaj la mieno, esprimanta dolĉan feliĉon. El la najbara fenestro retiriĝis la rigardanto. En la glitveturilo iom kompatinde ektusetis la postlasita viro.

— Ho, pardonu, sinjoro Hacker, preskaŭ mi forgesis pri vi, — senkulpigis sin Grauer.

— Ne mirinde, nemirinde, sinjoro Grauer — sonis la kaponvoĉa respondo.

— Nu, provizore, ĉar ni estas laŭŝajne bonvenintaj, — kaj Grauer petole okumulis al Tamara, — ni restos ĉi tie, poste ni transiros al sinjorino Lidia Jenmi. Espereble ŝi ne ludonis sian, ĝustadire mian ĉambreton?

— Panjo Lida ne estas hejme, — ŝi respondis trankvilon ŝajnigante. — Ŝi gastadas ĉe sia filino en Strutmagen.

— Nu, do en la laborejo de Juro, kiel la unuan fojon... Jes, ni iru al li senprokraste!

La veturigisto prenis sur la ŝultron kaj en la manon du valizojn. Ankaŭ sinjoro Hacker singarde, iom kontrole sekvis lin. Tamara haltis antaŭ la pordo de la laborejo.

— Atendu momenton! Nur tiam enpaŝu, kiam mi malfermos la pordon.

— Nu, bone! — Grauer ridetis. — Ni faru veran surprizon! Sed... Tamara, rigardu momenton al miaj okuloj kaj respondu! Ĉu mi estas vere bonveninta?

— Je la demando mi respondas demandante... Cezar', ĉu vi ne sentas mian manon en la via?

Grauer emociite perceptis la sopiratan signifon de la respondo.

— Por ĉiam, Tamara.

— Por ĉiam, Cezar'... Kaj nun atendu momenton!

Tamara senbrue ŝteliĝis en la laborejon, haltis ĉe la dorso de ŝia frato. Koŝelev kun ĉizilo en la mano faris la lastajn korektojn sur la ĉefaj marmorfiguroj.

— *Gad naov ane, hesi Koŝelev!* (Feliĉan novan jaron, sinjoro Koŝelev!) — ŝi diris petolvoĉe.

Koŝelev subite turnis sin, suprizis lin la gaja

tinto de la voĉo. Li esplore rigardis momenton ŝiajn larme ridetantajn okulojn.

— Ĉu okazis io?

— Ho, jes! Komenciĝis nova jaro kaj mi pensis, ke estus bone komenci ankaŭ novan vivon.

— Novan vivon? Mi ne komprenas...

— Ho, kiel malrapide funkcias la radoj de via menseto! Nu, la posedanto de la tria taso alvenis.

— Ĉu sinjoro Grauer? Kaj...

— Kaj postulas ne nur la tason, sed ankaŭ la manon, kiu prizorgas ĝin. Jen.

Kun spontanea ĝojo Koŝelev ĉirkaŭprenis sian fratinon.

— Nu, kie li estas?

— Antaŭ la pordo. Mi venis por peti vin, ke vi forgesu mencii la fremdulon en la najbara domo. Li volis okupi sian antaŭan loĝejon.

— Nu kaj nun?

— Sur la sofo en la laborejo kiel la unuan fojon.

Kaj Tamara kuris malfermi la pordon...

— — — — —

La duonhelo de la frua vesperiĝo forviŝis la akrajn konturojn de la mebloj. La lumon, radiantan el la forno, baris la geamantoj, sidantaj apud ĝi. La fajrolumo pentris la koloron de la flagranta vivo sur ilia vizaĝo. Grauer kaj Tamara sidis en intima duopo. Sur ŝia mano ekbrilis la fianĉina ringo. Serenaj pensoj karesis ŝian koron. La fianĉina ringo, katenanta ŝin al la amata viro. Pro tio ŝi rememoris pri nekonata virino, kiu certe aspiris pli avide la samon ol ŝi. Gis nun eĉ ne per sola aludo ŝi menciis tiun alian, sed nun sentis, ke ŝian ĝojon iom maldolĉigas pala sinakuzo. Ĉu ŝi havas plenan rajton porti la ringon? Ĉu ŝi ne artifike por akiri la aman katenon? Kaj kio okazis al tiu antaŭa? Skrupule esplorante siajn agojn ŝi fariĝis severa juĝanto pri si mem.

Grauer ameme rigardis ŝian mienon, elokvente kaj ĉarme montrantan la meditado.

— Pri kio vi pensas?

— Kaj kiel ŝi... ?

Grauer komprenis. Milda rideto aperis ĉe liaj lipoj.

— Si fartas bone... vivas laŭ sia plaĉo... Ne pensu pri ŝi!

Tamara havis malagrablan penson. Longe ŝi pri-silentis, sed la malcerteco devigis ŝin demandi.

— Ĉu vi aĉetis vian liberecon por mono?

— Ne turmentu vin per amaraj pensoj, Tamara!

— Respondu, Cezar', mi volas vidi klare.

Ŝia vibranta voĉo surprizis lin. Vere, estus plej prudente rakonti ĉion.

— Aŭskultu min, kara! Mia intenco estis neniam menciĝi tiun ĉi aferon al vi. Ĉu ne sufiĉe, mi pensis, ke mia profunda amo venkis la barojn?

— Ne, Cezar', ĉar mi ne volas aĉeti feliĉon por larmoj de tria persono. Se tiel estas, mi devas redoni al vi la ringon, kiu simbolas la donacon de via koro al mi. Ne miskomprenu min, Cezar', mi amas vin kaj ami vin mi neniam ĉesos, sed mian feliĉon venenus la scio, ke ĝi kostis larmojn kaj ĉagrenon de alia virino.

Grauer ekridis. La rido estis gaja, ne amara, tamen miksiĝis en ĝi iom da ironio.

— Tamara, vi konas viajn fratinojn nur el *romanoj*... Ne, ne bone mi esprimis min. Vi mem estas vivanta romanheroino, kvazaŭ kreaĵo de romantika verkisto kaj vi paŝadas en la realeco kun revteksita karaktero. Ho, kiel mi adoras vin! Jes, mia admiro jam atingas la limon de adoro. Ho, mia purkora amata Tamara, vi parolas pri larmoj kaj ĉagreno, sed en la realo mi trovis perfidon, facilanimecon kaj postan sakradon... Estu trankvila pri la sorto de tiu knabino, jam nun virino. Kiel mi aŭdis, antaŭ semajno ŝi edziniĝis kun Henrik Altmann kaj tre verŝajne tiel

ŝi mensogos al li fidelecon, kiel al mi ŝi iam mensogis amon. Ne nur ŝia vizaĝo, sed ankaŭ ŝia moralo estas laŭmode ŝminkita.

Tamara longe pensadis pri liaj vortoj. La skrupuloj neniigis, nur la scivolo pri la sinsekvaj okazintaĵoj incitis ŝin.

— Ĉu via disiĝo estis dolora?

Grauer laŭte ekridis.

— Ne estis necese fari klarigojn. Mia neatendita reveno malebligis fari kaj daŭrigi tiun komedion, kiun ŝi tiel lerte aranĝis kaj ludis du jarojn por teni min en rezervo. Jes ja, la bankdirektoro havis pli dikan monujon, pli imponan pozicion ol mi, la iama simpla prokuristo de komerca entrepreno. Cetere ŝi venis al nia firmo de tiu banko, kies direktoro estas Henrik Altmann. Permesu, kara Tamara, ke mi silentu pri la detaloj. Sufiĉas scii tiom, ke mi sukcesis persvadi tiun homon pri laŭleĝa firmigo de ilia amikeco. Jen !

Hontruĝo trakuris sur la vangoj de Tamara. Ŝi konjektis ja, ke tiu knabino havas iom facilaniman karakteron, sed neniam ŝi kuraĝis supozi tion, kion la realeco pruvis. Post momento ŝi forpelis ŝin el sia memoro kaj volis pensi nur pri la nobla ago de Grauer. Li sukcesis persvadi tiun viron pri edziĝo. Sed kiel, tion Tamara ne sciis kaj neniam eksciis dum sia tuta vivo. Tio restis sekreto de la du viroj.

Grauer kun ŝercotona seriozeco faris riproĉon por forgesigi la malagrablan humoron.

— Ŝajnas, ke vin, Tamara, ne interesas, kion mi faris dum mia longa foresto. Ĉu?

— Nur ne tiel riproĉe, Cezar'! Mi havas pli da kaŭzo por tio. Eĉ unufoje vi ne skribis. Ĉu ne honte?

— Mi serĉis konvenan lokon por nia monumento... Mi estis tie.

— Kie?

— Sur la insulo... En la postlasita taglibro de Vilhelmo Grauer mi trovis la precizan difinon de tiu punkto, kie la insulo troviĝas. Vere, ĝi apartenas

al la suvereneco de Usono kaj estas neŝata, sovaĝaspekta terpeco, elpintiganta en la Pacifika Oceano. Per aeroplano mi atingis ĝin. Mia akompananto estis amerikano kaj ni kune esploris ĉion. Nepri-skribebla emocio regis min kaj ne unufoje mi devis lukti kontraŭ la altrudigemaj larmoj. La ideo, kiu gvidis min tien, post detala preparolado kun la inĝeniero, ŝajnis efektivebla. Ni revenis al Ameriko kaj mi luis la insulon por kvindek jaroj. Nun centoj da laboristoj svarmas sur la insuleto. Laŭ plano de la inĝeniero baldaŭ ĝi aspektos malgranda paradizo. Sur la supro de la artefarita cementmonto staros lumturo, kies reflektiloj ĵetos verdan lumon al la vasta oceano por la erarvagantaj ŝipoj. Ĉirkaŭe ĉe la bordo forta digo kontraŭ la detrua forto de la tajdo protektos la vivon de la insulo. Ni trovis taŭgan albordejon por la ŝipoj. En la mezo de la insulo staros impona kaj arta konstruaĵo: *muzeo*. Jes, muzeo por tiuj verkoj kaj inventaĵoj de la homa genio, kiuj celas la efektivecon de via idealo, kiun esprimas kaj elokvente simbolas la grandioza monumento, kreita de via frato. Ĝi staros antaŭ la muzeo sur mezo de palmoborderita placo. Jes, Tamara mia, la plej inda loko por la monumento de la homo Homo estas tie, kie vivis dekkvin jarojn la bestohomoj. Kaj la ĝis nun sennoma insuleto estos baptita *Esper' de l' Homo*. Ho, kiel bone estos rifuĝi tien, kiam la lukto inter la nunaj homoj pelos nin al la nigra pesimismo. Tie, tie, sur la insuleto *Esper' de l' Homo*, ni retrovos ĉiam nian kredon pri la bela estonteco de la homaro kaj heliĝos antaŭ niaj okuloj la fina celo de nia tera vivo: la *homa Homo*. Tamara, Tamara mia kara, mia vivo jam havas celon, mia koro estas plena de ĝojo kaj konscia entuziasmo kaj ĉion mi povas danki nur al vi. Jes, sole al vi mi povas danki, ke mi ne estas plu erarvaganto sen celo en tiu ĉi tera ekzisto. Tamara, Tamara mia...

La voĉo de Grauer karesis la koron de la knabino.

Kun larme brilantaj okuloj ŝi rigardis sian amaton, kiu kvazaŭ renaskiĝinte en la doloroj montras sian veran vizaĝon al ŝi. Jes, liaj arde brilantaj okuloj, la voĉo, vibranta de entuziasmo fidele respegulas tiun animon, kiun ŝi nur konjektis, sed ne vidis ĝis nun. Ŝi sentis, ke la junuleca parolo levas ŝin kaj portas ŝian fantazion al tiu lando, kiun ŝi ofte vidis en siaj revoj. Ĉu ne nur revo estas ĉio eĉ nun? Ne! La koriginta energio krei tiun mondon sidas apud ŝi. Ho, kiel bone estas scii, ke komuna idealo firmigas ilian amon. Eĉ se ne senmanke efektiviĝos la revoj, tamen restos la komuna celo: atingi ilin.

La mano de Tamara danke karesis lian manon kaj sian kapon ŝi klinis al la arde batanta, revteksanta koro de la junulo.

— Cezar', kiel parenca estas via animo al la mia! Vere ni renkontiĝis. Mi dankas la sorton, ke ĝi kondukis vin al mia vivovojo kaj rekompence mi volas fariĝi via fidela helpantino. Nia ĝojo estos vivi ne por ni, sed por niaj homfratoj. Vi komprenis min, vi malfermis vian koron antaŭ mi. Via koro, Cezar', estas templo, kies beleco vekas pion en mi.

— Nu, mia kara, ne glorigu min, — protestis ridetante Grauer. — Mi deziras nur unu: estu nia amo la fonto de harmonia kunvivado.

— Kaj mi sentas, ke tiel estos kaj nenio povos disigi nin. La estontaj zorgoj, ĉagrenoj kaj seniluziigoj nur hardos tiun senton, kiu ligas nin unu al alia. Cezar', kiel mi esprimu mian dankon, mian feliĉon, mian...?

Grauer petole ridetis.

— Per unu fianĉina kiso. — Li brakumis al si la knabinon, kiu kun ĉasta simpleco cedis siajn lipojn je la arda kissoifo.

Mallaŭta ekfrapo de la pordo embarasis la geamantojn. Tamara liberigis sin el la ĉirkaŭprenantaj brakoj. La frapetado ripetiĝis. Tamara ekridis.

— Juro, ne ŝercadu, sed envenu!... Viaj ŝercoj...

En la kadro de la malfermita pordo aperis nekonata viro, altstatura kaj muskola. La lumo de la fajro por momentoj heligis lian junan vizagon. Tamara surpriziĝis.

— Pardonu, gesinjoroj, mi estas fremdulo — komencis la nekonata viro germanlingve, sed lia elparolo perfidis tuj la slavon, kiu moligas la sonojn.

Grauer kaj Tamara leviĝis. Sin embarasis, ke la fremdulo parolas germane.

— Kion vi deziras, sinjoro? — demandis Grauer.

— Mi venis tra la arbaro kaj perdis la ĝustan vojon. Dumnokte ne estas vagonaro al Talger kaj se la fraŭlino bonvolus informi min pri la ĝusta direkto de la ŝoseo, kondukanta tien, kore mi dankus.

Grauer interpretis, sed Tamara ne tre atentis. Sian intereson vekis la slava sonmoligado kaj ankoraŭ io. Tiu ĉi viro mensogas. Li venis ne tra la arbaro, almenaŭ ne nun. Tiun ĉi altan, muskolan staturon ŝi vidis matene tra la fenestro de la najbara domo.

La longminuta silento de Tamara ĝenis la fremdulon. Li ripetis sian peton, aldonante, ke li nepre devas antaŭ la mateniĝo esti en Talger kaj nur pro tio li riskis ĝeni la gesinjorojn per sia vizito. Grauer jam estis tradukonta, kiam Tamara ekparolis ruslingve je granda miro de Grauer kaj je embaraso de la malfrua vizitanto.

— Sinjoro, mi ne konas la veran celon de via vizito, sed mi sentas, ke vi ne diris la veron. Eble vi venis tra la arbaro, sed ne nun. Vi alvenis jam hieraŭ aŭ antaŭ tagoj. La vojon al Talger vi tre bone konas. Jes, tion mi sentas kaj fine kial vi parolas gemane, sciante, ke mi estas rusino?

La viro embarasite tusetadis, serĉis vortojn por senkulpiĝi sin, sed lia surpriziteco estis tro granda por sukcese ludi plu la rolon de senkaŭze suspektigata homo.

— Fraŭlino, vi havas tre viglan fantazion — fine li ruslingve diris.

— Tute ne! Mi ne bezonis fantazion diveni la veron, ĉar mi vidis vin hodiaŭ matene tra la fenestro de la najbara domo. Via parolmaniero similas al tiu de ĉiu ruso... Kial vi venis? ... Kiu vi estas?

La sintenado de Tamara estis iom atakema kaj tion rimarkis Grauer. Li tre atentis kaj kvazaŭ instinkte sentis, ke la du lastaj frazoj temis pri demandoj, kiuj videble ĝenis la fremdulon. Kun kreskanta antaŭsento pri io eksterordinara Grauer paŝis pli proksimen al la viro.

— Kial vi ne respondas? — li demandis.

La vira voĉo redonis la regopovon al la vizitanto. Li ridetis iom amare.

— Sinjoro, — li komencis germanlingve, — mi havus kelkajn vortojn al vi kaj estus tre danka, se vi bonvolus dediĉi al mi kelkajn minutojn.

Grauer per simpla kapjeso konsentis kaj turnis sin al Tamara.

— Kara, ne maltrankviliĝu! La sinjoro serĉis min, verŝajne li havas gravajn sciigojn. Pri kio? Mi ne scias. Mi petas vin, lasu min sola kun li.

Tamara ne forprenis sian rigardon de la fremda viro, kies vizaĝo ŝajnis konata al ŝi. Kie ŝi vidis tiujn trajtojn? Ŝi longe serĉis en siaj memoroj, sed vane. Subite ŝi turnis sin al Grauer.

— Cezar', mi ne scias, kiu estas tiu ĉi homo, sed mi sentas, ke liaj sciigoj koncernas min kaj mian fraton. Li estas ruso, eble sendita de la malamikoj de emigrantoj... Jes, jes! . . . La polico de tuta Bagonio serĉas iun, kiu nomas sin Fremdulo kaj organizas revoluciajn trupojn en la provinco. Onidire, li estas sendito de Sovetio.

— Ĉu vi pensas, ke li...

— Jes, Cezar', mi pensas, eĉ mi scias jam, ke li estas tiu Fremdulo, — kaj Tamara subite faris ruslingvan demandon al la viro, kiu divenis jam el

kelkaj vortoj, ke la knabino scias pri li pli ol necese.
— Vi estas tiu, kiu nomas sin La Fremdulo. Ĉu ne?... Respondu rekte!

Jesa kapklino estis la respondo.

— Kial vi venis?... Kial ĝuste al ni?... Ĉu viaj superuloj donis informojn, eble eĉ ordonojn pri ni?

La viro respondis per kapneo. Momenta silento regis en la ĉambro. La tri personoj rigardis unu la alian longe explore kaj ĉiu penadis diveni la prisilentitajn pensojn.

— Kial do tamen vi venis al ni? — demandis Tamara, sed ŝia voĉo jam ne sonis tiel akre, kiel antaŭe.

— Mi venis... mi venis viziti vin. La hazardo kondukis min ĉi tien kaj nun mi foriros... Mi volis renkonti... samlandanojn. La hazardo, nur la hazardo kaj nenio pli... .

La voĉo de la viro milde vibris, en liaj okuloj aperis larma brilo, liaj trajtoj esprimis subpremitan emocion. Tamara nesciante kial sentis kompaton al li. Grauer nekomprenante la konversacion atentis preta defendi sian fianĉinon.

— Kaj... kaj nun kien... kien vi volas...?

— Al Talger... Jes.

— Jes.

La ĝena silento denove ekkuŝis sur la lipojn, sed nun ĝi estis pli embarasa al iam antaŭe. Tamara por liberigi sin de la stranga humoro proponis sidlokon al la viro.

— Ne, dankon! Mi ne estas laca kaj mi devas senprokraste ekiri... Nur kelkajn vortojn mi volas paroli al tiu sinjoro, kiu estas via fianĉo.

— Kiu diris tion al vi?

— Oni diris... Negrave, kiu, sed iu diris tion.

— Kaj kion vi volas diri al li? Kiel koncernas mia afero vin?

— Neniel... Verdire neniel, kaj tamen mi de-

zirus paroli al li ĝis via frato revenos el la urbeto. Mi ne volas renkonti lin denove.

— Ĉu vi jam renkontis lin? — demandis surprizite Tamara.

— Jes, sur la vojo, antaŭnelonge... Li estas vera artisto. La monumento pri la homa Homo estas vere genia skulptaĵo.

— Ĉu vi vidis ĝin?

— Jes... Hieraŭ nokte mi ŝtelis min en lian laborejon por vidi ĝin... Ne konsterniĝu! Mi estas ja ĉasata persono de la tutlanda polico kaj fari viziton dumtage mi ne riskas. Mi renkontis lin intence sur la vojo, demandis lin pri la ŝoseo al Talger kaj per manpremo mi dankis la informon, sed tiu manpremo estis mia sincera gratulo kaj ankoraŭ io... jes, ankoraŭ io...

— Kio?

— Ne rigardu min tiel time!... Vere, via mondo estas tute fremda de la mia, tamen kelkfoje okazas renkontoj... renkontoj, kiam el la diferencaj mondoj restas nenio.

Tamara sentis tremeti sian koron. Neklarigebla dolora premo pezigis sur ŝian animon.

— Kiu vi estas? Diru, kiu vi estas? — Ŝia voĉo vibris pro ekscitiĝo.

— La Fremdulo, — respondis la viro kun tia trankvila tono, kiu eĉ pli incitis la sentemon de Tamara, — la Fremdulo, kiu morgaŭ matene nepre devas esti en Talger, ĉe la landlimo. Jen.

Tamara ne demandis plu. Ŝi sentis, ke la viro ne volas malkaŝi sian personecon. Verŝajne, liaj superuloj malpermesis tion. Ŝi legis ja tiom multe da strangaĵoj pri tiu lando, kie iam ŝia lulilo estis balancita.

Grauer senpaciencaĝis. Li paŝis tute proksime al la vizitanto.

— Sinjoro, vi esprimis deziron paroli kun mi. Jen, mi estas je via dispono. Kion vi deziras komuniki al mi?

La Fremdulo karese rigardis al liaj okuloj.

— Kiel malamikeme vi rigardas min? Nenian sciigon mi havas por vi. Nur unu peton mi volas interpreti. Mia persona peto, sed mi estas certa, ke vi volonte plenumos ĝin. Vi estas riĉa, potenca per la mono heredita. Mi devus malami vin, kiel malamikon de mia mondo, sed... sed ĵus mi diris al via fianĉino, ke okazas renkontoj, kiam el la diferencaj mondoj restas nenio.

— Mi ne komprenas vin.

— Negrave. Sufiĉos, se vi komprenos la peton. Kiel eble plej baldaŭ forlasu la landon kaj feliĉigu la fraŭlinon kaj ŝian fraton tiel, kiel vi povas fari tion en via mondo per la potenco de la kapitalo. Jen... Kaj ankoraŭ ion. Permesu, ke mi antaŭ foriro kisu la maneton de via fianĉino... Ne pensu pri ia junula ekflamiĝo, sekreta enamiĝo... Hodiaŭ la lastan fojon mi vidis ŝin.

La parolmaniero de la Fremdulo embarasis lin kaj je la demanda rigardo de Tamara li ne tradukis. Lia silento estis la konsento. La Fremdulo turnis sin al la knabino.

— Miaj momentoj estas kalkulitaj. Mi devas rapidi for. Forgesu, ke vi havis malagrablajn momentojn, sentojn pro mia vizito. Ne tiel mi pensis antaŭe. Estu sana, estu feliĉa! — Li klinis sin etendante la manon je adiaŭo.

En tiu momento tra la fenestro vaganta lumo de aŭtolampoj penetris en la ĉambron. La lumo longan minuton heligis la vizaĝon de la Fremdulo. Ĝi estis dolore emociita. Tiu mieno vekis kortranĉan senton en Tamara kaj ŝi ekkriis.

— Ivan!... Ivaĉjo!

Tamara per ambaŭ manoj ekkaptis la Fremdulon, sed post momento ŝi svenis, falis en la brakojn de Grauer, saltanta al ŝi. Grauer ekscitita, emociita premis ŝin al si. Ekstere akre bruegis la proksimiĝanta

aŭtomobilo. La Fremdulo saltis al la pordo kaj malfermis ĝin.

— Kiu vi estas? Kio okazis? — kriis Grauer al li.

— La tria el la gefratoj . . . sed nun eĉ momenton mi ne havas por klarigo. Zorgu pri ŝi kaj diru al ŝi, ke ŝia konjekto trompis ŝin!

La bruo de la aŭtomobilo ĉesis antaŭ la domo. La Fremdulo senbrue forglitis el la ĉambro kaj malaperis. Grauer senkonsile, hezitante tenis la svenintan knabinon en siaj brakoj.

XXIV.

Iun februaran matenon akra sonorilbruo vekis sinjoron Krak. Li salte ellitigis, kuris al la telefono kaj post momento kun tremanta koro, kun pli tremantaj piedoj li raportis al sia edzino, ankoraŭ kuŝanta kun duondormaj okuloj.

— Lola, jen la tago !

Kiel giganta piedpilko ŝi saltis el la lito.

— Dio helpu !... Kaj nun kion fari ?

— Veku la knabinojn ! Senprokraste ili agadu !... La korbon da ruĝaj kokardoj ili disdonadu kun ĉarma rideto sur la placo Otto Pastrosak.

La voĉo de Lola penetre sirenadis tra la tuta domo.

— Knabinoj, vekigu !... Jen la tago !

— — — — —

La stabo de la revolucia amaso estis en la malgranda vilaĝo Grafesenrang, kiu estis konsiderita kiel antaŭurbo de Strutmagen. En argilplanka ĉambro de iu pajlotegmenta dometo sidis la du gvidantoj : Scipo Prikatel kaj la Fremdulo. La mieno de la unua esprimis heziton, la vangoj de la dua flamis kaj lia voĉo verve akre sieĝis la animon de la revema kamarado.

— Sed la vivo de la dinastio estos donita al mi. Ĉu ne ? — demandis Scipo Prikatel.

— Ĉu indulgi vi volas ?

— Ne indulgi, sed ne maljuste puni... Ĉu vi

povas riproĉi la blindulon, ĉar li ne rekonas la kolorojn? Ĉu estas lia kulpo, ke ne vidas tiel, kiel la vidantoj. La vido estas ekster lia povo. Nu, la reĝa dinastio similas al tia blindulo. Ankaŭ la blindulo rigardas la kolorojn sen vido, ankaŭ la dinastio rigardas la mizeron sen kompreno. Kompreni ĝin estas bezone vivi en mizero.

— Scipo, vi estas revema evoluciano. La indulgo en revolucio signifas malfortecon. Ĉu vi komisius la gvidadon de pentrista akademio al mizera blindulo?

— Mi komprenas vin. Jes, vi estas prava, Ivan, sed via vero tranĉas mian homan koron. La kubo estas ĵetita kaj ni devas venki, venki aŭ morti. La tempo de absolutaj suverenoj jam pasis. Nun estas la vico de la gvidantoj. La ŝipo de Eŭropo kaj la tuta mondo dancas super maraj profundegaĵoj, embuskaj abismoj, akvoturnoj. Nur tion mi ne scias, ĉu la solvo de problemoj estas la revolucio aŭ la evolucio?

— Eŭropon povas savi provizore nur du: la komunismo aŭ Paneŭropo. Alia solvo ne ekzistas. Eble la unua estas vojo al la dua, tion al vi diras mi, la pursanga komunisto. La frukton maturigas por ni la strutpolitiko de la eŭropaj ŝtatoj. Ni ridas pri tio. La eŭropa diplomatio ŝovas sian kapon en la sablon de la dezerto kaj pensas, ke nevidante la danĝeron, la danĝero ne ekzistas. Dume ni, centsepdek milionoj da rusoj edukas jam la duan generacion en tia ideologio, kiu antipode kontrastas al tiu de la kapitalistaj landoj. Centsepdek milionoj kaj tuta Azio bolas, kirliĝas, evoluas, edukiĝas en nova mondpercepto kaj post jardeko ekiras almiliti la tutan okcidenton, baraktantan en mizero, malforteco, putriĝinta ideologio. Kio okazos? Nova invado de popoloj, Azio denove venkos, la blanka raso fariĝos nova miksaĵo, kaj nia ideologio formos novan mondon.

— Terurajn bildojn vi skizas, Ivan. La formorto

de la blanka raso signifos subniveleĝon de la tuta homaro.

— Scipo, Scipo, vi ne estas pursanga revoluciano, se tia bildo, se tia estonteco teruras vin. Tro mallargan horizonton vi vidas. Ne de la koloro, ne de la raso dependas la kultura evoluo, sed de la ideologio kaj de ĝia racio. La eŭropa ideologio maljuniĝis, agonias kaj la diplomatoj, ĝiaj kuracistoj estas blindaj por vidi la kuracilon. Rigardu Anglujon! Dum longaj centjaroj izolis sin de la kontinento, ebriiĝis pro la sinsekvaj venkoj de siaj armiloj kaj mi diras al vi, ke Anglujo post paso de du jardekoj estos la plej mizera lando de la mondo, perdos siajn koloniojn, perdos la simpation de siaj parencaj landoj kaj remaĉos sian gloran pasintecon eĉ tiam, kiam respubliko flartos jam sur la supro de ĝia pitoreska parlamento. Kaj la sorto de Anglujo estas la spegulo de tuta Eŭropo, haltanta sur la vojo de la evoluo kaj kroĉiĝanta al la muelradoj de la tradicio. Tiuj muelradoj frakosas la nunan Eŭropon kaj Azio denove venkos. Jes, Azio kun nova ideologio, en kiu edukiĝas jam la dua generacio. Diru, ĉu povos dolori tiam al vi, ke viaj bravaj bagonoj estos eŭrazianoj, aŭ el vidpunkto de la homa feliĉo la nacieco estas grava? Antaŭen, supren sur la pinton de la evoluo! Jen la devizo de la Vivo. Iam nepre devas alveni la Unuigintaj Ŝtatoj de la Mondo, kaj tiam ne ekzistos plu bataloj pro sociaj klasdiferencoj, sed batalo por atingi eksterterajn teritoriojn, raciigi la homan vivmanieron.

— Ivan, eble ĉio okazos laŭ via profetaĵo, sed min turmentas la dubo, ĉu tia sanga solvo, kiel estas la revolucio, povos iam alporti egalrajtecon kaj bonstaton por la homaro? Ne miskomprenu min! Mi estas preta doni mian sangon por miaj gefratoj, samcelanoj, sed mi volus scii, ĉu alia solvo ne ekzistas krom la sangverŝado de milionoj?

— Ne, ne, ne! — kriis plenkonvinkite la Fremdulo. — Evolucio venas ĉiam nur post revolucio,

alivorte, la evolucio estas frukto de revolucio. Jen, vidu, la plano pri Paneŭropo, pri la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo jam estas ellaborita, teorie aprobita, sed la diplomatio de la malnova ideologio ne kuraĝas fari eĉ tiun sensangan evolucian paŝon, ĉar krei novan, signifas samtempe detruiri ion malnovan. La centfoje kompromitita tradicio por ili estas multe pli grava ol la progreso kaj ĝenerala evoluo. Impotentaj potenculoj, kiuj vivas por propraj interesoj. Jen, kial mi diris, ke eble nia vojo kondukos al la dua : al la Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Orienta Terglobo.

— Do, se ni venkos hodiaŭ...

— Ĝi estos unu paŝo antaŭen. La sekvoj: pli da pano, pli da rajtoj, divido de respondeco kaj potenco. Nia venko estos komenco de novaj venkoj. Bagonio farigis antaŭenŝovita bastiono de tiu nova ideologio, kiu kreas novan, pli racian mondon.

— Kaj se ni ne venkos...?

— Per nia sango ni fekundigos la humon por la ideo, kiun nek subpremi, nek mortigi povas homa suvereneco.

— Jes, tiam ni mortos... Kaj mi ne timas la morton por la ideo kaj estonteco.

Scipo Prikatel premis la manon de la Fremdulo. La du kunkroĉigantaj manoj longe longe premadis unu la alian.

En la ĉefurbo ĉiuj telefonoj sonoradis. Ciuminute ordonoj kaj raportoĵoj alternis. La armeo kun kanonoj kaj maŝinpafiloj aperis sur la placo Otto Pastrosak. La ĝiskole armitaj polico kaj ĝendarmaro retiris sin en la domojn. En la reĝa palaco la regimento de la ĉasistoj atendis batalpreta. Generalo Venknejam persone estris ĝin. Majoro Blindfid koncentris sian stabon en la knabingimnazio. La poliestro Mordlanaz, iom tremante kaj dubante pri la venko, lokis sin en la urbestran oficejon. Sinjoro Kazimiro Jenlafiŝ, jen pala, jen ruĝa pro ekscitiĝo, senhalte kuradis tien kaj reen en la ĉambroj de sia domo,

Kelkfoje konscienciproĉoj turmentis lin, sed tiuj baldaŭ forvaporigis, kiam li ekvidis la batalpretajn soldatojn sur la strato. Neeble malvenki, kiam nia glora armeo tiel fiere marŝas, li pensis kaj liaj manegoj pugniĝis vengokolere. Sed kie estas Krak? En la lastaj monatoj tiu fripono tre nekompreneble agadis kaj ŝajne la supraj medioj favoras lin, aŭ almenaŭ indulge preterrigardas liajn agojn. Nu, post la finarango de tiu ĉi aĉa ribelo li montros ja sian potencon al tiu ĉi populara ĉefnotariaĉo. Sed ĉu la venko estas certa? Antaŭ liaj okuloj reaperis la pajloŝtopita kaj pendigita pupo, la minaca letero. Li frostotremis pro ne tre agrabla penso.

Por ĉerpi kuraĝon li paŝis al la fenestro. Ĉu la soldataro estas ankoraŭ batalpreta? Jes, jes. Sinjoro Jenlafiŝ kontente ridetis. La telefono eksonoris. Li kuris preni la aŭdilon, post la unuaj vortoj rekonis la voĉon de Krak.

— Amiko, iru tuj al cia oficejo! En tia kriza tago cia loko estas tie.

— Nu kaj ci?

— Mi? Ne zorgu pri mi! Senprokraste iru al la urbestra oficejo. La ribelantoj serĉos cin.

— Nu, kaj ci volas, ke ili trovi min. Ĉu?

— Kompreneble. Iu devas transdoni al ili la urban suverenecon. Post horoj Scipo Prikatel estos la urbestro, eble eĉ la prezidanto de la nova respubliko.

— Kion ci diras? Scipo Prikatel?!! Ĉu?

— Ne kriadu, sed iru tuj tien!

Sinjoro Jenlafiŝ vane sonoradis, kriadis, petegis, sakradis, li ne ricevis respondon.

En la periferioj de Strutmagen tumultis amasoj ĉifonvestitaj kaj ekiris al la centro de la urbo. La viroj, armitaj per bastonoj, la virinoj, ekipitaj per longaj lignokuleroj kaj balailoj. Kelkaj trupoj da ribelantoj marŝis al la direkto de vilaĝeto Grafsenrang

por renkonti la revolucianojn el la nordaj provincoj.
La stabo de Scipo Prikatel kaj la Fremdulo lokiĝis tie.

Proksimiĝante al la unuaj domoj de la vilaĝo
la amaso plengorge ekkantis.

*La urbestro kaj la trono
nur burĝojn favoras,
por popolo en melono
surprizo odoras.*

*Ho, popolo, fine do
profitu okazon,
en surprizon trempu do
ĉiun burĝan nazon!*

La kanto de la ribelantoj en la vilaĝo resonis
plibataleme.

*Ni liberigu el jugo nin,
Hura! Hura!
metu, popolo, sur tronon vin,
Hura! Hura!*

*por havi panon en la dom'
kaj rajtojn kiel ĉiu hom'
Hura! Hura! Hura!
falu potenco de la kron'!*

La du kantantaj trupoj renkontiĝis sur la vasta
kampo antaŭ Grafsenrang kaj jubile salutis unu la
alian. La urbanoj rapide amikiĝis kun la provincaj,
donacadis al ili kokardojn kaj vetkriadis kun ili la
devizojn: »Vivu la Respubliko Bagonio!«, »Falu la
trono!«, »Egaleco, Frateco, Libereco!«

La ribelantoj nemalhelpite proksimiĝis al la ĉef-
urbo. Kiel monstra demonstracia procesio impresis la
ĉifonvestita kaj senarmila korpuso de la mizero.

El la centro de la urbo kelkaj kurieroj alvenis
kaj malespere raportis, ke la reĝa armeo batalpreta
atendas ilin. Ekscitiĝo, interkonsiliĝo. Iu el la plej
sangavidaj urbanoj plenpulme ekkriis:

— Al la arsenalo!

— Jes, por akiri armilojn al la arsenalo! —
retondris la amaso.

La telefono de la arsenalo eksonoris. La oficiro transprenis la ordonon, poste vicigis siajn soldatojn!

— Soldatoj, kiam la amaso proksimiĝas ni senĉese pafante retiriĝos en la fortikaĵon. Rapide kaj senhezite pafi kaj retiriĝi! Ĉu komprenite?

De malproksime jam aŭdiĝis la muĝo de la ribelantoj. Kiam la unuaj el ili aperis antaŭ la arsenalo la soldatoj ekpafis. Kelkaj el la ribelantoj kun akra veo terenfalas. La soldatoj pafis kaj pafis. La krioj de la vunditoj plioftiĝis. La amaso furioze atakis kaj la soldatoj serĉis rifuĝon en la rapida retiriĝo. Triumfaj krioj! La negardita arsenalo estis ĵetita al la furoro de la amaso, kiu per pezaj stangoj komencis sieĝi, frapadi, rompi, frakasadi la kiraspordegon.

Aŭtomobilo proksimiĝis, sekvata de granda amaso, konstante vivuanta. La stabo de Scipo Prikatel sidis en ĝi. La Fremdulo entuziasmigis la amason. Scipo Prikatel, iom pala, sidis silente. La sento pri respondeco peziĝis sur lian koron. La vido de la furiozantaj ĉifonvestitoj vekis en li amarajn pensojn. La aŭtomobilo preterpasis.

— Scipo, la venko estas certa! — skuis lin ekscitite, batalebrie la Fremdulo.

— Ivan, la venko estos sanga, — respondis Scipo kun obtuza voĉo.

— La kubo estas ĵetita. La arsenalo estas en niaj manoj. Jen, vidu, ĉe la fronto de kelkaj domoj jam flirtas la standardo de la revolucio. Ni venkos.

— Vi estas prava, Ivan, ni venkos, ĉar la vero estas je nia flanko, sed...

Scipo Prikatel profunde enpenisiĝis kelkajn minutojn. La aŭtomobilo jam kuregis en la stratoj de la ĉefurbo. Sur la stratoj staris kelkaj viroj kaj virinoj el la mizera klaso kaj plengorĝe vivuadis al ili. Sed la pordegoj de la domoj estis ŝlositaj, la fenestroj zorge fermitaj kaj post ili palaj, timplenaj vizaĝoj gapis al la amaso. Ilia rigardo rememorigis al la rigardo de buĉota bovo.

Kazimiro Jenlafiŝ tute pala staris ĉe sia skribotablo kaj aŭskultis la raporton pri alveno de Scipo Prikatel kaj la Fremdulo. Kion fari? Por konsilo li turnis sin al la ŝtata policestro Mordlanaz. Tiu levis la ŝultrojn.

— Kian instrukcion donis al vi lia konsilanta moŝto Jonathan Krak?

— Kian instrukcion? Tiu... tiu fri-..., tiu tre estimata amiko mia riskis proponi al mi, ke mi transdonu mian oficon al la ribelantoj.

— Nu, vi do devos transdoni ĝin, — diris trankviltone la policestro.

— Kiel?! Ĉu transdoni?! Mi ne komprenas. Kial ne kontraŭstari?

— Ĉar venki revolucion oni povas nur post ĝia eksplodo.

Kazimiro Jenlafiŝ mire streĉis la okulojn. Ŝajnis al li, ke la saman frazon jam antaŭe li aŭdis. Sed de kiu? Kompreneble, de tiu fripona Krak.

— Vi, poliestra moŝto, parolas tiel kiel lia konsilanta moŝto Krak.

— Jes, ĉar hodiaŭ eĉ la reĝa kortego parolas tiel kiel lia konsilanta moŝto deziras.

La urbestron surprizis tiu ĉi novaĵo. Verdire, post la malapero de sia filino li ne multe zorgis pri la eksteraj aferoj, sed tamen ĉu dum tiom, proporcie tre mallonga tempo, tiu Krak fariĝis do tia influhava suvereno? Ho, jes. Li komprenas, Serponton li varmigi sur sia sino kaj verŝajne la serpento baldaŭ ruzados jam en la urbestra seĝo. Ho, kiel blinda li estis!

— Jes, jes. Lia konsilanta moŝto nun plene ĝuas la favoron de Lia Reĝa Moŝto.

— De Lia Reĝa Moŝto! Ĉu?... Interese, neniam li menciis tion.

— Li estas ja modesta homo, vivanta vere por la komunaj interesoj.

— Sekve, li estas do danĝera viro.

— Ĉu danĝera? Kial?

Sinjoro Jenlafiŝ p isilentis siajn pensojn. Ne estus prudente deklari ilin nun, kiam li sentas forgliti la potencon el siaj manoj.

La pordo malfermiĝis kaj la servisto, tute pala, tremetanta, anoncis la alvenon de sinjoroj, nomantaj sin Komisiono de la Revolucia Komitato. La policestro respektplene leviĝis. La urbestro senkonsile rigardis lin, poste la serviston kaj spasme alkroĉiĝis al sia seĝo. Ho, urbestra seĝo, adiaŭ!

— Bonvolu akcepti ilin senprokraste, — sufloris Mordlanaz.

— Nu, ili envenu!

Tri viroj paŝis en la ĉambron. Unu el ili estis tuj rekonata de Jenlafiŝ. Ho, milfoje li malbenis tiun viron! Scipo Prikatel. Kaj kiel dignoplene! De li dekstre junulo, alta kaj larĝŝultra: la Fremdulo, la vane ĉasata organizatoro. Kaj... kaj... malantaŭ ili... (la urbestro ne volis kredi je siaj okuloj)... malantaŭ ili paŝadis ne malpli fiere Jonathan Krak kun pugnogranda kokardo sur la brusto.

— — — — —

La telefono en la reĝa kancelariejo eksonoris. Xaver Nepaŭl VI. kaj Vaga Orel de Pord ekscitite aŭskultis la raporton de Krak.

— Ĉio en ordo. La revolucianoj renkontiĝis. Batalo ĉe la arsenalo kun kvin mortintoj kaj dudek vunditoj. Scipo Prikatel transprenis la suverenecon pri la urbo. La Fremdulo iras deklari lin unua prezidanto de la respubliko. Kazimiro Jenlafiŝ preskaŭ eksplodis, kiam la nova urbestro esprimis sian deziron pri edziĝo kun lia filino. Feliĉe, mia rideto kaj la granda ruĝa kokardo faris fortan impreson al li. Li vole nevole konsentis. La venko certigita.

— Kiam komenciĝos la batalo ĉe la reĝa palaco?
— demandis Vaga Orel de Pord.

— Verŝajne post horo. La pordego de la arsenalo donas grandan laboron al la amaso. Ĉiumomente

mi atendas la raporton pri la ribelado de la 4-a ĉasista regimento. La Fremdulo mem komandos ilin. Ni povas kalkuli mil vunditojn. Se estas necese, eĉ pli. La venko estas certa.

La urbestra oficejo kun larĝe malfermitaj pordoj atendis la kurierojn el diversaj partoj de la ĉefurbo. Scipo Prikatel rezidis tie. La Fremdulo staris antaŭ li kaj temperamente parolis, gestadis.

— Scipo, la revolucio ne estas ja infanludo. Kiu faris la unuan paŝon, tiu nepre devas fari la duan por firmigi sian potencon kaj ne riski la atingitajn sukcesojn.

— Ne, ne, Ivan. Kial vane, aŭ superflue verŝi sangon? La urbestro sen kontraŭstaro cedis sian suverenecon al ni, la polico kapitulacis antaŭ la premo de la amasopinio kaj ĵus deklaris submetiĝi je nia komando la Kvara Ĉasista Regimento. Ĉu ne sufiĉe da forto ni havas jam por devigi la parlamenton kaj la reĝon reformi la konstitucion?

— Scipo, mi konjektas aĉan komedion. Tiu ĉi senbatala kapitulaco de la burĝa klaso maskas komploton. Ne kredu al burĝo ĝis li estas varma!

Scipo Prikatel terurite rigardis al sia kamarado.

— Ivan, mi ne rekonas vin. Kion vi deziras de mi?

— Gis ne malfrue agi rapide kaj decide! Transdonu al mi la komandantecon de la regimento ribelanta, arestigu la plej riĉajn burĝojn kaj tenu ilin kiel garantiulojn, detronigu la reĝon, la tutan dinastion kaj al ĉiu posteno metu unu el niaj fidinduloj. Ne estu revema evoluciano, sed agu! La popolo fidas vin kaj duonvoje halti signifus aĉan perfidon.

En tiu momento proksimiĝanta muĝo de amaso penetris en la ĉambron. La ribelantoj atingis la placon. Akraj krioj, blasfemado, kantado.

Sangmakulita viro kuris en la ĉambron.

— Ĉivitano, perfido!

Scipo Prikatel salte leviĝis.

— Perfido, se mi diras, — daŭrigis la sovaĝaspekta viro. — La arsenalo ne entenis eĉ unu rustan poŝtrancilon. Ni trovis kelkajn kestojn, plenajn de tiuj komunistaj flugfolioj kaj broŝuroj, kiujn la polico dum la lastaj monatoj konfiskadis en la fabrikoj. Ni estas ĉirkaŭitaj de la tuta armeo. Perfido, mi diras!

Flamruĝo de kolero aperis sur la vangoj de Scipo Prikatel. Li sentis sin primokita.

— Kaj la amaso? Kaj niaj kamaradoj?

— Pro senpova furiozo ili atakis la domojn kaj prirabas ilin serĉante armilojn. Parto da ili ekiris al la reĝa palaco. Al ili aliĝis unu regimento ribelanta. La plimulto okupis la placon Otto Pastrosak kaj senmove, minace rigardas al la kanonoj. Kion fari? Ĉu retiriĝi sen risko de la batalo?

La Fremdulo akre sakrante furiozis.

— Ili kaptis nin kiel muson per kaptilo...

Scipo Prikatel kuris al la balkono, larĝe malfermis ĝin. Tondra vivuado de la amaso skuis, tremiĝis la korojn de la pacaj civitanoj, retiriĝintaj en siajn nestojn. La soldatoj indiferece rigardis supren al la popolestro. Malantaŭ la soldata muro sidis sur ĉevaloj majoro Blindfid kaj lia oficira stabo. Scipo Prikatel bone konis ilin, ĉar iam tiu regimento apartenis al li kaj ĝi portas lian nomon. Jes, iam tiu ĉi regimento apartenis al lia komando. Subita penso trafelmis en lia kapo. Kial ne riski? Venki aŭ morti por la ideo kaj pli bona estanteco! Momenton aperis antaŭ liaj okuloj dolĉe ridetanta knabina vizaĝo. Eh, nun estas la vico de batalo! Li revenis en la ĉambron.

— Ivan, tuj iru al la amaso, atakonta la reĝan palacon! Transprenu la komandon! Ne fidu al la soldatoj! Senarmigu ilin! Donu la armilojn en la manojn de la popolo. Ni venkos aŭ mortos. Rezistu ĝis lasta guto! Mi sekvos vin baldaŭ. Je mia honora vorto mi ne forlasos vin, nek la popolon, kiu donacis al mi fidon. Antaŭen! Rapide agu kaj senindulge!

Hohooo, ne tiel facile mi vendos mian vivon, kiel vi pensis, aĉaj intrigantoj !

La Fremdulo mirigite rigardis al li.

— Kion vi volas fari ?

— Ne demandu, sed sekvu mian ordonon !

La Fremdulo rapide forlasis la ĉambron. La sanga viro volis sekvi lin, sed Scipo Prikatel retenis lin.

— Kamarado, vi restos apud mi. Mi bezonas vin. Iru al niaj plej fidindaj homoj, elektu el ili dek. Ne nur virojn, sed ankaŭ virinojn kaj infanojn. Post dek minutoj vi staru servoprete antaŭ la pordego de la domo. Ĉu komprenite ?

— Jes, kamarado !

La viro forrapidis. Scipo Prikatel longe rigardis post li. Jen la kamparano kun la plugiltiranta edzino kaj ses infanoj... Li batalas por la malsataj buŝoj.

— — — — —
La reĝa telefono denove eksonoris. Vaga Orel de Pord avide aŭskultis la freŝan raporton de Krak.

— Ĉio en ordo. Post dek minutoj la batalo komenciĝos ĉe la palaco. La Fremdulo jam estas survoje por transpreni la komandon. Sur la placo Otto Pastrosak la amaso staras mute kaj vid-al-vide kontraŭ la regimento, komandata de majoro Blindfid. Kvincent tenoristoj, tricent basistoj kaj kvarcent sopranoj en la unuaj vicoj. Tuj post la signalo de lia ĝenerala moŝto Venknejam komenciĝos la koncerto. Scipo Prikatel retiriĝis en la urbestran oficejon kaj atendas la raportojn. Ni venkos.

— — — — —
Sur la placo Otto Pastrosak grupo de ĉifonvestitaj viroj, virinoj kaj infanoj proksimiĝis al la soldata koridoro. Belstatura viro en mano kun blanka flageto kondukis ilin. Majoro Blindfid ridetante rimarkis al siaj oficiroj: »La ratoj ne kuraĝas mordi«.

La grupo atingis la soldatojn. Serĝento haltigis

ilin. Maljuna, riĉe ordendekoraciita serĝento. Scipo bone konis lin.

— He, kien ?

— Pli da respekto postulas mia rango, serĝento Skurĝenman. Ĉu vi ne rekonas min ?

La maljuna soldato momenton gapis al la freŝe razita juna vizaĝo. Li paliĝis, subite krucosignis sin. Kelkaj el la proksime starantaj soldatoj kun terurstreĉitaj okuloj rigardis la dignoplenan junulon.

— Dio, helpu min ! Miraklo aŭ trompo ! — eliĝis duonvoĉa krio el la serĝento.

— Ne trompo, Skurĝenman. Ĉu vi rekonas mian voĉon, miajn trajtojn ? Vi devas rekoni ilin, ĉar de mia dekkvina jaro vi konas ilin.

— Sed... sed... Ho, Dio, liberigu nin de la fantomoj !

— Plenumu mian ordonon ! Konduku nin al majoro Blindfid ! Jes, jes nin : la elektitojn de nia popolo kaj min. Serĝento Skurĝenman plenumu la ordonon de via suvereno !

La maljuna serĝento kiel hipnotito ekiris antaŭ la trupo de la ĉifonvestitoj. En la vicoj de la soldatoj komenciĝis flustra susurado. Kelkaj timeme krucsignis, aliaj, instigitaj de superstiĉemo, parolis pri miraklo. Majoro Blindfid kun siaj oficiroj kun videbla malestimo atendis la senditojn de la ribelantoj. La serĝento por raportoj rapidis kelkajn paŝojn antaŭen, levis la manon al sia kepo, sed eĉ unu vorton elparoli li ne kapablis.

— Nu, Skurĝenman, kio estas al vi ? Ĉu vi mutiĝis ? — senpacienĉadis Blindfid.

— Kun humila respekto al majora Moŝto, mi ne povas kiel raportoj...

Majoro Blindfid kun akra ironio, superula minaco ekridis.

— Nu, mi instruos vin... Ĉu vi deziras ?

Scipo Prikatel subite antaŭenpaŝis, flankenpuŝis la serĝenton.

— Majoro Blindfid, kiel regimentestro mi transprenas de vi la komandon.

La bone konata voĉo, la komanda formulaĵo, la centfoje vidita vizaĝo por momento mutigis, embarasis la majoron kaj liajn oficirojn. Ne, ne povas esti realaĵo. Trompo! Lerta trompo de la ribelantoj! Post momento majoro Blindfid jam retrovis sian trankvilon.

— Serĝento Skurĝenman, arestu tiun homon, kiu tiel senhonte kuraĝas ludi la personon de nia karmemora iama regimentestro, Lia Reĝa Princo Olivero Karlo.

— Majoro Blindfid, mi ripetas la komandon, — kaj Scipo Prikatel energie altigis la tonon — mi, Olivero Karlo, alinome Scipo Prikatel, transprenas de vi la regimenton. Kiu per unu fingro nur tuŝos min, estos mortinta. Ĉu komprenite?

Majoro Blindfid konfuziĝis. Ĉu Olivero Karlo kaj Scipo Prikatel estus sama persono? Por konsiliĝi li turnis sin al siaj oficiroj, sed sur ilia mieno li renkontis la saman palan heziton, kian li havis. Ĉu kredi je miraklo? Ne!

— Olivero Karlo mortis kaj mi ne kredas pri reveno de mortintoj. Skurĝenman, arestu lin kaj kun forta eskorto akompanu lin al la komandanto de la fortikaĵa malliberejo.

Scipo Prikatel paliĝis. Malproksima kanontondro skuis la aeron. La batalo komenciĝis ĉe la palaco. La serĝento faris unu paŝon al li. La grupo de la ĉifonvestitaj elektitoj tute timigite rigardis lin. Por ili estis simile surprizaj la ĵus aŭditaj vortoj. Tute neatendite la sanga viro saltis al Scipo Prikatel kaj en lia alte tenita mano ekbrilis ponardo.

— Aĉa perfidulo, mortu do!

Sed la levita mano ne mortfrapis. Haltigis ĝin la dolora rigardo de Scipo. La momenta hezito sufiĉis por malhelpi la atencon. Skurĝenman saltis al la sanga viro kaj terenĵetis lin, poste li turnis sin al

majoro Blindfid kaj emociite, sed kun soldata sinteno levis sian manon al la kepo.

— Kun humila respekto al majora Moŝto mi deklaras, ke la plenumon de la ordono mi rifuzas. — Li turnis sin al la soldatoj kaj plengorge kriis. — Vivu nia reveninta regimentestro, Lia Reĝa Princo Olivero Karlo !

Kiel el unu gorgo eksplodis tondra vivuado de la soldatoj.

— Vivu ! Vivu ! Vivu !

Majoro Blindfid paliĝis, ĉirkaŭrigardis, sed vidante, ke ankaŭ la oficiroj rigidiĝis je soldata saluto, li kapitulacis. Perglave li salutis al Scipo.

— Kun humila respekto al via Reĝa Princo, mi transdonas la komandon de la regimento.

Tondra vivuado de la soldatoj refoje skuis la aeron. La amaso sur la placo ne komprenis la kaŭzon de tiu aklamado, sed kiam ĝi vidis, ke la grupo, akompananta la popolestron same aklamas kaj ke Scipo Prikatel transprenas glavon kaj ĉevalon de iu oficiro, komencis frenezan vivuadon.

— — — — —
La reĝa telefono longe sonoris. Vaga Orel de Pord levis la aŭdilon.

— Certe raporto de lia konsilanta moŝto Krak... Kio?... Kio okazis?... Mi ne komprenas... Ripetu!

Voĉo de Krak tremis. La vortoj balbute, raŭke pro ekscitiĝo, forlasis la lipojn de Krak.

— Ankaŭ mi ne komprenas... Eksterordinaraj programpunktoj... La Fremdulo malarmis la kvaran ĉasistan regimenton. La armiloj en la manoj de la ribelantoj. Felice, ke tiu regimento eĉ unu kuglo-havan kartoĉon ne havis. Nur ekzercokartoĉojn... Sed la armilo, tamen estas armilo... La alia... la alia eksterordinaraĵo... Mi eĉ ne scias kiel diri... Nia karmemora iama reĝa princo Olivero Karlo revenis, transprenis la komandon de sia iama regimento, kiu staris sur la placo Otto Pastrosak... Li faris parol-

adon al la soldatoj kaj al la popolo... La amaso fren-ezeĝis, la soldatoj interkisiĝis kun la popolaĉo, la fen-estroj de niaj burĝoj malfermiĝis kaj tia entuziasmo regas la loĝantaron, pri kia mi ne povas rememori. Oni ridas, ploras, kriadas, vivuadas, la pordegoj, zorge ŝlositaj malfermiĝis, ĉiu homo estas sur la strato kaj interkisiĝas... Miraklo! La mortinto revenis... Pardonu, ekscelenca moŝto, la sincerecon, sed ankaŭ mi... ankaŭ mi emociiĝis vidante ĉion ĉi... Kion fari?... Kion fari nun?

Vaga Orel de Pord, tute mortpala, raportis la okazintaĵojn al la reĝo. Xaver Nepaŭl VI-a ekscitite saltleviĝis. En la unuaj momentoj li ne povis percepti la plenan signifon de la perturbo. La patro paralizis en li la regnestron. Li havis fierecon pri sia filo.

— Ho, mia filo, mia brava Olivero Karlo... Ho, granda, benata tago estas la hodiaŭa...

— Sed Via Reĝa Moŝto, la sekvoj!... Pensu pri la konsekvencoj de tiu ĉi perturbo!... Pli terura eĉ ne povis okazi!... Mi eltordus la kolon de tiu Krak. Li estas la ĉefa kulpanto... Koketado al la demokratio neniam povas alporti bonon.

— Ne, ne! Lasu min ĝoji momenton, Vaga Orel de Pord!... Tiu Krak redonis al mi mian filon kaj pro tio li meritas indulgon. Cetere, la koketadon al la demokratio ne *li*, sed *vi*, ekscelenca moŝto proponis kaj komencis... Ho, mia brava heroo Olivero!

— Sed la interesoj de la dinastio, Via Reĝa Moŝto! — La voĉo de lia ekscelenca moŝto indigne tremis. — Pripensu la konsekvencojn!

— La konsekvencoj? Ĉu gravas nun la konsekvencoj en tiu ĉi momento, kiam mia filo reviviĝis kaj venas al mi, kiel heroo, kiel idolo de tiu popolo, kiun mi regis laŭ la rigidaj paragrafoj de la konstitucio, sed ne laŭ la dikto de mia homa koro. Vaga Orel de Pord, mi havas nur la kronon de la lando, sed la koron de la popolo havas mia filo, mia plej juna, plej kapricema fileto kaj mi kapitulacos antaŭ li.

— Sed mi havas la devon averti vin, Reĝa Moŝto, ke tian patran sentimentalecon permesas nek la konstitucio, nek la dinastia leĝaro. . .

— Lasu, lasu nun tiujn rigidajn paragrafojn. Nun la koroj parolas. Ĉu vi ne aŭdis, ke la loĝantaro jubilas, ke la burĝaro interkisiĝas kun la mizeruloj, ke la soldatoj ne plu estas disciplinmaŝinoj. Kiel vi povas haltigi tian torenton de amo kaj entuziasmo. Kiu nun kontraŭstaros, tiun neniigos la popolkolero kaj juste. Mi diras al vi, kara maljuna konsilanto, ke tre juste !

La ekstera kanonpafado ĉiumomente ekskuis la murojn. La telefono denove sonoris. La reĝo mem iris al la aŭdilo.

— La soldatoj, gvidataj de lia reĝa princo Olivero Karlo, aŭ Scipo Prikatel, vere mi ne scias kion pensi, ekiris al la palaco. La amaso sekvas ilin. Kion fari ?

— Kiel mi vidas, vi, konsilanta moŝto, estas senkonsila, — rimarkis la reĝo kun milda riproĉo. — Ankaŭ lia ekscelenca Moŝto cerbumadas pri elirvojo. Nu, mi pensas, ke sola afero restis por mi: pendigi mian kronon kaj vojaĝi al Monte Carlo por esti alloga reklamo de la tiea ludbanko. Scipo Prikatel venkis. Aŭ ĉu vi pensas, konsilanta moŝto, ke en Ameriko oni pli bone salajras tiajn reklamreĝojn ?

La reĝo iom atendis pri la respondo, amare ridetis, rekroĉis la aŭdilon. En tiu momento la telefono denove sonorvokis. Ĝi sonoris longe, ofte kaj senpacience. La reĝo ridetante reprenis la aŭdilon.

— Verŝajne lia konsilanta moŝto Krak rekomendas pli bonan postenon ol la monte-carla ludbanko. . .

— Via Reĝa Moŝto, mi havas ideon. . . Post kelkaj minutoj peraŭtomobile mi alvenos al la palaco. Ĉe la ĉasista pavilono mi atendos vian senditon, kiu devos senprokraste konduki min al via majesto.

Sinjoroj Jackson kaj Smith ridetante aŭskultis la foran tondradon de la kanonoj. Smith fumis cigaron kaj ĝuis la parfuman odoron de la tabako. Jackson enpensigante kirladis sian nigran kafon.

— Jackson, dum la lastaj semajnoj vi montriĝas tro sentimentala.

— Kial *tro*?... Ĉu mi ne estas homo? De kiam mi scias, ke la edzino de la urba notario Stubek estas mia filino, de tiam ĉiutage la patra sento ekparolas al mi. Cetere, mia filino estas vere beleta. Tion vi ne povas nei.

— Vi estas prava kaj se ŝi ne estus via filino, mi...

— Fermu la buŝon!... Preparu vin por la vespera komedio!

— Ĉu nepre necese fari tion kaj denove riski nian inkogniton?

— Nepre. Jen, vidu, mia estonta bopatro estas genia stultulo, aŭ pli bone esprimite, stulta geniulo. Mi volas helpi lin. Per la aranĝo de tiu ĉi revolucia komedio li donis bonegan okazon al ni por fari profitdonajn negocojn.

Sinjoro Smith eksplode ekridis.

— Vere vi estas tute prava... Via genieceo fruktigas la okazon. Eĉ nekonsiderinte tiujn 25%-ojn, kiujn ni ricevos de la diversaj metiistoj, havantaj profiton el la revolucia detruado, estis vere sensacie fari kontrakton kun la plej granda amerika filmfabriko, kies operatoroj eternigas nun ĉiujn epizodojn de la historia komedio. Tre bela sumo, eĉ en Ameriko, enkasi tiom da dolaroj por la honorario de kelkmiloj da statistikoj kaj ĉefroluloj.

— Nu, jen, pro tio necesas, ke hodiaŭ vespere nia rolado bone sukcesu! Koncerne la monon, vi ricevos el ĉiu negoco vian kutiman 50%-ojn. La alian duonon ricevos Lida, mia filino, kiel heredaĵon rekte el Ameriko, kie ŝia patro, do *mi*, mortis antaŭ semajnoj. Jam ĉio estas preparita.

— Ne nur sentimentala, sed eĉ romantika vi fariĝis.

— Ĉiam mi estis tia, ĉar tiu ĉarlatano, kiu ne havas korkaresajn sentojn, meritas la nomon *fripono*. La vera ĉarlatano levas sin al la plej alta grado de sia profesio nur se li havas ankaŭ idealismon en la fundo de sia koro.

Smith iom enpensiĝis, poste facile ĝemetis.

— Verŝajne, denove vi estas prava. Pro tio neniam mi sukcesis memstariĝi en la profesio... Nu, kiel bona statisto mi estos je via dispono ankaŭ hodiaŭ vespere.

La regimento kaj amaso, marŝanta al la palaco renkontis senorde rifuĝantajn ribelantojn en la strato Generalo Veseliven. Scipo Prikatel haltigis ilin.

— He, kien, kamaradoj?

— Perfido, terura hombuĉado! Centoj kaj miloj mortis el la niaj. Sango, stertorado de mortantoj, vunditoj. Niaj armiloj ne havis kuglojn, nur ekzerc-kartoĉojn. La Fremdulo ankoraŭ batalas, provas frakasigi la pordegojn de la fortikaĵo. La soldatoj ridetante, senkore pafas. La disciplino inter niaj plej bravaj estas renversita. Ĉiu rifuĝas, kien li povas.

Scipo Prikatel ekspronis sian ĉevalon kaj komandis kurmarŝon al la soldatoj.

La placo antaŭ la palaco aspektis kiel sanga batalejo. Dise, sur la pavimo, sur benkoj, sur la neĝkovritaj bedoj kuŝis senorde vunditoj, senmovaj korpoj. Kelkcentoj da furiozantaj homoj kun senpova fortostreĉo frakasadis la kirasitan pordegon per feraj stangoj, kolboj, hakiloj.

La apero de la soldatoj, komandataj de Scipo Prikatel, plene rompis la rezistemon de la ribelantoj. Ili pensis sin ĉirkaŭprenitaj de malamiko kaj kun terurkrioj diskure rifuĝis. La amaso, sekvanta la regimenton, baris la vojon de la rifuĝantoj, plenigis la

tutan placon, vivuadis, flirtigis la ruĝajn standardojn kaj plenpulme kantis la — *nacian himnon*.

La rigardo de Scipo Prikatel serĉis la Fremdulon. Li staris, ĉirkaŭita de kelkaj ribelantoj, meze de la placo, kaj senkomprene rigardis al la amaso, al la soldatoj kaj al la nekonata vizaĝo de la junulo, kies tre konata voĉo vokis lin.

— Ivan, ni venkos, ĉar la vero estas je nia flanko! Ivan!... La tuta popolo estas kun ni. Eĉ la pordegojn de la infero ni trabatos.

En tiu momento sur la supro de la fortikaĵo aperis blanka flago. La popolo aerskue akklamadis. La Fremdulo ekkuris al Scipo Prikatel kaj haltis antaŭ li.

— Kiu vi estas? — li krie demandis.

— Rekonu mian voĉon, se mia vizaĝo ne estas konata de vi!

— Kiu vi estas?! — ripetis preskaŭ furiozante la Fremdulo.

— Scipo Prikatel, alinome Olivero Karlo, reĝa...

Li ne povis daŭrigi, ĉar la Fremdulo kun deformiĝinta mieno furiozante interrompis liajn vortojn.

— Perfidulo!... Aĉa perfidulo! Ĉi ĉifonvestita reĝa ido... ci... — kaj per subita gesto li pafis per revolvero al Scipo Prikatel, — ci, aĉa... aĉa...

Soldatoj kuris al la furiozanta viro, eltordis la revolveron el lia mano, terenpremis lin, kolboj levigis, la amaso histerie ekveis. Scipo Prikatel iom ekŝanceliĝis en la selo, sed fortostreĉe tenis sin, la manon proteste levis.

— Ivan, vi eraris... Ivan, vi estis maljusta... Via kuglo trafis fraton. Vi... vi... ne estas prava, Ivan... Ne per sangverŝado, sed per kora amo oni povas savi la mondon. — Li turnis sin al la soldatoj — Pri la vivo de tiu ĉi homo vi respondos al mi. Neniu kuraĝu tuŝi lin!... Ivan, vi estas libera... aŭ... aŭ...

Scipo Prikatel paliĝis, momenta sveno malheligis

liajn okulojn. Kelkaj oficiroj kaj soldatoj kuris al li por helpe subteni lin.

— Lasu, nur momenta sveneto... baldaŭ pasos... La paca flago jam flirtas tie supre... Diru, diru al la senditoj de la reĝo, ke per popolo por popolo... por popolo... — La okuloj de Scipo Prikatel streĉiĝis, rigardis al la placo, subite eliĝis el li amara, longa rido, liaj okuloj pleniĝis je larmoj. — Ivan, Ivan, rigardu!... Hahah!... La mortintoj reviviĝas... Ili ĉiuj reviviĝas kaj gapas al la vivantoj, kiuj mortas por ili... Hahah!... Ivan, estis *nur* komedio... nur komedio... nur ni, ni pensis ĝin serioza... La mortintoj... hahaha!...

Scipo Prikatel falis de la ĉevalo al la brakoj de la soldatoj. La Fremdulo deskuis de si la virojn, lin tenantajn. Rigardis al la placo, al la sanga batalejo, kie la centoj da mortintoj kaj vunditoj leviĝis, kiel teatraj statistoj post fino de la akto. Li komprenis ĉion... ĉion.

— Scipo, mia reĝa kamarado, pardonu min... — El sia zono li eltiris ponardon kaj fulmorapide puŝis ĝin en sian bruston.

Trumpetado de reĝaj heroldoj sonis tra la placo kaj la pordego de la palaco malfermiĝis.

— — — — —
Olivero Karlo kuŝis pala en la lito. La kuracisto tenis lian manon kaj kalkulis liajn pulsobatojn. La reĝo kun tremanta koro sidis apud la lito. Per rigardo li demandis la faman profesoron.

— Feliĉe, la kuglo ne tuŝis noblajn partojn. Lia juneco baldaŭ venkos la febron kaj tiam...

— Sss!... Li malfermis la okulojn — flustre avertis la reĝo.

— Estis nur komedio, Ivan... Sed, kredu, ke mi... mi ne sciis... ke mi ne... Ivan, kamarado mia, vi ne estas prava... nek mi... Ho, kiel peza estas la kapo... Ivan, ankaŭ via kapo... Ĉu?... Jes, nur komedion oni... ludigis kun ni... Elvira, la

kortego priridis la larmojn de la mizero... super-ridegis la kriojn de la malfeliĉuloj... Elvira, nia Ivan ne ŝatas la leporon... li preferas la rusan kaĉon... Mi ne povas... ne povas levi la manon... Ne, ne batu lin!... Li estas mia kamarado... La reĝo... la reĝo disŝiris la skribon de la mizeruloj... Mi diris ja, ke per popolo por popol... popolo... Elvira malfermu la fenestron!... La sunon... la sunon mi volas... mi volas vidi...

La deliraj frazoj taŭzis la koron de la reĝa patro. Li kaptis la manon de la kuracisto kaj tiel petegis al li.

— Savu lin, savu lin!... Li estas mia plej juna kaj plej brava...

La kuracisto komplete rigardis la regnestron. Kie forestas lia majesta digno? Kie la ceremoniaj frazoj? Kie do?! Ankaŭ la reĝo estas nur homo. Li pensis tion, sed ne eldiris. Kun etiketa riverenco klinis sin.

— Estu konvikiĝinta, Via Reĝa Moŝto, ke ĉion eblan mi faros por akceli la rapidan resaniĝon... Nun la malsanulo bezonas plenan trankvilon. Ni forlasu la ĉambron! La plej lerta flegistino de la Ruĝa Kruco jam atendas miajn instrukciojn sur la koridoro.

La reĝo leviĝis. La rigardo de Olivero Karlo fiksiĝis al li.

— Kion vi serĉas mizerulo?... Ĉu reĝan komprenon?... Ivan, diru al li, ke la reĝoj... diru Ivan, ke la reĝoj... Mi ne scias, kion... Diru al tiu maljuna mizerulo ion, ke li ne perdu la kredon pri la homa boneco... Elvira, kial vi ne malfermas la fenestron... Tiel mallume... ho, kiel mallume... La leporon ne ŝatas Ivan... Donu ĝin al la maljunulo kun ses malsataj infanoj...

La reĝo kvazaŭ rifuĝe forrapidis el la ĉambro.

Lia ekscelenco Vaga Orel de Pord kaj Jonathan Krak atendis en la blua salono je alveno de la reĝo.

La unua senpacience promenadis tien kaj reen en la ĉambro kaj kalkulis siajn paŝojn. La dua kun ŝvitanta frunto sidis en fotelo, turnis sian rigardon al la ornamaĵoj de la plafono kaj rekonstruis la okazintaĵojn post la neatendita akcidento. Ho, ne tiel li pensis en komenco kaj tute certe, se tiu fanatika ruso ne intervenas, li estus sukcesinta finarangi la tutan revolucion komedion je la plena kontenteco de la popolo kaj la dinastio. Sed kiel li estus povinta diveni, ke Scipo Prikatel kaj Olivero Karlo estas la sama persono?! Nu, adiaŭ reĝa favoro kaj hejma suvereneco, li pensis kaj laŭte ekĝemis.

Lia ekscelenco haltis en la promonado, rigardis momenton al la tragikomike grimacanta Krak.

— Jes ,jes, konsilanta moŝto, ni falis en la mezon de varmega kaĉo.

— Ho, ekscelencna moŝto, la kaĉo ne estus tiel varmega, se iu blovus ĝin.

— Nu, blovu, se vi kapablas, aŭ se vi riskas blovi ĝin.

— Ĝuste pri tio mi pensadas, kiamaniere malvarmetigi la propran kuirarĵon.

— La reĝo furiozis, poste ploris kaj pli ol unu horon li pasigis ĉe la vundita princo, poste li retiris sin en sian laborĉambron kaj malpermesis, ke iu ajn ĝenu lin.

— Nu, do bone.

— Ĉu bone?... Kion vi intencas diri per tio?

— Ĉar tiu retirigo signifas, ke li ne plu furiozas, sed ordigas siajn pensojn... Ankaŭ mia edzino ĉiam, kiam reti...

— Konsilanta moŝto, mi devas averti vin, ke ne pri via tre estimata edzino temas.

— Dank' al Dio!... Ne, ne tion mi volis diri! Sed kion diras la kuracisto?

— Li certe resaniĝos... Post kelkaj semajnoj li povos forlasi la liton.

— Dank' al Dio! — kaj sinjoro Krak denove

ekĝemis, sed nun la ĝemo estis la signo de plifaciligō.
— Nu, tiel ja ne ĉio perdiĝis kaj mi riskos blove malvarmetigi la kaĉon.

Lia ekscelenco iom mire rigardis al la stranga hometo.

— Ĉu vi havas denove ideon? Espereble ne similan al tiu ĉi revolucia komedio. Ĉu?

Krak eksentis la kaŝitan riproĉon kaj li provis senkulpigi sin.

— Finfine la tuta revolucio alportos multe da bono por nia lando.

— Ĉu bonon por la lando?

— Nu, por la popolo kaj se lia princa moŝto Olivero Karlo resaniĝos, ĉio estos en ordo... Jes, ĉu... Ne, tion mi ankoraŭ pripensos, kvankam por rapidigi la resaniĝon ne estus malbona rimedo.

— Pri kio vi aludas?

— Ne pri kio, sed pri *kiu*?... Pri Elvira Jenlafiŝ, pri la fianĉino de lia princa moŝto.

Vaga Grel de Pord preskaŭ eksakris je la aŭdo de tia naivaĵo.

— Sed, konsilanta moŝto, vi forgesas, ke la membro de reĝa dinastio ne povas fari tian mezaliancon. Ho, kiel vi eĉ povis pensi tian absurdaĵon, ke reĝa princo kaj filino de simpla urbestro...

— Nu, simple pro tio, ĉar mi estas la amiko de la geamantoj kaj... kaj... kiel mi scias, la kortego favoris la penson, ke la filino de la urbestro kaj Scipo Prikatel...

— Jes, Scipo Prikatel, sed ne Olivero Karlo... Ĉu vi komprenas?

— Ne!... Vere mi ne komprenas. Prikatel kaj Olivero Karlo estas ja la sama persono... Nu, sed se tiel staras la afero, do mi petas vin, ekscelenta moŝto, bonvolu blovi tiun kaĉon sen mia helpo... Sed mi tute malkaŝe diras al vi, ke tiamaniere vi ne la kaĉon malvarmetigos, sed blovinstigos la fajron sub la kaĉokaldrono. Jen!

La ekscitita tono de la parolado ofende tuŝis tian ekscelencon. Li plenblovis sin, prenis al si dignon de altrangulo kaj kun akre tranĉa tono respondis.

— Sajnas al mi, tre estimata konsilanta moŝto, ke vi ankoraŭ ne alkutimiĝis al la parolmaniero de la kortego. Estus konsilinde, se vi havus forpermeson por studi la diplomatian lingvon.

Krak tute neĝenite de tia malvarmeco ekĝemis.

— Nu, tion ankaŭ mi dezirus, ne pro tio, ke mi studu la diplomatian lingvaĵon, sed por trankvile vivi. Finfine mi ja ne serĉis la favoron de la kortego. Mi estis pace vivanta simpla civitano, kiam venis tiu ĉi malbenita testamenta afero. Unue ekrajdis min la urbestro, poste vi, altestimata ekscelenca moŝto kaj poste la tuta urbo kaj ĉiu volis pumpi ĉel mi savideojn, kvazaŭ mi estus mirakla fonto de geniaco. Ne, tio mi tute ne estas kaj neniam mi pensis tion pri mi. Tamen estas sendankeco tiel riproĉi min, kiam eĉ nun per lasta ero de mia restinta saĝeto mi cerbumadas pri la solvo de tiaj aferoj, kiuj absolute ne tuŝas min, almenaŭ ne tiel, kiel ŝtatanon, ĉar mi estas nur simpla civitano. Nu!... Kaj eĉ nun mi ripetas, ke se tiu ĉi fanatikulo ne estus interveninta, nun ĉio estus en ordo. Ĉu vi antaŭvidis tian okazaĵon, ekscelenca moŝto? Se jes, vi estas kulpa, ĉar vi ne malhelpis ĝin kaj se vi ne antaŭvidis, vi ne estas pli bona ŝtatano ol mi. Jen! — Kaj sinjoro Krak pro ekscitiĝo leviĝis kaj starante, poste promenante daŭrigis je granda miro de lia ekscelenca moŝto. — Kaj nun mi volas interkonsiliĝi kun Lia Reĝa Moŝto, mi havas ideon, kiu pli malpli bone rearanĝus la aferon kaj vi intervenas kaj malhelpas. Jes, jes, kaj centfoje jes! La trono preskaŭ renversiĝis, la princo estas morte vundita, la popolo ekscitite atendas la konsekvencojn de la tago kaj vi parolas pri diplomatiaj lingvaj studoj. Nu, mi estas nur simpla civitano, sed mi diras al vi, ke pro tiaj diplomatiaj lingvaj turniroj nun ĝemas la popolo en

la tuta mondo. Kaj ĉu plaĉas, ĉu ne plaĉas al vi, mi estas la amiko de la geamantoj kaj ne volas kompreni la leĝaron de la dinastio, kiu jen permesas, jen malpermesas ion. Kaj se Lia Reĝa Moŝto mem...

La pordo malfermiĝis kaj la lakeo anoncis la alvenon de la reĝo. La vorto haltis ĉe la lipoj de Krak, li rigidiĝis, poste profunde klinis sin antaŭ la envenanta regnestro. La reĝo estis dolorrumpita. Li senvorte proponis eksidon al la du viroj, malamikeme rigardantaj unu la alian.

— Ŝajnas al mi, konsilanta moŝto — komencis la reĝo, — ke viaj lastaj vortoj, iom tro laŭtaj, koncernis min. Pri kio temis?

Krak embarasite turnadis sin sur la seĝo, per rigarde petis helpon de lia ekscelenco, sed tiu obstine fermis la lipojn kaj nur permiene esprimis sian indignon al la reĝo. Krak fine, post ofta tusetado, trovis sian langon.

— Kun profunda humileco kaj respekto al via majesta Reĝa Moŝto, mi iom pli laŭte ol estas permesate diskutis pri la benoj de la diplomatia lingvaĵo, kiun mi tute ne kapablas alproprigi. Jen!

— Jes?! — En la voĉo de la reĝo vibris malgaja, rezigna trompiĝo. — Mia filo kuŝas en delira febro, la tuta lando bolas, neniu scias, kion alportos la morgaŭo kaj vi parolas pri la diplomatia lingvaĵo. Dankon!

Vaga Orel de Pord ruĝiĝis ĝis la tempioj. Krak fariĝis pli vigla.

— Tutkoran dankon mi esprimas por viaj vortoj, Reĝa Moŝto. Jus antaŭ momenteto mi diris tute hazarde la samon al lia ekscelencan moŝto. Cetere lia ekscelencan moŝto estas tute prava, ke mi ne konas tiun lingvaĵon kaj Via Reĝa Moŝto plene pravas, ke pri tio diskuti estas superflue nun, kiam temas pri multe pli gravaj aferoj ol la lingvaĵo de simpla urba ĉefnotario. Mi venis por raporti pri la okazintaĵoj kaj la reganta humoro

en la urbo. Se via Reĝa Moŝto bonvolos havi paciencon finaŭskulti min, tiam...

La reĝo konsente kapsignis.

— La lasta programpunkto de nia revolucia komedio estas ŝanĝita. La bela iluminado per la bruligo kaj prirabado de la dekoracia filmvilaĝo ne okazos. La tie amasigitajn terpomojn, farunon, sukeron, karoton kaj diversajn legomojn la polico mem disdonos inter la provincaj ribelantoj. La urbaj statistoj morgaŭ matene estos pagitaj. Sinjoro Kazimiro Jenlafiŝ denove transprenis la urban suverenecon kaj agas laŭ sia maniero. Li enkarcerigas la gvidantojn de la ribelantoj; la grave vunditan, eble eĉ mortantan rusion, nomatan de la popolo La Fremdulo, li ordonis porti en la hospitalon de la ŝtata malliberejo. La humoro de la urbo estas tute premegita. El la antaŭa entuziasmo restis neniom. Oni fermis la pordegojn, sur la strato patrolas ĉiuangule ĝendarmoj kaj policianoj. Jen! Sed ĉio ĉi ne estas multe grava. Pli interesa estas la vaganta onidiro.

— Kaj kion oni diras? — demandis la reĝo kaj lia mieno iom vigliĝis.

— Ho, pardonu kaj indulgu min, Via Reĝa Moŝto, se la ripeto de la onidiro ne havos diplomatian lingvaĵon, sed mi opinias, ke la vera regnestro devas scii pri ĉio, kion oni diras en lia lando.

— Kompreneble... Daŭrigu do!

— Nu, oni diras, ke la tuta revolucio estas organizita de la kortego mem por (mil pardonojn por la esprimo!) akapari parton de la heredaĵo de Vilhelmo Grauer. Kompreneble, tio estas ja mensogo, sed tamen tiu diro iras de buŝo al buŝo kaj venenas la lojalecon al la dinastio, pli precize dirite la lojalecon al la kronprinco, kiu jam nun preparas sian absolutisman reĝimon. Jen!

Longa ĝena silento regis en la ĉambro. La reĝo riproĉe rigardis al lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord.

— Kaj kiuj diras tion? — demandis post ioma konsiderado la reĝo.

— Ciu, kompreneble ne malkaŝe... nur flustre... sub sigelo de sekreto, sed... Koncerne la personecon kaj rolon de lia princa moŝto Olivero Karlo, kiun la popolo pleje ŝatis el la juna generacio de la dinastio, la onidiroj estas diferencaj. Kelkaj asertas, kelkaj neas, ke Scipo Prikatel kaj lia princa moŝto estus sama persono. La asertantoj subtenas sian teorion per la fakto, ke Scipo Prikatel estas flegita nun en la reĝa palaco. La neantoj supozas, ke ankaŭ Lia Reĝa Moŝto estas trompita pro la simileco. Kaj la ribelantoj, la mizeruloj nutras en si la esperon, ke Scipo Prikatel, vidante la perfidon malaperis, sed baldaŭ revenos kaj donos justecon al la trompita popolo. Kaj tiu ĉi lasta estas la plej ŝatata onidiro.

La reĝo longe enpensiĝis, poste turnis sin al Vaga Orel de Pord.

— Certe, ekscelenca moŝto, vi povas servi per bona konsilo al ni. Kion fari? Kiun opinion de la popolo subteni kaj kiun subpremi, neniiĝi? Kiel savi la dinastion, la tronon de la kronprinco?

Vaga Orel de Pord profunde klinis sin.

— Jam delonge mi atendis vian alparolon, Reĝa Moŝto. Nur solan solvon mi vidas: subpremi ĉiun opinion kaj teni la potencon per ĉiu rimedo, kiu estas je nia dispono. Cedi al la popolo signifas malfortecon kaj kiam la popolo rimarkos ĝin, tiam la dinastia suvereneco pereis. Regantoj ne povas okupi sin pri bagatelaj deziroj de siaj regatoj, ĉar tiam ilia prestiĝo perdas la necesan nimbon.

La reĝo atende fiksis sian rigardon al Krak, kiu tre silente, kvazaŭ forgesinte pri la lokoj kaj personoj enprofundiĝis en siajn pensojn.

— Kaj vi, konsilanta moŝto?!... Ĉu vi malaprobos tion, aŭ samopinias kun lia ekscelenco?

Krak prenis la grandan poŝtukon por forviŝi la

aperintajn ŝvitgutojn, iom tusetis, strabe rigardis momenton al lia ekscelenca moŝto.

— Mi ne riskas samopinii, sed samtempe mi sentas min tia eta punkto en la alta politiko, ke eĉ malaprobi ŝajnas al mi riske. Finfine, mi estas nur simpla ĉefnotario, sed... sed...

— Sed?

— Mia edzino, pardonu, ke mi parolas pri ŝi, ofte nomis min romantika azeno, kiam mi kortuŝiĝis kaj pro ĝojoj aŭ ĉagrenoj de fremdaj personoj mi forĝesis pri ŝiaj interesoj, pri interesoj de mia familio. Vere, tio ŝajnas esti romantika azeneco. Similan naturon havas ankaŭ mia plej juna filineto Cia. Do ni ambaŭ, mi kaj Cia, neniam estis vere komprenataj de la niaj. Sed... jen la miraklo!... ni estis ĉiam ŝatataj kaj respektataj de tiuj fremdaj homoj, kiuj turnis sin al ni kun siaj bagatelaj ĝojoj kaj ĉagrenoj. Per tio ĉi mi volas senkulpigi la romantikemon de Olivero Karlo, lia princa moŝto kaj klarigi lian popularecon. Mi ne povas forgesi la scenon sur la placo Otto Pastrosak. La popolo interkisiĝanta, la malfermiĝantaj pordegoj pruvis, ke la ŝlosilo de la vera potenco estas la koro. La koro malfermas eĉ la monujon de avarulo. Lia princa moŝto Olivero Karlo mortis...

— Sed li vivas, reviviĝis — intermetis lia ekscelenco.

— Ne, la vundito estas Scipo Prikatel, la idolo de la popolo. Ni lasu ripozi la terajn restaĵojn de lia princa moŝto en la pariza kriptoj, sed ni revivigu kaj redonu al la popolo sian adoraton.

— Vi freneziĝis! — rimarkis gale kaj tre ekscitite Vaga Orel de Pord.

— Ankoraŭ ne, ekscelenca moŝto. — Krak milde ridetis. — Cetere, ĉu tiu esprimmaniero estas en la vortaro de la diplomatia lingvaĵo?

La reĝo senpacience gestis.

— Daŭrigu, konsilanta moŝto! Kiamaniere vi pensas solvi per tio la problemojn?

— Tre simple. Morgaŭ aperos bulteno, deklaranta, ke eĉ Lia Reĝa Moŝto estis erarigita per la simileco. La vundito estas vere Scipo Prikatel kaj tute ne identa kun la karmemora mortinta princo Olivero Karlo. Post lia resaniĝo li devos respondi pri siaj faroj al la ĉefa ŝtata tribunalo. Nu, intertempe ni zorgos pri tio, ke la publika simpatio tre fortiĝu al Scipo Prikatel, al la persekutata amiko de la popolo. Poste Via Reĝa Moŝto bonvole pardonos al la temperamenta regato, akceptos lin kaj nomos lin ministro de popolbonfarto kaj ĉio en ordo. La dinastio montris komprenemon al la popolo, la trono de la kronprinco estas savita, Scipo Prikatel povos vivi al siaj ideoj, iom moderigitaj kaj ni ne devos konsideri la leĝaron de la dinastio, kiu malpermesas subrangan edziĝon . . . Pardonu, sed mi estas la amiko de la geamantoj.

Vaga Orel de Pord faris grimacon, kiu plene elokventis pri liaj ignoraj pensoj. La reĝo indulge, sed bonkore ridetis. Krak denove viŝis sian frunton.

— Nu, ne tiel simple, kiel vi pensas, kara konsilanta moŝto, — diris la reĝo, — sed en via plano estas iom da koro kaj pro tio, se ekzistas ebleco ni klopodos efektiviĝi ion el ĝi. Cetere . . .

La reĝo ne povis fini la frazon, ĉar la lakeo aperis gravmiene kaj anoncis la viziton de la kortega kuracisto. La reĝo salte leviĝis. La momenta emociiĝo klare rebrilis el la rigardo de lia ekscelenco kaj sinjoro Krak.

— Kio ? . . . Kio okazis ? . . . Ĉu . . . — demandis kun tremetanta voĉo la reĝo.

La kortega kuracisto profunde klinis sin, poste iom konsternite, la tono vere montris tion, turnis sin rekte al la reĝo.

— Via Reĝa Moŝto, mi venis interesiĝi pri nia malsanulo, sed . . . sed . . .

— Sed ? . . . Diru do !

— Li malaperis . . . En komenco mi pensis, ke laŭ ordono de Via Reĝa Moŝto li estis transportita en

alian apartamenton de la kastelo, sed ne tiel estas.

— Kion vi diras? Li malaperis? !— Li ne povis ja forlasi la ĉambron kaj la flegistino de la Ruĝa Kruco laŭ viaj diroj estas fidinda persono... Mi ne komprenas, kion vi diras.

— Nu, mi pensis, ke ĉio okazis laŭ via certa deziro, eĉ ordono.... Verdire, mi miris, mi estis konsternita, ĉar transporti la vunditon en tia kriza stato al la hospitalo de la ŝtata malliberejo...

— Kien?... Kiu diris tion?... Kiu ordonis? — la reĝo kriis furioze.

— La oficiro ĉe la ĉefa gardposteno.

— Voku lin tuj!... Ekscelenca moŝto, telefonu al la postendomo de la gvardio! Kiu kuraĝis fari tion?... Kiu?... Ĉu eble tiu freneza urbestro?... Konsilanta moŝto, tuj informiĝu pri la afero ĉe la urbestro!... Alvoku la adjutanton! Senprokraste li iru al la hospitalo de la ŝtata malliberejo kaj...

Vaga Orel de Pord kaj Krak rapide forlasis la ĉambron. Krak estis iom pala. Li konjektis ion malbonan, sed..sed tio estis ja lia sekreto. Neniu sciis pri tio. Nur unu homo, kiu promesis helpi en la afero, se ĝi aktualigĝos. Sed ĝi ne aktualigĝis, ĉar intervenis eksterordinaraj programpunktoj. La kuglo kaj ceteraj okazintaĵoj jam estis eksterprogramaj. Fine li atingis la telefonĉambron de la kancelariejo, prenis la aŭdilon kaj alvokis la urbestran oficejon. La aparato longe sonoris, sed neniu venis al la telefono. Krak ŝvitis kaj ŝvitis. Li atendis, atendis, poste alvokis la numeron de la urbestra loĝejo. Denove li atendis kaj ŝvitis. Fine venis la servisto de Jenlafiŝ kaj informis lin, ke lia moŝto bonvolis foriri antaŭ duonhoru tute ekscitite kaj furioze. Nu, li ĉiam estas ekscitita kaj furioza, pensis Krak. Kion fari, kien telefoni? Ĉu sidi kaj atendi? Ĉu peraŭtomobile kuregi al la urbestro aŭ reiri al Lia Reĝa Moŝto? Certe reiri. Tie almenaŭ li informiĝos pri la detaloj de la okazintaĵo.

Kiam Krak revenis en la bluan salonon, la reĝo jam aŭskultis la raporton de la dejoranta oficiro.

— ... kaj sinjoro kolonelo Nurmipost kun la nigre vestita sinjoro, nomanta sin D-ro Fiksprez, montris legitimilojn, subskribitajn de lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord. Ili trapasis la unuan voĵeton kaj de tie la sinjoro kolonelo returnis sin, alvokis la ŝoforon, tre ĉarman junulon kaj donis al li diversajn instrukciojn, kiujn mi ne povis aŭdi. Poste la sinjoro kolonelo kun la kuracisto malaperis en la kastelon, la ŝoforo malfermis la pordeton de la ambulanca aŭtomobilo. Post dek minutoj ili revenis kun du lakeoj, kiuj tre zorge subtenis la vunditon, preskaŭ portante lin. La kolonelo ne esfis kun ili, sed la kuraciston sekvis lia ekscelenca moŝto Vaga Orel de Pord kun la flegistino. Ĉe la pordego lia ekscelenco bonvolis informi min, ke la sinjoro kolonelo faras raporton al Via Reĝa Moŝto...

— Ĉu lia ekscelenco? Kiam tio okazis?

— Antaŭ trikvaronhoro.

— Sed neeble! Lia ekscelenco dum la tuta vespero ne forlasis la palacon. En tiu ĉi momento li telefonas al la ŝtata malliberejo kaj alvokas la adjutanton.

La oficiro konfuziĝis. Lia mieno esprimis plej altgradan surprizon kaj nekomprenon. Krak kontraŭvole envortigis sian miron.

— Ŝajnas, ke en Bagonio, ĉiu grava homo estas en du ekzempleroj. Generalo Venknejam, kolonelo Nurmipost kaj lia ekscelenco Vaga Orel de Pord. Mi scivolas kiam mi renkontos min mem?

La aŭtomobilo, portanta sinjoron Krak al la urbestra oficejo, haltis. La dejoranta policoficiro ĝentile salutis lin. Krak, la ĉiama ĝentilulo eĉ ne rimarkis tion pro la amasiĝintaj pensoj, kiuj kirle dancadis en lia kapo. Li rapide kuris supren sur la ŝtuparo, sen frapo malfermis la urbestran pordon.

Kazimiro Jenlafiŝ eksцитite leviĝis el sia ŝatata fotelo.

— Nu, fine ! Fine ci venas. Jam al ĉiuj eblaj kaj neeblaj lokoj mi sendis miajn homojn por trovi cin. Kie ci estis ?

— Rekte de Lia Reĝa Moŝto mi venas. Mi telefonis al ci el la kancelariejo, sed respondon mi ne ricevis. Okazis io nekomprenebla, io terura.

— Ĉu ankaŭ ĉe ci ? Ĉu mortis la reĝo ?

— Ne, tio ankoraŭ ne, dank' al Dio ! Sed Scipo Prikatel malaperis. Iuj eskapigis lin.

— Diablo prenu tiun Scipon...

— Ne forgesu, ke li estas samtempe Olivero Karlo...

Jenlafiŝ fariĝis ruĝa kiel tro matura tomato. Gis nun li ne volis kredi, ke la du personoj estus nur unu. La malespera mieno kaj la vortoj de Krak konvinke efikis.

— Ĉu vere ? Lia princa moŝto kaj tiu frip... tiu umo... tiu Scipo estus la sama persono, kiu... Ho, mi jam komprenas ĉion ! — Subite li kolere ekkriis al Krak — Kial ci ne diris tion al mi antaŭ monatoj ?

— Ĉar ankaŭ mi mem eksciis tion nur hodiaŭ. Sed tio estas oficiala sekreto...

— Ho, mi jam komprenas ĉion !

— Kion ci komprenas ?

— Kion ? Nu tion, kial mi sentis interne ĉiam grandan ŝaton al tiu junulo, al tiu Sci... Sed tiam estas ja bonege !... Ho, mi komprenas ĉion ! Ho, mi azeno !

— Sed kio estas tiu ĉio, kion vi komprenas ?

— La eskapo ! Ili kune eskapis.

— Kiuj ili ? Ĉu Scipo Prikatel kaj la Fremdulo ?

— Ne ! Kiu parolas ĉi tie pri tiu fripono ? Mi parolas pri lia princa moŝto kaj mia filino Elvira.

— Ho, malfeliĉulo, mi parolas pri la Fremdulo.

— Kian interrilaton povas havi mia filino kun

tiu sennomulo? Li estas bone traktata en la hospitalo de la ŝtata malliberejo...

— Nur *estis*, mia kara amiko, ĉar antaŭ mia foriro el la reĝa palaco venis la adjutanto kaj raportis, ke ankaŭ la Fremdulo malaperis kun siaj gardistoj.

Kazimiro Jenlafiŝ kelkfoje senvoĉe malfermadis la buŝon kaj sentis, ke la subita kolero sufokadas lian gorĝon. Fine li sukcesis elbalbuti kelkajn vortojn.

— Ĉu ankaŭ... tiu... tiu...? — Subite je unu gluto li trinkis tiun glason da akvo, kiu jam de du tagoj proponadis sin sur lia skribotablo, poste li residigis, premadis sian kapon. Vane, eĉ unu sanan personon li ne sukcesis eltorturi el ĝi. — Kaj kiel okazis? Ĉu vi konas la detalojn?

— Neniu scias. Nur ĉe la ŝanĝo de la gardistaro oni rimarkis, ke la ĉambro estas malplena, kaj ankaŭ la du gardistoj mankas.

— Sed kiuj... kiuj kuraĝis fari tion?

— Estus bone scii... Mi pensas, ke neniam ni ekscios.

— Ĉu ci pensas, ke ankaŭ tio estas oficiala sekreto?

— Ne! Tio estas privata sekreto de cia filino.

— Sed kiel ci povas eĉ supozi, ke mia filino kaj tiu sennomulo...

— Nu, pri tio mi ne parolas, eĉ ne pensas, sed la komuna eskapo de cia filino kun Scipo Prikatel kaj la Fremdulo estas fakto. Kiu helpis ilin, mi ne scias, sed unu afero estas tute klara antaŭ mi kaj tio estas, ke en tiu ĉi lando ĉiu gravulo havas sian duan ekzempleron.

— Ĉu duan ekzempleron? Mi ne komprenas vin.

— Jes, jes... por malaperigi jen monon el la ŝtata kaso, jen homojn el la ŝtata malliberejo kaj el la reĝa kastelo.

Jenlafiŝ ankoraŭ ne komprenis la aludon kaj Krak rakontis al li la detalojn. La urbestro ĉiu-

momente konsterniĝis, ĵuradis je ĉiuj sanktuloj de la ĉielo, ke li arestigos la aŭdacajn friponojn, kiuj tiel impertinente mokas la ŝtatan kaj urban sekurecojn, sed ĉe la fino li trankviliĝis, ĉar agrabla penso karesis lian vantecon.

— Verdire, mi estas tre indignita, sed, kara Krak, finfine mia filino tamen fariĝos edzino de lia princa moŝto.

— Ci denove eraras, koncerne la princecon.

— Kion ci volas diri per tio?

— Cia filino, se la vundito resaniĝos, fariĝos tre feliĉa edzino de Scipo Prikatel, aŭ de alinomita persono, kiu iam estis lulata en princa kaleŝeto, ĉar sciu, ke la dinastia leĝaro ne permesas al la princoj sekvi la sentojn de la koro.

— La diablo prenu la tutan dinastian leĝaron — eksplodis la malkontenteco el sinjoro Jenlafiŝ, sed subite rekonsciiĝinte li aldonis iom pli milde — la leĝaron mi diris kaj *ne la gloran dinastion*. Bone komprenu, Krak!

— — — — —
Jam pasis noktomezo, kiam la brava bagona limĝendarmo trovis forlasitan aŭtomobilon je kelkaj cent metroj flanke de la ŝoseo. Senprokraste li rapidis raporti al sia oficiro.

— Demando, ĉu Scipo Prikatel aŭ la Fremdulo? ... Laŭ la ricevita ordono ni devas ne rimarki la eskapon de la unua, sed nepre malhelpi la forkuron de la dua. Iu devas respondi pri la revolucio. Kaj tiu fanatika ruso estas la pli danĝera, almenaŭ tiel ŝajnas, ĉar la registaro tuj telefone donis la arestordonon. Onidire Scipo Prikatel estus ne malpli grava persono ol mem lia princa moŝto Olivero Karlo, tute mirakle reviviĝinta el sia morto. Mi ripetas, la demando restas, ĉu Scipo Prikatel aŭ la Fremdulo?

— Kun humila respekto mi raportas al sinjoro leŭtenanto, ke en la forlasita aŭtomobilo mi trovis kelkajn strangajn objektojn. Perukojn, ŝminkfarbojn

kaj teatrajn kostumojn, diversajn medikamentojn, bandaĝrubandojn kaj kelkajn virinajn harpinglojn.

— Strange... Sed letero, skribo aŭ ia dokumento. Ĉu ?

— Ne !

De ekstere penetris fora helicbruo de aeroplano. La oficiro sekvata de sia subulo tuj kuris eksteren.

— Eble nun rifuĝas la dua. Ĉiamaniere ni devas malhelpi tion! Alarmu la tutan taĉmenton kaj pafu, pafu bone celite!

— Laŭ via ordono sinjoro leŭtenanto.

Post du minutoj la taĉmento de la limĝendarmaro jam freneze pafis, pafadis en la direkto de la bruo, sed la nokta mallumo bone protektis la rifuĝantojn. Je la neatendita pafado ankaŭ la najbarlanda ĝendarmaro vekigis kaj nekomprenante la kaŭzon, aŭ pli ĝuste miskomprenante ĝin, komencis viglan pafadon al direkto de la bagonaj ĝendarmoj, transpaŝis la limon kaj okazis grava apudlima incidento je ĝojo de la diplomatio de ambaŭ landoj... sed la du ĉefrolantoj, organizantoj de la vera revolucio sukcesis forlasi la landon.

Post kelkaj tagoj de la okazintaĵoj Vaga Orel de Pord transprenis leteron en la kancelariejo. Ĝi estis adresita al li, sed la komenca alparolo kaj ĝia enhavo koncernis Lian Reĝan Moŝton mem. Senprokraste li rapidis viziti la reĝon, kiu dum la lastaj tagoj tute retiris sin de la direktado de la lando kaj ĉion lasis je la konata prudenteco de sia ministraro.

Vaga Orel de Pord kun humila riverenco etendis la leteron al la reĝo.

— Gravaj sciigoj pri... pri... Scipo Prikatel.

La apatia mieno de la reĝo por momento heliĝis, sed baldaŭ malsereniĝis.

— Ĉu li mortis ?

— Kun via plej alta permeso mi laŭtleĝos la leteron.

La reĝo konsente kapjesis kaj lia ekscelenco gravmiene, iom malvarmtone komencis la legadon.

»*Via Reĝa Moŝto, Olivero Karlo kaj Scipo Prikatel malaperis por ĉiam. La unua, ĉar li ne trovis komprenon ĉe sia amata patro; la dua, ĉar li estis miskonprenata de siaj kamaradoj. Kiu restis do? Homo, kiun la sorto komplete rekompencis per sindona kaj sinofera koro de knabino. Je memoro de via filo Olivero Karlo pardonu la erarojn de Scipo Prikatel, trovinta jenan veron: teni potencon por dinastiaj kaj klasaj interesoj egalas fari krimon kontraŭ la homo digno; regadi per popolo por popolo egalas atingi nenion racian; uzi potencon sen popolo por efektiviĝi raciajn ideojn signifas servi al la evoluo kaj eviti la kataklismon, neniigantan la fruktojn de miljaraj kulturoj. Jen! Humile adiaŭas la edzo de Elvira Jenlafiŝ.*«... Lando, urbo kaj dato mankas, sed estas mallonga postskripto de tiu supre nomita knabino... »*Kiraso de krudaj vortoj ofte kaŝas sangantan koron. Ne la nomo gravas, sed la homo kaj ties koro, amanta sincere vin, Via Reĝa Moŝto*«... Subskribo mankas, sed la skribmaniero montras, ke nur virinaj manoj povas tiel delikate desegni literojn.

La reĝo ne respondis, senvorte transprenis la leteron kaj rigardis ĝin, rigardis ĝis emociiĝo. Lia ekscelenco kun humileco de regato partoprenis en la patra doloro, kvankam interne li ĝojis, ke tiu dangera membro de la dinastio fine definitive decidis pri sia sorto kaj neniam plu ĝenos per siaj faroj la lojalajn konzervativulojn.

— Ĉu vi, ekscelenta moŝto, rememoras pri la disŝirita petskribo de Scipo Prikatel? — demandis la reĝo post longa pripensado. — Kiel vi opinias pri ties efektiviĝado?

— Absurdaĵo! — esprimis spontanee sian lojalan kritikon Vaga Orel de Pord.

La reĝo milde, sed iom riproĉe ridetis al sia maljuna konsilanto.

— Nu, tiun absurdaĵon post kvin minutoj mi subskribos kaj transdonos al la ministroprezidanto. Mi estas sufiĉe maljuna por rezigni pri kelkaj aferoj kaj vere min amuzos la konsekvencoj.

— Estu permesate averti vin, Via Reĝa Moŝto, ke tiuj revoj kondukos al revolucio.

La reĝo amare kaj ironie ekridis.

— Nu, fine mi vidos, kiel aspektas la revolucio de la *kapitalistoj*.

Kaj la postan tagon la ministroprezidanto kun humila respekto aperis antaŭ Lia Reĝa Moŝto por deklari la abdikon de la tuta ministraro kaj la malfeliĉa Xaver Nepaŭl VI-a neniam sukcesis trovi taŭgajn diplomatojn kaj ŝtatanojn, kiuj estus riskintaj entrepreni la efektivigon de tiuj punktoj, kiujn iam Scipo Prikatel, la erarvaganta princo Olivero Karlo transdonis al sia patro. La maljuna reĝo komprenis: tiel aspektas la revolucio de la kapitalistoj. Li komprenis kaj iun tagon li prenis la zorge gardatan leteron de la malaperinto kaj komentariis: »*Reĝa scepro ne direktas, kiam oron ĝi neglektas*« kaj konfirmis ĝin per sia reĝa parafo.

XXV.

For de la metropola bruo kaj de la benzin- kaj trotuarodora aermiksaĵo la ozono, la sunvarmo, la silento de la montoj kaj precipe la fratina amo tre bone akcelis la resaniĝon de la Fremdulo. Ĉiutage, kiam la flegistino puŝis lian radan apogseĝon sur la terason, li turnis sian palan, malgrasiĝintan vizaĝon al la ridetantaj sunradioj, senvorte longajn horojn rigardis la senliman bluan de la ĉielo, aŭskultis la foran muĝon de rivereta kaskado. Lia vundo rapide cikatriĝis, sed en lia animo konstante alternis apatio kaj melankolio. Amaraj pensoj, laca meditado, celperdinta humiliĝo antaŭ la sorto muelis, venenis lian energion. Kelkfoje neretenebla ĝemspiro forlasis liajn lipojn kaj tiam la bonkora flegistino kvietige karesis lian manon, kuŝantan sur la brakapogilo. Estis momentoj, kiam la sentoj subpremataj, neniam envortigitaj aperis en formo de larmoj en liaj okuloj. Tiam por distri lin la flegistino rakontis banalajn historietojn. Ho, tiuj historioj torturis lin, sed li senplende toleris, ke la bonkorulino lasu liberan fluan al sia helpemo. Lia mieno nur tiam mildiĝis, kiam Tamara aperis sur la teraso por paroli pri siaj planoj, feliĉo, amo kaj senlima kredo, preskaŭ fanatika homamo. La Fremdulo emociite ridetis pri la naivaj songoj de sia retrovita fratino. Tiuj belaj songoj lulis, dormigis la dolorajn pensojn en li kaj pro dankemo li neniam komencis diskuton. Silente kaj komprene

li aŭskultis la fantaziajn projektojn kaj aprobe kapjesadis. Ho, kiel bone estus, se ŝi neniam devus perdi la belajn iluziojn ! ... Kaj tiel pasis la tagoj kaj semajnoj.

Iun matenon de la unuaj martaj tagoj la Fremdulo forlasis sian radan apogseĝon, faris sian unuan, tre mallongan promenon en la parko de la pensiono. La arboj kun senfoliaj branĉoj, la laŭboj sen verda kostumo modestadis, sed kelkaj esperkoloraj herbetoj jam anoncis la proksimiĝantan printempon. Li eksidis sur benketon kaj rigardis, rigardadis la malfortajn heroldojn. Lia mano etendiĝis al unu herbeto por deŝiri ĝin. Kial? Li mem ne sciis, sed tuŝante la delikatan trunketon lia mano retiriĝis, profunda kompatato regis lin. Poste li ironie ridetis pri sia sentimento. Mortpafi amikon, kamaradon, elverŝigi la sangon de miloj li havis kuragecon, sed deŝiri herbeton li hezitas. Kiel stranga estas la homa naturo ! Subita kolero kaptis lin pro la malforteco kaj li komencis sovaĝe elradikigi la senkulpajn verdajn heroldetojn. Subite akran doloron li sentis en sia brusto. Li ĉesigis la vandalan sarkadon, leviĝis kaj plenpulme enspiris la freŝan matenan ozonon, poste li turnis sin por reiri al la domo.

Ĉe la pordego li renkontis sian fratinton. Ŝi alportis la antaŭtagmanĝan teon kaj ŝinkopaneton.

— Ivan, jen por kvietigi vian apetiton, — ŝi diris kaj ridetante, proponas metis la tason kaj la teleron sur apudvoja benko. — Nu, kiel vi fartas ? Se tiel vi progresas, certe post semajno ni povas ekiri.

— Ekiri ? Ĉu ?

— Jes. Ĝus mi ricevis leteron de Cezar, ke por la inaŭgura festo ĉio estos preparita ĝis la fino de marto. Li venos per aeroplano por ni post kelkaj tagoj.

— Kaj vi volas, ke ankaŭ mi... ankaŭ mi...

— Kompreneble, Ivan, ke ankaŭ vi venos kun ni kaj tie sur la fea kaj silenta insuleto en tute nova

medio vi retrovos vin... ne, mi ne tute bone esprimis min, *vi retrovos nin*.

La Fremdulo longe rigardis en la okulojn de Tamara kaj poste kun silenta rezigno respondis.

— Neeble, Tamara, neeble... Mi havas devon.

— Mi ne komprenas vin, Ivan?

— Mi senprokraste devas reveni al miaj superuloj, fari raporton pri la okazintaĵoj kaj respondi pri miaj faroj. Jen, mia devo!

— Ivan, — komencis Tamara post ioma paŭzo, — mi atendis tiun ĉi momenton. Mi sentis, ke venos la momento, kiam ni staros unu kontraŭ la alia ne kiel gefratoj, sed kiel reprezentantoj de diferencaj mondoj. Kiu venkos el ni, mi ne scias? Verŝajne, neniu el ni, ĉar ni ambaŭ estas fanatikuloj de niaj principoj. Precipe vi, Ivan, ĉar mi mem objektivie konstatas, ke la fanatikuloj ofte estas la plej grandaj malamikoj de siaj doktrinoj. Pro tio mi klopodas esti laŭeble objektiva, komprenema al miaj kontraŭuloj.

— Kion celas via enkonduka parolo? Ĉu vi volas riproĉi min?

— Riproĉi?! Ne, neniam, Ivan, ĉar pro la okazintaĵoj, pro via mondpercepto ne vi estas kulpa, sed la medio, edukanta vin... Diru, Ivan, por kio vi batalas?

— Por liberigo de la laborista klaso, subpremo de la kapitalismo, por triumfo de la racio.

— Tre, tre belaj celoj... Kiel vi batalas por ilia efektiviĝo?

— Mi sentas en via demando la akuzan aludon, sed vi ne estas prava, Tamara. Sango kaj sango estas la sola rimedo atingi ĝin. Ankaŭ vi estas blinda evoluciano, kiel estis Scipo Prikatel. Nenion alian havas la mizeruloj nur sangon por oferi sur la altaro de la progreso.

— Jen la historia superstiĉo, jen la tradicia dogmo, kiuj malhelpas la homaron sur la vojo al la vera raciigo. Fari martirojn signifas fari samtempe

krimulojn. Bone komprenu min, Ivan, ĉar niaj celoj, niaj idealoj estas komunaj, nur la vojoj, laŭ kiuj ni volas alproksimiĝi al ili, estas diferencaj!

— Kion vi scias pri la mondo, pri la doloroj, suferoj de la malriĉuloj, mia naiva Tamara? Vi erarvagadas sur la sonĝokampoj de la idealistoj kaj mi kun la miaj jam delonge surpaŝis la vojon de la realigo.

— Ho, multon mi scias pri la mondo kaj plene konsentas kun vi, ke eble neniam estis tiel kriza la stato de homaro, kiel nuntempe. La koron de nia patro trapikis tiuj, kiujn vi nun servas. Laŭdire li estis fanatika malamiko de via mondo. Vi estis for de ni, kiam okazis lia torturado kaj vi restis tie, via animo absorbis la instruon de novaj homoj. Mi ne kulpigas vin. Sed ĉiam vivis en mi la espero, ke mi retrovos vin. La renkontiĝo okazis kaj mia fratina koro havis tre doloran seniluziigon. Mi ne sciis kion fari? Kiam la telegramo raportis pri eksplodo de la revolucio en Strutmagen, mi kaj Juro tuj vojaĝis al la ĉefurbo kaj la malavareco, riskemo de Cezar ebligis vian saviĝon. Mi faris mian devon, ĉar estas momentoj, kiam nenio restas el la diferencaj mondoj. Rememoru, tion diris vi en la vespero de la revido.

— Kaj nun... nun kion vi deziras? ... Ĉu mi danku al vi la plilongigon de miaj suferoj aŭ kiel en la romanoj mi falu teren kaj preĝu al la malplena ĉielo? — La voĉo de Ivan fariĝis akre incitita.

— Nek la unuan, nek la duan mi deziras de vi... La diokredo estas tiel malproksime de vi kiel de la religiaj dogmosklavoj. Kiu ne kredas la bonecon de la Homo, tiu perdas ankaŭ la scion pri tiu mistera forto, kiun oni nomas Dio kaj ili fariĝas sensentaj pupoj. Nur senkoruloj bezonas kirason de dogmoj ĉu politikan ĉu religian. Sub la ŝirmo de tiu kiraso ili povas imagi sin perfektuloj. Sed kredu, ke sen la kiraso ili montrus sin malkuraĝaj eĉ fari unu paŝon sub la libera ĉielo. Pri racio vi predikas kaj por atingi

ĝin vi alprenas la plej senracian rimedon: vi ĵetas senkonsciencce la amason al la kanonoj. Vi volas detrui la potencon de la kapitalismo kaj ne rimarkas, ke vi preparas pli kruelan kapitalismon — la ŝtatan kapitalismon, kiu per novaj devizoj same ekspluatos la malfortulojn kiel la nuna. Tiel, diru do, tiel oni devas prepari la vojon de la racia mondo? Por atingi novajn bastionojn de la progreso, por krei racian mondon estas nepre necese forpuŝi de ni la malnovajn rimedojn, kiuj nur ŝanĝas la nomon de la stato, sed neniam ŝanĝas ĝian kernon. Perforto alvokas perforton, atako kontraŭstaron, sangverŝo porĉiaman venĝemon.

La Fremdulo kun subpremita ironia rideto sci-
volis.

— Kaj vi, Tamara, konas novajn rimedojn por atingi la komunajn celojn?

— Ne kaj jes. Praktike *ne*, sed teorie *jes*... Ne ridetu, ĉar ankaŭ vi kaj la viaj aplikas la teorion. Por havi novan mondon oni bezonas unue kompromiti, malkreditigi la kredon, ke la mono donas la feliĉon kaj poste vekas kredon pri la homa boneco en ĉiu infano, en ĉiu junulo, en ĉiu klaso per modelaj ekzemploj. Metu sur la altaron la Homon mem kiel la plej altan celon de la tera vivo kaj tiam la homaro faros la unuan paŝon sur la vojo de la racio. Prediku kaj pruvu, ke ne ekzistas pli granda valoro sur la tero ol la Homo mem kaj servi ties evoluon estas la celo de la tuta homaro kaj fari pekon kontraŭ la homo estas la plej hontinda refalo al la nivelo de la prahomo. Ne estas klasoj, sed sole homoj pli malpli maturaj kaj talentaj; ne ekzistas ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, sed vivas kune prizorgantoj kaj prizorgatoj. La nacioj estas egalrajtaj fratpopoloj, laborantaj por la komuna kulturo de la homaro. Ne kontinentoj kun diversaj interesoj ekzistas, sed nur la Tero kun sama intereso.

La Fremdulo admiris momenton la vervon, la

entuziasmon de sia fratino, poste tre milde, emociite envortigis la demandon, kiu altrudis sin al liaj lipoj.

— Kaj, Tamara, ĉu vi kredas, ke ĉio ĉi ne estas perforto, ke ĉio ĉi ne postulos martirojn? Pripensu kaj respondu, Tamara, ĉu vi serioze kredas, ke via mondo alportos la regadon de la laborista klaso?

La demando surprizis, embarasis Tamaran. Longan momenton ŝi enpensiĝis. La unuan fojon ŝi sentis dubon pri la sensanga, senmartira vojo.

— La vojo de la evolucio konas nur sindonajn, sinoferajn geniulojn, kiuj vivas por la milionoj, sed ne martirigas milionojn, — ŝi respondis iom malgaje, sed subite ŝia mieno vigliĝis. — Ivan, aŭskultu, mi kaj Juro ĉiujare vizitis iun el la eŭropaj landoj por konatiĝi kun ĝia arto. Mi estas tre simpla knabino, kiu ĝuas la belecon de artaĵo, sed profundan komprenon mi ne havas por ĝi. Mian intereson ligas al si la socia aranĝo de la lando, la vivmaniero de la homoj. Mia atento do turnis sin al tiuj aferoj. Mi multon rimarkis kaj notis al mi. Estus longe kaj eble tede paroli pri miaj spertoj. Estas landoj, kie la regantoj detruas kaj por bagatelaj personaj interesoj volas restarigi la mezepokan feŭdalismon; estas landoj, kie la potenco detruas, sed ne havas forton, moralan energion konstrui kaj fine estas landoj, kie la gvidantoj unue kontraŭas kaj poste detruas la hontindajn restaĵojn de la pasinteco. Nun, post la terura mondmilito regas ekonomia krizo, sed tamen ekzistas ŝtatoj, kie tiu krizo ne nutras sociajn krizojn, ĉar la regantoj donas aŭtonomian rajton al la laboristaro. Tie apenaŭ estas senteblaj klasdiferencoj kaj se iu laboristo el reakcia lando elmigras tien, li pensas ĉiun laboriston lukse vivanta etburĝo. Tio ankoraŭ ne estas la fina solvo, sed jam montriĝas en ĝi la sana evoluo al nova etiko, al nova mondo. En tiuj landoj jam ofte cedeblas la heredita egoismo al la parolo de la koro kaj la homoj konscias pri la beno de la paco, devenanta el la natura boneco kaj el la evoluanta raciemo de la homoj. La

civitanoj de tiuj landoj pruvas, ke la homoj ne estas batalemaj ŝakaloj, sed kreopovaj laboruloj, kiuj respektas la valoron de la laboro, produktita ĉu de menso ĉu de kalokrustaj manoj. Mi ripetas, ke tiuj landoj estas sur la sana evoluo, kies vojon ne makulas la sango de milionoj da martiroj.

— Tamara, vi parolas kiel vera etburĝo kaj kiel la mezeŭropaj socialistoj, kiuj perfidis la interesojn de la laborista klaso. Ili volas fari el la milionoj da laboristoj burĝojn kun burĝa ideologio kaj marĉandi je kvindek procentoj kun la regantaj klasoj. Fi!

Tamara tre malgaje rigardis al sia ekflamiĝanta frato. Neniam ŝi vidis lin tiel malproksime de si, kiel en tiu ĉi momento. Rezigna, dolora rideto aperis ĉe ŝiaj lipoj.

— Ivan, mi antaŭsentis, ke ni ne povos kompreni unu la alian. Vi estas la homo de la detruo, mi estas humila servantino de la paca konstruo. Ĉu fari el la laboristaro burĝan klason kaj ĝian progresemon inokuli en tiun mezan klason, refreŝigi ties inertan ideologion estus krimo kaj perfido? Mi pensas, ke ne! Progreson ĝi signifus. La du klasoj kvazaŭ unuiĝus en la sama ideologio kaj el la milionoj fariĝus centmilionoj kaj reprezentus tian forton, kiun kontraŭstari neeble. Ho, nenion mi tiel sopiras kiel la proksimiĝon, la kunfratiĝon de tiuj du klasoj — kaj Tamara subite levis sian voĉon, ŝiaj okuloj indigne ekflamis — Ivan, mia erarvaganta frato, ĉu vi konscias, ke vi kaj la viaj estas la plej danĝeraj malamikoj de la laborista klaso?

La okuloj de la Fremdulo ekflamis pro subita kolero.

— Mensogo! Mi ripetas, mensogo!

— Sed jes, jes, jes! Ĉu vi ne rimarkas, ke viaj agadoj ĉu sisteme, ĉu senkonscie helpas la reakcion, kompromitas la konscian laboristaron, malhelpas fari kompromisojn je ĝia favoro, kaj sur la vojo, sur kiu vi ŝaltadas antaŭen, akompanas vin mortkrioj, sango de senpekuloj, mizero kaj morto? Nenio pli ol la Bago-

nia revolucio montras tion. La potenculoj primokis vin, profitis la okazon repuŝi kaj subpremi eĉ tiajn rajtojn, kiujn la konscie aganta laboristaro jam atingis. Vi detruas sen konstruo.

— Mensogo! Mensogo!

— En la natura evoluo ne ekzistas saltoj. La erupcio de vulkano nur detruas. Lafo kaj cindro enterigas la florantan vivon. Vi estas la reprezentantoj de la detruforto kaj via kolero vomas lafon kaj cindron unuavice al la konscia laboristaro, kiu formas tiun kreoforton, kiu sanktigas la laboron, donas pli da pano, pli da rajtoj, vekas respekton en la malamiko kaj simpatian en la komprenemaj intelektuloj. Vi neas la homan bonecon kaj piedpremas viajn laboristajn gefratojn, ĉar ili estas reprezentantoj de la sendogma homa boneco. Jen!

— Mensogo, ĉiuj viaj asertoj estas mensogoj kaj ni, laŭŝanĝaj gefratoj, nun staras unu kontraŭ la alia kiel malamikoj.

La mieno de Tamara dolore mildiĝis, larmoj aperis en ŝiaj okuloj. Ŝi etendis ambaŭ manojn je repaciĝo al sia frato.

— Ivan, vi eraras... mi ne estas via malamiko... Ni estas ja gefratoj. La sama patrino naskis, nutris kaj lulis nin. En la okuloj de malamiko ne aperas doloraj larmoj pro suferoj, malprudentaj agoj de la malamiko. Kредu, Ivan, ke sole la frata amo elvokis miajn larmojn. Ni estas simbolo de la vivo. Mi estas la pli aĝa, vi estas la june kaprica kiel en tiuj tagoj, kiam en la ĝardeno de niaj gepatroj ni ludis kune. Ĉu vi rememoras? Mi konstruis fortikaĵojn el la malseka sablo kaj vi ĉiam detruis ilin. Jen, ankaŭ nun!... Kaj ni simbolas, Ivan, ankaŭ tiun klason, kies reprezentanto estas vi kaj kies membro mi sentas ankaŭ min mem per mia mondpercepto. Unu patrino, la socialismo, naskis, nutris, lulis kaj edukis ilin, sed la bastionojn de la pli aĝa frato ĉiam detruas la juna kaprica frato. Ho, Ivan, ĉu vi ne povas ekvidi la lar-

mojn, la suferon, kiun sentas la pli aĝa frato? Rigardu nur foje en la malgajajn okulojn kaj vi sentos, vidos, ke ne malamo, sed profunda doloro kaj senfina toleremo nestas en la koroj... Nu, Ivan, donu la manon kaj ni ne parolu plu pri tio, kio disigas nin, sed nur pri tio, kio kunligas niajn manojn: la memoro pri niaj gepatroj.

La Fremdulo emociite ekprenis kaj premadis la manojn de Tamara. Ŝi jam ridetis tra la larmoj.

— Ivan, vi venos kun ni, vi helpos en la konstruado, vi kredos pri la homa boneco... Ĉu ne?

Li ne respondis. Lia rigardo fiksigis al la suno, leviĝanta simile al flagranta ruĝa disko el post orienta montopinto.

La trian tagon post la interparolado de la gefratoj la flegistino kun kretoblanka vizaĝo balbutante raportis al Tamara, reveninta el la apuda urbeto, ke la sinjoro malaperis kaj lasis leteron sur la tablo de sia ĉambro.

Tamara kun prema antaŭsento rapidis en la ĉambron, ŝiris la koverton kaj ekscitite legis.

»Tamara kaj Juro, miaj amataj gefratoj, la june kaprica knabo foriras, ĉar vokas lin la devosento kaj li volas vivi memstare, progresi sur tiu vojo, kiun li trovas la plej racia por atingi la celon. Ne riproĉu lin kaj ne ĉagreniĝu pro lia malapero. Plene mi konscias, ke niaj diferencaj mondperceptoj nur estus venenintaj la harmonion inter ni, se mi restus. Frate mi deziras feliĉon al vi ambaŭ en la Vivo, kiu iam pruvos, kiu el la tri gefratoj pravos: ĉu la pesimistaj arto kaj filozofio, narkotantaj sin per optimismaj fiktivaĵoj, aŭ la revteksanta homamo, drive baraktanta sur la furioza marĉomaro de la putranta socio, aŭ la senindulga batalemo, ekstermanta la praarbaron de la tradicioj, ĝisradike pluganta la humon, en kiu ĝi volas disjeti la semojn de nova mondo? Ivan.«

La fratina koro de Tamara pleniĝis je doloro. Larmoj de rezigno, seniluziiĝo vualis ŝiajn okulojn.

— La june kaprica knabo, kiel iam en la infan-aĝo, denove detruis unu el miaj plej belaj fortikaĵoj....

La vortoj plende vibrante forlasis ŝiajn lipojn kaj nepovante plu regi sin ŝi ploregante falis sur la forlasitan radan apogseĝon kaj skue baraktis pro la vundo, kiun frata mano tranĉis sur ŝia sentema koro.

XXVI.

Kazimiro Jenlafiŝ zorge observadis sin en la spegulo. Vanta kontenteco sorĉis larĝan rideton sur lia luna, trimentona vizaĝo. Vere, la frako estis unuaranga tajlorartaĵo kaj elegante efikis sur ĝi la ordenrubando de la Ora Ĉevalvosto, donacita al li antaŭ kelkaj tagoj por la brava sintenado en la revolucio. Verdire, la urbestro ankoraŭ neniam montris tiel spontanee sian veturigistan energion kiel en la postaj tagoj de la revolucio. Amasarestoj, domtraserĉoj, montego da protokoloj atestis pri lia agado. Sed la trian tagon lia senbrideco iom mildiĝis. Verŝajne Krak flustris ion al lia orelo pri la kortego kaj sinjoro Jenlafiŝ tuj grandanime bremsis sian furiozon en la patrujsavado. Kio estis tiu sekreto? Oni ne sciis, sed kelkaj konjektis, ke ĝi havas ioman interrilaton al la fakto, ke lia ekscelenta moŝto Vaga Orel de Pord tute neatendite petis forpermeson por refreŝigi sin en eksterlanda sanatorio kaj lia anstataŭanto provizore fariĝis Jonathan Krak, promociita al reĝa konsilanto kun ekscelenta titolo. La konsekvencoj de la reĝa favoro estis: fianĉiniĝo de unu el liaj filinoj kun la nova urba ĉefnotario, tre simpatia kaj mezaĝa viro, krevado de korsaĵo de sinjorino Lola pro la subita ĝojo kaj pli profunda riverenco de la urbestro antaŭ sia amiko. Sed ankoraŭ io, kio tre kortuŝis la favoraton de la sorto: la esperplena rideto de la simpluloj, kiuj ne forgesis, ke dum la revolucia tago la brava ĉefno-

tario portis ruĝan kokardon. Ke tio estis nur komedio ili jam forgesis aŭ ne volis rememori pri tio. La koroj malfermiĝis antaŭ li kaj li atente aŭskultis ĉiun. Iun tagon okazis miraklo, neniam vidita en Bagonio. La reĝo donacis fianĉinan doton al dek malriĉaj knabinoj, kies geedziĝa ceremonio okazis samtempe en la ĉefurba baziliko. Krak, kiel reprezentanto de Lia Reĝa Moŝto, partoprenis en la soleno kaj diris tiel naive kortuŝajn frazojn al la junaj paroj, ke la plenplena preĝejo tondris longe de la vivuado: »Vivu la Reĝo!« La unuan fojon de longa tempo ne sole detektivgorgoj kriis tion. En iu alia tago la reĝo kun sia nova konsilanto faris kaleŝpromenadon tra la stratoj. La amaso gapis, kelkaj ridetis. Multaj miris, ĉar dum la lastaj jaroj la reĝo nur kelkfoje kaj kun granda eskorto forlasis la palacon. Nun la kaleŝon sekvis nur la juna adjutanto. Ĉe iu angulo inter la gapanta amaso en la unua vico staris almozuline vestita virino tenante dujaran infanon sur la brako. Krak mallaŭte kaj nerimarkeble alparolis la reĝon.

— Kun humila respekto al Via Reĝa Moŝto mi kuraĝas alvoki vian favoran atenton pri tiu mizerulino.

La reĝo komprene, kvazaŭ obee rigardis al la montrita direkto kaj haltigis la kaleŝon, diris kelkajn vortojn al la adjutanto, kiu tuj deĉevaliĝis kaj alpaŝis al la mizerulino por konduki ŝin al Lia Reĝa Moŝto. La amaso miregis kaj ekscitite scivolis pri la okazontaĵo. La reĝo afable alparolis la virinon kaj levis al si la duonnudan infanon. Kiam la eta senpekulo alridetis lin, tiam la reĝo forgesis, ke ĉio estas ja lerte aranĝita teatraĵo de Krak kaj lia homa koro pleniĝis je sincera kompatato.

— Nu, bubeto, kie via patro?

— En la malliberejo — respondis la virino anstataŭ sia ido.

La reĝo ŝajne ne rimarkis la respondon, delikate ekkaresis la blondan kapeton de la infano.

— Kiom da infanoj vi havas, virino?

— Ses, jes, estimata sinjoro reĝo.

— Kaj vi tiras la plugilon, ĉu ne? ... Respondu, bona virino!

— Jam mi ne tiras, estimata sinjoro reĝo, ĉar la plugiltentanto mankas.

La reĝo nun jam komprenis la ruzetaĵon de sia nova konsilanto. Li volis vekti memoron en li. Por momento indulge li rigardis al Krak, kiu ŝajnis montri sin tute senpeka, poste li turnis sin denove al la virino.

— La plugiltentanton vi rericevos kaj pri viaj infanoj zorgos la reĝa favoro. — La reĝo diris ankoraŭ kelkajn vortojn al la adjutanto, redonis la infanon al la patrino kaj donis signon por daŭrigi la kaleŝveturadon.

La amaso miregis, eĉ ne unu gorgo kriis vivuon, sed la ĉapeloj senvorte malaperis de la kapoj kaj la reĝo kortuŝite ekpremis la manon de Krak.

— Ekscelenca Moŝto, mi dankas vin por la muteco de miaj regatoj, ĉar ĝi kaŝas ne malamon, sed emociion.

— Tio estas merito de via komprenema koro, Via Reĝa Moŝto.

La reĝo longe pensadis. Dum la tuta vojo eĉ ne unu vorton li diris plu ĝis la pordego de la palaco, Tie li turnis sin al Krak, kiu time pesadis en si la signifon de la silentado.

— Kaj nun kion ankoraŭ? — demandis la reĝo.
— Ĉu nur la plugiltentanton?

Krak komprenis la aludon kaj lia koro ekĝojis.

— Mi pensas, ke post paso de semajno jam povus aperi la amnestia dekreto. Tiun semajnon ni uzos por fari la adaptadon de georfoj *modo* ĉe la seninfanaj geedzoj. La reĝa ekzemplo helpas prepari la vojon de mia posteulo.

La reĝo milde ridetante averte metis la fingron sur sian buŝon.

— Ekscelenca Moŝto, vi forgesas, ke ni estas jam en la reĝa palaco, kie ĉiu arbitraĵo kaj muro havas orelojn.

Tiaj kaj similaj epizodoj tre firmigis la influon de Krak, vekis fidon al la dinastio kaj sukcese, ofte *kontraŭvole*, popularigis la modon inter la riĉuloj interesiĝi pri la sorto de la malriĉuloj. En societaj kunvenoj ofte okazis konversacio simila al la jena: »Ho, kara sinjorino Rangsurring, nia prizorgata familio havas du kisindajn bubojn.« — »Ho, mia adoptita filineto jam ne odoras de sterko kaj vi eĉ ne povas imagi, kara sinjorino Graskor, kiel ĉarme ŝi jam povas fari riverencon!« »Ĉio estus en ordo, sed mia edzo apenaŭ povas toleri la demandemon de la fileto de de nia veturigisto. La etulo demandadas kiel ŝtata prokuroro.« — »Vi estas prava, kara sinjorino Banksef, tiuj ĉi infanoj estas tre scivolaj, ne atentis pri la tapiŝoj, kaj ofte okazas, kiel mi aŭdis, ke ili ŝtelas tabakon por la patro, aŭ ion bagatelan por la vera patrino.« — »Nu, espereble, ne longe daŭros tiu ĉi teda modo.« — »Se Lia Reĝa Moŝto povas toleri ses needukitajn infanojn en siaj ĉambroj, tiam ankaŭ...« — »Jes, sed Lia Reĝa Moŝto havas kelkajn apartamentojn kaj kelkdekojn da lakeoj, sed ni, por ekzemplo, ni havas nur ses ĉambrojn kaj tri servistinojn. Estas granda diferenco, ĉu ne, sinjorino Dornpik?« — La demandito ekridis: »Kaj ĉu vi aŭdis jam, ke tiu naiva sinjorino Korsenmon kiel ameme prizorgas la bastardon de kudristino, nesciante, ke ŝi vartas la filon de sia propra edzo?« Kiel oni povas konstati, la modo ne en ĉiu koro akceptis egalan simpation, sed pro lojaleco (?) al la dinastio oni sekvis ĝin. Krak, dank' al la vigla lango de sinjorino Lola baldaŭ sciigis pri tio ĉi kaj per la reĝa kancelario sendis dankleteron al la riĉaj kaj aristokrataj familioj, kiuj subtenis la ideon. La Kortega Bulteno aludis pri speciala ordenrubando por tiuj, kiuj pleje prizorgas la infanojn kaj protektas la familiojn kun

multaj membroj. Nu, tio ĉi efikis bonege! Krak montris la vojon kaj manieron kiel atingi premion por la kora boneco kaj kiel melki la avaran riĉan klason. Estis malriĉaj gepatroj, kiuj vivis nur per siaj prizorgataj infanoj.

La gazetaro diversmaniere komentariis la ŝanĝojn. La registara »*Ĉioscio*« ŝajnis sciŝi nenion, la opoziciopartia »*Kuriero de Lumo*« palpatis en plena mallumo, la liberala »*Nova Perspektivo*« riskis aserti, ke nova suno aperos ĉe la politika horizonto, kaŝata nun de nebulo, la socialdemokrata organo, »*La Libera Voĉo*«, avertis siajn partianojn pri eventuala nova komploto de la supera klaso kaj fine la komunista unuiĝo ... Nu, la komunista unuiĝo perdis sian voĉon en la revolucio kaj ĝia organo, »*La Ruĝa Heroldo*« ĉiam vojeraris kaj anstataŭ iri al siaj legantoj ĝi alvenis ĉiunumere al la politika sekcio de la polico. Do tiamaniere la bravaj bagonaj civitanoj devis kontentigi je onidiroj, kiuj sugestis, ke la pensumado de lia ekscelenco Vaga Orel de Pord kaj la promocio de Jonathan Krak signifas aŭroron: reformadon de la konstitucio kaj proksimiĝon de la dinastio al la popolo. Precipe oni tre enigme parolis pri la oftaj eksterlandaj ekskursoj de Krak.

Tiuj eksterlandaj ekskursoj incitis la fantazion ankaŭ de sinjoro Jenlafiŝ, kiu vere enviis la popularcon de sia amiko-konkuranto. Nemirinde do, ke nun preparanta sin por la inaŭgura soleno de la monumento en la zoologia ĝardeno li cerbumadis pri rimedo, akiranta por li la simpation de la popolo. Iel neklare li sentis, ke ne sufiĉas bela oratorajo por la popolo. Estas necese, ke oni donu ion konkretan al la majesta amaso. Ion konkretan, sed kion? Ĉu monon? Nu, tia bovo li ne estas, kiu oferas eĉ monon por popularigo, precipe, se la monon li devus preni el sia propra poŝo. Ne, tia bovo... tia bovo... Jes, *bovon* oni devas rostigi por la ĉiam malsata amaso. La mieno de sinjoro Jenlafiŝ ekbrilis pro la bonega

ideo kaj li tuj kuris al la telefono por alvoki la buĉiston.

— Halo! Halo!... Jes. ĉi tie la urbestro... Mi bezonas du grasajn bovojn por la hodiaŭa festeno en la zoologia ĝardeno... Kompreneble, ke buĉite! Ĉu vi pensas, ke oni povas manĝi bovojn nebuĉitajn?... Nu!... Kiom kostas?... Ho, tre multe! Ne, tiom mi ne povas oferi, ĉar sciu, kara sinjoro Vilibald Hakperman, ke el mia propra kaso mi dezirus oferi iom por niaj bravaj samurbanoj... Nu, ni ne bezonas grasajn, por la sama celo servos bone du malgrasajn... Kompreneble kun la rostado! Ĉu vi pensis, ke mi mem iros rosti ilin?!... Do, ni konsentis. Du malgrasaj bovetoj. Bone!... Kie?... Sur la popolplaco malantaŭ la zoologia ĝardeno.

Sinjoro Jenlafiŝ rekroĉis la aŭdilon, la manojn kunfrotis por esprimi kontentecon kaj poste momenton pripensis la aferon kaj sonorigis al la servisto. Tiu aperis post momento.

— Tuj sciigu la sinjoron urban konsilanton de la ekonomiaj aferoj, ke mi mendis du bovojn por la konto de la komunuma kaso. Li asigu la necesan sumon por la buĉisto Hakperman.

La servisto foriris kaj sinjoro Jenlafiŝ denove kunfrotis la manojn. Nu, tia bovo tamen mi ne estas, ke mi oferu el mia propra poŝo, li pensis kaj iris al la spegulo por admiri plu sian dignoplenan aspekton. La spegulo donis al li novan penson: provi la grandan festan paroladon antaŭ la spegulo kiel la grandaj aktoroj provas siajn rolojn. Do li komencis gestadi manovri diversmaniere kun la manoj kaj zorge atentis la graciecon de siaj movoj. Li estis kontenta pri si kaj kun kreskanta verve li gestadis kaj dume enpense ripetadis kelkajn partojn el sia oratorajo. Subite en la spegulo aperis dua figuro, mire rigardanta lin: Jonathan Krak. La urbestro ruĝiĝis ĝis la tempioj.

— *Servus!* Kion ci faras?... Ĉu la matenan gimnastikadon?... — demandis Krak.

— Vere, ci surprizis min, ekscelenta moŝto... Mi pensis, ke nun ci vojaĝadas en eksterlando. Nu, cia subita apero estos granda honoro por la hodiaŭa inaŭgura festo. Espereble, ci bonvolos ĉeesti kaj reprezenti la kortegon. Ĉu?

Krak indulge ridetis. Li rememoris pri la tago, kiam li aperis la unuan fojon en tiu ĉi ĉambro kaj la sinjoro urbestro parolis iom ŝultrofrape al li. De tiu tago la roloj iom interŝanĝiĝis. Tion sentigi al la urbestra amiko estus tre amuze, pensis Krak, sed poste forĵetis la penson. Lojale li etendis je manpremo sian manon.

— Lasu la titolon, amiko! Nun ne la ekscelenco venis al la urbestro, sed la patro al patro... Mi renkontis cian filinon.

Sinjoro Jenlafiŝ subite ruĝiĝis. Li ne povis pardoni la eskapon de sia filino kun Scipo Prikatel. Eskapi kun princo Olivero Karlo estus iom alie! Do, la ruĝiĝo signifis subitan koleron, malfacile regeblan.

— Mia amiko, se estas permesate al mi peti cin, ne parolu pri la sendankema knabino, kiu malhonorigis mian familion. Miaj honestaj prauloj certe turnus sin en la ĉerko, se ili sciis la okazintaĵon.

Krak momenton rememoris pri la patro de Jenlafiŝ kaj pene subpremis la rideton, kiun penso altrudis al liaj lipoj: kiel povas aspekti ventilatore turniĝanta veturigisto?! Jen, la alta pozicio nobeligas la praulojn, eĉ nobligas ilin.

— Nu, bone! Estu laŭ cia deziro! Ni ne parolu pri la sendankemulino! Sed ni parolu pri Scipo Prikatel.

— Ĝis tiu altdevena junulo havas la nomon kaj sorton de la persekutata Scipo Prikatel, mi ne deziras paroli pri li.

— Nu, bone! Ni ne parolu do pri la insulo Esper' de l' Homo!

— Pri kiu insulo ?

— Ŝajnas al mi, ke ci ne kutimas zorge legi la ĵurnalojn. Mi parolas pri la insulo de Cezaro Grauer.

— Ĉu Cezaro Grauer havas insulon ? ... Sed kiel povas interesi min tiu insulo ? Kaj kie ĝi troviĝas ?

— Precize mi ne scias, sed onidire en la mezo de la Pacifika Oceano.

— Nu kaj... ?

— Kaj... kaj... Sed tio ne interesas ja cin.

— Nu, ne tre, tamen . . . Aŭ ĉu tio rilatas iamaniere al la heredaĵo ?

— Nu, tion mi ne scias, sed ci estas invitita al tiu insulo.

— Ĉu mi ? ... Mi ??? !

— Jes, ci . . . ci !

Krak ridetis, Jenlafiŝ konfuzite rigardis al lia mokema mieno.

— Mi ne komprenas. Kiu kaj kial invitis min al tiu insulo ?

— Ci malpermesis paroli . . .

— Ĉu mi ?

— Nu, jes. Ci diris, ke ci ne deziras paroli pri cialaj filino kaj bofilo.

— Ĉu ili invitis min tien ?

— Jes. Scipo Prikatel rifuzis reveni al la lando. Definitive li rifuzis. Vane estis mia elokventeco, la persvado ne rezultis sukceson. Li kun sia edzino akceptis la inviton de Cezaro Grauer kaj ili transloĝiĝos sur la insulon.

Sinjoro Jenlafiŝ longe gapis al sia amiko. Li ne komprenis tute la situacion. Ĉu Scipo Prikatel estis revokita al la lando ? De kiu ? Ĉu li konatiĝis kun Cezaro Grauer ? Sed kie ? Kaj fine, kion tiu revoluciano povas fari sur tiu insuleto ? Multaj demandoj svarmis en la kapo de la urbestro.

— Mi ne tute komprenas cialjn vortojn, — fine li diris. — Tre multajn novaĵojn ili entenas.

— Nu, simple la intenco de Lia Reĝa Moŝto

estis, ke mi anstataŭu la pensiumitan ekscelecancan moŝton Vaga Orel de Pord ĝis reveno de Scipo Prikatel. La reĝo donacis ja plenan amnestion al ĉiuj, kiuj partoprenis en la revolucio kaj estis lia intenco fari novan ministerion por popolkulturo kaj protekto, kies gvidanto estus fariĝinta Scipo Prikatel. Jen la vera kaŭzo de miaj oftaj ekskursoj. Sed Scipo Prikatel ne estas persvadebla.

— Ho, la frenezulo! — Kriis Jenlafiŝ tute konsternite, ĉar dum la parolo de Krak li jam vidis kreski sian influon en okazo, se lia bofilo fariĝos ministro. — Senprokraste mi vojaĝos al li por akceli la aferon.

— Vane! Mi diras al ci, ke vane!

— Sed kial?

— La kaŭzo estas cia filino kaj ci mem.

— Mi? Ĉu mi? Mi ne komprenas.

— Tio estas tre simpla afero. Scipo Prikatel kiel cia bofilo ne volas esti la rompanto de cia kariero. Lia reveno kaŭzus cian tujan eksigon.

— Ĉu mian eksigon?! Mi ne komprenas. Ĉu ministro kaj urbestro ne povus harmonie kunlabori?

Jonathan Krak post iom da paŭzo, dum kiu li akre observadis la baraktantajn trajtojn de Jenlafiŝ, fine donis plenan kaj nemiskomprenoblan klarigon.

— Ne! Tute ne! Scipo Prikatel ne volas per fondo de nova ministerio plimalfaciligi la situacion de la impostpagantaj civitanoj. Li konsentas reveni nur tiam, se li estos elektita urbestro de Strutmagen.

— Ho, la fripono! — eliĝis la kolero el la konsternita urbestra brusto. — Ho, la hipokritulo!... Kaj li eĉ kuragiis inviti min al tiu insulo, kiu troviĝas ie malantaŭ la dorso de Dio... Sed kial? Kial?! Mi scias. Dum mia foresto fiŝkaptadi en la malklara akvo!

— Ne, kara amiko, li invitis cin ripozi tie kaj pasigi komforte certan tempon.

— Ĉu ripozi? Ne! Mi tute ne volas ripozi kaj neniam mi libervole forlasos miajn amatajn civit-

anojn, kiuj iam honoris min per sia elekto. Ne kaj ne! Kaj ĝuste nun, kiam mi traluktadis kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj por akiri la heredaĵon por la urbo. Ne, ne, neniam mi cedos!

— Ci forgesas, ke tio dependas ne sole de ci. Finfine en nia lando la plej alta suvereno estas la Reĝo.

— Kaj kiuj defendas tiun suverenon? Ni, civitanoj. Bela danko, mi povas diri. Ĉu mi ne havas sufiĉe da meritoj eĉ per tio, ke la revolucio...

— Ni lasu la revolucion! Ĝi estis ne tre sukcesinta komedio... Nun jam ankaŭ ci scias tion. Nun temas pri la nova urbestro. Ĉu ci komprenas? Pri la nova urbestro.

Sinjoro Kazimiro Jenlafiŝ subite trankviliĝis. Li prenis al si humilan mienon kaj en lia sintenado montriĝis kapitulaco.

— Ĉu ekzistis iam pli malfeliĉa urbestro ol mi? Konfesu do, ĉu iam sidis pli malfeliĉa homo en la urbestra seĝo?

Jonathan Krak ŝajnis pripensi la doloran demandon.

— Jes, en ĝi sidos iu pli malfeliĉa urbestro.

— Ĉu ci aludas pri Scipo Prikatel?

— Ne, sed pri iu alia, kiu neniam celis sidi sur tiu seĝo kaj kiu tamen devos teni la bridrimenojn de la urbo dum la transira periodo.

— Kiu?

— Mi.

La respondo estis tiel surpriza, ke en la unuaj momentoj Jenlafiŝ ne povis plene percepti la signifon de la respondo.

— Ĉu ci?

— Jes, per reĝa dekreto dum ĉia foresto en Ameriko.

Post momento Jenlafiŝ ekfuriozis. Ho, kia ruza vulpo estas tiu ĉi Krak! Urbestro dum transira periodo! Kiu povus kredi tion? Li ne povis regi plu

sin kaj torenton da insultaj vortoj kaj riproĉoj li verŝis al Jonathan Krak, kiu silentis, ne protestis. Tiu obstina muteco senarmigis la koleron de Jenlafiŝ.

— Kial ci ne respondas ? Kial ci ne defendas cin eĉ per unu vorto? Kial? Ĉar mi estas prava! Ĉu ne?

— Ne, ci ne estas prava. Kaj tute ne miru pri mia silentado. Mi kutimiĝis jam al tio. Kiam en la domo kriadas mia edzino, tiam mi silentas. La plej bona rimedo kiel eble plej baldaŭ silentigi ŝin. Jen, la sama metodo efikis ankaŭ ĉe ci. De la plej supra galerio ci malsupreniĝis jam al la parteroj. Nun jam ci kapablas aŭskulti la proponon, kiun mi elpensis por eviti la urbestran seĝon, kiun mi absolute neniam celis atingi. Verdire mi nenion celis atingi escepte la edzinojn de miaj filinoj. Cetere, esti urbestro post ci, mi kuraĝas aserti, ne estas enviinda pozicio.

Kvankam la lasta frazo entenis ion dusencan, tamen Jenlafiŝ akceptis tiun sencon, kiu ventumis lian vantecon. Li sidiĝis, spasme premadis la brakapogilojn de la urbestra seĝo kaj post ioma konsidero de la antaŭe diritaj vortoj li emis finaŭskulti la proponon.

— Nu, parolu!

— Mi ripetas, ke nenio estas pli malproksima de mi ol la aspiro pri la urbestreco. Tial mi proponas al ci, ke ci ne vojaĝu al Ameriko, sed delegu min por transpreni la heredaĵon kaj...

— Hoho!... Jen, nova ruzaĵo!

— Ĉu ruzaĵo?

— Jes, por plipopularigi cin... kaj poste triumfe alporti la trezoron de la sefo 135 kaj per tio akceli cian *ne* provizoran, sed *definitan* urbestrecon.

Krak longe rigardis la urbestron. Ne, tiu ĉi homo neniam povos kompreni, ke ekzistas sincera amikeco.

— Ci denove miskomprenis min.

— Ho, tre bone mi komprenas cian intencon...

Mi decidis. Ci estos mia anstataŭanto, sed ne per reĝa dekreto, sed per mia propra elekto. Post la hodiaŭa inaŭgura festo mi oficiale deklaras cin urbestro-anstataŭanto. Mi mem persone volas reveni kun la trezoro, kiu firmigos mian pozicion kaj la frukton de mia klopodo neniel mi transdonos, cedos al iu ajn. Ĉu ci komprenas min? Ĝis mi estas la urba suvereno, mi uzos mian potencon, donitan al mi de la leĝo mem... Nek Lia Reĝa Moŝto, nek Scipo Prikatel, nek ci konas min.

— Kaj la volo de la civitanoj?! Ci forgesas, ke post jaro cia mandato finiĝos kaj tiam la civitanoj...

— La civitanoj kaj la majesta popolo manĝos ĝis satiĝo... — Li iris al la telefono kaj alvokis la numeron de Vilibald Hakperman. — Halo! Halo! Ankoraŭ du bovojn, sed grasajn, grasajn, ke la popolo satiĝu ĝis vomo kaj viaj helpantoj diru al ĉiu gustumanto, ke la sinjoro urbestro deziras bonan apetiton al ili... Jes, grasajn je mia propra kosto!

Jenlafiŝ forlasis la telefonon kaj triumfan rigardon ĵetante al Krak li residiĝis kun plena urbestra digno. Krak ne faris rimarkon, sed li pensis, ke rostitaj bovoj ankoraŭ neniam kapablis eltiri ĉaron, algluigintan en la koto.

La servisto venis en la ĉambron por raporti, ke la urba kaleŝo jam veturpreta staras antaŭ la pordego. Jenlafiŝ tuj salte leviĝis, momenton rigardis sin en la spegulo.

— Espereble, ci faros al mi la honoron(akompani min.

— Bedaŭrinde mi ne povos ĉeesti dum la festeno.

— Ĉu ŝtataj aferoj?

— Tute ne! Mia edzino volas prepari grandan regalon kaj rosti kelkajn anserojn kaj kokinojn.

Jenlafiŝ subpremis ironian rideton, sed la rimarkon li ne retenis.

— Ekscelenca amiko, ŝajnas al mi, ke ci devas helpi en la senplumigado.

Krak iomete ruze palpebrumis, poste milde ridetante rigardis al sia amiko.

— Ne, atestimata moŝta amiko, mi devas *malhelpi* la senplumigadon.

La urbestro konjektis sekreton en la figursenca respondo. Surprizite turnis sin al Krak.

— Ĉu ci aludas pri miaj aferoj? Parolu!

— Ci pensas min tre ruza. Mi ne estas ruza, sed *singardema*. Ĉe la kortego mi klopodas alproprigi la diplomatian lingvaĵon. Mia respondo koncernas tute hejman familian aferon. Malhelpi la senplumigadon de anseroj kaj kokinoj estas mia privata afero, kiel la rostigado de kvar bovoj estas tiu de la urbestro.

Jenlafiŝ iom ofendite ekiris al la pordo kaj lia amiko ridetante sekvis lin.

Dum la tuta vojo al la zoologia ĝardeno Kazimiro Jenlafiŝ cerbumadis pri senplumigo de anseroj kaj rostado de kvar bovoj. Vane, li ne povis diveni la kaŝitan sencon de la mistera diraĵo. Vole nevole li konstatis, ke Jonathan Krak bonege konas la diplomatian lingvaĵon.

Dume la freŝe bakita ekscelenca moŝto enpensigante proksimiĝis al sia hejmo por vere kaj laŭvorte malhelpi la senplumigadon de kelkaj malfeliĉaj kortbirdoj.

— — — — —

De kiam la diino de feliĉo, Fortuno, prenis sur siajn flugilojn aŭ manplaton la simplan urban notarion kaj faris el li eĉ ekscelencan moŝton, lia domo laŭrange reprezentis lin. Nova meblaro, moderne pentritaj ĉambroj, persaj tapiŝoj kaj kuirstino, ĉambristino, servisto klopodis kontentigi la dezirojn kaj ordonojn de Lola. Jes, nur de sinjorino Lola, kiu dum la antaŭtagmezoj banis siajn grasetajn manojn en glicerino, kaj ĉiuvespere duonkilogramon da freŝa bovviando albandaĝis sur sian vizagaĵon, posttagmeze en-

profundiĝis en la studadon de etiketaj reguloj. Sia voĉo mole flutadis, ofte ŝi havis kapdoloron kaj konstante plendadis kun aristokrate kuntiritaj lipoj pri sia troa okupateco, teruraj zorgoj. Ŝiaj filinoj volonte sekvis la ekzemplon de la patrino, escepte la maldankeman Cia, kiu plej volonte retirigis en la laborĉambron de sia patro kaj tie ŝi skribis amajn leteretojn al sia fianĉo.

La ĉambro de lia ekscelenco Jonathan Krak ne montris la rangaltiĝon de sia mastro. Ĝi aspektis kiel antaŭe. Ho, ne pro avareco aŭ egoismo de sinjorino Lola! Tute ne! Lia ekscelenco ne ŝatis la novajn meblojn, ĉar tiuj rememorigis lin pri lia nova posteno, pri la kortego, pri tiuj aferoj, kiujn oni altrudis al li. Ŝajnis al li, ke la nove meblita domo estas fremda hejmo, kie li devas konstante atenti pri etiketaj reguloj, ceremonioj kaj diplomacia lingvaĵo. Sole en sia malnova laborĉambro li sentis sin hejmece. Estis agrable por liaj okuloj rigardi la centon da pipoj, pendantaj sur la muroj, la malnovan, sed solidan skribotablon, kiun ornamis sennombraj inkmakuloj, la grandan libroŝrankon, en kiu nur li povas trovi la serĉatan libron.

Krak kiel ĉiam ankaŭ nun rapide trakuris la vestiblon, la salonon, la manĝoĉambron kaj iris en sian laborĉambron. Cia, kiel ĉiam, ankaŭ nun sidis ĉe la granda tablo kaj skribis. Je la alveno de sia patro ŝi ĝoje leviĝis kaj salutis lin per mankiso.

— Paĉjo, nur nun vi alvenis?!

— Ne, antaŭ horo, sed mi havis urĝan traktaĵon ĉe la urbestro. Kie estas via patrino?

— En la banĉambro por ŝviti kaj malgrasiĝi.

— Ĉu en la banĉambro? Interese! Ĉiutage dufoje. De kiam ŝi fariĝis altrangulino, ŝi konstante banas sin, kvazaŭ esti altranga signifus esti kamenpurigisto... Nu, kaj tiu fastado!... Finfine ŝi malsaniĝos pro la malplena stomako.

Cia ridetis iom mistere kaj poste klinis sin al la orelo de sia patro.

— Paĉjo, mi perfidas al vi sekreton, sed ne diru al panjo!... Per la fastado ŝi gajnis tri kilogramojn, ĉar ŝi rifuzas la manĝaĵon nur antaŭ niaj okuloj, sed poste, kiam ŝi pensas, ke neniu vidas ŝin, ŝi kompensas abunde la mankon.

— Cia, ne decas tiel priokulumi vian patrinon — diris ridetante Krak. — Nu, iru kaj voku vian patrinon al mi. Mi havas kelkajn vortojn por ŝi.

Cia flankenmetis sian leteron kaj rapidis plenumi la patran deziron. Krak komencis tien-reen-marŝadon en la ĉambro, ordigis siajn pensojn, kvazaŭ ili estus soldatoj manovrantaj. Verdire li ne bezonis tion, ĉar lia plena suvereniĝo estis fakto, tamen ĉiumomente li timis ĝian perdon. Nu, dudekdujaran kutimon oni ne povas tiel rapide forgesi. Sinjorino Lola jam staris en la ĉambro, sed Krak ŝajnis ne rimarki ŝin. Ankaŭ tio apartenis al la nova taktiko. Nur je la flate fluta voĉo de sia edzino li turnis sin al ŝi.

— Jon, kara, per kio mi povas servi je via utilo?

— Jes, unue, ke vi parolu al mi tute nature. Almenaŭ hejme mi volas ne rememori, ke en la mondo oni uzas deklinian parafrazon por diri: sidiĝu!

Lola profunde ekĝemis por demonstracii pri sia sklavina humilo.

— Kion vi volas?

Krak laŭte ekridis.

— Vidu, Lola, kiel mallonge vi povas esprimi vin!... Nu, venu ĉi tien, eksidu kaj ni babiladu!... Ne faru tian martiran mienon, ĉar finfine esti edzino de ekscelenca moŝto ne signifas martirecon... Ne interrompu!... Kiam vi komencis fastadi por iom rejuniĝi, sincere mi diras, mi timis, ke tio ruinigos vian sanon. Sed nun vidante, ke vi tiel heroe persistas kaj la fastado absolute ne influas vian belecon...

— Ĉu vi volas moki min?

— Moki?! Tute ne! Vi estas tiel bela *kiel antaŭe*... Nu, ĉar vi tiel bone alkutimiĝis jam al

la moderna plibeliga metodo, mi timas, ke subita satiĝo estus fatala por vi.

— Mi ne komprenas vin. Pri kio vi aludas, Jon?

— Tuj mi diros... Kiom da anseroj kaj kokinoj vi aĉetis por la morgaŭa tago?

— Tridek. Sed kiel koncernas tio...

— Ne interrompu! Por la morgaŭa regalo sufiĉos nur tri kokinoj. La infanoj ricevos la femuretojn kaj vi povas kontentiĝi laŭ la kuracista konsilo je la malgrasaj koloj.

Sinjorino Lola mire streĉis la okulojn.

— Ĉu okazis io? Ĉu sinjoro Jackson prokrastigas la edziĝan ceremonion? Ĉu li volas vojaĝi en Amerikon por akompani la urbestron? Aŭ... aŭ... ho granda Dio! ĉu li resendis la fianĉan ringon?

— Unue, ne krii! Due, estu trankvila! Trie, aŭskultu min! Mi mem prokrastas la morgaŭan ceremonion. Mi havas gravan motivon. Dum mia tuta vivo mi klopodis vivi kaj labori tute honeste kaj neniam mi aspiris atingi pli ol la vivo povas doni al tia simpla homo, kia mi estas. Mi fariĝis pli ol mi volis kaj tiu ĉi alteco kaŭzas al mi svenenton. Por teni la pozicion mi devas ĉirkaŭbari min, ligi min per ŝnuregoj al la pinto, ĉar facile mi povus fali en la profundegon pro simpla flankenpaŝeto.

— Mi ne komprenas vin.

— Ne, ĉar vi estas senpacienca por aŭskulti... Neniam ekzistis pli simpla homo ol mi, tion mi ĉiam asertas, sed oni ne volas kredi tion. Oni opinias min geniulo kaj tiu ĉi neekzistanta genienco levis min ĝis tia alteco, kie mi ne havas certan grundon sub la piedoj. Tamen mi sukcesas, vi diras. Longe mi pensadis pri la sekreto de tiuj sukcesoj kaj fine mi trovis la ŝlosilon. Ĝi estas: mia sincereco. En tiu mondo, kien la sorto metis min, la sincereco estas blanka korvo kaj tiat oni pensas min tre ruza, ĉar la sincereco estas tro simpla por la diplomatoj. Sed ne pri tio mi volis paroli. Ĉu vi rememoras pri la vespero de la revolucio?

— Ho, jes! Vi estis grandioza, Jon kara!

— Ne temas pri mi. Temas pri la eskapigo de lia princa moŝto Olivero Karlo. Tiun vesperon vekigis en mi suspekto, kiu konstante kreskis en mi. Vi scias ja, ke mi estas amiko de la geamantoj.

— Ho, jes! Mi eĉ tion scias, ke Lida, la iama ĉambristino de la urbestro, povas danki sian moŝtan edzon al vi... Ne faru tian senkulpan mienon! Antaŭ kelkaj tagoj, kiam Lida ricevis neatenditan heredajon el Ameriko, mi vizitis ilin kaj Stubek mem perfidis vin... Sed mi pardonis al vi, ĉar anstataŭ tiu ŝtupo vi akiris eminentan amerikanon por nia amata filino Lola.

Jonathan Krak iom embarasite tusetadis, prenis la grandan poŝtukon kaj forviŝis la aperintajn ŝvitperlojn.

— Guste temas pri la eminenta amerikano kaj kiel vi povas vidi mi estas en vera embaraso.

— Sed kial? Ĉu li forkuris?

— Ne! Tute ne! Sed aŭskultu do! Tiutempe, kiam mi vidis, ke la kortego simpatias al la geedzigo de Scipo Prikatel kaj la filino de la urbestro mi ne sciis, ke la popolestro estas identa kun lia princa moŝto kaj cerbumadis pri lia savo post la aresto. Al neniu mi menciis mian intencon escepte al sinjoro Jackson. Li tuj proponis sian helpon kaj certigis min, ke permone oni atingas ĉion. Nu, li estas prava, mi pensis kaj dankis lin pro lia grandanimeco. Alvenis la revolucia tago, malkaŝigis la sekreto, ke Scipo Prikatel kaj Olivero Karlo estas sama persono. Lia Reĝa Moŝto portigis la vunditan princon en la kastelon mem kaj malgraŭ la plej severa gardado oni eskapigis lin. Kaj kiel ruze, kiel artifice! En la kancelariejo ĉe la telefono mi pensis pri sinjoro Jackson kaj pri lia promeso. Ho, frostotremigis min la penso, ke la eskapigon ebligis li ne permone, sed persone. Ĉu vi komprenas?

SinJORINO Lola iom paliĝis, kvankam ŝi ne perceptis bone ĉion.

— Nu, eĉ se estus tiel, tio montras, ke sinjoro Jackson estas vere grandanima.

Krak denove forviŝis la ŝviton, denove tusetadis.

— Kara Lola, eble vi estas prava, ke li estas grandanima, sed tiam ankaŭ mi estas prava asertante, ke li estas grandanima ĉarlatano.

Sinjorino Lola salte leviĝis, indignite rifuzis la akuzon kaj preparis sin pledi elokvente por la edzokandidato de sia filino, sed Krak energie interrompis ŝian parolon.

— Ho, malfeliĉulino, ĉu vi ne volas kompreni, ke tiam, se li mem persone akcelis la eskapon, li kun sia amiko estas la lertaj ĉarlatanoj, kiuj sukcesis akiri la kason de la impostejo kaj ili estas tiuj, kiuj ludas la rolon de ĉiu ĉefa funkcianto en nia lando?! Ili aperis en la roloj de generalo Venknejam, kolonelo Nurmipost, lia ekscelenco Vaga Orel de Pord.

— Ĉu vi scias certe tion? — demandis sinjorino Lola kaj ŝia voĉo minace tremis.

— Se certe mi scius, ili estus jam delonge arestitaj. Vi ja konas mian honestecon.

— Jon, vi ĉiam parolas pri honesteco, sed vi forgesas la honton, kiun tia aresto kaŭzus al nia familio kaj rompus vian karieron. Jon, ĝis vi agis prudente mi humiliĝis antaŭ via volo, sed kiam vi volas perdi la prudenton pro simpla suspekto, pro tute nepruvebla konjekto, tiam mi kontraŭstaras.

La vangoj de sinjorino Lola estis fajroruĝaj, ŝiaj okuloj ĵetadis fulmojn. Lia ekscelenco vole nevole rememoris pri la antaŭaj tempoj. Lia koro iom ektremis, sed post momento li abrupte kaptis denove la hejman bridilon.

— Lola kara, bonvolu fermi la buŝon! Vi eĉ ne finaŭskultis min... Jes, jes! Trinku glason da akvo, residiĝu kaj trankvile finaŭskultu!... Jes, tiel!... Nu, tuj post la eskapigo de lia princa moŝto mi vizitis sinjoron Jackson kaj lian amikon. Ili dormis kaj la hotelservistaro certigis min, ke la du amerikanoj

pro timo ne kuraĝis forlasi la ĉambrojn dum la tuta tago. Mi ne kontentiĝis pri ilia aserto, sed mi mem persone volis konstati la fakton. Mi petis la ĉambrokelneron anonci mian viziton al ili. La kelnero senprokraste plenumis mian deziron kaj post du tri minutoj mi estis jam en la dormoĉambro de sinjoro Jackson. Poste ankaŭ sinjoro Smith venis en la ĉambro. Tute senĝene mi pridemandadis ilin. Kompreneble ili indignite rifuzis la supozon kaj mi mem tre embarasiĝis kaj finfine tute konvinkite pri ilia senkulpeco mi forlasis la hotelon.

SinJORINO Lola ekĝemis kiel fajroblovilo de forĝisto.

— Nu, jen, Jon kara, ankaŭ vi mem konvinkiĝis kaj tamen...

— Post semajnoj letero de Elvira perfidis la restadejon de lia princa moŝto kaj mi estis sendita al li por pritrakti la kondiĉojn de eventuala reveno. Nu, verdire, lia princa moŝto ne deziras havi rolon en la gvidado de la lando, kvankam Lia Reĝa Moŝto proponis al li ĉion eblan. Sed ne temas pri tio. Mi faris kelkajn aludojn pri la eskapo kaj pri ĝiaj cirkonstancoj, pri la helpantoj kaj nek lia princa moŝto, nek Elvira mem konas la personojn, kiuj faris tion. Elvira nur tion scias, ke ŝoforo venis al ŝi kaj en la nomo de Lia Reĝa Moŝto petis ŝin peraŭtomobile senprokraste veturi al la palaco. En la aŭtomobilo li trovis lian princan moŝton kuŝanta sur mola brankardo. La ŝoforo fermis la pordeton kaj ekkurigis la aŭtomobilon, kiu haltis fine ĉe la landlimo. Tie ŝi kaj la ŝoforo forlasis la aŭtomobilon kaj venis kelkaj viroj, kiuj portis la vunditon sur la brankardo trans la limon. Tie la ŝoforo subite fariĝis kuracisto kaj prizorgis la princon.

— Ho, kiel romantike!

— Eble jes, sed mi opinias tion bonege preparita eskapo. Ĉio en ordo. Jes en ordo, ĉar dum tiuj okazintaĵoj mi estis vizitanta la du amerikanojn.

— Nu, vidu kaj tamen vi kuraĝas supozi, ke...

— Tute same mi esprimis mian indignon al mi mem kaj mia konscienco tre trankviliĝis. Eĉ mi forgesis pri ĉio, sed sufiĉis momenteto, ke mia suspekto revekigiu. Tiu momenteto estis, kiam la prokuroro de la new-yorka banko alvenis. Tio okazis antaŭ tri tagoj. Nu, sinjoro Jackson kaj la prokuroro renkontiĝis sur la perono. Jen la momento. Ili interparoladis en angla lingvo kaj post minutoj turnis sin al mi la prokuroro kaj iom mirante rimarkis germanlingve: »Vere interese, ke via lingvo kiel forte influas la elparoladon de naskita amerikano. Sinjoro Jackson jam havas la samajn sondiferencojn ĉe la prononcado de la angla lingvo kiel la sinjoro urbestro, kiu faris la salutparoladon al mi. Certe sinjoro Jackson ofte parolas bagone, ĉu ne?« Iom mi embarasiĝis sed poste mi rememoris, ke li ĉiutage lernas longajn horojn la bagonan lingvon kaj ekzercas ĝin en la konversacio kun mia filino Lola. Nu, tion mi tuj deklaris al la sinjoro prokuroro kaj li denove esprimis sian admiron pri la forta influo de la bagona lingvo. Irante al la reĝa kancelario mi pripensis la aferon kaj mia suspekto pli forte ol iam antaŭe revekigis en mi. Aperis antaŭ mi la sceno inter panjo Lida kaj sinjoro Jackson en mia oficejo. Poste la mirakla kaj tute neatendita heredaĵo, kiun la filino de Lida ricevis el Ameriko. Tiel turmentis min la suspekto kaj eventuala malhonorigo de mia familio, ke mi deklaris mian suspekton al Lia Reĝa Moŝto.

— Ho, ci granda azeno! Plej granda el ĉiuj de la mondo!

— Mi ĝojas, ke vian spontanee esprimmanieron ankoraŭ ne sukcesis ekstermi la moderna kuracarto. Tamen vi eraras. Lia Reĝa Moŝto tre atente aŭskultis min, iomete mire rigardis al miaj okuloj, poste li bonvolis rimarki: »Tamen per la eskapigo de mia filo, *se ili* faris tion, ne la plej malbonan servon ili faris al nia lando. Longe mi pripensis tion kaj mi devis

konstati, ke tiu eskapigo simpligis la komplikitan politikan situacion. Mi konsilas al vi, ekscelenta moŝto, ke vi atendu kaj observu!« Mi komprenis la Reĝon. Nun mi atendas kaj observas. Pro tio morgaŭ sufiĉos tri kokinoj por la tagmanĝo. Ĉu vi komprenas min?

Sinjoro Lola tre bone komprenis sian edzon kaj la suspekto jam tiel enradikiĝis en ŝi, ke ŝi estus kondamninta la du amerikanojn eĉ sen ia ajn pruvo, sed ŝi estis antaŭ ĉio persistema pri siaj planoj. La amerikaj milionoj, la riĉega bofilo kvankam subite malaperis en la realo, tamen ŝi ne volis rezigni pri la belaj songoj. Kion fari? Unue ŝi serĉis senkulpigajn motivojn, kiuj beligos la malbelan aferon. Ne, ne ekzistas tiaj motivoj en la socia vivo. Fine ŝi kapitulacis antaŭ la volo de la edzo.

— Jon, vi estas prava. Tuj, kiam tiu fripono transpaŝos la sojlon mi eltordos lian kolon. Tiel trompi honestan knabinon, honestan patrinon! Mi ĵetos lin el la domo rekte al la brakoj de la policano.

— Nek eltordo de kolo, nek ĵeto al la brakoj de policano okazos. Vi estos tiel afabla kiel ĝis nun kaj mi ne rimarkigos mian suspekton. Atendi kaj observi! Atendi por eviti la malhonoriĝon kaj skandalon; observi por havi pruvojn pri la ĉarlatanado. Se ili estas senkulpaj, post semajnoj nia Lola fariĝos sinjorino Jackson. Se ili estas kulpaj, do...

— Tiam mi persone eltordos lian kolon.

— Lasu la kolon de Jackson. Finfine li ne estas kokino. Tiam ni devos indulgi.

— Ĉu indulgi? Sed tia fripono!

— Lia Reĝa Moŝto kaj ankaŭ la urbo certe estos tre kontentaj, se mi povos forigi ilin sen ia ajn skandalo el la urbo. Pardonu neeble, sed indulgi jes, diris Lia Reĝa Moŝto. Nia indulgo havos altan prezon: la senpagan redonon de la Urba Lakt- kaj Fromaĝ-fabrika kun la novaj instalaĵoj. Ignato Eltord fariĝos direktoro de la tuta fabrika.

— Ho, bonege!... Vi estas la plej granda genio de Bagonio!... Sed ve, Lola, nia eta Lola?!

— Ankaŭ ŝi ne fariĝos monaĥino, kvankam unu monaĥino estas tre bezonata en tia granda familio, **kia** estas la nia, por preĝi pro pekoj de la familianoj.

— — — — —

Sur la ornamita tribuno staris Kazimiro Jenlafiŝ. Lia kalva kranio vetbrilis kun la suno. Sian rigardon li paŝtis sur la amaso kaj sur la ornamita tribuno de la alta klaso kaj diplomatoj. La amaso donis la kvanton de la efiko, sed la kvaliton li pensis trovi ĉe la alta klaso kaj pro tio ofte li okulumis al la granda tribuno. Li parolis verve, faris preskaŭ gimnastikan manovron per gestoj kaj movoj kaj la tonon de sia parolado li variis tiel grandskale, ke multaj mezepokaj oratoroj estus enviintaj lin. Li ne ŝparis la bombastojn por laŭdi la meritojn de la karmemora mortinto, kiu pro arda patriota sento eĉ en la malproksima glora lando de la libereco, en Ameriko (kaj ĉi tie li okulumis al la amerikanoj) ne forgesis sian amatan patrujon. Li priskribis la karakteron de Vilhelmo Grauer tiel elokvente, ke la iama vulturhomo staris en la imago de la aŭskultantaro kiel nacia heroo, oferanta sian tutan vivon por progresigi sian adoratan naskiĝurbon Strutmagen. La mortinto fariĝis en lia parolado tre modesta geniulo, en kiu koncentriĝis ĉiuj virtoj de la bagona nacio. Jes, jes, tiel! Ĉar la bagona nacio havas *specialajn* virtojn. Ĝi estas gastamema, bona, heroa kaj honesta. La bagona popolo komprenas kaj deziras la progreson kaj la grandajn filozofojn kaj ĝi povas laŭmerite taksi kaj honori ilin. (Longa kaj provoka okulumado al la amaso.)

Sinjoro Jenlafiŝ subite altigis kaj emociite tremigis la voĉon kaj en la postaj minutoj faris preskaŭ koloraturan kantekezercan.

— Sed ne nur bona patrioto, ne sole granda filozofo, ne nura geniulo estis Vilhelmo Grauer, sed li estis grandanima ankaŭ el kristana vidpunkto, kiun

li volis sentigi al ni per la grandioza monumento, ĵus solene inaŭgurita kaj malkovrita antaŭ niaj okuloj. Kiel ĉiu geniulo, anticipanta la epokon, kiu naskis lin, ankaŭ li estis miskomprenata. Tiu ĉi miskompreno igis lin starigi antaŭ niaj okuloj la simbolon de lia kristana filozofio ; egaleco en la frateco kun la bestoj. Jes, ankaŭ la bestoj estas kreitaĵoj de Dio. Ili estas niaj nematuraj fratoj, pri kiuj la dia suvereno same zorgas kiel pri ni, homoj. La manprenantaj homo kaj besto simbolas tiun kristanan mondpercepton, kiun posedis kaj komentariis aprobe ne unu sanktul-filozofo de la eklezio. — Sinjoro Jenlafiŝ kokete okulumis alla maljuna episkopo de Strutmagen, sed ties rigardo ne esprimis aprobon. La urbestro tuj decidis en si, ke eĉ unu guldon li ne permesos asigni por la dispono de la eklezio el la amerika heredaĵo. — Jes, jes, rigardu, karaj bagonaj gefratoj, tiu ĉi grandioza monumento en la zoologia ĝardeno memorigos vin pri majesta penso, pri nova kulturmovado: *protektu la bestojn!* Ni, bagonoj, povas fieri pri tio, ĉar ni estas la unuaj, kiuj altiĝis al la nobla penso tiamaniere kaj tiagrade, ke artan, elokvente simbolan monumenton ni starigis por la honoro de tiu ĉi nova kulturmovado. Jes, jes! Ni protektu la bestojn, ni agu al ili kiel al niaj malfortaj, nematuraj fratoj, ni traktu ilin kiel niajn fratojn... ni... — En tiu ĉi momento sinjoro Jenlafiŝ perdis la fadenon de sia parolado. Io tre embarasis lin. La malica vento alportis la naztiklantan odoron de la rostataj kvar bovoj. — Ni traktu ilin kiel... kiel... jes... ni traktu ilin laŭ la spirito de nia moderna epoko. (Kia sentakteco! La helpantoj de Hakperman estus povintaj atendi almenaŭ la finon de mia parolado.) Kaj... kaj... jes... estas granda honoro por mi la momento, kiam mi povas meti la orrubandan fojnokronon en la nomo de la Urba Konsilantaro al la piedestalo de la monumento.

Sinjoro Jenlafiŝ dignoplene malsupreniĝis de la tribuno kaj kun riverenca gesto li lokigis la grandan

fojnokronon tiamaniere, ke ĝi kaŝis la surskribon:
EGALECO EN LA FRATECO.

Kiel ĉiam ĉe solenaj okazoj (ekzemple ĉe la unua ŝanĝo de la vindtukoj de novnaskita princo aŭ princino) ankaŭ nun la Urba Orĥestro ektrumpetis la nacian himnon. La ĉapeloj malaperis, la sidantoj levigis, la amaso rigidiĝis kaj el la gorgoj plenpulme ektondris:

La trumpetoj fanfaris:

Land' kaj Reĝ' de Bagoni'

Tradaratatatiiii!

estas gemoj de la Di'

La trumpetoj fendis la orelojn: Tradaratatatiiii!

Kor' lojala de bagon'

al la leĝo, al la tron'

petas benon de Dio

por Bagonio.

La trumpetoj esprimis kontenton: Tritj! Tratj! Trotj!

Ho, kiel solena, kiel kortuŝa momento! La sinkontento ŝveligis la bruston de Kazimiro Jenlafiŝ. Dum la tuta kantado liaj okuloj ŝtele observis la efikon de lia parolado kaj li sentis sian urbestran seĝon iom pli firma ol ĝi estis antaŭ horo.

La himnokantado finiĝis kaj la amaso vivuadis. La amaso ĉiam vivuadas, se ĝi flaras odoron de rostataj bovoj. Nun sekvis demonstraĉia promeno de la Urba Konsilantaro en la zooloĝia ĝardeno. La frake vestitaj grandkapuloj kun cilindro en la mano ekiris inter la kaĝoj. La urbestro gvidis ilin kaj kiel decas dum honorvizitoj li altrudis afablan mienon al sia trimentona vizaĝo. La bestoj ŝajnis neglekti la fratan alproksimiĝon kaj ili tute forgesis montri dankemon por la duoblaj porcioj da furaĝo kaj putrantaj hepatoj, kiujn donacis al ili la grandanimeco de la Urba Konsilantaro dum tiu ĉi tago. Ili ne estis dankemaj, sed tamen dece konduitis, escepte de maljuna paviano, kiu ĝuste en tiu momento, kiam sinjoro Jenlafiŝ bonvolis honori ĝian kaĝon per althoŝta interesiĝo, turnis sian nenomeblan parton al la vizitantoj kaj kun

nehaltigebla fervoro gratadis ĝin. Ho, nur simio povas esti tiel impertinenta! La urbestro tuj formulis dekreton por la protektataj nematuraj fratoj: »Ĉiaspeca gratado dum oficialaj vizitoj estas malpermesita!«

La majesta popolo vivuadis ĉirkaŭ la rostitaj bovoj kaj manĝegis kun enviinda apetito. La buĉisto Hakperman kaj liaj muskolbrakaj helpantoj ĉe ĉiu donacita porcio diris al la regalato: »La sinjoro urbestro deziras je via sano!« Multaj vizitis la zoologian ĝardenon por admiri la grandiozan monumenton kaj por akiri necesan inspiron el la penso, ke la homo estas egala kun la besto en frateco. La groteska ideo fariĝis eĉ simpatia tra la okulvitroj de la urbestra parolado kaj en la publiko troviĝis tuj kelkaj, kiuj entuziasme propagandis la majestan mondpercepton, nobligantan la homaron kaj bestaron. Antaŭ la kaĝoj ne unu staranto rimarkis, ke la observata besto havas homajn trajtojn. La mirindaĵo estis sole, ke neniu rekonis sin mem en la nova kaj nematura frato, sed ĉiu rekonis sian najbaron. Ĉe la longbarbaj kaproj Salamono Almido, la spicvendisto, ekkrie rimarkis: »Kia simileco! La fizionomio de nia najbaro Abrahamo Monenpoŝ absolute estas identa kun tiu de tiu ĉi kapro! Ĉu vi konas lin? Ne!? La fromaĝvendisto apud mia spicvendejo en la strato Tri Ovoj n-ro 7.« Nu, post unu horo Abrahamo Monenpoŝ preskaŭ sammaniere esprimis sian opinion pri la kapro kaj pri Salamono Almido. La diferenco estis nur la numero de la domo, ĉar ankaŭ sinjoro Monenpoŝ estis tiom saĝa, ke li ne faris senpage reklamon al sia konkuranto.

Antaŭ la granda bankuvo de la hipopotamo staradis gapanta amaso kaj rigardis la larĝe malfermiĝantan buŝegon, kiu sinsekve akceptis kaj englutis la grandajn panbulojn. Multaj pensis rekonu en ĝi sinjoron Jenlafiŝ, sed neniu kuraĝis envortigi la penson. Interese, ke vidante la hipopotamon la urbestro pensis pri la popolamaso, sed ankaŭ li prisilentis la penson.

La Urba Konsilantaro donis bankedon al la eksterlandaj gastoj je la honoro de la karmemora mortinto, heroa patrioto, nova filozofo Vilhelmo Grauer kaj ankaŭ en tiu festeno traktis la nematurajn fratojn laŭ »la spirito de la moderna epoko.« La sango de cento da kortbirdoj estis oferita sur la altaro de la frateco. La honorataj gastoj ne preterlasis la toastojn kaj per bombasto-incensoj narkotis sian prudenton. Kazimiro Jenlafiŝ sentis sin levata kaj vidis sian urbestran seĝon glorigata inter nimboj. La unuan fojon vekigis en li sincera dankdeziro kaj tio igis decidi lin : »Morgaŭ mi mendos la portreton de Vilhelmo Grauer je la kosto de la Urba Konsilantaro por la urbdoma konsilejo.«

XXVII.

Fine alvenis la granda tago. La deputitaro de Strutmagen solene atendis la malfermon de la sefo n-ro 135. Sinjoro Kazimiro Jenlafiŝ, iom pala pro la ekscitiĝo kaj iom malgrasa pro la longdaŭra surmara vojaĝo, staris dignoplene kaj atente aŭskultis la vortojn de la bankdirektoro, poste tiujn de la estro de la gardistoj, varbitaj speciale por la defendo kaj konservo de la sefo. Poste tre detale raportis la reprezentanto de la Asekura Societo »Nur Ni Gajnas« kaj sekvis teda kaj parafraza raporto de la prokuroro pri la plenumo de la kondiĉoj, fine la oficialaj personoj kun deca kaj tre konvena digno kondukis la urbestron kaj du bagonajn konsilantojn al la sigelita pordo de la riĉeco.

En la ĉambro regis silento de streĉa atento. La ĵurnalistoj kaj filmoperatoroj atendis la ĝustan momenton por eternigi skribe kaj bilde la sensacian scenon.

— Sinjoro urbestro, bonvolu konvinkiĝi pri la netuŝiteco de la sigeloj, — diris la bankdirektoro.

Kazimiro Jenlafiŝ longe ekzamenis la sigelojn, alvokis siajn samlandanojn, kiuj same konsciencie priesploris la grandajn ruĝajn vaksmakulojn.

— Estimata sinjoro bankdirektoro, ni zorge ekzamenis la sigelojn kaj trovis ilin netuŝitaj, nedifektitaj.

— Estimata sinjoro urbestro, via deklaro ab-

solvos la Asekuran Societon «Nur Ni Gajnas!» pri ĉia respondeco, — diris la reprezentanto kaj transdonis unu ŝlosilon al la urbestro. — Jen la ŝlosilo de la supra seruro !

— Estimata sinjoro urbestro, via deklaro absoluta la bankon pri ĉia plua respondeco, — diris la bankdirektoro. — Bonvolu transpreni la ŝlosilon de la malsupra seruro !

— Estimata sinjoro urbestro, la plenumitaj kondiĉoj, priskribitaj en la testamento de la mortinto, rajtigas min transdoni al vi la sigelitan koverton, kiu entenas la signalvorton de la turnoseruro. Prenu ĝin kaj per tio mia kuratoreco pri la testamento estas finita, — diris la sinjoro prokuroro kaj li retiriĝis.

Sinjoro Jenlafiŝ sentis batadi, tamburi sian koron en la gorgo kaj tre emociite balbutis kelkajn dankesprimojn, poste li kun siaj samlandanoj alpaŝis al la sefo n-ro 135 kaj forigis la sigelojn. En la silento knaris nur la plumoj de ĵurnalistoj kaj la filmaparatoj. La du konsilantoj samtempe metis la ŝlosilojn en la serurojn kaj la urbestro turnadis tien kaj reen la alfabetovan turnseruron laŭ la signalvorto : »*HURA!*«. Kiam la montrilo atingis la krisignon, ankaŭ la ŝlosiloj estis turneblaj en la seruroj kaj la pordeto de la sefo n-ro 135 larĝe malfermiĝis.

Malpleno oscedis al la ekscitite atendantoj. Malpleno, kiu haltigis la korbatojn de Kazimiro Jenlafiŝ, paligis la vizaĝojn de la bravaj bagonaj deputitoj sorĉis momentan konsternitan mienon al la ĉeestantoj kaj post momento ironian rideton al la lipoj de kelkaj maliculoj.

— Oni ŝtelis la heredaĵon — balbutis la urbestro.

— Aŭ oni neniam metis ĝin en la sefon, — rimarkis ofendite la bankdirektoro.

La estro de la bankgardistaro alpaŝis al la malfermita sefo por konvinkiĝi pri la malpleneco, sed

post momento li triumfe elprenis koverton, sigelitan simile kiel estis la sefo mem.

— Jen, letero ! Adresita al la Urba Konsilantaro de urbo Strutmagen. Jen !

Fajrero de nova espero revenis en la koron de la bagona deputitaro. Ho, tiu pedanta kaj zorgema Vilhelmo Grauer certe perletere sciigas la veran kaŝejon de la trezoro. Li, kiel tre prudenta filozofo, ne tre fidis la bankon. La urbestro ŝirmalfermis la koverton, rapide legis kelkajn vortojn kaj poste svene falis en la brakojn de siaj fidelaj samurbanoj. La letero falis el liaj manoj. Unu el la bagonaj deputitoj levis ĝin, legis kelkajn liniojn kaj paliĝis, poste per subita gesto li enpoŝigis la leteron.

— Teruraĵo !... Kiu estus kuraĝinta eĉ supozition !

Unue la prokuroro de la banko kaj la bankdirektoro rekonsciigis. Ili konjektis, ke la deputitaro volas prisilenti la enhavon de la letero, sed pelate de scivolemo ili protestis.

— Estimataj sinjoroj, nia banko estis suspektata antaŭ momentoj, ke el ĝia sefo gardita kaj asekurita oni ŝtelis la heredaĵon. Ni postulas, kiel satisfakcion, la laŭtleĝon de tiu skribaĵo.

La embarasita deputito hezitante rigardis siajn kolegojn. Kion fari ? Subite li rememoris, ke ĝi estas skribita bagonlingve kaj transdonis la leteron al la prokuroro. Tiu rigardis kun sincera ĉagreno la nekompreneblan skribaĵon.

— Ĝi estas bagonlingva. Ni bezonas interpretiston... Kiu el la sinjoroj deputitoj bonvolas entrepreni la fidelan tradukadon ?

En tiu momento eksonis lamente, ploreme la voĉo de Kazimiro Jenlafiŝ.

— Ho, neniam vivis pli malfeliĉa urbestro ol mi... Ve, neniam !

— Ĉu vi deziras interpreti, sinjoro urbestro ? — demandis la prokuroro.

— Kion interpreti ?

— La tekston de la letero.

— Ne, ne, neniam !... Mi preferus morti tuj, sed traduki ĝin — *neniam* ! Vi ne trovos tian bagonon, kiu konsentos traduki ĝin.

— Ĉu ne ? !... Sinjoro urbestro, vi forgesis pri nia oficiala interpretisto, kies devo estas traduki laŭvorte tion, kion ni ordonas. Estas nia intereso ekscii la enhavon de tiu ĉi skribaĵo por savi la prestiĝon de la banko.

Kazimiro Jenlafiŝ dolore ekĝemis kaj kapitulacis al sia sorto. La interpretisto, maljuna kalva bagono, jam antaŭlonge elmigrinta el sia patrujo, nun kiel fidela amerika civitano transprenis la leteron por plenumi sian devon. Lia rigardo trakuris kelkajn liniojn kaj lia mieno montris surprizitecon, konsterniĝon. Verdire, li ne kuraĝis komenci kaj provis senkulpiĝi sin.

— Nur rapide kaj konsciencie — admonis lin la prokuroro.

La maljuna interpretisto eklegis :

»Ĉefblekantoj de la ŝafaro,

kun postmorta grimaco mi salutas vin : Hura ! Via apero estas honora al mi. Vi venis surventriĝi antaŭ la Ora Bovido. Hura al la Ora Bovido ! Sed Ĝi — je via plej granda ĉagreno — malaperis. Hura por la nenio !

Tre bone mi konas kaj konis vin, ĉefblekantoj. Mi antaŭvidis, ke neniel vi permesos aperi ĉi tie la ekzilitojn de via glora socio, kvankam ili same apartenas al la homa komunumo kiel vi, tre altmoŝtaj hipokrituloj. Ho, tre bone mi konas kaj konis vin ! Eble pro tio, ĉar mi memvole forlasis la stalon kaj de malproksime mi rigardis viajn turnodancojn, aŭskultis viajn blekadojn : Hura ! Hura por la nenio !

Mi povas aserti, ke vi estas nepriskribeble amuzaj kaj komike dancantaj mikroboj en la Universo. Vi

nomas vin la Krono de Kreitajoj, sed kiel la sterkborantaj skaraboj, ankaŭ vi vidas nur la kadavron, per kiu vi regas vin. Satiĝi el la kadavro: jen la celo! Hura por la sankta ventro!

Cio, kion vi faras, servas kontentigi la sanktan ventron. La himno de la malplena ventro inspiras vin je malprudentaj agoj, je aŭdacaj pensoj. La satiĝintoj amasigas kaj degradas la Nevideblan al paŝtado de la Ora Bovido; la malsatantoj narkotas la ribeleman ventron per belaj mensogaĵoj kaj tiel vi kune kreas la leĝojn de la spiritualismo kaj materialismo. La protektantoj de la Nevidebla, la kolonoj de la religioj sammaniere kap-al-tere dancadas antaŭ la Ora Bovido, kiel la neantoj de la Mistera Forto Eterna. Ho, vi mikroboj, vi havas propran vizaĝon, propran spiriton! Nur via miopeco povas aserti similecon al la Nevidebla. Kial? Ĉar vi ne estas homoj. Sciu, sur la Tero ne ekzistas Homo. La Teron regas hombestoj.

Ĉefblekantoj, via apero antaŭ tiu ĉi sefo pruvas la pravecon de mia teorio: movo por la movo eĉ sencele, eĉ vane. Hura por la nenio! Mi dankas vin por la rekono de la egaleco inter la bestoj kaj vi. La starigita monumento elokvente parolas. Hura al la Ora Bovido!

Sciu, se nur unu eblecon mi estus povinta supozi, ke vi lasos surventriĝi la ekzilitojn, la senhontemajn hombestojn, la prostituinojn antaŭ la Ora Bovido, certe mi estus ŝetinta ĝin al ili, por ke almenaŭ foje ili povu plensatiĝi el la kadavraĵo de la sterkejo. Ho, sed mi scias kaj mi estas konvinkita, ke tio ne povos okazi! La ĉefblekantoj, pozmajstroj, maskportantaj farizeoj estas pretaj fari ĉion por la sankta ventro kaj tial mi kaŝis for de vi la Idolon.

Mi, la konscia hombesto, la vulturhomo, malestimanta ankaŭ sin mem, nun lastfoje montras al vi moke la langon. Ne embarasu vin la spegulbildo, kiun mi tenis antaŭ viaj miopaj okuloj! Daŭrigu la hurladon, la turnodancon en la stalo kaj bleku plu vian

atak- kaj ĝojkrion : Hura por la nenio ! Ne ekzistas instruoj, kiu povus prudentigi vin, ne ekzistas okulvitroj, tra kiuj vi povus vidi viajn agojn en la nuda realeco. Nemirinde, ĉar vi ne estas homoj, nur sinregalantaj skaraboj sur la sterkejo de la Universo : sur la Tero.

Urba Konsilantaro de Strutmagen, la tuta mondo ridos pri vi. Vi estos la celtabulo de ĉiuj mokoĵoj. Vi fariĝos la simbolo de la malprudenteco, de la avidemo, de la teorio »Ĉion por nenio !« kaj vi servos kiel porĉiama prava fakto, ke mi estis prava : inter la homoj kaj bestoj ne estas esenca diferenco. Ili ambaŭ vivas nur por la sankta ventro. Sed konsolu vin la fakto, ke la ridantoj, la mokantoj, la konsternitaj moralistoj, la senmoralaj akklamantoj ne diferencas de vi. Ĝis la Ora Bovido uzurpas la tronon de la spirita suvereno — la Teron regas nur Hombestoj.

Konsolu vin, ke la Vivo baziĝas sur ridinda reciprokeco : la Nekredemo kreas Kredon kaj la nova kredo batalas kontraŭ pasinta kaj estonta nekredemoj. La »voĉo de satano« fariĝas dia revelacio por la posteularo ĝis la sama nekredemo degrados ĝin »falsa vero«. La vivo de la homaro estas ludo en la sablo de la dezerto Sahara. Per ŝvito kaj salivo ĝi masonas sablofortikaĵojn. Kiam la suno absorbis la lastan kuntenantan sukcon, ili disfalas kaj estas necese konstrui novajn por forgesi la vanecon. Pro kaj por la Mono vi kverelas, luktas, ruzadas unu kontraŭ la alia kaj ĝiskole vi banas vin en la homa sango. La lastaj du homoj en la mezo de la tero-ventro, ĉe la lasta lafo-kaldrono de la malvarmiganta tero kverelos kaj mortigos unu la alian pro la nesolvebla demando : ĉu la Varmo kreis la Fajron aŭ la Fajro kreis la Varmon. Ĉiu el ili ĵuros je sia propra imagita vero. Fi, mi abomenas vin, stultaj ŝafoj !

Kaj nun vi povas ekleki viajn malbenojn ! Via lamentado ne embarasos min en la profundo de la sterkejo. Konstante rikanos al vi kun postmorta grim-

aco la senkarna kranio de tiu, kiu estis la nomportanto de Vilhelmo Grauer... Atestantoj: Jackson, Smith.»

En la ĉambro regis momenta silento. La ĉeestantoj konsternite rigardis unu la alian. Subite eksplodis la indigno, regita de scivolemo. La voĉaoso daŭris nur momenton, ĉar la interpretisto averte levis la manon.

— Sinjoroj, ankoraŭ io!... »*Postskripto: Ne miru, ke vi vane serĉis la atestantojn de mia testamento. Antaŭ mi ili kuniĝis kun la tero. Ili estis du mortkondamnitaj krimuloj, ekzekutitaj en la elektra seĝo de la pundomo Sing Sing. Ilian komplezemon mi rekompencis per po mil dolaroj. La unua havis tri infanojn surstrate vagantajn kaj kadukan virinon, sed li havis skrupulojn pri sia estonteco kaj tial li deziris testamenti la mil dolarojn al paroĥio X. por havi meson ĉiutage por sia animo. La alia deziris prizorgi la posteulojn kaj destinis sian kapitaleton al la bando, kies membro li iam estis, por instali pli modernajn kasborilojn. Ambaŭ komisionojn mi konsciencie plenumis kaj tial vi ŝuldas al ili nenion.»*

La lamenta kaj sakranta bruo de la konsternitoj esprimiĝis en spontaneaj esprimoj. Kazimiro Jenlafiŝ kun senesprima mieno rigardis la fatalan leteron en la manoj de la interpretisto. Ĝi estis lia verdikto, kondamnanta lin je porĉiama ekzilo. Adiaŭ urbestra seĝo! Kion fari nun? La aliaj bagonaj sinjoroj senkonsile rigardis la urbestron, sed post momento unu el ili faris rimarkon, kiu ekirigis la lavangon.

— Kaj ĉion ĉi Bagonio kaj nia popolo povas danki al vi, Kazimiro Jenlafiŝ.

— Ĉu al mi? ... Al mi?!

— Jes, ĉar vi proponis la akcepton de la kondiĉoj — rimarkis alia.

— Kaj kiuj akceptis, kiuj decidis pri tio? Vi, nur vi, ĉar nia lando estas ja konstitucia... Ĉu mi estas absoluta suvereno de la urbo?

— Vi, kiel kapo de la urbo Strutmagen, estas

responda pri ĉio!... Tian honton por nia amata urbo, por nia nacio! — kriis la tria.

— Respondeca estas la malsaĝa kaj malprudenta Urba Konsilantaro, akceptinta la kondiĉojn, — protestis energie Jenlafiŝ.

— Fripono, ci volas elgliti!... Ci estis la kapo de tiu konsilantaro, ci veturigisto! — plenpulme kriis malgrasa deputito timige gestante kaj pugnoskue minacante al la urbestro.

La sceno fariĝis ĉiam pli laŭta, pli akra. La disputantoj kverelis, la ĉeestantoj trankviligis ilin aŭ kaŝe ridetis pri ili, sed la plimulto restis sub la impreso de la letero, ĵus aŭdita kaj ili diversmaniere esprimis sian konsterniĝon. Subite la voĉhaoson superkriis penetra voĉo de grasa, nerve gestanta sinjoro, staranta sur la seĝo.

— Mi, James Morton, la redaktoro kaj posedanto de la plej vigla ĵurnalo »*Ĉiuhora Trumpeto*«, proponas mil dolarojn al la deputitaro por la sola publikrajto de la letero.

La deputitoj ekatentis kaj dum momentoj re-trankviligis. Mil dolaroj! Hm, estas alloga propono. Kion fari? Almenaŭ estus bone savi la ŝnuron de la perdita monsako. Ili perokule pritraktis la proponon.

— Sinjoroj! Sinjoroj!! — Alta maldika viro saltis sur seĝon. — Mi, Herbert Webster, la posedanto de la »*Duonhora Heroldo*« proponas du mil dolarojn! Pripensu!

— Tri mil dolaroj, — kriis plengorĝe James Morton.

La lipoj de la deputitoj malfermiĝis je parolo, kiam Kazimiro Jenlafiŝ neatendite kun granda patoso protestis.

— Bagonaj fratoj, ĉu vi konscias pri la konsekvencoj de tia ago? Tute certe ne! Ne, ne, *vi ne povas konsenti*. Mi ne povas proponi tion al vi, mi ne deziras de vi tian sinoferon! *Mi* prenos sur min la

malbenon kaj ekzilatecon anstataŭ vi. Ne vi, sed mi vendos la publikrajton de la letero.

— Por tri mil dolaroj! Por tri mil dolaroj! — moke kaj indignite retondris la horo de la deputitoj. — Ho, kia grandanimeco! Ci volas fariĝi Judaso de Bagonio por tri mil dolaroj!

— Sinjoroj, ne kverelu pri bagatelaĵo, — leviĝis tria persono el inter la ĵurnalistoj. — La gazeto »*La Horo*« proponas kvar mil dolarojn. Decidu!

— Senhonta konkurado! Ĉu tiel aspektas la kolega solidareco? — kriis Morton kaj Webster al la nova konkuranto.

— Kvin mil dolaroj! — ekscitite proponis Webster. — Jen la ĉeko!

La bagonaj deputitoj, ĉiu en si mem, decidis akcepti la plej altan proponatan sumon. Hejme, certe oni laŭdos ilin, se per tia ago ili povis reakiri iom el la perditaj esperoj kaj antaŭaj elspezoj. Dume la aŭkcia sceno fariĝis ĉiam pli vigla, pli akra. La nervema Webster perpugne minacis la redaktoron de la »*Horo*«, la grasa Morton ŝvitis kaj ĉiumomente elpoŝigis sian dikan monujon, la tria kaj kvara proponanto malamike ĵetadis nereprodukteblajn esprimojn unu al alia. La proponata sumo konstante kreskis kaj iom post iom la rideto de espero ŝteliĝis sur la mienon de la deputitoj.

— Dek mil dolaroj! — kriis Webster.

Momenta silento. Subite leviĝis grizhara sinjoro kaj sen ia ajn emocio turnis sin al la deputitaro.

— Sinjoroj, jen ĉeko pri dudek kvin mil dolaroj! Akceptu ĝin kaj la publikrajto de la letero apartenos al la ĵurnalo »*La Minuto*«. KREDU, ke la subskribo de Tobias Greay valoras *kelkajn* dudek kvin mil dolarojn!

La bagonaj okulparoj renkontiĝis, interkonsiliĝis kaj la bagonaj lipoj samtempe ekmoviĝis.

— Konsentite!

— Sinjoro Tobias Greay, la malbenita letero

apartenas al vi — esprimis pervorte la decidon de la Konsilantaro, Kazimiro Jenlafiŝ kaj etendis sian manon al la letero, tenata de la interpretisto. — Jen, bonv...

La terurkrio de la interpretisto rompis la ĝentilan frazon. La koroj ekstremis, la rigardoj turnis sin al la mortpala viro, kiu kun streĉitaj okuloj gapis al la granda papero.

— Misteraĵo!... Sinjoroj... la skribo... la papero... la... — li balbutis.

— Kio okazis?... Kio pri la skribo? — kriis Kazimiro Jenlafiŝ kaj elŝiris la leteron el la manoj de la interpretisto. — Ve, la papero brunigas... la skribo malaperas!

La deputitoj, sinjoro Tobias Grarey, la prokuroro kaj la bankdirektoro en rapida sinsekvo prenis la leteron, rigardis ĝin.

— Misteraĵo!... Friponaĵo!... Fotopapero!... La papero tute nigriĝas... Ne, ne tute!... Restis helaj makuloj!... Montru, montru al mi!... Al mi! Fotopapero! Ho, tiu fripono!

Kiam la papero denove trafis la manojn de Kazimiro Jenlafiŝ, ĝis tiam la iom pli helaj makuloj jam prenis definitivajn formojn kaj li vidis grimace ridetantan vizaĝon kaj helajn vortojn: *HURA POR NENIO!*

XXVIII.

Post paso de du semajnoj jam la tuta mondo ridis pri Bagonio. La new-yorka Radio per eteraj ondoj dissendis la raporton de la ĵurnaloj tuj post la okazintaĵoj kaj ĉie troviĝis homoj, kiuj diversmaniere komentariis la tutan aferon. Aperis intervjuoj, opinioj kaj longaj disertacioj en ĉiu gazeto de la terglobo. La amerikaj sektoj komunikis profetaĵojn pri tio, ke ĉio formas unu averton al la peka homaro pri la proksimiĝanta mondkataklismo. La kabaredoj prezentis spritajn scenojn pri Strutmagen. La romanverkistoj pretiĝis filmscenariojn por la filmfabrikoj. Fondiĝis kluboj kun la devizo : *Hura por nenio !* Fariĝis modo inter la skeptikema junularo la venena filozofio de la vulturhomo. La kapitalistoj timis la strikon de la rideganta laboristaro, kiu estis tre ema al la neglekto de la laboro mem. La artoj kreis groteskajn simbolojn. Jes, post paso de du semajnoj la tuta tero estis ununura grimace ridetanta vizaĝo. La gigantaj trajtoj de tiu vizaĝego baraktis jen pro ironio, jen pro doloro, jen pro avidemo nevenkebla. La kuracistoj deklaris la mortinton simpla frenezulo ; la mizeruloj kaj prostituinoj aranĝis honoran demonstracian promenon tra la stratoj por lia honoro ; la pastraro predikis pri li, kiel pri la enkorpiĝinta spirito de la Malbono kaj asertis, ke lia animo nun brulas inter teruraj flamoj en la profunda fundo de la infero ; la ateistoj kaj materialistoj libere deklaris lin pioniro de la nihilis-

mo kaj martiro de la pruda kaj mistifikanta teismo ; la dogmuloj ploris, la sendogmuloj ridegis ; ĉio en la mondo kap-al-tere dancadis por kaj kontraŭ la filozofia tezo de Vilhelmo Grauer : *Hura por nenio !*

Kazimiro Jenlafiŝ staris ĉe la balkona fenestro de hotelo en Hamburg. Li ne kuraĝis reveni al sia urbo. La telegramo de lia ekscelenca moŝto Jonathan Krak kaj la ĉiutagaj raportoj de la gazetoj pri la okazintaĵoj en Strutmagen kaj en Bagonio konvinkis lian ardan *patriotan* koron, ke nun estas pli prudente vesti for de la trohejtita kaldrono. Ho, mia amata naskurbo, li pensis, kiom vi suferas nun pro moko de la senkora mondo ! Li vidis antaŭ si la lastajn okazintaĵojn, detale kaj kolorriĉe priskribitajn de la gazetaro. Aperis antaŭ li : la detruo de la monumento, la frakasado de lia propra domo, la vandala eltombigo de la mortinto, la nigraj flagoj sur la tegmentoj, la funebra demonstracio de la patriota partio, renkontanta sur la strato la longan vicon de la mizeruloj kaj prostituinoj, kiuj portas la dispecigitan kadavron de Vilhelmo Grauer en ornamita ĉerko por entombigi ĝin sub la detruita zoologia monumento. Kunpuŝiĝo, batalo, sangverŝo. Krak sur la urbdoma balkono kun ŝvitanta frunto kaj granda naztuko. Apud li la gvidantoj de la nova reĝimo. Longaj oratoraĵoj. La popolo ridas, ridegas, forpuŝas la funebran procesion de patriotoj kaj ekiras al la zoologia ĝardeno ne sole enterigi, sed rekonstrui laŭ sia kaprica maniero la monumenton kun nova surskribo : **HURA POR NENIO !** La nigraj flagoj malaperas kaj multaj ruĝaj pintiĝas al la ĉielo. Militistaro, kanontondro, maŝinpafiloj. La reĝa kastelo en flamoj. Veantaj kaj rifuĝantaj homoj kuradas tien kaj reen en la nokto. Telegramoj, helpvokaj krioj al la najbaraj landoj. La kvartalo de la aristokratoj prirabita kaj detruita. La freneza popolo ridas, ridegas kaj la gvidantoj de la nova reĝimo estas senpovaj kontraŭ ilia frenezeco. Invado de fremdlanda soldataro. Gi marŝas antaŭen sen kontraŭstaro kaj

bridas la furiozon de la amaso, ŝultrofrape kvietigas la kuraĝperdintajn burĝojn. Invado de nova alilanda armeo por subpremi la revolucion. La batalekrio de la mizeruloj formortas sur la lipoj. Nur en Strutmagen kriegas ebriiĝinte la popolo: *Hura por nenio!* Sed ankaŭ tie ne longe. Renkontiĝas la du fremdlandaj armeoj kaj marĉandas unu kun la alia pri la konkerrita lando. Du fremdajn jugojn ili metas sur la bagonan popolon kaj manprenas amike, multpromese kun la rekuraĝiĝinta burĝaro. La eŭropa diplomatio malespere rigardas la okazintaĵojn. Politikaj interesoj kunpuŝiĝas. La Ligo de Nacioj gratas sian altmoŝtan verton en Genève. La grandpotencoj fine decidas kaj nuligas la marĉandon, la kontrakton inter la du konkerrintaj najbaraj landoj. La armeoj retiriĝas kun decaj militaj akiraĵoj en siajn landojn. *Hura por nenio!*

Cio ĉi filmrapide desegniĝis antaŭ la okuloj de Kazimiro Jenlafiŝ kaj denove li ekĝemis.

— Ho, mia amata patrujo! — sed kiel ajn forte li deziris faligi patriotajn larmojn en la ekziliteco, tio ne sukcesis. — Adiaŭ mia amata urbestra seĝo! Kiu uzurpas vin nun? Certe tiu fripona Krak! Tiu genia krimulo! Tiu ruza ŝakalo! Tiu serpento de la Edeno. Ho, neniam mi revidos vin, mia amata seĝo! — Kaj jen la dezirataj larmoj aperis en la okuloj de Kazimiro Jenlafiŝ kaj tra tiu akva vualo li legis la lumreklamon de ia teatro, ĵus ekbrilantan sur la kontraŭa tegmento: »*STRUTMAGEN HEREDAS*« *Sensacia burleskajo de Adolfo Kohn.*

Kazimiro Jenlafiŝ indignite turnis sin for de la fenestro. Liaj grandaj manoj pugnigis. Se tiu malfeliĉa Adolfo Kohn nun hazarde renkontus tiujn pugrojn lia burleskajo fariĝus sanga tragikomedio. Sinjoro Jenlafiŝ rigardis al la horloĝo kaj tuj forgesis ĉion. Estis la sepa. Post kelkaj minutoj alvenos la konsolo. Ho, la sorto tamen ne estas tute senindulga al li. Gi lasis por li la dolĉan rideton de Katalina

Kaptuŝin, kiu nun en iu hamburga kabaredo aŭ orfeono ravas la koron de la artamantaj viroj. Hodiaŭ matene li vidis ŝian reklamafiŝon kaj tuj vizitis tiun teatron. Bedaŭrinde li ne havis bonan ŝancon, ĉar la *dancanta nuda miraklo* jam foriris kaj Kazimiro Jenlafiŝ estis devigata postlasi letereton por la artistino. Li petis rendezuon je la sepa kaj sendube ŝi venos al sia amata »Porĉjo«. Porĉjo estis lia karesnomo, grandanime donacita de la nuda miraklo. Ho, tre delikata esprimo por la vulgara porketo. Li ja tiel similis al la ŝparkasa argilporketo de infano. Kaj la artistino estis tiel ĉarma infano. Ho tiel ĉarma! Kiu povus koleri je ŝi?

Kazimiro Jenlafiŝ atendis do senpacience la minuton, kiam la delikataj manetoj ekfrapetos la pardonon. Li atendis longe kaj vane. Centfoje rigardis sian trimentonan vizaĝon en la spegulo. Ĉu li plaĉos al la ĉarmulino en sia nuna formo? Sen lipharoj li aspektas junulo. Nu, se ne tute junulo, tamen dek jarojn pli juna ol antaŭe. Li zorge kaj skrupule brosis kelkfoje sian frakon kaj parfumis sin. Sed la horloĝosenindulge montris la pason de unu kaj du horoj. Fineli ekdormetis sur la seĝo kaj en lia sonĝo aperis la ridetanta ĉarma Katalina Kaptuŝin. Ho, la sonĝoj estas pli bonkoraj ol la homoj! Sed ŝajne iu malica pigmeo forpelis envie la sopiratan vizaĝon kaj alŝiris ironie ridantan fizionomion. Kie li vidis tiun teruran vizaĝon? Kie? Jes, jes! Sur la papero nigriganta antaŭ liaj okuloj. Jes, tie en la new-yorka banko! La koron de Kazimiro Jenlafiŝ tiel ekteruris la aperaĵo, ke li vekigis.

Iu mallaŭte frapetis sur la pordo. Sinjoro Jenlafiŝ kiel pilko eksaltis, ordigis sian vestaĵon kaj kun larĝa rideto rapidis malfermi la pardonon. La kelnero de la hotelo staris antaŭ li.

— Kion vi deziras? — demandis la eksurbestro tre abrupte.

— Iu sinjoro deziras paroli kun vi. Jen lia

vizitkarto kaj tiu ĉi letero, kiun mi trovis sur la tapiŝo antaŭ via pordo — kaj la kelnero transdonis ilin.

Jenlafiŝ ĵetis rigardon al la vizitkarto kaj la nomo tre surprizis lin. Post momento li ekscitite petis la kelneron, ke la sinjoron senprokraste konduku al li. La kelnero rapide foriris por plenumi la deziron kaj sinjoro Jenlafiŝ atendis ĉe la malfermita pordo.

Post minutoj aperis ĉe la ŝtuparfino Jonathan Krak.

— — — — —
Kazimiro Jenlafiŝ proponis sidlokon al sia amiko. Jonathan Krak aspektis iom pala, iom laca. Verŝajne pro la longa vojaĝo kaj ekscitiĝoj dum la lastaj semajnoj.

— Nu, sincere konfesante mi atendis ne vin, sed vian leteron. Ĉu denove malfeliĉo?

— Tio dependas, el kiu vidpunkto ni rigardas la aferojn. Certe mia edzino sentas sin martirino. Mi mem sentas min plifaciligita. La peza rolo de ŝtata geniulo ne plu ĝenas min. La rango restis, sed la respondeco, dank' al Dio, jam estas for.

— Sed kio okazis? Laŭ la raportoj de la gazetaro la revolucio estas subpremita kaj la lando pro la interveno de la grandpotencoj rericivis sian sendependecon.

— Jes, jes. Laŭvorte veraj faktoj, sed la nova reĝimo bezonas novajn homojn. La ekmoviĝo de la marĉo suprenĵetis novajn homojn. Kiel vi scias, Lia Reĝa Moŝto definitive retiriĝis. Li abdikis por la favoro de la kronprinco. Post kelkaj tagoj estos nova urbestro. La plej grandan ŝancon havas Ignato Eltord, mia bofilo, kiel la gvidanto de la demokrata partio.

— Ĉu li estas demokrato?

— Nu, komence ankaŭ min surprizis la fakto.

— Demokrata urbestro en mia seĝo! Harstarige!

— Ne lamentu! Mi pensas, ke li fariĝos tute

inda al vi kiel posteulo. Absolute mi estas konvinkita pri tio.

— Kaj kio okazis al la du friponoj, al la du amerikaj ĉarlatanoj ?

— Nu, ili ĝustatempe ekflaris la brulodoron de la kuirajo kaj vendis la Lakt-kaj Fromaĝfabrikon al germana entrepreno. Nun verŝajne ĝojos la advokatoj, havantaj bone melkeblan proceson. La amerikanoj, kiel ni fine eksciis, estas du bagonaj friponoj. Jackson estas la patro de la edzino de Stubek.

— Kaj nia polico ? Espereble ĝi sukcese arestis ilin, ĉu ne ?

— Nia polico perbastone batas iliajn postsignojn, dum la ĉarlatanoj bone vivas ie. Verŝajne en Ameriko.

— Nu, kaj via filino Lola, ĉu ŝi havas grandan ĉagrenon ? Kompatinda knabino !

— Kial ? Antaŭ tri tagoj ŝi denove fianĉiniĝis kaj mi esperas, ke lastfoje. Ŝi estos edzino de oficisto en la Lakt-kaj Fromaĝfabriko. Mia alia bofilo, la ĉefnotario de Strutmagen ricevis sian postenon. Cia post unu jaro estos feliĉa edzineto. Mi havas belan pension kiel iama notario kaj ekskonsilanto de la reĝa kortego kaj mi povas vivi por mia malnova revo: pipfumante fosadi en malgranda ĝardeno kaj rigardi la kreskon de la plantaĵoj, aŭskulti la kantadon de la birdoj. Iluzirompa estos sole tio, ke ankaŭ mia edzino vetkantus kun ili. Sed perfekta feliĉo ne ekzistas sur la tero.

— Kaj kie vi volas efektiviĝi tiun modestan planon ?

— Nu, en Bikitato. Mi aĉetis tre malkare la domon de la skulptisto Koŝelev.

— Mi pensis jam, ke vi intencas elmigri al Ameriko. Cetere, kial vi vojaĝis ĉi tien ?

Enigma rideto flirtis ĉirkaŭ la lipoj de Krak kaj por momentoj li ŝajnis esti la malnova geniulŝajna ruzulo.

— Nu, simple, mi volis vin vidi kaj paroli kun

vi antaŭ ol vi forlasos la kontinenton kaj ĝis fino de via vivo banos viajn piedojn en la akvo ĉe la marbordo de insuleto.

La okuloj de Kazimiro Jenlafiŝ streĉiĝis. Li ne tute komprenis, aŭ li ne volis kompreni la vortojn de sia amiko.

— Pri kio vi babilas ĉi tie? Ĉu mi forlasos la kontinenton? Ĉu mi banos la piedojn en la maro?

— Ĉu vi povus fari ion alian? Ne! Kaj mi diras, ke prudente vi agos rememorante kaj akceptante la inviton de via bofilo.

Kazimiro Jenlafiŝ iom ruĝiĝis, poste levante la leteron, ĝis nun ne malfermitan, li ĵetis triumfan rigardon al Krak.

— Nu, tia maljunulo tamen mi ne estas, ke mi fariĝu ermito. Cetere la vido de tiu Cezaro Grauer ĉiam rememorigus min pri lia patro, pri tiu aĉa fripono...

— Mi konsentas. Li estis aĉa fripono, sed ni konfesu, ke ankaŭ ni mem estis aĉaj senprudentuloj. Longe mi pensadis pri la afero kaj mi ne scias kial, sed mi sentas, ke ni meritis tiun mokon. Verdire, se vi bone kaj atente ĉirkaŭrigardas en la mondo, certe vi devos konfesi, ke tiu aĉa fripono estis prava. Nun ĉio estas »hura por la nenio!« Al neniu mi kuraĝas konfesi tion, sed al vi jes. Vilhelmo Grauer estis granda fripono, sed... sed... ĉu ni estis pli moralaj? Ne, ni ne parolu pri tio!

— Vi estas prava! Ni ne parolu pri tio, kio pasis. Neniel li estis prava. Mi tute ne povas senti lian pravecon!

— Tio ne signifas, ke li ne estis prava... Sed kion entenas tiu letero, kiun tiel triumfe vi flirtigas en via mano? Ĉu nova ofico?

— Jes, nova ofico... agrabla ofico... korkaresa konsolo... sed sekreto.

— Ĉu sekreto?

— Jes ! Dolĉa sekreto... Tamen mi povas iom malkaŝi. Baldaŭ mi denove edziĝos.

— Ĉu vere ?... Mi bedaŭras vin. Ne, ne, ne tion mi volis diri ! Mi gratulas. Vere, vi meritas havi *familian ripozon* post tiom da aventuroj.

— Vane vi mokas, amiketo, ĉar mi havos la plej ĉarman, la plej enviindan, mi volis diri eniitan virineton en la mondo... Jen ŝia letero ! Morgaŭ mi estos jam feliĉa fianĉo kaj miajn ĉagrenojn mi dronigos en la amo de purkora junulino.

Krak vole nevole ridetis. La eksurbestron incitis tiu tro intima rideto.

— Kial vi ridetas tiel ironie ? Ĉu mi ne estas ankoraŭ sufiĉe fortika por feliĉigi tiun, kiun mi amas kaj kiu tiel sindone amas min kiel tiu ĉi junulino ?

— Nu, vere mi ne scias. Estas via afero. Mi mem kiel via fidela amiko tre ĝojas, ke vi trovis iun, kiu donos al vi novajn iluziojn. Espereble, vi pli bone, pli zorge elektos vian edzinon ol iam vi elektis vian amikininon. La gramofoneco de edzino ne estas agrabla, sed pli tolerebla ol la flirtemo de certaj virinetoj.

Kazimiro Jenlafiŝ kuntiris la brovojn kaj severtone, ofendite demandis :

— Mi ne komprenas je kiu vi aludas. Se viaj vortoj iamaniere celas al iu tre ŝatata artistino, tiam mi vere bedaŭrus, sed nia amikeco finiĝis.

Sinjoro Krak iom konsternite rigardis al la eksurbestro. Post momento li jam komprenis la situacion. Li komprenis, sed ĝuste pro tio li estis vere konsternita.

— Ĉu ŝi eksedziniĝos pro vi ?

— Kiu ŝi ?

— Nu, ŝi, la tre ŝatata artistino.

— Vi estas freneza, Krak. Ŝi ne havas edzon. Kun neniu ŝi havis eĉ amikan interrilaton krom kun mi.

Krak gratadis signifplene la verdon, tusetadis,

rigardis Kazimiron Jenlafis, kaj li pensis, se tiun trimentonan monstron nun ne trafos la apopleksio, ĝi trafos lin neniam.

— Mi miras, ke vian atenton evitis tiu sciigo en la bagona gazetaro.

— Kia sciigo? Parolu! Ĉu ŝi edziniĝis?... Kun kiu? Kiu kuraĝis tion fari?

— Tiu ministeria konsilanto, kiu jam de kelkaj jaroj enpoŝigis la kvardekcendan diferencon por la eksportpremio de ĉiu kilogramo da butero. La geedziĝa ceremonio okazis tuj post via vizito en la new-yorka banko kaj ili forlasis Bagonion.

Jenlafiŝ kolerruĝe ŝirmalfermis la koverton, prenis la leteron, sed lia legado ne longe daŭris. Nur kelkaj nemiskompreneblaj frazoj, kiuj montris la tre ŝatatan artistinon ne en la plej idealista lumo. Krak iom komplete observis la mienon de la maljuna dando.

— Nu, amiko, vi estas tute prava — konfesis post longa silento Jenlafiŝ. — Neniam ekzistis pli malfeliĉa urbestro ol mi. Mi estas martiro de la urbo, de mia amata patrujo, kaj de mia bona amanta koro. Kion fari? Konsilu!

— Mi jam konsilis al vi bonan piedbanon ĉe bordo de maro.

— Verdire, mi ĉiam taksis alte la talenton de mia bofilo... Eble li konsideros miajn argumentojn kaj iam revenos al Bagonio por transpreni ian oficon. Ĉu vi ne pensas?

— Ne! Tute ne! Li retiriĝis definitive kaj dediĉis sin al studado de medicino por kuraci senpage la malriĉulojn.

— Ho, neplibonigebla li estas. Nu, sed estas lia afero. Mi pripensos vian konsilon kaj... kaj... Sed kion mi faru sur tiu malbenita insulo? Kian oficon ili povas proponi al mi? Vi ja povas kompreni min, ĉu ne? Tia viro, kia mi, laboranta dum sia tuta vivo, ne povas ekzisti sen okupo.

— Nu, okupon vi certe trovos tie. Vi povas fariĝi gardisto de ilia Muzeo.

Jenlafiŝ kun citrondolĉa grimaco akceptis la ŝercan proponon kaj longe longe pensadis, fine lumeto de savideo ekbrilis en liaj malgrandaj okuloj.

— Ne, mi ne iros tien! Mi restos ĉi tie kaj fondos klubon de emigrintaj bagonaj patriotoj... Jes, la ideo estas bonega!... Mi fariĝos prezidanto kaj vartos la patrujeman fajron en la koro de la ekzilitoj, donos esperon al tiuj en Bagonio, kiuj ĝemas sub la demokrata jugo kaj resopiras la pasintan reĝimon. Ĉu ne estas ideala celo? Diru tute malkaŝe!

— Ho, tute certe estas ideale praktika novaĵo. Pli malpli bone oni povas vivi per ĝi... Sed mi konas ion pli praktikan, — rimarkis ŝerceme Krak.

— Kion?

— Sekvi la ekzemplon de Ignato Eltord.

— Kiel vi povas eĉ supozati tian politikan mantelŝanĝon pri mi? — kaj en la voĉo de Jenlafiŝ vibris indigno.

— Mi *ne* proponis, *ne* supozis, nur mi rimarkis, ke mi *konas* pli praktikan solvon. Cetere ni ne parolu pri tiaj vantaĵoj, sed ni amuzu nin iom. Oni diras, ke la burleskaĵo de tiu Adolfo Kohn estas bonega. Ĉu vi ne deziras vidi vin? Oni diras, ke la aktoro brile ludas vian personon. Ankaŭ mi estas scivola pri mi mem. La kritiko tre laŭdas la aktoron. Mi dezirus vidi min mem sur la scenejo kaj iom ridi pri kio tiom multaj ploras inter ni. Nu, tiu Vilhelmo Grauer estis vere sprita fripono kaj ni kolosaj malsaĝuloj.

Kazimiro Jenlafiŝ ne estis persvadebla kaj post duonhoreto Krak adiaŭis de sia amiko por viziti la teatron kaj vidi sin mem en la burleskaĵo »*Strutmagen heredas*«. Kazimiro Jenlafiŝ ankoraŭ longe marŝadis tien kaj reen en la ĉambro ĝis fine li decidis.

— Nu, tiu maljuna Krak, ĉiam estas genia konsilanto. Ne estus la plej malbona posteno fariĝi ambas-

adoro de Bagonio en iu fremda ĉefurbo... Kaj bone pripensite tio certe sukcesos.

Lia ekscelenca moŝto Jonathan Krak bonege amuzis sin en la teatro. Ĉiuj rolantoj ludis bonege kaj li imagis sin por momentoj en Strutmagen. Precipe plaĉis al li la aktoro, kiu figuris lin mem, Genia talento! Eĉ mi mem ne povus pli bone prezenti min mem, li pensis kaj decidis, ke post la dua akto li serĉos la aktoron, vizitos lin en la vestejo kaj varme gratulos al li. Pli elokventa kritiko ne povas ekzisti por la aktoro ol lia gratulo... Kaj Jonathan Krak en la dua interakto ekiris al la scenejo por konatiĝi kun la talenta artisto. La pordisto kun profunda riverenco salutis lin.

— Ho, sinjoro Ludmann, hodiaŭ vi estis denove grandioza.

Krak iom embarasite ridetis.

— Mi ne estas sinjoro Ludmann, sed mi serĉas la grandan artiston por gratuli lin.

La pordisto mire ekstreĉis la okulojn, kvazaŭ li vidus miraklon antaŭ si, poste kapbalance ridetis.

— Sinjoro Ludmann, vi bonvolas ŝerci kun mi.

— Ne, ne, amiko! Ĉu vi ne vidis, ke mi venis de la strato kaj ne de la scenejo... Mi volas konatiĝi kun la artisto.

La pordisto ankoraŭ dubis, sed fine por deca trinkmono akompanis lin al la pordo de la vestejo.

— Jen la vestejo de sinjoro Ernst Ludmann... Sed mi pensas, ke estus bone iom atendi, ĉar kun la verkisto Adolfo Kohn li pritraktas novan scenon en la teatraĵo. Ho, ili estas geniuloj. La reĝisoro estis mem sinjoro Ludmann.

— Nu, bone, mi atendos iomete.

La pordisto foriris kaj Krak komencis kelkpaŝan promenadon antaŭ la pordo. Subite konataj voĉoj trafis liajn orelojn. Li haltis do kaj singarde ĉirkaŭrigardinte li komencis spionadi tra la ŝlosiltruo.

Nu, la spionado ne daŭris longe, ĉar sinjoro Krak forkuris ekscitite por reveni post kelkaj minutoj kun detektivoj kaj policianoj. Ili estis enirontaj, kiam la pordo malfermiĝis kaj Ernst Ludmann en masko de Krak aperis sur la sojlo. Li aperis kaj tuj retiriĝis, rapide ŝlisis la pordon je granda ĉagreno de la eksteraj starantoj. Estis necese rompi la seruron, frakasi la pordon. Dume lia ekscelenca Moŝto ekscitite klarigis jam eble la dekan fojon :

— Ili estas Jackson kaj Smith, la du amerikaj ĉarlatanoj. Ne, ne amerikaj, sed bagonaj friponoj. Joĉjo Gluemman kaj Nik Sekvas. Arestu ilin !

El la interno de la ĉambro eksonis krako de fenestromalfermo.

— Ili volas eskapi ! Kelkaj iru sur la straton !

Komenciĝis longa kurado gvidata de Krak tra stratoj, stratetoj. Fine la policianoj sukcesis atingi kaj kapti la talentan verkiston Adolfo Kohn, alinome Smith, propranome Nik Sekvas. Post kvaronhoro ĉe unu stratangulo Krak ekvidis la rifuĝantan Jackson, sed kia estis lia miro, kiam tiu tute trankvile montris al li kaj ordonis al kelkaj policianoj aresti lin. Vane estis ĉia protesto. La policianoj ankaŭ en Hamburgo kelkfoje similas al tiuj de la bagona fratkorporacio kaj tiel okazis, ke lia ekscelenco pasigis la nokton en malluma karcero inter ŝtelrompisto, apaĉoj kaj iliaj amatinoj.

Matene li sukcesis legitimi sin kaj la bravaj hamburgaj policianoj kun mil pardonpetoj lasis lin libera. Jonathan Krak iom rezigne, sed kun konstanta serena humoro rimarkis :

— Nenio estas tiel dolora por mi kiel tio, ke vi riĉigis la hejman esprimaron de mia edzino. Ĝis la fino de mia vivo ŝi ripetos al mi, ke mi estas frukto de malliberejo.

XXIX.

Estis senstela uragana nokto. Fajrobranĉaj fulmoj zigzagas inter la nuboj kaj la ĉielo orelfende tondris. La maro furioze levis, ŝetadis etaĝaltajn ondojn kaj sieĝis kun persista furiozo la gigantajn cementdigojn de la insuleto »*Esper' de l' Homo.*« Nur inter la longaj moleoj mildiĝis ĝia kolero. En la nova haveneto du ŝipoj ankrite ripozis : unu jakto kaj unu komerca vaporŝipo, antaŭ nelonge rifuĝinta tien. La hele verdkolora lumo de la lumturo, konstruita sur la moleo, cirkulis sur la nigra akvo. Sur la supro de la artefarita cementmonto en arda blanka lumo de reflektoroj staris la monumento de la homa Homo.

En la mezo de la insuleto leviĝis impona konstruaĵo de reflektoroj sur kies bone ŝirmita teraso malgranda societo rigardis la batalon de la elementoj. La rigardo de Koŝelevboriĝis en la nigron de la maro. Scipo Prikatel kaj Elvira brakumante unu la alian kalkulis la turnojn de la cirkulanta verda lumo. Ho, kiomfoje ĝi turniĝas dum kelkaj minutoj?! Tamara sidis sur apogseĝo ĉe kolono kaj per ama rigardo mire karesis la trajtojn de Cezaro Grauer, staranta apud ŝi. Neniam ŝi vidis sian edzon tiel inspirite bela.

Cezaro Grauer parolis kun arde entuziasma animo. Liaj okuloj kroĉiĝis al la blankaj marmoraj figuroj de la monumento kaj esprimis ravitecon.

— ...kaj mi sentas, ke Tamara estas tute prava, kion ajn vi asertas, Juro. Jes, ŝia pura animo,

ŝia korprofunda boneco radias al ni la malproksiman estontecon, la leviĝon, la venkon. En la varmo de ŝia koro ni povas jam rekoni la savantan forton.

— Subŝlimiĝanta mondo estas tio ĉi, kredu min, Cezar — kaj Koŝelev faris nemiskompreneblan geston por esprimi sian pesimismon. — Por ĝi ne ekzistas saviĝo. Prudentperdinta, furiozanta, malsana homaro. Pro senpova kolero ĝi ŝiras, vundas, mortigas sin mem. Similas ĝi al la uragano: detruas kaj nur detruas. Ĝia animo estas kiel la maro: nigra... nigra...

— Rigardu, Juro, kiel alloga, voke, kiel kuragiĝe brilas la esperkolora lumo de nia haveno al la surmare baraktantoj! Kaj rigardu al via propra verko, staranta en blindige blanka lumo, kiel simbolo de la Pureco, spitanta ĉiujn malhelpojn kaj montranta al la supro de suproj: *antaŭen!*... Ĉu vi ne sentas plu la kredon, kiu iam inspiris vin?

— Vaganta kredo, kiel la migranta lumo de la espero mem. Ĝi estas nur mallarĝa lumstrio kaj ĉirkaŭ ĝi regas plena mallumo.

Tamara ridetante kun multe da kompreno kaj fratina indulgo rigardis al sia frato.

— Lasu lin trankvila! Juro denove kreas. Jen lia metodo. Ĉu ne, Juro?... Kio estos la baza ideo de via nova verko?

Koŝelev kun embaraso de surprizitaj infanoj protestis.

— Tamara, vi troigas. Kion novan, kion perfektan mi povus krei? Sur mian animon ekkusis la doloro kaj mi vidas antaŭ mi nur la transtomban grimacon de *unu* mortinto. Ĉu krei? Kial? Ĉu havas sencon fandi ideon en la bronzon, doni koron al la rigida marmoro? Kiu komprenus la korŝiran motivon, la novan, la grandan grimacon, la monumentigitan »Hura por Nenio!«

— Nu, kion mi diris? La krea genio de Juro serĉas humoron kaj koketas al la nigra pesimismo...

Ne riproĉu la artiston, kiam li direktas sin al la profundo, ĉar lia inspirita animo trovas tie valoron kaj poste suprenflugas por montri vojon. Juro, mi komprenas vin. La Vivo estas doloro por vi, ĉar ankaŭ vi ne estas plu tute la homo de la Nuno. La homo de la Hodiaŭo ne sentas la malpuron de la marĉo. Li ja ne estas kulpa pri tio. La al kutimiĝo, la ĉiama rigardo al la polvo, la al kroĉiĝo al la momento faras lin neperceptema, sensenta. La homon de la Hodiaŭo porti al la supro estas tre malfacile, ĉar li svenefalas en la profundon, frakasas sin kaj malbenas la montopinton. Sed ne ĉiuj falas en la profundon. Kelkaj spasme tenas sin sur iu elstaranta roko kaj vole nevole ili devas vidi la vivon en la marĉo. Ili ne atingis la supron, ilian animon tiras, retiras la senfunda marĉo: la pasinteco. Ili havas nek energion, nek kredon atingi la supron kaj tiel naskiĝas la centmiloj da vulturhomoj. Nur la haoso de subŝlimiĝanta mondo povis krei la Vulturhomon. Laŭleĝe, kiel logika sekvaĵo de la haoso, li devis alveni. Lia langomontro, lia terura grimaco estis necesaj por konsciigi la homaron pri tio, kion ĝi jam delonge konjektas: la hodiaŭa vivo estas hura por nenio, aleluja al la Ora Bovido... Jes, Juro estas prava. Ni vivas en neniĝanta mondo, ni estas atestantoj de malaperanta epoko. La uragano de la Vivo furiozas, detruas. Sed malantaŭ la funebro-nuboj ridetas la firmamento kun siaj suno kaj stelaro, la nova suno: *la nova etiko*.

Ĉu vi scias, kial hodiaŭ regas malespero, nigra pesimismo? Ĉu vi konjektas, kial miloj da vulturhomoj furiozante venenas la mondon kaj kial al la nuna generacio mankas la necesa rezistpovo? Ĉar la socio degradis la homon en la Homo. La ido de hundo restas hundo dum sia tuta ekzisto, sed la idon de la Homo oni tuj nomas germano, franco, japano, negro kaj nur poste homo; oni edukas lin katoliko, judo, mahometano kaj nur poste homo; oni distingas lin laboristo, burĝo, aristokrato kaj nur poste

homo. Ĉio antaŭe kaj nur poste homo! Nemirinde, ke sub la terura ŝarĝo de mil balastoj la Homo naniĝas kaj li evidentiĝas nur en suferoj kaj morto. Kiel la mono povas feliĉigi la homon, tiel same la nacio, eklezio, klaso, politiko ne povas savi lin. Nur la Homo povas savi la homon. Nur nova kulto, *la kulto pri la Homo*, povas redoni al la homaro la perditan paradizon. Tutkore mi sopiras la alvenon de la Homo-kulto, ĉar ĝi gvidos nin el la marĉo, plena de kadavroj sociaj, religiaj, politikaj. Tutanime mi deziras kaj vokas la triumfon de la Homo-kulto, ĉar ĝi estos la ponto, kunliganta Teron kaj Ĉielon; ĉar ĝi glatigos la krudajn bulojn de la kontrastaj mondperceptoj de la materialismo kaj spiritualismo. Fortostreĉe, oferante ĉion efemeran, mi klopodas prepari la vojon de la Homo-kulto, ĉar sole ĝi povos sekuri la moralan altiĝon de la novaj generacioj kaj nur ĝi povos krei firman bazon por la plua paca evoluo, harmonion de la animoj kaj nur ĝi havas la venkoforton kontraŭ la demonoj de la malamo, avido, venĝemo, soifantaj je homa sango. Jes, mi amas la Homon, ĉar fariĝi Homo estas la plejmajeste. Mi amas la Homon, ĉar lia nemezurebla intelekto unuigante kun la kreopova amo havos senliman horizonton kaj per tio li faros el la infero de la Hodiaŭo la edenon de la Morgaŭo. Antaŭ mi la Homo, estas sankta, sankta, sankta, ĉar mi kredas pri la homa Boneco, mi konscias pri la majesteco de la Laboro kaj mi perokule vidas la miraklojn de la homa Amo. Unue do la Homo kaj nur poste ĉio alia!

Koŝelev emociigite longe rigardis sian fratinton. Tra la nebulvualo de la rememoroj aperis antaŭ li la vizaĝo de lia martirmorton suferinta patro. Ankaŭ li tiel fanatike amis la homojn kaj tamen... Scipo Prikatel kaj Elvira, ravitaj de tiu interna sankta fajro, kiu radiis el la koro de Tamara al ili, sentis nepriskribeblan altiĝon super la ĉiutagaĵojn. Iliaj okuloj rebililis la saman internan fajron kaj sur iliaj vangoj

ekflamis la plej belaj rozoj : la purpuro de la idealista entuziasmo. Grauer enpense terenfalas antaŭ sia edzino, sentis sin tre signifa, sed la naneco ne vekis en li envion. Ĝi formortis sub la varmkora karesado de ŝia maneto.

— Tamara, Tamara, kore mi deziras al vi, neniam vekigu el via belsonĝa dormo, ĉar tiam via koro estos morte vundita de la vulturoj — rimarkis Koŝelev duonvoĉe kaj kortuŝite.

— Mi ne timas la vulturojn, ĉar mi konas ilin. La vulturo evitas la homon, atakas nur la malfortulojn kaj nutras sin per kadavraĵoj. La veneno de la vulturhomo efikas nur tie, kie la rezistopovo de la Homo mankas kaj liaj monstraj ungoj ĉiam tranĉas nur mortintajn korojn, en kiuj jam delonge mankas la varmo de la amo. Mi ne timas la vulturojn !

— Juro, ĉu vi aŭdas — kriis entuziasme Grauer — ĉu vi sentas, ke Tamara estas la heroldo de pli bela epoko, de estontaj moralo kaj harmonio? Ho, mi kredas la evoluon, la progreson, la grandan leviĝon. Tiu ĉi insuleto en la mezo de la oceano simbole promesas tion. Paro da bestohomoj vivis en tiu kaverno, super kiu ni starigis la gigantan monumenton de la homa Homo. Sur tiu ĉi insuleto longajn jarojn vagadis la Vulturhomo, la konscia hombesto kun venenita intelekto kaj hodiaŭ ĉi tie staras *ni* kun firma kredo pri la alveno de la nova Homo. Jes, ni, la malperfektaj unuaj naskitoj de la malproksima estonteco. Sed ni ne estas solaj. Centmiloj kaj milionoj havas jam la kredon, kiu nutras tiun novan vivon, kiu nun moviĝas en la utero de la haoso. La varmo de la nova suno konsciigos ĝin kaj alvenos, fine naskiĝos la Nova Homo.

— Juro, Scipo, Elvira, ĉu vi aŭdas? Jen mia edzo! Jen mia fratanimi! — kaj Tamara por momento klinis sian kapon al la mano de Cezaro Grauer.

— Via amo savis lin por la vivo ... Ne ĉiam li estis tiel lunatike revema.

— Juro, vi esprimas tre trafe tion, kion mi jam delonge sentas — diris Grauer kaj tiris al sian edzinon. — La amo de ŝia koro savis min por la vivo. Se vi rekonis tiun ĉi veron, tiam vi ne povas plu nei tion, kion ni ambaŭ sentas. La kompreno, la reciproka helpo, la leviĝo super la materialon, la amo havas miraklan forton. Jes, Tamara kaj mi fariĝis samragaj kunbatalantoj, kiujn nedisigeble kunigis la ideo, la nobla batalo por la Homo. Tamara estas la antaŭenĵetita bildo pri la virina tipo de la nova mondo. Kiel ŝi tiel ankaŭ tiu fariĝos egalrajta kunulino, kies pura intelekto radios veran harmonion en la geedzeca vivo. La virino de la estonteco ne bezonos ŝminkitajn vizagojn kaj animon por plaĉi al la viro, ĉar la mensogo, kiel necesa malvirto, ne estos konata en la nova epoko. Ne egoistaj interesoj, ne infanoj kunligos parojn, sed la anima parenceco kaj komuneco de la ideo.

— Ho, vi ĝiskole enamiĝinta! — kaj Koŝelev milde ridetis.

— Juro, kiel mi vidas, Cezaro venkis vin. — Tamara rimarkis. — Viaj pesimistaj argumentoj mildiĝis je unu indulga frazo. Tiel mildiĝos ankaŭ la nuna uragano de la Vivo. Kvankam ĉio, kion diris Cezar', estas nur pala esperlumo de la estonteco, tamen ĝi voke kuraĝigas nin el la fora malproksimo. Rigardu la vagantan lumon de nia turo! Ankaŭ ĝi vokas, promesas kaj nia golfeto donas certan rodon al la rifuĝintoj. Ni estas, jes, ni, centmiloj da ideoj batalantoj la vokanta, promesanta lumo de la espero kaj la harmonio de la estonteco atendas tiun, kiu sekvos nin.

— Kaj vi, Tamara, firme kredas tion? — Koŝelev mire rigardis al sia fratino.

— Mi ne kredas, *sed mi scias tion!* Tiel estos! Tio ĉi estas la leĝo! Turnu vin al la historio, se vi ne kredas miajn vortojn. La religio de la sklavaro ĉiam renversis la putrantan socian ordon. Ĝi enterigis

sub la piramidojn la egiptan kulturon, ĝi detruis la mitologiajn diojn de la grekoj kaj kreis ĉiam novan moralon. La primitiva homo kredis la videblajn diojn, sed kiam la gvindantoj de la popolo mem dubis pri ilia suverena potenco, tiam la homo kredis pri la nevidebla Dio kaj estis vane ĉiu perforto de tiuj, kiuj havis la profiton el la idolkulto. La kredo pri la Nevidebla venkis. La nova moralo triumfe regis miljarojn, sed alvenis la tempo, kiam mem la gvindantoj ne kredas plu la Imagitan kaj tion konjektas la amaso kaj sopiras novan moralon. Jen la kaŭzo de la haoso. La vojo super la haoson estas la malkovro de la naturleĝoj. La Maŝino, kiu hodiaŭ estas malamiko de multmilionoj da malsataj buŝoj kaj obeema sklavo de centmiloj, enterigos la moralon de la hodiaŭo. Jes, la Maŝino kreas novan harmonion, novan moralon kaj liberigos la novan Homon el la katenoj, ĉenantaj lin al la turbulo kaj la nova Homo ne kredos plu, *sed scios la Nevideblan*. La altaroj de la Nova Homo leviĝos sur la ruinoj de niaj tradicioj kaj moralo. Tiel estos, mi scias!

La vangoj de Tamara purpure flamis pro la interna fajro. En ŝiaj okuloj ekbrilis varma kora lumo. Ĉiuj admire rigardis ŝin. Kun profunda emocio Cezaro Grauer premis ŝin al si.

— Jes, tiel estos, mia karulino! Via koro, radiantanta komprenon, sentas kaj antaŭvidas tion.

— Tamara, mia fratino, de kie vi prenis tiun altenflugan filozofion? Kiu aŭ kio inspiris al vi la vortojn? — kaj la voĉo de Koŝelev vibris pro ekscitiĝo, la pesimista lumo malaperis el liaj okuloj.

— De kie? La vido de la milfoje krucumita homa boneco inspiris min. Tiu homa boneco, kiu hodiaŭ preskaŭ senpove baraktas sub la premo de la neracia ekonomia aranĝo de la socio. Sed la Nova Homo liberigos tiun bonecon. Ne la venko de unu aŭ de alia politika partio alportos tiun harmonion de la homa boneco. Ili nur preparas la vojon. La tri-

umfo. apartenas al la Nova Homo. Ni, centmiloj, eble eĉ milionoj, ĉu konscie ĉu nekonscie oferas nian vivon por tiu epoko, en kiu ne vivos plu vulturhomoj kaj la teron regos la nova moralo: *Hura por la Homo! Aleluja al la sciata Nevidebla!* La triumfa revivigo de la Krista moralo estos tiu epoko kaj la ĉiama, nesubpremebla kreosopiro de la Homo kaj lia genio ne plu mueliĝos en bataloj pro ĉiamaj sociaj problemoj, sed ili direktos sin al novaj mondoj por certigi la vivekziston de la Nova Homo, kiun minacas danĝero pro la senprudenta disipado de pasintaj jarmiloj. La Laboro denove estos sankta kaj homa Volo ekiros al la senlimeco por triumfe venki ĉiun distancon. *Hura por la homo!*



F I N I T A L A G R I M A C O .

**KLARIGO DE LA NEOLOGISMOJ,
TROVEBLAJ EN LA VERKO :**

<i>ĉekano</i>	= hakfosilo
<i>disipi</i>	= malŝpari
<i>eskapi</i>	= sukcese rifuĝi
<i>hurio</i>	= feino de mahometa paradizo
<i>kampanio</i>	= sistema agado por cerza celo
<i>langvoro</i>	= korpa aŭ anima malstreĉiĝo
<i>masakri</i>	= amasbuĉi
<i>nana</i>	= nenormale malgranda (ankaŭ morale)
<i>pimpa</i>	= multornamaĵa (kun iom malaproba nuanco)
<i>rekviri</i>	= preni ion por pago, sed ankaŭ sen la konsento de la posedanto (oni diras precipe pri armeo)
<i>sakri</i>	= esprimi indignon aŭ malkonsenton per ne- tute salonmanieraj vortoj
<i>spektatoro</i>	= rigardanto, aŭskultanto
<i>stumbli</i>	= faleti, falpuŝiĝi
<i>svelta</i>	= gracitalia, ĉarme maldika
<i>ŝminki</i>	= ŝmiri vizaĝon per farbo
<i>ŝturmi</i>	= kur-ataki

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

444 1

